



De la Spirito Emmanuel

Paŭlo kaj Stefano

Francisco Cândido Xavier



FRANCISCO CÂNDIDO XAVIER
(MEDIUMO)

Paŭlo kaj Stefano

Historia Romano
dikitita de la Spirito
EMMANUEL



El la portugala lingvo tradukis
L. C. Porto Carreiro Neto
laŭ la 7^a eldono



Eldonfako de Brazila Spiritisma Federacio
DEPARTAMENTO EDITORIAL E GRÁFICO
Rua Souza Valente, 17 – CEP 20941 – 040
Rio de Janeiro, RJ – BRAZIL

Tabelo de la enhavo

Paĝoj

<i>Prezento</i>	7
<i>Antaŭklarigo</i>	13

UNUA PARTO

I. Torturataj koroj.....	17
II. Larmoj kaj turmentoj.....	38
III. En Jerusalemo.....	53
IV. Sur la vojo al Jafo.....	73
V. La predikado de Stefano.....	87
VI. Antaŭ la Sinedrio.....	103
VII. La unuaj persekutoj.....	119
VIII. La morto de Stefano.....	142
XIX. Abigail kristaniĝinta.....	168
X. Sur la vojo al Damasko.....	184

DUA PARTO

I. Direkte al la dezerto.....	201
II. La teksisto.....	226
III. Luktoj kaj humiligoj.....	254
IV. Unuaj apostolaj laboroj.....	304
V. Luktoj por la Evangelio.....	365
VI. Migradoj kaj sinoferoj.....	391
VII. La Epistoloj.....	410
VIII. La martireco en Jerusalemo.....	443
XIX. La malliberulo de la Kristo.....	485
X. Renkonte al la Majstro.....	506

<i>Glosaro</i>	541
----------------------	-----

Prezento

Kun ankoraŭ unu tradukaĵo jen mi enpaŝas en Esperantujojn. Ĝia originalo, en la portugala lingvo (“*Paulo e Estêvão*”), estas diktita de la Spirito Emmanuel, tiu sama aŭtoro de alia verko, kiun mi tradukis sub la titolo “Antaŭ du mil jaroj...”, al la fama brazila mediumo Francisco Cândido Xavier.

La nuna verko havas kiel temon la malfacilajn unuajn tempojn de la Kristanismo kaj estas teksita ĉirkaŭ la centra figuro de Saŭlo el Tarso, poste la apostolo Paŭlo. Ne malpli grava estas la persono de Stefano, viktimo de la spirita blindeco de Saŭlo, sed lia gvidanto kaj amiko el la nevidebla mondo.

Vaste parolante, oni povus diri, ke “Paŭlo kaj Stefano” estas ia disvolvo de la konataj “Agoj de la Apostoloj” rilate tiujn historiajn personojn. Ie kaj ie oni rimarkas kelkan diferencon de la verko, kiu certe kontentigos ĉiujn kristanajn sektojn.

Kiel ĉiuj Mentoroj de la homaro, kiuj volantas diri al ni ion, Emmanuel uzas plurajn lokojn por saĝaj kaj profundaj admonoj kaj sentencoj, kiujn ĉiu devus preni en la koron kiel efektivajn gvidilojn tra la malglataj vojoj de la vivo. Se la “Agoj” estas raporto, “Paŭlo kaj Stefano” estas instruo, kaj instruo ĉiela, leciono eterna, destinita, apud aliaj samspecaj, levi la spiriton al lia glora celo. Ho, se la homo per unu fojo konvinkigŭs pri la diaj veraĵoj kaj flanke lasus tiom

da imagaĵoj, kiuj forpasas kiel ombroj! Ho, kiel malfruas tiu tago de la definitiva regado de la Kristo super la Tero!

Mi uzas ĉi tiun okazon por transskribi artikolon de nia estimata samideano Ismael Gomes Braga pri la medio, publikigitan en la numero de Julio-Aŭgusto 1963, de la bela “Oomoto”, post trarigardo de la verkinto mem:

“FRANCISCO CÂNDIDO XAVIER

“La fama brazila medio, naskita la 2-an de Aprilo 1910 en la urbeto Pedro Leopoldo, Minas Gerais, estas filo de malriĉa laboristo, kiu vivis 90 jarojn kaj mortis la 6-an de Decembro 1960, nomata João Cândido Xavier, kaj de tollavistino nomata Maria João de Deus, mortinta la 29-an de Aprilo 1915, kiam la fileto estis apenaŭ kvinjara. Ambaŭ gepatroj estis malkleraj kaj la patro tro severa. La knabeto multe suferis kiel orfo de patrino en frua aĝo, en hejmoj de malmolkoraj homoj.

“Kiam li estis 9-jara la patro lin dungigis en ŝpinteksejo kiel metilernanto, kie li estis ofte batata same kiel ĉiuj tiamaj metilernantoj. En la mateno ĝis la 11-a horo la knabeto vizitadis elementan popollernejon kaj de la 11-a li laboradis en la fabrikejo de kotonajoj ĝis la 2-a post noktomezo. Li nesufiĉe lernis legi, skribi kaj kalkuli. Kiam li finis la kurseton en la popollernejo, lia baptopatro, José Felizardo Sobrinho, lin prenis kiel vendisthelpanton en sian malgrandan butikon. Post kelka tempo tamen la butikisto trovis pli lertan vendiston por lin helpi kaj eksigis la baptofilon, kiu tiam eklaboris kiel kelnero kaj kuiristo-helpanto en kafejo de iu S-ro Claudovino Rocha. En 1933 la administranto de la tiea modela bieno de la Ministerio de Terkulturo, D-ro Rômulo Joviano, donis al la junulo modestan laboron en la bieno kaj tie li fariĝis modesta oficisto kaj laboris ĝis la 17-a de Januaro 1961, kiam li estis eksigita kiel invalido pro okulmalsano neresanigebla, kaj sekve li fariĝis ŝtata pensiulo, kiel li vivas ĝis nun, duone blinda.

“Lia mediumeco elmontriĝis, kiam li estis kvarjara infano per klarvidado kaj klaraŭdado, ĉar li vidis kaj aŭdis

la Spiritojn, kaj konversaciis kun ili, neniel suspektante, ke ili ne estas normalaj homoj de nia mondo. Tiam la patro supozis lin freneza, ĉar li, laŭ la ŝajno, paroladis kun neniu kaj montradis homojn nevideblajn por aliaj.

“Kiam li estis 17-jara, oni fondis la spiritisman grupeton “Luiz Gonzaga” en Pedro Leopoldo, kaj tiam elvolviĝis tre rapide lia psikografio, t.e. la kapablo skribi spiritajn mesaĝojn. Kiel psikografo li tuj ekskribis rimarkindajn poemojn de famaj mortintaj poetoj, en literatura nivelo kelkfoje pli alta, ol kiel li mem aŭ la grupeto povis kompreni. Kolekto el tiuj poemoj formis la faman libron “Parnaso de Além-Túmulo” (Transtomba Parnaso), eldonita en 1932, kiam la mediuo estis 21-jara malklera junulo.

“Tiu libro kun poemoj de 56 mortintaj poetoj skuis la materialismajn konvinkojn de la literaturistoj tra la tuta lando, ĉar la stilo de ĉiu poeto klare montris lian identecon, kaj ĉiuj sciis, ke en Pedro Leopoldo ne estis biblioteko aŭ kulturaj homoj, kiuj konus la stilon de ĉiuj tiuj poetoj, por imiti tiel perfekte ilian stilon. La libro estis represita sep fojojn en grandaj eldonoj. Ĝi estas 420-paĝa volumo kaj varbis multegon da scivolemaj kleruloj al la studado de Spiritismo.

“Tuj post tiu “Transtomba Parnaso” la mediuo ricevis ankaŭ dikajn historiajn romanojn tre belajn kaj fidelajn. Tiu serio da historiaj romanoj, verkitaj en malklera urbeto per la mano de tia junulo sen ia historia instruo, vekis grandan intereson ĉe kleruloj, kiuj eklernis Spiritismon, penante kompreni tiun misteron. Multaj ĵurnalistoj de grandaj urboj veturis al Pedro Leopoldo, por serĉi la solvon de tia stranga fenomeno.

“Aliaj poetoj per li verkis aliajn librojn, kiuj poste aperis. Li ĝis nun verkas senĉese. Pli ol okdek libroj jam estas ricevataj per li, el kiuj pluraj havis multajn eldonojn. La plej nova estas “Antologia dos Imortais” (Antologio de la Senmortuloj), en kiu 110 poetoj prezentas longajn kaj mallongajn poemojn per Francisco Cândido Xavier kaj alia mediuo, la juna kuracisto D-ro Waldo Vieira, kiu laboras kune kun li en la sama spiritisma societo, en la urbo Uberaba, kie ili ambaŭ nun loĝas.

“Krom libroverkado ili ambaŭ laboras por helpi malriĉulojn kaj malsanulojn. Ili laboras tage kaj nokte en socia helpado al suferantoj kaj jam havas multajn kunlaborantojn por tiuj servoj.

“Ne nur “Antologio de la Senmortuloj” estas verkita per tiuj du medioj; plurajn aliajn librojn ili ricevis en kunlaborado per tio, ke la sama Spirito verkas unu ĉapitron per unu medio kaj alian per la dua, kaj fine oni kunigas la ĉapitrojn kaj konstatas la perfektan unuecon de la verko ne nur pri la stilo, sed ankaŭ pri la enhavo. Neniu leganto povus distingi tion, kion unu medio ricevis aŭ la parton riceviton de la dua. Pluraj tiaj libroj jam estas eldonitaj kaj montras, ke la Aŭtoro estas ĉiam la sama, malgraŭ la malsimileco de la medioj. Aliaj libroj estas en preparado laŭ la sama kunlaborado.

“D-ro Waldo Vieira, la kunlaboranto de F. C. Xavier, naskiĝis la 12-an de Aprilo 1932, tuj post la apero de “Trans-tomba Parnaso”. Li estas kuracisto nur por servi senpage al malriĉuloj; profesie li estas oficisto de Universitato.

“Ili ambaŭ oferas sian tempon kaj sian monon por helpi orfojn, vidvinojn, malriĉulojn, kaj memkompreneble nenium aŭtorrajton ricevas por siaj libroj, kiel ĉiuj medioj en Brazilo.

“Ĉiuj grandaj medioj en la lando laboras tute senpage kaj havas sociajn servojn al malfeliĉuloj. Kelkaj el ili havas orfejojn, kadukulejojn, hospitalojn, lernejojn, por la malriĉuloj, kiuj abundas en la lando.

“La mediumeco de F. C. Xavier rapide aliformigis la pensmanieron de la brazila popolo favore al Spiritismo kaj nun la movado estas tre granda kaj tre servema.

“Ankaŭ Esperanto ricevis grandan helpon per tiuj famaj medioj, ĉar en pluraj libroj kaj poemoj la lernado de nia lingvo estas konsilata al kredantoj. Dank'al tiuj konsiloj la brazilaj spiritistoj vigle laboras por Esperanto kaj la Brazila Spiritisma Federacio eldonas tre bonajn lernolibrojn, el kiuj kelkaj jam havis plurajn eldonojn.”

Fine, kiel ĉiam, mi plej kore dankas tiun nian kleran samideanon, kiu estas la Direktoro de la Departamento de

Esperanto de la Brazila Spiritisma Federacio, por lia netaksebla helpo dum mia tradukado, kiun li akompanis vorto post vorto, pacience kaj, kompreneble, plej kompateme kaj kun mia plena konfido. Dio ĉiam lumigu lian vojon!

2 . 4 . 64

PORTO CARREIRO NETO (*)

(*) **Noto de la Eldonistoj** – Forpasinta la 21-an de Julio 1964, en sia 70-a vivjaro, nia karmemora samideano L. C. Porto Carreiro Neto estis vere eminentulo: Universitata Profesoro, membro de la iama Lingva Komitato kaj poste de la Akademio de Esperanto, iama ĉefdelegito de U.E.A. kaj ĝenerala sekretario de B. E. L.

Prof. G. Waringhien, Prezidanto de la Akademio de Esperanto, komunikis kun granda bedaŭro lian malaperon al la akademianoj kaj sendis kondolencajn leterojn al la familio kaj al B. E. L.

El la nekrologia noto aperinta en la oficiala organo de U.E.A., en Oktobro 1964, ni transskribas:

“Li estis vaste konata pro siaj modelaj tradukoj, precipe de spiritismaj verkoj, el kiuj sep jam estas eldonitaj. Li postlasis manuskriptojn de 530-paĝa romano kaj vortarego portugala-esperanta”.

Li estis ĝisfundulo kaj verkis plurajn gravajn artikolojn pri Esperanto; li refandis la lernolibrojn **“Esperanto sem Mestre”**, de F. V. Lorenz, kaj **“Curso de Esperanto em 20 lições”**, de M. Mendes e C. Fernandes.

En la **“Enciklopedio de Esperanto”**, eldonita en Budapeŝto en 1933/4, ni legas pri la tiam juna esperantisto:

“Porto Carreiro Neto (portu karejru netu), Luiz da Costa, brazilano, d-ro inĝ., docento kaj asistanto ĉe Politeknika Lernejo de Rio de Janeiro. Ĝenerala Sekretario de B.E.L. kaj vicprez. de B.K.E., vicĉefdelegito de U.E.A. Poeto kaj prozverkisto, du trad. romanoj en manuskripto. Kunredaktas kompletan P. E. Vortaron.”

Post tiu artikoleto, li vikle, brile, konstante laboradis por Esperanto dum pli ol 30 jaroj.

Ĉi tiu romano ne estis lia lasta tradukaĵo: Kiam li mortis, li estis tradukanta la verkon **“Kio estas Spiritismo?”**, de Allan Kardec. Per siaj modelaj libroj li restos kun ni kaj instruos la lingvon al la estontaj generacioj de esperantistoj; tial ni ne diras, ke ni perdis kunlaboranton: li neniam estos perdita!

ANTAŬKLARIGO

Ne malmultaj verkoj ekzistas en la mondo rilate la gloran taskon de la apostolo al nacioj. Ni do prave atendus la demandon: – Kial ankoraŭ unu libro pri Paŭlo el Tarso? Ĉu honorado al la granda laboranto por la Evangelio aŭ ĉu pli detalaj informoj pri lia vivo?

Rilate la unuan supozon, ni la unuaj konfesas, ke la damaska konvertito ne bezonas nian senvaloran honoradon; rilate la duan, ni respondas jese, por trafi tiun celon, kiun ni al ni proponas, nome per la eblaj rimedoj registri iom el la tradicioj de la spirita regiono pri la laboroj, konfidentaj al la granda amiko de la nacioj.

Nia esenca celo ne povus esti nur rememori superbelajn okazaĵojn el la apostolaj tempoj, sed antaŭ ĉio prezenti la figuron de tiu fidela kunlaboranto laŭ lia vera mieno de homo regenerita de Jesuo kaj diligenta en la dia servado. Ni klarigas ankaŭ, ke nia intenco ne estas verki ian nuran romanecan biografion. La mondo estas plena de tiuj edukaj notoj, rilatantaj ĝiajn plej eminentajn homojn. Nia plej bona kaj plej sincera deziro estas tio, rememori la streĉajn batalojn kaj la dolorajn atestojn de eksterordinara koro, kiu forlasis la homajn luktojn, por sekvi en senĉesa klopodado la paŝojn de la Majstro.

La hodiaŭaj senfervoriĝintaj eklezioj kaj la falsaj deziroj de la konfesantoj, en la diversaj apartaĵoj de la Kristanismo, pravigas nian intencon.

Ĉie ekzistas inklino al la senfareco de la spirito kaj montroj de malpli granda peno. Multaj disĉiploj strebas al prerogativoj de la ŝtato, aliaj, memvole foriĝinte de la koncerna laboro, petegas la Ĉielon pri ia supernatura protekto. Temploj kaj piuloj plezure sin fordonas al konsentemaj situacioj, preferante materialajn regadon kaj regalojn.

Antaŭ tiu sentimenta bildo estas utile rememori la neforgeseblan figuron de la brava apostolo.

Multaj komentariis la vivon de Paŭlo, sed se ili ne konfesis ĉe li iajn favorititolojn, senmerite asignitajn de la Ĉielo, ili prezentis lin kiel ian fanatikulon kun elsek-iĝinta koro. Laŭ unuj li estis antaŭdestinita sanktulo, antaŭ kiu Jesuo aperis per mekanika procedo de la graco; laŭ aliaj li estis spirito arbitrema, superreganta kaj kruda, inklina kun preskaŭ kruela vantamo bataladi kontraŭ siaj kamaradoj.

Ni ne deziras juĝi tiajn ekstremistojn.

Ni volas rememorigi, ke Paŭlo proksime de Damasko ricevis tiuj sanktan favoron, la gloran vidon je la Mastro, sed ni ne povas forgesi la aserton de Jesuo rilatan al la sufero, kiu pro lia amo atendis la estontan apostolon.

La neforgesebla teksisto certe kunportis sian mision de servado al Dio, sed kiu en la mondon ne venas kun tia devo? Multaj eble diros, ke ili ne scias sian propran taskon, ke tion ili ne konscias, sed ni povos respondi, ke krom senscienco ekzistas ankaŭ malatento kaj multe da malutila kaprico. Tiuj plej postulemaj rimarkigos, ke Paŭlo ricevis rektan alvokon, sed efektive ĉiuj malpli krudaj homoj estas persone vokitaj al la servado al la Kristo. La formoj povas esti malsamaj, sed la esenco de la alvoko estas ĉiam unu sama. La invito al la servado iafoje venas senbrue, neatendite, sed la plej multaj homoj kontraŭstaras al la nobla alvoko de la Sinjoro. Nu, Jesuo ne estas ia perfortulo; se la figuro de Paŭlo multe pli kreskas antaŭ niaj okuloj, tiel estas, ĉar li aŭdis,

abnegaciis sin, pentis, levis sian krucon kaj sekvis la Kriston ĝis la fino de siaj materiaj taskoj. Ĉe persekut-oj, malsanoj, piksercoj, moko, disreviĝoj, defaloj, ŝton-ĵetoj, skurĝadoj kaj enkarcerigoj Paŭlo el Tarso estis ja kuraĝa kaj sincera viro, iranta en la ombro de la mondo renkonte al la Majstro, kiu aŭdiĝis ĉe la krizaj momentoj de lia vivo. Li estis ne nur ia antaŭdestinito, sed pli: li estis efike entreprenema homo kiu ĉiutage laboradis por la lumo.

El sia sfero kun nevelkema lumo la Majstro lin vokas. Paŭlo palpas en la mallumo de la homaj tra-vivaĵoj kaj respondas:

– Kion mi faru, Sinjoro? ()*

Inter li kaj Jesuo oscedis abismo, kiun la apostolo sciis transiri tra jardekoj da konstanta elaĉeta batalado.

Montri tion por la ekzameno de tio, kio nin kon-cernas kiel persona laboro, por iri al Jesuo, jen nia celo.

Alia celo de ĉiu tiu nia senpretenda peno estas kon-fesi, ke nia apostolo ne povus sukcesi, agante sola en la mondo.

Sen Stefano ni ne havus Paŭlon el Tarso. Tiu granda martiro de la Kristanismo komenciĝanta multe pli influis la sperton de Paŭlo, ol kiom oni povus imagi el la solaj konataj tekstoj en la surteraj dokumentoj. Iliaj vivoj estas mirinde bele interplektita. La kunhelpo de Ste-fano kaj de aliaj personoj de ĉi tiu reala historio kon-firmas la neceson kaj la universalecon de la leĝo de kunlaborado. Kaj por konstati la amplekson de ĉi tiu aserto, ni rememoru, ke Jesuo, kies kompatemo kaj povo ĉion entenis, elserĉis al si la kompanion de dek du helpantoj, por efektivi la renovigon de la mondo.

Cetere sen kunlaborado amo ja ne povus ekzisti, kaj amo estas la forto de Dio, kiu tenadas en ekvilibro la Universon.

(*) Vd. en Agoj, 22:10. – *La Trad.*

Jam nun mi vidas la kritikistojn konsultantaj tekstojn kaj komparantaj paragrafojn, por elaperigi la erarojn de ĉi tiu nia senartifika provo. La bonintencajn ni sincere dankas, konfesante nian parolon de erarema estulo kaj dirante, ke ĉi tiu modesta libro estas skribita de unu Spirito por tiuj, kiuj vivas spirite; rilate al la dogma aŭ literatura pedantismo de ĉiuj tempoj ni nin turnas al la Evangelio mem, ripetante, ke, se la litero mortigas, la spirito vivigas.

Donante do ĉi tiun modestan verkon al niaj surteraj fratoj, ni esprimas la deziron, ke la ekzemplo de la Granda Konvertito fariĝu pli klara en niaj koroj, por ke ĉiu disĉiplo povu kompreni, kiom li devas labori kaj suferi pro amo al Jesuo Kristo.

EMMANUEL

Pedro Leopoldo, la 8-na de Julio 1941

UNUA PARTO

I

Torturataj koroj

La mateno sin ornamis per multe da ĝojo kaj per sunlumo, sed la centraj stratoj de Korinto estis preskaŭ dezertaj.

En la aero petoladis la samaj aromaj ventetoj, kiuj blovis de malproksime; tamen oni ne vidis en la pompa mieno de la publikaj promenejoj la rideton de iliaj senzorgaj infanoj, nek la ordinaran movadon de la luksaj portoseĝoj en ilia kutima cirkulado.

Tiu urbo, rekonstruita de Julio Cezaro, estis la plej bela juvelo de la malnova Akajo kaj servis kiel ĉefurbo al la ĉarma provinco. Oni ne povis trovi en ĝia interno la helenan spiriton en ties antikva pureco, des pli, ke, bedaŭrinde forlasita dum cent jaroj, post kiam Mumio ĝin detruis, Korinto estis de la granda imperiestro, kiu restarigis ĝin, ŝanĝita en gravan kolonion de la romanoj, kien venis granda nombro da eks-sklavoj, avidantaj enspezigan laboron, aŭ posedantoj de esperdona riĉeco. Al ĉi tiuj lastaj aliĝis amasa fluo da izraelidoj kaj granda kvanto da alirasaj homoj, kiuj tie kolektiĝis, transformante la urbon en kernon, kien sin direktis ĉiaj aventuristoj el oriento kaj el okcidento. Ĝia kulturo troviĝis tre malproksime de la intelektaj faroj de la plej eminenta greka gusto; sur ĝiaj placoj mikse staris la plej diversaj temploj. Eble dank'al tia malsameco de sentoj Korinto famiĝis pro la tradicioj de libertinismo de la granda plimulto de siaj loĝantoj.

La romanoj tie trovis vastan kampon por siaj pasioj kaj delire sin fordonadis al la venena parfumo de tiu ĝardeno el fremdaj floroj; apud la belegaj aspektoj kaj la lumradiantaj juveloj la marĉejo de la moralaj mizerajoj elspiradis naŭzan odoron. La tragedio ĉiam estis la dolora prezo de la facilaj plezuroj. Iam kaj iam grandaj skandaloj postuladis grandajn punojn.

En tiu jaro 34 la tuta urbo estis turmentata de brutala ribelo de la premataj sklavoj.

Mistere fariĝis nigraj krimoj, kiuj postulis severajn esplorojn. La Prokonsulo, ĉe la graveco de la situacio, ne hezitis; per oficialaj senditoj li petis de Romo la necesajn rimedojn, kaj ĉi tiuj ja ne malfruis: baldaŭ la galero de la superregantaj agloj, pelata de favoraj ventoj, alportis la aŭtoritatulojn de la punmisio, kies agado klarigos la okazaĵojn.

Jen kial, en tiu hela kaj gaja mateno, la loĝejoj kaj komercejoj montriĝis envolvitaj en profunda silento, duonfermitaj kaj malgajaj. La stratirantoj estis malmultaj, krom kelkaj grupoj da soldatoj, kiuj senzorgaj kaj kontentaj preterpasadis la stratangulojn, kvazaŭ volonte sin donante al la ĝuado de la novaĵoj.

Jam antaŭ kelke da tagoj unu roma estro, kies nomo estis ligita kun maltrankviligaj tradicioj, estis akceptita de la Provinca Kortumo, kie li alte oficis kiel delegito de Cezaro, ĉirkaŭita de granda nombro da politikaj kaj militistaj funkciuloj, kaj dissemante terurisman ĉe ĉiuj klasoj per siaj malnoblaj procedoj. Licinio Minucio atingis ŝtatan aŭtoritatecon, uzante ĉiajn rimedojn de intrigo kaj kalumnio. Sukcesinte reveni Korinton, kie li estis antaŭ kelke da jaroj, sen pli alta aŭtoritatecon, li nun ĉion kuraĝe faradis, por pligrandigi sian bonstaton, frukton de nesatigebla kaj senskrupula avareco. Li intencis iam ripozi en tiuj teroj, kie liaj personaj havaĵoj estis grandaj, atendante la nokton de la profundaĝa kadukeco. Tial, por plenumi siajn krimajn planojn, li komencis fari multe da arbitraj eksproprietoj, pretekstante asekuri la publikan ordon por la bono de la potenca imperio, kiun lia aŭtoritateco reprezentis.

Multenonbraj familioj el juda origino estis elektitaj kiel preferataj viktimoj de tiu abomeninda eltrudado.

Ĉie ekploris la prematoj, sed kiu kuraĝus prezenti publikajn kaj oficialajn plendojn? Sklaveco ĉiam atendis ĉiun, iel instigitan al liberiĝo kontraŭ la manifestiĝoj de la roma tiraneco. Ne nur la aĉa figuro de tiu abomeninda oficisto estis ĝena kaj konstanta minaco; liaj kamaradoj troviĝis en pluraj lokoj de la stratoj, estigante netolereblajn scenojn, karakterizajn de senkonscia maliceco.

Estis jam malfrue matene, kiam grandaĝa viro, kompreniganta, ke li sin direktas al la bazaro laŭ la korbo, pendanta de liaj manoj, malrapide trairis sunan vastan placon.

Grupo da milestroj, ironie ridegante, pafis lin per humiligaj mokserĉoj. La maljunulo, kiu laŭ la fizionomiaj trajtoj estis izraelido, vidigis, ke li komprenas la ridindigon, kies celo li estis, sed, foriĝante de la patriciaj militistoj, kvazaŭ dezirante sin gardi, li pli timeme kaj humile ekpaŝis, silente forirante de tie.

En tiu momento unu el la milestroj, en kies aŭtoritata rigardo vidiĝis forta maliceco, alproksimiĝis kaj lin akre demandis:

– He, ĉi malŝatinda judo, kiel do ĉi kuraĝas preterpasi, ne salutante ciajn mastrojn?

La aldemandito haltis, pala kaj tremanta. Liaj okuloj elmontris strangan angoron, kiu esprimis, en sia silenta elokventeco, ĉiujn senfinajn suferojn, kiuj vipadis lian rason. Liaj faltoplenaj manoj iomete tremadis kaj lia brusto respekte kliniĝis, premante la longan grizan barbon.

– Ĉia nomo? – ankoraŭ demandis la oficiro duone malrespekte, duone ironie.

– Johedeb, filo de Jared – li time respondis.

– Kaj kial ĉi ne salutis la imperiajn milestrojn?

– Sinjoro, mi ne kuraĝis! – li preskaŭ en larmoj klarigis.

– Ĉu ĉi ne kuraĝis? – plej akre demandis la oficiro.

Kaj antaŭ ol la aldemandito sukcesis ankoraŭ peti pardonon, la imperiestra delegito ekbatis per la pugnoj la respektindan vizaĝon per sinsekvaj senkompataj survangoj.

– Jen! Jen! – li kruele ekkriadis, ĉe la gaja eksplodo de la ridegoj de la kamaradoj, ĉeestantaj tiun scenon. – Prenu al vi ankoraŭ ĉi tiun memoraĵon! Fava hundo, lernu edukadon kaj dankemon!

La kompatinda maljunulo ŝanceliĝis, sed ne reagis. Oni rimarkis lian internan surdan indignon laŭ la flama rigardo, kiun li kun terura sereneco ĵetis kontraŭ la atakinton. Per spontanea movo li ekrigardis siajn brakojn, ŝrumpintajn en la batalado kaj sufero, kaj konfesis al si la senutilecon de ĉia revenĝo. Tiam la neatendita turmentinto, rimarkinte lian silentan trankvilecon, kvazaŭ mezuris la gradon de sia malnobleco kaj, metante la manojn sur la komplikitan bukon de la zono, denove diris per profunde malŝata tono:

– Nun, kiam ci lernis ĉi tiun lecionon, ci povas iri al la bazaro, ci impertinenta judo!

La viktimo tiam direktis al li rigardon de premanta amareco, tra kiu vidiĝis la doloraj angoroj dum tuta longa ekzistado. Kadrita de la senluksa tuniko kaj de la respektinda maljuneco, aŭreolita de haroj blankiĝintaj en la plej malfacilaj travivaĵoj, la rigardo de la ofendito similis nevideblan ĵetlancon, kiu por ĉiam penetris la konsciencan de la malrespektema kaj malica atakinto. Tamen tiu vundita digno ne longe konservis la sintenadon de riproĉo, neespremebla per vortoj. Post nelonge, sub la pikvortoj de la mokado de ĉiuj tie, li ekiris pluen al la celo, kiu igis lin eliri sur la straton.

La maljuna Johedeb faris nun en sia animo strangajn kaj amarajn konsideradojn. Du varmaj kaj doloraj larmoj fluis en la sulkoj de lia palega vizaĝo kaj forperdiĝis en la grizaj haroj de lia respektinda barbo. Kion li ja faris, por meriti tiajn pezajn punojn? La urbo estis prilaborita per la ribelagadoj de multenombraj sklavo, sed lia malgranda hejmo vivis ankoraŭ en tiu paco de homoj, kiuj laboras kun sindonado kaj obeado al Dio.

La spertita humiligo pelis lin returne al la plej mal-facilaj tempoj de la historio de lia raso. Kiakaŭze kaj ĝis kiam la izraelidoj suferos la persekutadon de la plej potencaj homoj en la mondo? Kia la motivo, kial ili estas ĉiam riproĉataj kiel sendignaj kaj mizeraj estuloj en ĉiuj anguloj de la Tero? Ili tamen sincere amas tiun Patron justan kaj amantan, kiu el la Ĉielo vigle gardas la grandecon de ilia kredo kaj la eternecon de ilia destino. Dum la ceteraj popoloj sin donadis al la malstreĉiĝo de la spirita fortoj, ŝanĝante sanktajn esperojn en esprim-ojn de egoismo kaj idolaneco, Izrael subtenadis la leĝon de la unu sola Dio, en ĉia maniero klopodante, por konservi sendifekta sian religian proprajn, kvankam ofer-ante sian politikan sendependecon.

Frakasita, la kompatinda maljunulo ekmeditis pri sia propra sorto.

Iama sindona edzo, li vidviĝis, kiam tiu sama Licinio Minucio, kvestoro de la Imperio, antaŭ kelke da jaroj starigis abomenindajn procesojn en Korinto, por puni iujn el la loĝantaro nekontenta kaj ribelanta. Lia granda persona riĉeco estis ekstreme malpliigita kaj li devis suferi maljustan enkarcerigon pro malveraj akuzoj, kiuj kaŭzis al li pezajn ĉagrenojn kaj terurajn konfiskojn. Lia edzino ne rezistis al la sinsekvaj batoj, kiuj fatale vundis ŝian senteman koron, kaj mortis, turmentata de akraj ĉagrenoj kaj postlasante al li la du infanojn, kronon de espero de lia laborplena ekzistado. Jeziel kaj Abigail kreskis ĉe la karesado de liaj amaj brakoj, kaj pro ili, inter la multo de la sanktaj hejmaj devoj, li sentis, ke la neĝo de la homa vojo tro frue blankigis al li la har-ojn, dum li dediĉis al Dio siajn plej sanktajn spertojn. Tiam en lian menson venis, pli viva, la gracia figuro de liaj infanoj. Estis ja korfaciligo koni la agrablan guston de la surteraj travivaĵoj por ilia bono. Tiu trezoro, liaj infanoj, kompensis al li la turmentojn ĉe ĉiu neebenaĵo de la vojo. La rememoro de la hejmo, kie la kora amo de liaj infanoj nutris la patrajn esperojn, mildigis liajn afliktojn.

Kio grava estis la brutaleco de la konkerema roma-no, se lian maljunecon aŭreolis la plej puraj korinklinoj?

Sentante rezignacian konsolon, li venis al la bazono, kie li sin provizis per tio, kion li bezonis.

La movado en la ordinara vendejo ne estis intensa kiel kutime en la aliaj tagoj, tamen tie troviĝis kelka nombro da aĉetantoj, precipe eks-sklavoj kaj etbienuloj, venintaj de la vojoj al Kenkrea.

Kiam li apenaŭ aĉetis al si fiŝon kaj legomojn, jen luksa portoseĝo haltis en la centro de la placo kaj el ĝi eliĝis patricia oficiro, kiu ekmalvolvis grandan pergamenan rulaĵon. Ĉe la signalo por silentigo, kiu mutigis ĉiujn voĉojn, la parolo de tiu stranga homo forte ekvibris fi-dele legante la ordonon, kiun li portis:

– “Licinio Minucio, kvestoro de la Imperio kaj delegito de Cezaro, komisiita por fari en ĉi tiu provinco la necesan esploron, por restarigi la ordon en la tuta Akajo, invitas ĉiujn loĝantojn de Korinto, kiuj opinias, ke iliaj personaj interesoj estas vunditaj, aŭ kiuj bezonas leĝan helpon, iri morgaŭ tagmeze al la provinca palaco, apud la templo de Venero Pandemos, por prezenti siajn plendojn kaj postulojn, kiuj estos plene kontentigitaj de la kompetentaj aŭtoritatoj.”

Leginte ĉi tiun avizon, la kuriero reprenis la elegantan veturilon, kiu, portata de fortikaj sklavaj brakoj, malaperis post la plej proksima stratangulo meze en nubo da polvo, kirkle levita de la matena ventego.

Inter la ĉeestantoj tuj naskiĝis opinioj kaj komentarioj.

La plendantoj estis sennombraj. La delegito kaj subuloj tuj ĉe la komenco proprigis al si malgrandajn bienojn de la plimulto el la plej malaltrangaj familioj, kies monrimedoj ne sufuĉis por pagi procesojn en la provincaj tribunaloj. Ondo da esperoj ekposedis la koron de multaj, dum aliaj pesimisme vidis en tiu ordono nur novan insidon, por devigi la plendantojn tre kare pagi siajn pravajn postulojn.

Aŭdinte tiun oficialan komunikadon, Johanedeb tuj alviciĝis al tiuj, kiuj konsideris sin rajtantaj justan kompenson pro la iamaj malprofitoj. Portante la plej bonajn esperojn, li ekiris hejmen, elektante pli longan vojon, por

eviti novan renkonton kin tiuj, kiuj antaŭ nelonge lin brute humiligis.

Post nemulte da paŝoj li renkontis aliajn grupojn da romaj militistoj en brua interparolado, kiu gaje torentadis en la heleco de la mateno.

Antaŭ la nuna aro da milestroj kaj sentante sin celpunkto de humiligaj paroloj, kiuj travidiĝis per mokridoj, la maljuna izraelido konsideris: “– Ĉu mi ilin salutu aŭ preterpasu senparole kaj respekte, kiel mi intencis fari venante?” Penante evitigi al si ankoraŭ batojn, kiuj pliigus la humiligojn en tiu tago, li profunde kliniĝis kvazaŭ mizera sklavo kaj time murmuris:

– Saluton, bravaj milestroj de Cezaro!

Li ĉi tion apenaŭ diris, jen oficiro kun akra kaj senkompata mieno alproksimiĝis kaj kolere ekkriis:

– Kio tio estas? Judo senpune alparolas patriciojn! Ĉu venis ĝis tia ekstremaĵo la kondamninda toleremo de la provincestroj? Ni lin punu mem!

Kaj denove batoj klakis sur la doloranta vizaĝo de la kompatindulo, kiu devis koncentri ĉiujn siajn fortojn, por ne reagi en sia malespero. Sen eĉ unu vorto de pravigo la filo de Jared submetis sin al la kruela puno. Lia koro, febre batanta, kvazaŭ krevis de angoro en la kaduka brusto, kaj la rigardo travidigis la fortan indignon de lia premata animo. Ne povante kunordigi ideojn ĉe la neatendita atako, en sia humila sintenado li rimarkis, ke nun sango elfluas el liaj naztruoĵoj kaj ruĝigas lian blankan barbon kaj la linon de liaj modestaj vestoj. Sed tio ne kortuŝis la atakanton, kiu fine donis la lastan pugnobaton kontraŭ lian faltoplenan vizaĝon, murmurante:

– For, aĉulo!

Pene tenante la korbon, kiu pendis de liaj tremantaj brakoj, Joĥedeb ŝanceliĝe ekiris, sufokante la eksplodon de sia ekstrema malespero. “Ha, esti maljuna!” – li pensis. Sed samtempe la instruoj de la kredo ŝanĝis lian spiritan inklinon, li sentis en la animo la antikvan parolon de la Leĝo: “Ne mortigu.” Tamen la diaj instruoj, per la voĉo de la profetoj, laŭ lia opinio konsilis la revenĝon: “okulo pro okulo, dento pro dento”. La spirito

nutris la intencon de revenĝo kiel rimedon por la kompensoj, pri kiuj li pensis, ke li ilin rajtas; sed la fizikaj fortoj jam ne respondis al la postuloj de la reago.

Profunde humiligita kaj posedita de afliktaj pensoj, li rapidis hejmen, kie li konsiliĝos kun siaj tre karaj infanoj, en kies amo li certe trovos la necesan inspiron.

Lia modesta loĝejo staris ne malproksime, kaj ankoraŭ en kelka distanco li deprimita ekvidis la simplan dometon, el kiu li faris la niĉon de sia amo. Rapide li ekiris la vojeton, kiu finiĝis ĉe la kruda kradpordo, dronanta meze en la rozarbetoj de Abigaill, elspirantaj fortan kaj agrablegan parfumon. La verdaj branĉriĉaj arboj dissemis malvarmeton kaj ombron, kiuj mildigis la ardecon de la suno. Hela kaj amika voĉo de malproksime venis al liaj oreloj. La patra koro divenis. En tiu tempo de la tago Jeziel, laŭ la programo, kiun li mem starigis al si, plugadis la grundon, preparante ĝin por la unuaj semoj. La voĉo de lia filo kvazaŭ harmoniis kun la gajeco de la suno. La malnova hebrea kanzono, kiu sonis el tiuj varmaj lipoj de junulo, estis ia himno de laŭdo al la laboro kaj al la Naturo. La harmoniaj versoj parolis pri la amo al la tero kaj pri la konstanta protekto de Dio. La grandanima patro apenaŭ retenis la larmojn de la koro. La popola melodio inspiris al li tutan mondon da pripensoj. Ĉu li ja ne laboris sian tutan ekzistadon? Ĉu li ne opinias sin homo honesta ĉe la plej sen signifaj agoj de la vivo, por neniam perdi la titolon de justulo? Tamen la sango de la kruela persekuto jen gutadis el lia respektinda barbo sur la tunikon blankan, sen ia makulo, kiu povus turmenti lian konsciencon.

Li ankoraŭ ne transiris la krudan kradpordon de la modesta domo, kiam karesa voĉo ekkriis al li, forte kaj timplene:

– Patro! Patro! Vi sangas!

Rimarkinde bela junulino ekkuris al li, por lin plej kore brakumi, samtempe prenante la korbon el liaj tremantaj kaj dolorantaj manoj.

Abigail, en la pureco de siaj dek ok jaroj, estis gracia bildo de ĉiuj ĉarmaĵoj de la virinoj de ŝia raso. Ŝiaj silkecaj haroj pendis per kapricaj bukloj sur la ŝultroj,

kadrante ŝian allogan vizaĝon en harmonian tutaĵon el simpatio kaj beleco; sed kio plej forte impresis en ŝia svelta figuro de virino iom knabino, iom junulino, tio estis ŝiaj profunde nigraj okuloj, en kiuj intensa vibrado ŝajnis paroli pri la plej altaj misteroj de la amo kaj de la vivo.

– Filineto, mia kara filino! – li murmuris, apogante sin sur ŝiajn karesajn brakojn.

Li baldaŭ rakontis ĉiujn okazaĵojn; kaj dum la maljuna patro banis sian kontuzitan vizaĝon en la balzama infuzajo, kiun lia filino zorge preparis, Jeziel estis vokita, por ekscii la okazintaĵon.

La junulo rapide venis. Enbrakiĝinte kun sia patro, li aŭdis ties amaran korelverŝon, vorto laŭ vorto. En la tuta vigleco de la junaĝo li ne ŝajnis pli ol dudekkvinjara, sed la mezurateco de liaj gestoj kaj la seriozeco, kun kiu li parolis, vidigis en lin spiriton noblan, konsidereman kaj plej konscienceman.

– Kuraĝon, patro! – li, aŭdinte la doloran raporton, ekkriis per firma, sed ankaŭ iom karesa tono. – Nia Dio estas Dio de justeco kaj saĝo. Ni fidu Lian protekton!

Johedeb ekrigardis sian filon de la kapo ĝis la piedoj kaj fiksas siajn okulojn sur liaj, mildaj kaj kvietaj, kie, regata de la deziro revenĝi, li deziris en tiu momento vidi la indignon, kiu ŝajnis al li komprenebla kaj justa. Estas vero, ke li edukis Jezielon por la puraj ĝojoj de la devo, por la lojala plenumo de la leĝo; tamen nenio instigis lin forlasi sian penson pri revenĝo en tia maniero, ke li senmakuligus sian honoron je la ricevitaj ofendoj.

– Filo – longe meditinte, li konsideris –, la Eternulo estas ja justa, sed ankaŭ la idoj de Izrael, kiel elektitioj, devas fari juston. Ĉu ni ja povus esti justaj ignorante ofendojn? Mi ne povos ripozi, ĝis ripozos la konscienco ĉe la plenumita devo. Mi devas elmontri la erarojn, kiuj min vundis en la nuna kaj en la pasinta tempoj, kaj morgaŭ mi iros al la delegito reguligi miajn kontojn.

La juna hebreo faris mirgeston kaj rediris:

– Ĉu vi do iros al la kvestoro Licinio, esperante leĝajn disponojn? Kaj la antaŭaj faktoj, patro? Ĉu ja ne tiu sama patricio senigis vin je granda bieno kaj vin enkarcerigis? Ĉu vi ne vidas, ke li havas sub la mano la fortojn de maljusteco? Ĉu ne timindaj estas novaj atakoj, por elpreni la malmulton al ni restantan?

Joĥedeb fikse ekrigardis la okulojn de sia filo, kiujn ties kornobleco malsekigis per emociaj larmoj, sed, laŭ la regideco de sia karaktero, kutimante elplenumi siajn planojn, li iom seke respondis:

– Kiel vi scias, mi devas reĝustigi malnovajn kaj novajn kontojn, kaj morgaŭ, laŭ la ordono, mi uzos la okazon, kiun la provinca registaro havigas la mi.

– Mia patro, mi vin petegas – admonis la junulo duone respektate, duone karese –, ne uzu tiujn rimedojn!

– Kaj la persekutoj? – eksplodis la maljunulo – Kaj tiu senĉesa ventego da fiaĵoj ĉirkaŭ la niarasaj homoj? Ĉu ne fariĝos fino al tiu vojo de plej doloraj afliktoj? Ĉu ni senfare ĉeestu la malpurigon de ĉio, kion plej sanktan ni havas? Mia koro ribelas kontraŭ tiuj abomenindaj krimoj, kiuj nin senpune trafas...

Lia voĉo fariĝis trenata kaj melankolia, travidigante ekstreman senkuraĝiĝon; tamen, ne konfuziĝante ĉe la patraj kontraŭparoloj, Jeziel diris plue:

– Tiuj turmentoj ja ne estas io nova; antaŭ multe da jarcentoj la faraonoj tiel ekstremigis sian kruelecon kontraŭ niaj prauloj, ke la niarasaj knabetoj estis ekstermataj, tuj naskiĝinte. Antioko Epifanio, en Sirio, ordonis senkapigi virinojn kaj infanojn en la sino mem de niaj hejmoj. En Romo, iam kaj iam, ĉiuj zraelidoj suferas humiligojn kaj konfiskojn, persekutadon kaj morton. Sed certe, patro, Dio permesis tion, por ke Izrael rekonu, en la plej akraj suferoj, sian dian mision.

La maljuna izraelido ŝajnis mediti pri la konsideroj de sia filo, sed per decida tono rediris:

– Jes, ĉio ĉi estas vera, tamen la ĝusta justo devas ja esti plenumita litere, kaj nenio povos forkonvinki min de tio.

– Vi do morgaŭ metos vian plendon ĉe la delegito?

– Jes!

En tiu momento la rigardo de la junulo longe fiksas la malnovan tablon, kie kuŝis la Sankta Skribo de la familio. Tuŝite de subita inspiro, Jeziel humile parolis:

– Patro, mi ne rajtas admoni vin, tamen ni vidu, kion sugestas la parolo de Dio pri tio, kion vi nun pensas.

Kaj hazarde malfermante la skribaĵon, laŭ la tiutempa kutimo, por ekscii la inspiron el la sanktaj tekstoj, li legis el la “Sentencoj”:

– “La instruon de la Eternulo, ho mia filo, ne malŝatu, kaj ne deturnu vin, kiam Li faras al vi punon; ĉar kiun la Eternulo amas, tiun Li punkorektas, kiel patro la filon, en kiu li havas plezuron” (*).

La maljuna izraelido malfermegis la okulojn, vidigante la miregon, kiun kaŭzis al li la nereakta parolo, kaj ĉar Jeziel longe fiksas sur li sian rigardon, elmontrante premantan intereson ekkoni lian animan teniĝon ĉe la inspiro de la sanktaj dokumentoj, li tial akcente diris:

– Mi ricevis la admonon de la Skribo, mia filo, tamen mi ne rezignacias ĉe la maljusteco kaj, kiel mi decidis, mi prezentos mian plendon al la koncernaj aŭtoritatoj.

La junulo eksopiris kaj per rezignacia tono rediris:

– Dio nin protektu!

.....

En la sekvanta tago densa popolamaso staris apud la templo de la populara Venuso. El la malnova domo, kie funkciis improvizita tribunalo, estis vidataj la luksaj kaj ekstravagancaj veturiloj, trairantaj la placon en ĉiuj direktoj. Tio estis patricioj, kiuj sin direktis al la aŭdiencoj ĉe la provinca Kortumo, aŭ iamaj posedantoj de la privata riĉeco de Korinto, kiuj sin fordonis al la amuzoj de la tago je la kosto de la ŝvito de la

(*) Sentencoj de Salomono, 3:11–12. – *Noto de la Aŭtoro.*

mizeregaj sklavoĵoj. Eksterkutima movado montriĝis en tiu loko, kaj de tempo al tempo ebraj oficiroj forlasadis la malvirtan templon de la ĉarma diino, plenplenan de kapturnaj parfumoj kaj kondamnindaj plezuroj.

Johedeb trairis la placon, ne haltinte por atenti ian detalon de la homamaso, lin ĉirkaŭanta, kaj penetris en la tribunalon, kie Licinio Minucio, kune kun multe da helpantoj kaj soldatoj, ekspedis multenombrajn ordonojn.

Tiuj, kiuj kuraĝis meti publikan plendon, apenaŭ nombris pli ol centon kaj, farinte individuajn deklarojn, sub la agleca rigardo de la delegito, estis unuope konduk-taj al la aparta solvo de ilia persona afero.

Kiam venis lia vico, la maljuna izraelido elvolvis siajn personajn plendojn, rilatajn al la pasintatempaj kontraŭleĝaj eksproprietoj kaj al la insultoj, kies viktimo li hieraŭ estis, dum la malhumila patricio, de sia alte staranta seĝo, notis liajn eĉ plej etajn vortojn kaj teniĝojn, kvazaŭ de longe li konis tiun homon. Forlasinte la juĝistan ĉambron, Johedeb, kiel la ceteraj, ekatendis la solvon de siaj kompenspetoj al la Justico; sed dum aliaj iom post iom estis nome vokataj por la reguligo de siaj kontoj ĉe la imperia registaro, li rimarkis, ke la malnova domego involviĝas en silenton kaj ke lia vico kredeble estis prokrastita pro kaŭzoj, kiujn supozis li ne povis.

Insiste invitate per la nomo sin direkti al la juĝisto, li aŭdis, forte surprizite, la nean verdikton, legatan de oficiro en rolo de sekretario de tiu jurisdikcio:

– La imperia delegiro, en la nome de Cezaro, decidis konfiski la supozitan bienon de Johedeb ben Jared, kaj donas al li tri tagojn, por malokupi la terojn, kiujn tiu kontraŭleĝe okupas, ĉar ili sur leĝa bazo apartenas al la kvestoro Licinio Minucio, kiu povas en ĉiu tempo pruvi siajn proprietorajton.

La neatendita decido kaŭzis fortan afekcion al la maljuna izraelido, sur kies sentemon tiuj vortoj efikis kiel mortbato. Li tute ne sciis difini la sufokantan surprizon. Ĉu li ne fidis la Justicon kaj ne serĉis ĝian reĝustigan agadon? Li volis elkrii sian malamon, eldiri siajn korŝirajn seniluziigojn, sed lia lango kvazaŭ ŝton-

iĝis en la kuntiriĝinta kaj tremanta buŝo. Post minuto da profunda korpremateco li fikse rigardis la alte sidantan figuron de la patricio, kiu nun lin finruinigis, kaj envolvante lin en la koleran vibron de sia indignanta kaj suferanta animo, li ankoraŭ ekhavis fortojn por diri:

– Ho plej nobla kvestoro, kio fariĝis la justeco de viaj verdiktoj? Mi venis ĉi tien, por peti la helpon de la juĝistoj, kaj vi reciprokas mian konfidon per ankoraŭ unu uzurpo, kiu disneniigos mian ekzistadon? Antaŭ kelka tempo mi suferis la senkaŭzan eksproprietigon de ĉiuj miaj terposedaĵoj kaj plej malfacile konservis nur la bieneton, kie mi intencas atendi la morton! Ĉu estas kredible, ke vi, posedanto de riĉaj bienoj, ne sentas riproĉon de la konscienco, forprenante de mizera maljunulo lian lastan ereton da pano?

La fiera romano, sen ia gesto, kiu montrus la plej malgrandan emocion, seke rediris:

– For de tie ĉi, kaj neniu diskutu la imperiajn decidojn!

– Ne diskuti? – ekkriis Johedeb jam senkonscia.
– Ĉu mi ne povas do laŭtigi mian voĉon, malbenante la memoron pri la krimaj romanoj, kiuj min senplumigis? Kien vi metos viajn manojn, makulitajn de la sango de viaj viktimoj kaj de la larmoj de la senposedigitaj vidvinoj kaj orfoj, kiam sonos la horo de la juĝado en la tribunalo de Dio?

Sed subite rememorante sian hejmon, plenan de la karesoj de la amantaj infanoj, li ŝanĝis sian mensan teniĝon, tuŝita ĉe la profundaj fibroj de la animo. En konvulsia ploro falante sur la genuojn, li emocie ekkriis:

– Kompatu min, via nobla moŝto! Esceptu mian modestan domon, kie antaŭ ĉio mi estas patro... Miaj infanoj atendas min kun la kiso de sia sincera kaj sindona amo!

Kaj kun larmoj li aldonis:

– Mi havas du infanojn, kiuj estas du espero de mia koro. Indulgu min, pro Dio! Mi promesas, ke mi alkonformiĝos al tiu malmulto kaj neniam plu mi plendos pri io!

Sed la senkompata delegito malvarme rediris, turnante sin al soldato:

– Spartako, por ke ĉi tiu impertinenta judo foriĝu el ĉi tiu ĉambro kun siaj lamentoj, dek vergojn.

La subulo pretiĝis, por tuj plenumi ĉi tiun ordonon, sed la nepardonema juĝisto aldiris:

– Zorgu, ke vi ne tranĉu lian nazon, por ke la sango ne skandalu la stratirantojn.

Surgenue la kompatinda Johedeb suferis la punon; poste li stariĝis ŝanceliĝante kaj atingis la sunbanatan placon ĉe la mokoĵ de ĉiuj, kiuj ĉeestis la fian spektaklon. Neniam, dum lia vivo, li spertis tian grandan malesperon, kiel en tiuj momentoj. Li volis plori, sed liaj okuloj estis malvarmaj kaj sekaj, lamenti pri sia grandega malfeliĉo, sed la lipoj estis ŝtoniĝintaj de indigno kaj doloro. Li ŝajnis ia somnambulo, senkonscie vaganta inter la veturiloj kaj la irantoj, kiuj plenigis la vastegan placon. Kun ekstrema interna abomeno li ekrigardis la templon de Venero. Li deziris havi tondran voĉon, por humiligi ĉiujn tiujn homojn per kondamna parolo. Observante la kronitajn diboĉistinojn, kiuj lin renkontis, la armaĵojn de la romaj milestroj kaj la senfaran aspekton de la feliĉuloj, kiuj senatente preterpasadis lian turmenton mole sidantaj en la tiamaj luksaj portoseĝoj, li sentis sin kvazaŭ dronanta en unu el la plej aĉaj marĉoj en la mondo, inter la pekoj, kiujn la profetoj de lia raso senĉese vipadis per ĉiuj fortoj de la koro, konsekrita al la Plejalta. Korinto, en liaj okuloj, estis ia nova kopiaĵo de la kondamnita kaj malŝatinda Babel.

Subite, malgraŭ la suferoj, kiuj konsternis lian senfortiĝintan animon, li denove ekpensis pri siaj karaj infanoj, anticipe sentante la profundan ĉagrenon, kiun la sciigo pri la verdikto estigos en iliaj sentemaj kaj amantaj spiritoj. La rememoro pri la karesemo de Jeziel tuŝis lian koron, hardiĝintan en la suferado. Li havis la impreson, kvazaŭ li vidas sian filon ankoraŭ ĉe liaj piedoj petanta, ke li rezignu ĉian plendon, kaj ĉe liaj oreloj nun resonis, pli intense, la admonon de la Sankta Skribo: “La instruon de la Eternulo, ho filo, ne malŝatu!”. Sed samtempe pereigaj ideoj invadis lian lacan

kaj dolorantan cerbon. La sankta leĝo estis plena de instruoj de justeco, kaj li konsideris nepra devo zorgi pri la kompenso, kiu ŝajnis al li alkonforma. Nun, en ekstrema deprimateco, jen li iris returne al sia hejmo, senigite je ĉio, kion li posedis plej modestan kaj simplan, kaj jam en la fino de la vivo! Kiel venos al li la morgaŭa pano? Sen rimedoj por laboro kaj sen domo, li vidis sin devigita vagadi en necerta situacio ĉe la juneco de siaj infanoj. Nepriskribebla morala turmento sufokis lian koron.

Regata de amaraj pensoj, li alproksimiĝis al la amata bieno, kie li konstruis la familian neston. La varma posttagmeza suno plidolĉigis la ombron de la arboj kun verdaj riĉaj branĉoj. Johedeb ekpaŝis sur la tero, kiu ja estis lia propraĵo, kaj, afliktita de la perspektivo devi ĝin por ĉiam forlasi, enlasis en sian menson terurajn tentojn, kiuj lin senprudentigis. Ĉu la teroj de Licinio ne kuntuŝiĝas kun lia bieno? Flankiĝante de la vojo, kiu lin kondukis al la hejmo, li penetris en la proksiman arbetajaron kaj, post kelke da paŝoj, fikse ekrigardis la limlinion inter li kaj lia turmentanto. La transaj paŝtejoj laŭŝajne ne estis bone prizorgataj; manke de pli bona distribuado de akvo, akre sentiĝis iom da ĝenerala sekeco. Nur iaj kelke da unuopaj arboj mildigis per sia ombro la krudecon de tiu kampo, malvarmetigante tiun forlasitan terpecon plenan de dornarbustoj kaj parazitaj, kiuj sufokis la utilajn herbojn.

Obsedita de la penso pri repago kaj venĝo, la maljuna izraelido decidis ekbruligi la proksimajn paŝtejojn. Li ne konsiliĝos kun siaj infanoj, ĉar ili, inklinaj al toleremo kaj bonkoremo, kredeble fleksos lian spiriton. Johedeb sin retiris kelke da paŝoj kaj, uzante la servomaterialon, tie proksime konservatan, faris la fajron, per kiu li ekbruligis faskon da sekaj herboj. La fajro rapide komuniĝis kaj en malmultaj minutoj la brulo de la paŝtejoj fulme disvastiĝis.

Post tio kaj ankoraŭ kun dolorantaj ostoj, li ŝanceliĝe ekiris al sia hejmo, kie Abigail lin vane demandis pri la motivoj de tia profunda konsterniteco. Johedeb kuŝiĝis, atendante sian filon, sed baldaŭ surdiga bruo re-

sonis en liaj oreloj. Ne malproksime de la bieno la fajro detruadis amikajn arbojn kaj fortikajn branĉarojn, farante el verdaj paŝtejoj amasojn da cindro. Granda spaco senrimede bruladis, lamente kriadis birdoj, terurite forflugantaj. Malgrandaj konstruaĵoj en la bieno de la kvestoro, inkluzive de pitoreskaj varmobanejoj, kiujn li plej amis, inter la arboj, ankaŭ brulis, fariĝante nigraj ruboj. Ie kaj ie leviĝis la voĉbruado de la kamplaboristoj, kuregantaj por savi de detruado la kampodomon de la multepova patricio aŭ penantaj izoli la fajroserpenton, kiu en ĉiuj direktoj lekadis la grundon, alproksimiĝante al la najbaraj fruktoĝardenoj.

Kelke da horoj da maltrankvileco dissemis la plej afliktajn atendojn, sed ĉe vesperiĝo la brulego post grandegaj penoj estis venkita.

La maljuna judo vane sendis serĉe de sia filo servantojn de sia bieno. Li deziris paroli al Jeziel pri siaj bezonoj kaj pri la turmenta situacio, en kiu ili denove troviĝis, sopirante trankviligi la menson per la mildigaj vortoj de lia fila amo; sed nur vespere, en bruletigitaj vestoj kaj kun iomete vunditaj manoj, la junulo eniris hejmen, vidigante en la laceco de la vizaĝo la penigan taskon, kiun li al si trudis. Abigail ne surpriziĝis antaŭ lia aspekto, komprenante, ke ŝia frato ne sin detenis kaj helpis siajn najbarajn kamaradojn en tiu posttagmezo, kaj preparis por liaj lacaj piedoj kaj liaj dolorantaj manoj banon el aroma akvo; sed tuj vidinte lin kaj rimarkinte liajn vunditajn manojn, Johedeb mire ekkriis:

– Kie vi estis, mia filo?

Jeziel parolis pri la memvola kunhelpo por la savo de la najbara bieno, kaj laŭgrade kiel li rakontis la malĝojajn okazaĵojn de tiu tago, lia patro travidigis sian propran suferon tra la malluma mieno, sur kiu estis stampitaj la akraj trajtoj de la indigno, kiu mordadis lian koron. Post kelke da minutoj, laŭtigante la senkuraĝan voĉon, li profunde emociite parolis:

– Miaj infanoj, estas por mi dolore diri al vi: ni estas senigitaj je nia lasta propraĵo... Malkonsentante mian sinceran kaj justan plendon, la delegito de Cezaro ordonis eksproprieti nian domon. Tiu maljusta verdikto

estas la ilo de nia tuta ruiniĝo. Laŭ ĝi ni devas forlasi nian bieneton en la daŭro de tri tagoj!

Kaj supren turnante la okulojn, kvazaŭ insistante ĉe la dia kompatemo, li ekkriis kun la rigardo nebulita de larmoj:

– Ĉio perdita! Kial mi do estis forlasita, mia Dio? Kie la libereco de Via fidela popolo, se oni ĉie nin semkompate ekstermas kaj persekutas?

Dikaj larmoj fluis sur liaj vangoj, dum li per tremanta voĉo rakontis al siaj infanoj la pezajn turmentojn, kiujn li elportis. Abigail ame kisis al la manojn kaj Jeziel, tute ne parolante pri la patra indigno, lin brakumis post lia dolora rakontado, lin kore konsolante:

– Patro, kial vi timas? Dio neniam avaras favorkoraĵon. La Sankta Skribo instruas nin, ke Li, antaŭ ĉio, estas la sindona Patro de ĉiuj venkitoj sur la Tero! Tiuj malvenkoj venas kaj forpasas. Vi havas miajn brakojn kaj la aman zorgadon de Abigail. Kial lamenti, se eĉ morgaŭ, kun la dia helpo, ni eble eliros el ĉi tiu domo, por ie serĉi alian, por nin doni al honesta laboro? Ĉu Dio ne kondukis nian popolon, forkurintan el la sklaveco, tra la maro kaj la dezerto? Kial do Li rifuzos sian apogon al ni, kiuj Lin tiel amas en ĉi tiu mondo? Li estas nia kompasoj kaj nia domo.

Jeziel fikse rigardadis sian maljunan patron kun teniĝo de profunde karesa petego. Liaj vortoj elmontris la plej dolĉan kortuŝitecon. Johedeb ne estis nesentema por tiuj belaj kareselmontraj, sed ĉe la esprimado de tiom da konfido al la dia potenco li sentis honton post la ekstrema ago, kiun li faris. Konsolite de la karesemo de siaj infanoj, li donis liberan kuron al la maldolĉaj larmoj, kiuj fluadis el lia animo, vundita de kruelaj elreviĝoj. Tamen Jeziel daŭrigis:

– Ne ploru, patro, kalkulu je ni! Morgaŭ mi mem zorgos pri nia foriro, kiel necese.

En tiu momento la voĉo de lia patro aŭdiĝis kaveca kaj li emfaze diris:

– Sed tio ne estas ĉio, mia filo!

Kaj malrapide Johedeb pentris la bildon de siaj retenitaj afliktoj, de sia prava kolero, kiu finiĝis per la

decido bruligi la bienon de la malaminda trumentanto. Liaj infanoj lin mire aŭskultadis, vidigante la sinceran doloron, kiun naskis en ili la patra konduto. Rigardinte lin kun esprimo de senfina amo kaj profunda maltrankvileco, la junulo lin brakumis kaj diris:

– Patro, patro, kial vi levis la venĝantan brakon? Kial vi ne atendis la agon de la Dia Justeco?

Kvankam konfuzita de la koraj admonoj, la demandito klarigis:

– Estas skribite kiel unu el la ordonoj: “Ne ŝtelu”; farante, kion mi faris, mi celis reĝustigi deflankiĝon for de la leĝo, ĉar ni estas senigitaj je ĉio, kio konsistigis nian modestan propraĵon.

– Tamen super ĉiuj ordonoj, patro – sen kolero rediris Jeziel –, Dio ordonis, ke ni notu al ni la instruon pri amo, admonante nin ami Lin super ĉio, per la tuta koro kaj per la tuta animo.

– Mi amas la Plejaltan, sed mi ne povas ami la kruelan romanon – murmuris Johedeb per amara tono.

– Sed kiel ni montrus sindonon al la Ĉiopova en la Ĉielo – daŭrigis la kompatanta junulo –, detruante Liajn kreaĵojn? En la afero de la brulo ni devas konsideri ne nur nian ateston de malfido al la justeco de Dio, sed ankaŭ tion, ke la kampoj, kiuj liveras al ni ŝirmo kaj panon, estis difektitaj de nia agado kaj la du plej bonaj servistoj de Licinio Minucio, nome Kajo kaj Rufilio, estis morte vunditaj, kiam ili senutile penis savi de la fajro la preferatajn varmobanejojn de sia mastro; ili ambaŭ, kvankam sklavoj, ĉiam estis niaj plej bonaj amikoj. La fruktodonaj arboj kaj la bedoj de legomoj de nia bieno preskaŭ ĉion ŝuldas al ili, ne nur rilate al la semoj venintaj el Romo, sed ankaŭ al ilia klopodado kaj kunhelpo ĉe miaj laboroj. Ĉu ne estus juste, se ni honorus ilian amikecon, ja sindonan kaj diligentan, antaŭforigante de ili ian punon kaj maljustajn suferojn?

Johedeb laŭŝajne profunde meditadis pri tiuj konsideroj de la filo, faritaj per ama tono. Dum Abigail silente ploradis, la junulo aldonis:

– Ni, kiuj vivis pace sur la vojoj de la mondo, ĉar nia konscienco estis pura, devas nun preni ian decidon,

konsiderante la revenĝojn, kiuj falos sur nin. Dum tiuj miaj penoj kontraŭ la fajro mi rimarkis, ke multaj amikoj de Mnucio rigardadas min kun evidenta malkonfido. En la nuna momento li certa jam revenis de siaj laboroj en la imperia kortumo. Ni devas do rekomendi nin al la amo kaj pardonemo de Dio, ĉar ni ja scias la turmentojn, al kiuj la romanoj submetas ĉiujn, kiuj malobeas iliajn ordonojn.

Peza nuboj da malĝojo dronigis tiujn tri homojn en premanta zorgo. En la maljunulo oni rimarkis teruran angoron, miksitan kun la doloro pro la ŝiranta riproĉo de la konscienco, kaj en la okuloj de la junuloj oni vidis senfinan, nepriskribeblan amarecon.

Jeziel prenis de sur la tablo la malnovajn sanktajn skribaĵojn kaj malgaje diris al sia fratino:

– Abigail, ni recitu la psalmon, kiun panjo instruis al ni por la doloraj momentoj.

Ili genuiĝis, kaj iliaj emociitaj voĉoj, similaj al tiu de turmentataj birdoj, mallaŭte ekkantis unu el la belaj kantoj de David, kiujn ili lernis ĉe la patrino brusto:

*“La Eternulo estas mia paŝtisto; mi mankon ne havos.
Sur verdaj herbejoj Li ripozigas min, apud trankvilaj
akvoj Li kondukas min.
Li kvietigas mian animon; Li kondukas min laŭ vojo
de la vero, pro Sia nomo.
Eĉ kiam mi iros tra valo de densa mallumo, mi ne timos
malbonon, ĉar Vi estas kun mi; Via bastono kaj
apogiĝilo trankviligos min.
Vi kovras por mi tablon antaŭ miaj malamikoj; Vi ŝmir-
is per oleo mian kapon, mia pokalo estas plenigita.
Nur bono kaj favoro sekvos min en la daŭro de mia tuta
vivo; kaj mi restos en la domo de la Eternulo
eterne.”* (*)

La maljuna Johedeb akompanis la malgajan kanton, sentante sin premata de amaraj emocioj. Li nun komenc-

(*) La Psalmaro, 23 – Noto de la Aŭtoro.

is kompreni, ke ĉiaj suferoj, senditaj de Dio, estas profitaj kaj justaj, kaj ke ĉiaj malicaĵoj de la manoj de la homo nepre alportas inferajn turmentojn al la malvigla konscienco. La mallauĝta kantado de liaj infanoj plenigis lian koron per ŝiranta malĝojo. Li nun rememoris la amatan edzinon, kiun Dio vokis al la spirita vivo. Kiel ofte ŝi luladis lian suferantan spiriton per tiuj neforges-eblaj versoj de la psalmisto? Ŝia amika kaj fidela admono sufiĉis, por ke la spirito de oboe kaj justeco pli laŭte parolu al lia koro.

Ĉe la ritmo de la karesa kaj malgaja ario, kiu prezentis apartan akcenton en la voĉo de la amegataj infanoj, Johanedeb longe ploradis. Tra la malgranda fenestro, malfermita en la modesta ĉambro, liaj okuloj sopire serĉis la bluan ĉielon, kiu pleniĝis per trankvilaj ombroj. La nokto envolvis la Naturon, kaj tre malproksime, en la alto, eklumis la unuaj steloj. Agordiĝante kun la grandiozaj inspiroj de la firmamento, li spertis intensajn emociojn en la afliktita animo. Profunda karesemo instigis lin stariĝi, kaj, dezirante montri al siaj infanoj, kiel multe li ilin amas kaj kiom multe li esperas de ili en tiu kriza momento de sia vivo, li kliniĝis kun malfermitaj brakoj, kun signifoplena esprimo de koreco, kaj, kiam la lastaj notoj sonis el la lipoj de la junuloj, genuantaj kaj reciproke ĉirkaŭbrakitaj, li ilin plorante brakumis, ekkriante:

– Miaj infanoj! Miaj amataj infanoj!

Sed en ĉi tiu momento la pordo malfermiĝis kaj malgranda servanto el la najbaraĵo anoncis kun miregantaj okuloj:

– Sinjoroj, la soldato Zenas kune kun kelke da kamaradoj vokas vin al la pordo.

La maljunulo almetis la dekstran manon al la premata brusto, dum Jeziel ŝajnis momenton mediti; tamen, montrante la fortecon de sia decidema spirito, la junulo diris:

– Dio nin protektos.

Post kelke da momentoj la sendito, kiu komandis la negrandan eskorton, voĉlegis la arestordonon kontraŭ la tuta familio. La ordono estis kategoria kaj nenuligebla.

La akuzitoj devis esti tuj enkarcerigitaj, por ke ilia situacio klariĝu en la sekvanta tago.

Brakumante siajn ambaŭ infanojn, la kompatinda izraelido iris antaŭ la eskorto, kiu ilin senkompate observis.

Joĥedeb rigardadis la florbedojn kaj la amatajn arbojn apud la modesta dometo, kie li teksis ĉiujn revojn kaj esperojn de sia vivo. Stranga emocio regis lian lacan spiriton. Torento da larmoj fluadis el liaj okuloj, kaj, transirante la florkovritan kradpordon, li laŭte diris, rigardante la klaran ĉielon, nun prisemitan per la noktaj astroj:

– Sinjoro, kompatu nian amaran destinton!

Jeziel milde ekpremis lian ŝrumpintan manon, kvazaŭ petante lin teni sin rezignacie kaj trankvile, kaj la grupo silente ekmarŝis en la lumo de la steloj.



Larmoj kaj Turmentoj

La malliberejo, kiu akceptis niajn konatojn, en Korinto, estis malnova domego kun malsekaj kaj mallumaj koridoroj, sed la ĉambro, destinita por ili, kvankam sen ia komforto, feliĉe havis kraditan fenestron, per kiu tiu malgaja ejo komunikiĝis kun la ekstera Naturo.

Joĥedeb estis morte laca, kaj Jeziel, uzante mantelon, kiun li foririnte de sia hejmo, hazarde prenis, improvizis por li ian kuŝejon sur la malvarmaj platŝtonoj. Turmentata de alamasigo de pensoj, la maljunulo ripozigis sian dolorantan korpon, amare meditante pri la problemoj de la homa destino. Ne sciante elesprimi siajn akrajn dolorojn, li dronis en turmenta muteco, evitante la rigardon de siaj infanoj. Jeziel kaj Abigail alproksimiĝis al la fenestro kaj, ekpreninte ĝiajn neflekseblajn kradojn, pene sufokis sian pravan maltrankvilecon. Ambaŭ pretervole ekrigardis la firmamenton, kies grandegeco ĉiam reprezentis la fonton de la plej dolĉaj esperoj por tiuj, kiuj ploras kaj suferas sur la Tero.

La junulo plej kore ĉirkaŭbrakis sian fratinn kaj emociita diris:

– Abigail, ĉu vi memoras nian hieraŭan legadon?

– Jes – ŝi respondis kun la naiva sereneco de siaj nigraj kaj profundaj okuloj –, mi nun havas la impreson, kvazaŭ la Skribo donis al ni gravan mesaĝon, ĉar nia studotemo estis ĝuste tiu, en kiu Moseo de malproksime rigardadis la Promesitan Landon, tamen ne povante ŝin atingi.

La junulo kontente ekridetis, konstatinte, ke liaj pensoj trovas resonon, kaj konfirmis:

– Mi vidas, ke ni perfekte akordas. La ĉielo, ĉi tiun vesperon, prezentas al ni la perspektivon de ia luma malproksima patrujo. Tie – li daŭrigis, montrante al la stela volbo – Dio aranĝas la triumfojn de la vera justeco, havigas pacon al la malgajaj, konsolon al la senesperaj pri la sorto. Certe nia patrino staras ĉe Dio kaj nin atendas.

Abigail ricevis fortan impreson de ĉi tiuj vortoj de sia frato kaj demandis:

– Ĉu vi estas malĝoja? Ĉu la konduto de nia patro vin ĉagrenis?

– Tute ne – respondis la junulo, karesante ŝiajn harojn –; ni spertas provojn, kiuj certe havas la plej bonan celon rilate nian elaĉeton, ĉar alie Dio ilin ne sendus al ni.

– Ni ne koleru la patron – rediris la junulino –; mi longe pensis pri tio, ke se patrino estus ĉe ni, li ne estus prezentinta plendojn kun tiaj bedaŭrindaj sekvoj. Ni ja ne havas tiun konvinkpovon, per kiu ŝi, ĉiam karesplena, prilumis nian hejmon. Ĉu vi memoras? Ŝi ĉiam instruis al ni, ke la infanoj de Dio devas esti pretaj, por plenumi la diajn decidojn. Siaflanke la profetoj asertas al ni, ke la homoj estas vergoj sur la kampo de la Kreitaĵaro; la Ĉiopova estas la plugisto kaj ni devas esti la florantaj aŭ fruktonaskaj branĉoj en Lia kultivejo. La parolo de Dio instruas nin esti bonaj kaj amplenaj. Bono devas esti la floro kaj la frukto, pri kiuj la Ĉielo nin petas.

Nun la bela knabino faris signifoplenan paŭzon. Ŝiaj grandaj okuloj estis kovritaj de maldika vualo el larmoj, kiuj tamen ne elfluis.

– Tamen – ŝi daŭrigis, emociante sian amantan fraton –, mi ĉiam deziris fari ian bonon, sed ĝi neniam prosperis al mi. Kiam nia najbarino vidviniĝis, mi ekdeziris helpi al ŝi per mono, sed mi ĝin ne havis; ĉiam, kiam prezentiĝas ia oportuna okazo por ia helpo, miaj manoj estas malriĉaj kaj malplenaj. Mi do pensas, ke nun nia malliberigo estis ja utila: ĉu ne estas feliĉo, en ĉi tiu mondo, ke ni povas suferi ion pro Dio? Kiu havas nenion, tiu havas ankoraŭ la koron, por ĝin doni. Kaj

mi estas konvikita, ke la Ĉielo benos nin pro nia decido gaje servi al ĝi.

La junulo alpremis ŝin al sia brusto kaj ekkriis:

– Dio benu vin, fratineto, ke vi komprenas Liajn leĝojn!

Longa paŭzo stariĝis inter ili, dum ili penetrigis en la senliman vastaĵon de la klara nokto siajn mildajn kaj maltrankvilajn rigardojn.

En unu momento la junulino reprenis siajn konsideradojn:

– Kial la homoj de nia raso estas ĉie persekutataj, spertante maljustecon kaj suferojn?

– Mi supozas – respondis la junulo –, ke Dio tion permesas simile al amanta patro, kiu, por eduki la pli junajn kaj sensciajn infanojn, prenas kiel bazon la infanojn pli spertajn. Dum la ceteraj popoloj malvigligiĝas ĉe la superregado per la glavo aŭ ĉe la kondamnindaj plezuroj, nia atesto antaŭ la Plejalta, per la doloroj kaj afliktoj, pliigas en nia spirito la rezistopovon, samtempe kiel la ceteraj homoj lernas primediti, per nia klopodo, la religiajn veraĵojn.

Kaj fiksante la serenajn rigardon sur la firmamento, li aldonis:

– Sed mi kredas je la Elaĉetonta Mesio, kiu venos klarigi ĉiujn aferojn. La profetoj asertas al ni, ke la homoj lin ne komprenos, tamen li venos, por instrui amon, kariton, justecon kaj pardonon. Li naskiĝos ĉe humiluloj, prezentos ekzemplojn ĉe la malriĉuloj, lumigos al la popolo de Izrael, reanimos la malgajajn kaj prematajn, ame prenos al si ĉiujn, kiuj suferas en la forlasiteco de la koro. Eble, Abigail, li jam estas en la mondo kaj ni tion ne scias. Dio agadas silente, ne brue kiel la homoj. Ni havas fidon kaj nia konfido al la Ĉielo estas fonto de neelĉerpebla forto. La idoj de nia raso jam de longe multe suferas, sed Dio scias, kial tiel estas, kaj Li ne venigus al ni problemojn, kiujn ni ne bezonus.

La junulino ŝajnis longe meditadi kaj post kelke da momentoj konsideris:

– Ĉar ni parolis pri suferoj, kiel do ni atendu la morgaŭon? Mi antaŭvidas grandajn ĝenojn el la elde-

mandado, kaj, fine, kion la juĝistoj faros el nia patro kaj el ni mem?

– Ni devas atendi sole nur ĉagrenojn kaj disreviĝojn, sed ni ne preterlasu la oportunan okazon obei al Dio. Kiam lin pikis la ironio de la edzino, en la ekstrema malfeliĉo, al Ijob venis la bona penso, ke se la Kreinto donas al ni bonon por nia ĝojo, Li povas sendi al ni ankaŭ malbonon por nia profito (*). Se paĉjo estos akuzita, mi diros, ke la bruliginto estis mi.

– Kaj se oni skurĝos vin pro tio? – Ŝi demandis kun maltrankvilaj okuloj.

– Mi donos min al la skurĝado kun la paco en la konscienco. Se en tiu momento vi staros apud mi, vi kune kun mi elkantos la preĝon de la afliktitoj.

– Kaj se ili mortigos vin, Jeziel?

– Ni petos Dion nin protekti.

Abigail pli kore brakumis sian fraton, kiu de sia flanko apenaŭ kaŝis la emocion, kiu posedis lian animon. La kara fratino ĉiam estis la ama trezoro de lia tuta vivo. De kiam la morto forrabis al ili la patrinon, li sin donadis al la fratino per ĉiuj fibroj de sia koro. Lia pura vivo dividiĝis inter la laboro kaj la obeado al la patro, inter la studado de la leĝo kaj la amo al la dolĉa kunulino de lia infanceco. Abigail lin milde rigardadis, dum li ŝin tenis en siaj brakoj en la raviteco de la amikeco pura, kiu ligas unu al alia du fratajn animojn.

Meditinte multe da minutoj, Jeziel emociite diris:

– Se mi mortos, Abigail, promesu al mi absolute plenumi tiujn konsilojn de patrineto, ke ni konduku senmakulan vivon en ĉi tiu mondo. Memoru pri Dio kaj pri nia vivado de sanktiga laboro, kaj vi neniam aŭdos la voĉon de la tentoj, kiuj trenas la homojn en la abismojn de la vojo. Ĉu vi memoras la lastajn admonojn de patrineto sur la lito de morto?

– Ho jes! – respondis Abigail, plorante, – Mi havas la impreson, kvazaŭ mi ankoraŭ aŭdas ŝiajn lastajn vortojn: “kaj vi, miaj infanoj, amu Dion super ĉio, per via tuta koro kaj per via tuta animo”.

(*)Vd. en Ijob, 2:10 – *La trad.*

Ĉe ĉi tiuj rememoroj Jeziel sentis, ke liaj okuloj mal-sekiĝas, kaj murmuris:

– Vi feliĉa, ke vi ĝin ne forgesis!

Kaj ŝanĝante la temon de la konversacio, li emociita aldonis:

– Nun vi bezonas ripozon.

Kvankam ŝi rifuzis ripozi, li tamen ekpreniis ŝian mizeran mantelon, improvizis kuŝejon en la neklara lulumo, kiu penetris tra la krado, kaj, ŝin plej kore kisinte sur la frunto, milde konsilis:

– Ripozu, ne maltrankvuliĝu pro la situacio: nia destino apartenas al Dio.

Por plaĉi al li, Abigail laŭpove kvietiĝis, dum li alproksimiĝis al la fenestro, por rigardadi la belecon de la lume pudrita nokto. Lia juna koro dronis en premantaj konsideradoj. Nun, kiam la patro kaj la fratineto ripozis en la ombro, li donis liberan kuron al la profundaj ideoj, kiuj posedis lian noblan spiriton. Li sopire serĉis ian respondon al la demandoj, kiujn li adresis al la malproksimaj steloj. Sincere kaj konfide li esperis al sia Dio saĝa kaj kompatema, kiun liaj gepatroj al li konigis. En liaj okuloj la Ĉiopova estis ĉiam senfine justa kaj bona. Li, kiu mensklarigis sian patron kaj konsolis sian fratineton, ankaŭ li nun demandis en sia koro pri la kialo de siaj doloraj elprovoj. Kiel praviĝus, pro tiu bagatela kaŭzo, la neatendita aresto de honesta maljunulo, de laborema viro kaj de senkulpa infano? Kian nepardonindan krimon ili faris, por meriti tian pezan punon? Rememorinte la humiligon de sia fratino, li abunde ekploris, sed li tamen ne penis forviŝi la larmojn, kiuj fluegis sur li vizaĝo, por ilin kaŝi antaŭ Abigail, kiu eble lin observis el la ombro. Li rememoris unu post unu ĉiujn instruojn de la Sankta Skribo. La lecionoj de la profetoj konsolis lian soifantan animon, tamen ŝiris lian koron grandega respiro. Li rememoris la patrinajn karesojn, kiujn la morto rabis al li. Se lia patrino nun estus apud ili, ŝi ja scius, kiel ilin konsoli. Kiam li estis infano, ĉe liaj malgrandaj ĉagreniĝoj ŝi instruis, ke en ĉio Dio estas bona kaj kompatema, ke en la malsanoj Li rebonigas la korpon kaj en la angoroj de la animo Li prilumas

la koron; ĉe la preterpasado de la rememoroj li konsideris ankaŭ, ke ŝi lin ĉiam admonis al kuraĝo kaj gajeco, igante lin senti, ke homo, konvinkita pri la patreco de Dio, iradas en la mondo fortikigite kaj feliĉe.

Edifite de la fido, li rekuraĝiĝis kaj post longa meditado ekkuŝis sur la ŝtonplanko por la ebla ripozo en la majesta silento de la nokto.

La tago vekigis plena de nigraj antaŭvidoj.

Post nemulte da horoj Licinio Minucio, akompanata de multenombraj gvardianoj kaj satelitoj, akceptis la kaptitojn en la ĉambro destinita por la ordinaraj krimuloj, kie vidiĝis kelke da iloj por puno kaj torturo.

Joĥedeb kaj liaj infanoj travidigis tra la paleco de la vizaĝoj la profundan emociion, kiu ilin posedis.

La tiamaj moroj estis tro malhumanaj, por ke la senkompata juĝisto kaj la plej multaj ĉeestantoj bedaŭru ilian mizeran aspekton.

Kelke da ekzekutistoj staris ĉe la punŝtipoj, sur kiuj pendis kruelaj skurĝoj kaj mankatenoj.

Ne okazis eldemandado nek deklaro de atestantoj, kiel supozeble antaŭ tiaj abomenindaj disponoj; malĝentile vokite de la metalsona voĉo de la delegito, la maljuna judo malfirme kaj tremante alproksimiĝis.

– Joĥedeb – ekkriis la nesentema kaj terura turmentanto –, homoj, kiuj malrespektas la leĝojn de la Imperio devas esti punataj per morto, sed mi penis esti grandanima pro konsidero rilate vian senhelpan maljunecon.

Rigardo de premanta atendo ŝanĝis la mienon de la akuzito, dum la patricio ironie ekridetis.

– Kelke da laboristoj en mia bieno – diris plue Licinio – vidis viajn malicajn manojn hieraŭ posttagmeze, kiam vi ekbruligis la paŝtejon. Tiu ago kaŭzis seriozan malprofiton al miaj interesoj, krom eble neripareblaj difektoj al la sano de du tre bonaj servistoj. Ĉar vi mem havas nenion, per kio vi kompensus la kaŭzitan malutilon, vi tial ricevos la justan punon per skurĝado, por neniam plu levi viajn vulturungegojn kontraŭ la romajn interesojn.

Antaŭ la afliktita kaj larmanta rigardo de siaj infanoj, la maljuna izraelido genuiĝis kaj ĝemis:

– Sinjoro, kompaton!

– Kompaton? – blekis Minucio. – Vi faras krimon kaj petegas pri favoroj! Oni ja prave diras, ke via raso konsistas el naŭzaj, malŝatindaj vermoj.

Kaj montrante al la punŝtupo, li malvarme diris al unu el siaj satelitoj:

– Pescenio, rapidu! Dudek skurĝobatoj!

Ĉe la muta afliktiĝo de la du junuloj la respektinda maljunulo estis solide mankatenita.

Kiam la puno estis komenciĝonta, Jeziel kontraŭ la ĝenerala atendo, alproksimiĝis al la tablo kaj humile diris:

– Plej nobla kvestoro, pardonu mian malkuraĝon, ke mi ĝis nun ne parolis: mi asertas al vi, ke mia patro estas maljuste akuzita. Tio estis mi, kiu ekbruligis vian bienon, konsternite de la verdikto pri konfisko kontraŭ ni. Bonvolu do liberigi lin kaj fari al mi la merititan punon: mi ĝin volonte akceptos.

Al la patricio ekfulmis de surprizo la malvarmaj okuloj, kiujn karakterizis granda moviĝado, kaj li emfaze rediris:

– Sed, ĉu vi ne helpis miajn servantojn savi parton de la varmobanejoj? Ĉu vi mem la unua ne kuracis Rutilion?

– Mi tiel agis pelate de la konscienciproĉo, via moŝto – respondis la junulo, sopirante antaŭliberigi sian patron je la minacanta puno. – Vidante, ke la fajro etendiĝas kaj eklekas la arbojn, mi timis la sekvojn de mia ago, sed nun mi konfesas, ke mi estas ĝia farinto.

Dume, timante pri la sorto de sia filo, Johedeb kun turmentata animo ekkriis:

– Jeziel, ne akuzu vin pri kulpo, kiun vi ne faris!

Sed akcentante siajn vortojn per ekstrema ironio, la delegito rediris, turnante sin al la hebrea junulo:

– Nu bone, mi ĝis nun indulgis vin, dank'al la malveraj informoj, kiujn oni donis al mi pri vi; tamen vi ricevos vian nepre necesan korektoporcion. Via patro

pagos por la krimo, en kies plenumo li neneigeble estis vidita, kaj vi pagos por via memvola konfeso.

Surprize kaptite de la neatendita decido, Jeziel estis kondukita al la punŝtupo fronte al sia korpremata patro. Apud li ekstaris la kamarado de Pescenio, kiu lin senkompate ligis al la bronzaĵaj ringoj, kaj la unuaj skurĝofrapoj eklekis lian dorson, kruelaj, egaldaŭraj.

Unu... du... tri...

Johedeb vidigis profundan malfortiĝon, lia brusto dolore leviĝadis kaj malleviĝadis, dum lia filo laŭŝajne elportis la torturon kun heroa kaj noble serena teniĝo; ili ambaŭ havis okulojn fiksitajn sur Abigail, kiu ilin rigardadis treege pala, travidigante tra la varmaj larmoj, kiujn ŝi verŝis, la turmentiĝon de sia amanta spirito.

Kiam la terura puno estis jam preskaŭ duone plenumita, jen kuriero envenis kaj, laŭte kaj solene, anoncis al la delegito:

– Plej nobla moŝto, senditoj el via domo sciigis, ke la servanto Rutilio ĵus mortis.

La kruela patricio kunŝovis la brovojn, kiel li kutime faris en la momentoj de kolereksplodo. Revengaj sentoj ekmontriĝis sur lia vizaĝo, kiun la maliceco de la incitata egoismo sulkis per neforviŝeblaj faltoj.

– Li estis la plej bona el miaj servantoj – li ekkriis. – Tiuj malbenindaj judoj tre kare pagos por tia ofendo. Filokrio, kalkulo al tiu dudek batojn plie kaj tuj poste konduku lin en la karceron, el kiu li iru en la galerojn.

Inter la kompatindaj viktimoj kaj la afliktita junulino interŝanĝiĝis rigardo de neesprimebla signifo; tiu kaptiteco estis samvalora kiel ruiniĝo kaj morto. Kiam ili ankoraŭ ne rekonsciĝis de la kruela surprizo, jen la neelpetebla juĝisto daŭrigis:

– Rilate vin, Pescenio, reprenu vian taskon. Tiu maljunulo, krimea kaj senskrupula, pagos por la morto de mia fidela servanto. Skurĝu liajn manojn kaj piedojn tiel longe, ĝis li ne kapablos plu iradi kaj fari malbonon.

Ce tiu maljusta verdikto Abigail falis genue kaj varme ekpreĝis. El la brusto de ŝia frato sonis profundaj ĝemoj, kaj siajn okulojn li sentis nebulitaj de doloraj

larmoj, prezentante al si la nepran malfeliĉon de sia fratineto, dum lia patro, timante la ekstreman momenton, maltrankvile serĉadis ilian rigardon.

La skurĝobatoj daŭris plu senĉese, sed ĉe unu el ili Pescenio ne sukcesis teni la ekvilibron: la akra bronza pinto de la skurĝo funde vundis la gorĝon de la kompatinda izraelido kaj la sango torente ekŝprucis. La junuloj ekkomprenis la seriozecon de la situacio kaj afliktite rigardis unu la duan. Per altege fervoraj preĝoj Abigail sin turnis al Dio, al tiu mildkora, amanta Dio, kiun ŝia patrino instruis al ŝi adori. Filokrio estis fininta sian taskon. La frunto de Jeziel pene leviĝis, montrante glucecan ŝviton, ruĝigitan de sango. Liaj okuloj fiksiĝis sur lia tre amata fratino, sed laŭ sia aspekto li travidigis grandegan malvigliĝon, kiu neniigis liajn lastajn fortojn. Nekapabla difini siajn proprajn pensojn, Abigail dividis sian angoran atenton inter la patro kaj la frato, sed post nelonge, pro la senĉesa fluegado de la sango, la blankhara kapo de Johedeb ekpendis por ĉiam. La sango abunde malsekigis liajn vestojn kaj pastece amasiĝis sur liaj piedoj. Sub la kruela rigardo de la delegito neniu kuraĝis diri eĉ unu vorton. Nur la skurĝo, tranĉante la pezan aeron de la ĉambro, rompis la silenton per stranga siblado. Ĉe unu momento oni rimardis, ke la brusto de la viktimo ankoraŭ eliĝas malklaraj vortoj, el kiuj elstaris la karesaj esprimoj:

– Miaj infanoj, miaj karaj infanoj!

La junulino eble ne povis kompreni, ke venis la decida momento, sed Jeziel, malgraŭ la terura sufero de tiu horo, ĉion komprenis kaj per grandega peno ekkriis al sia fratino:

– Abigail, paĉjo mortas; havu kuraĝon, fidu... Mi ne povas akompani vin en la preĝado... sed faru por ni ĉiuj... la preĝon de la afliktitoj...

Montrante enviindan fidon en tiaj doloraj cirkonstancoj, la junulino surgenue longe rigardis la maljunan patron, kies brusto jam ne moviĝadis; poste, levante la okulojn al la ĉielo, ŝi ekkantis per voĉo tremanta, sed harmonia kaj klara:

*“Di’, ho Patro de l’ plorantoj
De l’ malĝojaj, sklavigitaj,
Fortikaĵo de l’ venkitaj,
Konsol’ de ĉia sufer’,
Kvankam en erar’ ni ploras,
Kaj de l’ peko nutras flamon,
Ni petegas Vian amon
El ĉi ekzil’ sur la Ter’.*

*En l’ afliktoj de la vojo,
En la nokto plej malhela,
Via riĉa fonto bela
Fluigas bonon sen fin’;
L’ eterna lumo Vi estas
De l’ ĝoj’ kaj paco sur Tero,
Nia pordo de l’ espero,
Kie Vi akceptas nin.”*

Ŝia voĉo plenigis la ĉambiron per nepriskribeblaj sonoroj. La kanto similis pli ĝuste ian dolortriladon de najtingalo, kiu, vundite, kantus ĉe iu mateniĝo en printempo. Tiel granda, tiel sincera montriĝis ŝia fido al la Ĉiopova, ke ŝia teniĝo estis tiu de amanta kaj obeanta filino, komunikiĝanta kun sia silenta kaj nevidebla patro. La ploro malhelpis ŝian tremantan voĉon, sed ŝi brave ripetadis la preĝon, kiun ŝi lernis en sia hejmo, kun la plej bela esprimo de fido al la Plejaltulo.

Peza emocio posedis ĉiujn. Kiel agi kun knabino, prikantanta la torturon de siaj amatoj kaj la kruelecon de iliaj ekzekutistoj? Ĉeestantaj soldatoj kaj gardistoj apenaŭ kaŝis sian emociion. La kvestoro mem estis kvazaŭ paralizita, kvazaŭ en ĝenanta situacio. Abigail, al kiu estis nekonata la maliceco de la homoj, petegante la helpon de la Ĉiopova, ne sciis, ke ŝia kanto nenion utilas al la savo de ŝiaj karuloj sed vekos kompaton por sia senkulpeco, tiel havigante al ŝi la liberecon.

Rericevinte fortojn kaj rimarkinte, ke tiu sceno vundiĝis ĉies sentemon, Licinio klopodis por ne perdi la maldecon de sia spirito kaj per ordona tono rekomendis al unu el siaj malnovaj servantoj:

– Justeno, forkonduku tiun virinon sur la straton kaj liberigu ŝin, sed ŝi plu ne kantu, eĉ ne unu noton!

Ĉe ĉi tiu tondra ordono Abigail ne finis sian preĝon kaj tuj silentiĝis, kvazaŭ obeinte strangan stakaton.

Ŝi direktis al la sangokovrita kadavro de sia patro neforgeseblan rigardon kaj, tuj ekrigardante sian vunditan kaj mankatenan fraton, kun kiu ŝi interŝanĝis la plej profundajn impresojn per la lingvo de la dolorantaj kaj maltrankvilaj okuloj, sentis, ke ŝin ektuŝas la kala mano de maljuna soldato, kiu krudete diris al ŝi:

– Akompanu min!

Ŝi ektemis, sed, direktinte al Jeziel la lastan kaj signifoplenan rigardon, sen kontraŭstaro sekvis la subulon de Minucio. Trairinte kune kun ŝi sennombrajn malseketajn kaj mallumajn koridorojn, Justeno, senteble ŝanĝante la tonon de la voĉo, komprenigis al ŝi senfinan simpation por ŝia preskaŭ infana figuro, kortuŝite murmurante ĉe ŝia orelo:

– Mia infano, ankaŭ mi estas patro kaj mi komprenas vian turmentiĝon. Se vi volas elaŭdi amikon, aŭskultu mian konsilon. Plej rapide forkuru el Korinto. Profitu de ĉi tiu momento de kortuŝiteco de viaj turmentantoj kaj ne revenu ĉi tien.

Abigail rekuraĝiĝis ĉe tiu neatendita simpatio kaj treege konfuzita demandis:

– Kaj mia patro?

– Via patro ekripozis por ĉiam – respondis la nobla soldato.

La larmoj de la junulino ekfluis pli abunde el ŝiaj malgajaj okuloj; tamen, dezirante defendi sin kontraŭ ia soluleco, ŝi ankoraŭ demandis:

– Sed... kaj mia frato?

– Neniu revenas el la galeroj – respondis Justeno kun signifoplena rigardo.

Abigail almetis la malgrandajn manojn al la brusto, dezirante sufoki sian propran doloron. La hokoj de malnova pordo malrapide ekknaris kaj ŝia neatendita protektanto ekkriis, montrante al la multemova strato:

– Iru en paco kaj la dioj vin protektu.

La kompatinda knabino baldaŭ eksentis la solulecon

inter la vicoj da homoj, kiuj rapidece trairadis la straton. Kutima al la familiaj karesoj, en la hejmo, kie la patra lingvo anstataŭis la lingvon de la stratoj, ŝi sentis sin ia fremdulino meze inter tiom da homoj malkvietaj, okupitaj de materiaj interesoj kaj zorgoj. Neniu rimarkis ŝiajn larmojn, nenia amika voĉo penis ekscii ŝiajn dolorojn.

Ŝi troviĝis tute sola! Ŝia patrino antaŭ kelke da jaroj estis vokita de Dio; ŝia patro ĵus mortis, malnoble murdita; ŝia frato, arestita kaj sklavigita, sen ia espero pri saviĝo. Malgraŭ la tagmeza suno ŝi havis senton de frosto. Ĉu reveni al la hejma nesto? Sed por kio, se ili estis el tie elpelitaj? Al kiu konfidi sian grandegan malfeliĉon? Ŝi ekpensis pri malnova amikino de ŝia familio, kaj iris al ŝi. La vidvino Sostenia, kore sin doninta al ŝia patrino, akceptis ŝin kun la afabla rideto de sia bonanima maljuneco.

En larmoj la malfeliĉa rakontis al ŝi ĉion okazintan. La respektinda maljunulino, karesante ŝiajn bukajn harojn, diris emociita:

– Dum la antaŭaj persekutoj niaj suferoj estis tiaj samaj.

Kaj komprenigante, ke ŝi ne deziras revivigi malnovajn dolorajn okazaĵojn, Sostenia aldonis:

– Estas necesa la plej granda braveco en tiaj premtantaj situacioj, kiel ĉi tiu. Ne estas facile altigi la koron el inter tiom da teruraj ruinaĵoj, sed estas necese fidi Dion en la plej amaraj momentoj. Kion vi intencas fari nun, kiam ĉiuj rimedoj malaperis? De mia flanko mi nenion povas al vi oferi krom amika koro, ĉar mi ĉi tie loĝas almoze, ĉe malriĉa familio, kiu karite donis al mi rifuĝon post la lasta tempesto de nia vivo.

– Sostenia – diris sopire Abigail –, miaj gepatroj preparis min por ekzistado de brava propra penado. Mi nun pensas iri al la delegito kaj peti lin pri ia anguleto en nia bieno, por tie vivi honestan vivon, esperante rehavigi ĉe mi Jezielon. Kiel ĝi ŝajnas al vi?

Rimarkinte la sendecidecon de la respektinda amikino, ŝi dauzrigis:

– Ĉu mi scias, eble la kvestoro Licinio kompatos mian sorton. Mia decido eble kortuŝos lin; mi revenos en la hejmon kaj prenos vin kun mi: vi estus ia dua patrino por la restantaj tagoj de mia vivo.

Sostenia premis ŝin al sia brusto kaj emfaze diris kun malsekaj okuloj:

– Mia kara, vi estas anĝelo, sed la mondo estas ankoraŭ havo de la malbonuloj. Mi vivus kune kun vi eterne, mia bona Abigail; sed vi ja ne konas la delegiton kaj lian klikon. Aŭdu, infano! Estas necese, ke vi forkuru el Korinto, por ke vin ne trafu pli akraj humiligoj.

La junulino senkuraĝe sopirĝemis kaj post longa paŭzo diris:

– Mi akceptas viajn konsilojn, sed antaŭ ĉiu paŝo mi bezonas reveni hejmen.

– Por kio? – mire demandis la amikino. – Vi nepre devas foriri de ĉi tie kiel eble plej baldaŭ. Ne revenu hejmen. En ĉi tiu momento via domo eble estas okupita de senskrupulaj viroj, kiuj vin ne respektus. Konvenas al vi sintenado de sincera morala forteco, ĉar ni vivas en tempo, en kiu ni devas evitigi al ni pereon, kiel okazis al Lot kaj liaj familianoj, riskante esti ŝanĝitaj en senutilan statuon, se ni rigardos posten.

La fratino de Jeziel sorbadis ŝiajn vortojn kun dolora miro, ĉe la neatenditeco de la situacio.

Post momento Sostenia metis la manon al la frunto, kvazaŭ venis en ŝian kapon iu oportunokaza ideo, kaj entuziasme diris:

– Ĉu vi memoras Zeĥarjan, filon de Hanan?

– Tiu amiko ĉe la vojo al Kenkrea?

– Ĝuste tiu. Mi eksciis, ke li kune kun sia edzino, sin preparas por definitive forlasi Akajon, ĉar ilia solinfano antaŭ kelke da tagoj estis mortigita de fiaj romanoj.

Animita de varma espero, ŝi vivece finis:

– Kuru al la domo de Zeĥarja! Se vi lin ankoraŭ trovos, parolu al li en mia nomo. Petu de li rifuĝon. Rut havas malavaran koron kaj sendube etendos al vi siajn fratajn manojn; mi estas certa, ke ŝi akceptos vin kun patrina amo!

Abigail ĉion ĉi aŭdadis kvazaŭ indifera pri sia propra sorto, sed Sostenia igis ŝin konsideri la neceson de tiu rimedo, kaj post kelkaj minutoj da reciproka konsolado, la junulino, sub la rostanta sunvarmego de la unuaj posttagmezaj horoj, ekiris al Kenkrea, farante la impreson de ia aŭtomato, vaganta tra la vojo, kiu forte svarmis per pluraj veturiloj kaj sennombraj piedirantoj. La haveno de Kenkrea situis en kelka distanco de la centro de Korinto. En tia situacio, ke ĝi servis al la komunikigo kun la Oriento, ĝiaj multehomaj kvartaloj estis plenaj de izraelidaj familioj, de longe loĝantaj en la regionoj de Akajo aŭ transire al la ĉefurbo de la Imperio kaj ĉirkaŭaĵoj. La fratino de Jeziel venis al la domo de Zeharja en terure deprimita stato. Kune kun la maldormo en la lasta nokto kaj la afliktiĝoj de tiu tago, peza fizika laceco pliigis ŝian senkuraĝecon. Malferme paŝante, rememorante sian patron mortintan kaj sian fraton malliberigitan, ŝi ne atentis sin mem, en la kaduka stato de sia malsana, sennutra organismo. Nur veninte antaŭ la loĝejon de sia amiko, ŝi konstatis, ke febro ekkonsumas ŝian internaĵon, devigante ŝin pensi pri siaj doloraj bezonoj.

Kurinte al ŝia voko, Zeharja kaj Rut, lia edzino, mire kaj afliktite ŝin renkontis.

– Abigail!

La krio de ambaŭ elmontris grandan surpriziĝon, ĉe la aspekto de la junulino kun diskombitaj haroj, ruĝega vizaĝo, enfalintaj okuloj kaj neordigitaj vestoj.

Afekciite de malvigleco kaj febro, la filino de Johedeb sin ĵetis al la piedoj de la geedza paro, ekkriante per korŝiranta tono:

– Miaj amikoj, kompatu mian malfeliĉon! Mia bonkora Sostenia sugestis al mi vian karesemon en la dolora momento kiun mi travivas. Mi kiu estis jam perdinta mian patrinon, hodiaŭ perdis mian patron, murditan, kaj mian fraton Jeziel, senrevene sklavigitan. Se estas vero, ke vi estas forlasontaj Korinton, pro karitato prenu min kun vi!

Abigail nun afliktite brakumis Ruton, dum la amikino ŝin karesis en larmoj.

Plorĝemante, la junulino rakontis la hieraŭajn faktojn kaj la malĝojajn epizodojn de tiu tago.

Zeharja, kies patra koro ĵus suferis teruran baton, ŝin ame ĉirkaŭbrakis kaj ŝin emociite subtenis, serveme dirante:

– En la daŭro de unu semajno mi reiros Palestinon. Mi ankoraŭ ne scias la ĝustan lokon, kie ni konstante loĝos, sed ni, kiuj perdis la karan filon, havos en vi amatan filinon. Estu trankvila! Vi ja iros kun ni, vi estos nia filino por ĉiam.

Nekapabla vortigi sian ĝojan dankon, turmentata de alta febro, la junulino plorante genuiĝis, penante elmontri sian koran, sinceran dankon. Rut ŝin ame prenis en la brakojn kaj, kvazaŭ sindona patrino anĝelo, kondukis ŝin sur molan liton, kie Abigail, flegata de la du noblaj amikoj, deliris tri tagojn, inter vivo kaj morto.



III

En Jerusalem

Longe kaj dolorplene rigardinte la kadavron de sia patro, la hebrea junulo per maltrankvila rigardo sekvis sian fratinton ĝis la pordo al unu el la vastaj koridoroj de la tribunalo. Li neniam antaŭe spertis tian profundan emocion. Al lia turmentata cerbo alsvarmis la patrinaj konsiloj, ke la homo devas ami super ĉio Dion. Li ankoraŭ neniam konis larmojn tiel amarajn, kiel tiuj, torente fluantaj el lia disŝirita koro. Kiel li ricevu kuragon kaj reorganizu la vojon? Li subite ekdeziris rompi la mankatenojn, alproksimiĝi al sia senviva patro, karesi liajn blankajn harojn kaj samtempe malfermi ĉiujn pordojn, kuri post Abigail, preni ŝin en siajn brakojn, ke ili neniam disiĝu sur la vojoj de la vivo. Li vane tordiĝadis ĉe la torturŝtupo, ĉar, kiel sekvo de tiaj penoj, nur la sango pli forte elfluadis el la oscedantaj vundoj. Doloraj singultoj skuadis lian bruston, ĉe kiu la tuniko fariĝis ruĝaj ĉifonaĵoj. Absorbite de siaj propraj pensoj, li fine estis kondukita en malsekan ĉelon, kie li dum tridek tagoj tenadis sian menson en profunda meditado.

Post unu monato la vundoj estis cikatriĝintaj kaj unu el la subuloj de Licinio opiniis, ke venis la momento por konduki lin al unu el la komercaj galeroj, kie troviĝis la kvestoro, tie interesita pri profitigaj aferoj.

La hebrea junulo estis perdinta la rozokoloran freŝecon de la vangoj kaj la naivan tonon de la milda kaj gaja mieno. La kruda sperto havigis al li fizionomion doloraspektan kaj ombran. En lia mieno vagis nedifinebla malĝojo kaj sur la frunto jam ekaperis trofruaj faltoj, signantaj antaŭtempan maljunecon; sed en la okuloj

tiu sama sereneco, kiun donas profunda fido al Dio. Kiel aliaj idoj de lia raso, tiel li spertis la doloran torturon; li tamen konservis la fidon kiel la dian aŭreolon de tiuj, kiuj scias agi kaj esperi. La aŭtoro de “Sentencoj” rekomendis kiel nepre necesan la serenecon de la animo ĉe ĉiuj ŝanĝiĝoj de la homa vivo, ĉar de tio fluas la plej puraj fontoj de la ekzistado, kaj Jeziel gardis la koron. Orfo pri ambaŭ gepatroj, sklavo de kruelaj turmentistoj, li scios konservi la trezoron de la espero kaj serĉos sian fratinton ĝis la finoj de la mondo, se la libereco iam denove kisas lian nun sklavigitan frunton.

Proksime sekvata de senkompataj gardistoj, kvazaŭ li estus ia ordinara senokupulo, li trairis la stratojn de Korinto ĝis la haveno, kie oni lin metis en la naŭzan holdon de galero, ornamita per la simbolo de la superregantaj agloj.

Reduktita al la mizera stato de homo kondamnita al dumvivaj laboroj, li ekrigardis vizaĝo al vizaĝo la novan situacion plena de fido kaj humileco. La kontrolisto Lizipo mire rimarkis lian bonan konduton kaj la noblan kaj sindonan laboradon. Kutiminte trakti kun malicaj kaj senskrupulaj homoj, kiuj ne malofte devis esti skurĝataj, li surpriziĝis, konstatinte en la hebrea junulo la sinceran pretecon de iu, kiu sin submetis al la puno sen ribelo kaj sen sklavaĉemo.

Manipulante la pezajn remilojn tute serene, kiel iu plenumanta kutiman taskon, li sentis, ke riĉa ŝvito banas lian junulan vizaĝon kaj emociite rememoris la penigajn tagojn de sia kara plugilo. La kontrolisto baldaŭ konfesis en li servanton indan je atento kaj estimo, homon, kiu sciis imponi al siaj kamaradoj mem dank'al la natura boneco, elverŝiĝanta el lia animo.

– Ve al ni! – ekkriis malesperanta samsortulo. – Tre malmultaj rezistas ĉe ĉi tiuj malbenindaj remiloj dum pli ol kvar monatoj!

– Sed ĉia servo estas de Dio, amiko – rediris Jeziel alte inspirita –, kaj se ni ĉi tie faras nian taskon honeste kaj kun trankvila konscienco, ni havu la konvinkon, ke ni estas servantoj de la Kreinto, laborantaj en Liaj faroj.

Ĉe ĉiaj komplikaĵoj de la nova aspekto de sia ekzistado li havis interkonsentigan procedon, kiu harmoniigis inter si la plej ekzaltiĝintajn animojn. La kontrolisto miregis pri la delikateco de lia konduto kaj pri lia laborpovo kune kun la plej alta religia edukado, kiun li ricevis en sia hejmo.

En la senluma internaĵo de la galero la firmeco de lia fido ne ŝanĝiĝis. Li dividis siajn horojn inter la krudaj laboroj kaj la sanktaj meditoj. Ĉiujn pensojn superstaris la resopiro je la familia nesto, ĉe la espero iam revidi la fratinojn, kiel ajn longedaŭra estos lia sklaveco.

El Korinto la granda ŝipo venis al Cefalonio kaj Nikopolis, de kie ĝi estis revenonta al la havenoj de la linio de Kipro post nelonga haltado ĉe la marbordo de Palestino, laŭ la irvojo, kiun oni organizis, por profiti la senpluvan veteron, kaj konsiderante, ke la vintro paralizas ĉian navigadon.

Kutimiĝinte al laboro, li ne malfacile alkonformiĝis al la peza tasko enŝipigi kaj elŝipigi la transportatan materialon, al la manipulado de la turmentaj remiloj kaj al la helpado al la nemultaj pasaĝeroj ĉiam, kiam ili petis lian servadon, sub la vigla rigardo de Lizipo.

Returne de Cefalonio la galero akceptis eminentan pasaĝeron: tio estis la juna romano Sergio Paŭlo, kiu iris al la urbo Citium kun politika komisiono. Ĉi tiu patricio sin direktis al la haveno de Nea-Pafos (*), kie kelke da amikoj lin atendis, kaj tuj fariĝis, inter ĉiuj, celpunkto de grandaj komplezoj. Pro la graveco de lia nomo kaj la oficiala karaktero de lia misio, la ŝipestro Servio Karbo destinis por li la plej bonajn komfortaĵojn.

Sed longe antaŭ ol la galero denove venis al Korinto, kie ĝi estis restonta kelke da tagoj, daŭrigonte la antaŭdifinitan veturadon, Sergio Paŭlo serioze malsaniĝis, kun alta febro kaj la korpo krevinta de pusaj ulceroj. Oni kaŝite babildis, ke en la ĉirkaŭaĵo de Cefalonio regas ia nekonata pesto. La ŝipkuracisto ne sukcesis ĝuste difini tiun malsanon, kaj la amikoj de la malsanulo kun

(*) Por la klarigo de ĉi tiu nomo kaj de aliaj bonvolu vidi la glosaron en la fino de ĉi tiu verko. – *La Trad.*

nekaŝebla skrupulo komencis foriĝi de li. Post tri tagoj la juna romano estis preskaŭ forlasita. De sia flanko, maltrankvila pro sia persona situacio kaj mem timoplena, la ŝipestro venigis Lizipon kaj petis lin indiki iun sklavon el la plej edukitaj kaj ĝentilaj, kapablan preni sur sin ĉiun flegadon de la eminenta pasaĝero. La kontrolisto tuj indikis Jezielon kaj en tiu sama posttagmezo la hebrea junulo eniris en la kajuton de la malsanulo kun tia sama sereneco, kiun li kutime elmontradis en la plej diversaj kaj riskoplenaj situacioj.

La lito de Sergio Paŭlo troviĝis en malordo. Ne malofte li subite ellitiĝadis ĉe la plej alta grado de la febro, kiu igis lin deliri kaj diri vortojn sen interligo, krom tio, ke, movante la brakojn, li pli difektis la ulcerojn, kiuj sangis sur la tuta korpo.

– Kiu vi estas? – demandis la deliranta malsanulo, tuj kiam li ekvidis la silentan kaj humilan figuron de la korinta junulo.

– Mi estas nomata Jeziel, la sklavo, kiu venis por servi al vi.

De tiu momento li sin dediĉis al tiu malsanulo per ĉiuj fortoj de sia animo. Kun la permeso de la amikoj de Sergio li uzis ĉiajn rimedojn disponeblajn en la galero, imitante la kuracadon, kiuj li lernis hejme. Tagojn post tagoj, noktojn post noktoj, li vigle staradis ĉe la lito de la eminenta romano, sinofere kaj volonte. Banojn, balzamojn kaj pomadojn li pretigadis kaj uzadis plej sindone, kvazaŭ li kuracus intiman kaj tre karan parencon. Ĉe la plej krizaj momentoj de la dolora malsano li parolis al Sergio pri Dio, recitis malnovajn pecojn el la skribaĵoj de la profetoj, kiujn li parkere konservis, kaj superŝutis lin per konsolado kaj frata korelverŝo.

Sergio Paŭlo komprenis la gravecon de tiu malsano, kiu forigis de li la plej karajn amikojn, kaj en la kunvivado dum tiuj tagoj li inklinigis sian koron al la humila kaj bona fleganto. Post kelke da tagoj, dum kiuj Jeziel plene havigis al si lian admiron kaj dankon, pro agoj de nesuperebla bonkoreco, la junulo rapide ekresaniĝis, kio estis motivo por la ĝojo de ĉiuj. Sed en la an-

taŭtago de sia reiro en la sufokan holdon la juna sklavo jen ekprezentis la unuajn simptomojn de tiu nekonata malsano, reganta en Cefalonio.

Konsiliĝinte kun kelke da altkategoriaj subuloj, la ŝipestro petis la atenton de la patricio, preskaŭ tute resaniĝinta, kaj ankaŭ lian aprobon al la projekto, ke la junulo estu ĵetita en la maron.

– Estas preferinde veneni la fiŝojn, ol alfronti la danĝeron de la infekto kaj riski je pereco la altvaloran vivon de tiom da homoj – klarigis Servio Karbo kun morda rideto.

La patricio momenton konsideris kaj postulis la ĉeston de Lizipo, kaj nun ili tri ekpritraktis la aferon.

– Kia estas la situacio de tiu junulo? – demandis interese la romano.

La kontrolisto ekklarigis, ke la juna hebreo venis al li kune kun aliaj viroj, kaptitaj de Licinio Minucio okaze de la lastaj tumultoj en Akajo. Lizipo, kiu plej simpatiis kun la korinta junulo, penis fidele pentri la bontonecon de lia konduto, liajn bonedukajn manierojn, lian bonfaran moralan influon al siaj ofte malesperantaj kaj ribelemaj kunuloj.

Post longaj konsideroj Sergio kun profunda nobleco parolis:

– Mi ne povas konsenti, ke Jeziel estu ĵetita en la maron. Mi ŝuldas al tiu sklavo dankon por tia sindono, kiu egalvaloras mian vivon mem. Mi konas Licinion kaj se necese, mi iam povos klarigi al li ĉi tiun mian konduton. Mi ne dubas, ke la pesto de Cefalonio konsumadas lian organismon, kaj ĝuste tial mi petas vian necesan kunhelpon, por ke tiu junulo estu por ĉiam emancipita.

– Sed tio estas ne ebla... – ekkriis Servio hesitante.

– Kial do? – rediris la romano. – En kia tago ni venos al la haveno de Jafo?

– Morgaŭ ĉe vesperiĝo.

– Nu, mi esperas, ke vi, amikoj, ne kontraŭstaros miajn planojn: tuj kiam ni atingos la havenon, mi kondukos Jezielon en boato ĝis la marbordo, pretekstante bezonon al muskola ekzerciĝo, kiun mi devas rekomenci.

Tie ni lin liberigos. Tio estas faro, kiu al mi altrudiĝas, laŭ miaj principoj.

– Sed, sinjoro... – konsideris la ŝipestro sendecide.

– Mi akceptas neniajn limigojn, des pli, ĉar Licinio Minucio estas malnova kamarado de mia patro.

Kaj li daŭrigis post momenta medito:

– Ĉu vi ne estis jetonta la junulon en la maron?

– Jes.

– Nu, registru do en viaj notoj, ke la sklavo Jeziel, atakita de nekonata malsano, kiun li ricevis en Cefalonio, ekhavis sian tombon en la maro, antaŭ ol la pesto infektos la ŝipanojn kaj pasaĝerojn. Por ke la junulo sin ne kompromitu, mi donos al li koncernajn instrukciojn per iaj kelke da nepre obeendaj ordonoj. Krom tio, mi rimarkis, ke li estas sufiĉe malfortiĝinta, por sukcese rezisti al la plej akraj krizoj de la nun ankoraŭ komenciĝanta malsano. Kio povas aserti, ke li venkos? Kiu scias, li mortos forlasite ĉe la dua minuto de libereco?

La ŝipestro kaj la kontrolisto interŝanĝis inteligentan rigardon de silenta reciproka akordo.

Post longa paŭzo Servio konsentis, konfesante sian malvenkon:

– Bone, tiel estu.

La juna patricio etendis al ili ambaŭ la manon kaj diris:

– Pro ĉi tiu komplezo al mia ŝuldo de konscienco vi havas en mi amikon, kiun vi ĉiam povas disponi.

Post nelonge Sergio alproksimiĝis al la junulo, duondormanta apud lia kajuto kaj jam posedita de la komenciĝanta febro, kaj delikate kaj bonkore parolis al li:

– Jeziel, ĉu vi dezirus reveni en la liberecon?

– Ho sinjoro! – ekkriis la junulo, revigligante la organismon per radio da espero.

– Mi volas kompensi al vi la sindonon, kiun vi oferis al mi dum la multaj tagoj de mia malsaneco.

– Mi estas via sklavo, sinjoro. Vi ŝuldas al mi nenion.

Ambaŭ paroladis greke; subite ekpensinte pri la estonta situacio, la patricio demandis:

– Ĉu vi povoscias la idiomon ordinaran en Palestino?

– Mi estas infano de izraelidoj, kiuj instruis al mi la patran lingvon en mia plej frua infaneco.

– Ne estos do por vi malfacile rekomenci la vivon en tiu provinco.

Kaj prikalkulante siajn vortojn, kvazaŭ li timus ian surprizon kontraŭ liaj projektoj, li aldonis:

– Jeziel, vi ja scias, ke vi estas malsana, eble tiel serioze, kiel mi antaŭ kelkaj tagoj. Pro la ebleco de ĝenerala infekto dank'al la ekzisto de multenombraj homoj en la galero, la ŝipestro intencis ĵeti vin en la maron, sed morgaŭ posttagmeze ni venos al Jafó, kaj mi ja uzos ĉi tiun cirkonstancon, por vin liberigi. Vi certe rekonas ke, tiel agante, mi malobeas gravajn ordonojn, kiuj prezidas en la interesoj de miaj sampatrujanoj, kaj tiel estas juste, ke mi petas vin teni ĉi tion en sekreto.

– Jes, sinjoro – respondis la junulo treege senfortiĝinta, malfacile penante kunordigi la ideojn.

– Mi scias, ke la malsano baldaŭ forte pligraviĝos – daŭrigis la protektanto. – Mi donos al vi la liberecon, sed nur via Dio povos doni al vi la vivon. Se vi resaniĝos, vi tamen devas esti ia nova homo, kun malsama nomo. Mi ne deziras, ke miaj amikoj mem akuzu min pri perfido, kaj mi devas kalkuli je via kunhelpo.

– Mi obeos vin en ĉio, sinjoro.

Sergio direktis al li noblan rigardon kaj finis:

– Mi faros ĉiujn disponojn. Mi donos al vi iom da mono por viaj unuaj bezonoj kaj vi surmetos unu el miaj malnovaj tunikoj; sed kiel eble plej baldaŭ foriru de Jafó en la internon de la provinco. La haveno estas ĉiam plena de romaj maristoj, scivolaj kaj malicemaj.

La malsanulo faris geston de danko kaj Sergio foriris, por kontentigi la vokon de kelke da amikoj.

En la sekvanta tago, en la antaŭkalkulita horo, estis vidata la domaro de Palestino. Kiam eklumis la unuaj noktaj astroj, malgranda barko, okupita de du homoj, kies figuroj perdiĝis en la ombro, alproksimiĝis al dezerta loko de la marbordo. Lastaj vortoj de bona konsilo kaj adiaŭo, kaj la hebrea junulo kortuŝite kisis la dekstran manon al sia bonfarinto, kiu revenis al la galero rapide, kun trankvila konscienco.

Tuj post la unuaj paŝoj Jeziel sidiĝis, premata de la doloroj, kiuj suferigis lian tutan korpon, kaj de la natura malvigleco, kiun kaŭzis la lin konsumanta febroy. Konfuzaj ideoj valsadis en lia cerbo. Li volis pensi pri la feliĉo de la liberiĝo; li deziris fikse prezenti al si la bildon de sia fratino, kiun li nepre serĉos ĉe la unua oportuna okazo, sed stranga torporo ŝancelis liajn fakultojn, naskante en li nevenkeblan dormemon. Li indiferekte ekrigardis la stelojn, kiuj svarmis en la nokto, malvarmetigita de la marventeto. Li rimarkis movadon en la proksimaj domoj, sed restis kviete en la herbejo, kien li rifuĝis, apud la marbordo. Strangaj premsonĝoj pezis sur lia fizika ripozo, dum la vento karesis al li la febrantan frunton.

Frue matene li vekiĝis ĉe la kontakto de nekonataj manoj, kiuj senhonte traserĉis lian tunikon.

Dormeme malferminte la okulojn, li rimarkis, ke la unuaj eklumoj de la matenkrepusko ruĝe strias la horizonton. Sagacmiena viro estis klinita super li kaj serĉis ion kun malpacienco, kies motivon la hebrea junulo tuj divenis, konvinkite, ke li havas antaŭ si unu el tiuj ordinaraj maliculoj, avidantaj la aliulan monon. Li ekstremis kaj faris pretervolan geston, rimarkinte, ke la neatendita atakinto levis la dekstran manon, tenante ian ilon por lin tuj murdi.

– Ne mortigu min, amiko – li balbutis kun tremanta voĉo.

Ĉe ĉi tiuj vortoj, kortuŝe diritaj, la fripono retenis la mortigan frapon.

– Mi donos al vi la tutan monon, kiun mi havas ĉe mi – malgaje finis la junulo.

Kaj serĉfosante la saketon, kie li tenis la nemultan monon, kiun la patricio al li donacis, li ĉion fordonis al la nekonato, kies okuloj ekfulmis de avidemo kaj plezuro. En palpebruma daŭro tiu ĝenata fizionomio aliĝis en la ridetanta mienon de homo, kiu deziras malplisuferigi kaj helpi.

– Ho, vi estas treege grandanima! – li murmuris, ekprenante la monujon.

– Mono estas ĉiam bona – diris Jeziel –, kiam per ĝi ni povas gajni la simpatian aŭ favorkorecon de la homoj.

Lia kunparolanto ŝajnis, kvazaŭ li ne komprenis la filozofian amplekson de ĉi tiuj vortoj, kaj rediris:

– Via boneco tamen ne bezonas la kunhelpon de iaj fremdaj elementoj, por ekhavi bonajn amikojn. Mi, ekzemple, nun iris al mia laboro en la haveno, sed mi tiel simpatiis vian situacion, ke mi ĉi tie staras por ĉia servo al vi.

– Via nomo?

– Irineo el Krotona, por al vi servi – respondis la demandito, videble kontenta de la mono, kiu plenigis al li la saketon.

– Mia amiko – diris la junulo treege senfortiĝinta –, mi estas malsana kaj ne konas ĉi tiun urbon, ke mi prenis ian decidon. Ĉu vi povus indiki al mi ian gast-ejon aŭ iun homon, kiu povus fari al mi la karitaton doni al mi rifuĝon?

Irineo faris mienon de hipokrita kompatato kaj respondis:

– Mi bedaŭras, ke mi havas nenion, por disponigi al vi, kaj ankaŭ ke mi ne scias, kie troviĝus ia rifuĝejo konvena al vi, kiel necese. Vere estas, ke por fari mal-bonon, ĉiuj estas pretaj, sed for fari bonon...

Poste, nelonge konsiderinte, li aldonis:

– Ha, nun io venas al mi en la kapon: mi konas iajn homojn, kiuj povus helpi al vi; tio estas la homoj de la “Vojo” (*).

Ili interŝanĝis ankoraŭ kelke da vortoj kaj tiam Irineo volontis konduki lin al plej proksima konato, subtenante lian ŝanceliĝantan malsanan korpon.

La karesa matena suno komencis vekti la Naturon per siaj varmaj kaj vigligaj radioj. Mallongiginte la iradon per senkultura vojeto, Jeziel, subtenate de la bandito, fariĝinta bonfaranto, haltis ĉe la pordo de humilaspekta domo. Irineo eniris kaj el tie revenis kune kun agrabla-

(*) Unua nomo de la Kristanismo. – *Noto de la Aŭtoro.*
Vd. en Agoj, 9:2 – *La Trad.*

miena grandaĝa sinjoro, kiu kore etendis al la hebrea junulo la manon, dirante:

– De kie vi venas, frato?

La junulo miris pro tiaj grandaj afableco kaj delikateco de homo, kiun li vidis je la unua fojo. Kial tiu donis al li la familian titolon, aparte uzatan en la plej intima rondo de homoj, naskiĝintaj sub sama tegmento?

– Kial vi nomas min frato, se vi min ne konas? – li kortuŝite demandis.

La demandito, kun nobla rideto, respondis:

– Ni ĉiuj estas granda familio en la Kristo Jesuo.

Jeziel ne komprenis. Kiu estas tiu Jesuo? Ĉu ia nova dio por tiuj, kiuj ne konas la leĝon? Konstatante, ke lia malsaneco ne favoras religiajn aŭ filozofiajn konsiderojn, li respondis nur jene:

– Dio rekompencu vin pro via grandanima gastigado. Mi venas de Cefalonio kaj dumvoje mi serioze malsaniĝis; tial mi en ĉi tiu sanstato petas la helpon de via karitemo.

– Efraim – diris Irineo al la domomastro –, nia amiko febras kaj lia farto postulas zorgojn. Vi, unu el la bonaj homoj de la “Vojo”, lin certe akceptas kun la koro dediĉata al la suferantoj.

Efraim pli alproksimiĝis al la malsana junulo kaj rimarkis:

– Li ne estas la unua malsanulo el Cefalonio, kiun la Kristo venigas al mia pordo. Ankoraŭ antaŭhieraŭ alia venis ĉi tien kun la korpo kovrita de malbenignaj vundoj. Cetere, konante la gravecon de tiu okazo, mi intencas posttagmeze konduki lin al Jerusalemon.

– Sed, ĉu estas necese iri tiel malproksimen? – demandis Irineo iom mire.

– Nur tie ni havas pli grandan nombron da kunlaborantoj – li humile klarigis.

Aŭdante ilian interparolon kaj konsiderante la neceson forlasi la havenon, obeante la rekomendojn de la patricio, kiu montriĝis al li tiel amika, reliberigante lin, Jeziel sin turnis al Efraim kun humila kaj malĝoja peto:

– Pro Dio, prenu min kun vi en Jerusalemon! Pro kompatato!

La alparolito, elmontrante naturan bonecon, sen pli granda miro konsentis kaj diris:

– Vi venos kun mi.

Fordonite de Irineo al la flegado de Efraim, la malsanulo ricevis zorgojn de efektiva amiko. Se ĝin ne malhelpus la febro, li pli intime konatiĝus kun tiu frato, penante pli detale ekkoni la noblajn principojn, kiuj igis tiun etendi al li helpan manon. Li tamen apenaŭ povis pensi pri sia malsano por la necesa kuracado, sed ne pri iaj ĝentilaj demandoj.

Ĉe la sunsubiro, profitante la malvarmeton de la vespero, ĉaro, zorge sunŝirmita per malkara ŝtofo, ekveturis de Jafo direkte al Jerusalemo.

Zorge veturante, por ne lacekonsumi la kompatindan beston, Efraim kondukis la du malsanulojn al la proksima urbo, por ekhavi la necesajn rimedojn. Haltante ie kaj ie, nur en la morgaŭa mateno la veturilo venis al la pordo de domo ja ekstere tre malriĉa. Gajmiena junulo kuris al la ĵusveninto, kiu per intima tono lin demandis:

– Urija, ĉu vi povos diri al mi, ĉu Simon Petro estas en la domo?

– Jes, tuj.

– Ĉu vi povos voki lin en mia nomo?

– Jes, tuj.

Akompanata de Jakobo, frato de Levi, Simon aperis kaj akceptis la vizitanton kun granda korelverŝado. Efraim klarigis al li la motivon de sia ĉeesto: du homoj, forlasitaj de la sorto, postulas urĝan helpon.

– Sed ĉi tio estas apenaŭ farebla – rimarkis Jakobo. – Ni jam havas kvardek naŭ malsanulojn, ĉiujn sur litoj.

Petro noble ekridetis kaj konsideris:

– Nu, Jakobo, se ni estus fiŝkaptantoj, estus juste, se ni ne akceptus tian aŭ tian devon ekster la kadro de la ĉiutagaj neprokrasteblaj ŝuldoj ĉe la familio, kies organizado venas de Dio; sed nun la Majstro ŝarĝis nin per helpado al ĉiuj liaj suferantaj fratoj. Nun nia tempo estas difinita por tio; ni do vidu, kion ni povos fari.

Kaj la bonkora Apostolo antaŭenpaŝis, por akcepti la du malfeliĉulojn.

De kiam li venis de Tiberias en Jerusalemon, Simon fariĝis centra ĉelo de granda filantropia movado. La filozofoj de la mondo predikadis ĉiam de sur komfortaj katedroj, sed neniam malsupreniris al la areno de la persona agado, apud tiuj malpli favoritaj de la sorto. Jesuo per diaj ekzemploj estis reforminta la tutan manieron de predikado de la virto. Vokante al si la afliktitojn kaj la malsanulojn, li starigis en la mondo la procedon de la vera socia bonfarado.

La unuaj helporganizacioj estiĝis per la penado de la Apostoloj ĉe la ama influo de la lecionoj de la Majstro. Tial la loĝejo de Petro, donitaĵo de pluraj amikoj de la “Vojo”, estis plenplena de senesperaj malsanuloj kaj mizeruloj. Tie estis maljunuloj, venintaj el Cezarea, kun naŭzaj ulceroj; frenezuloj, kiuj venis de la plej malproksimaj regionoj, kondukite de parencoj, sopirante plifaciligon de siaj suferoj; paralizitaj infanoj, el Idumeo, en la patrinaj brakoj; ĉiuj, altiritaj de la famo de la nazareta profeto, kiu revivigadis mortintojn kaj reĝuigadis trankvilecon al la plej malfeliĉaj koroj en la mondo.

Estas kompreneble, ke ne ĉiuj resaniĝis, kio devigis la iaman fiŝkaptiston kun patra amo akcepti ĉiujn en necesbezono. Ekloĝinte tie kune kun sia familio, li estis helpata precipe de Jakobo, filo de Alfeo, kaj de Johano; sed baldaŭ ankaŭ Filipo kaj liaj filinoj ekloĝis en Jerusalemon kaj kunlaboris en la granda frata penado. Tiel kreskis la movado de ĉiaspecaj mizeruloj, ke jam de longe Simon ne povis sin fordoni al alia tasko koncerne la predikadon de la Bona-Novajaĵo de la Regno. La disvastiĝo de tiuj taskoj ligis la iaman disĉiplon al la plej grandaj ĉeloj de la reganta judismo. Devigite uzi la helpon de la plej eminentaj elementoj de la urbo, Petro sentis sin ĉiam pli sklavo al siaj bonfarantaj amikoj kaj favorataj malriĉuloj, kiuj venadis el ĉiuj lokoj al lia spirito de sindona kaj sincera disĉiplo kiel al ekstrema rimedo.

Kontentigante la konfidajn petojn de Efraim, li faris disponojn, por ke ambaŭ malsanuloj estu engastigitaj en la malriĉan domon.

Sur pura kaj modesta lito Jeziel kuŝiĝis, en plena senkonscieco, en la deliro de la lin konsumanta febro;

tamen liaj seninterrilataj vortoj montris tiel ĝustan scion de la sanktaj tekstoj, ke Petro kaj Johano en speciala maniero interesiĝis por tiu junulo kun palaj kaj malĝojaj vangoj. Precipe Simon pasigadis tutajn horojn lin plezure aŭdante kaj notante al si liajn profundajn dirajojn, kvankam diktatajn de la febra ekzaltiĝo.

Post du lacegigaj semajnoj Jeziel pli bone ekfartis kaj reordigis siajn fakultojn, por pli ĝuste analizi kaj senti sian novan situacion. Li korinkliniĝis al Petro, simile kiel amanta filo al leĝa patro. Rimarkante lian zorgadon, ĉe ĉiu lito, ĉe ĉiu mizerulo, la hebrea junulo spertis ĉarman intiman surpriziĝon. La ekŝiŝisto el Kapernaum, ankoraŭ rilate juna, estis vivanta ekzemplo de frata abnegacio.

Tuj kiam li ekresaniĝis, Jeziel estis transkondukita en pli kvietan ejon, en la mildan ombron de maljunaj daktilarboj, kiuj ĉirkaŭis la malnovan domon.

Ekde la unuaj tagoj naskiĝis inter ambaŭ la magmeta fluo de la grandaj koraj altiroj.

En tiu mateno Simon lin simpatie observadis, sed malgraŭ la prava scivolo de sia animo pri tiu interesa gasto li ankoraŭ ne havis oportunan okazon por pli intima interŝanĝo de ideoj, ke li sondus ties pensojn, por perfekte ekkoni liajn sentojn kaj devenon. Ĉe la milda blovo de la matena venteto, sub la foliriĉaj arboj, la Apostolo faris al si kuraĝon kaj ĉe unu momento, distrinte la resaniĝantan junulon per kelke da koraj vortoj, li penis zorge penetri ties misteron, dirante:

– Amiko – li diris kun afabla rideto –, nun, kiam Dio reĝuigis al vi la altvaloran sanon, mi ĝojas, ke ni akceptis vin ĉe ni. Nia ĝojo estas ja sincera, ĉar eĉ en la plej malgrandaj detaloj de via estado inter ni vi elmontris la spiritan estecon de vera ido de la hejmoj, organizitaj de Dio, laŭ via konado de la sanktaj tekstoj. Kaj min tiel forte impresis viaj paroloj pri Jesaja, kiam vi deliradis en alta febro, ke mi dezirus ekscii, el kiu tribo vi devenas.

Jeziel komprenis, ke tiu sincera amiko, antaŭe frato plena de amo en la plej krizaj momentoj de lia malsaneco, deziris kun delikata psikologia sagaceco koni lin pli

bone, intime kaj profunde koni lian personecon. Li opiniis tion justa kaj konsideris, ke li ne devas malŝati la helpon de vere frata koro, por la rafinado de la propraj spiritaj fortoj.

– Mia patro naskiĝis en la ĉirkaŭaĵo de Sebasto kaj devenis de la tribo de Isahar – li respektive klarigis.

– Kaj ĉu li tiel multe sin donadis al la studado de Jesaja?

– Li sincere studadis la tutan Testamenton, eble preferante nenian libron, sed min Jesaja ĉiam impresis profunde pro la beleco de la diaj promesoj, kiujn li portis, anoncanta al ni la Mesion, pri kies veno mi pensas de mia infaneco.

Simon Petro, ekridetis de granda ĝojo kaj diris:

– Sed, ĉu vi ne scias, ke la Mesio jam venis?

Jeziel faris surprizan ekmovon sur la improvizita seĝo.

– Kion vi diras? – li vivece demandis.

– Ĉu vi neniam aŭdis pri Jesuo el Nazaret?

Kvankam li malprecize memoris, kion Efraim al li diris, li respondis:

– Neniam!

– Nu, la nazareta profeto jam portis al ni la mesaĝon de Dio por ĉiuj jarcentoj.

Kaj Simon Petro, kun okuloj brilantaj en la luma flamo de tiuj, kiuj sentas sin feliĉaj, rememorante feliĉan tempon, parolis al li pri la ekzemplado de la Sinjoro, farante perfektan buŝan biografion de la altega Majstro.

En forte koloraj trajtoj li rememoris tiujn tagojn, kiam li gastigis la profeton en sia modesta domo apud Tiberiado, la ekskursojn tra la najbaraj vilaĝoj, la veturadoj en ŝipeto de Kapernaum al la lokoj apud la lago. Estis admirindaj la nepriskribebla emocio de lia voĉo, lia profunda ĝojo, kun kiu li rememoris la farojn kaj predikojn de la Majstro apud la ondanta lago, karesata de la vento, la poezion kaj la mildecon de la vesperkrepuskoj. La ardanta imagemo de la Apostolo sciis teksti saĝajn kaj brilajn konsideradojn, rememorante iun resanigitan leprulon, iun blindulon, kiu ricevis la vidadon, iun mal-sanan infaneton, kiu tuj resaniĝis.

Jeziel sorbadis liajn vortojn, tute ravite, kvazaŭ li eltrovis ian novan mondon. La mesaĝo de la Bona-Novaĝo penetris lian disreviĝintan spiriton kvazaŭ milda balzamo.

Kiam Simon laŭŝajne estis finonta sian rakontadon, li ne povis sin deteni kaj demandis:

– Kaj la Mesio? Kie estas la Mesio?

– Antaŭ pli ol unu jaro – respondis la Apostolo, estingante sian flamiĝon ĉe la malĝoja rememoro – li estis krucumita ĉi tie, en Jerusalemo, inter du rabistoj.

Poste li elnombris la korŝirajn turmentojn, la dolorajn maldankojn, kiuj trafis la Majstron, liajn lastajn instruojn kaj lian gloran releviĝon en la tria tago. Poste li parolis pri la unuaj tagoj de la apostolado, pri la okazaĵoj ĉe Pentekosto kaj pri la lastaj aperoj de la Sinjoro sur la ĉiam resopirata scenejo de la malproksima Galileo.

Al Jeziel estis malsekaj la okuloj; tiuj malkaŝoj tuŝis lian koron, kvazaŭ li konis la profeton el Nazaret, kaj rilatigante ties figuron al la tekstoj, kiujn li tenis memore, li ekdiris, preskaŭ laŭte, kvazaŭ parolante en sia animo:

“Li elkreskis antaŭ Li kiel juna branĉo kaj kiel radiko en tero senakva...

Li estis malestimata kaj evitata de homoj.

Kiel iganta deturni de li la vizaĝon, li estis malestimata, kaj li havis por ni nenian valoron.

Vere, niajn malsanojn li portis sur si, kaj per niaj suferoj li sin ŝarĝis.

Ni opiniis lin plagita, frapita de Dio, kaj humiligita.

Li estis turmentata, tamen li humiliĝis; kiel ŝafido kondukata al buĉo, li ne malfermis sian buŝon. Kiam lia animo estos preninta sur lin elacetan punon, la intenco de la Eternulo sukcesos per lia mano.”^()*

Mirante tiel profundan konadon de la sanktaj tekstoj, Simon fine diris:

^(*) El la Ĉap. 53, de Jesaja. – Noto de la Aŭtoro.

– Mi alportos al vi la novajn tekstojn; tio estas la notoj de Levi ^(*) pri la reviviĝinta Mesio.

Kaj post nemultaj minutoj la Apostolo enmanigis al li la notojn de la Evangelio. Jeziel ne legis, sed forglutis. Li laŭte reliefigis, unu post alia, ĉiujn pecojn de tiu rakonto, sekvata de la atento de Petro intime kontenta.

Post la supraĵa trarigardo la junulo diris:

– Mi trovis la trezoron de la vivo: mi nun devas ĝin pli kviete ekzameni; mi volas ensorbi ĝian lumon, ĉar mi sentas ĉi tie la ŝlosilon de la homaj enigmoj.

Preskaŭ plorante, li voĉlegis la Predikon sur la Monto, akompanata de la emociaj memoroj de Petro. Poste ankaŭ ekkomparis la instruojn de la Kristo kun la profetaĵoj, kiuj anoncis lian venon. La juna hebreo estis forte kortuŝita kaj deziris koni la plej malgrandajn epizodojn de la vivo de la Majstro. Simon, edifita kaj ĝojanta, penis lin kontentigi. La grandanima amiko de Jesuo, tiel nekomprenata en Jerusalemo, spertis fieran ĝojon pro tio, ke li trovis junulon, kiu entuziasmiĝis ĉe la ekzemploj kaj instruoj de la senkompara Majstro.

– De kiam mi rekonsciiĝis en via domo – diris Jeziel –, mi konstatis, ke vi sekvas principojn, al mi ne konatajn. Tiom multe da absorba zorgo pri helpado al la nefavoritoj de la sorto estas leciono tute nova por mia animo. La malsunuloj, kiuj vin benas, kiel mi nun faras, estas protektatoj de tiu Kristo, kiun mi ne havis la feliĉon koni.

– La Majstro helpadis al ĉiuj suferantoj kaj rekomendis, ke ni same agu en lia nomo – emfaze klarigis la Apostolo.

– Konforme al la instruoj en Levidoj – diris Jeziel –, ĉiu urbo devas havi, malproksime de siaj pordegoj iun lokon, destinitan por la lepruloj kaj aliaj homoj, rigardataj kiel malpuraj, sed Jesuo donis al ni hejmon en la koro de siaj sekvantoj.

– La Kristo portis al ni la mesaĝon de amo – klarigis Petro –; li kompletigis la leĝon de Moseo, iniciatante

(*) Mateo. – *Noto de la Aŭtoro.*

novan instruadon. La leĝo antikva estas justu, sed la Evangelio estas amo. Dum la iama kodo preskribis “okulon pro okulo, denton pro dento”, la Mesio instruis, ke ni devas “pardoni ĝis sepdekoble sep fojoj” kaj ke se iu volas forpreni al ni la tunikon, ni donu al li ankaŭ nian mantelon.

Jeziel kortuŝiĝis kaj ekploris. Tiu amplena kaj bona Kristo, pendanta sur la kruco de la homa malnoblegeco, estis ja la personiĝado de ĉiuj heroaĵoj de la mondo. Kiel li malpli suferis, konsiderante ties personon! Li sentis sin feliĉa, ke li ne reagis kontraŭ la perfortaĵoj, kiujn li spertis. Kristo estis la Filo de Dio kaj tamen ne evitis la suferon. Ties kaliko superbordiĝis kaj Petro sentigis al li, ke en la plej amaraj momentoj tiu Majstro nekonata kaj humila en la mondo sciis doni la lecionon de kuraĝo, abnegacio kaj vivo. Kiel ekzemplon de ties amo tie estis tiu simpla kaj karesplena viro, kiu nomis lin frato kaj lin akceptis kiel sindona patro. La junulo rememoris siajn lastajn tagojn en Korinto kaj longe ekploradis. Tiam, malfermante sian koron, li ekprenis la manojn al Petro kaj rakontis al li sian tutan tragedion, nenion mankigante kaj petante de li konsilojn.

Finante sian rakontadon, li kortuŝita aldonis:

– Vi malkaŝis al mi la lumon de la mondo; pardonu do, ke mi malkaŝas al vi miajn suferojn, kiuj certe estas justaj. Vi havas en la koro la lumon de la parolo de la Savinto kaj sendube inspiros mian malfeliĉan vivon.

La Apostolo lin brakumis kaj rediris:

– Mi opinias saĝe, ke vi tenu vin anonime, ĉar Jerusalemo svarmas per romanoj kaj ne estus juste kompromiti la grandaniman amikon, kiu vin reliberigis. Via afero tamen ne estas nova, mia amiko. Mi troviĝas en ĉi tiu urbo de preskaŭ unu jaro, kaj ĉi tiujn litojn okupis la plej strangaj homoj. Mi, iam tre malriĉa fiŝkaptisto, akiris al mi grandan sperton dum la lastaj nemultaj monatoj! Ĉi tiujn pordojn frapis ĉifonvestitaj viroj, kiuj estis gravaj politikistoj, lepraj virinoj, kiuj estis preskaŭ reĝinoj! En kontakto kun la historio de tiom da disruiniĝintaj kasteloj, ĉe la trompo de la homaj vantaĵoj, mi nun rekonas, ke la animoj antaŭ ĉio bezonas la Kriston.

Ĉi tiuj strangaj klarigoj havigis kuraĝon al Jeziel, kiu dankplena demandis:

– Ĉu vi opinias, ke mi povus per io esti utila al vi? Mi, kiu estis sklavo de homoj, dezirus nun esti sklavo al la Savinto, kiu sciis vivi kaj morti por ni ĉiuj.

– Vi de nun estos mia filo – ekkriis Simon ravita.

– Kaj ĉar mi devas renaskiĝi en Kristo, kiel do mi estos nomata? – demandis Jeziel kun okuloj brilantaj de ĝojo.

La Apostolo konsideris momenton kaj respondis:

– Por ke vi ne forgesu Akajon, kie la Sinjoro bonvolis venigi vin al sia dia servado, mi baptos vin en la novan kredon per la greka nomo Stefano.

Ankoraŭ pli solidiĝis la simpatioligiloj, kiuj de la unua momento ilin kunetenis, kaj la junulo neniam forgesos tiun renkontiĝon kun la Kristo en la ombro de la daktilarboj, aŭreolitaj de lumo.

Dum unu monato Jeziel, nun konata kiel Stefano sin fordonis al la studado de la tuta ekzemplado kaj instruoj de la Majstro, kiun li ne konis persone.

En la domo de la Apostoloj, en Jerusalemo, ĉiam pli kreskis la helpado al la mizeruloj, kio postulis multe da amo kaj sindono. Tio estis frenezuloj el ĉiuj provincoj, forlasitaj maljunuloj, malgrasegaj kaj malsataj infanoj. Ne nur tio. En la kutima tempo de manĝoj, longaj vic-oj da ordinaraj almozuloj petegis sian teleron da supo. Kun grandega sinofero portante sur si la taskojn, Johano kaj Petro, helpate de siaj kamaradoj, konstruis modestan pavilonon, destinitan por la servoj de la eklezio, kiun ili ĵus fondis, por dissemi la mesaĝojn de la Bona-Novaĵo. Tamen la helpado al la malriĉuloj ne ebligis okazon al la evangelia parolo. Tiam Johano konsideris nesaĝe, ke la rektaj disĉiploj de la Sinjoro flanken metis la semejon de la dia parolo kaj uzadis sian tutan disponeblan tempon ĉe la servado en la manĝejo kaj malsanulejoj, ĉar de tago al tago kreskis la nombro da malsanaj kaj malfeliĉaj homoj, kiuj petis pri helpo la sekvantojn de Jesuo kiel la lastan esperon por iliaj personaj aferoj. Krom tiuj, ankaŭ bonfarantoj de la nova institucio petis spe-

cialajn favorojn por siaj protektatoj, amikoj postulis disponojn por la bono de la orfoj kaj vidvinoj.

Ĉe la unua kunsido de la humila eklezio Simon Petro tial petis, ke oni nomu sep helpantojn por la servado en la malsanulejoj kaj manĝejoj, kio estis aprobita kun ĝenerala plaĉo. Inter tiuj sep fratoj troviĝis Stefano, elektita kun la simpatio de ĉiuj.

Nova vivo komenciĝis por la junulo el Korinto. Tiuj samaj spiritaj virtoj, kiuj ornamis lian personon kaj tiel kunhelpis por la resaniĝo de tiu patricio, kiu lin reliberigis, disverŝis sur la malsanulojn kaj mizerulojn de Jerusalemo la plej sanktajn konsolojn. Multe da malsanuloj, gastigitaj en la domo de la disĉiploj, resaniĝis. Senesperaj maljunuloj rekuraĝiĝis ĉe la influo de lia parolo, inspirata de la dia fonto de la Evangelio. Afliktitaj patrinoj iris al li por certeca konsilo; virinoj el la popolo, lacekonsumitaj de laborado kaj suferoj de la vivo, sopirantaj pacon kaj konsolon, klopodis por lia revigliganta frata ĉeesto.

Simon Petro plej ĝojis ĉe la venkoj de sia spirita filo. La mizeruloj havis la impreson, kvazaŭ al ili venis ia nova heroldo de Dio, por plifaciligi iliajn dolorojn.

Post nelonge Stefano fariĝis fama en Jerusalemo pro siaj kvazaŭ miraklaj faroj. Li estis rigardata kiel elektita de la Kristo, kaj efektive lia energia kaj sincera agado en la daŭro de nemultaj monatoj gajnis la plej grandajn konkerojn por la Evangelio de amo kaj pardono. Lia nobla klopodado ne limiĝis je la laboro kvietigi la malsaton de la nefavoritaj de la sorto. Inter la galileaj apostoloj lia parolo, prilumata de la arda kaj pura fido, brilis ĉe la predikoj de la eklezio. Dum preskaŭ ĉiuj kamaradoj, pretekstante ne vundi de longe starigitajn principojn, sin detenis de publikaj komentarioj ekster la konsideroj agrablaj al la reganta judismo, Stefano kuraĝe prezentis la Savinton de la mondo en la gloro de la novaj diaj revelacioj, indiferenta al la bataloj, kiujn li levos, studante la vivon de la Majstro per sia parolo flamanta de lumo. La disĉiploj mem miris la magiecon de liaj profundaj inspiroj. Li estis animo, hardita en la super-

bela forĝoforno de sufero, kaj tial lia predikado estis plena de larmoj kaj ĝojoj, alvokoj kaj aspiroj.

En la daŭro de nemultaj monatoj lian nomon kronis surpriza respekto. Kaj en la fino de la tago, en la tempo de la vesperpreĝoj, la junulo el Korinto, apud Petro kaj Johano, paroladis pri siaj vizioj kaj esperoj, plena de la spirito de tiu adorinda Majstro, kiu per la Evangelio semis en lia koro la benatajn stelojn de senfina ĝojo.



Sur la vojoj al Jaf

Ni troviĝas en la malnova Jerusalemo, en hela mateno de la jaro 35.

En la interno de solida konstruaĵo, kie ĉio elspiras komforton kaj lukson de tiu tempo, ankoraŭ juna viro ŝajnas senpacienca, atendanta iun malfruantan. Ĉe la plej malgranda bruo sur la strato li rapidece kuras al la fenestro, poste denove sidiĝas kaj ekzamenas papirusojn kaj pergamenajn dokumentojn, iel pasigante la tempon.

Veninte en la urbon post semajno da lacegiga vojaĝo, Cadok atendis sian amikon Saŭlo por la kora ĉirkaŭbrako de ilia multejara amikeco.

Baldaŭ tre malgranda ĉaro, simila al la romaj bigoj (*), tirara de du belaj blankaj ĉevaloj, haltis ĉe la pordo. Post minuto ili kore brakumis unu la duan, radiante de ĝojo kaj juneco.

La juna Saŭlo prezentis la tutan vivecon de fraŭlo preskaŭ tridekjara. En la mieno plena de vireco kaj potenco beleco la izraelidaj trajtoj aparte montriĝis en la profundaj kaj akraŭdaj okuloj, propraj al la fajraj kaj nebrideblaj temperamentoj, riĉaj je sagaceco kaj decidemo. Li havis sur si tunikon de patricio kaj prefere parolis en la greka lingvo, al kiu li kutimis en sia naskiĝurbo ĉe la kunevivado de estimataj instruistoj, spertiĝintaj en la skoloj de Ateno kaj Aleksandrio.

(*) *Bigo*, en la latina lingvo “bigatus”. Ĉi tiun vorton mi proponis en la romano “Antaŭ du mil jaroj...”, paĝ. 23, por tiaspeca ĉaro; ĝi estus simila al “kvadrigo”, en la latina lingvo “quadriga”, kiun registras la vortaroj de Kabe kaj de Prof. G. Waringhien (ne E. Wüster, kiel mi erare diris en tiu citita romano). Bedaŭrinde tiuj verkoj ne parolas pri ia “bigo”, kaj tial mi trovis necesa tiun enovaĵon. – *La Trad.*

– Kiam vi alvenis? – bonhumore demandis Cadok la vizitanton.

– Mi estas en Jerusalem jam de hieraŭ matene. Mi vidiĝis kun via fratino kaj via bofrato, kiuj, forironte Lidan, donis al mi sciigojn pri vi.

– Kaj kiel vi kondukas vian vivon tie en Damasko?

– Ĉiam bone.

Antaŭ ol fariĝos iu paŭzo, lia amiko rimarkis:

– Sed kiel vi ŝanĝiĝis! Romtipa ĉaro, greklingva parolo kaj...

Sed Saŭlo ne lasis lin daŭrigi kaj finis:

– Kaj la Leĝo en la koro, ĉiam deziranta submeti Romon kaj Atenon al niaj principoj.

– Vi ĉiam la sama! – ekkriis la amiko kun mal-kaŝa rideto –. Cetere mi povas prezenti aldonon al viaj propraj klarigoj. La bigo estas nepre necesa por la vizitoj en florornamita dometo ĉe la vojo al Jafjo; kaj la greka lingvo estas necesa al konversacioj kun vera idino de Isahar, naskiĝinta inter la floroj kaj la marmoraĵoj de Korinto...

– Kiel vi scias tion? – demandis mirante Saŭlo.

– Ho, ĉu mi ne diris al vi, ke mi hieraŭ posttagmeze parolis kun via fratino?

Kaj la du amikoj, sidante en tiutempaj komfortaj brakseĝoj kaj interplektante la konversacion per kelke da pokaletoj de la ebriiga cipra vino, vaste elvolvadis la problemojn de sia persona vivo, rakontante la ĉiutagajn bagatelajn okazaĵojn.

Tre gajhumora, Saŭlo rakontis al sia amiko, ke efektive li enamiĝis en junulinon liarasan, kiu krom eksterordinara beleco havas ankaŭ la plej noblan koron. Ŝia kultado al la hejmo estas unu el plej sanktaj virinaj naturdotoj. Li klarigis la unuan renkontiĝon, kiun ili havis. En kompanio de Aleksandro kaj Gamaliel li antaŭ ĉirkaŭ tri monatoj iris al intima festo, kiun Zeĥarja ben Hanan, grandbienulo ĉe la vojo al Jafjo, donis al kelke da bonsocietaj amikoj honore al la cirkuncidado de infanoj de siaj servantoj. Li aldiris, ke la gastiginto estas iama izraelida komercisto, elmigrinta el Korinto post multe da jaroj da laborado en Akajo, ĉagrenite de la per-

sekutoj, kiujn li suferis. Post grandaj turmentoj dum la veturado de Kenkrea ĝis Cezarea, Zeĥarja alvenis al tiu haveno en tre malbona financa stato, sed lin helpis roma patricio, kiu havigis al li rimedojn, por farmi grandan bienon ĉe la vojo al Jafo, en kelka distanco de Jerusalemo. Kore akceptite en ties hejmo, nun prospera kaj feliĉa, li tie ekkonis en la juna Abigail dolĉan koron de knabino, posedanta la plej belajn moralajn naturdotojn, kiuj povis ornami iun idinon de ŝia raso. Ŝi ja estas lia idealo de junulo: inteligenta, kompetenta en la Leĝo kaj precipe obeema kaj karesema. Amare suferinte en Korinto, kie restis ŝia patro mortinta kaj ŝia frato por ĉiam sklavigita, ŝi estis adoptita de tiuj geedzoj kiel tre kara filino. De tri monatoj ili sin konis reciproke, interŝanĝante la plej rozokolorajn esperojn kaj, kiu scias, eble la Eternulo al ili destinis la geedziĝon, kiel kronon de la sanktaj revoj de la juneco. Saŭlo paroladis kun la entuziasmo propra al lia fajra kaj vibrema temperamento. En lia profunda rigardo oni rimarkis la vivan flamon de la decidemaj sentoj koncerne la korinklinon, kiu superregis lian emociopovon.

– Ĉu vi jam sciigis viajn gepatrojn pri tiuj projektoj? – demandis Cadok.

– Mia fratino intencas en la daŭro de la plej proksimaj du monatoj iri Tarson kaj konigos al ili miajn planojn pri la organizo de mia estonteco. Cetere, vi scias, ĉi tio ne povas nek devas esti demando kun tro rapida decido. Mi pensas, ke al la viro ne estas bone trafe aŭ maltrape decidi pri tia grava demando de sia destino. Obeante nian malnovan instinkton de singardemo, mi de longe ekzamenas miajn proprajn idealojn kaj ankoraŭ ne venigis Abigailon, por dum kelke da tagoj kunvivi kun Delila en nia domo; mi intencas tion fari nur nemultajn tagojn antaŭ la vizito de mia fratino en la patra hejmo.

– Ĉar vi karesas tiom da projektoj por la estonteco – aldonis lia amiko kun bonkora intereso –, kiel staras viaj pretendoj pri tiu ofico en la Sinedrio?

– Mi ne povas plendi kontraŭ la sorto, ĉar la tribunalo nuntempe donas al mi tre specialan povon. Vi ja

scias, ke Gamaliel jam de longe insistas ĉe mia patro pri mia transformigo en Jerusalemon, kie oni promesas al mi elstaran postenon en la administrado de nia popolo. Kiel ni scias, la malnova majstro estas jam grandaĝa kaj deziras forlasi la ŝtatan servadon. Mi lin baldaŭ anstataŭos ĉe la voĉdonado pri la plej altaj decidoj, krom tio, ke mi hodiaŭ ricevas tre bonan salajron, jam ne parolante pri mono, kiu de tempo al tempo venas al mi el Tarso. Super ĉio mi havas la politikan idealon pligrandigi mian prestiĝon ĉe la rabenoj. Ni ne forgesu, ke Romo estas multepova kaj Ateno estas saĝa, kaj tial estas nepre necese vekti la eternan hegemonion de Jerusalemon kiel tabernaklo de la unu sola Dio. Ni do devas fleksi la genuojn de grekoj kaj romanoj antaŭ la leĝo de Moseo.

Sed Cadok, komprenigante, ke li ne tre atentis la naciistan idealismon de sia amiko, ĉiam plu pensadis pri ties persona situacio kaj delikate diris:

– Laŭ tio, kion vi diras al mi, mi ĝoje sciante, ke al via patro ĉiam pli bele prosperas la financa stato – kaj li ja estis ia senfama teksisto...

– Eble ĝuste pro tio – rimarkis Saŭlo – li lernigis al mi metion, kiam mi estis kanabo, por ke mi neniam forgesu, ke la progresado de homo dependas de lia propra penado. Hodiaŭ, post tiom da laborado super la teksilo, li juste ripozas en honesta kaj senzorga maljuneco apud mia patrino. Liaj karavanoj da kameloj trairas la tutan Kilikion kaj la transportoj certigas al li ĉiam pli grandan enspezon.

La konversacio daŭris plu animita, kaj ĉe unu momento la junulo el Tarso demandis sian amikon pri la motivoj, kiuj lin venigis Jerusalemon.

– Mi venis certiĝi pri la resaniĝo de mia onklo Filodemo, kies mallnova blindeco malaperis per iaj misteraj procedoj.

Kaj kvazaŭ lia cerbo estis plena de ĉiaspecaj demandoj, por kiuj li ne trovis respondon en siaj propraj scioj, li demandis:

– Ĉu vi jam aŭdis pri la homoj de la “Vojo”?

– Ho jes! Androniko antaŭ longe parolis al mi pri ili. Ĉu tio ne estas iaj kompatindaj galileanoj, ĉifon-

vestitaj kaj malkleraj, kiuj kaŝe loĝas en la malŝatindaj kvartaloj?

– Jes, ĝuste tiuj.

Kaj li rakontis, ke iu viro, nomata Stefano, posedanta, laŭ la popola famo, supernaturajn virtojn, reĝuigis al lia onklo la vidadon, ĉe la mirego de multaj homoj.

– Kio tio estas? – ekkriis la miranta Saŭlo. – Kiel do Filodemo povis submetiĝi al tiaj aĉaj eksperimentoj? Ĉu li ne komprenis, ke ĉi tiu fakto eble radikas en la artifiko de la malamiko de Dio? De kiam Androniko la unuan fojon parolis al mi pri ĉi tiu afero, mi ofte aŭdis komentariojn pri tiuj homoj kaj eĉ interŝanĝis ideojn kun Gamaliel, por bridi tiujn pereigajn klopodojn; tamen la majstro, kun sia tute propra toleremo atentigis min pri tio, ke tiuj homoj de longe helpas sennombrajn mizerulojn.

– Jes – rediris lia amiko –, sed mi aŭdis, ke la predikoj de Stefano varbas multe da studemaj homoj en novajn principojn, kiuj iamaniere ŝancelas la leĝon de Moseo.

– Tamen, ĉu ne ia galilea ĉarpentisto, senfama kaj senkultura, iniciatis tiun movadon? Kion ni povus atendi el Galileo? Ĉu ĝi iam produktis ion alian, ol legomojn kaj fiŝojn?

– Malgraŭ tio la martirigita ĉarpentisto fariĝis ia idolo por siaj sekvantoj. Penante disfumigi la impresojn de mia onklo, prudentigante lin per la necesa energio, mi estis instigita hieraŭ viziti la karitentreprenojn, direktatajn de ia Simon Petro. Tio estas institucio stranga kaj ja eksterordinara. Tie senhelpaj infanoj ricevas koran zorgadon, lepruloj resaniĝas, maljunuloj malsanaj kaj ne favoritaj de la sorto ĝojas de komforto.

– Sed la malsanuloj? Kie restas tiuj malsanuloj? – demandis Saŭlo mireganta.

– Ĉiuj loĝas ĉe tiuj nekompreneblaj homoj.

– Ili ĉiuj malsaĝiĝis! – diris la junulo el Tarso kun la spontanea sincereco, kiu signis liajn teniĝojn.

Ambaŭ interŝanĝis intimajn impresojn pri la nova doktrino, semante per ironio la konsideradon de multe da

piaj faktoj, kiuj tenis ĉe si la atenton de la simplanima popolo de Jerusalemo.

Finante la konversacion, Cadok diris:

– Mi ne rezignacie vidas niajn principojn malŝatataj kaj proponas min por kunlabori kun vi, kvankam mi loĝas en Damasko, por ke ni bridu tiajn farojn. Kun viaj prerogativoj de estonta rabeno, alte sidanta en la Templo, vi povos estri decidigan agadon kontraŭ tiuj mistifikantoj kaj falsaj miraklistoj.

– Sendube – respondis Saŭlo –, kaj mi estas preta fari ĉiajn disponojn, kiujn la afero postulas. Ĝis nun la Sinedrio sin tenis plej tolereme, sed mi faros, ke ĉiuj kamaradoj ŝanĝu sian opinion kaj konduku laŭdeve kontraŭ tiuj atakoj, kiuj spitas severan punon.

Kaj per preskaŭ solena tono li finis:

– Kiuj estas la tagoj de predikado de tiu Stefano?

– Sabatoj.

– Nu, postmorgaŭ ni iros ambaŭ plezuri ĉe tiuj stultuloj. Se mi konstatos la sendanĝeran karakteron de iliaj instruoj, ni lasu ilin en paco kun ilia galimatio ĉe la suferoj de la proksimulo, alie ili tre kare pagos por la trokuraĝo ofendi niajn religiajn kodojn en la metropolo mem de la judismo.

Ankoraŭ longe ili teksis konsideradojn pri la sociaj faktoj, la intrigoj de la fariseoj, al kiuj ili apartenis, la nunaj okazaĵoj kaj la esperoj por la estonteco.

Ĉe vesperiĝo de tiu sama tago la eleganta bigo de Saŭlo el Tarso traveturis la pordegojn de Jerusalemo kaj direktiĝis al la haveno de Jafo.

La varmega suno, ankoraŭ alte super la horizonto, plenigis la vojon per sia tre hela lumo. La mieno de la juna leĝisto radiis de freneza ĝojo ĉe la larĝapaŝa trotado de la ĉevaloj, kiuj de tempo al tempo ekgalopadis. Li kontente rememoris tiun sporton, kiuj li amis en sia naskiĝurbo, tiel laŭ la greka gusto, laŭ kiu li estis edukita dank'al la patra zorgemo. Kun okuloj fiksitaj sur la vivaj kaj rapidaj ĉevaloj, li rememoris siajn venkojn inter la konkursantoj en sia senzorga adoleskeco.

Nemultajn mejlojn plue staris komforta domo meze de grandaj florantaj daktilaj kaj persikaj arboj. Ĉirkaŭ

ĝi riĉaj legomplantejoj apud flueto da akvo, inteligente uzata en vasta hortikulturejo. Tiu bieno estis parto de unu el la multaj vilaĝetoj, ĉirkaŭantaj la sanktan urbon ĉie, kie ajn ekzistis kondiĉoj favoraj al malgranda terkulturado, kiu tre interesis la komercon de Jerusalemo, situacianta en terure seka klimato. Tie ekloĝis Zeĥarja kun sia familio, por rekomenci honestan vivon. Rut kaj Abigail penis helpi lin en lia nobla klopodado de aktiva kaj laborema viro, kulturante fruktojn kaj florojn kaj tiel uzante ĉiun disponeblan grundpecon.

Forlasinte Korinton, la nobla izraelido renkontis terurajn malfacilaĵojn, ĝis li elŝipiĝis en Cezarea, kie elĉerpigis ĉiuj liaj monrimedoj, sed kelke da samlandanoj prezentis lin al konata romana patricio, grava proprietulo en Samario, kiu pruntis al li grandan sumon da mono, rekomendante al li tiun parton de Jafo, kie li povus farmi la bienon de iu amiko. Zeĥarja akceptis la helpon kaj ĉio iris glate. La vendado de legomoj kaj fruktoj, kiel ankaŭ la bredado de birdoj kaj grandaj brutoj, kompensis al li la klopodojn. Kvankam malproksime de Jerusalemo, li pli ol tri fojojn havis okazon viziti la urbon, kaj, patronata de Aleksandro, proksima parenco de Anas, sukcesis viciĝi inter la privilegiitaj negocistoj, kiuj rajtis vendi bestojn por la oferoj en la Templo. Helpata de influaj amikoj, kiel Gamaliel kaj Saŭlo el Tarso, kiu liberiĝis de la stato de disĉiplo kaj pli alte eksidis kiel kompetenta aŭtoritatulo, en la plej alta tribunalo de sia raso, li povis pagi multajn el siaj ŝuldoj kaj rapide iradis al bela situacio de financa sendependeco en sia naskolando. Rut ĝojis pri la prosperado de sia edzo, kaj same Abigail, en kiu ŝi trovis la sindonecon de efektiva filino.

La fratino de Jeziel laŭŝajne refandis la delikatecon de la virinaj trajtoj en la forĝejo de la travivitaj suferoj. La gracileco de ŝia mieno kaj la nigreco de ŝiaj okuloj kuniĝis kun ia vualo da ĉarma malgajeco, kiu ŝin tutan envolvis de post tiuj tragikaj, funebraj tagoj en Korinto. Kiel sopire ŝi deziris ricevi ian sciigon, eĉ se mallongan, banalan, pri sia frato, kiun la destino faris sklavo de kruelaj turmentistoj! Por tio Zeĥarja ekde la unua tempo ŝparis nek rimedojn nek penojn. Komisiinte fidelan

amikon en Akajo por esplori tiun aferon, li eksciis nur, ke Jeziel mankatenta estis kondukita en komercoŝipon, forveturontan al Nikopolis: nenion pli. Abigail insistis plu; kaj el Korinto venis ankoraŭ promesoj de amikoj, kiuj ne ĉesigos siajn pridemandojn ĉe la samrondanoj de Licinio Minucio, por ekscii la lokon, kie troviĝas la sklav-igita junulo.

En tiu tago la junulino profunde rememoris la figuron de sia kara frato, liajn ĉiam tiel korajn admonojn kaj konsilojn.

De kiam ŝi konatiĝis kun tiu junulo el Tarso kaj ekvidis la eblecon de edziniĝo kun li, ŝi sopire petegis de Dio la konsolan certecon pri la ekzistado de sia frato, kie ajn li estus. Laŭ ŝia opinio, estus por Jeziel plezuro ekkoni la elektiton de ŝia koro, kies pensojn ankaŭ prilumis la sincera zorgo bone servi al Dio. Ŝi rakontus al li, ke ankaŭ la amon de ŝia animo traplektas religiaj kaj filozofiaj komentarioj, kaj ke sennombraj estas la fojoj, kiam ili ambaŭ rave rigardadas la Naturon, komparante ĝiajn vivantajn lecionojn kun la diaj figuroj de la Sankta Skribo. Saŭlo ŝin tre helpis en la kulturado de la floroj de la fido, kiun Jeziel semis en ŝia senkulpa animo. Li ne estis viro tro sentimentala, inkлина al la elverŝado de amesprimoj, kiuj forpasas sen pli grava signifo, sed ŝi komprenis lian noblan kaj lojalan spiriton, kiun karakterizis profunda sento de sinregado. Abigail estis certa, ke ŝi komprenas liajn plej intimajn aspirojn en la grandiozaj revoj, kiuj superregis lian junecon. Superbela altiro, tiu, kiu peladis ŝin al la saĝa, obstina kaj sincera junulo! Ifoje li ŝajnis al ŝi tro kruda kaj energia. Lia kompreno de la Leĝo ne toleris paliativojn. Li povosciis ordoni, kaj al li malplaĉis ĉia montro de malobeo al liaj decidoj. Tiuj monatoj da preskaŭ ĉiutaga kunevivado konigis al ŝi lian nebrideblan kaj malkvietan temperamenton ĉe plej nobla koro, kie fonto de amemo kaŝiĝis en abismaj profundoj.

Dronante en meditado, sur gracia ŝtonbenko apud la persikarboj en printempa festo, ŝi ekvidis, ke la ĉaro de Saŭlo alproksimiĝas per la larĝpaŝa trotado de la ĉevaloj.

Zeharja akceptis lin en kelka distanco, kaj ambaŭ kune, vigle konversaciante, eniris en la domon, kien la junulino sin direktis.

Ekestis konversacio en elkora tono, kio ripetigis plurajn fojojn en la semajno, kaj, kiel kutime, la du gejunuloj, en la belegeco de la krepuska pejzaĝo, mano en mano kiel gefianĉoj, malsupreniris en la fruktoĝardenon, kies gazono konsistis el vastaj bedoj el orientaj floroj. La maro sterniĝis en la distanco de multe da mejloj, sed la malvarmeta vespera aero impresis kiel la mildaj ventoj el la marbordo. Saŭlo kaj Abigail komence paroladis pri la ĉiutagaj banalaĵoj, sed ĉe unu momento, rimarkinte la malĝojovualon, kiu montriĝis sur la vizaĝo de sia kunulino, la junulo ŝin milde demandis:

– Kial vi hodiaŭ estas tiel malĝoja?

– Mi ne scias – ŝi respondis kun malsekaj okuloj –, sed mi de longe forte pensas pri mia frato. Mi maltrankvile atendas sciigon pri li, ĉar mi esperas, ke li pli aŭ malpli frue povos konatiĝi kun vi. Jeziel ricevus vian parolon kun entuziasmo kaj ĝojo. Unu amiko de Zeharja promesis informon pri li, kaj ni atendas ian sciigon el Korinto.

Post mallonga paŭzo ŝi levis siajn grandajn okulojn kaj daŭrigis:

– Aŭskultu, Saŭlo: se Jeziel ankoraŭ estas malliberigita, ĉu vi tiam promesas al mi vian helpon al li? Viaj prestiĝohavaj amikoj en Jerusalemo povus interveni, por lin liberigi, ĉe la Prokonsulo de Akajo! Ĉu ne? Miaj esperoj nun kuŝas tute en viaj manoj.

Li ekprenis ŝian manon kaj kortuŝite rediris:

– Mi faros ĉion por li.

Kaj fiksante sur ŝi siajn potencemajn kaj amplenajn okulojn, li diris:

– Abigail, ĉu vi eble amas vian fraton pli multe ol min?

– Kion vi diras! – ekkriis ŝi, kompreninte la delikatecon de lia demando. – Vi ja komprenas mian fratan koron kaj tio liberigas min de pli detala klarigo. Kiel vi scias, kara, Jeziel estis mia subtenanta brako dum la tagoj de nia senpatrineco. Ni estis kamaradoj en nia

infaneco, kaj li, amiko de senreva juneco, ĉiam estis la amanta frato, kiu instruis min legi la diajn ordonojn, kun kunmetitaj manoj kanti la Psalmojn, forklinante min de la vojoj de malbono kaj inklinigante min al bono kaj virto. Ĉio, kion vi trovis en mi, estas dono de lia grandanima helpo de amplena frato.

Saŭlo rimarkis ŝiajn okulojn malsekajn de ploro kaj bonkore diris:

– Ne ploru. Mi komprenas viajn sanktajn korajn motivojn. Se necese, mi iros ĝis la fino de la mondo, por trovi Jezielon, se nur li ankoraŭ vivas. Mi kunportos leterojn de Jerusalemo al la Provinca Kortumo de Korinto. Mi faros ĉion. Estu do trankvila. Laŭ via diro mi supozas en li iun sanktulon. Sed ni parolu pri aliaj aferoj. Urgaj problemoj postulas solvon. Kaj niaj projektoj, Abigail?

– Dio nin ja benos – murmuris la junulino kortuŝita.

– Hieraŭ Delila kaj ŝia edzo iris Lidano vizite al kelkaj el niaj parencoj. Ĉio tamen estas interkonsentita, por ke vi post du monatoj de hodiaŭ estu kun ni en Jerusalemo. Antaŭ ol mia fratino faros la plej proksiman vojaĝon al Tarso, mi volas, ke vi vin pli intime konu, por ke ŝi malkaŝe sciigu miajn gepatrojn pri nia projektata geedziĝo.

– Via invito min plej kortuŝas, sed...

– Neniom da limigoj kaj timemo. Ni venos, por forkonduki vin. Mi kombinos kun Rut kaj Zeharja la necesajn disponojn, kaj pri tio necesa, por ke vi prezentu vin en granda urbo, mi ne permesos, ke oni ĉi tie iom elspezu. Mi jam zorgas, ke vi post nemultaj tagoj ricevu plurajn grekmodelajn tunikojn.

Kaj li finis per bela rideto:

– Mi volas, ke vi prezentu vin en Jerusalemo kiel perfekta ekzemplo de nia raso, disvolviĝinta inter la antikvaj belaĵoj de Korinto.

La junulino faris timan geston, elmontrante internan ĝojon.

Ili faris ankoraŭ kelke da paŝoj kaj eksidis sub maljunaj florantaj persikarboj, kie ili per plenaj pulmoj

ekenspiris la mildan venteton, kiu parfumis tiun lokon. La grundo, kultivata kaj kolorata de ĉiunancaj rozoj, eligis dolĉegan aromon. La finiĝo de la krepusko ĉiam estas plena de sonoj, kiuj preterpasas rapidece, kvazaŭ ankaŭ la animo de la aĵoj strebus al silento, la amiko de la granda ripozo... Foliriĉaj arboj vualiĝis en la ombro, lastaj vagantaj birdoj rapide flugadis, karesa zefiro venis de malproksime, agitante la grandajn branĉarojn kaj pliintensigante la dolĉan murmuradon de la vento.

Ravite de nedifinebla ĝojo, Saŭlo ekrigardadis la unue aperintajn stelojn, kiuj ridetis sur la ĉielo punktita de lumo. La Naturo estas ĉiam la fidela spegulo de la plej internaj emocioj, kaj tiuj ondoj da parfumo, kiun la venteto alportis de malproksime, eĥiĝis kvazaŭ mistera ĝojo en lia koro.

– Abigail – li diris, tenante ŝian maneton en la siaj –, la Naturo ĉiam kantas kun la esperplenaj kaj kredantaj animoj. Kiel sopire mi atendis vin sur la vojo de la vivo! Mia patro parolis al mi pri la hejmo kaj ties ĉarmoj, kaj mi atendis tian virinon, kiu min tute komprenus.

– Dio estas bona – ŝi rediris ravita –, kaj nur nun mi konstatas, ke post tiom da suferoj Li, laŭ Sia senlima favorkoreco, destinis por mi la plej grandan trezoron en mia vivo, nome vian amon, en la lando de miaj gepatroj. Via korinklino, Saŭlo, koncentras en si ĉiujn miajn idealojn. La ĉielo faros nin feliĉaj. Ĉiumatene, kiam ni estos geedzoj, mi petos, per varmaj preĝoj, la anĝelojn de Dio instrui min teksti la filigranon de viaj ĝojoj; vespere, kiam la beno de la ripozo envolvos la mondon, mi donos al vi ĉiam novan kareson de mia amo. Mi prenos vian kapon, turmentatan de la problemoj de la vivo, kaj kovros vian frunton per la karesado de miaj manoj. Mi vivos nur kun Dio kaj kun vi. Mi estos al vi fidela la tutan vivon kaj amos eĉ la suferojn, kiujn la mondo spertigos al mi por via vivo kaj por via nomo.

Saŭlo pli ravite premis ŝiajn manojn kaj pasie rediris:

– Miaflanke mi donos al vi mian sindonan kaj sinceran koron. Abigail, mia spirito estis potencata nur de la amo al la Leĝo kaj al miaj gepatroj. Mia juneco ĝis nun estis malkvieta, sed pura. Mi ne oferos al vi ian senparfuman floron. De la unuaj tagoj de mia juneco mi konatiĝis kun kamaradoj, kiuj instigis min sekvi iliajn erarajn paŝojn en la ebrieco de la sentumoj, kuriero de la pereo de niaj plej noblaj zorgoj en ĉi tiu mondo, sed mi neniam perfidis la dian idealon, vibrantan en mia sincera animo. Post la komencaj studoj de mia profesio mi renkontis virinojn, kiuj logincitis min, instigite de danĝera kaj erara koncepto pri amo. En Tarso, en la pompaj tagoj de la junulaj ludoj, mi, konkerinte la plej belajn laŭrojn, ricevis de ardantaj junulinoj amdeklaraĵojn kaj edziĝoproponojn, sed mi efektive restis indifera, atendante vin kvazaŭ nekonatan heroinon de mia revo, en la kunvenoj, paradantaj per purpuraĵoj kaj floroj. Kiam Dio kondukis min ĉi tien al vi renkonte, viaj okuloj ekfulme parolis al mi pri superbelaj malkaŝoj. Vi estas la koro de mia cerbo, la esenco de mia menso, kaj vi estos la mano, gvidanta miajn farojn dum la tuta vivo.

Dum al la junulino, kortuŝita kaj feliĉa, larmoj malsekigis la okulojn, la flamanta junulo daŭrigis:

– Ni vivos unu por la dua kaj havos infanojn fidelajn al Dio. Mi estos la ordono en nia vivo, vi estos la obeado en nia paco. Nia hejmo estos ia templo. La amo al Dio estos nia plej fortika kolono, kaj kiam la laboro postulos mian foreston for de la hejma altaro, vi restos kaj viglos super la tabernaklo de nia feliĉo.

– Jes, kara, kion mi ne farus por vi? Vi ordonos kaj mi obeos. Vi estas la ordono en mia vivo, kaj mi petos la Eternulon helpi min esti via ama balzamo. Kiam vi estos laca, mi rememoros mian patrinon kaj endormigos vian noblan animon per la plej belaj preĝoj de David. Vi por mi interpretos la parolon de Dio. Vi estos la leĝo, mi estos via servantino.

Saŭlo kortuŝiĝis ĉe ĉi tiuj karesaj vortoj. Tiuj estis la plej belaj, kiujn li iam rikoltis el iu virina koro. Nenia virino, krom Abigail, iam tiel parolis al lia arda spirito.

Kutiminte al la longaj kaj malfacilaj rezonadoj, bruligante al si la cerbon ĉe la silogismoj de la leĝistoj, celante brilan estontecon, li sentis sian animon kvazaŭ elsekiĝinta, soifanta veran idealismon. De infaneco, dank'al la edifa hejma edukado, li konservis puraj la unuajn impulsojn de la koro, neniam ilin infektante en la rondo de la trivialaj plezuroj aŭ en la fajro de la krudaj pasioj, kiuj ordinare postlasas en la animo la karbon de la senesperaj doloroj. Kutiminte al sportoj, al la tiamaj ludoj, ĉiam akompanata de multe da delirantaj kamaradoj, li estis farinta la sanktan heroaĵon superstarigi la ordonojn de la Leĝo super siaj naturaj inklinoj. Lia koncepto pri servado al Dio ne toleris cedojn al li mem. Laŭ lia opinio, ĉiu homo devus konserviĝi libera de malsuperaj kontaktoj kun la mondo ĝis la edziĝa lito. La starigita hejmo estos ia sanktejo de la eternaj benoj; iliaj infanoj – la unuaaĵoj sur la altaro de la Plejgranda Amo, konsekrita al la Plejaltulo. Tiel li pensis ne tial, ke lia juneco havas neniom da deziroj; Saŭlo el Tarso spertis ĉiajn sopirojn de la flamanta junularo liatempa. Li imagis al si situaciojn de kontentigitaj aspiroj kaj tamen, submetita al la patrinaj karesoj, li promeisis al si mem neniam forflankiĝi de ĉi tiu sintenado. La hejma vivo estas la vivo en Dio, kaj Saŭlo konserviĝis por pli altaj emocioj. Kun ĉiam novaj esperoj, li vidis preterpasi la jarojn, atendante ĝis la inspiro de Dio difinos la vojon de liaj idealoj. Li atendis kaj fidis. Liaj gepatroj ie kaj ie supozis, ke ili trovis tiun virgulinon, kiun li devis elekti, sed Saŭlo, energia kaj decidema, flanken metis la enmiksiĝon de tiuj karuloj koncerne la elekton, kiu tuŝis la decidon de lia destino. Abigail plenigis al li la koron. Ŝi estis la mistika floro de lia idealo, la animo, kiu komprenus liajn aspirojn, en perfekta interrespondado de pensoj. Kun okuloj fiksitaj sur ŝiaj delikataj trajtoj, kiujn la pala luno prilumis, li forte ekdeziris por ĉiam ŝin retenadi en siaj fortikaj brakoj. Samtempe ia dolĉa amemo vibris en lia animo. Li deziris tiri ŝin al si, kvazaŭ mildan infanon, kaj karesi ŝiajn silkecajn harojn per ĉiuj fortoj de sia karesemo.

Ebriaĵoj de spirita ĝuado, ili longe paroladis pri la

amo, kiu ilin identigis en sama aspiro al feliĉo. Ĉiuj plej intimaj komentarioj faris el Dio la sanktan partoprenanton en iliaj esperoj je la estonteco, kiu antaŭbildigis al ili benata de senfinaj ĝojoj.

Mano en mano ili raviĝis de la mirinda plenluno. La oleandroj kvazaŭ ridis al ili. La orientaj rozoj, aŭreolitaj de la lunradioj, estis por ili la mesaĝo de beleco kaj parfumo.

Adiaŭante, Saŭlo aldiris feliĉa:

– En la daŭro de du tagoj mi vin revidos. Estas inter ni konsentite. Kiam Delila forveturos, ŝi portos sciigojn pri ni al miaj gepatroj, kaj ĝuste de hodiaŭ post ses monatoj mi volas vin havi ĉe mi por ĉiam.

– Ses monatoj? – Ŝi rediris duone ruĝiĝinte, duone surprizite.

– Nenio, mi pensas, povos malebliĝi la efektivigon de ĉi tiu decido, ĉar ni jam havas ĉion necesan.

– Kaj se ĝis tiam ni ne estos ricevintaj sciigojn pri Jeziel? De mia flanko, mi dezirus edziniĝi certa pri lia ĝojoj kaj aprobo.

Kun supraĵa rideto, en kiu vidiĝis multe da apenaŭ kaŝita ĉagreno, Saŭlo respondis:

– Pri ĉi tio estu trankvila. Ni unue zorgos pri la sintenado de miaj familianoj, kiuj staras sur pli antaŭa plano; kaj tuj kiam ni solvos ĉi tiun parton, mi, se necese, iros mem Akajon. Estas ne eble, ke Zeharja ne ricevos novajn sciigojn el Korinto en la plej proksimaj semajnoj. Tiam ni faros pli certajn disonojn.

Abigail faris geston de kontenteco kaj danko.

Nun, kiam ili harmoniis ĉe la sama vibrado de ĝojo, antaŭ ol ili denove eniris en la domon, kie la mastroj ilin atendis, plezurante ĉe la legado de la Profetaĵoj, Saŭlo ekprenis la manon de la junulino ĝis siaj lipoj kaj flustris la kutiman adiaŭon:

– Fidela por ĉiam!

Post lia kelkminuta konversacio kun siaj amikoj, aŭdiĝis la trotado de la ĉevaloj sur la vojo returne al Jerusalemo. Jen la ĉareto rapide ruliĝadis ĉe la lumo de la luno, en nubo da polvo.

La predikado de Stefano

Saŭlo kaj Cadok eniris en la modestan preĝejon de Jerusalemo kaj ekvidis la densan amason da malriĉuloj kaj mizeruloj, kiuj tie staris kun radio da espero sur la malgajaj okuloj.

La simpla pavilono, konstruita je la kosto de tiom da oferoj, estis nenio alia ol vasta korbalo, tegita de malfortikaj muroj, sen ia eĉ plej malgranda komforto.

Jakobo, Petro kaj Johano forte surpriziĝis pri la ĉeesto de la juna leĝisto, kiu faris al si popularecon en la urbo dank'al sia parolvorto kaj sia profunda konado de la Skriboj.

La grandanimaj galileanoj proponis al li la plej komfortan benkon; li akceptis la ĝentilaĵojn, kiujn oni faris al li, kun nekaŝebla ironio ridetante pri ĉio, kion li tie vidis. En sia animo li opiniis, ke Cadok mem estis viktimo de malveraj juĝoj. Kion povis fari tiuj malkleraj viroj, kuniĝintaj kun aliaj jam maljunaj, malsanaj kaj kadukaj? Kio danĝera estis por la Leĝo de Izrael tiuj forlasitaj infanoj, tiuj duonmortintaj virinoj, en kies koro ĉiaj esperoj ŝajnis forvelkintaj? Al li estis tre malagrabla vidi tiom da vizaĝoj, kiujn la lepro detruis kaj la malignaj ulceroj kruele kripligis. Ĉi tie, maljunulo kun pusaj vundoj, envolvitaj en malbonodorajn tukojn; tie, kriplulo, apenaŭ kovrita de ŝtofpecoj apud ĉifone vestitaj orfoj, kiuj humile prenis al si lokon.

La konata leĝisto rimarkis la ĉeeston de pluraj personoj, kiuj aŭskultadis lian parolon en la interpretado

de la tekstoj de Moseo, en la Sinagogo de la kilikianoj; de aliaj, kiuj proksime observis liajn laborojn en la Sinedrio, kie lia inteligenteco estis rigardata kiel garanti-aĵo de la espero de la raso. Per la rigardo li ekkomprenis, ke tiuj amikoj tie troviĝas ankaŭ je la unua fojo. Lia vizito en la nekonata templo de la sennomaj galileanoj allogis multe da partianoj de la reganta fariseismo, sopirantaj okazajn servojn, kiuj povus meti ilin en lumrondon kaj ilin rekomendi al la plej gravaj aŭtoritatoj. Saŭlo venis al la konkludo, ke tiu parto de la aŭdantaro tie troviĝas en solidara teniĝo por ĉia dispono, kiun li devos fari. Tia teniĝo ŝajnis al li natura kaj logika, konvena al la celoj, kiujn li intencis atingi. Ĉu oni ne rakontadis nekredablajn farojn de la adeptoj de la “Vojo”? Ĉu tio ne estas trivialaj kaj skandalaj mistifikoj? Ĉu ĉio tio ne estas malnobla verko de kondamninda sorĉarto? Se li en tio konstatos ian malhonestan celon, li en tiu loko mem povus kalkuli je granda nombro da samreligi-anoj, pretaj defendi la rigoran plenumon de la Leĝo, eĉ se tio kostus al ili la plej pezajn sinoferojn.

Ekvidante tiun aŭ alian bildon malpli agrablan al lia rigardo, kutiminta al luksaj medioj, li evitis fiksi la okulojn sur la kripluloj kaj malsanuloj, dense starantaj en tiu loko, ien turnante la atenton de Cadok kun ironiaj kaj spritaj rimarkoj. Kiam tiu vasta ejo, sen iaj ornamoj kaj figuroj, tute pleniĝis, unu junulo, havanta ĉe siaj flankoj Petron kaj Jakobon, preterpasis la longajn vic-ojn, kaj ili tri suriris preskaŭ naturan podion el ŝtonoj, kuŝantaj unu sur alia.

– Stefano! Ĝi estas Stefano!

Sufokitaj voĉoj anoncis la predikanton, dum liaj plej entuziasmaj admirantoj kun ĝoja rideto montris al li.

Subita silento tenis ĉiujn korojn en stranga atendo. La junulo, malgrasa kaj pala, pri kies helpo la plej malfeliĉaj opiniis, ke ili ĉe ĝi trovas ian duoblaĵon de la amo de la Kristo, laŭte ekpreĝis, petante por si kaj por tiu kunvenantaro la inspiron de la Plejpotenca. Tuj poste li malfermis libron en la formo de rulaĵo kaj voĉe eklegis pecon el la notoj de Mateo:

“Sed iru prefere al la perditaj ŝafoj de la domo de

Izrael; kaj dum vi iros, prediku, dirante: La regno de la ĉielo alproksimiĝis.” (*)

Stefano alte levis la serenajn kaj radiantajn okulojn, kaj, ne konfuziĝante pro la ĉeesto de Saŭlo kaj ties multenombraj amikoj, komencis per klara kaj vibranta voĉo paroli pli-malpli jene:

“Miaj karaj, jen veninta la tempo, kiam la Paŝtisto venas, por kolekti la ŝafojn ĉirkaŭ sian senliman zorgadon. Ni estis sklavoj al la altrudoj per la rezonoj, sed hodiaŭ ni estas liberaj per la Evangelio de la Kristo Jesuo. Nia raso, de nememorebla tempo, gardis la lumon de la Tabernaklo, kaj Dio sendis al ni Sian senmakulan Filon. Kiuj en Izrael ankoraŭ neniam aŭdis la mesaĝojn de la Bona-Novaĵo? Kiuj ankoraŭ sin ne gratulis pro la ĝojoj de la nova kredo? Dio sendis Sian sanktan respondon al niaj miljaraj aspiroj, la revelacio de la Ĉielo heligas niajn vojojn. Laŭ la promesoj de la profetado de ĉiuj, kiuj ploris kaj suferis por la Eternulo, la Dia Sendito venis en la kavernon de niaj amaraj kaj justaj doloroj, por prilumi la nokton de niaj obstine kulpantaj animoj, por ke disvastiĝu la horizontoj de nia el-aĉeto. La Mesio konsideris la premantajn problemojn de la homo kaj donis al ili kiel solvon la amon, kiu el-aĉetas ĉiujn estulojn kaj purigas la homojn de ĉiuj pekoj. Instruanto pri laboro kaj pri la perfekta ĝojo de la vivo, kaj tial liaj benoj estas nia heredaĵo. Moseo estis la pordo, la Kristo estas la ŝlosilo. Per la krono de martiro li akiris por ni la nemorteman laŭron de la savo. Ni estis sklavoj al la eraro, sed lia sango nin liberigis. En vivo kaj en morto, en la ĝojoj en Kana, kiel en la doloroj sur Kalvario, pro ĉio, kion li faris, kaj pro ĉio, kion li ne faris dum sia glora migrado sur la Tero, li estas de Dio la Filo, prilumanta la vojon.

“Super ĉiaj homaj pensoj, ekster ĉiaj interpuŝiĝoj de la surteraj ambicioj, lia regno de paco kaj lumo brilas en la konscienco de la elaĉetiĝintaj animoj.

“Ho Izrael, vi, kiu atendis tiom da jarcentoj! Viaj afliktoj kaj doloraj spertoj ne estis vanaj! Dum aliaj po-

(*) Mateo, 10:6-7 – *Noto de la Aŭtoro.*

poloj implikiĝis en malnoblaj intereso, honorante la falsajn idolojn per falsa adorado kaj samtempe entreprenante ekstermantajn militojn kun ekstrema perverseco, vi, Izrael, atendis la justan Dion. Vi portis la katenojn de la homa nekompatemo en eldetruado kaj dezertigo; vi ŝanĝis en kantojn de espero la hontindaĵojn de la sklaveco; vi suferis malhonoron, truditajn de la potenculoj de la Tero; vi vidis viajn virojn kaj virinojn, viajn junulojn kaj infanojn ekstermitajn sub la premo de persekutoj, sed vi tamen neniam perdis vian kredon je la justeco de la Ĉielo! Kiel la Psalmisto, vi per via heroeco asertis, ke amo kaj favorkoreco vibras en ĉiuj viaj tagoj! Vi ploris tra la longa vojo de la jarcentoj pro viaj doloroj kaj vundoj. Kiel Ijob, vi vivis de via fido, subjugigite de la feraj manoj de la mondo, sed vi jam ricevis la sanktan deponitaĵon de la Eternulo, la unu sola Dio! Ho eternaj espero de Jerusalemo, kantu de ĝojo, gaju, kvankam ni ne estis tute fidelaj al la kompreno de la Leĝo, ĉar ni kondukis la Amatan Ŝafidon sur la brakojn de kruco; tamen liaj vundoj elaçetis nin por la Ĉielo, per la alta prezo de lia ekstrema sinofero!

“Jesaja lin rigardadis, fleksiĝintan sub la pezo de niaj malbonaĵoj, florantan en la sterileco de niaj koroj kvazaŭ ĉiela floro sur brulkonsumita grundo, sed ankaŭ diris, ke eble la momento de lia ekstrema abnegacio, per malnobliga morto, la sankta dia afero por ĉiam prosperos en liaj manoj.

“Amataj, kie troviĝas tiuj ŝafoj, kiuj ne sciis aŭ ne povis atendi? Ni ilin serĉu por la Kristo, kiel drakmojn forperdiĝintajn de lia sindona amo! Ni anoncu al ĉiuj senesperuloj la triumfojn kaj ĝojojn de lia regno de paco kaj de senmorta amo!

“La Leĝo tenadis nin en la spirito de nacio, ne sukcesante estingi en nia animo la homan deziron de superregado sur la Tero. Multaj el nia raso atendis ian mastrantan princon, kiu triumfe enirus en la sanktan urbon, kun la sangokovritaj trofeoj el ruiniga kaj mortiga batalo, estron, kiu enmanigus al ni abomenan sceptron de forto kaj tiraneco. Sed la Kristo liberigis nin por ĉiam. Lia plej granda ordono, de li, ido de Dio kaj sendito de

Ties gloro, konfirmas tiujn de Moseo, nome rekomendante al ni ami Dion super ĉio, per nia tuta koro kaj animo (*), kaj aldonante, per la plej bela dia dekreto, ke ni amu unu alian, kiel li mem nin amis (**).

“Lia regno estas regno de la ĝusta konscienco kaj de la koro puriĝinta ĉe la servado al Dio. Liaj pordoj estas la mireginda vojo al la spirita elaĉeto, larĝe malfermitaj al la filoj de ĉiuj nacioj.

“Liaj amataj disĉiploj venos de ĉiuj kvar flankoj de la mondo. Ekster lia lumo ĉiam trafos tempesto la malfirmpaŝan migranton de la Tero, ĉar sen la Kristo li falos venkita en la bataloj senfruktaj kaj detruantaj la plej bonajn fortojn de la koro. Nur lia Evangelio havigas pacon kaj liberecon. Ĝi estas la trezoro de la mondo. En lia plej alta gloro la justaj ricevas la venkokronon, la malfeliĉaj konsolon, la malgajaj la fortikaĵon de la kuraĝo, la pekantaj trovas la vojon de la favorkoraj elaĉetoj.

“Estas vero, ke ni lin ne komprenis. Ĉe la granda atesto la homoj ne komprenis lian dian humilecon kaj tiuj, al li plej korligitaj, lin forlasis. Liaj vundoj kriis kontraŭ nia krima indiferenteco. Neniu povas forskui de si tiun kulpon, ĉar ja ni ĉiuj estas heredintoj de liaj ĉielaj donoj. Se ĉiuj ĝuas bonfaron, neniu povas sin elturni de respondeco. Tio estas la motivo, kial ni respondas por la krimo sur Kalvario. Sed liaj vundoj estis nia lumo, liaj suferoj la plej varma amvoko, lia ekzemplo la vojo malfermita al la superbela kaj senmorta bono.

“Venu do manĝi kun ni ĉe la tablo de la dia bankedo! Ne plu la festoj kun putrema pano, sed la eterna nutraĵo de ĝojo kaj vivo... Ne plu la fermentanta vino, sed la nektaro, fortikiganta la animon, miksitita kun la parfumoj de la nepereema amo.

“La Kristo estas la substanco de nia libereco. Tago venos, kiam lia regno ampleksos la filojn de Oriento kaj de Okcidento, per ĉirkaŭpreno de frateco kaj lumo. Tiam ni komprenos, ke la Evangelio estas la respondo de Dio

(*) Readmono, 6:5. – *La Trad.*

(**) Johano, 13:34. – *La Trad.*

al niaj alvokoj per la Leĝo de Moseo. La Leĝo estas homa, la Evangelio estas dia. Moseo estas la kondukanto, la Kristo estas la Savinto. La profetoj estis fidelaj administrantoj, sed Jesuo estas la Sinjoro de la Vinberejo. Kun la Leĝo ni estis servutuloj, kun la Evangelio ni estas liberaj infanoj de amanta kaj justa Patro!”

Tiam Stefano interrompis sian parolon, kiu harmonie kaj vibre fluadis el liaj lipoj, inspirite de la plej puraj sentoj. La aŭdantoj, kiaj ajn iliaj inklinoj, ne sukcesis kaŝi sian miregon ĉe liaj asertoj de solidaj instruoj. Tiuj multaj homoj raviĝis de la prezentitaj principoj. La almozuloj, tie dense starantaj, direktis al la predikanto aproban rideton, kiu ja esprimis ĝojigajn esperojn. Johano fiksitis sur li karesan rigardon, ankoraŭ unu fojon konstatante en lia flama parolo la evangelian mesaĝon, donitan de disĉiplo plej amata de la neforgesebla Majstro, kiu ĉiam estas ĉe tiuj, kiuj kunvenas en lia nomo.

Nature emociema, Saŭlo el Tarso fandiĝis en la ondo da ĝenerala mirego, sed, forte surprizite, li rimarkis la diferencon inter la Leĝo kaj la Evangelio, diskonigata de tiuj strangaj homoj, kiujn lia menso ne povis kompreni. Momente li konsideris la danĝeron de la novaj instruoj rilate la regantan judismon. Li indignis pro tiu prediko malgraŭ ĝia mistere bela eĥo. Laŭ lia pensmaniero estis nepre necese forfini la komenciĝantan konfuzon pri Moseo. La Leĝo estas unu sola. Tiu Kristo, kiu kulminis en malvenko, inter du rabistoj, aperis antaŭ liaj okuloj kiel ia mistifikanto, neinda je ia estimo. La venko de Stefano ĉe la popola konscienco, kiel li ĝin vidis en tiu momento, lin indignigis. Li konsentis, ke tiuj galileanoj eble estas piaj homoj, sed ili ja estas krimuloj pro la renverso de la netuŝeblaj principoj de lia raso.

Kiam la oratoro estis reprenonta la momente interrompitan parolon, atendatan kun sintenado de ĝenerala ĝojo, la juna leĝisto kuraĝe stariĝis kaj preskaŭ kolere ekkriis, akcentante la frazojn per evidenta ironio:

– Piaj galileanoj, kian sencon havas viaj strangaj kaj absurdaj doktrinoj? Kiel vi kuraĝas proklami la malveran superecon de ia senfama nazaretano super Moseo, en la urbo Jerusalemo mem, kie estas decidataj la destin-

oj de la triboj de la nevenkebla Izrael? Kio estas tiu Kristo? Ĉu nenio alia krom ia ĉarpentisto?

Ĉe la impertinenta aplombo de ĉi tiu neatendita apostrofo fariĝis en tiu medio ia retiriĝo pro timo, sed de la nefavoritoj de la sorto, por kiuj la mesaĝo de la Kristo estis la plej bonega nutraĵo, venis al Stefano rigardo de defendo kaj gaja entuziasmo. La Apostoloj el Galileo ne sukcesis kaŝi sian timon. Jakobo estis palega. La amikoj de Saŭlo rimarkis ties mokan vizaĝon. Ankaŭ la predikanto paliĝis, sed elmontris en la decidema rigardo ĉiam saman nekonsterneblan serenecon. Fiksante la okulojn sur la leĝisto, la unua homo en tiu urbo, kiu kuraĝis malhelpi la noblan klopodadon de la evangeliismo, li, ne perfidante la ondon da amo, kiu elbordiĝis el lia koro, vidigis al Saŭlo la sincerecon de sia parolo kaj la noblecon de siaj pensoj. Kaj antaŭ ol liaj kunuloj rekonsciiĝis de la surprizo, kiu ilin ekposedis, kun mirinda spiritoĉeesto indifera al la impreso de kolektiva timo, li rediris:

– Bone estas, ke la Mesio estis ĉarpentisto, ĉar tiel la homaro jam ne restis sen ia ŝirmejo. Li estis ja la Rifuĝejo de la paco kaj espero! Ni jam neniam iros laŭ la kaprico de la tempestoj aŭ laŭ la ĉeno de la ĥimeraj rezonoj de tiuj, kiuj vivas laŭ la kalkulo, sen la heleco de la sento.

Ĉi tiu konciza kaj kuraĝa respondo senaplombigis la estontan rabenon, kutimintan venki en la plej kulturitaj sferoj, en ĉiuj parolturniroj. Energia, ruĝiĝinta, elmontrante profundan koleron, li mordis la lipojn, kio estis al li propra, kaj per impona voĉo diris:

– Kien ni venos kun tia misinterpretado laŭ ia vulgara mistifikanto, kiun la Sinedrio punis per skurĝado kaj morto? Kion ni diru pri ia Savinto, kiu ne sukcesis savi sin mem? Se li estis sendito kun ĉiela povo, kial do li ne evitigis al si la humiligon de malhonoriga verdikto? Ĉu la Eternulo Cebaot, kiu liberigis de la sklaveco la privilegiitan popolon; kiu kondukis ilin tra la dezerto kaj trabatis al ili vojon tra la maro; kiu kvietigis al ili la malsaton per la dia manao kaj, pro amo, ŝprucigis el la senviva roko fonton de viva akvo, ĉu Li havis neni-

ajn aliajn rimedojn signigi Sian senditon, ol per ofera kruco inter ordinaraj maliculoj? Ĉu vi en ĉi tiu domo tiel malŝatis la gloron de la Plejalta Sinjoro? Ĉiuj leĝistoj de la Templo konas la historion de la trompanto, kiun vi honoras kun la simpleco de via malklereco! Ĉu vi ne hezitas malaltigi niajn proprajn valoraĵojn, prezentante ian Mesion disvunditan kaj sangantan ĉe la mokfajfado de la popolo? Vi superverŝas Izraelon per honto, tamen vi deziras starigi novan regnon? Estus juste, ke vi tute koniglu al ni la instigilon de viaj piaj fabeloj.

Kiam ĉesis ĉi tiu katilinario, Stefano digne reprenis la parolon:

– Amiko, oni ja prave diris, ke la Majstro venos al la mondo, por konfuzi multajn en Izrael. La tuta edifa historio de nia popolo estas dokumento pri la revelacio de Dio; tamen, ĉu vi ne vidas en la mirindaj signoj, per kiuj la Providenco iam kondukis la hebreaĵn tribojn, elmontron de la ekstrema amo de Patro, deziranta konstrui la spiritan estontecon de infanoj karaj por Lia koro? Kun la tempo ni rimarkos, ke la infana menso donas oportunajn okazojn por pli vastaj edukprincipoj. Kio hieraŭ estis karesemo, tio hodiaŭ estas energio, naskita de la grandaj amesprimoj de la animo. Kio hieraŭ estis trankvileco kaj vigleco, tio hodiaŭ povas esti tempesto, por havigi sekurecon kaj reziston. Iam ni estis infanoj eĉ rilate la revelacion, sed nun la viroj kaj la virinoj en Izrael atingis sian plenaĝecon pri la konado. La Filo de Dio portis al la homoj la lumon de vero, instruante al ili la misteran belecon de la vivo ĉe sia plialtiĝo per sin-fero. Lia gloro resume konsistis en tio, ke li amis nin, kiel Dio nin amas. Ĝuste tial oni ne komprenis lin. Ĉu ni povus atendi ian savonton konforman al niaj malnoblaj celoj? La profetoj asertas, ke la vojoj de Dio povas ne esti la vojoj, kiujn ni deziras, ke Liaj pensoj ne ĉiam povas akordi kun la niaj. Kion ni dirus pri ia Mesio, kiu prenis la sceptron de la mondo, konkurante kun la korifeoj de la malbonagado pri laŭro el sango-verŝaj venkoj? Ĉu la Tero jam ne satiĝis de bataloj kaj kadavroj? Ni demandu iun roman generalon, kiom kostis al li la konkero de la plej sensignifa vilaĝeto; ni ri-

gardu la nigran liston de la venkintoj laŭ niaj eraraj ideoj pri la vivo. Izrael neniam povus atendi iun Mesion, kiu paradus en ia ĉaro de pompaj gloroj de la materia sfero, veturilo, kiu povus renversiĝi sur la plej proksima deklivo de la vojo. Tiuj pasemaj esprimoj apartenas al tiu efemera scenejo, kie la plej brilanta purpuro revenas en la polvon. Malsame ol ĉiuj, kiuj pretendis instrui virton, apogante sin sur la kontentigo de la propraj sentumoj, Jesuo plenumis sian taskon inter la plej simplaj aŭ plej malfeliĉaj, ĉe kiuj oni ofte trovas la manifestiĝojn de la Patro, kiu edukas per la nekontentigita espero kaj la doloroj, kiuj de lulilo ĝis tombo prilaboras la homan ekzistadon. La Kristo ĉe ni konstruas sian regnon de amo kaj paco sur diaj fundamentoj. Lia ekzemplado estas ĵetita sur la homan animon per eterna lumo! Kiu do el ni, komprenante ĉion ĉi, povus vidi en tiu Sendito de Dio ian militeman estron? Ne! La Evangelio estas amo en ĝia plej bela senco. La Majstro lasis sin buĉi, donante al ni la ekzemplon de elaĉeto per la plej pura amo. Kiel paŝtisto de multenombra grego, li ne volas, ke perdiĝu eĉ unu el liaj amataj ŝafoj, kaj ne ordonas la morton de pekinto. La Kristo estas la vivo, kaj la savo, kiun li havigis al ni, kuŝas en la sankta oportuna okazo de nia altiĝo, kiel infanoj de Dio plenumante la belajn instruojn de la Majstro.

Post paŭzo la leĝisto jam leviĝis por kontesti lian parolon, sed Stefano daŭrigis:

– Kaj nun, fratinoj kaj fratoj, mi petas permeson, por elfini mian paroladon. Se mi ne parolis tiel, kiel vi deziris, mi tamen parolis tiel, kiel la Evangelio al ni konsilas, akuzante min mem per la interna kondamno de miaj grandaj difektoj. La beno de la Kristo estu kun vi ĉiuj.

Antaŭ ol la predikanto povis malsupreniri de la tribuno, por sin miksi en tiun homamason, la estonta rabeno subite ekstaris kaj kolere ekkriis:

– Mi postulas la daŭrigon de ĉi tiu polemiko! La predikanto atendu, ĉar mi ne finis, kion mi bezonas diri.

Stefano serene rediris:

– Mi ne povos diskuti.

– Kial do? – demandis Saŭlo ekscitegita. – Mi ordonas al vi daŭrigi.

– Amiko – trankvile rediris la alparolito –, la Kristo konsilis, ke ni devas redoni al Cezaro la propraĵon de Cezaro kaj al Dio la propraĵon de Dio ^(*). Se vi havas ian leĝan akuzon kontraŭ mi, sentime prezentu ĝin, kaj mi obeos al vi, sed pri tio, kio apartenas al Dio, nur Lin koncernas eldemandi min.

Tia alta spirito de decido kaj sereneco kvazaŭ konfuzis la leĝiston de la Sinedrio, sed, komprenante, ke flamiĝo povus nur nubigi lian menson, li rediris pli trankvile, malgraŭ la aŭtoritateca tono, kiu travidigis lian tutan energion:

– Sed mi bezonas meti en lumon la erarojn de ĉi tiu domo. Mi bezonas demandi kaj vi nepre respondos al mi.

– Tuŝante la Evangelion – rediris Stefano –, mi jam prezentis al vi tiujn elementojn, kiujn mi povis disponi, klarigante ĉion, kio estis por mi ebla. Koncerne la ceteraĵon, ĉi tiu modesta templo estas konstruaĵo de fido, sed ne por kazuistikaj polemikoj. Jesuo plej insiste rekomendis al siaj disĉiploj eviti la fermenton de diskutoj kaj malkonsentoj. Jen kial ne estas permesite, ke ni perdu tempon en senutilaj kvereloj, dum la laboro de la Kristo postulas nian klopodadon.

– Ĉiam la Kristo! Ĉiam la trompanto! – tondris Saŭlo kun acida vizaĝo. – Mia aŭtoritateco estas insultata de via fanatikeco en ĉi tiu ĉambro de mizero kaj malklereco. Mistifikantoj, vi rifuzas la eblon por klarigo, kiun mi proponas al vi; neinstruitaj galileanoj, vi ne volas levi mian ganton. Mi ja scios venĝi pro la Leĝo de Moseo, kiun oni ĉi tie piedpremas. Vi rifuzas mian ordonon, sed vi ne povos eviti mian venĝon. Vi lernos ami la veron kaj honori Jerusalemon, defalante de tiu aroganta nazaretano, kiu pagis sur la kruco por siaj krimaj deliroj. Mi turnos min al la Sinedrio, por vin juĝi kaj puni; la Sinedrio havas aŭtoritaton, por forbati viajn kondamnindajn halucinojn.

(*) Mateo, 22:21. – *La Trad.*

Tiel fininte, li ŝajnis posedita de furiozo, sed eĉ tiel li ne sukcesis konfuzi la predikanton, kiu kun serena animo respondis al li:

– Amiko, la Sinedrio havas mil manierojn igi min plori, sed mi ne rekonas en ĝi povon, por devigi min rezigni la amon al Jesuo Kristo.

Tion dirinte, li malsupreniris de la tribuno kun tia sama humileco, ne lasinte sin entuziasmigi de la aprobo-gesto de tiuj malfeliĉuloj, kiuj tie aŭdis lin kiel defendanton de sanktaj esperoj.

Ekaŭdiĝis iaj kelke da unuopaj protestoj. Koleraj fariseoj vomis malrespektajn kaj mokajn parolojn. Tiu homamaso agitiĝis, antaŭvidante tuj okazontan konflikton; sed antaŭ ol Stefano faris dek paŝojn en la internon, apud siajn kamaradojn, kaj antaŭ ol Saŭlo trafis lin per aliaj personaj kaj rektaj kontraŭdiroj, ĉifone vestita maljunulino prezentis al la brava ĉampiono malriĉe vestitan junulinon kaj fidplene ekkriis:

– Sinjoro! Mi scias, ke vi kontinuigas la bonecon kaj la farojn de la nazareta profeto, kiu unu tagon savis min de la morto, malgraŭ miaj pekoj kaj malfortaĵoj. Helpu min ankaŭ vi, pro kompato! Mia filino mutiĝis antaŭ pli ol unu jaro. Mi ŝin kondukis el Dalmanuta ĉi tien tra grandegaj malfacilaĵoj, fidante vian fratan helpon!

La predikanto antaŭ ĉio ekpensis pri la danĝero de ia kaprico de li mem kaj, dezirante kontentigi la petant-inon, ekrigardis kun sincera simpatio la malsanulinon kaj diris:

– Nian ni havas mem nenion, sed estas juste esperi de la Kristo la donojn al ni necesajn. Li, justa kaj grandanima, ne forgesos vin en la sankta distribuado de sia favorkoreco.

Kaj kvazaŭ pelita de ia stranga forto, li aldiris:

– Vi ja parolos, por laŭdo al la bona Majstro!

Tiam oni ekvidis strangan fakton, kiu subite impresis tiun multenombrian kunvenantaron. Kun radio da grandega ĝojo la malsanulino ekparolis:

– Mi laŭdos la Kriston per mia tuta animo, por eterne.

Forte afekciite, ŝi kaj ŝia patrino sur tiu sama loko falis genue kaj kisis al li la manojn; sed Stefano, profunde emociite, nun havis okulojn nebulitajn de ploro. Li la unua kortuŝiĝis kaj miris la ricevitan protekton, kaj ne alie, ol per larmoj, li povis esprimi la grandecon de sia danko.

La fariseoj, kiuj alproksimiĝis, intencante kompromiti la pacon de tiu humila rondo, miregante repaŝis. La malriĉuloj kaj afliktitoj, kvazaŭ ricevinte ian helpon de la Ĉielo por la sukceso de la pura kredo, plenigis la ĉambron per ekkrioj de forta espero.

Saŭlo observis tiun scenon, ne povante kaŝi sian koleron; se eble, li disfrakasus Stefanon en siaj manoj; tamen, malgraŭ sia impulsigema temperamento, li venis al la konkludo, ke iu atako trenus liajn ĉeestantajn amikojn en terure grandan konflikton. Li pripensis ankaŭ, ke ne ĉiuj adeptoj de la “Vojo” estas kapablaj, kiel la predikanto, enfermi la lukton en la kadro de la spirit-regionaj lecionoj, kaj iamaniere ne malakceptus la korp-an lukton. En momento li rimarkis, ke iuj el ili estas armitaj, ke la maljunuloj portas solidajn apogiĝilojn kaj la kripluloj uzas fortikajn lambastonojn. La korpa lukto en tiu malforta konstruaĵo havus bedaŭrindajn sekvojn. Li ekpenis kunaranĝi pli efikajn ideojn. La Leĝo estus por li favora; li povus kalkuli je la Sinedrio; la plej eminentaj pastroj estas liaj sindonaj amikoj. Li batalus kontraŭ Stefano, ĝis li fleksos ties moralan reziston. Se li ne sukcesus submeti tiun fiulon, li tiun malamus por ĉiam. Por la kontentigo de siaj kapricoj li sciis formovi ĉiajn barojn.

Rimarkinte, ke Cadok kaj ankoraŭ du kamaradoj estas komencontaj la tumulton, ki kriis al ili per serioza kaj ordonema voĉo:

– Ni foriru! La adeptoj de la “Vojo” tre kare pagos por sia trokuraĝo.

Ĉe tiu momento, kiam ĉiuj fariseoj estis pretaj obei lian ordonvoĉon, la junulo el Tarso rimarkis, ke Stefano sin direktas en la internon de la domo, preterŝoviĝante antaŭ liaj ŝultroj. Saŭlo sentis ekskuitaj ĉiujn fibrojn de sia fiero kaj malame fiksitis sur li siajn siajn okulojn, sed la

predikanto respondis al li per serena kaj amika rigardo.

Tuj kiam la juna leĝisto foriris kun siaj multenombraj kamaradoj, kiuj ne sukcesis kaŝi sian resenton, la galileaj Apostoloj kun granda timo komencis konsideri la eblajn sekvojn de tiu neatendita epizodo.

En la sekvanta tago, kiel kutime, Saŭlo el Tarso ĉe vesperiĝo eniris en la domon de Zeharja, vidigante tra la mieno la ĉagrenon, kiu mordis lian animon. Iom forpelinte la mallumajn pensojn, kiuj lin konsumis, dank'al la karesado de la fianĉino amata, kiu insistis ĉe li, ke li konigu la motivojn de tia granda maltrankvileco, li rakontis al ŝi la hieraŭajn okazaĵojn, aldonante:

– Tiu Stefano tre kare pagos por la humiligo, kiun li pretendis fari al mi antaŭ la publiko. Liaj subtilaj rezonoj povas konfuzi malpli sagacajn homojn, kaj estas necese, ke ni superstarigu nian aŭtoritaton super tiuj, kiuj ne estas kompetentaj por pritrakti la sanktajn principojn. Ankoraŭ hodiaŭ mi konversaciis kun kelke da amikoj pri la farendaj disponoj. Tiuj pli toleremaj parolis pri la nemalutila karaktero de la galileanoj, homoj kvietaj kaj karitemaj, sed mi opinias, ke unu fava ŝafo tutan ŝafaron infektas.

– Mi dividas kun vi la defendon de niaj kredoj – rediris la junulino kontenta –; ni ne forlasu nian fidon al la kaprico de individuaj nekompetentaj interpretoj.

Post paŭzo ŝi daŭrigis:

– Ha, se Jeziel troviĝus ĉe ni, li estus via ĉefa asistanto en la elvolvado de la sankaj konoj. Li certe volonte defendus la Testamenton kontraŭ ĉia malpli prudenta kaj fidinda parolo.

– Ni batalos kontraŭ la malamiko, kiu minacas la verecon de la dia revelacio – rediris Saŭlo –, kaj mi ne cedos al tiuj senkulturaj kaj sofismemaj ennovaĵistoj.

– Ĉu tiuj homoj estas multaj? – demandis Abigail zorgoplena.

– Jes, kaj faras ilin pli danĝeraj tio, ke ili maskas siajn intencojn per piaj agoj, ekzaltante la ŝanĝiĝeman imagpovon de la popolo per supozataj misteraj kapabloj, nature nutrataj per sorĉaĵoj kaj magiaĵoj.

– En ĉia okazo – admonis la junulino post mo-

menta pripenso – estas konsilinde agi serene kaj prudente, detenante sin de iaj povekscesoj. Ĉu ili ne estas homoj, pli ĝuste bezonantaj edukadon, ol meritantaj punon?

– Mi jam pensis pri ĉio ĉi. Vere, mi ne intencas ĝeni la simplanimajn kaj modestajn galileanojn, kiuj kolektas ĉirkaŭ sin, en Jerusalemo, kriplulojn kaj malsanulojn, farante al ni la impreson de trankvilaj frenezuloj; sed mi ne povas ne frakasi la oratoron, kies lipoj, laŭ mia opinio, inokulas terure efikan venenon al la variema spirito de la popolo, ne tute konscianta la akceptitajn principojn. La unuajn estas necese klerigi, sed la dua devas esti nuligita. Ĉar oni ne scias liajn celojn, eble krimajn kaj revoluciajn.

– Mi povas prezenti nenan argumenton kontraŭ viaj konkludoj – konsenteme rediris la junulino.

Tuj poste, kiel kutime, ili ekparolis pri la sanktaj sentoj de la koro, kaj tiam oni vidis, ke la junulo el Tarso trovas apartan ĉarmon kaj karesan balzamon ĉe la amaj rimarkoj de la kara amikino.

Post kelke da tagoj oni en Jerusalemo faris la necesajn paŝojn, por ke Stefano estu kondukita antaŭ la Sinedrion kaj tie eldemantata pri la celo, al kiu li strebas per tiuj predikoj de la “Vojo”.

Dank'al la paciga interveno de Gamaliel tiu afero konsistis nur en diskutado, en kiu la predikanto de la novaj interpretoj difinus antaŭ la plej alta tribunalo de la raso siajn vidpunktojn, por ke la pastroj, kiel juĝistoj kaj defendantoj de la leĝo, per la ĝustaj vortoj prezentu la veron.

La invito por la polemiko venis al la modesta eklezio, sed Stefano ĝin ne akceptis, dirante, ke obee al la ordonoj de la Majstro ne estas saĝe disputi, malgraŭ la argumentoj de la filo de Alfeo, kiun timigis la perspektivo de iu lukto kontraŭ la altaj aŭtoritatoj, ĉar al li ŝajnis, ke la rifuzo vundus la publikan opinion. Siaflanke Saŭlo ne povis devigi sian antagoniston akcepti la defion, des pli ke la Sinedrio povus uzi trudajn rimedojn nur ĉe iu publika denunco, post starigo de proceso, en kiu la akuzito estus konfesita kiel blasfemanto aŭ kalumnianto.

Ĉe la ripetata rifuzo de Stefano la leĝisto el Tarso eksplodis de kolero. Incitinte la plej multajn kamaraĵojn kontraŭ la malamiko, li ŝpinis grandan planon, por devigi la kontraŭulon akcepti la deziratan polemikon, en kiu li penus humiligi tiun antaŭ ĉiuj potenculoj de la superreganta judismo.

Post unu el la ordinaraj kunsidoj de la tribunalo Saŭlo vokis unu el siaj malaltrangaj amikoj kaj flustris al li:

– Nehemja, nia afero bezonas ian decideman kunlaboranton kaj mi ekpensis pri vi por la defendo de niaj sanktaj principoj.

– Kia estas la tasko? – demandis lia amiko kun ia enigma rideto. – Ordonu, kaj mi estas preta vin obei.

– Ĉu vi jam aŭdis pri ia falsa miraklisto, nomata Stefano?

– Ĉu unu el tiuj homaĉoj de la “Vojo”? Mi jam aŭdis lian parolon mem, kaj, por diri la veron, mi rimarkis en liaj ideoj la fantaziojn de efektiva deliranto.

– Bone estas, ke vi lin proksime konas – rediris la juna leĝisto kontenta. – Mi bezonas iun, kiu denuncus lin kiel blasfemanton kontraŭ la Leĝo, kaj venis al mi en la kapon via kunhelpo en tio.

– Ĉu nur tion vi ordonas? – ruze demandis la alparolito. – Ĝi estas facila kaj agrabla afero. Ĉu mi ja ne aŭdis lin, ke la krucumita ĉarpentisto estas la fundamento de la dia vero? Ĉi tio estas pli ol blasfemo. Li estas danĝera revolucianto, punenda kiel kalumnianto de Moseo.

– Tre bone! – ekkriis Saŭlo kun triumfa rideto. – Mi do kalkulas je vi.

En la sekvanta tago Nehemja iris al la Sinedrio kaj denuncis la noblan predikanton de la Evangelio kiel blasfemanton kaj kalumnianton, false aldonante krimajn asertaĵojn. En la akuza akto Stefano estis prezentita kiel ia vulgara sorĉisto, kiel instruanto de renversaj normoj en la nomo de iu falsa Mesio, kiun Jerusalemo antaŭ kelka tempo krucumis per similaj kulpigoj. Nehemja sin prezentis kvazaŭ viktimo de tiu danĝera sekto, kiu atingis kaj malpacigis lian familion mem, kaj asertis, ke li ĉe-

estis fiajn sorĉaĵojn, kiujn ili faris por malutilo al aliaj.

Saŭlo el Tarso notis ĉiujn eĉ plej sensignifajn de-poziciojn, akcentante la kompromitantajn detalojn.

La sciigo pri tiu proceso eksplodis inter la adeptoj de la “Vojo”, farante tre dolorajn afikojn. Tiuj malpli bravaj, kun Jakobo en la fronto, lasis sin kapti de ĉi-aspecaj konsideroj, timante esti persekutataj, sed Stefano, kune kun Simon Petro kaj Johano, tenadis sin absolute serena, trankvile ricevinte la ordonon kuraĝe respondi la akuzon. Plena de espero, li petis Jesuon lin ne forlasi, por ke li atestu la solidecon de sia evangelia fido, kaj fidele kaj ĝoje atendis la oportunan okazon por tio.



Antaŭ la Sinedrio

En la tago difinita la granda salono de la plej alta izraelida institucio pleniĝis per efektiva multego da konfesantoj kaj vidamuloj, avidantaj ĉeesti la unuan konflikton inter la pastroj kaj la piaj kaj strangaj homoj de la “Vojo”. Tie kolektiĝis ĉio, kion Jerusalemo havis da plej aristokrata kaj kulturita; sed al la almozuloj ne estis permesite eniri, kvankam la afero estis publika.

La Sinedrio prezentis siajn plej eminentajn membrojn. Kune kun la pastroj kaj instruantoj de Izrael tie troviĝis la plej gravaj personoj de la fariseismo. Tie estis reprezentantoj de ĉiuj sinagogoj.

Komprenante la sagacecon de Stefano, Saŭlo deziris havigi al li okazon kompari la scenejon, sur kiu regis lia talento, kun la senluksa domo de la adeptoj de la nazereta ĉarpentisto. En la fundo lia intenco kuŝis en la pava elmonro de ia supereco, samtempe karesante la koran esperon gajni lin al la vicoj de la judismo. Tial li preparis tiun kunvenon laŭ ĉiuj postuloj, tiel, ke ĝi impresu la antagoniston.

Stefano sin prezentos ne kiel ia ordinara arestito, devanta reguligi kontojn kun la Justico, sed kiel homo, vokita por sin defendi kontraŭ imputitaj akuzoj. Ekzameninte do la situacion, li insiste petis la galileajn apostolojn ne akompani lin, konsiderante ne nur la neceson, ke ili restadu apud la suferantoj, sed ankaŭ la eblan farigon de seriozaj konfliktoj en la okazo, se tien iros adeptoj de la “Vojo”, pro la fortanimeco, kun kiu li penas gardi la purecon kaj la liberecon de la Evangelio de la Kristo. Krom tio la rimedoj, kiujn ili povos disponi, estis

tro simplaj, kaj ne estus juste per ili alfronti la altegan potencon de la pastroj, kiuj trovis rimedojn por krucumi la Mesion mem. Favore por la “Vojo” emfaze parolis nur tiuj kompatindaj malsanuloj, la puraj konvinkoj de la plej humilaj, la danko de la plej malfeliĉaj – la sola forto potenca pro sia enhavo de dia virto, subtenanta ilian aferon antaŭ la aŭtoritatuloj, superregantaj en la mondo. Tiel pensante, li nepre volis ekhavi la ĝojon preni sur sin solan la respondecon por sia sintenado, kompromitante neniun el siaj kamaradoj tiel same, kiel agis Jesuo iam en sia dia apostolado. Se necese, li ne evitus la eblon de la ekstrema sinofero, atestante sian amon al la respektinda kaj kompatema koro de la Majstro. La sufero por ĉi tiu estus por li milda kaj dolĉa. Lia argumentado venkis la bonan deziron de la plej flanimaj kunuloj; tiel, helpate de neniun amiko, li sin prezentis al la Sinedrio, kiu lin forte impresis pro sia grandeco kaj lukso. Kutiminte al la malgajaj kaj malriĉaj scenoj en la antaŭurbo, kie loĝis ĉiaspecaj malfeliĉuloj, li raviĝis de la riĉeco de la Templo, de la majesta aspekto de la turo de la romanoj, de la grekastilaj loĝokonstruaĵoj, de la ekstera mieno de la tie multenombraj sinagogoj.

Komprenante la gravecon de tiu kunsido, kien iris la elito de la urbo, por sciiĝi pri tiu neordinara interesiĝo de Saŭlo, kiu tiam estis la plej vibra esprimo de juneco de la judismo, la Sinedrio petis la kunhelpon de la roma aŭtoritatularo por la perfekta tenado de la ordo. La Provinca Kortumo ne domaĝis penojn. La patricioj mem, loĝantaj en Jerusalemo, en granda nombro iris, por ĉeesti la gravan okazon de tiu tago, konsiderante, ke tiu estis la unua proceso pri la ideoj, instruitaj de la nazareta profeto post lia krucumo, kiu postlasis tiel profundan perpleksecon kaj tiom multe da duboj en la publika spirito.

Kiam la granda salono estis plenkuna de homoj kun alta socia rango, Stefano, kondukita de iu servanto de la Templo, sidiĝis sur antaŭdifinita loko, kie li restis sub la gardo de soldatoj, kiuj fiksis sur li ironian rigardon.

La kunsido komenciĝis laŭ ĉiuj statutaj ceremonioj. Komencante la laborojn, la ĉefpastro anoncis la elekton de Saŭlo, laŭ ties deziro mem, por eldandi la denunc-

iton kaj esplori la grandecon de ties kulpo pro la malŝato de la sanktaj principoj de la raso. Ricevinte la inviton, por ofici kiel juĝanto de la afero, la tarsi junulo ekmontris venkan rideton. Kun aŭtoritateca gesto li ordonis al la senfama predikanto de la “Vojo” proksimiĝi al la centro de la luksa salono, kaj tien Stefano serene sin direktis, akompanata de du mallumvizaĝaj gardistoj.

La junulo el Korinto fikse ekrigardis la medion ĉirkaŭ si kaj konsideris la kontraston inter la du atmosferoj, rememoris la lastan kunvenon en lia malriĉa eklezio, kie li malgraŭvole konatiĝis kun tia kaprica antagonisto. Ĉu tiuj ne estas la “perditaj ŝafoj” de la domo de Izrael, pri kiuj Jesuo parolis en siaj viglaj instruoj? Kvanke la judismo ne akceptis la mision de la Evangelio, kiel do ili interkonsentigas la sanktajn asertojn de la profetoj kaj ties noblan ekzempladon de virto kun la avarico kaj la malsolideco de la moroj? Moseo mem estis sklavo kaj pro sindono al sia popolo spertis sennombrajn malfacilaĵojn tra ĉiuj tagoj de sia ekzistado, konsekrita al la Ĉiopova. Ijob suferis nepriskribeblajn dolorojn kaj atestis sian fidon ĉe la plej akraj suferoj. Jeremia ploris nekomprenebla. Amos gustumis la galon de sendankeco. Kiel la izraelidoj povus harmoniigi inter si egoismon kaj la aman saĝecon de la Psalmoj de David? Estis strange, ke, tiel ĵaluzaj pri la Leĝo, ili sin tute fordonas al malnoblaĉaj interesoj, dum Jerusalemo estas plena de tute senhelpe vivantaj familioj, iliaj fratoj laŭ la raso. Kiel kunlaboranto en modesta societo li proksime konis la bezonojn kaj suferojn de la popolo. Ĉe tiuj ĉi konkludoj li sentis, ke la nazareta Majstro nun multe pli altigis antaŭ liaj okuloj, tiu profeto, kiu disdonis al la afliktitoj la plej purajn esperojn kaj la plej konsolantajn spiritajn veraĵojn.

Li ankoraŭ ne rekonsciiĝis de la mirego, kun kiu li rigardadis la brilantajn tunikojn kaj la orajn ornamojn, abunde paradantajn en tiu salono, jen la hela kaj vibranta voĉo de Saŭlo vekis lin al la realeco de la situacio.

Leginte la akuzan akton, en kiu Neĥemja estis la ĉefa atestanto, kaj aŭdite plej atente, Saŭlo parolis al Stefano samtempe krude kaj fiere:

– Kiel vi vidas, vi estas akuzita kiel blasfemanto, kalumnianto kaj sorĉisto, antaŭ la plej gravaj aŭtoritatuloj. Tamen antaŭ ol ion decidi, la tribunalo deziras ekoni vian devenon, por difini viajn rajtojn en la nuna momento. Ĉu vi estas el familio izraelida?

La aldemandito paliĝis, pesante la malfacilaĵojn de ia plena identigo, se ĝi estus necesa, sed per firma tono respondis:

– Mi apartenas al la idoj de la tribo de Isaĥar.

La leĝisto iomete surpriziĝis, sed nerimarkeble por la ĉeestantoj, kaj daŭrigis:

– Kiel izraelido vi rajtas libere rebati miajn demandojn, tamen estas necese klarigi, ke tia rajto ne evitigos al vi severajn punojn, se vi obstinos en la diskonigo de la krudaj eraroj de revolucia doktrino, kies fondinton kondamnis al la malhonoriga kruco la aŭtoritateco de ĉi tiu Tribunalo, kie alte sidas la plej respektindaj idoj de la triboj de Dio. Supozante vian devenon, mi invitis vin lojale diskuti kun mi ĉe nia unua renkontiĝo en la kunsido de la homoj de la “Vojo”. Mi fermis al mi la okulojn antaŭ la scenoj de mizero, kiuj tiam min ĉirkaŭis, por analizi sole nur vian inteligentecon, sed, elmontrante strangan ekzaltitecon, eble dank’al sorĉaĵoj, kies influoj estas tie videblaj, vi detenis vin de ĉia parolo, malgraŭ mia insistado. Via neklarigebla sintenado igis la Sinedrion, laŭ ĉi tiu denunco de via nomo, rigardi vin kiel malamikon de niaj leĝoj. Vi do nun devos respondi ĉiujn konvenajn kaj necesajn demandojn, kaj vi rekonos, mi esperas, ke via izraelida karaktero ne povos liberigi vin de la puno, destinita por la perfidantoj de nia afero.

Post ne malgranda paŭzo, dum kiu la juĝanto kaj la denuncito povis rimarki la korpreman atendon de la ĉeestantoj, Saŭlo komencis la eldemandadon:

– Kial vi forpuŝis mian inviton je diskutado, kiam mi per mia alesto honoris la predikadon en la eklezio de la “Vojo”?

Stefano, kies okuloj brilegis, kvazaŭ per ia dia forto respondis per firma voĉo, ne malkaŝante la emocion, kiu regis lian internon:

– La Kristo, al kiu mi servas, rekomendis al siaj

disĉiploj ĉiam ajn eviti la fermenton de la kvereloj. Koncerne tion, ke vi per via alesto honoris mian modestan parolon, mi dankas vin por tiu monstro de nemeritita interesiĝo, sed mi preferas konsideri kun David ^(*), ke per la Eternulo gloriĝas nia animo, ĉar ja ni posedas nenion bonan en ni mem, se Dio ne helpas nin per la grandeco de Sia gloro.

Ĉe tia subtila leciono, kiu estis ĵetita al li rekte en la vizaĝon, Saŭlo el Tarso mordis la lipojn, kun samtempaj koleraj kaj resentaj, kaj nun penante eviti ĉian personan atakon, por ne fali en iun similan situacion, daŭrigis:

– Vi estas akuzita kiel blasfemanto, kalumnianto kaj sorĉisto...

– Mi permesas al mi demandi, kiamaniere – brave rediris la alparolito.

– Blasfemanto, prezentante la nazaretan ĉarpentiston kvazaŭ Savinton; kalumnianto, malŝatante la Leĝon de Moseo per forneado de la sanktaj principoj, kiuj prezidas en niaj destinoj. Ĉu vi konfirmas ĉion ĉi? Ĉu vi konsentas ĉi tiujn akuzojn?

Stefano senhezite klarigis:

– Mi persistas en mia kredo, ke la Kristo estas la Savinto, promesita de la Eternulo per la instruoj de la profetoj de Izrael, kiuj ploris kaj suferis tra multe da jarcentoj, ĉar ili sciigis al ni la dolĉajn ĝojojn de la Promeso. Rilate la duan parton, mi pensas, ke la akuzo venas de erara interpreto de miaj vortoj. Mi ĉiam respektis la Leĝon kaj la Sanktajn Skribojn, sed mi konsideras la Evangelion de Jesuo ilia dia komplemento. La unuaj estas la verko de la homoj, la dua estas la salajro de Dio al la fidelaj laboristoj.

– Ĉu vi do opinias – diris Saŭlo, ne kaŝante sian koleron ĉe tia solida firmeco –, ke la ĉarpentisto estas pli granda, ol la granda leĝodonanto?

– Moseo estas la severa justeco en la revelacio, la Kristo estas la viva kaj daŭra amo.

(*) Psalmaro, 34:2. – *Noto de la Aŭtoro.*

Ĉe ĉi tiu respondo de la akuzito leviĝis ŝaŭmo de ekzaltiĝo inter la multenombra ĉeestantaro. Kelkaj kolerantaj fariseoj elkriadis insultojn, sed Saŭlo faris al ili ordonan geston, kaj la silentiĝo ebligis la rekomencan de la eldemandado. Donante al sia voĉo aŭtoritatan tonon, li daŭrigis:

– Vi estas izraelido kaj ankoraŭ juna. Konsiderinda inteligento servas al via klopodado. Ni do devas, antaŭ ol vin iel puni, klopodati por via reveno en la ŝafejon. Estas nepre necese ame voki la defalintan fraton antaŭ la ekstremokaza uso de la armiloj. La Leĝo de Moseo povos havigi al vi eminentan situacion, dum kion vi havos de la sensignifa, senesprima parolo de la malklera nazareta laboristo, kiu revis pri la gloro, sed pagis por siaj malsaĝaj esperoj sur malhonoriga kruco?

– Mi malŝatas la pure konvencian valoron, kiun la Leĝo povus havigi al mi interŝanĝe kontraŭ la apogo al la monda politiko, kiu kun ĉiu tago estas alia, konsiderante, ke nia sekureco kuŝas en la prilumita konscienco kun Dio kaj por Dio.

– Sed kion vi atendas de tiu mistifikinto, kiu ĵetis konfuzon inter nin kaj fine mortis sur Kalvario? – kolere rediris Saŭlo.

– La disĉiplo de la Kristo devas scii, al kiu li servas kaj por mi estas honoro esti humila instrumento en liaj manoj.

– Ni bezonas nenian ennovajiston por la vivo en Izrael.

– Vi iam komprenos, ke, por Dio, Izrael signifas la tutan homaron.

Ĉe tiu ĉi tro brava respondo preskaŭ ĉiuj kunsidantoj eksplodis per mokfajfado, elmontrante sian malkaŝan malamikecon kontraŭ la denunciado de Neĥemja. Kutiminte al necedema regionismo, la izraelidoj ne toleris la ideon de kunfratiĝo kun tiuj popoloj, kiujn ili konsideris barbaroj kaj idolanoj. Dum la pli ekzaltitaj elverŝis flamajn protestojn, la romanoj observadis la scenon, sciivolaj kaj interesitaj, kvazaŭ ili ĉeestus ian festan ceremonion.

Post longa paŭzo la estonta rabeno daŭrigis:

– Vi jesigas la akuzon pri blasfemo, eldirante tiun principon kontraŭ la pozicio de la elektita popolo. Ĉi tio estas via unua kondamno.

– Tio min ne timigas – diris la akuzito per firma tono. – Anstataŭ la fieraj iluzioj, kiuj kondukus la homon en pereigajn abismojn, mi preferas kredi kun la Kristo, ke ĉiuj homoj estas infanoj de Dio, meritantaj la amon de la unu sama Patro.

Saŭlo kolere mordis la lipojn kaj, aspektigante pli severa sian teniĝon de juĝanto, akre parolis plu:

– Vi kalumnias Moseon per ĉi tiuj vortoj. Mi atendas de vi ilian konfirmon.

Ĉi tiun fojon la alparolito direktis al li signifoplenan rigardon kaj diris:

– Kial vi atendas de mi la konfirmon de miaj vortoj, se vi juĝas arbitre? La Evangelio ne konas la komplikajojn de la kazuistiko. Mi ne malŝatas Moseon, sed mi ne povas ne proklami la superecon de Jesuo Kristo. Vi povas skribi verdiktojn kaj eldiri anatemojn kontraŭ mi, sed iu devas kunlabori kun la Savinto, por la restarigo de la vero super ĉio kaj spite la plej dolorajn sekvojn. Mi ĉi tie staras, por ĝin fari, kaj mi scios pagi, pro la Majstro, la prezon de la plej pura fideleco.

Post kiam ĉesis la murmurado de la ĉeestantaro, Saŭlo reprenis la parolon:

– La tribunalo rekonas vin kiel kalumnianton, kiu devas ricevi la punon rilatan al tiu abomeninda kvalitigo.

Tuj kiam la skribisto, kiu notis la vortojn de tiu eldemandado, registris ĉi tiujn novajn deklarojn, Saŭlo akcente diris, ne kaŝante la koleron, kiu lin posedis:

– Oni tute ne forgesu, ke vi estas akuzita kiel sorĉisto. Kion vi respondas al ĉi tiu kulpigo?

– Pri kio oni akuzas min en ĉi tiu rilato? – sentime demandis la predikanto de la “Vojo”.

– Mi mem vidis vin resanigi mutan junulinon en sabato, kaj mi ne scias la specon de sorĉaĵoj, kiun vi por tio uzis.

– Ne mi faris tiun agon de amo, kiel vi certe aŭdis min, sed la Kristo, per mia mizereco, kiu havas nenion bonan.

– Ĉu vi pensas, ke mi senkulpigas vin per tia naiva aserto? – ironie rediris Saŭlo. – Tia ŝajna humileco ne liberigas vin de kulpo. Mi vidis tiun okazaĵon, kaj nur sorĉarto povus klarigi ĝian strangan influan kaŭzon.

Tute ne konfuziĝante, la akuzito inspirite respondis:

– Kaj tamen la judismo estas plena de tiaj faktoj, pri kiuj vi pensas, ke vi ilin ne komprenas. Dank'al kia sorĉarto Moseo sukcesis ŝpruci el roko la fonton de vivanta akvo? Kia sorĉaĵo tio estis, ke la elektita popolo vidis disflankiĝi la malkvietajn ondojn, por ke ĝi forkuru de la sklaveco? Per kia talismano Josuo pretendis haltigi la sunon? Ĉu vi en ĉio ĉi ne vidas la rimedojn de la Dia Providenco? De ni mem ni povas preni nenion, tamen en la plenumado de nia devo ni nepre atendu ĉion de la Dia Favorkoreco.

Analizante ĉi tiun koncizan respondon, kiu enhavis logikon, nerefuteblan rezonadon, la leĝisto el Tarso grincis per la dentoj. Ekrigardante la ĉeestantaron, li konstatis, ke lia antagonisto ĝuas la simpation kaj admiron de multaj. Li eĉ konsterniĝis. Kiel li ricevu trankvilecon ĉe la impulsiĝema temperamento, kiu instigadis lin al emociaj ekstremoj? Ekzamenante la lastan aserton de Stefano, li sentis, ke estas por li malfacile aranĝi decidigan argumentadon. Ne povante elmontri sian desapontigon, ne kapablante trovi la ĝustan rediron, li konsideris la urĝecon de ia taŭga solvo kaj turnis sin al la ĉefpastro jene:

– La akuzito per sia propra parolo konfirmas la denuncon, kies objekto li estis. Li ĵus publike konfesis, ke li estas blasfemanto, kalumnianto kaj sorĉisto, tamen pro sia naskiĝo li rajtas lastan defendon, sendepende de mia juĝopinio. Mi do proponas, ke la kompetenta aŭtoritato konsentu al li ĉi tiun rimedon.

Fikse rigardante la vizaĝon de la fiera leĝisto, ruĝan de kolero, kiu travidigis la tempeston, tondrantan en lia koro, granda nombro da pastroj kaj eminentuloj ekrigardis unu alian kun mirego, kvazaŭ antaŭĝuante la unuan malvenkon de Saŭlo, kies flama parolo ĉiam superfortis ĉiajn kontraŭulojn.

La juĝanto de la afero akceptis tiun proponon, kaj

sekve Stefano ekuzis rajton, kiun al li konsentis lia naskiĝo.

Stariĝinte, li noble ekrigardis la afliktitajn mienojn, kiuj lin serĉis de ĉiuj flankoj. Li rimarkis, ke la plej multaj ĉeestantoj supozas en lia figuro ian danĝeran malamikon de la rasaj tradicioj, tiaj estis iliaj agresemaj mienoj; sed li rimarkis ankaŭ, ke iuj izraelidoj lin rigardas simpatie kaj kompreneme. Uzante ĉi tiun subtenon, li sentis sin pli kuraĝa, povanta pli serene elvolvi la sanktajn instruojn de la Evangelio. Pretervole venis al li en la memoron la promeco de Jesuo al siaj sekvantoj, ke li staros ĉe ili en la momentoj, kiam ili devos atesti sian kredon per la parolo, kaj tial li devos ne tremi ĉe la malsaĝaj provokoj de la mondo. Pli ol iam li sentis la konvinkon, ke la Majstro lin helpos ĉe lia pritraktado de la doktrino de amo.

Post minuto da maltrankvila atendo li en impresita maniero ekparolis:

– Izraelidoj! Kiel ajn granda la malkonsento de niaj religiaj opinioj, ni ne povus modifi nian ligilon de frateco en Dio, la plej alta liveranto de ĉiaj favoroj. Al tiu Patro, grandanima kaj justa, mi levas mian peton, ke ni fidele komprenu la sanktajn veraĵojn. En la pasintaj tempoj niaj prapatroj aŭdis la grandiozajn kaj profundajn admonojn de la senditoj de la Ĉielo. Por prepari estontecon de solida paco por siaj posteuloj, niaj prapatroj travivis mizeraĵojn kaj necesbezonojn de la sklaveco. Ilian panon malsekigis dolorlarmoj, ilia soifo sufokis. Ili vidis fiaskintaj ĉiujn esperojn pri sendependeco, sennombraj persekutoj disbatis iliajn hejmojn, pligrandigante la suferojn en la bataloj de ilia migrado. La sanktaj viroj de Izrael akceptis siajn nobligajn martiriĝojn kvazaŭ gloran kronon de triumfo. Nutris ilin la parolo de la Eternulo ĉe ĉiuj sortobatoj. Iliaj spertoj prezentas potencon kaj sanktan posedaĵon; el tiuj ni havas la Leĝon kaj la Skribaĵon de la profetoj. Malgraŭ tio ni ne povas trompi nian soifon. Nia koncepto pri justeco estas frukto de miljara laborado, en kiu ni streĉas niajn plej grandajn fortojn, sed intuicie ni sentas, ke super tiu justeco ekzistas io pli alta. Ni havas la karceron por

la deviintoj, la valon de la malpuruloj por tiuj, kiuj mal-saniĝas, sen la protekto de la familio, la ŝtonumadon sur la publika placo por la erarinta virino, la sklavecon por la ŝuldantoj, la tridek naŭ skurĝobatojn (*) por tiuj plej malfeliĉaj. Ĉu tio sufiĉas? Ĉu la pasintatempaj lecionoj ne estas plenaj de la vorto “favorkoreco”? Io parolas al nia konscienco pri ia supera vivo, kiu inspiras pli noblajn kaj belajn sentojn. Grandega estis la laboro tra multe da jarcentoj, sed la justa Dio respondis la angorajn vokojn de la koro, sendante al ni Sian amatan Filon, la Kriston Jesuo!

La ĉeestantaro aŭdis lin kun mirego, sed kiam li pli akcente parolis pri la nazareta Mesio, la alestantaj fariseoj, aliĝinte al la junulo el Tarso, eksplodis per protestoj, freneze kriante:

– Anatemo! Anatemo! Punon al la defalinto!

Stefano serene ricevis tiun riproĉuraganon kaj, tuj kiam la ordo estis restarigita, firme daŭrigis:

– Kial vi min tiel mokfajfas? Ĉia rapideca juĝo estas signo de malforteco. Antaŭe mi ne akceptis diskutadon, konsiderante, ke oni devas ekstermi ĉian fermenton de malkonkordo; sed de tago al tago la Kristo kunvokas nin por nova laboro, kaj certe la Majstro vokas min hodiaŭ, por ke mi konversaciu kun vi pri liaj profundaj veraĵoj. Ĉu vi deziras min ridindigi kaj moki? Tio ja devas kuraĝigi min, ĉar Jesuo en la plej alta grado ricevis tian saman traktadon. Malgraŭ via abomeno, estas por mi honoro proklami la nesupereblajn glorojn de la nazareta profeto, kies grandeco venis helpe al nia morala ruino, altigante nin al Dio per sia elaĉeta Evangelio.

Ankoraŭ unu hajlo da insultoj interrompis lian parolon. Mordaj esprimoj kaj akraj ofendoj estis kontraŭ lin ĵetataj de ĉiuj flankoj. Stefano ne senkuraĝiĝis. Serene turnante sin al la ĉeestantoj, li ilin noble ekri-

(*) En Readmono, 25:3 ni legas: “Kvardek batojn oni povas doni al li, sed ne pli”, kaj en II Korintanoj, 11:24: “De la Judoj kvinfoje mi ricevis batojn po kvardek sen unu.” – *La Trad.*

gardis kaj ricevis la senton, ke tiuj plej ekzaltitaj estas la fariseoj, tiuj plej funde atingitaj de la novaj veraĵoj.

Atendinte, ĝis refariĝos kvieteco, li denove ekparolis:

– “Amikaj fariseoj, kial vi obstinas en nekompreno? Ĉu vi timas la realecon de miaj asertoj? Se viaj protestoj sin bazas sur tiu timo, silentiĝu, ke mi plue parolu. Rimarku, ke mi parolas pri niaj pasintatempaj eraroj, kaj kiu dividas kun iu kulpon, tiu atestas amon, en la kadro de kompensoj. Malgraŭ niaj malfortaĵoj Dio amas nin, kaj mi, konfesante mian propran malfortecon, povus paroli al vi nur kiel frato. Tamen, se vi esprimas mal-esperon kaj indignon, memoru, ke ni ne povas formeti de ni la realecon de nia profunda malgraveco. Ĉu vi iam legis la lecionojn de Jesaja? Estas grave konsideri la admonon (*), ke ni ne povas eliri rapidante, nek trompante nin mem, nek forkurante de niaj devoj, ĉar la Eternulo iros antaŭ ni kaj la Dio de Izrael gardos nin malantaŭe. Audŭ min! Dio estas la Patro, la Kristo estas nia Sinjoro.

“Vi multe parolas pri la Leĝo de Moseo kaj pri la Profetoj, tamen ĉu vi povas tute konsciencĉe aserti, ke vi absolute observas iliajn lumajn instruojn? Ĉu vi nun ne estas blindaj, rifuzante kompreni la dian mesaĝon? Tiu, kiun vi ironie nomas la nazareta ĉarpentisto, estis amiko al ĉiuj malfeliĉuloj. Lia predikado ne limiĝis je elvolvado de filozofiaj principoj: pli ĝuste, per ekzemplado, li renovigis niajn morojn, reformis la pli altajn ideojn, sigelante ilin per la dia amo. Liaj manoj honorindigis la laboron, kuracis ulcerojn, resanigis leprulojn, donis vidadon al blinduloj. Lia koro disdividiĝis al ĉiuj homoj laŭ la nova kompreno de amo, kiun li havigis al ni per la plej pura ekzemplo.

“Ĉu vi ne scias, ke la parolo de Dio havas aŭdantojn kaj praktikantojn? Estus al vi utile, se vi demandus vin mem, ĉu vi la Leĝon sole nur aŭdis, por ne falsi la ateston.

“Jerusalem ne ŝajnas al mi tiu sanktejo de tradicio de la kredo, kiun mi de infaneco konis per informoj de

(*) Jesaja, 52:12. – *Noto de la Aŭtoro.*

miaj gepatroj. Hodiaŭ ĝi faras la impreson de ia granda bazaro, kie oni vendas la sanktaĵojn. La Templo estas plena de komercistoj. La sinagogoj estas plenŝtopitaj de aferoj rilataj al mondaj interesoj. La fariseaj ĉeloj similas bolantan svarmejon de malnoblaĉaj interesoj. La lukso de niaj tunikoj skandalas. Via malŝparado miregigas. Ĉu vi ne scias, ke apud viaj muroj iom da malfeliĉuloj mortas de malsato? Mi venas de la antaŭurboj, kie centriĝas granda parto de niaj mizeruloj.

“Vi parolas pri Moseo kaj la Profetoj, mi ripetas. Ĉu vi kredas, ke la respektindaj prapatroj komercis per la donoj de Dio? La granda leĝdonanto vivis meze en teruraj, doloraj spertoj. Jeremia pasigis longajn noktojn de afliktoj, laborante por la netuŝebleco de nia religia posedaĵo ĉe la diboĉoj en Babel. Amos estis malriĉa paŝtisto, ido de la laboro kaj humileco. Elija suferis ĉiaspecajn persekutojn kaj devis rifuĝi en dezerton, ricevinte nur larmojn kiel prezon de lia iluminateco. Ezra estis modelo de sinofero por la paco de siaj samlandanoj. Jehezkel estis kondamnita al morto, ĉar li proklamis la veron. Daniel elportis la plej akrajn suferojn de kaptiteco. Ĉu vi citas niajn iamajn heroajn instruantojn nur por tio, por pravigi la egoisman ĝuadon de la vivo? Kie vi konservas vian kredon? Ĉu en la senfara komforto aŭ en la produktanta laboro? Ĉu en la monujo de la mondo aŭ en la koro, kiu estas la dia templo? Vi instigas al ribelo, sed volas pacon? Vi ekspluatas la proksimumon, kaj samtempe parolas pri amo al Dio? Ĉu vi ne pensas pri tio, ke la Eternulo ne povas akcepti laŭdon el lipoj, dum la koro de la homo restas malproksime de Li?”

Ĉe la blovo de tiu altega inspiro la ĉeestantaro ŝajnis ŝtoniĝinta, ne kapablanta preni ian decidon. Multaj el tiuj izraelidoj supozis, ke ili vidas en Stefano la reaperon de unu el la pratempaj profetoj de ilia raso, sed la fariseoj, kvazaŭ rompinte la misteran forton, kiu ilin mutigis, eksplodis per surdiga kriegado, per delira gestado kaj per vomado de insultoj, penante malpliigi la fortan impreson, kiun faris la elokventaj kaj varmaj ekflugoj de la parolanto.

– Ni ŝtonumu la fiulon! Ni frakasu la kalumnion!
Anatemon al la vojo de Satano!

Intertempe Saŭlo stariĝis ruĝa de kolero. Li ne povis kaŝi la furiozon de sia impulsigema temperamento, eliĝantan el liaj malkvietaj kaj brilantaj okuloj. Li rapide ekpaŝis al la akuzito, komprenigante, ke li reprenos ties parolon, kaj la kunvenantaro tuj kvietiĝis, kvankam ankoraŭ daŭris susuro de sufokitaj komentarioj.

Rimarkinte, ke li suferos ian perforton, kaj ankaŭ, ke la fariseoj petis lian morton, Stefano fikse ekrigardis tiujn plej ironiantajn kaj flamantajn, kaj laŭte kaj trankvile diris:

– Via sintenado min ne timigas. La Kristo zorge rekomendis al ni, ke ni ne timu tiujn, kiuj povas mortigi nur nian korpon.

Li ne povis daŭrigi sian paroladon. La tarsi junulo, kun manoj al la flankoj, kolera rigardo kaj krudaj gestoj, kvazaŭ antaŭ li starus ia ordinara malbonfarinto, furioze kriis al li en la orelon:

– Sufiĉe! Sufiĉe! Eĉ ne unu vorton plu! Nun, kiam estis al vi senutile konsentita la lasta helprimedo, ankaŭ mi uzos la rajton, kiun al mi donas mia deveno, antaŭ defalinta frato.

Kaj li forte ekpugnis la vizaĝon de Stefano, kiu neiel reagis. La fariseoj aplaŭdis tiun brutalajon per delira kriegado, kvazaŭ en festa tago. Donante liberan kuron al sia flamiĝemo, Saŭlo senkompate pugnadis plu sian viktimon. Sen rimedoj en la morala sfero, ĉe la logikeco de la Evangelio, li uzis perforton, kontentigante sian trudeman naturon.

Sub tiaj ekstremaj elprovoj, la predikanto de la “Vojo” petis Jesuon pri la helpo necesa, por ne fali ĉe la atesto. Malgraŭ la radikala reformo, kiun la influo de la Kristo trudis al liaj plej profundaj konvinkoj, li ne povis sin deteni ne senti la doloron de vundita digno; tamen li tuj penis reĝustigi sian fortojn, komprenante la abnegacion, kiun la Majstro predikis kiel plej altan lecionon. Li rememoris la suferojn de sia patro en Korinto, revidis en la imago lian torturon kaj morton. Li revenigis en la memoron la doloran provon, kiun li mem

travivis, kaj konsideris, ke se per la sola konado de la parolo de Moseo kaj de la Profetoj li tian moralan energion ricevis, por kontraŭstari tiujn nesciantojn de la Dia Boneco, kion do li ne povos atesti nun kun la Kristo en la koro? Ĉi tiuj pensoj alsvarmis al lia turmentata cerbo kiel ia ekstreme konsola balzamo. Tamen, malgraŭ la fortanimeco, kiu signis lian karakteron, oni vidis, ke li verŝas abundajn larmojn. Rimarkinte lian ploron, miksit-an kun la sango, ŝprucanta el la vundo, kiun la pugnobatoj faris en lia vizaĝo, Saŭlo el Tarso sin detenis, satigante sian koleregon. Li ne povis kompreni la pasivecon, kun kiu la atakito ricevis la batojn de lia forto, hardita en la sportekzercoj.

La sereneco de Stefano lin ankoraŭ pli konfuzis; sendube li staris antaŭ ia nekonata energio.

Mokridetante, li fine demandis:

– Ĉu vi ne reagas, malkuraĝulo? Ĉu via skolo estas ankaŭ doktrino de sendigneco?

La kristana predikanto, kvankam plorante, firme respondis:

– Paco diferencas de brutaleco tiel same, kiel la forto de la Kristo malakordas kun la via.

Konstatinte tian grandan superecon de konceptado kaj pensado, la leĝisto ne povis kaŝi la resenton kaj la furiozon, kiuj vidiĝis tra liaj flamantaj okuloj. Ŝajnis, ke li troviĝas sur la supro de incitiĝo, kiu elfluis per la plej grandaj malsaĝaĵoj. Li kvazaŭ atingis la zeniton de la toleremo kaj rezistemo.

Turnante sin, por vidi, ĉu kun li konsentas liaj partianoj, kiuj tie prezentis la plimulton, li petis de la ĉefpastro kruelan verdikton. Lia voĉo tremis pro la farita fizika peno.

– Analizinte la kondamnan akton – li aldonis triumfe – kaj konsiderinte la gravajn insultojn, ĉi tie elvomitajn, mi, kiel juĝanto de la afero, petas, ke la juĝato estu ŝtonumita.

Uragana aplaŭdado subtenis lian krudan parolon. La fariseoj, tiel akre trafataj de la flamaj esprimoj de la disĉiplo de la Evangelio, supozis, ke ili tiamaniere venĝ-

as tion, kion ili rigardis kiel kriman mokon al iliaj prerogativoj.

La supera aŭtoritatulo ricevis la proponon kaj jam intencis submeti ĝin al voĉdonado en la malgranda rondo de siaj plej eminentaj kolegoj.

Tiam Gamaliel, mallaŭte parolinte kun siaj altrangaj kolegoj, eble konsiderante la noblan karakteron kaj la nebrideblan impulsiĝemecon de sia ekslernanto, komprenigante al ili, ke la proponita sankcio kuntrenus la tujan morton de la predikanto de la “Vojo”, stariĝis meze en la malkvieta kunsidantaro kaj grandanime rimarkis:

– Havante voĉon en ĉi tiu tribunalo kaj ne dezirante trorapidigi la solvon de problemo de konscienco, mi proponas, ke oni pli prudente studu la petitan verdikton, tenante la akuziton en karcero, ĝis estos klarigita lia respondeco antaŭ la Justico.

Saŭlo komprenis la vidpunkton de sia eksinstruanto kaj deduktis, ke ĉi tiu agigas sian ĉie konfesatan toleremon. Tiu propono treege kontraŭis liajn solidajn intencojn, sed sciante, ke li ne povas malŝati la respektindan aŭtoritatecon de tiu majstro, li rediris:

– En karaktero de juĝanto de la afero mi akceptas tiun proponon, tamen, se la puno, kiel dezirata, estas prokrastota, kaj konsiderante la venenon, elspiritan de la malrespekta kaj sendanka parolo de la juĝato, mi esperas, ke li estos mankatenita kaj tuj kondukita en karceron. Mi proponas krom tio, ke oni faru pli vastajn esplorojn pri la pseŭdo-piaj laboroj de la danĝeraj kredantoj de la “Vojo”, por ke estu elradikita la ĝermo de maldisciplino, kiun ili semis kontraŭ la Leĝo de Moseo; tia revolucia entrepreno trenos neantaŭvideblajn sekvojn kaj esence estas malordo kaj konfuzo en nia tendaro mem kaj abomeninda forgeso de la diaj ordonoj; ĝi tiamaniere kunhelpas por la disvastiĝo de la malvera doktrino, kies kreskado pliseverigus la punojn.

Ĉi tiu nova propono estis plene aprobita. Laŭ sia profunda sperto pri la homoj Gamaliel komprenis, ke estas nepre necese fari kelkan cedon.

En tiu sama loko Saŭlo el Tarso estis rajtigita de la Sinedrio komenci la plej vastajn esplorojn pri la agado

de la “Vojo”, kun la ordono admoni, korekti kaj aresti ĉiujn izraelidojn, regatajn de sentoj ricevitaj el la Evangelio; de tiu momento ĉi tiu estis rigardata de la semida regionismo kiel fonto de ideologia veneno, per kiu la tro kuraĝa ĉarpentisto pretendis renversi la izraelidan vivon, diserigante ĝiajn plej legitimajn ligilojn.

La tarsi junulo, antaŭ Stefano, nun malliberigita, ricevis la oficialan komunikon kun triumfa rideto.

Tiel finiĝis tiu memorinda kunsido. Multenombraj kamaradoj alproksimiĝis al Saŭlo kaj lin gratulis pro lia flama parolo, ĵaluza pri la hegemonio de Moseo. La ekslernanto de Gamaliel ricevis la saluton de siaj amikoj kaj kuraĝigite diris:

– Mi kalkulas je ĉiuj; ni batalos ĝis la fino.

La laboroj en tiu posttagmezo konsumis ĉies fortojn, sed la vekita interesiĝo estis grandega. Stefano estis ekstreme laca. Antaŭ la grupoj, kiuj foriris plej diverse konsiderante la faktojn, li estis manligita, antaŭ ol esti kondukita al la malliberejo. Gardante en la koro la sentojn de la Majstro, li, malgraŭ la laceco, sentis la konsciencon konsolata. Kun sincera interna ĝojo li konstatis, ke Dio ankoraŭ unu fojon havigis al li okazon, por atesti sian fidon.

Post kelke da momentoj ŝajnis, ke la ombro de la krepusko rapide glitas en la malluman vesperon.

Suferinte la plej dolorajn humiligojn de kelke da fariseoj, kiuj unu post alia foriris kun profunda resento, jen nun li kun pezaj mankatenoj troviĝis en karceron sub la okuloj de krudaj kaj nesentemaj gardistoj.



La unuaj persekutoj

Laŭ la karaktero de sia impulsigemo, Saŭlo el Tarso lasis sin posedi de la penso de venĝo, ĉar ja impresis lin la braveco de Stefano antaŭ lia aŭtoritateco kaj famo. Laŭ sia opinio tiu predikanto de la Evangelio lin publike humiligis, kio necesigis samvaloran kompenson.

Kvankam li nun ankoraŭ nelonge sin trovis en Jerusalema, neniu el la tieaj rondoĵoj kaŝis sian admiron al li. La intelektuloj de la Templo rigardis lin kiel energian personon, fidindan gvidanton, majstron en la supera racionalismo. La pli malnovaj pastroj kaj leĝistoj de la Sinedrio rekonis lian akran inteligentecon kaj al li konfidis sian esperon pri la estonteco. En tiu tempo lia aktiva juneco, preskaŭ tute sin donanta al la servado al la Leĝo, por tiel diri, centrigis en si ĉiujn interesojn de la kazuistiko. Kun la psikologia penetremo, kiu lin karakterizis, la tarsi junulo sciis la rolon, kiun Jerusalema asignis al li. Tial la kontraŭparoloj de Stefano dolorigis la plej sentemajn fibrojn de lia koro. En la fundo lia resento estis trajto de nobla kaj sincera juneco, tamen la vundita vantamo, la rasa fiero, la instinkto de superregado malklarigis lian spiritan vidadon.

En la profundo de sia meditado, li nun malamamis tiun krucumitan Kriston, ĉar li abomenis Stefanon, tiam konsideratan kiel danĝeran malamikon. Li ne povis toleri ian ajn esprimon de tiu doktrino ŝajne simpla, sed kiu skuis la fundamenton de la starigitaj principoj. Li semkompatate persekutos la "Vojon" en la persono de ĉiu, al ĝi aliĝinta. Li intence mobilizos ĉiujn disponeblajn simpatiantojn, por plivastigi la necesan traserĉadon. Li certe

devis preni en kalkulon la pacigajn admonojn de ia Gamaliel kaj aliaj nemultaj spiritoj, kiuj laŭ lia opinio, lasos sin trompi de la filozofio de boneco, kiun la galileanoj estigis per la novaj skriboj, sed li estis konvinkita, ke la plej multaj fariseoj, kun iu politika funkcio, staros sur lia flanko, kuraĝigante lin en la komencita entrepreno.

En la tago sekvanta la areston de Stefano li plej lerte ekpensis kolekti la unuajn fortojn. Serĉante simpatian por la ampleksa persekutado, kiun li intencis efektivi, li vizitis la plej eminentajn personojn de la judismo, sed sin detenis peti la kunhelpon de la rekonate pacemaj aŭtoritatoj. La inspiro de la prudentaj lin ne interesis. Li bezonis temperamentojn similajn al lia, por ke la entrepreno ne fiasku.

Teksinte grandan planon kun samlandanoj, li petis aŭdiencon de la Provinca Kortumo, por ekhavi la apogon de la romanoj, komisiitaj por solvi ĉiujn politikajn aferojn de la provinco. La Prokuroro, kvankam li oficiale loĝis en Cezarea, kelkan tempon troviĝis en la urbo kaj tie sciigis pri la kuriozaj hieraŭaj okazaĵoj. Ricevinte la peton de la prestiĝohava leĝisto, li esprimis al tiu sian plenan solidarecon, laŭdante la atendatajn paŝojn. Logite de la flua parolo de la juna rabeno, li sentigis al ĉi tiu, kun la senzorgeco de la politikisto en ĉiuj tempoj kaj en ĉiaj cirkonstancoj rilate religiajn temojn, ke li konfesas en la fariseismo nekontestablajn motivojn, por batali kontraŭ la malkleraj galileanoj, kiuj tumultigas la ritmon de la fidmanifestiĝoj en la preĝejoj de la sankta urbo. Konfirmante siajn promesojn, li tuj donis al la tarsi junulo la necesan permeson por la celata faro, kompreneble esceptinte la politikajn rajtojn, kiujn la roma superega aŭtoritato devis tenadi netuŝeblaj; sed sufiĉis al la sensperta rabeno la aliĝo de la ŝtataj estroj al la prezentitaj projektoj.

Kuraĝigite pri siaj intencoj de la preskaŭ ĝenerala aprobo al lia plano, Saŭlo komencis aranĝi la unuajn esplorojn, por malkaŝi la agojn de la “Vojo” en ĉiuj ĝiaj formoj. Blindigita de la ideo de iu publika venĝo, li pentris timegigajn bildojn en la superekscitita menso.

Tuj kiam eble, li arestos ĉiujn kulpulojn. En liaj okuloj la Evangelio kaŝis minacan ribelon. Li prezentos la oratorojn de Stefano kiel signalvorton de la revolucia partio por veki la abomenon de la malpli viglantaj kamaradoj, kutimantaj cedi al la malbono, pretekstante paciencon toleremon. Li kombinos la tekstojn de la Leĝo de Moseo kaj de la Sanktaj Skriboj, por pravigi la penson, ke oni devas konduki ĝis la morto tiujn, kiuj defalis de la principoj de la raso. Li pruvos la neriproĉindecon de sia nefleksebla konduto. Li faros ĉion, por meti Simonon Petron en karceron. Laŭ lia opinio, tiu certe estas la intelekta aŭtoro de la subtila intrigo, kiu ŝpiniĝis pri la memoro de ia simpla ĉarpentisto. En la flamado de la rapidecaj ideoj li eĉ venis al la konkludo, ke neniu ricevos indulgon de liaj nenuligeblaj decidoj.

En tiu tago, kiun li elektis, por viziti alte sidantajn aŭtoritatulojn, por ilin varbi al sia afero, aliaj surprizaj faktoj pliakrigis la zorgojn, kiuj lin premis. Hoŝea Marko kaj Samuel Natan, du tre riĉaj samlandanoj el Jerusalemo, aŭdinte la personan defendon de Stefano, en la Sinedrio, impresitaj de la elokventeco kaj ĝusteco de la parolo de la predikanto donis al ĉiu el siaj infanoj la koncernantan heredaĵon kaj donacis al la “Vojo” la restaĵon el siaj havaĵoj. Por tio ili iris al Simon Petro, al kiu kisis la manojn harditajn en la laboro, post kiam ili aŭdis lian parolon pri Jesuo Kristo.

La sciigo pri ĉi tiu fakto eksplodis en la fariseaj rondoj sub la formo de efektiva skandalo.

Saŭlo el Tarso eksciis tiun okazaĵon en la morgaŭa tago kaj taksis la ĝeneralan afekcion, kiun naskis la sintenado de Stefano. La defalo de tiuj du samreligianoj, kiuj transiris al la galileanoj, kaŭzis al li profundan indignon. Oni plie disfamigis, ke, donacante al la “Vojo” ĉiujn siajn havaĵojn, Hoŝea kaj Samuel kun larmoj deklaris, ke ili akceptas la Kriston kiel la promesitan Mesion. La komentarioj de liaj amikoj pri tio instigis lin al la plej forta revenĝo. Elektita de la kapricaj popoloj fluoj kiel la plej juna defendanto de la Leĝo, li ĉiam pli sentis sin devanta montri sian superecon en tiu posteno, kiun li konsideris sankta. Ĝuste tial, defendante sian

mandaton, li formetos de si ĉiajn konsiderojn, kiuj povus ŝanceli ties rigorecon, kiun li rigardis kiel dian devon.

Konsiderante la seriozecon de la lasta okazaĵo, kiu minacis la stabilecon de la judismo en la sino mem de ĝiaj plej eminentaj personoj, li denove iris al la superegaj aŭtoritatoj de la Sinedrio, por akceli la intencatajn punojn.

Observante la rajtigon, konsentitan de la plej altaj politikaj potenculoj de la provinco, Kajafas proponis, ke oni nomu la fervoran leĝiston el Tarso estro kaj plenumanto de ĉiuj disponoj rilataj kaj necesaj al la gardo kaj defendo de la Leĝo. Koncernis lin do ellabori ĉiajn rimedojn, kiujn li opinios konvenaj kaj utilaj; la lastaj decidoj, precipe tiuj pli gravaj, estas rezervitaj al la Sinedrio.

Kontenta de la rezultato de la kunveno, kiun li improvizis, la tarsa junulo diris, antaŭ ol adiaŭi siajn amikojn:

– Ankoraŭ hodiaŭ mi rekvizicios la armean trupon, kiu devas agadi en la ĉirkaŭo de la urbo. Morgaŭ mi ordonos aresti Samuelon kaj Hoŝean, ĝis ili decidiĝos saĝiĝi, kaj en la fino de la semajno mi faros disponojn, por aresti la fiularon de la “Vojo”.

– Ĉu vi do ne timas la sorĉaĵojn? – ironie demandis Aleksandro.

– Tute neniel – li serioze kaj decideme respondis. – Aŭdinte, ke la militistoj mem fariĝas superstiĉaj sub la influo de la ekstravagancaj ideoj de tiuj feĉuloj, mi mem estros la ekspedicion, ĉar mi intencas enkarcerigi tiun Simonon Petron.

– Simonon Petron? – Kun miro demandis unu el la ĉeestantoj.

– Kial do ne?

– Ĉu vi scias, kial Gamaliel forestis de nia hodiaŭa kunveno? – demandis tiu.

– Ne.

– Tial, ke, invitate de tiu sama Simon, li iris ĉirkaŭrigardi la instalaĵojn kaj la farojn de la “Vojo”. Ĉu vi ne trovas tion treege kurioza? Mi iamaniere havas la impreson, kvazaŭ la senfama estro de la galileanoj, mal-

aprobante la konduton de Stefano antaŭ la Sinedrio, deziras rebonigi la situacion, penante alproksimiĝi al nia administra aŭtoritatulo. Kiu scias, eble ĉio ĉi estas iel utila. Almenaŭ eble ni paŝas al la necesa reharmoniiĝo.

Saŭlo elmontris pli ol surpriziĝon, ĝuste miregon.

– Sed, kion signifas ĉio ĉi? Ĉu Gamaliel vizitas la “Vojon”? Mi ja dubas lian mensan sanecon.

– Ni tamen scias – intermetis Aleksandro –, ke nia instruanto ĉiam plej ĝuste kondukis siajn agojn, kaj pensojn. Estus juste, ke li ne akceptus tiun inviton, pro konsidero rilate nin, tamen, se li tiel ne agis, ni ne riproĉu tiun decidon, kiun li certe prenis kun la nobleco de celoj, kiu lin ĉiam inspiris.

– Konsentite – diris Saŭlo iom ĝenata –, tamen, malgraŭ mia amikeco kaj danko al li, eĉ Gamaliel ne povas ŝanĝi mian decidon. Povas esti, ke Simon Petro sin pravigos kaj saviĝos el la provoj, al kiuj li estos submetita, sed, kiel ajn ĝi estas, li devos iri en karceron por la necesaj demandoj. Mi suspektis lian ŝajnan humilecon. Por kia celo li kuraĝis forlasi siajn retojn, por pozii ian komplezeman bonfaranton de la malriĉuloj de Jerusalemo? Mi en ĉio ĉi vidas planojn de ribelo, kiu probable ne estas tre malproksime. La plej malaltrangaj kaj malkleraj iras en la fronto de la danĝeroj; la estroj de la detruado sin montras poste.

La konversacio vigle daŭris ankoraŭ kelkan tempon pri la ĝenerala atendo de la alproksimiĝantaj okazaĵoj, ĝis Saŭlo adiaŭis siajn amikojn kaj revenis hejmen, por pretigi la lastajn detalojn de sia plano.

La aresto de Stefano faris fortan efikon en la modesta eklezio de la “Vojo”, naskante pravan timon ĉe la galileaj apostoloj. Petro ricevis tiun sciigon kun profunda malĝojo. En la junulo el Korinto li trovis helpanton sindonan kaj fraton. Krom tio pro la nobleco de siaj koraj ecoj Stefano fariĝis ia centra figuro, kiu altiris la atenton de ĉiuj. Al lia inspirata menso alsvarmis multenombraj problemoj, por kies solvo la ekŝfĥisto el Kapernaŭ jam ne forhavis lian altvaloran kunhelpon. Amata de afliktitoj kaj suferantoj, li ĉiam havis la rekuraĝigan parolon, kiu levadis la plej senesperan koron.

Petro kaj Johano maltrankviliĝis pli pro amo, ol pro ĉiaj aliaj konsideroj, sed Jakobo, filo de Alfeo, ne sukcesis kaŝi sian ĉagrenon pro la brava konduto de sia samkredano, kiu ne hezitis alfronti la fariseajn povojn, la aŭtoritatecon de la mastroj de la situacio. Laŭ lia opinio Stefano eraris rilate al admonoj; tiu devus esti pli modera, meritis do esti arestita pro la tro varmaj argumentoj en la defendo de si mem. La diskuto degeneris en fermentaĵon. Petro igis lin vidi la oportunecon de tiu okazaĵo, por ke elmontriĝu la libereco de la Evangelio, kaj plipravigis siajn argumentojn per la logikeco de la faktoj. La decido de Hoŝea kaj Samuel, fordoni sin al la Kristo, estis citita por motivi la spiritan sukceson de la “Vojo”. La tuta urbo komentariis tiujn okazaĵojn; multaj alproksimiĝis al la eklezio kun sincera deziro pli bone koni la Kriston, kaj tio certe signifis la venkon de la afero. Jakobo tamen ne lasis sin venki eĉ de la plej fortaj argumentoj. La malkonkordo kreskis, sed Simon kaj la filo de Zebedeo starigis super ĉio la interesojn de la Mesaĝo de Jesuo. La Majstro montriĝis kiel sendito por ĉiuj senkuraĝaj kaj malsanaj homoj, kaj tiuj jam konis la modestan eklezion de Jerusalemo, ricevis lumon el la parolo de vivo kaj vero. La malsanaj, la elreviĝintaj pri la sorto, la senprotektaj de la mondo, la senĝojaj iris al li por la konsolanta instruado. Estis bele vidi, kiel ili ĝojis en la doloro, kiam oni parolis al ili pri la eterna lumo de la reviviĝo. Tremantaj maljunuloj larĝe malfermadis la okulojn, kvazaŭ vidante novajn horizontojn de neantaŭviditaj esperoj. Homoj lacaj de la surtera batalado ridetis feliĉaj, kiam, aŭdante la Bonan-Novaĵon, ili komprenis, ke la maldolĉa ekzistado ne estas ĉio.

Petro observadis la suferantojn, kiujn Jesuo iam tiel amis, kaj ricevis novajn fortojn.

Eksciinte pri la nobla konduto de Gamaliel ĉe la akuzoj de la leĝisto el Tarso, kaj konvinkite, ke nur ĝi evitis la tujan ŝtonumadon de Stefano, li ekpensis inviti tiun viziti la senluksajn instalaĵojn de la eklezio de la “Vojo”. Konigitate al la kamaradoj, ĉi tiu ideo estis unu-

anime aprobata. Johano estis la sendito, elektita por ĉi tiu nova tasko.

Gamaliel ne nur ĝentile akceptis la senditon, sed ankaŭ elmontris grandan interesiĝon pri tiu invito, kiun li akceptis kun la nobleco, ornamanta lian respektindan maljunecon.

Post la necesaj interkonsentoj la klera rabeno eniris en la malriĉan domon de la galileanoj, kiuj lin plej ĝoje akceptis. Simon Petro, kun profunda respekto, klarigis al li la celojn de la institucio, sciigis lin pri la atingitaj faroj kaj parolis pri la komforto al tiuj, malzorgate vivantaj. Li kore donacis al la vizitanto pergamenan kopion de ĉiuj notoj de Mateo pri la persono de la Kristo kaj ties gloraj instruoj. Gamaliel ĝentile dankis la ekfisiŝiston kaj traktis lin ankaŭ respektive kaj estime. Komprenigante, ke li deziras submeti al la ŝatinda juĝado de Gamaliel ĉiujn programojn de tiu humila eklezio, Simon kondukis la maljunan leĝiston al ĉiuj ĉambroj de la domo. Kiam ili venis al la vasta salono, kie dense troviĝis la plej diversaj malsanuloj, la granda raveno de Jerusalemo ne povis kaŝi sian plej profundan impreson, ĝis larmoj kortuŝite de la sceno, kiu montriĝis antaŭ liaj miregantaj okuloj. En komfortaj litoj kuŝis maljunuloj kun haroj blankigitaj de la vintroj de la vivo kaj palegaj infanoj, kies dankoplenaj rigardoj sekvis la figuron de Petro, kvazaŭ ili estus antaŭ ia patro. Kiam li ankoraŭ ne faris dek paŝojn ĉirkaŭ la senluksaj kaj puraj mebloj, jen li haltis antaŭ mizeraspekta maljunulo. La kompatinda, paralizita de la malsano, kiu lin frapis, laŭŝajne lin ankaŭ rekonis, kaj tuj komenciĝis dialogo:

– Samonio, vi ĉi tie? – demandis Gamaliel kun miro.
– Ĉu do estas eble, ke vi forlasis Cezarean?

– Ha, ĝi estas vi, sinjoro! – respondis la demandito kun larmo en la angulo de la okuloj. – Bone estas, ke unu el miaj samlandanoj kaj amikoj ekvidis mian grandan mizecon.

La ploro sufokis lian voĉon, malebligante al li daŭrigi.

– Sed viaj infanoj? Kaj viaj parencoj? En kies manoj troviĝas viaj bienoj en Samario? – demandis per-

pleksa la maljuna instruanto – Ne ploru, Dio havas ĉiam multe, por al ni doni.

Post longa paŭzo, dum kiu Samonio ŝajnis kunordigi la ideojn, por klarigi sian situacion, li povis forviŝi la larmojn kaj paroli plu:

– Ha, sinjoro, kiel Ijob, tiel mi vidis mian korpon putri meze en la komfortaĵoj de mia domo; la Eternulo, laŭ sia saĝo, destinis por mi longajn elprovojn. Deklarita leprulo, mi vane petis helpon de la infanoj, kiujn la Kreinto donis al mia juneco: ili ĉiuj min forlasis. Miaj familianoj rapidis foriri, lasante min tute sola. La amikoj, kiuj festenadis kun mi en Cezarea, ne rimarkate de mi, sin forpafis. Mi restis sola, senhelpa. Unu tagon, por la plej ekstrema turmento de mia malfeliĉo, la justicaj ekzekuciistoj venis al mi, por sciigi min pri tiu kruela verdikto: interkonsentinte, laŭ la konsilo de la maljusteco, miaj infanoj senigis min je ĉiuj havaĵoj, proprigis al si miajn posedaĵojn kaj monon, kiuj estis la espero de honesta maljuneco. Fine kaj por plenigi mian suferadon, ili kondukis min en la lokon de la malpuruloj, kie ili forlasis min kvazaŭ krimulon, kondamniton al morto. Mi sentis tian grandan forlason kaj malsaton, mi travivis tiajn bezonojn, eble pro mia vivo, pasigita en laborado kaj komforto, ke mi forkuris el tiu loko kaj ekiris longan vojon, esperante trovi en Jerusalemo la iamajn altvalorajn amikrilatojn.

Aŭdante ĉi tiun doloran rakonton, la maljuna majstro havis okulojn malsekajn de larmoj. Li konis Samonion en la plej feliĉaj tagoj de lia vivo. Pasloĝante en Cezarea, li estis honore akceptita en ties loĝejo, kaj tial li miris tiun doloran mizerecon.

Post malgranda paŭzo, dum kiu la malsanulo penis forviŝi la ŝviton kaj la larmojn, Samonio per malrapida voĉo daŭrigis:

– Mi ekfaris tiun vojaĝon, sed ĉio konspiris kontraŭ mi. Baldaŭ la ulcervunditaj piedoj ne povis paŝi plu. Mi treniĝadis, kiel mi nur povis, lacega kaj soifanta, kaj jen modesta ĉaristo, kortuŝita, min prenis kaj kondukis al ĉi tiu domo, kie la doloro trovas fratan konsolon.

Gamaliel ne sciis, kiel elmontri sian surpriziĝon, tia estis la emocio, kiu skuis lian internon. Ankaŭ Petro estis kortuŝita; kutiminte fari bonon, neniam pensante pri la antecedentoj de la helpato, li vidis en ĉi tiu afero konsolan elmontron de la ama povo de la Kristo.

La granda rabeno miregis ĉion, kion li tie vidis kaj aŭdis. Kun la sincereco al li propra, li ne povis kaŝi sian dankoplenan amikecon al la kompatinda malsanulo, sed sen rimedoj por lin preni el tiu malriĉa gastejo, li devis prezenti sian dankon al Simon Petro kaj aliaj kamaradoj de la eksfĥisito el Kapernaum. Nur nun li konstatis, ke la judismo neniam ekpensis pri tiaj rifuĝejoj, kie regas amo. Trovante tie sian amikon lepra, li deziris sincere tiun helpi, sed kiel? Je la unua fojo li ekpensis pri la dolora okazo sendi iun amaton al la loko de la malpuruloj. Li, kiu konsilis tiun rimedon al tiom da homoj, nun tie troviĝis kaj konsideris la situacion de kara amiko. Ĉi tiu fakto lin profunde afekciis. Penante ne fari filozofi-ajn rezonojn, por ne fali en tro rapidajn konkludojn, li dolĉe diris:

– Jes, vi havas motivaon, por danki viajn bonfarant-ojn por ilia klopodado.

– Kaj ankaŭ la Kriston por lia kompatemeco – akcente aldonis la malsanulo kun larmoj. – Mi nun kred-as, ke la grandanima profeto el Nazaret, per la atesto de amo, kiun li liveris al ni, estas la promesita Mesio.

La granda leĝisto komprenis la sukceson de la nova doktrino. Tiu Jesuo nekonata, ignorata de la plej kultur-ita societo en Jerusalem, venkis en la koro de la mal-feliĉuloj per la dono de abnegacia amo al tiuj, malpli favoritaj de la sorto. Li samtempe komprenis, ke li dev-as esti diskreta en tiu senfama medio pro sia prirespond-eco antaŭ la socio. Bezonante daŭrigi la konversacion, por montri sian altruismon kaj piecon, li ridetante diris:

– Mi kredas, ke Jesuo estis ja modelo de abnegacio por ideoj, kiujn mi ĝis hodiaŭ ne povis esplori aŭ kom-preni, sed de tio ĝis li estus rigardata kiel la Mesio mem...

Ĉi tiu interrompita frazo komprenigis la skrupulon de lia delikata koro, ŝanceliĝanta inter la malnova leĝo kaj la novaj revelacion de la Evangelio. Simon Petro ĝin

tiel komprenis kaj vane serĉis ian rimedon, por turni la konversacion al alia direkto, sed Samonio mem, kiel zorgato de la Majstro, ekhelpis al la Apostolo, respondante al Gamaliel per saĝaj kaj justaj rimarkoj:

– Se mi estus sana, en plena konsento kun mia familio kaj en la ĝuado de la posedaĵoj, kiujn mi havigis al mi per penado kaj laboro, ankaŭ mi eble dubus tiun konsolan veraĵon, sed mi estas senfortiĝinta, forgesita de ĉiuj, kaj mi scias, kiu etendis al mi amikan manon. Kiel izraelidoj, amantoj de la Leĝo de Moseo, ni ĝis hodiaŭ atendas ian Savonton en la mortema persono de iu monda princo, sed tia kredo nelonge daŭros. Iluziaj antaŭjuĝoj estas tiuj, kiuj igas nin indukti ian superregadon de pereemaj fortoj. La malsaneco estas amplena kaj saĝa konsilanto. Por kio servas al vi iu profeto, kiu savus la mondon, sed poste nuliĝus meze en la sennomaj neniaĵoj de putrinta korpo? Ĉu ne estas skribite, ke ĉia maljusteco malaperos? ^(*) Kaj kia surtera potenca estro regus sen la apogo de la armiloj? La lito de doloro estas kampo de superbelaj, lumaj instruoj; en ĝi la konsumita animo iom post iom rekonas en la korpo la rolon de ia tuniko. Ĉio do, rilatanta al la vesto, ĉiam pli malgraviĝas, sed daŭras plu nia spirita realeco. La antikvuloj asertis, ke ni estas dioj ^(**); en mia nuna situacio mi havas la perfektan impreson, kvazaŭ ni estus dioj, ĵetitaj en polvan kirloventon. Malgraŭ la pusaj ulceroj, kiuj pelis min for de miaj plej karaj korligiĝoj, mi pensas, mi volas, mi amas. En la malluma ĉelo de la sufero mi trovis la Sinjoron Jesuon, por lin pli bone kompreni. Hodiaŭ mi kredas, ke lia potenco mastros la naciojn, ĉar ĝi estas la forto de amo, venkanta la morton mem.

La voĉo de tiu homo, makulita de purpuraj vundoj, ŝajnis, pro sia grava tono, la klariono de la vero, eliĝanta el amaso da polvo. Petro kontente vidis la moralan progreson de tiu anonima almozulo, kaj tiel en sia koro taksis la revigligan forton de la Evangelio. Siaflanke Gamaliel perpleksiĝis ĉe la profunda signifo de tiuj espri-

(*) Jesaja, 32:1–18. – *La Trad.*

(**) Palmaro, 82:6. – *La Trad.*

moj. La predikado de la Kristo el la lipoj de iu senhelpa malsanulo portis stampon de mistera kaj stranga beleco. Samonio parolis kun la tono de iu, kiu rekte spertis realan renkontiĝon kun la nazareta profeto. Penante eviti ĉian eblon de religia debato, la nobla raveno ridetis kaj diris:

– Mi konfesas, ke vi tre saĝe parolas. Se estas nekontesteble, ke mi havas aĝon, en kiu ne estus utile ŝanĝi la principojn, mi tamen ne povas paroli kontraŭ viaj supozoj, ĉar mi fartas bone, ĝuas la amon de miaj karuloj kaj havas senzorgan vivon. Mia kapablo de juĝado devas do agi laŭ alia direkto.

– Jes, vi pravas – rediris Samonio inspirita –, en la nuna momento vi ankoraŭ ne bezonas ian savanton. Jen kial la Kristo diris, ke li venis al la malsanuloj (*) kaj al la afliktitoj (**).

Gamaliel komprenis la atingon de ĉi tiuj vortoj, kiuj donis materialon por meditado dum tuta vivo. Li sentis larmojn en la okuloj. La rimarko de Samonio penetris profunde en lian senteman koron de justulo, sed, rekonante, ke li devas kondukti prudente, por ne konfuzi la sentojn de la popolo, en vido de sia oficiala funkcio, li dolĉe ridetis al sia kunparolanto, faciltuŝe frapis ties ŝultron kaj per tono de frata sincereco rediris akcente:

– Vi eble estas prava: mi studos vian Kriston.

Kaj nun memoriĝante pri la malmulta tempo, kiun ili disponis, li rekomendis al Simon sian amikon, kiun li adiaŭis kun brakumo, por akompani la Apostolon el Kapernaum al la lastaj ĉambroj.

Antaŭ ol foriri, la klera rabeno gratulis la sekvantojn de Jesuo pro ilia verko en la urbo kaj, komprenante la delikatecon de sia misio en iafoje tiel malamika medio, konsilis al Petro nepre plenumi, en la eklezio de la “Vojo”, ĉiujn formalajojn de la judismo. Laŭ lia opinio, estus juste zorgi, ke estu cirkumciditaj ĉiuj, kiuj petos lin pri rifuĝo; eviti malpurajn viandojn; ne forgesi la

(*) Mateo, 9:12. – *La Trad.*

(**) Mateo, 11:28. – *La Trad.*

Templon kaj ties principojn. Gamaliel sciis, ke la galileanoj ne evitos al si persekutojn, des pli, ke tio estis institucio, iniciatita de homo, kondamnita de la Sinedrio al morto. Per ĉi tiuj konsiloj li celis rebati la brutalajn, kiuj pli aŭ malpli frue ja fariĝos.

Petro, Johano kaj Jakobo kortuŝite dankis lin por lia ama admono, kaj la malljuna leĝisto revenis hejmen forte impresita de la lecionoj en tiu tago kaj kunportante la notoĵn de Mateo, kiujn li tuj eklegis.

Post du tagoj la persekutoj, estrataj de Saŭlo el Taro, komencis skui Jerusalemon en ĉiuj sektoroj de ĝiaj religiaj laboroj.

Hoŝea Marko kaj Samuel Natan estis sen kulpatestoj arestitaj, por esti submetitaj al rigora enketo. La kunhelpantoj en tiu movado faris longajn listojn de la plej eminentaj izraelidoj, kiuj vizitadis la kunvenojn de la eklezio de la “Vojo”. La tarsi junulo ordonis, ke oni starigu ĝeneralan enketon, tamen, dezirante parade elmontri kuraĝon antaŭ siaj malamikoj, li opiniis, ke li devas komenci la pli gravajn arestojn, post la enkarcerigo de Hoŝea kaj Samuel, en la nesto mem de la senfamaj galileanoj, kiuj aŭdacis alfronti lian aŭtoritatecon.

En la mateno de tre hela tago la estonta rebeno, kune kun kelke da kamaradoj kaj soldatoj, frapis je la pordo de la modesta domo, parade anoncanta la celon de sia insida vizito. Simon Petro mem akceptis lin kun tute serenaj okuloj. Videbla teruro leviĝis ĉe la pli timemaj, ĉar du junuloj, kiuj kompaniis al la Apostolo, decidis kuri en la internon de la domo kaj diskonigi tiun okazaĵon.

– Ĉu vi estas Simon Petro, iama fiŝkaptisto en Kapernaŭm? – iom arogante demandis Saŭlo.

– Mi mem – li firme respondis.

– Mi arestas vin! – diris la estro de la ekspedicio per triumfa tono.

Kaj li ordonis al du el siaj kamaradoj elpaŝi kaj tuj mankateni la Apostolon. Petro faris nenian kontraŭstaron. Impresite de la pacema temperamento, kiun la sekvantoj de la Nazaretano ĉiam montris, Saŭlo malŝate rimarkis:

– La Majstro de la “Vojo” certe estis alta modelo de inercio kaj malkuraĝo. Mi ankoraŭ trovis nenian montron de digno ĉe liaj disĉiploj, kies reagokapableco ŝajnas mortinta.

Ricevinte en la vizaĝon tian pikantan insulton, la ekfiŝisto serene rediris:

– Vi eraras, ilin tiel juĝante. La disĉiplo de la Evangelio estas malamiko nur de malbono, kaj en sia agado li starigas amon super ĉiaj principoj. Cetere ni konsideras, ke ĉia jugo, kun Jesuo, estas facila.

La tarsa junulo, havanta tian altan povon, ne kaŝis la ĝenon, kiun ĉi tiu respondo kaŭzis al li kaj, montrante al la sekvanto de Jesuo, diris al unu el la viroj de la taĉmento:

– Jona, zorgu pri li.

Kaj ironie akcentante siajn vortojn, li sin turnis al la ceteraj kun monro de malŝato al la mankatena Apostolo, kiu lin serene, kvankam surprizite, rigardadis:

– Ni ne diskutu kun ĉi tiu viro. Tiuj homoj de la “Vojo” ĉiam dronas en absurdaj rezonoj. Estas necese ne perdi tempon atentante la blindan malklerecon. Ni iru en la internon, ni arestu la ĉefojn. La klananoj de la ĉarpentisto estos nepre persekutataj ĝis ilia ekstermiĝo.

Decideme li ekpaŝis antaŭe kaj kuraĝe penetris en la domon, serĉante la plej internajn ĉambrojn. Ĉe ĉiu pordo li renkontis mizerulojn, kiuj lin mire kaj maldolĉe ekrigardis. Tiu vivanta bildo de tiom da engastigita mizero lin miregigis, sed li klopodis, por ne fleksi la senindulgan harditecon, ĉar li volis plendetale efektiviĝi siajn projektojn. Apud la plej vasta malsanulejo li renkontis la filon de Zebedeo, kiu aŭdis lian arestordonon, ne ŝanĝante sian mienan serenecon.

Sentante la maldelikatajn manojn de la soldato, kiu lin mankatenis, Johano levis siajn okulojn al la Ĉielo kaj nur murmuris:

– Mi rekomendas min al la Kristo.

La taĉmentestro ekrigardis lin kun profunda malŝato kaj fiere diris al siaj kamaradoj:

– Restas du el la plej suspektindaj: ni ilin serĉu.

Li parolis pri Filipo kaj Jakobo, kiel rektaj disĉiploj de la nazareta Mesio.

Post kelke da paŝoj ili facile trovis la unuan. Filipo lasis sin senproteste mankateni. Liaj filinoj lin afliktitaj kaj kun larmoj ĉirkaŭis.

– Kuraĝon, infanoj! – diris li sentime – Ĉu ni estas superaj ol Jesuo, kiu estis persekutata kaj krucumita de la homoj?

– Ĉu vi aŭdas, Klemento? – kolere demandis Saŭlo unu el siaj plej distingigaj amikoj. – Oni aŭdas nenion alian, ol parolojn pri la stranga Nazaretano! La unua parolis pri la jugo de la Kristo, la dua rekomendis sin al la Kristo, ĉi tiu tria parolas pri la supereco de la Kristo... Kien ni venos?

Per akraj vortoj elverŝinte sian koleron, li finis per konstanta rediraĵo:

– Ni nepre iros ĝis la fino.

Post la kaptado de tiuj tri adптоj restis la filo de Alfeo. Iu ekpensis serĉi lin en la barako, kie li loĝis; efektive ili tie lin trovis genuante, havante antaŭ la okuloj rulon da skribaĵoj, kie troviĝis la Leĝo de Moseo. Oni vidis la marmoran palecon de lia vizaĝo, kiam Saŭlo alproksimiĝis kaj krude ekkriis:

– Kio tio estas! Ĉu ĉi tie iu studas la Leĝon?

La frato de Levi turnis supren la okulojn plenajn de sincera timo kaj humile klarigis:

– Sinjoro, mi neniam forgesis la Leĝon de niaj prapatroj. Miaj prauloj instruis min ricevi surgenu la lumojn de la sankta profeto.

La konduto de Jakobo ne estis hipokrita. Ĉiam aŭdinte, ke la sanktajn librojn de la liberiginto de Izrael stampas dia vorto, li tiujn plej profunde respektis. Atendante sian enkarcerigon, li pleniĝis de timo ĉe la minacanta danĝero. Li ne povis pli bone kompreni, kiel liaj kunuloj, la dian kaŝitan sencon de la lecionoj de la Evangelio. Lia ofero inokulis al li nekaŝeblan timon. Efektive, li konsideris, nur parte kompreninte la Kriston, kiu restos, por direkti la komencitajn laborojn? La Majstro mortis sur la kruco, kaj en ĉi tiu momento la jerusalemaj Apostoloj estis jam arestitaj. Li do devis defendi sin per

la disponeblaj rimedoj, kiel li nur povos. Li ekpensis helpi al si per la supernaturaj virtoj de la Leĝo de Moseo, konforme al la malnovaj kredoj. Sur genuoj li atendis la alproksimiĝantajn turmentistojn.

Ĉe tiu neatendita sintenado de Jakobo, Saŭlo el Tarso konfuziĝis. Nur tiuj homoj, profunde enradikiĝintaj en la judismo, genue legadis la instruojn de Moseo. Tute konsciencie li ne povos arestigi tiun homon. La argumento, kiu pravigis lian taskon ĉe la politikaj kaj religiaj aŭtoritatoj de Jerusalemo, estis la batalado kontraŭ la malamikoj de la tradicioj.

– Sed, ĉu vi ne estis amiko de la ĉarpentisto?

Kun mirinda spiritoĉeesto la demandito respondis:

– Mi neniam aŭdis, ke la Leĝo malhelpus iun havi amikojn.

Saŭlo konfuziĝis, sed daŭrigis:

– Sed kion do vi elektas: ĉu la Leĝon aŭ la Evangelion? Kiun el ambaŭ vi akceptas preference antaŭ la dua?

– La Leĝo estas la unua dia revelacio – lerte diris Jakobo.

Ĉe tiu ĉi respondo, kiu lin iom konsternis, la tarsi junulo momente konsideris kaj diris, turnante sin al la ĉeestantoj:

– Bone do. Ĉi tiu viro estos plu en paco.

Tre kontenta de la rezultato de sia iniciativo, la filo de Alfeo nun kredis, ke la Leĝo de Moseo estas tuŝita de vivaj kaj daŭraj gracoj. En liaj okuloj la talismano, kiu konservis lin libera, estis la kodo de la judismo. De tiu tago la frato de Levi por ĉiam plifirmigos siajn superstiĉajn inklinojn. Tie havis sian originon de fanatikeco, kiun la raportintoj pri la historio de la Kristanismo vidis en lia enigma persono.

Elirinte el la ĉambro de Jakobo, Saŭlo jam intencis foriri, sed jen, revenante al la porditejo, por ordoni, ke la arestitoj estu forkondukitaj, li ekvidis tiun scenon, kiu lin plej profunde impresos. Ĉiuj malsanuloj, kiuj povis sin treni, ĉiuj gastoj, kapablantaj sin movi, ĉirkaŭis Petron, kortuŝite plorante. Kelkaj infanoj nomis lin “patro”, tremantaj maljunuloj kisis al li la manojn...

– Kiu nun kompatos nin? – demandis maljunulino kun larmoj.

– “Patro”, kien oni vin forkondukos? – ame diris orfo, brakumante la arestiton.

– Mi iras al la monto, infano – respondis la Apostolo.

– Kaj se oni mortigos vin? – rediris la kanabeto kun granda demando en la blujaj okuloj.

– Mi renkontiĝos kun la Majstro kaj revenos kun li – bonkore klarigis Petro.

En ĉi tiu momento ekaperis Saŭlo, kiu revenis. Rigardante la amason da kripluloj, blinduloj, lepruloj kaj infanoj, kiuj plenŝtopis la salonon, li kolere ekkriis:

– For! liberigu vojon!

Kelkaj sin retiris timigite, vidante la alproksimiĝantajn soldatojn, dum la pli obstinaj ne eliris for de sia loko. Leprulo, kiu apenaŭ staris, elpaŝis: la maljuna Samonio, rememorante tiun tempon, kiam li povis ordoni kaj esti obeata, kuraĝe alproksimiĝis al Saŭlo.

– Ni devas ekscii, kien iros ĉi tiun arestitoj – li diris per serioza tono.

– For! – ekkriis la tarsa junulo kun naŭza gesto.

– Ĉu eble leĝisto donu kontentigon al malpura maljunulaĉo?

La armitaj gvardianoj provis antaŭeniĝi, por puni la tro bravan, sed la lepro defendis Samonion kontraŭ iliaj atakoj. Profitante el la situacio, la iama bienulo el Cezarea per firma tono rediris:

– La leĝisto devas doni kontentigon nur al Dio, kiam li akurate plenumas siajn devojn, sed en ĉi tiu domo parolas la kodoj de humaneco. Laŭ vi mi estas malpurulo, sed laŭ Simon Petro mi estas frato. Vi arestas la bonajn, sed liberigas la malbonajn! Kia justeco la via! Ĉu vi kredas nur al la Eternulo Cebaot? Vi nepre devas scii, ke, se la Eternulo estas la plej alta faranto de la ordo, la Evangelio instruas nin klopodi, por havi en Lia Providenco la amon de Patro.

Aŭdante tiun dignan voĉon, fluantan el mizero kaj sufero, kvazaŭ ĝi estus ia alvoko de malespero, Saŭlo

silentis mirplena. Post longa paŭzo la malriĉulo daŭrigis emfaze:

– Kie estas viaj domoj por rifuĝo de la batitaj de la sorto? Kiam vi ekpensis pri ia azilo por la pli malfeliĉaj? Vi eraras, supozante inercion en nia konduto. La fariseoj pelis Jesuon sur la Kalvarion de la krucumo kaj sekve senigis la malfeliĉulojn je lia potenca ĉeesto. Ĉar li faris bonon, Stefano estis enkarcerigita. Nun la Sinedrio arestas la Apostolojn de la “Vojo”, repagante ilian bonkorecon per la senlumeco de karcerito, sed vi ĉiuj eraras. Ni, la mizeruloj de Jerusalemo, ja batalados kontraŭ vi. De Simon Petro ni luktos por la posedo eĉ de la ombro mem. Se vi rifuzos kontentigi niajn petojn, ne forgesu, ke ni estas lepruloj. Ni venenos viajn akvuojn. Vi pagos por via maliceco per la sano kaj la vivo.

Nun li ne povis daŭrigi. Ĉe la korprema atendo de ĉiuj Saŭlo krude ekkriis:

– Silentu, fiulo! Kiel mi povis aŭdi vin ĝis nun? Eĉ ne unu vorteton plu!

Kaj montrante lin al unu el la soldatoj, li malŝate siblis:

– Sinezio, kalkulu al li dek bastonbatojn. Estas nepre necese puni lian impertinentan kaj vipuran langon.

Sur tiu sama loko, antaŭ ĉiuj kamaradoj, kiuj timigite sin retiris, Samonio sen ia plendo ricevis la punon. Al Petro kaj Johano staris larmoj en la okuloj. La ceteraj malsanuloj kuntiriĝis teruregitaĵ.

Post tio granda silento regis la maltrankvilajn kaj dolorantajn korojn. La leĝisto el Tarso rompita la atendon, ordonante, ke ĉiuj foriru direkte al la karcerito.

Du palaj infanoj tiam alproksimiĝis al la eksfiŝisto el Kapernaŭ kaj larme demandis:

– “Patro”, ĉe kiu ni staros?

Petro sin turnis konsternita kaj dolĉe respondis:

– La filinoj de Filipo staros ĉe vi... Se Jesuo permesos, miaj infanoj, mi ne longe forestos.

Saŭlo mem en la profundo de sia koro estis tuŝita, sed li ne deziris perfidi sin, lasante sin venki de la emocio, kiun tiu sceno naskis en li.

Petro komprenis, ke la silentaj larmoj de ĉiuj mal-
 eminentaj zorgatoj de la “Vojo” esprimas sindonan amon
 en tiu momento de korpremanta adiaŭo.

Post ĉi tiu entrepreno la tarsa junulo disvolvis siajn
 fortojn en la unua persekutado, kiun spertis homoj kaj
 kolektivoj de la naskiĝanta Kristanismo. Pli multe, ol
 kiom oni povis supozi, Jerusalemo svarmis per homoj, kiuj
 interesiĝis pri la ideoj de la nazareta Mesio. Saŭlo uzis
 ĉi tiun cirkonstancon, por ankoraŭ unu fojon sentigi tian
 ideologian danĝeron, kia estis la Evangelio. Multenombraj
 homoj estis arestitaj. El la urbo komenciĝis amasa
 elirado. La konfesantoj de la “Vojo”, disponantaj mon-
 rimedojn, preferis komenci novan vivon en Idumeo aŭ
 en Arabujo, en Kilikio aŭ en Sirio. Kiuj povis, tiuj sin
 tiris el la rigoro de la perfortaj enketoj, starigitaj kun
 tondrado de publika skandalo. La plej eminentaj per-
 sonoj estis enkarcerigataj, sen permeso komukikiĝi kun
 la ekstero, sed la simpluloj kaj senfamuloj, la pleban-
 ojn, tiuj suferis grandan molestadon en la ĉambroj de la
 tribunalo, kie oni faris la eldemandadon. La gardistoj,
 dungitaj de Saŭlo por tiu abomeninda tasko, translimis
 la perfortaĵojn.

– Ĉu vi apartenas al la “Vojo” de la Kristo Jesuo?
 – kun ironia rideto demandis unu el ili malfeliĉan vir-
 inon.

– Mi... mi... – balbutis la kompatinda, kompren-
 ante la delikatecon de sia situacio.

– Rapidu, respondu rapide! – malrespekte rediris
 la policisto.

La mizerulino tremente paliĝis, meditante pri la krud-
 aj pupnoj, kiujn ŝi ricevus, kaj plena de timo diris:

– Mi... ne...

– Sed por kio vi iris en la ribelajn kunvenojn?

– Por preni medikamenton por malsana fileto.

Ĉe tia nea respondo la delegito de la Sinedrio ŝajne
 sereniĝis, sed tuj ekkriis al unu el siaj helpantoj:

– Tre bone! La eldemanditino povas foriri pace, sed
 antaŭ ol ŝi foriros, la regularo ordonas ke oni regalu
 ŝin per kelke da glavobatoj.

Rezisti estis senutile. En tia stranga tribunalo, tra multaj sinsekvaj tagoj, fariĝis ĉiaspecaj punoj. De la respondoj de la eldemandito dependis enkarcerigo, skurĝado, glavobatado, bastonado, turmentoj kaj mokfajfoj.

Saŭlo fariĝis la centra motoro de tiu terura maŝino kaj malamegata de ĉiuj amikoj de la “Vojo”. Streĉante siajn fortojn, li ĉiutage vizitadis la rondojn de tiu servado, kiun li kutime nomis “elpurigo de Jerusalemo”, plenumante miregigan aktivecon, per kiu li tenadis la konstantan vigecon de la administraj aŭtoritatoj, kuraĝigis helpantojn kaj delegitojn, instigis aliajn persekutantojn de la principoj de Jesuo, ne lasante malvarmiĝi la religian fervoron de la Sinedrio.

Unu semajnon post la arestoj en la modesta eklezio okazis tiu memorinda kunsido, en kiu Petro, Johano kaj Filipo estis juĝotaj. Tiu escepta kunveno vekis la plej grandan scivolon. Tie kolektiĝis ĉiuj eminentuloj de la superreganta fariseismo. Gamaliel venis, montrante profundan deprimatecon.

Plej multe oni faradis konsiderojn pri la konduto de la almozuloj, kiuj, ne ricevinte la permeson eniri, dense staris en longaj vicoj sur la granda placo, protestante per tondra kriegado. Oni vane donis al ili bastonfrapojn ĉi tie kaj tie, ĉar tiu amaso da mizeruloj prenis neniam antaŭe viditan amplekson. La sceno estis kurioza kaj alarma. Fari disponon por forpeli tiun kolekton ŝajnis ne ebla entrepreno. La pilgrimantoj kaj malsanuloj estis en la nombro de multe da centoj. Estus senutile bridi tiun aŭ alian grupon, ĉar tio nur pliigus la indignon kaj malesperon de multaj. Kriegante, ili postulis la liberigon de Simon Petro, kaj ĝin postulis tumulte, kvazaŭ postlasitaĵon, super kiu ili havus leĝan rajton.

En la solenejo ne nur la ĉeestantoj komentariis tiun fakton, sed ankaŭ la juĝistoj ne kaŝis profundan impreson. Anas mem rakontis la sieĝon, per kiu lin ĝenis la helpatoj de Jerusalemo. Aleksandro diris, ke al lia domo alamasigis centoj da afliktitoj, petantaj lian interhelpon por la arestitoj. Saŭlo de tempo al tempo respondis al tiu aŭ alia per simplaj duonvortoj. Lia maluma mieno esprimis malnoblajn intencojn rilate al la

destino de la Apostoloj de la Bona-Novaĵo, sidantaj antaŭ li, en la fundo de la salono, humilaj, serenaj, sur la benko de la ordinaraj krimuloj.

Oni tiam vidis, ke Gamaliel tenas kun la ĉefpastro intiman konversacion, kiu daŭris kelke da minutoj kaj vekis grandan scivolon ĉe liaj kolegoj. Tuj poste la respektinda leĝisto vokis sian ekslernanton por aparta interparolo, antaŭ ol ili komecos la laborojn. Liaj kolegoj komprenis, ke la tolerema kaj grandanima rabeno pledos por la afero de la sekvantoj de la Nazaretano.

– Kian verdikton oni eldiros pri la arestitoj? – demandis la maljunulo kun bonkora interesiĝo, tuj kiam ili staris malproksime de la bruantaj grupoj.

– Ĉar ili estas galileanoj – emfaze respondis Saŭlo de la supro de sia aŭtoritateco –, ne estos al ili konsentita la rajto de la parolo en la salono, kaj tial mi jam decidis la punon, kiu ilin trafos. Mi proponos la mortigon de la tri kune kun Stefano per ŝtonumado.

– Kion vi diras! – ekkriis Gamaliel surprizita.

– Mi vidas nenian alian rimedon – diris la tarsa junulo –; ni devas elsarki ĉe la radiko la elkoviĝantaj malbonojn. Mi opinias, ke se tiun movadon ni rigardos tolereme, niaj manoj mem ŝancelos la prestiĝon de la judismo.

– Tamen, Saŭlo – rediris la maljuna instruanto kun profunda bonkoreco –, mi devas voki al mia influo sur vian spiritan konstruitecon, por defendi tiujn homojn de la mortpuno.

La kaprica junulo palegiĝis. Li ne kutimis cedi pri siaj konceptoj kaj decidoj, lia volo estis ĉiam tirana, nefleksebla; sed Gamaliel ĉiam estis lia plej bona amiko. Tiuj sulkitaj manoj donis al li la plej sanktajn ekzemplojn; de ili li ricevis altvalorajn helpon en ĉiuj tagoj de sia vivo. Li komprenis, ke li staras antaŭ potenca baro por la tuta plenumo de siaj deziroj. La respektinda rabeno rimarkis lian perpleksecon kaj tuj insistis:

– Neniu pli bone ol mi konas la noblecon de via koro, kaj mi super ĉiuj konfesas, ke viaj decidoj obeas la nesupereblan zorgon pri la defendo de niaj miljaraj principoj; sed la “Vojo”, Saŭlo, laŭŝajne havas grandan

celon, nome la renovigon de niaj homoj kaj religiaj valoroj. Kiu ĉe ni iam ekpensis helpi al la malfeliĉuloj per la havigo de ama, frata hejmo? Antaŭ ol vi faris tiun punan traserĉadon, mi vizitis tiun modestan institucion kaj povis plezuri, observante ĝian bonegan programon.

La juna leĝisto estis pala, aŭdante ĉi tiujn vortojn, kiuj, laŭ lia opinio, estis senduba signo de malfortanimeco.

– Sed ĉu estas eble – li diris kun miro –, ke ankaŭ vi legis la Evangelio de la galileanoj?

– Mi ĝin ankoraŭ legas – senhezite jesigis Gama-liel –, kaj mi intencas pli profunde meditati pri la nun okazantaj fenomenoj. Mi antaŭsentas grandajn ŝanĝojn ĉie. Mi intencas post nemultaj tagoj forlasi mian oficon, por iri en la dezerton. Komprenoble, ĉi tiujn miajn vortojn vi gardu kiel signon de reciproka konfido.

Treege impresite, la tarsi junulo ne sciis, kion respondi. Li suspektis, ke la respektinda majstro estas mense afekciita de troa meditado, sed la majstro, kva-zaŭ leginte lian penson, aldiris:

– Ne opiniu min mense malvigliginta; la kadukeco de la korpo ne forviŝis de mi la kapablecon pensi kaj distingi mem. Mi komprenas la skandalon, kiu eksplodis en Jerusalemo, se iu rabeno de la Sinedrio publike ŝanĝus siajn plej intimajn konvinkojn, sed ni nepre konsentu, ke mi parolas al iu mia spirita infano, kaj sincere elvokante mian vidpunkton, mi faras ĝin nur, por defendi noblajn kaj justajn homojn kontraŭ nejusta kaj maltaŭga verdikto.

– Via parolo – impete ekkriis Saŭlo – min profunde disrevigas!

– Vi konas min de via infaneco kaj scias, ke la sincera homo ne povas zorgi pri siaj laŭdantoj aŭ bedaŭrantoj en la plenumado de sankta devo.

Kaj donante al la voĉo mildan akcenton, li insistis:

– Ne devigu min en ĉi tiu kunsido ekpaŝi kun vi al publikaj debatoj skandalaj kaj atencantaj la aman trajton, kiun ĉiu vero devas kunporti. Liberigu ĉi tiujn homojn pro konsidero al nia pasinteco de interkompren-

iĝo. Nur pri ĉi tio mi vin petas. Lasu ilin en paco, pro niaj korligiloj. Post kelke da tagoj vi ankoraŭ nenion bezonos konsenti al via maljuna instruanto. Vi estos mia anstataŭanto en ĉi tiu rondo, ĉar mi intencas post kelke da tagoj forlasi la urbon.

Kaj ĉar Saŭlo hezitis, li daŭrigis:

– Vi bezonos longe primediti. La ĉefpastro scias, ke mi petos vian indulgon por la arestitoj.

– Sed... kaj mia aŭtoritateco? – arogante demandis la junulo. – Kial akordigi indulgemon kun la neceso ekstermi la malbonon?

– Ĉia aŭtoritateco estas de Dio. Ni estas nuraj iloj, mia infano. Neniu malaltiĝas, ĉar li estas bona kaj tolerema. Koncerne la plej dignan decidon, konvenan al ĉi tiu afero, ĝi estas la liberigo de ili ĉiuj.

– Ili ĉiuj? – kun mirego demandis Saŭlo.

– Kial do ne? – konfirmis la respektinda leĝisto. – Petro estas nobla homo, Filipo estas familiestro, ekstreme sin donanta al la plenumado de siaj devoj, Johano estas simplanima junulo, Stefano oferis sian koron al la malriĉuloj.

– Jes, jes – interrompis la tarsa junulo. – Mi konsentas la liberigon de la tri unuaj, sub unu kondiĉo. Estante edzoj, Petro kaj Filipo povos resti en Jerusalemo, limigante siajn laborojn per helpado al malsanuloj kaj mizeruloj; Johano estos ekzilita; sed Stefano devos suferi mortpunon. Mi publike jam proponis la ŝtonumadon, kaj mi ne vidas, kial mi cedus, ankaŭ tial, ĉar, por averta ekzemplo, almenaŭ unu el la disĉiploj de la ĉarpentisto ja devas morti.

Gamaliel komprenis la forton de ĉi tiu decido el la vicleco de la vortoj, kiuj ĝin esprimis. Saŭlo diris tre klare, ke li ne cedos pri tiu miraklisto. La maljuna rabeno ne insistis; por eviti skandalon, li konsentis, ke Stefano pagos per sia sinofero. Cetere, konsiderante la obstinan temperamenton de sia ekslernanto, al kiu la urbo donis tian grandan aŭtoritatecon, li opiniis, ke li ne mal multe sukcesis, havigante indulgon al la tri justaj homoj, sin dediĉantaj al la komuna bono.

Komprenante la situacion, per firma tono diris la respektinda rabeno:

– Nu, tiel estu!

Kaj kun bonkora rideto li foriris de la iom maltrankvila kaj perpleksa junulo.

Post kelke da sekundoj, surprizante la tutan ĉeestantaron, Saŭlo el Tarso, de sur la tribuno, proponis la liberigon de Petro kaj Filipo, kiel ankaŭ la ekzilon de Johano, kaj ree faris sian peton pri ŝtonumado de Stefano, ĉar li tiun rigardis kiel la plej danĝeran el la partianoj de la “Vojo”. La aŭtoritatoj de la Sinedrio, plezure konsiderante ĉi tiujn proponojn, ĉar ili sciis, ke tia decido plaĉos al la tiea grandnombra popolamaso, donis sian unuaniman konsenton; la morto de Stefano estis difinita por post unu semajno, kaj Saŭlo invitis siajn amikojn al tiu bedaŭrinda publika ceremonio, en kiu li mem prezidos.



La morto de Stefano

Malgraŭ sia intensa aktiveco la tarsa junulo ĉiam vizitadis la domon de Zeharja, kie, en la koro de Abigail, li ĝuis la necesan ripozon. Se la klopodoj en Jerusalema konsumadis liajn fortojn, tamen apud la amata virino li ilin kvazaŭ regajnis, en tiu dolĉa raviteco, kun kiu li atendis la realigon de la plej karaj esperoj. Li havis la impreson kvazaŭ la mondo estas ia batalkampoj, kie li devas bataladi por la leĝo de Dio; tamen, estante justa kaj grandanima, la Eternulo havigis al li, en la sindoneco de lia amatino, ian konsolrifugejon.

Abigail estis lia sentimenta mondo. La ĉiutagajn klopodojn, la rigorajn disponojn, kiujn lia ofico trudis al li, la severecon, kun kiu li devis trakti la aferojn, konfidentajn al lia juĝo, li transversis en la koron de sia fianĉino, plenan de amo, pieco kaj justeco. Liajn ideojn ŝi ricevis kun ama atento, ŝi kvazaŭ moderigis per la karesemo de sia frata animo, kaj ilin revenigis al la amata fianĉo sub la formo de ĝustaj kaj amikaj proponoj.

Saŭlo estis kutiminta al tiu ĉiutaga altvalora interŝanĝado de ideoj. Kiam lia koro ne ricevis la mildajn konsolojn en tiu domo ĉe la vojo al Jafoj, li sentis sin skuata de siaj propraj energiaj, impetaj sentoj. Abigail korektadis lian spiriton, glatigadis la akraĵojn de lia perfortema, kruda karaktero, kunhelpadis por la malplirigorigo de liaj arbitraj decidoj. Tutajn horojn la tarsa junulo raviĝis aŭdante ŝin, kvazaŭ ŝiaj sentoj de boneco estus ia dolĉa nutraĵo por lia animo, kiun la cerbostreĉoj, postulataj de la mondo, ofte varmegigis. Ne spertinte la tiamajn galantajn aventurojn, ĉar li nepre deziris

konservi pura sian konsciencon antaŭ la leĝo, li trovis en tiu virino, kiun lia koro elektis, la personiĝadon de ĉiuj revoj de sia esperplena juneco.

En la vespero, sekvanta la memorindan kunsidon en la Sinedrio, Saŭlo el Tarso, flanken metinte ĉiajn plej gravajn absorbajn demandojn, pli sopire iris al la domo de Zeharja. Liaj klopodoj en tiu tago skuis liajn fortojn. Li volis rapide trairi la distancon, droni en la karesoj de sia fianĉino, forgesi la zorgojn, bolantajn en lia menso, taŭzata de la plej kontraŭaj pensoj.

La nokto jam disfaldis la lunluman mantelon super la Naturon, kiam la juna leĝisto transpaŝis la sojlon de tiu domo, surprizante la noblan familion per delikata kaj elkora saluto.

La ĉeesto de la fianĉino inokulis ian balzamon al lia koro; post nelonge li ŝajnis revigliĝinta. Posedite de bonhumoro, nun, kiam la internaj fortoj ripozis ĉe mildaj karesoj, li entuziasme rakontis la lastajn okazaĵojn. Zeharja, kiel fidela observanto de la Leĝo, lin absolute pravigis rilate la faritajn decidojn. La persono de Stefano estis detale diskutata. La ekslernanto de Gamaliel, kompreneble klarigis la aferon kiel konvene al li, pentrante la predikanton de la “Vojo” kiel homon inteligentan kaj, ĝuste pro tio, danĝeran, dank’al la revoluciaj ideoj, kiujn lia flua parolo dissemadis.

Abigail kaj Rut ilin aŭskultadis silente, dum la du sinjoroj tenadis animitan konversacion.

Ĉe iu momento, aŭdinte rektan rimarkon de Saŭlo, la junulino demandis:

– Ĉu do ne ekzistus ia rimedo, por almenaŭ modifi la difinitan punon?

– Kion vi dezirus, ke ni faru? – emfaze respondis la junulo. – Tio ne estis malgranda indulgo, ke ni liberigis la plej elstarajn ĉefojn, prenante en kalkulon la trobravecon de iliaj strangaj predikoj. Rilate Stefanon, ni faris ĉion, por ke li, kiel rekta ido de la triboj de Izrael, revenu al siaj fratoj. Li ribelis, kaj lia ribelo diktis lian kondamnon. Li min publike insultis en la Sinedrio, li tretis niajn plej sanktajn principojn, kritikis

la plej eminentajn personojn de la fariseismo per mensogaj kaj sendankaj ilustraĵoj.

Kaj li finis:

– Kio min koncernas, mi estas kontenta. Mi rigardas la atendatan ŝtonumadon kiel unu el la faroj plej gravaj por la estonteco de mia kariero; ĝi atestos mian zorgon pri la defendo de nia plej ŝatinda posedaĵo. Ni devas konsideri, ke Izrael, dum siaj plej nigraj tagoj, preferis la religian emancipiĝon ol la politikan sendependecon. Ĉu ja ni povus elmeti niajn plej altajn moralajn valorojn al la malhonora influo de ia aventuristo?

La junulo nun ekpenis ŝanĝi la vojon de la konversacio, dum Rut ordonis disporti pokalojn da revigliga vino.

Antaŭ ol foriri, la tarsi junulo invitis sian fianĉinon al la kutima promeno. En tiu vespero ŝajnis, ke la Naturo sin ornamis per mirindaĵoj. La lunlumo, kiu reliefigis ĉiujn florojn per palaj tonoj, estis saturita de ĉarmegaj odoroj. La geamantoj, mano en mano, sur kruĉa benko, ravite kontempladis tiun scenon. Saŭlo spertis dolĉan komforton. Lia koro faciliĝis. Jerusalemo nebuligis lian menson en kirlego da zorgoj, sed tiu modesta domo ĉe la vojo al Jafo kvazaŭ deŝarĝis de li koro ĉiujn ĉagrenojn, abunde portante al lia spirito grandegan konsolon.

– Nun, mia kara, ĉio estas preta – li flume diris – Post ses tagoj de hodiaŭ Delila venos mem, por vin forkonduki. Vi ekkonos la urbon kaj miaj amikoj honoros en via nobla animo mian feliĉan elekton. Ĉu vi estas kontenta?

– Jes, tre kontenta – ŝi dolĉe murmuris.

– Ni jam organizis ampleksan amuzan programon. Mi volas konduki vin en Jeriĥon, kie iuj niaj amikoj nin ĝojege atendas. En Jerusalemo mi konigos al vi ĉiujn plej gravajn konstruaĵojn. Vi estos ravita de la Templo kaj de la trezoroj, tie tenataj de la religia sindoneco de nia raso. Vi vidos la turon de la romanoj. Miaj samlandanoj, kiuj vizitas la Sinagogon de la kilikianoj, intencas regali vin per altpreza donaco.

Abigail raviĝis, aŭdante lin. Tiu junulo impulsigema kaj krudmaniera en fremdaj okuloj, sed amema kaj sentema en intimaj rondoj, estis ĝuste ŝia idealo, la viro, kiun esperis ŝia karesema animo.

– Neniu povas regali min per ia donaco pli altvalora ol tiu, sendita de Dio al mia ekzistado, per via lojala kaj nobla koro – diris la junulino gaje ridetante.

– Mi, mi gajnis multe pli – rediris la tarsi legisto –, ricevante al altprezan juvelon de via amo, kiu riĉigos mian tutan vivon. Ifoje, Abigail – li daŭrigis kun la entuziasmo propra al lia revema juneco –, en mia idealismo de venkoj por Jerusalemo super la grandaj urboj de la mondo, mi pensas, ke mi venos al la maljuneco kiel venkinto plena de tradicioj de saĝo kaj gloro. De kiam mi renkontis vin, kreskis mia fido je la destino, mi plifortikigis miajn esperojn, mi havos vian kunhelpon en la grandega tasko, sternaanta antaŭ miaj okuloj. La romanoj asignas al la venkintoj triumfan kronon el laŭroj kaj rozoj; se Jerusalemo iam donos al mi sian triumfan kronon, tiun ĉi mi ne metos ĉirkaŭ mian kapon, sed ĝin kuŝigos ĉe viaj piedoj, kiel tributon de eterna kaj sola amo.

“Ankoraŭ hodiaŭ – daŭrigis Saŭlo, fidante la estontecon – Gamaliel sciigis min, ke li baldaŭ forlasos la Sinedrion, por ke mi lin anstataŭu en lia prestiĝa funkcio. Jen, kara, nia unua gradmezura venko. Tuj kiam Delila revenos el Tarso, ni povos difini la feliĉegan tagon de nia geedziĝo. Mi pensas, ke, ĉiam kune kun vi, mi bridos miajn impulsojn, miaj taskoj estos pli facilaj, mia ekzistado estos pli glata kaj pli feliĉa. Hejmo estas beno, kaj ni ja havos tian hejmon.”

– Mi neniam sentis min tiel feliĉa – diris la junulino kun larmoj de ĝojo.

Li karesis ŝiajn manojn kaj, dezirante, ke ŝi kun li dividu liajn plej intimajn sentojn, aldonis:

– Vi venos kun ni al la urbo ĝuste en la antaŭtago de la morto de la revolucia predikanto. La ekzekuto, kiel juste, obeos la ceremoniaron, starigitan de niaj moroj, kaj mi deziras, ke vi ĝin ĉeestu kune kun mi.

– Sed kial? – ŝi demandis, iomete tremante.

– Ĉar tie ni renkontos niajn plej eminentajn amikojn kaj mi deziras uzi la okazon, por nerekte prezenti vin al ili ĉiuj.

– Ĉu vi ne povus evitigi al mi tiun spektaklon? – ŝi timeme insistis. – La morto de mia patro, en turmentoj, antaŭ la brutala soldataĉaro, neniam forviŝiĝis de mia menso.

Saŭlo ne kaŝis sian ĉagrenon kaj respondis:

– Ĉu vi do ne komprenas? La afero de Stefano estas ja tre malsama. Li estas homo, kiu por ni havas nenian signifon, kiu arogis al si la rolon de ribela kaj impertinenta reformisto. Lia persono ja reprezentas la daŭrigon de la malrespekto kaj insulto al la Leĝo de Moseo, kiujn en grandaj mezuroj iniciatis ia deliranta ĉarpentisto el Nazaret. Ĉu vi do opinias, ke oni ne punu rabiston, kiu trarompe penetris en iun loĝejon? Ĉu punon ne meritas la blasfemantoj en la sanktejo de la Eternulo?

Komprenante, ke ŝi malplaĉus al sia fianĉo, se ŝi elmontrus malkonsenton de opinio, la junulino diris:

– Mi vidas, ke vi estas tre prava. Mi ne devas diskuti pri viaj saĝaj kaj ĝustaj argumentoj; cetere mi ja intencas akiri al mi la amikecon de viaj kamaradoj el la Sinedrio, ĉar mi ne perdas la esperon pri via protekto ĉe la afero de Jeziel, tuj kiam sin prezentos iu oportuna okazo por pluaj esploroj en Akajo. Sed aŭdu, Saŭlo: se vi permesas, mi iros, kiam la ceremonio estos proksima al sia finiĝo. Konsentite?

Al la tarsi junulo, kiu rimarkis ŝian alkonformigan bonvolon, heliĝis la mieno per bela rideto de kontenteco kaj li respondis:

– Jes, konsentite, kaj mi esperas, ke vi vidos ĉion serene, certa, ke mi povus ŝarĝi min nur per justaj taskoj kaj estimindaj decidoj en la plenumado de la devo. Estas bedaŭrinde, ke la arestito montriĝis necedema en tia grado, ke li devigis min preni ekstremajn decidojn. Vi tamen kredu, ke mi faris ĉion, por eviti la lastan rimedon. Mi uzis ĉiajn akordigajn procedojn, por deadmoni lin de tiuj danĝeraj iluzioj, sed lia konduto estis tiel incita, ke ĉia cedo fariĝis praktike ne ebla.

Ili ankoraŭ longe interŝanĝis elkorajn parolojn, kiujn la amika vespero zorge rikoltis en sian luman mantelon el steloj. Tio estis karesaj juroj pri senmorta amo sub la beno de Dio, beno, kiun ili prenis kiel la plej altan celon de siaj sanktaj pensoj, projektoj kaj esperoj pri estonteco.

Estis jam malfrue nokte, kiam Saŭlo adiaŭis sian fianĉinon kaj kun feliĉa animo reiris Jerusalemon.

Post kelke da tagoj Abigail kune kun sia fianĉo kaj lia fratino sin direktis al la urbo, kies interesa mieno prezentis vidaĵojn novajn por ŝiaj okuloj. En tiu sama vespero, kiam ŝi venis, la domo de Delila pleniĝis de amikoj, kiuj iris esprimi al la virino, elektita de la koro de Saŭlo, sian estimon; kaj la junulino el Korinto ĉiujn ĉarmis per siaj naturdotoj kaj solida, bone prizorgita spiritokonstruo. Ŝia parolo, plena de koreco, laŭŝajne tre malproksime staris de la frivolaĵoj, kiuj karakterizis la tiaman junularon. Ŝi povosciis eldiri la plej delikatajn opiniojn ĉe la pritraktado de ĉiuj temoj, pri kiuj oni petis ŝian parolon, ĉerpante belajn deduktojn el la Leĝo kaj la Sanktaj Skriboj, por difini la pozicion de la virino ĉe la plej intimaj devoj en la familia vivado. La tarsi leĝisto fieris pri tiu ĝenerala admiro je ŝia vigla kaj simpatia persono. Kiel lia plej granda idealo, Abigail plenigis lian koron per belegaj promesoj. La mirego de liaj amikoj, kiuj lin gratulis per la rigardo, kreskigis en lia arda animo ian novan ĝojon.

La tago sekvanta naskiĝis hela kaj bela. En la bril-ega suno de Jerusalemo Saŭlo adiaŭis sian amatan fianĉinon, por ankoraŭ frue matene zorgi pri la laboroj en la Sinedrio.

– Ĝis baldaŭ do, en la Templo – li afable diris.

– En la Templo? – demandis Delila kun miro, brakumante Abigailon.

– Jes – li ĝentile klarigis –, Abigail ĉeestos la finan parton de la puno de Stefano.

– Sed kiel do? – ankoraŭ demandis la juna sinjorino – Virinoj en la ceremonio?

– La ŝtonumado okazos proksime al la altaro de la oferoj, ne en la sanktaj kortoj – li klarigis. – Laŭ

mia opinio la ĉeesto de virinoj ne estos malpermesita, kaj eĉ se la pastroj decidus kontraŭe, tia decido tamen ne povus kontraŭstari mian personan intencon, kaj mi deziras, ke Abigail partoprenu en mia unua venko ĉe la defendo de niaj regantaj principoj.

La du sinjorinoj ridetis feliĉaj, konstatante liajn bonegajn dispoziciojn.

– Kiel lastan rimedon, Saŭlo – diris Abigail, elmontrante trakvilecon kaj amemon –, nepre havigu al la kondamnito ekstreman okazon, por saviĝi de la morto. Post du monatoj en la karcero li eble rebakis siajn pli profundajn sentojn. Ankoraŭ unu fojon demandu lin, ĉu li persistas ĉe sia insultado al la Leĝo.

La tarsa junulo direktis al ŝi dankan rigardon, ĝojante pri tia granda nobleco, kaj rediris:

– Tiel mi agos.

En tiu tago, jam de tre frua mateno, la plej alta tribunalo en Izrael prezentis nekutiman movadon. La ekzekuto de la predikanto de la “Vojo” estis objekto de longaj komentarioj. Precipe la fariseoj nepre volis ricevi ĉiajn informojn, sed la modesta eklezio de Simon Petro ne kuraĝis alproksimiĝi por ia ajn pridemando. Saŭlo, kiel malkaŝa persekutanto kaj uzante la prerogativojn de sia leĝa funkcio, anoncigis, ke neniu adepto de la “Vojo” povos ĉeesti la ekzekuton, okazontan en unu el la grandaj kortoj de la sanktejo. Longaj vicoj da soldatoj estis starigitaj sur la granda placo, por dispeli ĉian grupon da mizeruloj, kiu estiĝos kun nekonataj intencoj, kaj ekde la unuaj horoj de la mateno multe da almozuloj en Jerusalemo estis per glavo forpelataj for de la najbaraĵo de tiu loko.

Posttagmeze aŭtoritatuloj kaj vidamuloj, avidantaj sensacion, kolektiĝis en la Sinedrio, kun apenaŭ aŭdebla voĉmurmuro. Oni atendis la kondamniton, kiu fine alvenis ĉirkaŭita de armita eskorto, kvazaŭ ia ordinara kriminto.

Stefano montriĝis kun forte ŝanĝita aspekto, kvankam lia mieno ne perfidis la serenecon propran al lia animo. La treniĝanta paŝado, la grandega laceco, la ekimoj sur la manoj kaj piedoj, ĉio ĉi evidentigis la se-

verajn fizikajn turmentojn, kiujn oni suferigadis al li en la ombro de la karcero. La longekreskinta barbo aliigis lian fizionomion, sed la okuloj konservis la lumradiadon de pura boneco.

Meze en la ĝenerala scivolo Saŭlo el Tarso lin kontente ekrigardis. Stefano fine pagos por siaj malsaĝaĵoj kaj insultoj.

En la difinita momento la nepetegebla leĝisto voĉlegis la akuzaĵon, sed antaŭ ol eldiri la verdikton, li, fidela al sia promeso, ordonis al la soldatoj puŝi la juĝaton ĝis lia tribunuo. Sen ia kompato rigardante la predikanton de la Evangelio, li krude demandis:

– Ĉu vi nun estus preta ĵuri kontraŭ la nazareta ĉarpentisto? Pripensu, ke ĉi tiu estas la lasta oportuna okazo, ke vi konservus la vivon.

Ĉi tiuj vortoj, maŝine eldiritaj, strange sonis en la oreloj de la junulo el Korinto, kiu ilin ricevis en sia sentema kaj nobla animo, kvazaŭ aliajn pikilojn de ironio.

– Ne insultu la Savinton! – brave diris la heroldo de la Kristo. – Nenio en la mondo igos min rezigni lian dian protekton! Morto por Jesuo estas gloro, ĉar ni scias, ke li sin oferis sur la kruco por la tuta homaro!

Sed torento da insultoj rompis lian parolon:

– Sufiĉe! Ni lin tuj ŝtonumu! Morton al la fiulo! For la sorĉisto! Blasfemanto! Kalumnianto!

La kriegado timige kreskadis. Kelkaj pli ekscititaj fariseoj, trompante la viklecon de la gardistoj, proksimiĝis al Stefano, provante lin senkompatate treni, sed, ĉe la unua ektiro je la ŝirita kolumo, peco de lia froteluzita tuniko restis en iliaj manoj. Estis necesa la interveno de soldatoj, por ke la junulo el Korinto ne estu sur tiu sama loko disŝirita de la furioza kaj deliranta popolamaso. Saŭlo kun krioj ordonis do al la soldatoj agi; li volis la ekzekuton de la disĉiplo de la Evangelio, sed kun la tuta antaŭdifinita ceremoniaro.

Al Stefano estis la vizaĝo ruĝa de honto. Li estis duonnuda kaj tial romana legiano helpis lin rearanĝi la restaĵojn el la disĉifonita vesto super la lumboj, por ke li ne restu tute nuda. Per la mano, tremanta pro la ri-

cevitaj brutalaĵoj, li penis forviŝi la salivon, kiun la plej ekzaltitaj ĉeestantoj ĵetis al li sur la vizaĝon. Forta bato kontraŭ lian ŝultron tre dolorigis lian tutan brakon. Li komprenis, ke alproksimiĝas liaj lastaj momentoj de vivo. La humiligado lin profunde suferigis, sed li rememoris la rakonton de Simon pri Jesuo en ties lasta kriza momento. Antaŭ Herodo Antipas la Kristo similajn ironiojn travivis de izraelidoj; li estis skurĝita, ridindigita, vundita; preskaŭ nuda, li elportis ĉiujn ofendojn sen ia plendo, sen ia malpli digna esprimo; li, kiu amis la malfeliĉulojn, kiu klopodis, por fondi doktrinon de konkordo kaj amo por ĉiuj homoj, kiu tiujn plej malfeliĉajn benis kaj ame akceptis, li kiel premion ricevis krucon meze en supermezuraj turmentoj. Tiam Stefano ekpensis: “Kiu mi estas kaj kiu estis la Kristo?” Ĉi tiu interna demando lin iom konsolis. La Princo de Paco estis trenita tra la stratoj de Jerusalemo sub hajlo da plej grandaj insultoj, kaj li estis la atendita Mesio, la Sanktoleito de Dio! Kial do, estante homo erarema, ŝarĝita per sennombraj malfortaĵoj, li hezitu en la momento de la atesto? Kaj kun larmoj, fluantaj sur la vundita vizaĝo, li aŭdis en la koro la karesantan voĉon de la Majstro: “Ĉiu, kiu volas partopreni en mia regno, abnegaciu sin mem, levu sian krucon kaj sekvu min” (*). Li devis do abnegacii sin mem, por akcepti la profitan oferon. Post ĉiuj torturoj li certe trovos la gloran amon de Jesuo kaj la belecon de ties senmorta karesemo. La humiligita kaj vundita predikanto rememoris sian pasintecon de laboroj kaj esperoj. Li kvazaŭ vidis la sopiratan infanecon, dum kiu la zorgado de lia patrino inokulis al li la fundamentojn de la konsolanta fido; poste la noblajn junulajn aspiradojn, la sindonecon de la patro, la amon de la fratinetino, kiun la kapricoj de la destino rabis al li. Ekspensinte pri Abigail, li eksentis ian premon sur la koron. Nun, kiam li estis alfrontonta la morton, li deziris revidi ŝin por la lastaj rekomendoj. Li rememoris tiun lastan vesperon, kiam ili interŝanĝis tiom da karesaj

(*) Kp. Mateo, 16:24. – *La Trad.*

impresoj, tiom da frataj promesoj en la malluma karcero en Korinto. Malgraŭ la renovigaj laboroj de la kredo, en kies klopodoj li vigle partoprenis en Jerusalemo, li neniam povis forgesi la devon ŝin ĉie ajn serĉi. Dum ĉirkaŭ li ĉiam pli kreskis la insultoj en la tondrado de indignigaj krioj kaj minacoj, la kondamnito ploradis kun siaj rememoroj. Helpante al si per la promesoj de la Kristo en la Evangelio, li sentis ian animfaciligon. La penso, ke la fratinetoj vivas plue en la mondo konfidite al Jesuo, mildigis la turmentojn de lia koro.

Apenaŭ elirinte el siaj doloraj rememoroj, li aŭdis la aŭtoritatan voĉon de Saŭlo al la soldatoj:

– Denove mankatenu lin, estas finite, ni iru en la korton.

Eletendante la manojn, por ricevi la katenojn, la disĉiplo de Simon Petro suferis tiel fortajn batojn de senskrupula soldato, ke el la vunditaj manradikoj ekfluis multe da sango.

Stefano faris nenian kontraŭstaron. Iam kaj iam li levadis la okulojn, kvazaŭ petante la helpon de la Ĉielo por liaj apogeaj minutoj. Malgraŭ la milfajfoj kaj la vundoj, kiuj lin konsumis, li ĝuis neniam antaŭe konatan spiritan pacon. Ĉiuj tiuj suferoj en tiu ceremoniaro fariĝis por la Kristo. Tiu momento estis lia dia oportuna okazo. La Nazareta Majstro vokis lian fidelan koron al la publika atesto pri la spiritaj valoroj de lia dia doktrino. Fidplena, li rezonis: “Se la Mesio akceptis la malhonoran morton sur Kalvario, por savi ĉiuj homojn, ĉu ne estas honoro doni la vivon por li?” Ĉu lia koro, ĉiam avidanta doni ateston pri sia fideleco al la Sinjoro, de kiam li ekkonis ties elacetan Evangelion, ja ne ĝoju ĉe la ĝusta okazo oferi al li sian propran vivon? Sed la ordono ekmarŝi elŝiris lin el liaj plej altaj pensoj.

La nobla predikanto de la “Vojo” ŝanceliĝis irante, sed havis serenajn kaj firman rigardon, elmontrante bravecon en la lastaj momentoj de sia atesto.

En tiuj unuaj horoj de la posttagmezo la suno super Jerusalemo estis ia ardanta fajrujo. Malgraŭ la terura

varmo la popolo tre interesite alsvarmis al la Templo. Tiu estis la unua proceso rilate al la laboroj de la “Vojo” post la morto de ties fondinto. Distingigante de ĉiuj ceteraj judaj fluoj, tie troviĝantaj por la prestiĝo de la Leĝo de Moseo, la fariseoj laŭte eltrumpetis la okazaĵon. Ĉe la preterirado de la kondamnito ili nepre elvomis al li en la vizaĝon la plej trivialajn insultojn, sed li, kvankam elmontrante profundan malĝojon, iradis duonnuda, serena, indiferenta.

La kunsidosalono de la Sinedrio ne estis tre malproksima de la korto de la Templo, kie estis fariĝonta la funebra ceremonio. Post kelke da paŝoj la irado finiĝis, ĝuste tie, kie staris la granda altaro por la oferoj.

Ĉio estis preparita alkonforme, kiel Saŭlo komprenigis pri siaj intencoj.

En la fundo de la vasta korto Stefano estis ligita al ŝtipo, por ke la ŝtonumado efektiviĝu akurate en la difinita horo.

La ekzekutantoj estos la reprezentantoj de la sinagogoj de la urbo, ĉar tio estis honora tasko, komisiata al ĉiu, kiu povis agadi defende de Moseo kaj ties principoj. Ĉiu sinagogo nomis sian delegiton, kaj, komecante la ceremonion, Saŭlo, kiel estro de tiu afero, akceptis unu post unu, apud la viktimo, kaj konservis en la manoj, laŭ la etiketo, la brilantajn mantelojn, ornamitajn per purpuro.

Nun la tarsi junulo donis ordonon kaj la ekzekuto komenciĝis ĉe ridegoj. Ĉiu ekzekutanto malvarme ekcelis la preferitan punkton, penante ĉerpi la plej bonan rezultaton.

Ridoj de ĉiuj sekvis ĉiun frapon.

– Ni ŝparu lian kapon – diris unu el la plej flamantaj –, por ke la spektaklo perdu neniom da intenseco kaj intereso.

Ĉiu prestiĝohava reprezentanto de la judismo sekvis la ekzekutanton, nomitan de la korifeoj de la sinagogo, atente kaj entuziasme kriegante: “Mortu la perfidinto! Mortu la sorĉisto!”

– Celu al lia koro, en la nomo de la kilikianoj! – kriis iu el la popolamaso.

– Defaligu al li kruron, pro la idumeanoj! – apoge blekis alia senhonta voĉo.

En kelka distanco de la popolamaso, de proksime sekvante la movojn de la kondamnito, Saŭlo el Tarso ĝoje kaj kontente observis la vibradon de tiuj homoj. Kiel ajn ĝi estis, la morto de tiu predikanto de la Kristo prezentis lian unuan grandan venkon ĉe la akiro de la atento de Jerusalemo kaj de ĝiaj prestiĝohavaj politikaj korporacioj. En tiu momento, kiam li estis la celo de tiom da aklamoj de la popolo de sia raso, li fieris pri la decido, kiu igis lin senkompate kaj senhalte persekutadi la “Vojon”. Tamen tiu trankvileco de Stefano ja impresis lin profunde en la volforta kaj necedema koro. Kie tiu martiro povas ĉerpi tian serenecon? Sub la ŝtonoj, kiuj lin celis, tiuj okuloj rigardadis la ekzekutantojn ne palpebrumante, elmontrante nek timon nek konfuzitecon!

Efektive, genue ligite al la torturoŝtupo, la junulo el Korinto konservis impresan pacesprimon en la helaj okuloj, el kiuj rivere fluadis silentaj larmoj. La senkovra brusto estis ia sanganta vundo. La disĉifoniĝintaj vestoj, pastiĝinte de ŝvito kaj sango, algluiĝis al lia korpo.

La martiro de la “Vojo” sentis sin tenata de grandaj netuŝeblaj fortoj. Ĉe ĉiu frapo li sentis pliakriĝi la kruelegajn suferojn, kiuj taŭzis lian senfortiĝintan korpon, sed interne li sentis superteran dolĉecon. Lia koro batis sentakte; la torakon ŝiris profundaj vundoj, la ripoj estis rompitaĵoj.

En tiuj ekstremaj momentoj li rememoris eĉ la plej etajn fidoligilojn, kiuj tenis lin ĉe ia pli alta vivo. Li rememoris ĉiujn preĝojn, kiujn li preferis en sia infaneco. Li faris ĉion eblan, por bildigi sur la retino la morton de sia turmentata kaj nekomprenata patro. En sia animo li ripetis la Psalmojn 23 de David, kiel li faradis apud sia fratino en tiuj situacioj, kiuj ŝajnis neelireblaj: “La Eternulo estas mia paŝtisto; mi mankon ne havos...”. La vortoj de la Sanktaj Skriboj, kiel ankaŭ la promesoj de la Kristo en la Evangelio, kuŝis en la profundo de lia koro. La korpo konsumiĝadis en la torturo, sed la spirito estis trankvila kaj esperplena.

Nun li havis la impreson, kvazaŭ du manoj milde karesas liajn dolorantajn vundojn, donante al li dolĉan sensaĵon de malpli akra sufero. Sen ia timo li komprenis, ke venis al li la ŝvito de agonio.

Sindonaj amikoj el la spirita regiono ĉirkaŭis la martiron en liaj lastaj minutoj. En la apogeo de la fizikaj doloroj, kvazaŭ li transflugis grandegajn vidabismojn, la junulo el Korinto rimarkis, ke io disŝiriĝis en lia afliktita animo. Liaj okuloj kvazaŭ penetris en glorajn scenojn de la transtomba vivo. La legio da senditoj de Jesuo, kiuj lin ame ĉirkaŭis, ŝajnis al li la ĉiela kortego. Sur la luma vojo, etendiĝanta antaŭ li, li rimarkis, ke iu alproksimiĝas al li kun malfermitaj amikaj brakoj. Laŭ la priskribo, kiun li aŭdis de Petro, li konkludis, ke li rigardas la Majstron mem, venantan en la tuta brilego de sia dia gloro. Saŭlo rimarkis, ke la okuloj de la kondamnito estas senmovaj kaj radilumaj. Tiam la kristana heroo, movante la lipojn, laŭte ekkriis:

– Jen mi vidas la ĉielon malfermita kaj la Kriston reviviĝinta en la majesto de Dio!

Oni tiam vidis, ke du junaj virinoj kun intimaj gestoj alproksimiĝas al la persekutanto. Delila lasis Abigailon ĉe sia frato kaj tuj adiaŭis, por kontentigi la vokon de alia amikino. La amplena fianĉino portis grekmodan tunikon, kiu ankoraŭ plibeligis ŝian ĉarman vizaĝon. Ĉu pro la elvolviĝanta dolora sceno, ĉu pro la ĉeesto de la amata virino, Saŭlo videble estis iom perpleksa kaj emociita. La nesubigebla koro de Stefano kvazaŭ instigis lin konsideri la nekonatan trankvilecon, certe regantan en la spirito de la martiro.

Ĉe la ĉirkaŭanta kriegado kaj observante la mizeran situacion de la viktimo, la junulino apenaŭ retenis krimon de mirego. Kiu estas tiu viro, ligita al la punŝtupo? Ĉu tiu leviĝanta kaj malleviĝanta brusto, kovrita de algluiginta sango, tiuj haroj, tiu pala vizaĝo, kiun la longe kreskinta barbo aliaspektigis, ĉu ili ne estas de ŝia frato? Ha, kiel pentri la grandegan angoron ĉe la surprizo de unu minuto? Abigail tremadis. Ŝiaj afliktoplenaj okuloj sekvis la plej malgrandajn movojn de la heroo, kiu ŝajnis indifera, en la ekstazo, kiu lin absorbis. Vane Saŭlo

diskrete deturnis ŝian atenton, por ŝpari al ŝi dolorajn impresojn. Ŝajnis, ke la junulino vidas nenion, krom la kondamnito, konsumiĝanta de la elfluanta sango de la martireco. Ŝi nun rememoris... Forirante de la karcero, post la morto de sia patro, ĝuste tiel ŝi vidis Jezielon en la pozicio de la torturo. La abomeninda punŝtupo, la krudaj mankatenoj kaj la kompatindulo genuanta! Ŝi sentis impulsojn sin ĵeti antaŭ la ekzekutantojn, peti klarigon pri la situacio, ekscii, kiu estas tiu viro.

En tiu momento, ne sciante, ke li estas celpunkto de tia stranga atento, la predikanto de la “Vojo” eliris el sia impresa senmoveco. Vidante, ke Jesuo melankolie rigardadas la figuron de la leĝisto el Tarso, kvazaŭ bedaŭrante ties riproĉindajn deflankiĝojn, la disĉiplo de Simon eksentis en la koro por sia turmentanto veran amikecon. Li konis la Kriston, Saŭlo ne. Ekposedite de efektiva frateco kaj dezirante defendi sian persekutanton, li per impresa tono ekkriis:

– Sinjoro, ne metu sur lin ĉi tiun pekon!

Tion dirinte, li turnis la okulojn, por ilin amplene fiksi sur sia turmentanto, sed jen li ekrimarkis apud tiu sian fratinton, vestitan kiel en la festaj tagoj, en la patra domo. Ĝi estis ja ŝi, la amata fratino, por kies amikeco lia koro tiel ofte batadis de resopiro kaj espero. Kiel klarigi ŝian ĉeeston? Eble ankaŭ ŝi foriris en la regnon de la Majstro kaj nun spirite revenis kun tiu, por bonvenigi lin el ia pli bona mondo? Li ekdeziris elkrii sian senfinan ĝojon, altiri ŝin, aŭdi ŝian voĉon en la kantoj de David, morti lulata de ŝiaj karesoj, sed lia gorgo jam ne vibris, la emocio lin ekregis en la ekstrema momento. Li eksentis, ke la Majstro karesas lian frunt-on, kie la lasta ŝtonfrapo plugis sulkon el sango. Li aŭdadis arĝentajn voĉojn, kiuj malproksime kantadis sanktajn himnojn pri la diaj motivoj de la Prediko sur la Monto. Ne povante rezisti ankoraŭ longe al tiu torturo, la disĉiplo de la Evangelio sentis, ke liaj fortoj forsvenas.

Aŭdinte la esprimojn de la kondamnito kaj ricevinte lian luman kaj klaran rigardon, Abigail ne povis kaŝi sian korŝiran surpriziĝon.

– Saŭlo! Saŭlo! Tio estas mia frato! – ŝi ekkriis terurita.

– Kion vi diras? – mallaŭte balbutis la tarsa leĝisto, larĝe malfermante la okulojn. – Ne eble! Ĉu vi freneziĝis?

– Ne, ne, tio estas li, estas li! – ŝi ripetadis treege pala. – Tio estas Jeziel, karulo – insistis Abigail terurita –; donu al mi unu minuton, lasu min paroli al la mortanto sole nur unu minuton.

– Ne eble! – rediris la ĝenata junulo.

– Saŭlo, pro la Leĝo de Moseo, pro niaj prapatroj, kontentigu mian peton! – ŝi ekkriis, tordante la manojn.

La ekslernanto de Gamaliel ne kredis la eblecon de tia koincido, krom tio estis diferenco en la nomo; estis necese antaŭ ĉio klarigi ĉi tiun detalon. Certe la malvera impreso de Abigail disfumiĝos ĉe la unua kontakto kun la agonianto. Ŝia sentema kaj amema tempreamento pravigis tion, kio en liaj okuloj estis absurdo. Rapide farinte al si ĉi tiujn konsiderojn, li severe diris al sia fianĉino:

– Mi iros kun vi identigi la mortanton, sed ĝis ni povos tion fari, prisilentu viajn impresojn... Eĉ ne vorteton, ĉu vi aŭdas? Estas necese ne forgesi la respektindecon de la loko, kie vi staras!

Tuj poste li vokis altrangan oficiston kaj seke diris:

– Ordonu porti la kadavron en la kabineton de la pastroj.

– Sinjoro – respekte rediris la oficisto –, la kondamnito ankoraŭ ne estas mortinta.

– Ne grave, eĉ tia li iru, ĉar mi elpremos lian pentokonfesion en la lasta momento.

La ordono estis senprokraste plenumita, dum Saŭlo regalis siajn amikojn kaj estimantojn per pluraj amforoj da bongustega vino, por festi lian unuan venkon. Poste, kun mulluma vizaĝo, maltrankvila, li ŝtelmove traŝoviĝis, en kompanio de sia fianĉino, ĝis la salono, rezervita al la pastroj de Jerusalemo.

Traŝirante la grupojn, kiuj lin salutis per freneza akklamado, la tarsa junulo ŝajnis senkonsciiginta. Li kondukadis Abigailon je la brako delikate, sed senforte. La

surprizo lin mutigis. Se Stefano efektive estas tiu Jeziel, kiun ili tiel sopire atendas? Dronante en premanta cerbumado, ili eniris en la izolitan ĉambron. Ordoninte al siaj helpantoj eliri, la juna leĝisto zorge fermis la pordon.

Abigail kun plej kora dolĉeco alproksimiĝis al sia sangokovrita frato kaj ambaŭ rimarkis, ke la viktimo ekmovas la sangelverŝantan kapon, kvazaŭ grandega, nevenkebla forto vokis lin en la vivon. Vidigante la ekstreman penon de la agonio, Stefano murmuris:

– Abigail!

Tiu voĉo estis nur bloveto, sed la rigardo estis kvietata, klara. Aŭdante lian hezitan kaj treniĝantan parolon, la tarsi junulo terurita repaŝis. Kion ĉio ĉi signifas? Li ne povus dubi. La viktimo de lia senindulga persekutado estis ja la tre kara frato de lia elektitino. Kia aranĝo de la destino forĝis tian situacion, kiu maldolĉigos lian tutan vivon? Kie troviĝis Dio, kiu lin ne inspiris en la labirinto da cirkonstancoj, kiuj pelis lin al tia senrimeda, kruela rezulto? Li sentis sin posedita de senfina ĉagreno. Li, elektinta Abigailon la anĝelo-protektanto de lia ekzistado, nun devis por ĉiam rezigni tiun amon. La fiereco de viro ne permesos al li edziĝi kun la fratino de la supozita malamiko, konfesita kaj juĝita kiel ia ordinara kriminto. Perpleksa, li sin ne movis, kvazaŭ ia nevenkebla forto lin alnajlis al la tero, turnante lin en objekton de neelporteblaj ironioj.

– Jeziel! – ekkriis Abigail, kisante kaj surverŝante per larmoj la frunton de la mortanto. – Kia mi vidas vin! Ŝajnas, ke la torturo daŭris al vi de la tago, kiam ni disiĝis unu de la dua!

Kaj ŝi plorsingultadis...

– Estas al mi bone... – diris la disĉiplo de Jesuo, plej penante movi la rompitan dekstran manon kaj vidigante la deziron karesi ŝiajn harojn, kiel en la tagoj de sia infaneco kaj unuatempa juneco. – Ne ploru! Mi estas kun la Kristo!

– Kiu estas la Kristo? – demandis la junulino – Kial oni nomas vin Stefano? Kiel oni tiel ŝanĝis vian personon?

– La Kristo... Jesuo... estas nia Savinto... – klarigis la agonianto, dezirante ne perdi la rapide forfluantajn minutojn – Nun oni nomas min Stefano tial..., ĉar bonkora romano liberigis min... sed petis min... gardi absolutan sekreton. Pardonu min... Mi obeis lian konsilon pro danko. Neniu estas danka al Dio, ne elmontrante dankon al la homoj...

Rimarkinte, ke lia fratino ankoraŭ plorsingultas, li daŭrigis:

– Mi scias, ke mi estas tuj mortonta... sed la animo estas senmorta... Mi bedaŭras, ke mi foriras de vi nun..., kiam mi vin apenaŭ revidis, sed mi ja helpos vin el tie, kie mi staros.

– Aŭskultu, Jeziel – diris la junulino kun korelverŝo –, kion instruis al vi tiu Jesuo, ke li kondukis vin al tia dolora fino? Kiu tiel forlasas lojalan servanton, ĉu tiu pli ĝuste ne estas ia kruela mastro?

La mortanto ŝajnis admoni ŝin per la rigardo.

– Ne tiel pensu – li pene respondis. – Jesuo estas justa kaj kompatema..., promesis, ke li estos kun ni ĝis la maturiĝo de la mondaĝo... Iam vi komprenos... Min li instruis ami eĉ miajn turmentantojn...

Ŝi ameme, en larmoj, lin brakumis. Post paŭzo, kiam montriĝis, ke la viktimo troviĝas en la lastaj momentoj de sia materia vivo, ili vidis, ke Stefano plej pene agitiĝas.

– Kun kiu mi lasos vin?

– Jen mia fianĉo – klarigis la junulino, montrante al la tarsi junulo, kiu ŝajnis ŝtoniĝinta.

La mortanto ekrigardis lin sen malamo kaj akcente diris:

– La Kristo benu vin ambaŭ... En via fianĉo mi havas ne malamikon, sed fraton... Saŭlo certe estas bona kaj grandanima, li defendis Moseon ĝis la fino... Kiam li konos Jesuon, tiam li servos al la Majstro, tiel same fervore... Estu al li plena kaj fidela kunulino...

Sed la voĉo de la predikanto de la “Vojo” estis nun raŭka kaj apenaŭ aŭdebla. En la angoroj de la morto li frate kortuŝite rigardadis Abigailon.

Aŭdante liajn lastajn frazojn, la leĝinstruisto el Tarso palegiĝis, volis esti malamata, malbenita. La kompatado de Stefano, frukto de ia paco, kiun li, Saŭlo, neniam konis en la zenito de la mondaj pozicioj, lin profunde impresis; tamen, ne sciante kial, la rezignacio kaj la dolĉeco de la agonianto mordis lian rigidiĝintan koron. Sed interne li perfortis sin mem, por ne emociiĝi ĉe tiu dolora vidaĵo; li ne fleksiĝos pro ia sentimentaleco; li abomenas tiun Kriston, kiu laŭŝajne lin ĉie vokas, eĉ enŝovigante inter lin kaj la adoratan virinon. La turmentata cerbo de la estonta rabeno estis ia erupcianta vulkano. Li malŝatis la fierecon de sia familio kaj elektis Abigailon kiel sian kunulinon en la batalo de la vivo, kvankam li ne konis ŝian praularon. Li amis ŝin per la ligiloj de la animo, li eltrovis en ŝia delikata koro de virino ĉion, kion li revis dum siaj meditadoj en la monda sfero. Ŝi reprezentis liajn esperojn de junulo, estis la garantio de lia destino, la respondo de Dio al la alvokoj de lia idealista juneco. Nun profunda abismo oscedas inter ili. Ŝi, fratino de Stefano! Neniu iam antaŭe kuraĝis alfronti lian aŭtoritatecon krom tiu flamanta predikanto de la “Vojo”, kies ideoj neniam povos akordi kun liaj. Li abomenis tiun junulon, pasie regatan de la delira idealo de ia ĉarpentisto, kaj atingis la supron de siaj intecoj de venĝo. Se li edziĝus kun Abigail, ili neniam estus feliĉaj: li estus la turmentanto, ŝi la viktimo. Krom tio lia familio, alkroĉita al la rigoreco de la malnovaj tradicioj, ne povus, ekkoninte tiujn faktojn, toleri tian ligiĝon.

Posedite de premante senkuraĝeco, li metis la manojn al la brusto.

Plorante, Abigail observis la doloran agonion de sia frato, kies lastaj minutoj pasadis malrapide. Peza emocio ekposedis ĉiujn ŝiajn fortojn. Ŝajnis, ke en la doloro, kiu disŝiradis ŝiajn plej sentemajn fibrojn, ŝi ne vidas sian fianĉon, kiu sekvis ĉiujn ŝiajn movojn samtempe miregante kaj terurite. Sidiĝinte, por karese alpreni al si la mortanton, ŝi tre zorge subtenis lian kapon.

Rimarkinte, ke la frato direktis al ŝi lastan rigardon, ŝi afliktoplena ekkriis:

– Jeziel, ne foriru... Restu kun mi! Ni neniam disiĝos unu de la dua!

Li, preskaŭ elspirante sian animon, murmuretis:

– La morto ne disigas tiujn... kiuj sin reciproke amas...

Kaj kvazaŭ rememoriginte pri io tre agrabla al lia koro, li larĝe malfermis la okulojn kun esprimo de grandega ĝojo:

– Kiel en la Psalmo... de David... – li diris per tirata voĉo –, ni povas... diri... ke amo... kaj favorkoreco... sekvis nin... ĉiujn tagojn... de nia vivo... (*)

La junulino tre kortuŝite aŭskultadis liajn lastajn vortojn kaj forviŝadis la ŝviton, miksitane kan sango, de lia vizaĝo, kiu heliĝis de supertera sereneco.

– Abigail... – li ankoraŭ flustris –, mi foriras en paco... Mi dezirus aŭdi de vi la preĝon... de la afliktitoj kaj agoniantoj...

Ŝi rememoris la lastajn momentojn de la torturo de sia patro, en tiu neforgesebla tago de ilia disiĝo en la karceroj en Korinto. Momente ŝi komprenis, ke tie agas aliaj fortoj. Nun ne Licinio Minucio kaj ties kruelaj partianoj, sed ŝia fianĉo mem, aliiginta en turmentiston per terura eraro. Pli ame ŝi karesis lian sangokovritan kapon, alpremis la mortanton al sia koro, kvazaŭ li estus ia adorinda infano. Tiam, kvamkam laŭŝajne rigida kaj nefleksebla, Saŭlo el Tarso pli klare ekvidis tiun scenon, kiu neniam elviŝiĝos el lia menso. Tenante la mortanton en sia frata sino, la junulino levis la okulojn al la Ĉielo, elmontrante la varmajn larmojn, kiuj el ili fluadis. Ŝi ne kantis, sed la preĝo venis el ŝiaj lipoj kiel la natura petego de ŝia spirito al iu amanta sed nevidebla Patro:

*Di', ho Patro de l' plorantoj,
De l' malgajaj, sklavigitaj,
Fortikaĵo de l' venkitaj,
Konsol' de ĉia sufer',*

(*) Psalmaro, 23. – Noto de la Aŭtoro.

*Kvankam en erar' ni ploras,
Kaj de l' peko nutras flamon,
Ni petegas Vian amon
El ĉi ekzil' sur la Ter'.*

*En l' afliktoj de la vojo,
En la nokto plej malhela,
Via riĉa fonto bela
Fluigas bonon sen fin';
L' eterna lumo Vi estas
De l' ĝoj' kaj paco sur Tero,
Nia pordo de l' espero,
Kie Vi akceptas nin*

*Kiam ĉio nin forlasas
En mondo de larma pano,
Kiam blovas uragano
Sur florojn de l' iluzi',
Vi, Patro, estas la lumo,
De la certeco la kanto,
De ĉiaj baroj venkanto
Kaj de l' dolor' tie ĉi.*

*En tago de nia morto,
En forlaso aŭ turmento,
Estu forges' nia sento
De l' ombro, malbon', dolor'!
Ĉe nia vesperkrepusko
Ni sentu, ke viv' alia,
Pura, lumas nin, ĉe Via
Feliĉa paco, Sinjor'!*

Kiam finiĝis la preĝo, la vizaĝo de Abigail estis malseka de ploro. Sub la dolĉa karesado de ŝiaj manoj Jeziel kvietiĝis. Neĝpaleco kune kun profunda mienserenco karakterizis lian kadavran vizaĝon. Saŭlo komprenis, ke li mortis, kaj dum la korinta junulino stariĝis plej delikate, kvazaŭ la kadavro de ŝia frato postulus la tutan zorgemon de ŝia bona spirito, la tarsi junulo kun rigida mieno alproksimiĝis kaj severe parolis:

– Abigail, estas finite, kaj ankaŭ forfinita estas ĉio inter ni ambaŭ.

La kompatinda virino terurita sin returnis. Ĉu do ne sufiĉis al ŝi la ricevitaĵ batoj? Ĉu tio estis ebla, ke ŝia amata fianĉo ne havas ian vorton de grandanima repaciĝo en tiu malfacila horo de ŝia vivo? Ŝi ricevis la plej malvarman humiligon per la morto de Jeziel kaj al tio nun lian forlason? Konsternita de ĉio, kio ŝin trafis en Jerusalemon, ŝi komprenis, ke ŝi devas uzi ĉiujn siajn fortojn, por ne subfali al la akraj elprovoj por ŝi destinitaj, kaj tuj rimarkis, ke en la fiereco de Saŭlo ŝi ne trovos konsolon. En momento ŝi ekvidis la rolon, kiun ŝi devas ludi en tia embarasa situacio. Flanken metante la virinan sentemon, ŝi kuraĝiĝis kaj digne, noble diris:

– Forfinita ĉio inter ni ambaŭ – Kial? La sufero ne devus forpeli la sinceran amon.

– Ĉu vi do min ne komprenas? – rediris la malhumila junulo. – Nia geedziĝo fariĝis neefektivebla. Mi ne povos edziĝi kun la fratino de malamiko, kies memoron mi malbenas. Mi estis nefeliĉa, elektante ĉi tiun okazon por via vizito en Jerusalemon. Mi hontas ne nur antaŭ tiu virino, kun kiu mi jam neniam povos edziĝe ligiĝi, sed ankaŭ antaŭ miaj parencoj kaj amikoj, pro la amara situacio, kiun la cirkonstancoj enmetis en mian vojon...

Abigail estis pala kaj dolore surprizita.

– Saŭlo... Saŭlo... ne hontu antaŭ mia koro! Jeziel mortis, estimante vin. Lia kadavro nin aŭskultas – ŝi afliktita akcentis. – Mi ne povas devigi vin edziĝi kun mi, sed ne turnu nian amon en surdan malamon... Estu mia amiko! Mi estas al vi eterne danka por la feliĉaj monatoj, kiujn vi ĝuigis al mi. Mi morgaŭ revenos en la domon de Rut... Vi ne hontiĝos per mi! Al neniuj mi diros, ke Jeziel estis mia frato, eĉ ne al Zeĥarja! Mi ne volas, ke iu nia amiko konsideru vin ia turmentisto.

Rigardante ŝin en tiu humila grandanimeco, la junulo el Tarso sentis impulsojn preni ŝin al la koro, kiel li farus al iu infano. Li ekvolis antaŭeniĝi, premi ŝin

al la brusto, kovri per kisoj ŝian puran, senkulpan fronton, sed subite enkuris en lian menson liaj titoloj kaj oficoj; li ekvidis Jerusalemon ribelinta, nigriganta lian reputacion per amaraj ironioj. La estonta rabeno ne povos esti venkita; la instruisto de la rigida, neelpetebla Leĝo devos por ĉiam sufoki la homon.

Elmontrante nekortuŝitecon, li per kruda tono re-diris:

– Mi akceptas vian silenton pri la hodiaŭaj bedaŭrindaj okazaĵoj; vi morgaŭ revenos en la domon de Rut, sed ne esperu, ke mi daŭrigos miajn vizitojn, eĉ ne el nepravigebla ĝentileco, ĉar, laŭ la sincereco de la homoj de nia raso, kiu ne estas amiko, tiu estas malamiko.

La fratino de Jeziel ricevis tiujn klarigojn kun profunda mirego.

– Vi do min tute forlasas? – ŝi demandis kun larmon.

– Vi ne estas forlasita – li necedeme respondis –, vi havas viajn amikojn ĉe la vojo al Jafo.

– Sed, unuvorte, kial vi tiel furioze malamis mian fraton? Li estis ĉiam bonkora... En Korinto li neniam iun ofendis.

– Li estis predikanto de la malbeninda nazareta ĉarpentisto – li kolere kaj krude rediris –; krom tio li humiligis min antaŭ la tuta urbo.

Premata de la severeco de liaj respondoj, Abigail tute eksilentis. Kian povon havas tiu Nazaretano, ke li altiras al si tiom da aldonitaj kaj estigas tiom da malamantaj? Ĝis tiam ŝi ne interesiĝis pri la persono de la fama ĉarpentisto, kiu mortis sur kruco kiel krimulo, sed ŝia frato diris al ŝi, ke li trovis en tiu la Mesion. Se la Kristo allogis tian kristalan karakteron, kiel Jeziel, li do ne povis esti ia ordinarulo. Ŝi rememoris la pasintecon de sia frato, por konsideri, ke, ĉe la indigno de sia patro, li sukcesis tenadi sin super la sangligiloj mem kaj ame admonis la maljunulon. Se Jeziel estis sufiĉe forta kaj analizis la patrajn agojn kun la preciza saĝo, tiu Jesuo certe estis tre granda, por ke la frato sin dediĉu al li, oferante al li sian vivon mem post la ricevo

de sia libereco. Laŭ ŝia opinio Jeziel ne eraras; detempe de sia naskiĝo konante lian temperamenton, ŝi trovis ne eble, ke li lasis sin trompi rilate siajn religiajn konvinkojn. Ŝi nun sentis sin altirita de tiu nekonata kaj maljuste malamata Jesuo. Ĉi tiu instruis ŝian fraton ami la turmentantojn mem; kion do li povus doni al ŝia koro, soifanta kareson kaj pacon! La lastaj vortoj de Jeziel faris sur ŝin grandegan influon.

Absorbite de profunda meditado, ŝi ekvidis, ke Saŭlo malfermis la pordon kaj vokis kelke da helpantoj, kiuj alkuris, por plenumi liajn ordonojn. En nemulte da minutoj la restaĵoj de Stefano estis forportitaj, dum multenombraj amikoj, elverŝante sian parolemon kaj gajhumoraj, ĉirkaŭis la junan paron.

– Kio ĉi tio estas? – demandis unu el ili Abigailon, rimarkinte, ke ŝia tuniko estas makulita de sango.

– La kondamnito estis izraelido – rapidis respondi la tarsi junulo, dezirante antaŭveni al ŝi pri klarigoj – kaj, kiel tian, ni helpis lin en la ekstrema horo.

Pli severa rigardo komprenigis al la junulino, kiel forte ŝi devas reteni siajn emociojn, for kaj super la efektivaj okazaĵoj.

Post nelonge la maljuna Gamaliel alvenis kaj petis de sia eksinstruato kelke da minutoj de aparta atento.

– Saŭlo – li bonkore diris –, mi esperas en la plej proksima semajno foriri trans Damaskon. Mi iros ripozi ĉe mia frato kaj uzi la nokton de la maljuneco, por mediti kaj ripozigi la spiriton. Mi pri tio jam sciigis la Sinedrion kaj la Templon, kaj mi pensas, ke vi post nemulte da tagoj efektive ekokupos mian oficon.

La alparolito faris supraĵan geston de danko, kies malvarmeco apenaŭ kaŝis la deprimecon, kiu konsumis lian animon.

– Tamen – kore daŭrigis la nobla rabeno – mi havas lastan peton al vi, konsiderante, ke Simon Petro estas mia amiko; ĉi tiu konfeso vin eble skandalas, sed por mi estas agrable ĝin fari. Nu, mi ĵus ricevis lian viziton, kiam li petis mian interhelpon, ke la kadavro de la hodiaŭa viktimo estu donita al la eklezio de la “Vojo”,

kie ĝi estos tre kore enterigita. Mi estas la peranto de lia peto kaj esperas, ke vi ne rifuzos al mi ĉi tiun komplezon.

– Vi diras “viktimo”? – demandis Saŭlo kun miro.
– La ekzisto de ia viktimo supozigas ian turmentanton, kaj mi estas turmentato de neniu. Mi ja defendis la Leĝon ĝis la fino.

Gamaliel komprenis lian kontraŭparolon kaj rediris:

– Ne vidu en miaj vortoj eĉ ombbron da riproĉo. Nek la tempo nek des malpli la loko taŭgas por diskutado. Sed por ne dekliniĝi de la sincereco, kiun vi ĉiam en mi vidis, mi devas mallonge diri al vi, ke mi iom post iom venas al iaj konkludoj pri la tiel nomata nazareta ĉarpentisto. Mi jam longe mature meditadas pri lia verko inter ni, sed mi estas tro maljuna kaj kaduka, por iniciati ian ajn renovigan movadon ĉe la judoj. En nia ekzistado estas fazo, en kiu ne estas al ni permesite enmiksiĝi en la kolektivajn demandojn, sed en ĉia aĝo ni povas kaj devas entrepreni la klerigon aŭ perfektigon de ni mem. Tion mi nun faros. La dezerto, en la silenta majesteco de la izoliteco, estis ĉiam la alloga objekto de niaj prauloj. Mi eliros el Jerusalem, mi forkuros de la skandalo, kiun miaj novaj ideoj kaj agoj certe naskus; mi iros en la solulecon, por trovi la veron.

Saŭlo el Tarso estis perpleksa. Ankaŭ Gamaliel laŭŝajne ricevis influon de strangaj sorĉaĵoj! La homoj de la “Vojo” sen ia dubo lin sorĉis kaj disbatis liajn lastajn fortojn, kaj la maljuna majstro fine kapitulacis, prenante teniĝon kun neantaŭvideblaj sekvoj! Saŭlo jam estis preta oponi, diskuti, voki lin en la realecon, sed la respektinda mentoro de la farisea junularo, komprenigante, ke li perceptas la kontraŭajn vibrojn de lia flama spirito, diris:

– Mi jam scias la enhavon de via intima respondo. Vi opinias min malfortanima, venkita: nu, ĉiu analizas tiel, kiel li kapablas, sed ne entiru min en la enuon de la kvereloj. Mi estas ĉi tie, nur por peti de vi komplezon, kaj mi esperas, ke vi ĝin ne rifuzos al mi. Ĉu mi povos

fari la necesajn paŝojn, por tuj forporti la restaĵojn de Stefano?

Oni vidis, ke la tarsi junulo, premata de strangaj pensoj, ŝanceliĝas.

– Konsentu, Saŭlo! Ĝi estas la lasta komplezo al la malnova amiko!

– Mi konsentas – li fine diris.

Gamaliel adiaŭis lin kun gesto de sincera danko.

Denove ĉirkaŭita de multe da amikoj, kiuj penis ĝojigi lin, la juna leĝisto montriĝis tute senkonscia. Li vane levadis la pokalon de la tostoj. La disvaganta, melankolia rigardo vidigis la profundan memapartiĝon, en kiu li dronis for de la mondo. La neantaŭviditaj okazaĵoj naskis en lia menso ian svarmon da premantaj pensoj. Li volis pensi, li deziris retiriĝi en sin mem por la necesa esplorado de la novaj perspektivoj de sia destino, sed ĝis la sunsubiro li devis obeadi la sociajn konvenciojn, kompaniante al siaj amikoj ĝis la fino.

Pretekstante la bezonon ŝanĝi siajn sangomakulitajn vestojn, Abigail foriris tuj post la vizito de Gamaliel, sed en la domo de Delila la kompatinda junulino estis atakita de alta febro, kio naskis ĉe ĉiuj en la domo kompaton kaj maltrankvilon.

Ĉe vesperiĝo Saŭlo revenis al la hejmo de sia fratino, kie oni sciigis lin pri la malsano de Abigail.

Decidinte konduki sian vivon laŭ aliaj vojoj, li penis sufoki sian emocion, por konsideri la faktojn kiel eble plej nature.

Plorante, la junulino el Korinto, timante pri la irado de la malsano, petis, ke oni rekonduku ŝin en la domon de Zeharja. Delila kaj la parencoj vane penis per amplenaj rimedoj deadmoni ŝin de tio. La petego de Abigail al la energia spirito de Saŭlo estis tiel kortuŝanta, ke, laŭ la severeco, kiu karakterizis lian konduton, la ekslernanto de Gamaliel faris ĉiujn disponojn, por ŝin kontentigi, kaj ĉe vesperiĝo modesta veturito tre zorge eliris el Jerusalemo laŭ la vojo al Jafao.

Rut, kun emocio kaj aflikto, akceptis la junulinon kun malfemitaj brakoj. Ŝi kaj ŝia edzo tiam rememoris, ke nur ĉe la morto de la patro Abigail havis tiel altan febron kaj tiel profundan konsumitecon. Kun malluma vizaĝo Saŭlo ilin aŭdadis, penante maski sian emociion. Kaj dum la amikoj de la junulino klopodis, por ŝin ame flegi, la estonta rabeno, dronante en nebulego da interkontraŭaj pensoj, direktis sin al Jerusalem, intencante neniam plu reveni al tiu domo.



Abigail kristaniĝinta

De post la martirigo de Stefano pliakriĝis en Jerusalema la persekutado al ĉiuj disĉiploj aŭ simpatiantoj de la “Vojo”. Kvazaŭ sub ia efektiva halucino, Saŭlo el Tarso, anstataŭinte Gamalielon en la plej gravaj religiaj funkcioj en la urbo, lasis sin fascini de sugestioj de krula fanatikeco.

Senidulgaj enketoj estis farataj pri ĉiuj familioj, kiuj elmontris inklinton kaj simpatian por la ideoj de la nazareta Majstro. La modestan eklezion, kie la bonkor-eco de Petro ĉiam ankoraŭ helpadis tiujn pli malfeliĉajn, severe gardis soldatoj kun la ordono malpermesi la predikojn, kio estis la dolĉa konsolo de la nefavoritoj de la sorto. Obsedite de la penso defendi la farisean sanktan proprajon, la tarsi junulo sin fordonadis al la plej grandaj eksceso kaj tiranaĵoj. Virtaj homoj estis elpelitaj el la urbo pro nuraj suspektoj. Honestaj laboristoj kaj eĉ famiilestrinoj estis pridemandataj en skandalaj publikaj procesoj, kiujn la persekutanto nepre volis starigi. Komenciĝis grandmezura elmigro, kian Jerusalema de longe ne vidis. La urbo ekfariĝis sen laboristoj. La “Vojo” altiris al siaj dolĉaj konsoloj la animon de la popolo, lacan de nekomprenejo kaj sinofero. Libera de la influhavaj admonoj de Gamaliel, kiu sin retiris en la dezerton, kaj sen la ama helpado de Abigail, kiu havigis al li noblajn inspirojn, la estonta rabeno ŝajnis ia frenezulo, en kies brusto la koro estus ŝtoniĝinta. Sendefendaj virinoj vane petadis de li kompaton; mizer-egaj infanoj senutile petis indulgon por la gepatroj, forlasitaj kiel malfeliĉaj malliberigitaj.

La junulo el Tarso ŝajnis potencata de ia krima indifereco. Eĉ la plej sinceraj petegoj renkontis en lia spirito ian akraĵan rokon. Nekapabla kompreni la cirkonstancojn, kiuj ŝanĝis liajn planojn kaj esperojn en la vivo, li imputis la fiaskon de siaj junulaj revoj al tiu Kristo, kiun li ne sukcesis kompreni. Tiun li ja malamos tra sia tuta vivo. Ne povante trovi lin, por fari rektan venĝon, li tiun por ĉiaj rimedoj persekutos en la persono de ties sekvantoj. En liaj okuloj tiu estis, tiu senfama ĉarpentisto, la kaŭzinto de lia malsukceso rilate al la amo de Abigail; tiun amon nun venenis en lia impulsigema koro strangaj sentoj, kiuj tago post tago fosadis profundajn abismojn inter ŝia neforgesebla figuro kaj la rememoroj por li plej dolĉaj. Li neniam plu iris al la domo de Zeĥarja; kvankam tiuj amikoj, loĝantaj ĉe la vojo al Jafo, insistis por ekhavi sciigojn pri li, tamen li sin tenadis necedema en la rondo de sia sufokanta egoismo. De tempo al tempo li sentis sin premata de ia stranga resopiro. Li forte suferis de la manko de la karesoj de Abigail, kies bildo neniam forviŝiĝis de lia hardiĝinta kaj sopiranta animo. Nenia virino povus anstataŭi ŝin en la amo de lia koro. Ĉe ekstremaj turmentoj li rememoris la agonion de Stefano, ties enviindan pacon de la konscienco, ties vortojn de amo kaj de pardono; poste li ekvidis sian fianĉinon genuantan, petantan de li helpon kun lumo de nobleco en la petegantaj okuloj. Li ja neniam forgesos tiun afliktan kaj kortuŝantan preĝon, kiun ŝi eldiris, brakumante sian fraton en la lastaj momentoj de lia vivo. Malgraŭ la kruela persekutado, kiu faris lin la motoro de ĉiuj agoj kontraŭ la humila eklezio de la “Vojo”, Saŭlo sentis multiĝadi la spiritajn bezonojn en la animo, soifanta konsolon.

Kiam ok monatoj da senĉesaj luktoj pasis super la morto de Stefano, la tarsi junulo, kapitulacante antaŭ la resopiro kaj la amo, kiuj superregis lian animon, decidis revidi la florriĉan pejzaĝon de la vojo al Jafo, kie li certe regajnos la amon de Abigail kaj tiel ili rearanĝos ĉiujn projektojn de feliĉa estonteco.

Kun premata koro li ekprenis sian ĉareton. Kian teruran hezidadon li devis venki, ĉu reveni, aŭ ne, al la

iama situacio, humiligante la vantecon de konvenciamaj kaj nefleksebla viro! La krepuska lumo superverŝis la Naturon per rebriloj de fajranta oro. Tiu intense blua ĉielo, tiu senkultura verdaĵo, la karesa venteto de la sunsubira horo, estis tiaj samaj. Li sentis sin revigliĝinta. Ankaŭ revoj kaj esperoj estis ĉiam ankoraŭ la samaj. Li pensadis pri la plej bona maniero rehavi la korinklinon de la elektita virino, ne humiligante sian vantamon. Li rakontos al ŝi sian malesperon, siajn sendormajn noktojn, la ĉiamecon de lia grandega amo, kiun nenio sukcesis detruiri. Kvankam li tenadis senŝanĝa sian intencon eĉ ne vorteton diri pri la nazareta ĉarpentisto, li tamen sciigos Abigailon pri la riproĉo de sia konscienco, ke li ne etendis al ŝi amikajn manojn en tiu momento, kiam ŝanceliĝis ĉiuj esperoj de ŝia animo de virino ĉe la neantaŭvidita dolora morto de ŝia frato en tiaj amaraj cirkonstancoj. Li klarigos la detalojn de siaj sentoj. Li ja diros, ke li ĉiam memoras pri ŝia angora kaj varma preĝo, dum tiuj momentoj, kiam Stefano trapasis la sojlon de la morto. Li tiros ŝin al sia koro, kiu ŝin neniam forgesis, li kisos ŝiajn harojn, li teksos novajn projektojn de amo kaj feliĉo.

Dronante en tiaj pensoj, li atingis la enirpordon, ĉe kiu li rekonis la florantajn rozarbetaĵojn.

Lia koro sentakte batis, kiam Zeharja forte surprizite aperis. Longedaŭra brakumo signis ilian revidiĝon. Abigail estis la temo de lia unua demando. Kun miro li rimarkis, ke Zeharja malĝojiĝis.

– Mi pensis, ke iu el viaj amikoj jam portis la via malagrablan sciigon – li komencis dirante, dum la junulo lin sopire atentis. – Abigail antaŭ pli ol kvar monatoj malsaniĝis je la pulmoj, kaj, sincere parolante, ni havas neniom da espero pri ŝia resaniĝo.

Saŭlo estis nun palega.

– Tuj kiam ŝi rapidece revenis el Jerusalemo, ŝi pli ol monaton baraktis inter vivo kaj morto. Mi kaj Rut, ni ambaŭ vane klopodis, por ke ŝi ricevu la viglecon kaj la vizaĝoruĝon de la juneco; la kompatinda ekvelkis kaj baldaŭ iris senforta en la liton. Mi sopire petis pri via ĉeesto, por ke vi faru ĉion eblan por ŝi, sed vi ne

venis. Ŝajnis al mi, ke iu nova medio ŝin resanigus, sed mankis al mi rimedoj por pli ampleksa entrepreno, kiel estis necese.

– Sed, ĉu Abigail iamaniere plendis kontraŭ mi? – demandis Saŭlo afliktita.

– Tute neniel. Ŝia neatendita reveno el Jerusalemo, ŝia subita malsaniĝo kaj via nepreavigebla foriĝo for de ĉi tiu domo naskis ĉe ni dubojn kaj timojn, sed post la pli akra fazo de la febro ŝi tuj efektive ekfartis pli bone, kaj ŝi nin trankviligis pri tio. Ŝi klarigis vian bezonon foresti, dirante, ke ŝi scias pri viaj multaj politikaj okupiĝoj kaj taskoj; ŝi danke parolis pri la akcepto, kiun viaj parencoj faris al ŝi, kaj kiam Rut, por konsoli ŝin, kvalitigas sendanka vian konduton, Abigail tuj elpaŝas, por vin defendi.

Saŭlo ekdeziris diri ion, dum Zeharja iom haltis, sed nenio venis al li en la kapon. La emocio, kiun al li kaŭzis la spirita nobleco de lia amata fianĉino, paralizis lian pensadon.

– Malgraŭ ŝia klopodo por nin trankviligi – daŭrigis la edzo de Rut –, ni havas la impreson, ke nian adoptitan filinon regas profundaj ĉagrenoj, kiujn ŝi penas kaŝi. Dum ŝi povis iradi, ŝi vizitadis la persikarbojn en tiu sama tempo, kiam ŝi kutime ĝin faradis kune kun vi. En la komenco mia edzino surprizis ŝin ploranta en la ombro de la nokto, sed ni vane penis ekscii la kaŭzon de ŝiaj intimaj suferoj. La sola motivo, kiun ŝi prezentis, estis ĝuste la malsaneco, kiu ekkonsumis ŝian organismon. Post kelka tempo ĉi tie pasigis unu semajnon mizera maljunulo, nomata Ananias, kaj tiam okazis io stranga: Abigail vidis lin en la domo de niaj farmantoj kaj ĉiun posttagmezon aŭdadis lin tutajn horojn; de tiam ŝi ekmontris grandan animfortecon. Ĉe ŝia adiaŭo la almozulo donacis al ŝi kiel memorigaĵon iom da paperaĵoj kun la instruoj de la fama ĉarpentisto el Nazaret...

– De la ĉarpentisto? – interrompis Saŭlo kun videbla ĉagreno. – Kaj poste?

– Ŝi fariĝis fervora legantino de la tiel nomata Evangelio de la galileanoj. Ni konsideris, kiel konsilinde estus fortiri ŝin de tia spirita novaĵo, sed Rut rimarkigis,

ke tio estas nun ŝia sola distraĵo. Efektive, de kiam ŝi komencis paroli pri la pridiskutata Nazareta Jesuo, ni rimarkis, ke Abigail ricevis profundan konsolon, kaj ja ni neniam plu vidis ŝin plori, kvankam ne estingiĝis en ŝia konsumita mieno la dolora esprimo de amareco kaj melankolio. De tiam ŝajnas, ke ŝia konversacio ricevis aliajn inspirojn. Ŝia doloro sin turnis en konsolan esprimon de intima ĝojo. Pri vi ŝi parolas kun ĉiam pli pura amo. Ŝi faras la impreson, kvazaŭ ŝi eltrovis en la misteraj faldoj de la animo la energion de ia nova vivo.

Post spirĝemo Zeharja finis:

– Tamen tiu ŝanĝiĝo ne retenis la iradon de la malsano, kiu ŝin iom post iom konsumas. Kun ĉiu tago ni vidas ŝin klini sin al la tombo simile al floro, kiu defalas de la tigeto ĉe la blovo de forta vento.

Saŭlo travivis nekaŝeblan angoron. Peza emocio taŭzis lian kaprican kaj senteman animon. Al kio decidiĝi? Turmentaj demandoj frakasis lian spiriton. Kiu ja estas tiu Jesuo, kiu aperas antaŭ li ĉie? La interesiĝo de Abigail pri la persekutata Evangelio montris la venkon de la nazareta ĉarpentisto, kontrastantan kun la revoj mem de lia juneco.

– Sed, Zeharja – demandis galhumore la leĝisto el Tarso –, kial vi ne malhelpis tian kontakton? Tiuj sorĉantaj maljunuloj trairadas la vojojn, dissemante konfuzon. Tiu via cedo miregigas min, ĉar nia fideleco al la Leĝo ne konsentas aŭ almenaŭ neniam devas konsenti cedojn.

La alparolito ricevis la riproĉon serene kaj akcente rediris:

– Antaŭ ĉio estas grave konsideri, ke mi vane petis la helpon de via ĉeesto, por orientiĝi. Cetere, kiu kuraĝus rifuzi la medikamenton al amata malsunulo? De kiam mi vidis ŝian sanktan rezignacion, mi decidis ne paroli pri ŝiaj novaj vidpunktoj en la kadro de religia kredo.

Kaj ĉar Saŭlo dronis en profunda meditado, ne sciante, kion respondi, tiu bonkorulo finis:

– Venu kun mi, vi vidos per viaj propraj okuloj!

La junulo ŝanceliĝe sekvis ties paŝojn. La pensoj

valsadis en lia doloranta cerbo. Tiuj neatenditaj sciigoj venenis lian koron.

Surdorse kuŝante sur la lito, flegate de la patrineca amo de Rut, la junulino el Korinto montris en la mieno profundan senfortiĝon. Pro ŝia altgrada malgrasiĝo la haŭto ricevis eburan koloron, sed la hela rigardo travidigis absolutan spiritan trankvilecon. Ĉiela sereneco stampiĝis en ŝia malgaja mieno. Iam kaj iam reaperadis la dispeo, akompanata de longedaŭra aflikto, kaj tiam ŝi sin turnadis al la malfermita fenestro, kvazaŭ de tie atendante ian helpilon por sia laceco per la malvermeta venteto, venanta el la malavara sino de la Naturo.

Ekvidinte ŝin, Saŭlo ne kaŝis sian miregon. Siaflanke la junulino, ricevinte tiun agrablan surprizon, estis ekposedita de sincera kaj elverŝiĝanta ĝojo.

Aman saluton ambaŭ interŝanĝis, dum la okuloj esprimis la premantan sopiron, kun kiu ili atendis tiun momenton. La estonta rabeno ekkaresis ŝiajn delikatajn manojn, kiuj nun ŝajnis modlitaj el diafana vakso. Ili parolis pri la espero, kiu ilin kuraĝigis antaŭ la revidiĝo. Rimarkinte, ke ili deziras esti solaj, por pli libere konfidenci, Zeharja kaj Rut diskrete foriris.

– Abigail! – forte emociite ekkriis Saŭlo, tuj kiam ili estis solaj – Mi forĵetis de mi mian fieron kaj mian vantamon de politikisto, por veni ĉi tien demandi, ĉu vi pardonis min, ĉu vi min ne forgesis!

– Forgesi vin? – ŝi respondis kun malsekaj okuloj – Kiel ajn akra kaj longedaŭra la tempo de varma suno, la folio en la dezerto ne povas forgesi la bonfaran pluvon, kiu donis al ĝi vivon. Ne parolu al mi ankaŭ pri pardono, ĉar ĉu iu povas pardoni sin mem? Ni ambaŭ, Saŭlo, apartenas unu al la dua por eterne. Ĉu mi ne estis la koro de via cerbo, kiel vi ofte diris al mi?

Aŭdante la karesan tembron de tiu amata voĉo, la tarsa junulo emociiĝis en la profundo de sia flamiĝema animo. Tiu humileco kaj tiu karestono penetris lian koron, rehavigante al li la prudenton por la rekta vojo.

Tenante inter la siaj la blankajn manojn de sia fianĉino, li ekkriis kun ekfulmo de ĝojo en la okuloj:

– Kial vi diras, ke vi “estis” la koro, se vi ankoraŭ estas kaj por ĉiam estos? Dio benos niajn esperojn. Ni efektivigos nian idealon. Mi revenis, por forkonduki vin kun mi. Ni ja havos hejmon kaj en ĝi vi estos la reĝino!

Regata de nedifinebla ĝojo, lia fianĉino, kiu kun larmoj lin rigardadis, murmuris:

– Mi suspektas, Saŭlo, ke la surteraj hejmoj ne estas faritaj por ni! Dio scias, kiel varme mi deziris esti la amanta patrino de viaj infanoj, kiel zorge mi konservis la idealon super ĉiaj cirkonstancoj, por beligi vian ekzistadon per miaj karesoj! De mia knabineco, en Korinto, mi vidis virinojn, kiuj ĝuegadis tiujn ĉielajn trezorojn, reprezentatajn de la amo de la edzo kaj infanoj, kaj mi pensis, ke la Sinjoro donos al mi tiun saman riĉaĵon el diaj esperoj, ĉar mi atendis la benojn de la hejma sanktejo, por glori lin el mia tuta koro. Por laŭdi lin mi idealigis al mi la vivon de la amata viro, kiu helpus al mi starigi la altaron de la idaro, kaj tuj kiam vi venis mi organizis vastajn planojn de ia sankta kaj feliĉa vivo, en kiu ni povus honori Dion.

Saŭlo ŝin aŭskultis kortuŝita. Neniam antaŭe li vidis en ŝi tian grandan rezonvastecon per tia tono de trankvila koreco.

– Sed la Ĉielo – ŝi daŭrigis plena de rezignacio – fortranĉis de mi ĉian eblon ĝui tian feliĉon sur la Tero. Dum miaj unuaj tagoj de soluleco mi vizitis senhomajn lokojn, kvazaŭ serĉante vin, strebante al la helpo de via amo. Niaj plej amataj persikarboj kvazaŭ diradis, ke vi neniam revenos; la amika nokto konsilis al mi forgeson; la lunlumo, kiun vi min instruis ami, plifortigis miajn rememorojn kaj malpliigis miajn esperojn. El tiu ĉiu-vespera rondirado mi revenis kun elfluantaj larmoj, fruktoj de la malespero de la koro. Mi vane sopiris al via konsola parolo. Mi sentis min profunde sola. Por rememori kaj observi viajn admonojn, mi revenigis en mian spiriton vian atentigon al mi, ĉe la lasta fojo, kiam ni intervidiĝis, pri la amikeco de Zeĥarja kaj Rut. Estas vero, ke mi ne havas amikojn pli fidelajn kaj noblajn, ol ili, tamen mi ne povus esti por ili pli granda ŝarĝo, ol mi estas. Mi do miajn suferojn ne konfidis al ili. Dum

la unuaj monatoj de via foresto mi senkonsole travivis mian grandan malfeliĉon. Tiam aperis ĉi tie respektinda maljunulo, nomata Ananias, kiu konigis al mi la sanktan lumon de la nova revelacio. Mi ekkonis la historion de la Kristo, la Filo de la Vivanta Dio; mi avide legis lian elaĉetan Evangelion, mi ricevis edifon el liaj ekzemploj. De tiu momento mi vin pli bone ekkomprenis, konante mian propran situacion.

Subite atako de tuso rompis ŝian rakontadon.

La vortoj de lia fianĉino falis en lian koron kvazaŭ gutoj el galo. Li neniam antaŭe spertis tiel akran moralan doloron. Vidante la naturan sincerecon, la dolĉan korecon de ĉi tiuj konfesoj, li sentis sin pikata de akraj riproĉoj de la konscienco. Kiel li povis tiel malnoble forlasi tiun virinon elektitan de lia animo, forgesante ŝian fidelecon kaj amon? Kiel ekposedis lin tia krueleco, ke li forgesis tiel sanktajn devojn? Nun li trovis ŝin konsumita, jam ne esperanta realigi sur la Tero siajn junulinajn revojn. Krom tio ŝajnis, ke la malamata ĉarpentisto okupas lian lokon en la koro de lia adorata fianĉino. En tiu momento li ne nur ekdeziris frakasi ties doktrinon kaj adeptojn, sed ĵaluzis kontraŭ tiu en la kaprica animo. Kian potencon povas disponi tiu nazaretano senfama kaj martirigita sur la kruco, por konkeri la plej purajn sentojn de lia karesema fianĉino?

– Abigail – li emociita diris –, forlasu la malgajajn ideojn, kiuj povus veneni la revojn de nia juneco. Ne fordonu vin al iaj iluzioj. Ni renovigu niajn esperojn. Vi bladaŭ estos resaniĝinta. Mi scias, ke vi pardonis al mi la morton de via frato, kaj mia familio akceptos vin kun sincera ĝojo en Tarso. Ni estos feliĉaj, tre feliĉaj!

Liaj okuloj kvazaŭ ŝvebis en ia regiono el ĉarmaj revoj, penante revigliĝi en tiu amata koro siajn projektojn por ia surtera feliĉeco. Sed ŝi, kunmiksante ridetojn kaj larmojn, rediris:

– Sincere parolante, kara, ankaŭ mi dezirus revivi! Esti via, interplekti viajn junulajn revojn, forĝi stelojn por la ĉielo de via ekzistado: ĉio ĉi konsistigas mian idealon de virino! Ha, se mi povus, mi plena irus al viaj parencoj, mi ja ilin konkerus por mia koro per granda

koralligiĝo, sed mi antaŭsentas, ke la planoj de Dio estas aliaj rilate al niaj destinoj. Jesuo vokis min en sian spiritan familion...

– Ve al mi! – ekkriis Saŭlo, interrompante ŝian parolon. – Ĉie mi renkontas ion rilatan al la nazareta ĉarpentisto! Kia plago! Ne ripetu tion. Dio ne estus justa, se Li forprenus vin de mia amo. Kiu do povas, kiel tiu Kristo, sin intermeti kontraŭ niaj planoj?

Sed Abigail fiksas sur li petegan rigardon kaj diris:

– Saŭlo, kion utilus al ni malespero? Ĉu ne estus pli bone, se ni pacience kliniĝus antaŭ la sanktaj decidoj? Ni ne nutru malutilajn dubojn. Ĉi tiu lito estas lito de meditado kaj morto. La sango jam plurajn fojojn elfluegis el mia buŝo, anoncanta la finon, sed ni kredas al Dio kaj scias, ke tiu fino estas sole nur de la korpo. Nia animo ja ne mortos, ni nin reciproke eterne amos...

– Mi ne konsentas – li treege afliktita respondis –, tiaj supozoj estas frukto de absurdaj instruoj, kiaj la predikoj de tiu fanatika nazaretano, kiu mortis sur la kruco inter humiliĝo kaj malbraveco. Vi neniam tia estis, melankolia kaj senkuraĝa; nur la galileaj sorĉaĵoj povus konvinki vin pri tiaj pereigaj absurdoj. Penu rezoni per vi mem! Kion alian donis al vi tiu krucumito, ol malĝojon kaj senkuraĝecon?

– Vi eraras, Saŭlo! Mi ne sentas min senkuraĝa, kvankam konvinkita pri la neebleco de mia surtera feliĉeco. Jesuo estis ne ia vulgara lertulo pri sorĉaĵoj, sed la Mesio, disdonanta konsolon kaj vivon. Lia influo renovigis miajn fortojn, kuraĝigis min kaj igis min efektive kompreni la diajn planojn. Lia Evangelio de pardono kaj amo estas la dia trezoro de la suferantoj kaj nefavoritoj de la mondo.

La junulo ne sukcesis kaŝi la incitiĝon, kiu mordis lian animon.

– Ĉiam tiu sama rediraĵo – li diris konfuzita –, tiu sensanĝa aserto, ki li venis por la malfeliĉaj, la malsanaj, la neprotektataj de la fortune. Sed la triboj de Izrael ne konsistas nur el tiaj homoj; kaj la sanaj homoj de la elektita popolo? kaj la familioj kun respektindaj tra-

dicioj? Ĉu ili troviĝas ekster la influo de la Savinto? (*)

– Mi jam de longe legadas la instruojn de Jesuo – per firma tono respondis la junulino – kaj mi pensas, ke mi komprenas viajn kontraŭparolojn. Plenumante la sanktan parolon de la profetoj, la Kristo malkaŝis al ni, ke la vivo estas ia tutaĵo el noblaj celadoj de la animo, por ke ni iru al Dio laŭ rektaj vojoj. Ni ne povas koncepti la Kreanton kvazaŭ ian senfaran kaj izolitan juĝiston, sed ja kiel Patron, sin plej ame donantan al la bono de Siaj infanoj. La sanaj homoj, pri kiuj vi parolas, tiuj liberaj de malsanoj kaj suferoj, havantaj la realan benon de Dio, devis esti filoj laboremaj, interesigantaj pri la produktado de la tasko, al kiu ili estas vokitaj por la feliĉo de siaj fratoj, sed en la mondo kontraŭ niaj superaj inklinoj staras la malamiko, kiu nestas en nia koro. Egoismo atakas la sanon, ĵaluzo malutilas la dian komision, simile kiel la rusto kaj la tineo detruas niajn vestojn kaj ilojn, kiam ni estas nezorgemaj. Malmultaj en la gajaj tagoj de abundeco ekpensas pri la dia protekto, kaj ankaŭ tre malmultaj laboras sen la instigo de ia sprono. Ĉi tio pruvas, ke la Kristo estas gvidilo por ĉiuj, konsolo por la plorantoj kaj kompasoj por la saĝaj animoj, vokitaj de Dio por kunhelpi al la sanktaj laboroj de bonfarado.

Saŭlo miregis tiun klarecon de rezondao. Sed la konversacio postulis de la malsanulino pli grandan penon kaj sekvan laciĝon. La spirado fariĝis malfacila kaj baldaŭ la sango abunde ekfluis el ŝia buŝo. Tiu suferado, ornamita de kormildeco kaj humileco, profunde emociis kaj incitis ŝian fianĉon. Li komprenis, ke estus kruele ataki antaŭ la fianĉino tiun Jesuon, kiun li devis persekuti ĝis plena ekstermo. Li ne volis kredi, ke lia Abigail jam staras per unu piedo en la tombo. Li preferis rigardi la estontecon kun optimismo. Kiam ŝi resaniĝos, li igos ŝin reveni al siaj iamaj vidpunktoj. Li ne toleros la enmiksigon de la Kristo en ilian hejmon. Tamen en tiu introspekta esplorado li konkludis, ke li devas iom reteni

(*) *Jesuo*, en la hebrea lingvo, signifas *Savinton*. – *La trad.*

siajn kontraŭajn pensojn, por zorgi pri la esencaj demandoj de sia trankvileco mem. Post tiu krizo, kiu daŭris longajn kaj malgajajn minutojn, la grandaj okuloj de la juna malsanulino estis serenaj kaj helaj. Longe rigardante ŝin kun tiu dolĉa teniĝo de ekstrema rezignacio, Saŭlo el Tarso spertis intimajn kortuŝantajn skuojn. Lia flamiĝema temperamento facile sin fordonadis al ekstremaj impresoj. Pli alproksimiĝante al al amata fianĉino, li havis okulojn malsekajn de ploro. Li ekdeziris karesi ŝin, kiel li karesus infanon.

– Abigail – li ame murmuris –, ni ne parolu plu pri religiaj aferoj. Pardonu min! Ni pensu pri nia floranta estonteco, ni forgesu ĉion, por plifirmigi niajn esperojn.

Kaj la vortoj elŝprucadis el lia buŝo, ardante de emocio. La koreco, kiun ili travidigis, estis signo de lia pento kaj de la noblaj kaj sinceraj aspiroj, kiuj nun agitigis en lia afliktita spirito. Dume, posedita de forta konsumiteco post tiu fortostreĉo, la junulino el Korinto timis daŭrigi la konversacion pro la atakoj de tuso, kiuj ŝin ofte minacis. Ŝia fianĉo, maltrankvila, komprenis la situacion kaj, premante ŝiajn diafanajn manojn, ilin kortuŝite kisis.

– Vi bezonas ripozon – li kore diris –, ne maltrankviliĝu pri mi. Mi donos al vi miajn proprajn fortuojn. Vi baldaŭ estos resaniĝinta.

Kaj ĉirkaŭvolvinte ŝin per rigardo plena de danko kaj ekstrema dolĉeco, li finis:

– Mi vidos vin denove ĉiujn vesperojn, kiam mi povos foriĝi de Jerusalemo, kaj tuj kiam vi povos, ni revidos la lunlumon en la ĝardenon, por ke la Naturo benu niajn revojn antaŭ la okuloj de Dio.

– Jes, Saŭlo – ŝi per trenata voĉo rediris –, Jesuo donos al ni la plej bonan. Kiel ajn ĝi estas, vi tamen ĉiam estos en mia koro, ĉiam, ĉiam...

La leĝisto estis adiaŭonta, sed ekrimarkis, ke lia fianĉino diris al li nenion pri sia frato. La nobleco de tiu prisilentado lin impresis. Li preferus esti akuzata, pridiskuti la aferon kun ĉiuj ĝiaj doloraj cirkonstancoj, por ankaŭ prezenti sian senkulpigon, sed anstataŭ riproĉ-

oj li trovis karesojn, anstataŭ mallaŭdoj noblan trankvilecon, per kiu la mildkora junulino povosciis kaŝi la profundajn vundojn, kiuj mordis ŝian animon.

– Abigail – li iom hezite diris –, antaŭ ol foriri, mi dezirus sincere ekscii, ĉu vi pardonis al mi la morton de Stefano. Mi neniam plu povis paroli al vi pri la premantaj cirkonstancoj, kiuj kondukis min al tia bedaŭrinda fino, tamen mi estas konvinkita, ke via bonkoreco forgesis tiun mian eraron.

– Kial vi rememoras ĉi tion? – ŝi rediris, penante tenadi la voĉon firma kaj klara. – Mia animo estas nun trankvila. Jeziel staras ĉe la Kristo kaj mortis postlasante al vi amikan penson. Kion mi de mia flanko povus plendi, se Dio ĉiam estas tiel favorkora al mi? Ĝuste nun mi per mia tuta koro dankas la justan Patron por la graco de via estado en ĉi tiu domo. Mi jam de longe petadis la Ĉielon ne lasi min morti, antaŭ ol mi vin revidos kaj aŭdos...

Saŭlo mezuris la amplekson de tiu memvola grandanimaĵo kaj ne povis reteni la larmojn. Li adiaŭis la fianĉinon. La malvarmeta vespero malavaris sugestojn al lia spirito. Neniam antaŭe li tiel pensis pri la nesondeblaj decidoj de la Eternulo, kiel en tiu momento, kiam li ricevis de la amata virino tiel profundajn instruojn pri humileco kaj amo. En la premata animo li spertis la interpuŝiĝon de du antagonismaj fortoj, kiuj inter si bataladis por la ekposedo de lia nobla kaj impulsiĝema koro.

Dion li ne komprenis alie, ol kiel potencan kaj nededeman mastron. Antaŭ Ties suverena volo, li pensis, fleksiĝas ĉia homa volo, sed li nun komencis serĉi la motivon de sia dolora maltrankvilo. Kial li nenie trovas la arde sopiratan pacon? Kaj tamen tiuj mizeraj homoj de la “Vojo” ridetantaj kaj trankvilaj fordonis sin en la malliberecon. Homoj malsanaj kaj kadukaj, sen ia espero en la mondo, elportadis liajn persekutojn kun laŭdoj en la koro. Stefano mem, kies morto servis al li kiel neforgesebla ekzemplo, benis lin por la suferoj, ricevitaĵ pro amo al la nazareta ĉarpentisto. Tiuj senprotektaj estuloj ĝuis tian trankvilecon, kian li ne konis. La bildo

de lia fianĉino malsana ne fortiriĝis de liaj okuloj. Abigail estis sentema kaj karesema, sed li memoris ŝian virinan senpaciencon, la intensecon de ŝiaj absorbaj zorgoj de virino, kiam li eventuale ne sukcesis akurate veni al la adorinda dometo ĉe la vojo al Jafó. Tiu nekonata Jesuo enverŝis fortojn en ŝian koron. Se nekontesteble estis, ke la malsano iom post iom estingas ŝian vivon, tamen videbla estis ankaŭ la renoviĝo de ŝiaj spiritaj fortoj. Lia fianĉino parolis al li kvazaŭ tuŝita de novaj inspiroj; tiuj okuloj kvazaŭ rigardis internen la scenojn de aliaj mondoj.

Ĉi tiu meditado ne ebligis al li admiri la Naturon. Reenirante en Jerusalemon, li havis la impreson, kvazaŭ li vekigis el ia sonĝo. Antaŭ li konturiĝis la majestaj linioj de la granda sanktajo. La rasofiereco pli forte parolis al lia spirito. Ne eble estis konfesi superecon ĉe la homoj de la “Vojo”. Sufiĉis por li ekvidi la Templon, por trovi en si mem la deziratajn klarigojn. Laŭ lia opinio la sereneco de la disĉiploj de la Kristo originis mem el la malklereco, kiu estis ilia trajto. Tiuj, kiuj amikiĝis al la galileanoj, ĝenerale estis nur tiaj homoj, kiujn la mondo forĵetis de si pro ilia korpa kadukeco, mankhava edukiteco, absoluta forlasiteco. Homo, respondeca antaŭ la mondo, certe ne povus akiri al si la pacon por tia mizera prezo. Ŝajnis al li, ke li ja solvis la demandon. Li daŭrigos la bataladon. Li kalkulis je la baldaŭa resaniĝo de sia fianĉino; kiam nur eble, li edziĝos kun Abigail kaj ŝin facile deadmonos de la ne nur fantaziaj, sed eĉ danĝeraj allogoj de tiuj kondamnitaj instruoj. El la sfero de sia hejmo li, feliĉa, daŭrigos la persekutadon kontraŭ ĉiuj, kiuj forgesas la Leĝon, ŝanĝante ĝin je aliaj principoj.

Ĉi tiuj rezonoj iamaniere kvietigis liajn zorgojn. Sed en la sekvanta tago, malfrue matene, kuriero de Zeharja vundis lian animon per grava sciigo: Abigail fartis pli malbone, agoniis! Senprokraste li ekveturis al Jafó, sopirante rabi sian amatinon al la superpendanta danĝero.

Rut kaj ŝia edzo estis konsternitaj. De frua mateno - la malsanulino falis en afliktantan prostracion. La sang-elvomoj senĉese sin reciproke sekvis. Ŝajnis, kvazaŭ ŝi

nur atendas la venon de sia fianĉo, por morti. Saŭlo aŭskultis ilin, pala kiel tolo. Muta, li direktis sin al ŝia ĉambro, kien la malvarmeta aero penetris parfumita, kunportante la mesaĝon de la fruktejoj kaj ĝardenaj floroj, kiuj ŝajnis adiaŭi la delikatajn kaj karesajn manojn, kiuj ilin flegadis.

Abigail akceptis lin kun radio da plej granda ĝojo en la brilantaj okuloj. La ebureca tono de ŝia velkinta mieno rapide pliintensiĝis. Ŝia tuta aspekto elmontris la proksiman agonion. Saŭlo aliris kun premata koro. La unuan fojon en la vivo li sentis sin tremanta antaŭ la neforpelebla fato. Tiu rigardo, tiu marmora paleco, tiu angora sufero antaŭanoncis ŝian morton. Demandinte sin pri la kaŭzo de tiu neatendita prostracio, li ekprenis ŝiajn molajn manojn, kovritajn de la malvarma ŝvito de la mortantoj.

– Kiel ĉi tio okazis, Abigail? – li demandis konsternita – Ankoraŭ hieraŭ, kiam mi disiĝis de vi, mi foriris tiel plena de espero... Mi sincere petis Dion resanigi vin por mi!

Treege kortuŝitaj, Zeharja kaj lia edzino foriĝis.

Rimarkinte, ke al lia fianĉino estas treege malfacile konigi siajn lastajn pensojn, Saŭlo genuiĝis apud ŝi, kovris ŝiajn manojn per varmaj kisoj. Tiu dolora agonio ŝajnis al li la nepreavigebla sufero, kiun la Ĉielo sendis al anĝelo. Li, kies spiriton elsekigis la hermeneŭtiko de la homaj leĝoj, sentis, ke li nun abunde ploras je la unua fojo. Vidante lian emocion tra la larmoj, kiuj silente fluis el liaj okuloj, Abigail, uzante sian lastan fortan, penis lin karesi. Ŝi konis Saŭlon kaj jam konstatis la rigidecon de lia karaktero. Tiu ploro atestis la intiman kalvarion de ŝia amato, sed ankaŭ elmontris la aŭroron de ia nova vivo por lia spirito.

– Ne ploru, Saŭlo – ŝi apenaŭ flustris –, la morto ne estas la fino de ĉio...

– Mi volas vin ĉe mi la tutan vivon – rediris la junulo, disfandiĝante en larmoj.

– Tamen oni devas morti, por vivi efektive – rediris la agoniantino, disrompante la vortojn per la malfacila spirado. – Jesuo instruis al ni, ke se la grenero

ne falas en la teron kaj ne mortas, ĝi restas sola, sed se ĝi mortas, ĝi donas multe da frukto (*). Ne ribelu kontraŭ la diaj decidoj, kiuj min forprenas de via materia kunvivado! Se ni interligiĝus per geedziĝo, ni eble ricevus multe da ĝojo, ni havus hejmon kun niaj infanoj, sed, disbatante niajn esperojn pri ia pacema feliĉo sur la Tero, Dio plimultigas niajn belajn revojn... Tiel longe kiel ni atendas nian nerompeblan ligitecon, mi vin helpos de tie, kie mi staros, kaj vi fordonos vin al la Eternulo per noblaj kaj elaĉetantaj klopodoj...

Oni vidis, ke la agoniantino aktivigas ekstremajn rimedojn, por diri la lastajn vortojn.

– Kiu havigis al vi tiajn ideojn? – demandis la junulo afliktita.

– La pasintan nokton, post kiam vi foriris, mi ek-sentis, ke iu alproksimiĝas, plenigante la ĉambron per lumo... Tio estis Jeziel, kiu venis, por vidi min... Ekvidinte lin, mi ekpensis pri Jesuo en la ĉarma mistero de lia reviviĝo. Li sciigis min, ke Dio benas nian strebadon al feliĉo, sed ke mi ankoraŭ hodiaŭ estos forportita en la spiritan vivon. Li instruis min sufoki la egoismon de mia animo, kuraĝigis min kaj faris al mi la agrablan sciigon, ke Jesuo vin tre amas, nutras esperojn al vi! Mi do ekpensis, ke estus utile min ĝoje fordoni al la manoj de la morto, ĉar, se mi estus plue en la mondo, mi eble malhelpus la mision, kiun la Savinto destinis por vi... Jeziel asertis, ke ni helpos vin de iu pli alta regiono! Kial do mi ne estos plu via kunulino? Mi sekvos viajn paŝojn sur la vojo, mi kondukos vin tien, kie troviĝas sen protekto niaj surteraj fratoj, mi helpos vian menson ĉiam trovi la veron! Vi ankoraŭ ne akceptis la Evangelion, sed Jesuo estas bona kaj havos ian rimedon, por unuigi niajn pensojn en la vera kompreno!

La peno de la mortantino estis grandega. La voĉo estingiĝis en ŝia gorgo. El ŝiaj brilegaj okuloj la larmoj abunde elfluadis.

– Abigail! Abigail! – ekkriis Saŭlo en malespero.

(*) Kp. Johano, 12:24. – *La Trad.*

Sed post longaj minutoj da premanta maltrankvileco ŝi diris en stertora paroksismo:

– Jeziel estas jam veninta... por forkonduki min...

Saŭlo instinkte komprenis, ke venis la fatala momento. Li vane vokis la mortantinon, kies okuloj malklariĝadis; senrezulte li kisis ŝiajn malvarmegajn manojn, nun kovritajn de ia paleco de lumtrairebla neĝo. Kvazaŭ freneza, li krie vokis Zeharjan kaj Ruton. Ĉi tiu kun larmoj brakumis Abigailon, kiu de post la morto de ŝia filo estis ŝia tuta patrino trezoro.

La agoniantino fiksas la rigardon sur ĉiu el ambaŭ, kvazaŭ elmontrante koran dankon. Poste... unu sola silenta larmo estis ŝia lasta adiaŭo.

El la proksima ĝardeno fluadis dolĉaj odoroj; la krepuska ĉielo ricevis tonojn de orbrilaj nuboj, birdoj, revenante al siaj nestoj, gaje traflugadis la aeron...

Peza malĝojo falis sur tiun domon ĉe la vojo al Jafo. Leviĝis al la ĉielo la adorata filino, la amata fianĉino, la karesema amikino de la floroj kaj de la birdoj.

Saŭlo el Tarso tie plu restadis muta, konsternita, dum Rut, ploreante, kovris per rozoj la adoratan mortintinon, kiu ŝajnis dormi.



Sur la vojo al Damasko

Dum tri tagoj Saŭlo restadis ĉe siaj noblaj geamikoj, rememorante la neforgeseblan fianĉinon. Profunde deprimita, li serĉadis ian rebonigilon por siaj doloroj ĉe la rigardado de tiu pejzaĝo, kiun Abigail tiel multe amis. Kiel malĝojan konsolon al la malesperanta koro li penis ekscii la zorgojn de la mortintino en ŝia lasta tempo kaj kun larmoj aŭdadis la karesan parolon de Rut pri ĉio, rilatanta al la kara foririntino. Li akuzis sin mem, ke li ne venis pli frue, por liberigi ŝin de tiu dolora malsano. Posedite de premanta pento, li travivis la turmentadon de amaraj pensoj. Per la rigideco de siaj pasioj li ja neniigis ĉian eblon de feliĉo. Pro la rigoreco de lia senindulga persekutado Stefano trovis tiun teruran torturon; pro la nefleksebla fiero de sia koro li pelis sian fianĉinon en la nesondeblan internajon de tombo. Sed li ne povis forgesi, ke ĉiujn tiujn dolorajn kontraŭiĝojn kaŭzis tiu krucumita Kristo, kiun li ne povis konpreni. Kial li en ĉio renkontas postesignojn de la senfama nazareta ĉarpentisto, kiun lia kaprica spirito malamas? Ekde la unua diskutado en la eklezio de la "Vojo", li neniam plu sukcesis pasigi eĉ unu tagon ne vidante tiun homon en la mieno de iu stratiranto, en la admono de siaj amikoj, en la oficialaj dokumentoj de siaj punenketoj, en la buŝo de la mizeraj malliberigitoj. Stefano faris sian lastan elspiron, kun amo kaj ĝojo parolante pri li; Abigail en siaj lastaj minutoj konsoliĝis rememorante lin kaj admonis lin, Saŭlon, sekvi la nazaretanon. Pro tiu tuta amaso da konsideroj, kolektiĝintaj en la lacekonsumita menso, Saŭlo el Tarso pliakrigis sian personan malamon

al la mokata Mesio. Nun, kiam li troviĝis sola, tute liberiĝinta el apartaj zorgoj en la regiono de la koro, li penos ĉion fari, por puni ĉiujn, kiujn li trovos defalintaj de la Leĝo. Opiniante, ke la dissemado de la Evangelio lin malutilas, li rekomendos sian malnoblan persekutadon. Sen aliaj esperoj, sen novaj idealoj, ĉar mankis al li la fundamentoj por starigi al si iun hejmon, li per korpo kaj animo sin fordonos al la defendo de la Leĝo de Moseo, gardante la kredon kaj trankvilecon de siaj samlandanoj.

En la antaŭtago de sia reveno Jerusalemon, jen la juna leĝisto aparte konversacias kun Zeharja, kiu penis lin atente aŭdi.

– Fine do – diris Saŭlo maltrankvila –, kiu estas tiu maljunulo, kiu sukcesis sorĉi Abigailon en tia grado, ke ŝi alprenis la strangan doktrinon de la Nazaretano?

– Nu, nu – respondis Zeharja ne interesite –, li estas unu el tiuj mizeraj ermitoj, kiuj ordinare sin donas al longaj meditoj en la dezerto. Zorgante pri la spirita trezoro de tiu junulino, kiun Dio al ni konfidis, mi petis informojn pri lia deveno kaj pri liaj vivolaboroj, kaj mi sciigis, ke li estas homo honesta, kvankam treege malriĉa.

– Kiel ajn ĝi estas – severe kontraŭdiris la junulo –, mi ankoraŭ ne povis kompreni la motivojn de via tolero. Kial vi ne leviĝis kontraŭ la novaĵemulon? Mi havas la impreson, kvazaŭ la malgajaj kaj absurdaj ideoj de la adeptoj de la “Vojo” decide kunhelpis por la malsano, kiu mortigis nian malfeliĉan Abigailon.

– Ĉion ĉi mi pesis en la animo, sed la mensa sinteno de la kara mortintino sin armis per grandega konsoliĝo post la kontakto kun tiu honesta kaj humila anakoreto. Ananias ŝin ĉiam traktadis kun profunda respekto, ŝin ĉiam akceptadis gaje, postulis nenian rekompencan, kaj tiel kondutis kontraŭ miaj servantoj mem, elmontrante senliman bonkorecon. Ĉu do estus juste kontraŭstari, malŝati bonfarojn? Estas vero, ke en la limoj de mia komprenpovo mi ne povos akcepti ideojn aliajn, ol tiuj, instruitaj de niaj prauloj, homoj respektindaj kaj noblaj, sed mi opiniis, ke mi ne rajtas senigi aliajn je la objekto de iliaj plej altvaloraj konsoloj. Krom tio, via foresto metis min en malfacilan situacion. Abigail faris

el via persono la centron de ĉiuj siaj amaj interesoj. Ne komprenante la motivojn, kiuj igis vin ne plu veni al nia domo, mi kompatis ŝian profundan ĉagrenon, kiu elmontriĝis per senŝanĝa malĝojo. La malfeliĉa ne sukcesis kaŝi siajn dolorojn antaŭ niaj amplenaj okuloj. La trovado de ia reboniĝilo estus providenca. De post la veno de Ananias, Abigail fariĝis tute alia, ŝi kvazaŭ sangis sian tutan aflikton en esperojn je pli bona vivo. Kvan-kam malsana, ŝi akceptadis la mizerulojn, kiuj venis paroli al ŝi pri tiu Jesuo, kiun ankaŭ mi mem ne povas kompreni. Tio estis najbaraj amikoj, simplanimaj homoj, ĉe kiuj laŭŝajne ŝi plezuris. Observante la senrimed-an malsanon, kiu ŝin konsumadis, mi kaj Rut kortuŝite sekvis ĉion tion. Kial ni ne tiel konduku, se temis pri la spirita paco de plej amata filino en la lastaj tagoj de sia vivo? Eble vi ankoraŭ ne kapablas kompreni la sencon de mia konduto, en ĉi tiu afero, sed, laŭ tute bona konscienco, mi estas pravigita, ĉar mi scias, ke mi ja plenumis mian devon, ne debarante de ŝi la rimedojn, kiujn ŝi opiniis necesaj por ŝia konsoliĝo.

Saŭlo aŭdadis lin kun miro. La sereneco kaj konsideremo de Zeharja rompis liajn plej fortajn impulsojn al riproĉo kaj severeco. La vualitaj akuzoj pri lia nemotivita foriĝo for de sia fianĉino penetris lian koron, taŭzante ĉi tiun per pikanta memriproĉo.

– Nu – li malpli krude rediris –, mi rekonsideras la motivojn, kiuj instigis vin elporti ĉion ĉi, sed mi tamen ne volas, ne povas kaj ne devas flanken meti la ŝuldiĝon, per kiu mi ŝarĝis min, por venĝi la ofendojn al la Leĝo.

– Sed pri kia ŝuldiĝo vi parolas? – demandis Zeharja surprizita.

– Mi volas diri, ke mi devas trovi Ananiason, por lin laŭmerite puni.

– Kio do, Saŭlo! – oponis Zeharja dolore impresita. – Abigail ĵus iris en la tombon; ŝia spirito, kun naturo tre sentema kaj karesema, profunde suferis el kaŭzoj, kiujn ni ambaŭ, Rut kaj mi, ne scias, sed kiujn vi mem eble scias; la sola konsolo, kiun ŝi trovis, estis ĝuste la patra amikeco de tiu bonkora kaj honesta mal-

junulo, kaj vi volas puni lin pro la bono, kiun li faris al ni kaj al tiu neforgesebla infano?

– Sed la afero estas pri la defendo de la Leĝo de Moseo – per firma tono respondis la tarsa junulo.

– Tamen – saĝe rimarkis Zeharja –, serĉfosante la sanktajn tekstojn, mi trovis nenian preskribon, kiu rajtigus puni bonfarantojn.

Ĉe ĉi tiu justa rimarko la leĝisto faris koleretan mienon, sed, uzante sian hermeneŭtikon, sagace konsideris:

– Sed unu afero estas la Leĝon studi kaj alia afero estas la Leĝon defendi. En la supera tasko, kiun mi portas sur la ŝultroj, mi ja devas esplori, ĉu la bono ne kaŝas la malbonon, kiun ni kondamnas. Ĉi tie kuŝas nia malkonsento. Mi devas puni la dekliniĝintojn tiel same, kiel vi bezonas pritondi la arbojn de via bieno.

Fariĝis longedaŭra silento. Ili dronis en profunda meditado, sur mense kaj intime malsamaj kampoj, kaj nun Saŭlo reprenis la parolon, demandante:

– Kiam Ananias foriris de ĉi tiu regiono?

– Antaŭ pli ol du monatoj.

– Kaj ĉu vi sciiĝis pri la loko, kien li sin direktis?

– Abigail diris al mi, ke li estas vokita Jerusalemon, por helpi la malsanulojn de la malriĉaj kvartaloj, pro la embarasa situacio, kiun tie kreis la persekutado.

– Nu, ankaŭ lia pereiga influo estos frakasita de la fortoj de nia vigleco. Reironte en la urbon morgaŭ, kiel mi intencas, mi penos lin lokalizi. Aliajn kapojn Ananias ja ne senprudentigos! Li neniam ekpensis pri la reago, kiun li eksplodigis en mia animo, kvankam ni persone ne konas unu la duan.

Zeharja ne sukcesis kaŝi sian ĉagrenon kaj rediris:

– En la simpleco de mia kampara vivado mi ne povas trovi la motivon de la religiaj luktoj en Jerusalemo; nu, tio estas demandoj propraj al viaj profesiaj taskoj kaj mi ne devas enmiksi min en la disponojn, kiuj plej taŭge konvenas.

Saŭlo longe restadis enpena kaj poste ekkondukis la konversacion laŭ alia direkto.

En la sekvanta tago li forte konsternita reiris en la urbon, sopirante ŝtopi la malplenenon de la koro, perdiĝinta en la labirinto de la senfaraj horoj. Al neniu li malkaŝis la grandan maldolĉon, kiu konsumadis lian animon. Retiriĝinte en absolutan silenton, li kun malluma vizaĝo reprenis siajn religiajn funkciojn.

En la hela suno de malfrua mateno jen li en la Sinedrio vive demandas servohelpiston:

– Isaak, ĉu vi plenumis miajn ordonojn rilate la deziratajn informojn?

– Jes, sinjoro, inter la malliberigitoj mi trovis junulon, kiu konas la maljunan Ananiason.

– Tre bone – diris la tarsa leĝisto videble kontenta – kaj kie loĝas tiu Ananias?

– Ha, tion li ne volis diri, kvankam mi forte insistis ĉe li. Li diris, ke li ne scias.

– Tamen li eble mensogas – kolere rediris Saŭlo.
– Tiuj homoj estas kapablaj al ĉio. Zorgu tuj, ke li senprokraste venu al mi. Mi povoscios elpremi el li la veron.

Jam konante liajn nenuligeblajn decidojn, Isaak humile obeis. Post ĉirkaŭ unu horo du soldatoj eniris en la kabineton, kondukante mizermienan junulon. Perfidinte nenian emocion, Saŭlo el Tarso ordonis, ke ili iru en la punĉambro, kie li post kelke da minutoj parolos al la malliberigito.

Pleniginte per notoj kelke da papirusoj, li decideme sin direktis al la punĉambro. Tie troviĝis ĉiuj abomenindaj, malbenindaj iloj de la politika-religiaj persekutoj, kiuj venenis Jerusalemon en la tiutempaj luktoj.

Parade sidiĝinte, la tarsa junulo akre pridemandis la mizeran enkarcerigiton.

– Cia nomo?

– Matatias Johanan.

– Ĉu ci konas la maljunan Ananiason, migradantan predikiston de la eklezio de la “Vojo”?

– Jes, sinjoro.

– De kiam?

– Mi koniĝis kun li, kiam oni ankoraŭ ne arestis min, antaŭ monato.

– Kaj kie loĝas tiu adepto de la ĉarpentisto?

– Tion mi ne scias – timeme respondis la demandito. – Kiam mi koniĝis kun li, li loĝis en malriĉa kvartalo de Jerusalemo, kie li instruadis la Evangelion. Ananias ne havis konstantan loĝejon. Li venis de Jafo, haltante en pluraj vilaĝoj, kie li predikadis la veraĵojn de Jesuo Kristo. Ĉi tie li vivis irante de unu kvartalo en alian, en sia pia misio.

La targa junulo ne atentis tiun teniĝon de profunda humileco, kaj, kunŝovante la brovojn, minace aldonis:

– Ĉu ci opinias, ke ci povas mensogi antaŭ leĝisto?

– Sinjoro, mi ĵuras... – ĝemis la junulo.

Saŭlo ne bonvolis konsideri lian petegon. Turnante sin al unu el la soldatoj, li senindulge diris:

– Julio, ni ne povas perdi tempon. Mi devas ricevi la necesan informon. Suferigu al li la torturon de la ungoj. Mi pensas, ke per tia rimedo li ne kuraĝos kaŝi plue la veron.

Ĉi tiu ordono estis tuj plenumita. Akrepintaj torturiloj estis prenitaj el granda polvoplena ŝranko. Post nemultaj sekundoj Julio kaj lia kamarado, liginte la kompatindan junulon al kruda ŝtipo, enigis la akrapintajn ilojn en la finon de la fingroj, kio elvokis ĉe la torturato korŝirajn kriojn. La juna malliberigito vane elkriadis siajn terurajn dolorojn; la turmentantoj aŭdadis lin indifere. Kiam la sango komencis elgutadi el sub la perforte eltirita ungo, la viktimo laŭte blekis:

– Kompaton! Mi konfesos ĉion, mi diron, kie li troviĝas! Kompatu min!

Saŭlo ordonis, ke oni momente ĉesigu la punon, por aŭdi la novajn deklarojn.

– Sinjoro! – plorante, diris la malfeliĉa. – Ananias jam ne troviĝas en Jerusalemo. Ĉe nia lasta kunveno, tri tagojn antaŭ ol ni iris en la karceron, la maljuna disĉiplo de la Evangelio adiaŭis nin, dirante, ke li nun loĝas konstante en Damasko.

Tiu lamenta voĉo estis ia eĥo de profundaj doloroj, amasiĝintaj en koro juna sed plena de amaraj disreviĝoj pri la vivo, sed Saŭlo ŝajne ne havis okulojn, por vidi tiajn kortuŝantajn suferojn.

– Ĉu tio estas ĉio, kion ci scias? – li seke demandis.

– Jes, mi ĵuras – humile respondis la junulo.

Ĉe tia kategoria aserto, travidebla tra la sincera rigardo kaj la emocia kaj malgaja tono de la voĉo, la leĝisto estis kontenta kaj ordonis rekonduki la malliberigiton en la karceron.

Post du tagoj la tarsi junulo kunvokis kunvenon en la Sinedrio, kunsidon, al kiu li atribuis apartan gravecon. Ĉiuj liaj kolegoj venis al lia alvoko. Kiam la kunsido estis malfermita, la leĝisto el Tarso klarigis la motivon de tiu kunvoko.

– Amikoj – fiere komencis –, antaŭ kelka tempo ni kunvenis, por ekzameni la karakteron de la religia lukto, naskiĝinta en Jerusalemo el la agado de la partizanoj de la nazareta ĉarpentisto. Feliĉe nia enpaŝo en la aferon venis en la tempo ĝusta, por antaŭforigi grandajn malbonojn dank'al la ruzeco de la falsaj miraklistoj, eksportitaj el Galileo. Je la kosto de teruraj penoj la atmosfero sennubiĝis. Estas vero, ke la urbaj karceroj estas plene ŝtopitaj, sed ĉi tiu dispono estas pravigebla tial, ke estas nepre necese bridi la revolucieman instinkton de la malkleraj amasoj. La tiel nomata eklezio de la “Vojo” limigis siajn laborojn al la helpado al senprotektaj malsanuloj. Niaj plej malaltklasaj kvartaloj estas en paco. Sereneco revenis al niaj okupiĝoj en la Templo. Sed ne tion saman oni povas diri rilate la najbarajn urbojn. Miaj demandoj al la religiaj aŭtoritatoj de Jafao kaj Cezarea konigas la tumultojn, kiujn la adeptoj de la Kristo jam longe spite elvokas, kun grava malutilo por la ĝenerala ordo. Ne nur en tiuj ĉeloj ne devas fari laboron: ĵus venis al mi el Damasko alarmaj sciigoj, kiuj postulas tujajn decidojn. Tie nestas danĝeraj individuoj. Maljunulo, nomata Ananias, tie nun malordigadas la vivon de tiuj, kiuj bezonas pacon en la sinagogoj. Ne estas juste, ke la plej alta tribunalo de nia raso ne interesiĝas pri la izraelidaj kolektivoj en aliaj regionoj. Mi do proponas, ke ni etendu la bonefikecon de nia kampanjo al aliaj urboj. Por tio mi ofertas mian tutan personan servemon, sen ia mona ŝarĝo por la domo, kie ni oficas. Sufiĉas por mi nur la necesa rajtigo, por

agigi ĉiajn rimedojn, kiuj ŝajnos al mi konvenaj, inkluzive de la kondamno al morto mem, kiam mi opinios ĝin necesa kaj oportuna.

La propono de Saŭlo estis ricevita kun elmontraj de simpatio; unu el la ĉeestantoj eĉ proponis specialan voĉon de laŭdo al lia viglanta zorgemo, kion unuanime aplaudis la negranda kunvenantaro. Mankis al ĉi tiu la saĝeco de ia Gamaliel, kaj la ĉefpastro, devigite de la ĝenerala aprobo, ne hezitis doni la necesajn leterojn kun la absoluta rajtigo por arbitra agado. La ĉeestantoj brakumis la junan rabenon, forte laŭdante lian akrevidan kaj energian spiriton. Sen ia dubo tiu juna kaj fortika mensa strukturo estis bonaŭgura garantio de pli granda estonteco ĉe la politika emancipiĝo de Izrael. Celpunkto de la flata kaj stimulantata parolo de siaj amikoj, Saŭlo el Tarso reliefigis la fieron de sia raso, nutrante esperojn al la venontaj tagoj. Estas vero, ke li maldolĉe suferis de la disruiniĝo de siaj junulaj revoj, sed li uzos la solulecon de sia ekzistado en la luktoj, kiujn li opiniis sanktaj, en la servado al Dio.

Havante en la manoj la leterojn, kiuj rajtigis lin agadi konvene, kunlabore kun la sinagogoj de Damasko, li akceptis la kompanion de tri respektindaj sinjoroj, kiuj proponis sin por lin akompani en karaktero de tre amikaj servantoj.

Post tri tagoj la malgranda karavano eliris el Jerusalema al la vasta ebenaĵo de Sirio.

En la antaŭtago de ilia alveno, kiam preskaŭ finiĝis la malfacila kaj laciga vojaĝo, la tarsi junulo sentis ĉiam pli akraj la amarajn rememorojn, kiuj al li konstante alsvarmis. Sekretaj fortoj devigis lin fari al si profundajn demandojn. Li rememoris la unuajn revojn de sia juneco. Lia animo baraktadis en kruelaj demandoj. De sia adoleskeco li ŝatis la internan pacon: li soifis stabilecon, por elplenumi sian karieron. Kie trovi tiun serencon, kiu tiel frue estis la objekto de liaj plej intimaj meditadoj? Por tio la instruistoj de Izrael rekomendis la absolutan observadon de la Leĝo. Pli ol ĉion li gardadis ĝiajn principojn. Ekde la komencaj impulsoj de la juneco li abomenis la pekon. Li sin fordonis al la idealo

per ĉiuj siaj fortoj servi al Dio. Li ne hezitis fari ĉion, kion li rigardis kiel devon, ĉe la plej krudaj kaj brutalaj agoj. Se nekontesteble estis, ke li havas sennombrajn estimantojn, li tamen havas ankaŭ potencajn malamikojn, dank'al sia karaktero nefleksebla ĉe la plenumo de tiuj devoj, kiujn li konsideris sanktaj. Kie do la spirita paco, al kiu li tiel forte sopiras en siaj senĉesaj klopodoj? Kiel ajn li streĉis siajn fortojn, li vidis sin kvazaŭ ia vulkano el doloraj kaj profundaj zorgoj. Lian vivon karakterizis potencaj ideoj, sed en sia animo li bataladis kontraŭ nerepacigeblaj antagonismoj. La scioj de la Leĝo de Moseo laŭŝajne ne sufiĉis al lia konsumanta soifo. La enigmoj de la destino mastris lian menson. La mistero pri la doloro kaj la diversaj destinoj superŝutis lin per nesolveblaj enigmoj kaj mallumaj demandoj, tamen tiuj adeptoj de la krucumita ĉarpentisto elmontris nekonatan serenecon! Preteksti, ke ili ne konas la plej gravajn problemojn de la vivo, ne taŭgis ĉi tie, ĉar Stefano estis tre inteligenta homo kaj, mortante, vidigis impresan pacon kaj spiritajn valorojn, kiuj inspiris miregon.

Kiel ajn insiste liaj kunuloj turnis lian atenton al la unuaj vidaĵoj de Damasko, malproksime bildiĝantaj, Saŭlo ne sukcesis eliri el la malluma monologo. Li ŝajnis ne vidi la paciencajn kamelojn, kiuj pezece paŝadis sub la tagmeza suno, bruleganta de la zenito. Vane ili invitis lin kune manĝi. Kelke da minutoj li restis en ĉarma malgranda oazo, kie li atendis, ĝis finiĝos la manĝeto de liaj kamaradoj, kaj ekiris pluen, absorbite de la intensaj intimaj pensoj.

Li mem ne povoscius klarigi, kio nun okazas. Liaj rememoroj atingis la tempojn de lia frua infaneco. Lia tuta laborplena pasinteco nete klariĝis ĉe tiu introspekta analizado. El inter ĉiuj familianoj reliefiĝis la memoro pri Stefano kaj Abigail, kvazaŭ instigante lin al pli profundaj demandoj. Kial tiuj gefratoj el Korinto havigis al si tian influon sur ĉiujn problemojn de lia "mi"? Kial li atendis Abigailon sur ĉiuj vojoj de la juneco, kiu strebadis al vivo pura? Li rememoris siajn plej eminentajn amikojn, kaj ĉe neniu el ili li trovis moralajn ecojn similajn al la ecoj de tiu juna predikanto de la "Vojo",

kiu spitis lian politika-religian aŭtoritatecon antaŭ la tuta Jerusalem, malŝatante humiligon kaj morton, kaj poste mortis, benante liajn maljustajn kaj senapelaciajn decidojn. Kia forto kunligis ilin en la labirintoj de la mondo, ke lia koro ilin neniam forgesis? La dolora vero estis tio, ke li troviĝas sen interna paco, malgraŭ la konkero kaj ĝuado de ĉiaj prerogativoj kaj privilegioj inter la plej eminentaj homoj de sia raso. En penso li preterpasis la junulinojn, kiujn li konis dum la vivo, tiujn plej karajn al lia infaneco, kaj ĉe neniu li povis trovi karakterizaĵojn egalajn al tiuj de Abigail, kiu divenadis liajn plej kaŝitajn dezirojn. Turmentite de tiuj profundaj demandoj, kiuj potencis lian menson, li kvazaŭ vekigiĝis el ia granda premsonĝo. Estis eble tagmezo. Ankoraŭ tre malproksime, la vidaĵo de Damasko jam prezentis siajn konturojn: densaj fruktoĝardenoj, grizaj kupoloj duonmontriĝis fore. Firme rajdante, montrante la korpan rektecon de viro, kutiminta al la plezuroj de la sporto, Saŭlo iris antaŭe kun superreganta teniĝo.

Sed en certa momento, kiam li apenaŭ vekigiĝis de siaj angoraj meditoj, li eksentis sin envolvita en lumojn malsamajn ol la suna. Li havis la impreson, kvazaŭ la aero fendiĝas simile al kurteno sub ia potenca nevidebla premo. En sia animo li supozis, ke lin atakas kapturino post la persista kaj dolora streĉado de la menso. Li ekvolis sin returni, peti la kunulojn pri helpo, sed li ilin ne vidis, kvankam li ja povis krii pri helpo.

– Jakob! Demetrio! Helpu al mi! – li ekkriis en malespero.

Sed la konfuziteco de la sentumoj prenis de li la konadon pri ekvilibro kaj li senprotekte falis de sur la besto sur la varmegan sablon. Nun ŝajnis, ke la vizio disvastiĝas ĝis la senfineco. Alia lumo frapis liajn duonblindigitajn okulojn, kaj sur la vojo, kiun la fendita aero al li malkaŝis, li ekvidis aperi la figuron de majeste bela homo, ŝajnanta veni el la ĉielo al li renkonte. Ties tuniko estis el lumantaj punktoj, la haroj atingis la ŝultr-ojn, laŭ la nazareta modo, la magnetaj okuloj, altirante per simpatio kaj amo, lumigis lian seriozan kaj mildan mienon, kie ŝvebis ia dia malĝojo.

La leĝisto el Tarso rigardadis lin kun profunda mir-
ego, kaj tiam la nekonato per neforgesebla tono aŭdiĝis:

– Saŭlo, Saŭlo, kial vi min persekutas?

La tarsa junulo ne sciis, ke li preterkonscie staras sur la genuoj. Ne povante difini, kio okazas, li males-
pere ekpremis la koron. Neretenebla sento de respekt-
ego lin tutan ekposedis. Kion tio signifas? Kies estas
tiu dia figuro, kiun li duonvidis sur la bildo de la nudi-
ĝinta firmamento kaj kies ĉeesto superverŝis lian rapid-
ege batantan koron per nekonataj emocioj?

Dum la kompanianoj ĉirkaŭis la junulon genuantan,
nenion aŭdante nek vidante, kvankam ili en la komenco
ekrimarkis ian grandan lumon en la alto, Saŭlo demandis
per tremanta, simplena voĉo:

– Kiu vi estas, ho Sinjoro?

Aŭreolita de ia milda lumo kaj per tono neimageble
dolĉa, la Sinjoro respondis:

– Mi estas Jesuo, kiun vi persekutas!

Tiam montriĝis, ke la fera kaj necedema leĝisto,
konvulsie plorante, kurbiĝas al la tero. Aspektis, kvazaŭ
la flama rabeno de Jerusalemo estis morte vundita, mo-
mente spertante la disruiniĝon de ĉiuj principoj, kiuj mo-
delis lian spiriton kaj ĝis nun gvidis lin tra la vivo.
Antaŭ liaj okuloj, nun kaj tie, staris tiu grandanima kaj
nekomprenebla Kristo! La predikantoj de la “Vojo” ne
iluziiĝis! La parolo de Stefano estis la pura vero! La
kredo de Abigail estis la reala vojo. Tiu homo estis la
Mesio! La mirinda historio de lia resurekto ne estis ia le-
genda artifiko, por plisolidigi la fortojn de la popolo.
Efektive, li, Saŭlo, tiun ja vidas en la majesteco de lia
dia gloro! Kia amo certe animas ties koron plenan de
plej alta favorkoreco, ke tiu venis al li renkonte sur de-
zertaj vojoj, al li, Saŭlo, kiu prenis sur sin la rolon
de senindulga persekutanto de ties plej fidelaj disĉiploj!
Laŭ la sincereco de sia arda animo li konsideris ĉion ĉi
en la mallonga daŭro de unu minuto. Li eksentis ne-
venkeblan honton pri sia kruela pasinteco. Torento da
impetaj larmoj surverŝis lian koron. Li ekdeziris paroli,
pentofari, elkrii siajn senfinajn disreviĝojn, ĵuri fidelec-
on kaj sindonecon al la Mesio el Nazaret, se la sincera

bedaŭro de la pentanta kaj disŝirita spirito sufokis lian voĉon.

Tiam li rimarkis, ke Jesuo alproksimiĝas, kaj, fiksante sur li karesan rigardon, la Majstro ame tuŝis liajn ŝultrojn, dirante per patra tono:

– Ne piedbatu kontraŭ la pikiloj!

Saŭlo komprenis. De post lia renkontiĝo kun Stefano profundaj fortoj ĉiumomente kaj ĉiuloke instigadis lin mediti pri la novaj instruoj. La Kristo vokis lin per ĉiaj rimedoj kaj en ĉiaj manieroj.

Ne povante kompreni la dian grandecon de tiu horo, liaj kunvojaĝantoj ekvidis lin pli varme ploranta.

La tarsi junulo plorsingultadis. Ĉe la dolĉa kaj persvada mieno de la nazareta Mesio li konsideris la tempon perditan sur malglataj kaj sendankaj vojoj. De nun li devas reformi la provizon de siaj plej internaj pensoj; la vido de Jesuo releviĝinta tute rebakis, en liaj mortemaj okuloj, la religiajn konceptojn. Certe la Savinto kompatis lian lojalan kaj sinceran koron, aldonitan al la servado al la Leĝo, kaj malsuprenvenis de sia gloro, por eletendi al li siajn diajn manojn. Li, Saŭlo, estas la ŝafo, perdiĝinta en la pereigejo de la bruligaj kaj detruantaj teorioj. Jesuo estas la Paŝtisto amika, kiu bonvolis fermi la okulojn kontraŭ la sendankaj dornarbetaĵoj, por lin ame savi. En palpebruma daŭro la juna rabeno konsideris la amplekson de tiu ago de amo. Larmoj ŝprucis el la suferanta koro, simile kiel pura akvo el ia nekonata fonto. Sur tiu sama loko, en la majesta sanktejo de la spirito, li ĵuris al si mem, ke li por ĉiam sin donos al Jesuo. Subite li rememoris siajn krude dolorajn elprovojn. La ideo pri iu hejmo estingiĝis kun Abigail. Li sentis sin tute sola kaj frakasita. Sed de hodiaŭ li sin fordonos al la Kristo kiel nura sklavo al ties amo, kaj ĉion faros, por pruvi al tiu, ke li scias kompreni ties oferon, nome ke Jesuo helpas lin sur la ombra vojo de la homaj malbonagoj en tiu decidiga momento de lia destino. En larmoj, kiel neniam antaŭe en sia vivo, ĉe la mireganta rigardo de siaj kamaradoj kaj en la rosta varmeĝo de tagmezo, li sur tiu sama loko faris sian unuan kredkonfeson..

– Kion mi faru, Sinjoro?

Tiu decidema animo, eĉ en la momento de senkondiĉa kapitulaco, humiligita kaj vundita ĉe siaj plej estimindaj principoj, elmontris sian noblecon kaj lojalecon. Trovinte la plej grandan revelacion dank'al la amo, kiun Jesuo volonte manifestis al li, Saŭlo el Tarso ne elektas taskojn, por servi al li por la renovigo de siaj klopodoj de homo. Fordonante sin al Jesuo per sia tuta animo kvazaŭ plej malsupera servanto, li humile demandas, kion la Majstro deziras de lia kunlaborado.

Tiam, lin pli ame rigardante kaj komprenigante al li, ke la homoj devas harmonii en la komuna laboro de la edifo de ĉiuj, en la universala amo, en lia nomo, Jesuo respondis:

– Leviĝu, Saŭlo! Eniru en la urbon, kaj estos dirite al vi, kion vi devas fari!

Tiam la tarsa junulo ne plu vidis la amindan figuron kaj havis la impreson, kvazaŭ li dronas en ia maro da ombroj. Vizaĝaltere, li ĉiam ankoraŭ ploradis, elvokante kompaton ĉe siaj kamaradoj. Li frotis al si la okulojn, kvazaŭ dezirante ŝiri la vualon, kiu malhelpis lian vidpovon, sed li sukcesis nur palpadi en densa malumo. Iom post iom li komencis rimarki la ĉeeston de siaj amikoj, kiuj laŭŝajne komentariadis la situacion:

– Nu, Jakob – diris unu el ili, montrante grandan maltrankvilecon – kion ni nun faru?

– Mi opinias, ke estus bone – respondis la alparolito –, se ni irigus Jonan al Damasko, por peti tujan helpon.

– Sed kio okazis? – demandis la respektinda maljunulo, kiun lia amiko nomis Jona.

– Mi tute klare ne scias – respondis Jakob impresita. – Mi antaŭe ekvidis intensan lumon en la ĉielo kaj tuj poste aŭdis, ke Saŭlo krias pri helpo. Mi povis ĝustatempe fari nenion por li, ĉar en tiu sama momento li falis de la besto, antaŭ ol ricevi ian helpon.

– Maltrankviligas min – konsideris Demetrio – tiu dialogo kun la ombroj. Kun kiu li konversacias? Ni aŭdas lian voĉon, sed vidas neniun: kio do nun okazas ĉi tie, kion ni ne povas kompreni?

– Ĉu vi do ne vidas, ke nia estro deliras? – saĝe kontraŭmetis Jakob. – La longaj vojaĝoj en rostanta suno ordinare konsumas eĉ la plej fortikajn organismojn. Krom tio, kiel ni vidis, li de frue matene ŝajnas deprimita kaj malsana. Li sin ne nutris, malfortiĝis pro la penado dum ĉi tiuj tiel longaj tagoj, kiujn ni tre malfacile travivas ekde Jerusalemo. Laŭ mia opinio – li finis, malĝoje balancante la kapon –, tio estas unu el tiuj okazoj de febroj, kiuj subite atakas en la dezerto...

Sed la maljuna Jona, kun larĝe malfemitaj okuloj, fikse kun forta miro rigardadis la plorsingultantan rabenon. Aŭdinte la opinion de siaj kunvojaĝantoj, li diris hezite, kvazaŭ li timus ofendi ian nekonatan estulon:

– Mi havas grandan sperton pri tiaj iradoj sub la suno, brulanta de la zenito. Mi pasigis mian junecon pelante kamelojn tra la dezertoj de Arabujo, sed mi tie neniam vidis iun malsanulon kun ĉi tiuj signoj: la febro de tiuj, kiuj falas senfortaj sur la vojon, ne manifestiĝas kune kun delirado kaj larmoj; la atakito falas frakasita, sen reago. Ĉi tie ni observas nian mastron, kvazaŭ li konversacias kun iu nevidebla por ni. Mi ne inklinas akcepti ĉi tiun hipotezon, sed mi suspektas, ke en ĉio ĉi estas ia signo de la sorĉaĵoj de la “Vojo”. La sekvantoj de la ĉarpentisto scias magiajn procedojn, kiujn ni ankoraŭ tute ne kapablas kompreni. Ni ja scias, ke nia leĝisto sin donis al la tasko persekutadi ilin ĉie, kie ili troviĝas. Ili eble teksis kontraŭ li ian kruelan venĝon. Mi proponis min, por veni Damaskon, celante foriĝi de miaj parencoj, kiuj laŭŝajne estas delogitaj de tiuj novaj doktrinoj. Kiam estis dirite, ke oni resanigas iun de lia blindeco simple per surmetado de manoj? Tamen mia frato resaniĝis pere de la fama Simon Petro. Laŭ mia opinio nur sorĉarto klarigas tiajn aferojn. Vidante tiom da misteraj faktoj en mia domo mem, mi ektimis Satanon kaj forkuris.

Retiriĝinte en si mem, surprizite de la lin ĉirkaŭanta densa mallumo, Saŭlo aŭdadis ĉi tiujn konsiderojn de siaj amikoj, spertante fortan malvigliĝon, kvazaŭ konsumita kaj blinda reveninte el grandega malvenko.

Forviŝante la larmojn, li plej humile vokis unu el ili. Ĉiuj ili diligente alkuris.

– Kio okazis? – demandis Jakob maltrankvila. – Ni estas afliktitaj pro vi. Ĉu vi estas malsana, sinjoro? Ni zorgos pri ĉio, kion vi trovos necesa...

Saŭlo faris malgajan geston kaj rediris:

– Mi blindiĝis.

– Sed kio estis? – demandis alia kompaniano, ankaŭ zorgoplena.

– Mi vidis Jesuon el Nazaret! – li respondis penteme, tute alia homo.

Jona faris signifoplenan signon, kvazaŭ dirante al siaj kunuloj, ke li estas prava, kaj ili rigardadis unu alian kun tre granda miro. Ili instinkte ekkomprenis, ke la menso de la juna rabeno estas afekciita. Jakob, kiel persono de lia intimeco, prenis sur sin la iniciativon de la unuaj disponoj kaj diris:

– Sinjoro, ni bedaŭras vian malsanecon. Ni devas decidi pri la destino de la karavano.

La leĝisto el Tarso, elmontrante ian humilecon, kia neniam alkonformiĝis al lia regema temperamento, lasis fali larmon kaj profunde malĝoje rediris:

– Jakob, ne ĝenu vin pro mi... Rilate tion, kio koncernas min fari, mi devas senprokraste veni Damasikon. Rilate vin tri... – kaj la voĉo dolore rompiĝis, kvazaŭ premata de granda angoro, kaj amare daŭrigis –, agu tiel, kiel vi volos, ĉar ĝis nun vi estis miaj servantoj, sed de nun ankaŭ mi estas sklavo, mi jam ne apartenas al mi mem...

Ĉe tiu humila kaj malĝoja voĉo Jakob komencis plori. Li estis plene konvinkita, ke Saŭlo freneziĝis. Li vokis aparte la du kamaradojn kaj diris:

– Vi ambaŭ revenu Jerusalemon kun la malĝoja novaĵo, dum mi kun nia leĝisto iros al la proksima urbo, por kiel eble zorgi pri ĉi tiu afero. Mi kondukos lin al liaj amikoj kaj ni serĉos ian helpon de iu kuracisto... Mi rimarkas, ke lia menso estas treege perturbita...

La juna rabeno sciiĝis pri iliaj decidoj preskaŭ nesurprizite. Li pasive konsentis la decidon de sia servanto. En tiu momento, kiam li dronis en densa kaj profunda

mallumo, lia imagemo estis plena de transcendaj konjektoj. La subita blindiĝo lin ne afliktis. El la sfero de tiu mallumo, pleniganta liajn karnajn okulojn, kvazaŭ elvenas la radiluma figuro de Jesuo antaŭ liajn spiritajn okulojn. Estis juste, ke estingiĝis lia vidpovo, por ke li por ĉiam konservu la memoron pri tiu glora minuto de sia aliĝo por iu pli alta vivo.

Saŭlo ricevis la parolon de Jakob kun la humileco de iu infano. Senplende, senreziste li aŭdis la fortrotadon de la karavano, returne iranta al Jerusalem, dum la maljuna servanto, posedite de grandega timo, oferis al li la amikan brakon.

Kun larmoj, fluantaj el la senesprimaj okuloj, kiuj kvazaŭ dronis en la nepenetrebla vizio en la malpleno, la fiero leĝisto el Tarso, gvidata de Jakob, piediradis en la varmega suno de la unuaj posttagmezaj horoj.

Kortuŝite de la benoj, kiujn li ricevis de la plej altaj sferoj de la vivo, Saŭlo ploradis, kiel neniam antaŭe. Li nun estis blinda kaj for de siaj karuloj. Sufokanta angoro bolis en lia premata koro, sed la vizio de la reviviĝinta Kristo, ties neforgesebla parolo, ties esprimo de amo troviĝis en lia aliĝinta animo. Jesuo estas la Sinjoro, neatingebla por la morto. La Majstro direktos liajn paŝojn sur la vojo, donos al li novajn ordonojn, elsekigos la ulcerojn de vantamo kaj fiero, kiuj mordadis lian koron, kaj precipe havigos al li fortojn, por korekti la erarojn de siaj tagoj de iluzio.

Impresite kaj malĝoja, Jakob gvidis sian amikan estron, demandante sin mem, kial tiu senĉesa kaj silenta ploro.

Envolvita en la mallumo de la kelkatempa blindeco, Saŭlo ne rimarkis, ke la densa mantela de la krepusko ĉirkaŭvolvas la Naturon. Malhelaj nuboj akcelis la vespriĝon, dum sufokaj ventoj blovdadis de la vastega ebenaĵo. Li malfacile akompanis la paŝojn de Jakob, kiu deziris plirapidigi la iradon, timante la pluvon. Kun decidema kaj energia koro, li ne atentis la malhelpaĵojn, kiuj leviĝadis antaŭ lia dolora marŝado. Mankis al li la vidado, li do bezonis ian gvidanton; sed Jesuo rekomendis al li eniri en la urbon, kie estos al li dirite, kion li

devas fari. Li devis obei al la Savinto, kiu honoris lin per la plej altaj malkaŝoj de la vivo. Per ŝanceliĝaj paŝoj, vundante al si la piedojn ĉe ĉiu malfirma movo, li iel ajn irados, por plenumi la diajn ordonojn. Estis nepre necese ne atenti la malfacilaĵojn, ne forgesi la celon. Kio grava tio estas, la rigardo en mallumo, la reveno de la karavano Jerusalemon, la peniga piedirado al Damasko, la erara supozo de liaj kunuloj pri tiu neforgesbla okazaĵo, la perdo de la honoraj titoloj, la forpuŝo, kiun li suferos de la pastroj liaj amikoj, la nekompreno de la tuta mondo, kompare kun la kulmina fakto de lia destino?

Kun la profunda sincereco, kiu karakterizis liajn eĉ plej sensignifajn agojn, Saŭlo el Tarso konsideris nur tion, ke Dio ŝanĝis Sian decidon pri li; li do estos al Li fidela ĝis la fino.

Kiam la krepuska malhelo fariĝis pli densa, du nekonataj viroj eniris en la antaŭurbon de Damasko. Kvankam la forta vento forblovis la tempestajn nubojn al la dezerto, dikaj pluvogutoj tie kaj tie faladis sur la varman polvon de la stratoj. La fenestroj de la loĝodomoj klakbrue fermiĝadis.

Damasko povis rememori la tarsan junulon, belan kaj triumfantan. Ĝi konis lin ĉe siaj plej brilaj festoj. Ĝi kutime aplaŭdadis lin en la sinagogoj. Sed, vidante sur la stratoj iradi tiujn du lacajn kaj magajajn virojn, ĝi tute ne povus rekoni lin en tiu junulo, malfirme paŝanta, kun mortintaj okuloj...

FINO DE LA UNUA PARTO



DUA PARTO

I

Direkte al la dezerto

– Kien ni iru, sinjoro? – time demandis Jakob, tuj kiam ili ekiris sur la tordaj stratoj.

La tarsi junulo momente konsideris kaj respondis:

– Mi ja kunportas iom da mono, tamen mi troviĝas en tre malfacila situacio: mi sentas, ke mi bezonas pli ĝuste moralan helpon, ol fizikan ripozon. Mi devas trovi iun, kiu helpus min kompreni, kio okazis. Ĉu vi scias, kie Cadok loĝas?

– Jes, sinjoro – diris lia servanto kortuŝita.

– Konduku min tien... Vidiĝinte kun iu amiko, mi ekpensos pri ia gastejo.

Ne longe daŭris kaj jen ili ĉe la pordo de konstruaĵo kun kurioza kaj majesta aspekto. Bonformaj muroj ĉirkaŭis vastan korton, ornamitan de floroj kaj arbustoj. Eksidinte apud la enirpordego, Saŭlo diris al sia kunulo:

– Ne estus bone, se mi alproksimiĝus sen ia avizo. Mi neniam vizitis Cadokon en ĉi tiu stato. Eniru en la korton, voku lin kaj rakontu al li, kio fariĝis al mi. Mi atendos ĉi tie, des pli, ke mi ne povas fari eĉ unu paŝon.

Lia servanto senprokraste obeis. La benko, kie li ripozis, staris kelke da paŝoj malproksime de la larĝa enirpordego, sed, restinte sola, sopirante aŭdi iun amikon, kiu lin komprenus, Saŭlo trovis la muron, palpante ĝin. Ŝanceliĝe kaj tremante, li sin malfacile trenis kaj atingis la enirejon, kie li restis.

Veninte al la alvoko, Cadok penis ekcii la motivon de tiu neatendita vizito. Jakob humile klarigis, ke li

venis el Jerusalemo akompanante la leĝiston, kaj detale elvolvis ĉiujn okazaĵojn dum la vojaĝo, kiel ankaŭ ilian celon; sed kiam li tuŝis la plej ĉefan epizodon, Kadok mirkonsternite malfermegis la okulojn. Estis por li malfacile kredi tion, kion li aŭdas, sed li tamen ne povis dubi la sincerecon de la rakontanto, kiu siaflanke apenaŭ kaŝis sian propran miregon. Tiu homo tiam parolis pri la mizera stato de sia estro, pri lia blindeco, pri la abundaj larmoj, kiujn li verŝadis. Saŭlo ploras?! Lia amiko en Damasko ricevis tiujn strangajn sciigojn treege surprizite kaj mallonge manifestis siajn unuajn impresojn per respondo, kiu konfuzis Jakobon:

– Kion vi al mi rakontas, tio estas preskaŭ neverŝajna, tamen en ĉi tiuj cirkonstancoj estas ne eble akcepti vin ambaŭ ĉi tie. De antaŭhieraŭ mia domo estas plena de gravaj amikoj, ĵus venintaj el Citium (*) por granda kunsido en la sinagogo, la plej proksiman sabaton. Mi mem supozas, ke Saŭlo subite menskonfuziĝis, kaj mi ne volas elmeti lin al malpli respektaj opinioj kaj komentarioj.

– Sed, sinjoro, kion mi diru al li? – hezite intermetis Jakob.

– Diru, ke mi ne estas hejme.

– Tamen... mi troviĝas sola kun li, kiu estas perturbita kaj malsana, kaj, kiel vi vidas, la vespero estas tempesta...

Cadok momente konsideris kaj rediris:

– La solvo de ĉi tiu demando ne estas malfacila. Ĉe la plej proksima angulo vi atingos straton, kiun oni nomas “Rekta strato” kaj post kelke da paŝoj vi venos al la gastajo de Judas, kiu ĉiam havas multe da disponeblaj ĉambroj. Mi poste penos veni tien, por ekscii, kio okazis.

Aŭdinte tiajn vortojn, kiuj ŝajnis pli ĝuste ia ordono, ol respondo al peto de amiko, Jakob surprizite kaj senkuraĝigite lin adiaŭis.

– Sinjoro – li diris al la rabeno, reveninte al la

(*) Urbo de la insulo Kipro. – *La Eldonistoj*.

enirpordego –, via amiko Cadok bedaŭrinde ne estas hejme.

– Ĉu li ne estas hejme? – ekkriis Saŭlo kun miro. – Mi de ĉi tie aŭdis lian voĉon, kvankam ne tion, kion li diradis. Ĉu ankaŭ miaj oreloj estas difektitaj?

Ĉe ĉi tiu rimarko tiel esprimplena kaj sincera Jakob ne povis plu kaŝi la veron kaj raportis al la rabeno la akcepton, kiun li ricevis, la deteniĝan kaj malvarman konduton de Cadok.

Sekvante la paŝojn de sia gvidanto, Saŭlo ĉion aŭdis muta, forviŝante larmon. Li ne supozis, ke lin tiel renkontos kolego, kiun li ĉiam konsideris nobla kaj lojala en ĉiaj cirkonstancoj de la vivo. La surprizo lin pikis. Estis kompreneble, ke Cadok timas pri la renoviĝo de liaj ideoj, sed ne estis juste forlasi malsanan amikon al la vespera malbonvetero. Tamen en la kirlego da ĉagrenoj, kiuj komencis ŝveligi lian koron, li subite rememoris tiun vidon je Jesuo kaj meditis pri tio, ke efektive li nun havas kun si travivaĵojn, kiajn tiu amiko ne povis sperti; tiam li venis al la konkludo, de se la roloj estus inversigitaj, li eble agus tiel same.

Kiam lia kompaniano finis sian raporton, li rezignaciplena konsideris:

– Cadok estas prava. Ne estus dece ĝeni lin per la priskribo de la fakto tiam, kiam li sidas ĉe la tablo kun amikoj, havantaj gravajn funkciojn en la politiko. Krom tio mi estas blinda... Mi estus do ia ŝtupo, sed ne gasto.

Ĉi tiuj konsideroj kortuŝis lian vojkamaradon, kiu cetere elperfidis al la juna rabeno siajn proprajn timojn. En la vortoj de Jakob, Saŭlo duonvidis ian neklaran esprimon de nerpravigeblaj timoj. La konduto de Cadok eble pligrandigis suspektojn de Jakob. La admonoj de Cadok estis malklaraj, ŝanceliĝaj. Ĉi tiu ŝajnis timoplena, kva-zaŭ antaŭvidante minacojn al lia persona trankvileco. En la plej simpla parolo li travidigis la timon esti akuzita kiel portanto de iu manifestaĵo de la ‘Vojo’. Dank’al la amplekso de sia psikologia juĝokapablo la tarsi junulo ĉion ĉi komprenis. Vere li, Saŭlo, estis la plej alta estro de la detrua kampanjo, sed de nun li dediĉos sian vivon al Jesuo, kaj tial li kompromitos ĉiun, kiu rekte

kaj malkaŝe alproksimiĝos al li. Lia aliĝo elvokos multe da protestoj en la fariseaj rondoj. En la hezita parolo de sia gvidanto li antaŭsentis la timon esti akuzita pri ia sorĉaĵo aŭ magiaĵo.

Efektive, post kiam ili sin komforte aranĝis en la modesta gastejo de Judas, la kompaniano de Saŭlo diris maltrankvila:

– Sinjoro, mi bedaŭras, ke mi devas paroli pri miaj interesoj, sed, laŭ la faritaj projektoj, mi bezonas reveni Jerusalemon, kie atendas min du filoj, por ke ni loĝu konstante en Cezarea.

– Perfekte – rediris Saŭlo, respektante liajn skrupulojn –, vi povos foriri ĉe mateniĝo.

Tiu voĉo, iam agresiva kaj aŭtoritata, nun estis indulgema kaj milda, kaj tuŝis la koron de la servanto ĉe ĝiaj plej sentemaj fibroj.

– Tamen, sinjoro, mi hezitas – diris la maljunulo, jam pikita de la riproĉo de sia konscienco –, vi nun estas blinda, vi bezonas ian helpon, por ricevi la vidadon, kaj mi sincere bedaŭras, ke mi forlasas vin senprotekta.

– Ne maltrankviliĝu pro mi – rediris la leĝisto rezignacie –; kiel vi scias, ke mi restos senprotekta? Mi estas konvinkita, ke miaj okuloj estos resaniĝintaj tre baldaŭ. Cetere – Saŭlo daŭrigis, kvazaŭ konsolante sin mem –, Jesuo ordonis al mi eniri en la rubon, por ke mi eksciu, kio al mi konvenas. Li do certe ne lasos min ne scianta, kion mi devas fari.

Tiel parolante, li ne povis vidi la esprimon de kompatato, kun kiu lin rigardadis Jakob, perpleksa kaj frakasita. Tamen, malgraŭ la doloro, kiun al li kaŭzis lia estro en tia stato, kaj rememorante la punojn, trudatajn al la sekvantoj de la Kristo en Jerusalemon, tiu lia kamarado ne sukcesis forpeli de si la timojn de sia animo kaj foriris ĉe ektagiĝo.

Saŭlo nun estis sola. Kun la densa vualo de la blindeco li povos sin doni al sia profunda kaj malĝoja meditado.

Lia plena kaj malfermita monujo certigis al li la servemon de la gastejestro, kiu de tempo al tempo venis al li, por ekscii liajn bezonojn, sed la gasto estis vane

invitata al manĝoj kaj amuzoj, ĉar nenio fortiris lin de lia morna soluliĝo.

Tiuj tri tagoj en Damasko estis tempo de rigora spirita disciplino. Lia aktiva persono ĉesigis la mondajn laborojn, por esplori la pasintatempajn erarojn, la nunajn malfacilaĵojn kaj la estontajn farojn. Li devis alkonformiĝi al la nekontraŭebla reformo de sia “mem”. En la premateco de sia spirito li efektive sentis sin forlasita de ĉiuj siaj amikoj. La sintenado de Cadok estis ekzempla kaj, li pensis, reprezentis tiun de ĉiuj liaj samreligianoj, kiuj ja neniam rezignacie konsentos lian aliĝon al la novaj idealoj. Neniu kredos tian influon ĉe lia neatendita konvertiĝo, tamen li devos bataladi kontraŭ ĉiuj skeptikuloj, ĉar Jesuo, por paroli al lia koro, elektis la plej helan kaj brilantan horon de la tago, sur vasta kaj senarba loko kaj ĉe la sola kompanio de tri viroj multe malpli kleraj ol li kaj ĝuste pro tio nekapablaj ion kompreni per sia mensa krudeco. Taksante la homajn valorojn, li travivis la neelporteblan angoron de tiuj, kiuj troviĝas tute forlasitaj, sed en la kirlego de la rememoroj li klare vidis la figurojn de Stefano kaj Abigail, kiuj havigis al li konsolajn emociojn. Nun li komprenis tiun Kriston, kiu venis en la mondon precipe por la malfeliĉaj kaj malĝojaj. Iam li ribelis kontraŭ la nazareta Mesio, en kies agado li supozis ian nekompreneblan plezuron ĉe sufero; nun, pli bone esplorante sin mem, li sukcesis ĉerpi el sia propra sperto la plej profitajn konkludojn. Malgraŭ la titoloj en la Sinedrio, la politikaj devoj, la renomo, ĉio ĉi, kio faris lin estimata ĉie, kio nun li estis alia, ol iu bezonanta la dian protekton? La mondaj konvencioj kaj la religiaj antaŭjuĝoj havigis al li ian ŝajnan trankvilecon; suffiĉis, ke venis la neprikalkulita doloro, por ke li taksu siajn grandegajn bezonojn. Abisme dronante en la lin envolvanta blindeco, li fervore preĝis, turnis sin al Dio, ke ĉi Tiu ne lasu lin senhelpa, petis Jesuon klarigi lian menson, turmentatan de la ideoj de angoro kaj senprotekteco.

En la tria tago de varmaj preĝoj jen la gastejmastro sciigis lin, ke iu deziras paroli al li. Ĉu Cadok? Saŭlo soifis ian karesan, amikan voĉon. Li enkondukigis la

vizitanton. Tie staris maljunulo kun trankvila kaj simpatia mieno, sed la konvertito ne povis vidi liajn respektindajn grizajn harojn kaj lian noblan rideton.

La silento de la vizitanto montris, ke ili ne konas unu alian.

– Kiu vi estas? – demandis la blindulo kun miro.

– Frato Saŭlo – dolĉe respondis la demandito –, la Sinjoro, kiu aperis al vi sur la vojo, sendis min en ĉi tiun domon, por ke vi regajnu la vidadon kaj ricevu la lumon de la Sankta Spirito.

Aŭdinte lin, la junulo el Tarso afliktite ekpulpis en la mallumo. Kiu estas tiu viro, kiu sciis tiujn okazaĵojn sur la vojo? Ĉu iu konato de Jakob? Sed... tiu tono de kompatoplena, karesa voĉo?

– Via nomo? – li demandis iom terurita.

– Ananias.

Ĉi tiu respondo estis revelacio. La persekutata ŝafo venis renkonte al la karnoŝira lupu. Saŭlo komprenis la lecionon, kiun la Kristo al li donas. La ĉeesto de Ananias revokis en lian memoron la faktojn plej sanktajn por li. Ananias estis la inicinto de Abigail en tiun doktrinon kaj la motivo de lia vojaĝo Damaskon, kie li renkontis Jesuon kaj la renovigan veron. Posedite de profunda respekto, li ekvolis antaŭenpaŝi genuiĝi antaŭ tiu disĉiplo de la Sinjoro, kiu lin dolĉe nomis “frato”, kortuŝite kisi ties bonfarajn manojn, sed li nur palpis en la aero, ne sukcesante plenumi tiun plej agrablan deziron.

– Mi dezirus kisi vian tunikon – li humile kaj danke diris –, sed, kiel vi vidas, mi nun estas blinda!

– Jesuo sendis min ĝuste por tio, por ke vi rehavu la vidadon.

Tre kortuŝita, la maljuna disĉiplo de la Sinjoro rimarkis, ke la kruela persekutanto de la apostoloj de la “Vojo” estas nun tute alia homo. Aŭdante lian parolon plenan de fido, Saŭlo el Tarso travidigis tra la mieno signojn de profunda interna ĝojo. El la vualitaj okuloj ekfluadis kristalaj larmoj. Tiu flamanta kaj kaprica junulo lernis esti humana kaj humila.

– Jesuo estas la eterna Mesio! Mi metis mian anim-

on en liajn manojn! – li diris samtempe kortuŝita kaj esperplena. – Mi pentas mian vojon!

Plorante de sincera pento, ne sciante esprimi sian dankon pro tiu horo kaŭze de la mallumo, kiu malfaciligis lian iradon, li humile genuiĝis.

La grandanima maljunulo ekdeziris antaŭeniĝi, malhelpi tiun agon de ekstrema sinofero, konsiderante sian propran naturon de erarema kaj neperfekta homo; sed, dezirante stimuli ĉiujn rimedojn de tiu flamanta animo, por la bono de ĝia plena konvertiĝo al la Kristo, li kortuŝita alproksimiĝis kaj, metinte la kalan manon sur tiun turmentatan frunton, diris:

– Frato Saŭlo, en la nomo de Dio Ĉiopova mi baptas vin en la novan kredon al Kristo Jesuo!

Ĉe la varmaj larmoj, kiuj fluadis el liaj okuloj, la tarsa junulo penteme diris:

– La Sinjoro volonte pardoni miajn pekojn kaj prilumi miajn intencojn por iu nova vivo.

– Nun – diris Ananias, metinte la manojn sur liajn senlumajn okulojn kaj per amoplena tono –, en la nomo de la Savinto mi petas Dion, ke vi ree ricevu vian vidpovon.

– Se plaĉas al Jesuo, ke tiel estu – kortuŝite diris Saŭlo –, mi oferas miajn okulojn al liaj sanktaj servoj por ĉiam.

Kaj kvazaŭ ekagis grandaj nevideblaj fortoj, li ek-sentis, ke de liaj dolorantaj palpebroj falis peza substanco, kvazaŭ skvamoj, kaj dume la vidpovo refariĝis, pleniĝante per lumo. Tra la malfermita fenestro li vidis la helan ĉielon super Damasko kaj spertis nedifineblan feliĉon ĉe tiu oceano da brilegaj lumoj. La matena venteto, kvazaŭ parfumo el la suno, venis kisi lian frunton kaj por lia koro estis ia beno de Dio.

– Mi vidas! Nun mi ja vidas! Glorata estu la savinto de mia animo! – li ekkriis, etendante la brakojn en impeto de danko kaj amo.

Ankaŭ Ananias ne plu sin detenis; ĉe tiu granda elmonstro de la favorkoreco de Jesuo la maljuna disĉiplo de la Evangelio brakumis la tarsan junulon, plorante de danko al Dio pro la ricevitaj favoroj. Tremante de ĝojo,

li levis Saŭlon per siaj servemaj brakoj, subtenante ties animon surprizitan kaj konfuzitan de ĝojego.

– Frato Saŭlo – li entuziasme diris –, ĉi tiu estas nia granda tago; ni nin reciproke brakumu ĉe la sankta memoro al la Majstro, kiu interfratigis nin per sia granda amo!

La damaska konvertito ne diris eĉ unu vorton. La danklarmoj lin sufokis. Brakumante la iaman predikiston, per esprimoplena silenta gesto, li faris ĝin, kvazaŭ li trovis la sindonan kaj amantan patron de lia nova ekzistado. Dum kelke da sekundoj ili silentadis, ravitaj de la dia fingro, kvazaŭ du fratoj, tre amantaj unu la duan kiuj repaciĝis sub la okuloj de Dio.

Saŭlo nun sentis sin vigla kaj lertmova. En minuto ŝajnis, ke li rericervis ĉiujn fortojn de sia vivo. Rekonsciĝinte de la dia ĝojo, kiu lin feliĉigis, li ekprenis la manon al la maljuna disĉiplo kaj respektete ĝin kisis. Al Ananias larmoj staris en la okuloj; li mem ne povis esti antaŭvidinta la grandegajn ĝojojn, kiuj atendis lin en la modesta gastejo sur la Rekta strato.

– Vi revivigis min por Jesuo – li ĝojplena diris –, mi apartenos al li por eterne. Lia favorkoreco revigligos mian malfortecon, kompatos miajn vundojn, sendos helpon al la mizereco de mia peka animo, por ke la koto de mia spirito turniĝu en oron de lia amo.

– Jes, ni apartenas al la Kristo – jesigis la grandanima maljunulo kun ĝojo elverŝiĝanta el liaj okuloj.

Kaj kvazaŭ subite fariĝinte ia knabeto, avidanta instruojn, Saŭlo el Tarso, sidiĝinte apud sian amikan bonfaranton, petis de li ĉiajn informojn pri la Kristo, pri ties senmortaj konsiloj kaj agoj. Ananias raportis al li ĉion, kion li sciis pri Jesuo pere de la Apostoloj, post la krucumo, kiun ankaŭ li ĉeestis en Jerusalemo, en tiu tragedia posttagmezo sur Kalvario. Li diris, ke li estis ŝuisto en Emaŭ kaj ke li iris en la sanktan urbon por la Pasko, kaj tie li akompanis la korŝiran dramon tra la stratoj plenŝtopitaj de popolanoj. Li parolis pri la kompatado, kiun vekis ĉe li la Mesio kun dorna krono kaj sub la milfajfado de la furioza kaj senkonsciencia popolaĉo. Profundan emociion li elmontris, priskribante la

penigan iradon de Jesuo sub la kruco, protektata de senkompataj soldatoj kontraŭ la popola furiozo, kiu sovaĝe blasfemis kontraŭ Jesuo. Scivola pri la irado de la okazaĵoj, li sekvis la kondamniton ĝis la monto. De sur la tortura kruco Jesuo adresis al li neforgeseblan rigardon. Laŭ lia spirito tiu rigardo esprimis sanktan alvokon, kiun li nepre devis kompreni. Profunde impresite, li ĉion ĉeestis ĝis la fino. Post tri tagoj, ankoraŭ sub la pezo de tiuj doloraj impresoj, jen venis al li la ĝojiga sciigo, ke la Kristo releviĝis de la mortintoj en la eternan gloron de la Ĉiopova. La disĉiploj de la Mesio estis ebriaj de feliĉo. Li tiam iris al Simon Petro, por pli bone ekoni la personon de la Savinto. Tiel superbela estis la priskribo, tiel altaj la instruoj, tiel profundaj la informoj, kiuj prilumis lian spiriton, ke li senhezite akceptis la Evangelion. Dezirante partopreni en la laboro, kiun Jesuo postlasis al siaj adeptoj, li revenis Emauson, forcedis sian materialan havon kaj atendis la galileajn Apostolojn en Jerusalemon, kie li kuniĝis kun Petro en la unuaj laboroj de la eklezio de la “Vojo”. La esenco de la instruoj de la Kristo vigligis lian spiriton. La malsanetoj de la maljuneco malaperis. Tuj kiam Johano kaj Filipo venis Jerusalemon, por kunlabori kun la iama fiŝkaptisto el Kapernaum en la starigo de la Evangelio, ili interkonsente decidis transforigi lin en Jafon, por kontentigi sennombrajn petojn de fratoj, dezirantaj ekoni la doktrinon. Li tie estis, ĝis la persekutoj, plistreĉigitaj post la morto de Stefano, devigis lin foriri.

Saŭlo sorbadis liajn vortojn kun aparta raviteco, kiel iu, kiu enpaŝis en ian novan mondon. La menciado de la persekutoj pliakrigis la pikantajn riproĉojn de la konscienco. Kompense, la animo estis plena de sinceraj deziroj, promesantaj ian novan vivon.

– Efektive – li diris, dum la rakontanto faris longan paŭzon –, mi venis Damaskon kun rajtigo de la Templo, por forkonduki vin arestitan en Jerusalemon, sed vi venis kun ordono de Jesuo kaj al li vi min por ĉiam ligis. Se mi katenus vin, en mia senscio, mi pelus vin al turmentado kaj morto; vi, savante min de la peko, turnis min en volontan kaj feliĉan sklavon!

Ananias ridetis treege kontenta.

Saŭlo tiam petis lin paroli pri Stefano, pri kio Ananias lin afable kontentigis. Poste li petis informojn pri ties veturado de Jafo al Jerusalemo. Tre singarde li deziris de sia bonfaranto ian aludon al Abigail. Sian peton li faris kun tia amplena tono, ke la maljuna disĉiplo, kompreninte lian intencon, milde parolis:

– Vi ne bezonas konfesi viajn junulajn sopirojn: en viaj okuloj mi legas, kion vi antaŭ ĉio deziras. Inter Jafo kaj Jerusalemo mi longe estadis najbare de unu samlandano, kiu, kvankam fariseo, neniam malhelpis siajn servantojn ricevi la sanktajn ĝojojn de la Bona-Novaĵo. Tiu viro, Zeĥarja, havis en sia domo veran ĉielan anĝelon; tio estis la juna Abigail, kiu, ricevinte de miaj manoj la bapton, konfesis, ke ŝi vin tre amas. Ŝi paroladis pri via amo kun varma koreco kaj ofte invitis min preĝi por via konvertiĝo al Jesuo Kristo!

Saŭlo lin emociite aŭdadis kaj post nelonga halto, dum kiu la kormilda maljunulo ŝajnis mediti, diris, kvaŭ parolante en sia animo:

– Ho, se ŝi ankoraŭ vivus!

Ananias aŭdis ĉi tiun rimarkon sen surprizo kaj diris:

– De kiam Abigail venis al mi, mi rimarkis, ke ŝi ne longe restos plu sur la Tero. Ŝia pala vizaĝo, la intensa brilo de ŝiaj okuloj parolis al mi pri ŝia stato de ia ekzilita anĝelo; sed ni devas kredi, ke ŝi vivas en la senmorta regiono, kaj eble ŝiaj petoj ĉe la piedoj de Jesuo kunhelpis por tio, ke la Majstro vokis vin al la lumo de la Evangelio proksime al la pordegoj de Damasko!

La maljuna disĉiplo de la “Vojo” estis kortuŝita. Ricevante tiujn karesajn rememorigojn, Saŭlo ploradis. Li ja komprenis, ke Abigail ne povas esti mortinta. Lia vido je Jesuo reviviĝinta sufiĉis por li, por disbati ĉiujn dubojn. Certe tiu anĝelo, elektita de lia animo, kompatis liajn malkorektaĵojn kaj insiste petis la Sinjoron helpi lian malnoblan spiriton; kaj dank'al feliĉa kuntrafiĝo tiu sama Ananias, kiu preparis ŝian koron por la benoj de la Ĉielo, etendis al li siajn amikajn manojn, plenajn

de amo kaj pardono. De nun li por ĉiam apartenos al tiu plena kaj justa Kristo, kiu ja estas la promesita Mesio. Kun la ekstremaj emocioj, kiuj karakterizis liajn sentojn, li komencis konsideradi la povon de la Evangelio, ekzamenante ĝiajn senlimajn aliĝajn rimedojn. Li volis penetrigi sian spiriton en ĝiajn lumajn kaj altegajn lecionojn, bani sin en tiu rivero de vivo, kies akvo de la amo de Jesuo fekundigas la plej sekajn kaj dezertecajn korojn. Tiu profunda meditado nun posedis lian tutan animon.

– Ananias, mia majstro – entuziasme diris la eksrabeno – kie mi povos ekhavi la sanktan Evangelion?

– Antaŭ ĉio, ne nomu min majstro; tio estas kaj ĉiam estos la Kristo; ni ĉiuj, per aldono de dia favorokoreco, estas disĉiploj, fratoj en la bezono kaj en la el-aĉeta laboro. Rilate la ekhavon de la Evangelio, nur en la eklezio de la “Vojo”, en Jerusalemo, ni povos ricevi kompletan kopion el la notoj de Levi.

Kaj serĉfosante en eluzita sako, li elprenis kelke da flaviĝintaj pergamenfolioj, sur kiuj li sukcesis kolekti iom da elementoj de la apostola tradicio. Prezente tiujn disajn notojn, Ananias aldiris:

– Pri tio buŝe transdirita, mi tenas parkere preskaŭ ĉiujn instruojn; pri tio, tuŝanta la parton skribitan, jen vi ĉi tie havas ĉion, kion mi posedas.

La tarsi junulo, forte mirante, ricevis tiujn notojn. Li tuj kliniĝis super la malnovajn skribaĵojn kaj kun nekastebla interesiĝo ilin glutadis.

Konsiderinte kelke da minutoj, li diris:

– Se eble, mi petus vin lasi ĉe mi ĉi tiujn altvalorajn instruojn ĝis morgaŭ. Mi pasigos la hodiaŭan tagon, kopiante ilin por mia persona uzado. La gastejmaŝtro aĉetos por mi la necesajn pergamenfoliojn.

Kaj kvazaŭ jam ricevinte tiun misiistan spiriton, kiu dum lia restanta vivo difinis liajn eĉ plej malgrandajn agojn, li zorgis konsideris:

– Ni devas serĉi al ni ian rimedon, por disvastigi la novan revelacion kun la plej granda amplekso. Jesuo estas ia helpilo de la Ĉielo. Malfrui kun lia mesaĝo estas plidaŭrigi la malesperon de la homoj. Cetere la vorto

“evangelio” signifas “bonan novaĵon”. Estas nepre necese dissemi tiun novaĵon de la plej alta regiono de la vivo.

Dum la maljuna predikanto de la “Vojo” lin interese observadis, la konvertito apud Damasko vokis la gastejestron, por aĉeti la pergamenfoliojn. Judas surpriziĝis, konstatinte tiun strangan resaniĝon. Kontentigante lian scivolon, la tarsa junulo parolis sen ĉirkaŭfrazoj:

– Jesuo sendis al mi kuraciston. Ananias venis, por resanigi min en lia nomo.

Kaj antaŭ ol tiu sinjoro retrankviliĝis el sia mirego, li superŝutadis tiun per rekomendoj pri la folioj, kiujn li deziris, kaj donis la necesan sumon da mono.

Lasante liberan kuron al la entuziasmo, kiu bolis en lia animo, li denove sin turnis al Ananias, al kiu li elvolvis siajn planojn:

– Ĝis hodiaŭ mi okupis mian tempon per la studado kaj ekzegezo de la Leĝo de Moseo, sed nun mi pleningos miajn horojn per la spirito de la Kristo. Mi laboros super ĉi tiu tasko ĝis la fino de miaj tagoj. Mi penas komenci mian laboron ankoraŭ ĉi tie en Damasko.

Kaj farinte kelkan paŭzon, li demandis sian bonfaranton, kiu aŭdadis lin silente:

– Ĉu vi konas en ĉi tiu urbo junulon fariseon kun la nomo Cadok?

– Jes, li estas la kondukanto de la persekutoj en ĉi tiu urbo.

– Nu – ĝentile daŭrigis la tarsa junulo –, morgaŭ estos sabato kaj okazos prelego en la sinagogo. Mi intencas iri al miaj amikoj kaj publike paroli al ili pri la alvoko de la Kristo al mi. Ankoraŭ hodiaŭ mi volas studi viajn notojn, ĉar ili donos al mi temon por mia unua prediko pri la Evangelio.

– Sincere parolante – diris Ananias kun sia sperto pri la homoj –, mi opinias, ke vi devas esti tre singarda dum ĉi tiu nova religia fazo. Viaj amikoj en la sinagogo eble ne estas preparitaj, por ricevi la lumon de la tuta vero. La malsincereco ĉiam disponas rimedojn, por provi konfuzi ĉion, kio estas pura.

– Sed se mi ja vidis Jesuon, mi do ne rajtas vualigi nekontesteblan malkaŝon – rediris la neofito, kvazaŭ reliefigante antaŭ ĉio la bonan intencon, kiu lin movis.

– Bone, mi ne diras, ke vi elturnu vin de la atesto – trankvile klarigis la maljuna disĉiplo –, sed mi devas rekomendi la plej grandan mezuratecon en la konduto, ne pro la doktrino de la Kristo, supera kaj nevundebla por ĉiaj atakoj de la homoj, sed ja pro vi mem.

– Kio min tuŝas, mi povas timi nenion. Se Jesuo rehavigis al mi la lumon de la okuloj, li do certe prilumos miajn vojojn. Mi volas sciigi Cadokon pri tiu okazaĵo, kiu donis novan direkton al mia destino, kaj la okazo ne povus esti pli ĝustatempa, ĉar mi scias, ke li nun gastigas en sia domo kelke da famaj levidoj, ĵus venintaj el Kipro.

– La Majstro benu viajn bonajn intencojn – diris la maljunulo ridetante.

Saŭlo sentis sin feliĉa. La ĉeesto de Ananias lin senfine konsolis. Kvazaŭ malnovaj kaj fidelaj amikoj, ili tagmanĝis duope. Tuj poste kaj ĉiam kontenta, la nobla sendito de la Kristo foriris, lasante la eksrabenon tute donita al la skrupula kopiado de la tekstoj.

En la sekvanta tago Saŭlo el Tarso ellitiĝis bonhumora kaj sangvina. Li sentis sin revigliĝinta por nova vivo. La amaraj rememoroj forflugis de lia menso. La influo de Jesuo plenigis lin per fortodonaj kaj daŭremaj ĝojoj. Li havis la impreson, kvazaŭ li elhakis en sia animo novan pardonon, tra kiu rapide enblovis la inspiroj de ia pli granda mondo.

Post la unua manĝo, malgraŭ la ĉagreno, kiun kaŭzis al li la konduto de Cadok, li penis vidiĝi kun tiu amiko, instigite de la sincereco, kiu signis liajn eĉ plej sensignifajn agojn en la vivo, sed ne trovis lin en lia loĝejo; unu servanto informis, ke lia mastro eliris kune kun kelke da gastoj al la sinagogo.

Saŭlo iris tien. La laboroj de tiu tago estis jam komencitaj. Oni jam faris la legadon de la tekstoj de Moseo. Unu el la levidoj el Citium estis preninta la parolon por la koncernaj komentarioj.

La eniro de la eksrabeno vekis la scivolon de ĉiuj. La plej multaj ĉeestantoj sciis lian personan gravecon kaj ankaŭ lian flaman kaj trafan parolon. Sed Cadok, ekvidinte lin, paliĝis kaj ankoraŭ pli, kiam la tarsa junulo petis lin pri aparta parolo. Kvankam ĝenata, Cadok iris al li renkonte. Ili sin reciproke salutis, ne kaŝante la novan impreson, kiun ili jam nun havis unu pri la dua.

Ĉe la unuaj rimarkoj de la novebakita ano de la Evangelio, faritaj per afabla tono, la amiko el Damasko diris, elmontrante sian ofenditan fieron:

– Efektive, mi sciis, ke vi troviĝas en la urbo, kaj eĉ iris al vi en la gastejon de Judas, sed la informoj de tiu gastejmastro estis tiaj, ke mi detenis min iri en vian ĉambron; mi eĉ petis de li sekreton pri mia vizito. Ŝajnis ja nekredeble, ke ankaŭ vi kapitulacis antaŭ la sorĉaĵoj de la “Vojo”! Mi ne povas kompreni tian aliĝon de via fortika menso.

– Sed, Cadok – tre trankvile rediris la tarsa junulo –, mi ja vidis Jesuon resurektintan...

Lia amiko faris grandan penon, por reteni tondran ridegon.

– Ĉu tio ja fariĝis – moke kontraŭmetis la amiko –, ke via sentimentala temperamento, tiel malinklina al mistikaĵoj, lasis sin venki en tiu afero? Ĉu vi ja kredas tiajn viziojn? Ĉu vi ne povas supozi, ke vi estis ludilo de iu alivestita adepto de la “Vojo”? Via nuna konduto kaŭzos al ni profundan honton. Kion diros la stultuloj, kiuj konas nenion pri la Leĝo de Moeseo? Kaj nia pozicio en la superreganta partio de la raso? La kolegoj de la fariseismo larĝe malfermos la okulojn, kiam ili ekscios pri via krianta defalo. Mi akceptis la taskon persekuti la krimulojn de la nazareta ĉarpentisto, bridante iliajn danĝerajn laborojn, nur pro la amikeco, kiun mi portis por vi, kaj ne doloras vin la perfido al la antaŭaj promesoj? Konsideru, kiel malfacila fariĝos nia celo, kiam diskoniĝos la sciigo, ke vi kapitulacis antaŭ tiuj senkulturaj kaj senkonsciencaj homoj.

Saŭlo fiksas la okulojn sur sia amiko, elmontrante grandegan konsternitecon en la maltrankvila rigardo. Ĉi tiuj akuzoj estis la unuaj manifestiĝoj de la akcepto, kiu

atendis lin en la rondo, de la malnovaj kamaradoj de religiaj bataloj kaj edifoj.

– Ne – li diris, funde sentante ĉiun vorton –, mi ne povas akcepti viajn riproĉojn. Mi ree diras, ke mi ja vidis Jesuon el Nazaret, kaj mi devas proklami, ke en li mi agnoskas la Mesion, promesitan de niaj plej eminentaj profetoj.

Cadok faris larĝan geston de miro, rimarkinte tiun tonon de certeco kaj sincereco, sed Saŭlo daŭrigis, konvinkite:

– Cetere mi opinias, ke en ĉiu tempo ni devas kaj povas rebonigi la pasintatempajn erarojn, kaj kun tiu flameco de la fido mi estas preta rebonigi miajn vojojn. Mi de nun laboros por mia firmeco en Kristo Jesuo. Ne estas juste, ke mi perdu tempon en iaj sentimental-ecaj konsideroj, flanken metante la veron; kaj tiel mi agos por la bono de miaj amikoj mem. La amantoj de la realaĵoj de la vivo ĉiam estis la plej malamataj homoj en la tempo, kiam ili vivis. Kio do! Ĝis hodiaŭ miaj predikoj fontadis el la tekstoj, kiujn ni ricevis de la respektindaj prauloj, sed hodiaŭ miaj asertoj baziĝas ne nur sur la kolekto da tradiciaĵoj, sed ankaŭ sur la atesta pruvo.

Cadok ne sukcesis kaŝi sian surpriziĝon.

– Sed... via pozicio? Kaj viaj parencoj? Kaj via nomo? Kaj ĉio, kion vi ricevis de tiuj, kiuj ĉirkaŭigas vian personon per fervoraj ŝuldiĝoj? – demandis Cadok, revokante lin en la pasintecon.

– Nun mi staras ĉe la Kristo kaj ni ĉiuj apartenas al li. Lia dia parolo vokis min al pli varmaj kaj aktivaj penoj. Al tiuj, kiuj min komprenos, mi ja ŝuldas la plej sanktan dankon; kontraŭ tiuj, kiuj ne povos min kompreni, mi havos la plej serenan teniĝon, konsiderante, ke la Majstro mem estis kondamnita al krucumo.

– Ĉu ankaŭ vi portas la manion de martireco?

La demandito prenis belan teniĝon de persona digno kaj rediris:

– Mi ne povas vane atenti malsaĝajn opiniojn. Mi atendos, ĝis via amiko el Kipro finos sian prelegon, por rakonti mian travivaĵon en la ĉeesto de ĉiuj.

– Ĉu pri tio paroli ĉi tie?

– Kial do ne?

– Estus pli saĝe, se vi ripozus de la vojaĝo kaj de la malsaneco, kiam vi pli bone meditus pri la afero, des pli, ke mi esperas al viaj rekonsideroj pri la okazintaĵo.

– Sed vi ja scias, ke mi ne estas ia infano, kaj mi devas klarigi la veron, kia ajn la cirkonstanco.

– Kaj se oni vin mokfajfos? Kaj se vi estos rigardata kiel perfidulo?

– La fideleco al Dio devas esti, en niaj okuloj, pli granda ol ĉio ĉi.

– Tamen eble oni ne donos al vi la parolon – konsideris Cadok, renkontinte la kontraŭstaron de la forto de tiuj enradikiĝintaj konvinkoj.

– Mia situacio estas suffiĉa por tio, por ke neniu kuraĝu rifuzi al mi tion, kio estas laŭ la justeco.

– Nu, tiel estu. Vi respondos por la sekvoj – finis Cadok ĝenita.

En tiu momento ili ambaŭ komprenis la larĝecon de la abismo, kiu ilin apartigis unu de la dua. Saŭlo rimarkis, ke la amikeco, kiun Cadok ĉiam elmontradis al li, estis bazita sur pure homaj interesoj. Forlasinte la falsan karieron, kiu havigis al li prestiĝon kaj brilon, li vidis disfumiĝi ties amikecon. Sed el ĉi tiu konsidero tuj venis al li en la kapon tio, ke ankaŭ li eble same kondutis, se li ne havus Jesuon en sia koro.

Serena kaj brava li intence ne alproksimiĝis al la loko, kie troviĝis la eminentaj vizitantoj, kaj direktis sin al la larĝa estrado, kie oni starigis novan tribunon. Kiam finiĝis la disertacio de la levido el Citium, Saŭlo ekaperis antaŭ ĉiuj ĉeestantoj, kiuj lin salutis kun maltraktivaj rigardoj. Li afable salutis la direktantojn de la kunveno kaj petis la permeson elvolvi siajn ideojn.

Cadok anticipe ne kuraĝis estigi antipatian atmosferon, lasante, ke ĉio iradu laŭ la cirkonstancoj; tial la pastroj premis al Saŭlo la manon kun sama simpatio, kiel ĉiam, kaj treege ĝoje ricevis tiun lian proponon.

Havante la parolon, la eksrabeno levis la frunton kun tia sama digno, kian li montradis en siaj triumfaj tagoj.

– Viroj de Izrael! – li solene komencis. – En la nomo de la Ĉiopova mi hodiaŭ, je la unua fojo, anoncas al vi la veraĵojn de la nova revelacio. Ni ĝis nun ne konis la kulminan fakton en la vivo de la homaro. La promesita Mesio jam venis, kiel asertis la profetoj, kiuj gloriĝis per virto kaj suferado. Jesuo el Nazaret estas la Savinto de la pekuloj.

Bombo, kiu eksplodus en tiu ĉambro, ne naskus pli grandan miregon. Ĉiuj, perpleksaj, fikse rigardadis la parolanton. La kunvenantaro estis ŝtoniĝinta. Tamem Saŭlo post kelka paŭzo brave daŭrigis:

– Ne miru pro ĉi tio, kion mi al vi diras. Vi ja konas mian konsciencon laŭ la honesteco de mia vivo, laŭ mia fideleco al la diaj leĝoj. Nu, apogita ĝuste al ĉi tiu pasinteco, mi hodiaŭ parolas al vi, riparante la pretervolajn erarojn, kiujn mi faris ĉe la sinceraj impulsoj en kruela kaj maljusta persekutado. En Jerusalemon mi antaŭ kaj pli ol ĉiuj aliaj kondamnis la apostolojn de la “Vojo”; mi iniciatis la unuiĝon de romanoj kaj izraelidoj por la senhalta malebligo de ĉiaj entreprenoj, tuŝantaj la Nazaretanon; mi perforte traserĉis sanktajn hejmojn, enkarcerigis virinojn kaj infanojn, submetis kelkajn el tiuj al mortpuno, okazigis multenombrian elmigron de la laboristoj, kiuj pace laboradis en la urbo por ĝia progreso; mi starigis por ĉiuj plej sinceraj spiritoj reĝimon el mallumo kaj teruro. Ĉion ĉi mi faris, erare supozante, ke mi defendadas Dion, kvazaŭ la Superega Patro bezonus iajn mizerajn defendantojn! Sed dum la vojiro al ĉi tiu urbo, rajtigite de la Sinedrio kaj de la Provinca Kortumo, por invadi aliulajn hejmojn kaj persekuti sendanĝerajn kaj senkulpajn homojn, jen Jesuo ekaperis al mi proksime al viaj pordegoj kaj ĝuste tagmeze sur tiu senarba kaj senhoma ebenaĵo, demandis min: – Saŭlo, Saŭlo kial vi min persekutas?

Ĉe tiu ĉe rememoro lia elokventa parolo moliĝis kaj liaj larmoj abunde fluadis. Li paŭzis, rememorante tiun okazaĵon decidigan de lia destino. La aŭdantoj lin rigardadis kun mirego.

– Kio ĉi tio estas? – demandis iuj el ili.

– La leĝisto el Tarso ŝercas! – ridetante diris aliaj,

konvinkitaj, ke la juna oratoro celas pli grandan parol-efekton.

– Ne amikoj – li vigle rediris –, mi neniam ŝercis antaŭ vi sur la sanktaj tribunoj. La justa Dio ne permesis, ke mia krima perfortemo iru ĝis la fino, malprofite por la vero, kaj konsentis, per aldono de favorkoreco, ke la mizera servanto ne renkontu la morton, antaŭ ol alporti al vi la lumon de la nova kredo!

Malgraŭ la ardo de la prediko, kiu postlasis en ĉiuj oreloj emociajn eĥojn, stranga voĉmurmuro leviĝis en la ĉambro. Iuj pli ekzaltiĝemaj fariseoj mallaŭte demandis Cadokon pri tiu neatendita okazaĵo kaj ricevis la konfirmon, ke Saŭlo efektive ŝajnas treege menskonfuzita, dirante, ke li vidis la nazaretan ĉarpentiston proksime al Damasko. Tuj fariĝis terura tumulto en la tuta ĉambro, ĉar iuj vidis en la okazo danĝeran defalon de la rabeno kaj aliaj ian subitan malsanon, kiu lin frenezigis.

– Viroj el mia iama kredo – pli energie tondris la voĉo de la tarsi junulo –, vi senutile provus maski la veron. Mi ne estas perfidulo, nek estas malsana. Staras antaŭ ni nova erao, antaŭ kiu ĉiuj niaj religiaj kapricoj estas sensignifaj.

Hajlo da insultoj subite interrompis lian parolon.

– Malkuraĝulo! Blasfemanto! Hundo de la “Vojo”!
For la perfidinto de Moseo!

La pikmokoj flugadis de ĉiuj flankoj. Tiuj plej korigitaj al la eksrabeno, kiuj inklinitis kredi lin atakita de seriozaj mensperturboj, venis en konflikton kun la pli krudaj kaj rigoraj fariseoj. Kelke da bastonoj estis fortege ĵetitaj kontraŭ la tribunon. La grupoj, kiuj sin interbatis, faris grandegan tumulton en la sinagogo, el kio la parolanto rimarkis, ke ili staras ĉe la rando de ne-rebonigeblaj malfeliĉoj.

Tiam unu el la plej aĝaj levidoj suriris la grandan estradon, de kie li plej eble ekkriegis kaj petis la ĉeestantojn akompani lin en la deklamado de unu el la Psalmoj de David. Ĉi tiu invito estis akceptita de ĉiuj. Tiuj plej ekzaltiĝintaj eldiris la preĝon plenaj de honto.

Saŭlo sekvis la scenon kun profunda interesiĝo.

Post la preĝo la pastro kun incita emfazo diris:

– Ni bedaŭru ĉi tiun epizodon, sed ni ne faru tumulton, kiu donas nenion utilan. Ĝis hieraŭ Saŭlo el Tarso honoradis niajn vicojn kiel modelo de triumfo; hodiaŭ lia parolo estas por ni ia dorna branĉo. Li havas respektindan pasintecon, sed ĉi tiu lia konduto meritas de ni nur kondamnon. Ĉu perfido? Ĉu frenezeco? Mi ĝin certe ne scias. Se la parolanto estus alia homo, ni sen ia meditado lin ŝtonumus, sed kontraŭ iama kolego la procedoj devas esti malsamaj. Se li estas malsana, li indas nur kompaton; se perfidulo, li povas meriti nur absolutan malŝaton. Jerusalemo juĝu lin kiel sian senditon. De nia flanko ni fermu la predikojn en la sinagogo kaj rifuĝu en la pacon de la fidelaj plenumantoj de la Leĝo.

La eksrabeno elportis ĉi tiun riproĉon kun granda sereneco, kiu vidiĝis tra liaj okuloj. En sia animo li sentis sin vundita ĉe sia memestimo; la restaĵoj el la “malnova homo” postulis revenĝon kaj tujan kompenson sur tiu sama loko en la ĉeesto de ĉiuj. Li ekvolis denove paroli, postuli la parolon, devigi siajn kamaradojn aŭdi lin, sed sentis sin kaptita de nereteneblaj emocioj, kiuj bridis liajn eksplodajn impulsojn. Senmova, li vidis, ke malnovaj amikoj el Damasko trankvile forlasas la ĉambron, farante al li eĉ ne supraĵan saluton. Li vidis ankaŭ, ke la levidoj el Citium laŭŝajne lin komprenas per rigardo de simpatio, dum Cadok lin fikse rigardadis kun ironio kaj venkrikanado. Tio estis la veninta repuŝo. Kutiminte al la aplaŭdoj ĉie, kien ajn li venis, li estis viktimo de sia propra iluzio, kredante, ke por sukcese paroli pri Jesuo, sufiĉas la efemeraj laŭroj, jam konkeritaj el la mondo. Li eraris. Liaj egaluloj metis lin flanken kiel senutilan. Nenio doloris lin pli ol tio, ke lia servemo ne estas uzata, dum en lia animo ardis pastra fervoro. Li tolerus, se oni lin vangofrapus, lin arestus, lin skurĝus, sed oni ne forprenu de li la okazon libere diskuti, ĉiujn venkante kaj konvinkante per la logikeco de siaj argumentoj. Tiu forlaso lin profunde vundis, ĉar, flanken metante ĉian alian konsideron, li konfesis al si, ke li agas ne por sia propra persono, ne pro vantamo aŭ egoismo, sed por liaj kolegoj mem, alkroĉitaj

al la rigidaj kaj neflekseblaj konceptoj de la Leĝo. La sinagogo iom post iom fariĝis senhoma ĉe la varmeĝo de la unuaj posttagmezaj horoj. Saŭlo eksidis sur kruda benko kaj ekploris. Tio estis la batalo inter la iama vantamo kaj la komenciĝanta abnegacio de si mem. Por konsolo de la premata animo li rememoris la rakonton de Ananias en tiu parto, en kiu Jesuo diris al la maljuna disĉiplo, ke li montros, kiom multe liaj sekvantoj devas suferi pro lia nomo.

Frakasita, li foriris de la preĝejo al sia bonfaranto, por sin konsoli per ties parolo.

Ananias ne montriĝis surprizita ĉe la rakontado de tiuj okazaĵoj.

– Mi estas ĉirkaŭita de grandegaj malfacilaĵoj – diris Saŭlo iom konsternita. – Mi sentas en mi la devon dissemi la novan doktrinon, feliĉigante niaj similulojn. Jesuo plenigis mian koron per neatendita energio, sed la korsekeco de la homoj timigas eĉ la plej fortajn.

– Jes, vere – klarigis la pacienca maljunulo –, la Sinjoro komisiis al vi la taskon de semanto; vi havas tre bonan volon, sed kion faras homo, ricevante tiajn ŝarĝojn? Antaŭ ĉio li penas amasigi la semojn en sia aparta kolektujo, por ke la klopodo estu fruktodona.

La neofito atentis la atingon de ĉi tiu komparo kaj demandis:

– Sed, kion vi deziras diri sub ĉi tio?

– Mi volas diri, ke homo kun pura, honesta vivo, sen la eraroj de la bonintenco mem, estas ĉiam preta planti bonon kaj juston sur la vojo, kiun li iras; sed tiu, kiu jam eraris aŭ portas ian kulpon, devas atesti sian fidon en la propra suferado, antaŭ ol instrui. Tiuj, kiuj ne estas tute puraj aŭ kiuj nenion suferis sur la vojo, neniam estos komprenataj de iu, kiu nur aŭdas ilian parolon: kontraŭ ilia instruado staras ilia vivo mem. Krom tio, ĉio, kio rilatas al Dio, postulas grandan pacon kaj profundan komprenemon. Koncerne vin, vi devas pensi pri la leciono de Jesuo, kiu restadis tridek jarojn inter ni, preparante sin por toleri nian ĉeeston nur dum tri. Por ricevi taskon de la Ĉielo, David intime vivis kun la Naturo paŝtante ŝafojn; por traesplori la vojojn de la

Savonto, Johano, la Baptisto, longe meditadis en la akraj dezertoj de Judujo.

Ĉi tiuj dolĉaj konsideroj de Ananias gutadis en la prematan animon de Saŭlo simile al ia revigliga balzamo.

– Kiam vi estos pli multe suferinta – daŭrigis la bonfaranto kaj sincera amiko –, vi estos rafininta vian komprenpovon pri la homoj kaj la aferoj. Nur la doloro sola instruas nin esti humanaj. Kiam la homo enpaŝas en la plej danĝeran fazon de sia ekzistado, post la matena infaneco kaj antaŭ la vespero de la maljuneco; kiam la vivo abundas per energio, Dio venigas al li la infanojn, por ke per la klopodoj lia koro mildiĝu. Laŭ via konfeso, vi eble neniam estos patro, sed vi ĉie havos ĉe vi la infanojn de Kalvario. Ĉu vi en Jerusalem ne vidis Simonon Petron ĉirkaŭitan de malfeliĉuloj? Vi kredeble havos sur la Tero pli grandan hejmon, kien vi estos vokita, por praktikadi fratecon, amon, pardonon... Ni ja devas morti por la mondo, por ke la Kristo vivu en ni...

Ĉi tiuj tiel puraj kaj mildaj rimarkoj penetris la spiriton de la eksrabeno kvazaŭ balzamo, konsolanta per la anonco de pli vastaj horizontoj. La amoplenaj vortoj de Ananias igis lin rememori iun, kiu lin tre amis. Kun la cerbo, lacigita de la hodiaŭaj luktoj, Saŭlo klopodis por pli bone fiksi la ideojn. Ha, nun li tute klare rememoris: tiu iu estas Gamaliel. Subite venis al li la deziro vidi la maljunan instruanton. Li komprenis la kaŭzon de tiu rememoro, nome, ke ankaŭ li, Gamaliel, kiam ili laste estis kune, parolis al li pri la bezono, kiun li sentis pri la senhomaj lokoj, por mediti pri la superbelaĵoj novaj veraĵoj. Li sciis, ke lia eksinstruanto sin trovas nun en Palmira, kune kun iu frato. Kiel li do ankoraŭ ne ekpensis pri sia iama instruanto, kiu estis por li kvazaŭ patro? Gamaliel lin certe akceptos kun malfermitaj brakoj, ĝojos pri liaj plej freŝdataj konkeroj, donos al li bonvolajn konsilojn pri la vojo, kiun li devas iradi.

Absorbite de dolĉaj rememoroj, li per signifoplena rigardo dankis Ananiason kaj kortuŝite diris:

– Vi estas prava... Mi iros en la dezerton, anstataŭ reveni Jerusalemon rapidece, eble sen fortoj por alfronti la nekomprenemon de miaj kolegoj. Mi havas

en Palmira malnovan amikon, kiu min volonte akceptos. Tie mi kelkan tempon ripozos, ĝis mi povos enprofundiĝi en la senhomajn regionojn, por meditati pri la ricevitaj instruoj.

Ananias kun rideto aprobis ĉi tiun ideon. Ankoraŭ longe ili konversaciis ĝis la momento, kiam la vespero envolvis la animon de la aĵoj en sian mantelon el densa ombro.

La malnova predikisto tiam kondukis la novan adpton al humila kunveno, kiu okazis en tiu sabato jam plena de grandaj disrevidoj por la eksrabeno.

Damasko propre ne havis ian eklezion, tamen ĝi kalkulis multenombrajn kredantojn, kuniĝintajn per la religia idealo de la “Vojo”. La rondo de preĝantoj kunvenis en la domo de modesta lavistino, samkredantino, kiu luigis la ĉambron, por helpi al paralizita infano. Kun profunda miro la tarsi junulo rimarkis tie miniaturon de tiu sceno, kiun li ekvidis je la unua fojo, kiam li ne povis reteni la fortan deziron ĉeesti la famajn predikojn de Stefano en Jerusalemo. Ĉirkaŭ kruda tablo kolektiĝis mizeraj plebaj homoj, kiajn li ĉiam tenadis malproksime de sia socia sfero: analfabetaj virinoj kun infanoj ĉe la brusto, maljunaj senedukaj masonistoj, lavistinoj, kiuj nur fuŝis la lingvon, maljunuloj kun tremantaj manoj, apogitaj al fortikaj bastonoj, plej mizeraj malsanuloj, elmontrantaj signojn de doloraj kadukaĵoj. La ceremonio ŝajnis ankoraŭ pli simpla, ol tiuj de Simon Petro kaj ties galileaj kamaradoj. Ananias estris kaj prezidis en la kunsido. Sidiĝinte al la tablo, simile al patriarko en la sino de sia familio, li petis la benojn de Jesuo por la bonvolo de ĉiuj. Tuj poste li legis la instruojn de Jesuo, ĉi tie kaj tie ĉerpante kelkajn sentencojn de la Dia Majstro sur la disaj pergamenfolioj. Komentariinte la legitan paĝon, ilustrante ĝin per la rakontado de signifoplenaj faktoj, kiujn li konis aŭ persone travivis, la maljuna disĉiplo de la Evangelio forlasadis sian lokon, preteriradis la vicajn da benkoj kaj metadis la manojn sur la malsanulojn kaj mizerulojn. Ordinare, laŭ la kutimo en la unuaj kristanaj ĉeloj de la unua jarcento, rememore de la ĝojo de Jesuo, disdonanta tiun

manĝon al siaj disĉiploj, fariĝis modesta distribuo de pano kaj pura akvo en la nomo de la Sinjoro. Saŭlo kortuŝite prenis al si iom el la simpla pano. Por lia animo la mizera nutraĵo havis la dian guston de la universala frateco; la klara kaj malvarma akvo de la kruda kruĉo gustis al li kvazaŭ ia fluidaĵo de amo, fluanta el Jesuo al ĉiuj estuloj. En la fino de la kunveno Ananias varme preĝadis. Rakontinte la vizion de Saŭlo kaj sian propran, li petis la Savinton protekti la novan servanton, ironitan al Palmira, por pli zorge meditadi pri la multego de liaj korfavoroj. Aŭdante lian peton, kiun la varmo de la amikeco vestis per aparta korelverŝo, Saŭlo ekploris de danko kaj komparis la emocion de la rabeno, kio li estis, kun la servanto de Jesuo, kio li nun deziris esti. En la pompaj kunvenoj de la Sinedrio li neniam aŭdis iun kamaradon preĝi al la Cielo kun tiu supera sincereco. Ĉe tiuj siaj plej korligitaj li trovis nur vanajn laŭdojn, pretajn turniĝi en malnoblaĉajn kalumniojn, kiam li ne povis konsenti al ili materialajn favorojn. Ĉie nur supraĵa estimo, frukto de la ludado de malsuperaj interesoj. Ĉi tie la situacio estis alia. Neniu el ĉi tiuj homoj nefavortiaj de la sorto, venis peti de li iajn komplezojn; ĉiuj ŝajnis kontentaj en la servado al Dio, kiu ilin tiel kolektis por penigaj, konsumantaj laboroj; kaj, krom tio, ili ankoraŭ petis Jesuon doni al li spiritan pacon por lia entrepreno.

Kiam finiĝis la kunsido, al Saŭlo el Tarso staris larmoj en la okuloj. En la eklezio de la “Vojo”, en Jerusalemo, la galileaj apostoloj traktis lin kun aparta respekto, konsiderante lian socian kaj politikan pozicion, de li, ĝuanta la privilegiojn, kiujn al li konsentis la mondaj konvencioj; sed la kristanoj en Damasko lin pli vive impresis, ligis lian animon, ekposedis ĝin por nerompebla kateniĝo per tiu esprimo de konfido kaj koreco, traktante lin kiel fraton.

Unu post unu ili ĉiuj manprenis lin, dezirante al li feliĉan vojon. Kelke da pli humilaj maljunuloj kisis liajn manojn. Tiaj atestoj de amikeco naskis en li novajn fortojn. Se la amikoj de la judismo, spitantaj kaj agresemaj, malŝatis lian parolon, li nun komencis ren-

konti sur sia vojo la infanojn de Kalvario. Li laboros por ili, li dediĉos al ilia konsolado siajn junulajn fortojn. La unuan fojon en sia vivo li ekmontris interesiĝon pri la rideto de la infanetoj. Kvazaŭ dezirante reciproki la ricevitajn elverŝojn de simpatio, li ekprenis en la brakojn malsanan knabeton. En la ĉeesto de la ridetanta kaj dankoplena patrino li ekkareisis la bubon, mallerte glatigis liajn harojn. Inter la pikemaj dornoj de lia flamanta animo komencis elvolviĝi la florojn de karesemo kaj danko.

Ananias estis kontenta. Kune kun la plej fidindaj fratoj li akompanis la novicon ĝis la gastejo de Judas. Tiu modesta nekonata grupo trairis la straton, superverŝatajn de lunlumo, kvazaŭ unu animo, revigliĝante per kristanaj komentarioj. Saŭlo miris, ke li tiel rapide trovis tiun harmoniorimedon, kiu havigis al li perfektan konfidon por ĉiuj. Li havis la impreson, kvazaŭ en la veraj rondoj de la Kristo la amikeco estas io malsama ol ĉio, kio ĝin esprimas en la mondumaj kolektiĝoj. En la diverseco de la sociaj luktoj la superreganta trajto de la rilatoj nun, en liaj okuloj, resume konsistis en la profitoj el la individua intereso, dum en la unueco de penoj en la laboroj de la Majstro ekzistas ia dia stampo de konfido, kvazaŭ la ŝuldiĝoj havas la dian, la originan influon. Ĉiuj parolis, kvazaŭ naskiĝintaj en sama hejmo. Se ili prezentis ian ideon indan je pli granda konsiderado, ili tion faris serene kaj komprenante sian devon; se ili pritraktis negravajn kaj simplajn temojn, la komentarioj havis tonon de sincera kaj konsola ĝojo. Ĉe neniu el ili li vidis la intencon ŝajni malpli sincera en la defendado de siaj vidpunktoj, sed, kontraŭe, ĉe ĉiuj estis simpleco de traktado sen ia ombro da hipokriteco, ĉar ili ordinare sentis sin sub la protekto de la Kristo, kiu antaŭ la konscienco de ĉiu el ili estis la nevidebla ĉeestanta amiko, kiun neniu devis trompi.

Konsolita kaj kontenta, ke li trovis amikojn laŭ la ĝusta senco de ĉi tiu vorto, Saŭlo venis al la gastejo de Judas, kie li plej kortuŝite adiaŭis ĉiujn. Lin mem surprizis la tono de intimeco, per kiu la vortoj eliĝis el liaj lipoj. Nun li komprenis, ke la vorto “frato”, vaste uzata

inter la adeptoj de la “Vojo”, ne estas io sensignifa kaj vana. La kompanianoj de Ananias konkeris lian koron. Li neniam forgesos siajn fratojn el Damasko.

En la morgaŭa tago, dunginte servanton, indikitan de la gastejestro, Saŭlo el Tarso ĉe mateniĝo, kvankam surprizinte la domomastron pro sia decidemo, ekiris al la fama urbo, situanta en oazo meze de la dezerto.

Frue matene jen ekiris el la pordegoj de Damasko du modeste vestitaj viroj, antaŭ malgranda kamelo, ŝarĝita per la necesaj provizoj.

Saŭlo nepre volis foriri tiamaniere, piede, por komenci sian vivon kun sintrudoj, kiuj poste estos por li treege bonefikaj. Li ne plu vojaĝos kiel leĝisto, akompanata de servantoj, sed kiel disĉiplo de Jesuo, limigita al ties programoj. Li tial opiniis preferinde vojaĝi kiel bedueno, por lerni ĉiam kalkuli je siaj propraj fortoj. Sub la rostanta varmego de la tago, sub la refreŝigantaj benoj de la krepusko, lia penso estis fiksita sur tiu, kiu vokis lin de la mondo al nova vivo. La vesperoj en la dezerto, kiam la lunlumo plenigas per revo la senhomecon de la senviva pejzaĝo, estas stampitaj de mistera beleco. Sub la foliaro de iu izolita daktilarbo la konvertito apud Damasko profitis la silenton por profundaj meditoj. La stelpunktitita firmamento sendis nun al lia spirito senĉesajn konsolajn mesaĝojn. Li estis konvinkita, ke lia animo estas forprenita al novaj horizontoj, ĉar per ĉiuj aĵoj de la Naturo ŝajnis al li, kvazaŭ li ricevas la penson de la Kristo, kiu karese paroladis al lia koro.



II

La Teksisto

Kvankam kutiminte al la konstanta sceno de la alveno de fremdlandanoj al la urbo, dank'al ĝia plej favora situacio en la dezerto, tamen la stratirantoj en Palmira kun profunda interesiĝo rimarkis la preterpasadon de tiu bedueno sekvata de modesta servanto, kiu tiradis kadukan kamelon, anhelantan de laceco. Sendube laŭ la karakterizaj trajtoj de lia vizaĝo kaj en la serena energio, kiu travidiĝis tra lia rigardo, ili rekonis en li iun judon.

De sia flanko Saŭlo iradis kun indiferenta mieno, kvazaŭ li jam longe vivus en tiu loko.

Sciante, ke la frato de sia iama instruanto tie estas el la plej konataj kaj bonstataj negocistoj, li ne malfacile ekhavis informojn de unu samlandano, kiu sciigis lin pri ties loĝejo.

Preninte al si ĉambron en ia ordinara gastejo, por revigliĝi de la laciga vojaĝo, li esploris sian monujon, por alkomformigi sian programon. La mono konsumiĝadis, apenaŭ sufiĉis por pagi la sindonan vojkamaradon, kiu estis por li fidela amiko tra la tuta peniga irado. Eksciinte, kiom li devas pagi, kaj konstatinte la nesufiĉecon de siaj moneroj, li humile diris al tiu:

– Jehuda, mi nunmomente ne havas sufiĉe, por pli bone pagi la servon, kiun vi faris al mi. Mi tial donas al vi duonon de tiu sumo kaj plie la kamelon kiel pagon por la restanta ŝuldo.

La servanto mem kortuŝiĝis ĉe la humila tono de ĉi tiu propono.

– Ne estas necese tiom multe, sinjoro – li rediris

konfuzita. – La valoro de la besto estas sufiĉa kaj eĉ troa; tiel vi ne restos sen mono. Mi kontentiĝas je iaj kelke da moneroj, je nur tiom, kiom necese pro la reveno.

Saŭlo direktis al li rigardon de danko kaj, dirante, ke li ne povos pli longe reteni la amikon, fordungis ĉi tiun kun karesaj vortoj kaj deziresprimoj por feliĉa reveno Damaskon.

Poste, irinte en la malriĉan ĉambron, kiun li prenis al si, li konsciencie ekmeditis pri la lastaj okazaĵoj de sia vivo.

Li troviĝis sola, sen parencoj, sen amikoj, sen mono.

Nelonge antaŭ ol decidi postkuri Ananiason, li ne hezitus dekreti la morton de iu ajn, kiu profetus la estontecon, kiu lin atendas. Lia ekzistado, liaj planoj ŝanĝiĝis eĉ per la plej etaj detaloj. Kion li nun faru? Kaj se li ne trovos en Palmira la helpon de Gamaliel, kiel li atendis laŭ siaj plej profundaj esperoj? Li konsideris la amplekson de la malfacilaĵoj, starantaj antaŭ liaj okuloj. Ĉio malfacila. Li troviĝis simile al homo, kiu perdis familion, patrujon, hejmon. Premanta maldolĉo minacis invadi lian koron. Sed subite li rememoriĝis pri la Kristo kaj la memoro pri tiu majesta vizio revigligis lian frakasitan spiriton. Fidante multe pli al tiu, kiu etendis al li la manojn, ol al siaj propraj fortoj, li penis kvietigi la skuojn de sia animo, donante ripozon al la laca korpo.

La morgaŭan tagon, malfrue matene, li eliris sur la straton plena de zorgoj kaj angoro. Observinte la ricevitajn informojn, li haltis ĉe la perdo de impona konstruaĵo en kies fronto funkciis grandaj butikoj.

Demandinte pri Ĥizkija, li estis tuj akceptita de grandaĝa sinjoro, kun ridetanta kaj respektinda mieno, kiu lin tre simpatie salutis. Tio estis la frato de Gamaliel, kiu, tuj familiare ekstraktante sian samlandanon, ĵus venintan de malproksime, ĝuigis al li konsolan konversacion. Delikate penante ekscii pri la respektinda rabeno de Jerusalemo, Saŭlo plej volonte ricevis de Ĥizkija la necesajn sciigojn.

– De kiam li venis Palmiran – diris Ĥizkija afliktita –, mia frato ekŝajnis al mi tute alia homo. Eble lia transloĝiĝo de Jerusalemo influis por tiu profunda ali-

iĝo. La malsameco de socia atmosfero, la ŝanĝo de moroj, la klimato, la manko de kutimaj laboroj, ĉio ĉi kredeble malutilis lian farton.

– Kiel do? – demandis la junulo, ne kaŝante sian surprizon.

– Li pasigas tutajn tagojn en iu forlasita kabano, kiun mi posedas, en la ombro de kelke da daktilarboj, en unu el la multaj nin ĉirkaŭantaj oazoj, kaj tio, notu al vi, sole nur por legi kaj mediti pri ia malgrava manskribaĵo, kiun mi ne sukcesis kompreni. Krom tio, li ŝajnas al mi tute seninteresiĝinta pri niaj religiaj laboroj; li vivas kvazaŭ ekster la mondo. Li parolas pri iaj vizioj el la ĉielo, konstante parolas pri ia ĉarpentisto, kiu fariĝis Mesio de la popolo kaj sin nutris per imagaj aferoj, nerealaj revoj. Iafoje mi kun profunda bedaŭro observas lian mensan kadukiĝon. Mia edzino atribuas ĉion tion al lia grandaĝeco, sed mi kredas, ke tion pli ĝuste, aŭ almenaŭ plejparte, kaŭzis la streĉeco de la studado, de la longaj meditoj.

Hizkija iom haltis kaj dume Saŭlo fiksas sur li akran kaj signifoplenan rigardon, komprenante la konduton de la maljuna instruanto.

Ĉe ankoraŭ unu rimarko de la tarsi junulo, tiu babiladis plue:

– En la sino de mia familio Gamaliel estas traktata kvazaŭ nia patro. Estas vero, ke mi devas danki la komencon de mia vivo al lia grandega frata sindoneco, kaj ĝuste tial mi kaj mia edzino interkonsentis kun niaj infanoj pri la paca atmosfero, kie devas ĉi tie vivi la estimata kaj nobla malsanulo. Kiam li vaste parolas pri tiuj religiaj iluzioj, kiuj okupas lin en lia mensa perturbo, neniu en ĉi tiu domo lin kontraŭas. Ni ja scias, ke li jam ne parolas mem. Tiu potenca menso paliĝis, tiu stelo estingiĝis. Konsiderante ĉi tiujn dolorajn cirkonstancojn, mi eĉ dankas Dion, kiu lin kondukis al mi ĉi tien, por ke li finu siajn tagojn ĉirkaŭita de nia familia amo kaj libera de la mokado, kies objekto li eble estus en Jerusalemo, kie ne ĉiuj kapablas kompreni kaj honori lian eminentan pasintecon.

– Sed la urbo ĉiam respektis en li ian neforges-eblan majstron – rediris la junulo, kvazaŭ dezirante defendi siajn proprajn sentojn de amikeco kaj estimo.

– Jes – diris konvinkite la negocisto –, tia homo de via intelekta nivelo estas preparita por ĉion kompreni, sed la ceteraj? Vi sendube scias pri la senindulga persekutado, kiun faras la aŭtoritatoj de la Sinedrio kaj de la Templo kontraŭ la simpatiantoj de la fama nazareta ĉarpentisto. Palmira sciigis pri ĉi tiuj faktoj per multenombraj malriĉaj samlandanoj, kiuj plej rapide forlasis Jerusalemon, sub la minaco de malliberigo kaj morto. Nu, ĝuste dank'al la persono de tiu homo Gamaliel vidigis la unuajn montrojn de mensa malforteco. Se li estus tie, kio estus kun lia senprotekta maljuneco? Kompreneble multaj amikoj, kiel vi, estus pretaj por lia defendo, sed la afero eble pliserioziĝus, eble aperus politikaj mallamikoj, postulantaj malagrablajn disponojn. De nia flanko ni povus provi nenion, por rebonigi la situacion, ĉar ja lia frenezeco estas trankvila, apenaŭ rimark-ebla, kaj ni tute ne sukcesus toleri lian apologion al tiu krimulo, kiun la Sinedrio najlis sur la kruco, destinita al rabistoj.

Saŭlo sentis sin treege ĝenata, aŭdante ĉi tiujn vortojn, nun, laŭ lia opinio, tiel maljustajn kaj supraĵajn. Li komprenis la delikatecon de la momento kaj la naturon de la psikologiaj rimedoj, kiujn li devas uzi, por sin ne kompromiti kaj por ankoraŭ pli ne endanĝerigi la situacion de la klera instruanto.

Dezirante ŝanĝi la direkton de la konversacio, li serene demandis:

– Kaj la kuracistoj? kia la opinio de la kompetentaj?

– Ĉe la lasta ekzameno, al kiu li pro nia insistado sin submetis, ili trovis, ke la estimata malsanulo, krom perturbo, suferas grandan astenion, kiu iom post iom konsumadas liajn lastajn vivofortojn.

Saŭlo, ĉagrenita, faris ankoraŭ kelke da rimarkoj kaj, rekonsiderinte siajn unuajn impresojn rilate al la afebla akcepto de Ĥizkija, kun la helpo de knabo, serv-

anta en la domo, ekiris al la loĝejo de Gamaliel, kie la iama mentoro akceptis lin surprizite kaj ĝoje.

La ekslernanto rimarkis, ke Gamaliel efektive elmontras profundan malviglecon. Senfine ĝoja, Saŭlo lin ame ĉirkaŭprenis kaj amike kisis liajn tremantajn kaj ŝrumpintajn manojn. Liaj haroj ŝajnis pli blankaj; la haŭto, sulkita de respektindaj faltoj, aspektis kiel alabastro, kun nedifinebla paleco.

Ili longe paroladis pri siaj resopiroj, pri la okazaĵoj en Jerusalemo, pri la foraj amikoj. Post la koraj komencaj vortoj la tarsi junulo raportis al la respektinda majstro la gracojn, kiujn li ricevis proksime al Damasko. La voĉo de Saŭlo havis la vibrantan tonon de la fajro kaj sincereco, per kiuj li kutime stampis siajn emociojn. La maljunulo aŭdis lian rakonton kun ne esprimebla mirego; el la vivaj kaj serenaj okuloj gutadis larmoj de emocio, kiuj tamen ne falis. Tiu atesto plenigis lin per profunda konsolo. Li ja ne vane akceptis tiun saĝan kaj amoplenan Kriston, nekomprenatan de liaj kolegoj. Fininte sian raporton, Saŭlo el Tarso havis la rigardon vualita de ploro. La bonkora maljunulo lin emociite brakumis, prenante lin al sia koro.

– Saŭlo, mia infano – li diris ĝojega –, mi ja sciis, ke mi ne eraras pri la Savinto, kiu tiel profunde parolis al mia konsumiĝanta maljuneco per la spirita lumo de sia elaçetanta Evangelio. Jesuo bonvolis etendi siajn amoplenajn manojn al via sindonema spirito. La vizio ĉe Damasko sufiĉos pro la konsekrado de via tuta ekzistado al la amo de la Mesio. Estas vero, ke vi forte klopodadis por la Leĝo de Moseo, ne hezitante veni al ekstremaĵoj por ĝia defendo, sed nun estas veninta la momento, ke vi klopodu por tiu, kiu estas pli granda ol Moseo.

– Sed mi estas forte senkonsila kaj konfuzita – fidplene diris la junulo el Tarso. – De post tiuj okazaĵoj mi rimarkas, ke mi estas objekto de strangaj kaj radikalaj ŝanĝiĝoj. Laŭ mia absolute sincera temperamento mi ekvolis komenci mian bataladon por la Kristo en Damasko, sed mi ricevis de niaj tieaj amikoj la plej akrajn montrojn de malŝato kaj ridindigo, kiuj min tre suferigis.

Mi subite vidis min sen kamaradoj, sen iu ajn. Kelkaj anoj de la “Vojo” konsilis mian frakasitan animon per esprimoj de frateco, sed tio ne estis sufiĉa por kompensi la travivitajn amarajn disreviĝojn. Cadok mem, kiu en sia infaneco estis zorgato de mia patro, superĵetis min per riproĉoj kaj moko. Mi ekdeziris reiri Jerusalemon, sed laŭ la sceno en la sinagogo de Damasko mi komprenis tion, kio min en granda mezuro atendus ĉe la aŭtoritatuloj de la Sinedrio kaj de la Templo. Kompreneble la profesio de rabeno ne povas interesi mian sinceran spiriton, alie mi mensogus antaŭ mi mem. Sen laboro, sen mono, mi baraktas en ia labirinto da nesolveblaj demandoj, sen la helpo de iu koro pli sperta ol mia. Mi tial decidis iri en la dezerton kaj veni al vi por la necesa helpo.

Kaj finante sian parolon, kun petegantaj okuloj, kiuj elmontris la teruran angoron, kiu uraganis en lia animo, li ekkriis:

– Amata majstro, vi ĉiam vidis la solvojn, kiujn trovas bono tie, kie mia neperfekteco vidis nur frakasantan ombron. Helpu mian koron, dronantan en sufoka premsonĝo. Mi bezonas servi al tiu, kiu volontis ŝiri min el la mallumo de malbono, kaj mi ne povas forhavi vian helpon en ĉi tiu malfacila horo de mia vivo!

Ĉi tiujn vortojn li diris per profunde kortuŝanta tono. Kun okuloj firmaj, kvankam prilumitaj de ekstrema mildeco, la grandanima maljunulo ekkaresis liajn manojn kaj emocioplena ekparolis:

– Ni en speciala maniero ekzameni viajn dubojn, por studi ian solvon taŭgan por ĉiuj problemoj laŭ la instruoj kiuj nin hodiaŭ prilumas.

Kaj post paŭzo, dum kiu li ŝajnis ordigi la temojn, li daŭrigis:

– Vi parolis pri la malŝato, kiun vi spertis en la sinagogo de Damasko, sed la ekzemploj estas klaraj kaj konvinkaj. Ankaŭ mi hodiaŭ estas rigardata kiel trankvila frenezulo ĉe miaj familianoj. En Jerusalemo, vi vidis, Simon Petro estis konsiderata malestiminda, ĉar li amis la mizerulojn de Dio kaj ilin gastigis; Stefano mortis sub ŝtonfrapoj – kaj kio ankoraŭ? La Kristo mem,

elaĉetinto de la homoj, ne evitis la torturon de malhonoriga kruco inter rabistoj, kondamnitaj de la juĝistoj de la mondo. La leciono de la Majstro estas tro granda, por ke liaj disĉiploj esperu iajn politikajn regadojn aŭ financajn potencojn en lia nomo. Se li, kiu estis plej altgrade pura kaj neimitebla, travivis suferojn kaj malkomprenojn en ĉi tiu mondo, ne estas do juste, ke ni esperu ripozon kaj glatan vivon en nia mizera stato de pekuloj.

La tarsi junulo aŭdis tiujn mildajn kaj energiajn vortojn kun suferanta animo, precipe rilate al la persekutoj kontraŭ Petro kaj al la rememoro pri Stefano, ĉe kio la malnova amiko havis la delilkatecon ne eldiri la nomon de la turmentinto.

– Koncerne la malfacilaĵojn, pri kiuj vi diras, ke vi ilin travivis, post la okazaĵoj en Damasko – serene daŭrigis Gamaliel –, en miaj okuloj spertaj en la problemoj de la mondo tio ja estas justa kaj natura. Niaj prauloj, antaŭ ol ricevi la manaon de la ĉielo, trapasis nigrajn tempojn de mizero, sklaveco kaj sufero. Sen la afliktoj en la dezerto Moseo neniel trovas en la senviva roko la fonton de viva akvo. Kaj vi mem, vi eble ne pli profunde iam meditis pri la revelacioj rilataj al la Promesita Lando. Kia regiono tiu estis, se, en pli vasta senco komprenante Dion, ni trovas en ĉiuj lokoj de la mondo fontojn de Lia protekto? Folriĉaj kaj amikaj daktilarboj kreskas en la varmegaj sablejoj. Ĉu tiuj helpemaj arboj ne turnas eĉ la dezerton en benindajn lokojn, plenajn de la dia pano, por kvietigi nian malsaton? En miaj solulaj meditadoj mi venis al la konkludo, ke la Promesita Lando de la diaj revelacioj estas la Evangelio de la Kristo Jesuo. Kaj la meditado inspiras al ni pli profundajn komparojn. Kiam niaj plej bravaj prapatroj klopodis por konkeri tiun privilegiitan regionon, grandnombraj homoj provis senkuraĝigi la plej persistemajn, dirante, ke tiu lando estas nelogebla, la aero estas malsaniga kaj alportas mortigajn febrojn, la loĝantoj estas malsocietemaj, manĝantoj de homa karno; tamen Josuo kaj Kaleb, per heroa peno, penetris la nekongatan landon, venkis la unuajn malhelpaĵojn kaj re-

venis dirante, ke en tiu lando fluadas lakto kaj mielo. Ĉu ni ĉi tie ne havas perfektan simbolon? La dia revelacio certe parolis pri ia benita regiono, kies spirita klimato estas farita el paco kaj lumo. Alkonformiĝi al la Evangelio estas eltrovi alian landon, kies amplekso perdiĝas en la senfineco de la animo. Apud ni staradas homoj, kiuj faras ĉion eblan, por debati nin de la konkerita entrepreno. Ili akuzas la lecionon de la Kristo kiel kriman kaj revolucian, ili vidas en lia ekzemplo intencojn de malordigo kaj morto, ili konsideras tian apostolon, kiel Simon Petro, tromemfida kaj malklera; sed, pensante pri tiu miregiga sereneco, kun kiu Stefano elspiris sian animon, mi vidis en li la modelon de la brava kaj digna kunbatalanto, kiu revenis de la instruoj de la “Vojo”, por diri al ni, ke en la Lando de la Evangelio ekzistas fontoj de la lakto de saĝo kaj de la mielo de la dia amo. Estas do necese iradi sen ripozo kaj ne atentante la barojn sur la vojo. Ni iru al la senlima domo, kiu altiras al si nian koron.

Gamaliel iom interrompis sian amikan kaj tre konsolan parolon. Saŭlo miris ĉion ĉi. Tiuj tiel simplaj komparoj, tiuj altvaloraj deduktoj el la studado de la antikva Leĝo, rilate al Jesuo, lin perpleksigis. La saĝo de tiu maljunulo refreŝigis liajn fortojn.

– Vi parolis pri via embaraso – daŭrigis la respektinda amiko, dum la junulo lin fikse rigardadis kun kreskanta interesiĝo – rilate la ŝanĝon de profesio kaj la mankon de mono por la plej urĝaj bezonoj... Tamen, Saŭlo, sufiĉos pro vi iom pensi pri la realeco de la faktoj, por klare vidi. Maljunulo, kiel mi, troviĝas en la situacio de Moseo, rigardanta la Promesitan Landon, ne povante tamen ĝin atingi; sed rilate vin, ni konfesu, ke vi estas ankoraŭ tre juna. Vi povas pligrandigi vian energion per ekzercado de viaj fortoj kaj enpaŝi en la regionon de la aspiroj de la Savinto pri ni. Por tio estas nepre necese plisimpligi la vivon, rekomenci la bataladon. Josuo ne povus venki la malhelpaĵojn sur la vojo sole nur per la legado de la sanktaj skribaĵoj, nek per la favoroj de siaj estimantoj. Li certe per superhomaj pen-

oj manipulis krudajn ilojn, ebenigis vojojn, kie oscedis abismoj.

– Kaj kion vi konsilas al mi en ĉi tiu rilato? – plej atente interrompis la junulo, dum la maljuna instruanto faris longan paŭzon.

– Mi intecas diri, ke mi konas vian patron, kiel ankaŭ lian bonstaton. Elmontrante sian amon, li kompreneble rifuzus al vi nenian helpon en ĉi tiuj cirkonstancoj, sed via patro estas homo kaj povas morgaŭ esti vokita en la spiritan vivon. Lia helpo estus do grandvalora, sed ja negranda sen via propra klopodo por la solvo de viaj problemoj. Vi travivas fazon, en kiu energia laboro estas nepre necesa. Jen la demando pri la familio. Nun ni konsideru vian profesion staton. Ĝis nun vi estis rabeno de la Leĝo, vi manie pensadis nur pri la aliulaj eraroj, pri la diskutoj de la kazuistiko, pri via elstara situacio inter la leĝistoj; vi gajnis monon el la vigleco super aliaj homoj, sed Dio vokis vin, por kontroli viajn proprajn erarojn, same kiel Li vokis min mem. La Promesita Lando bildiĝas antaŭ niaj okuloj. Estas necese venki kaj marŝi. Kiel leĝisto vi tion ne povus fari. Vi devas do rekomenci la laboron, kiel farus homo, kiu senutile serĉadis oron tie, kie ĝi ne kuŝis. La demando estas pri laboro, pri persona penado.

La junulo el Tarso longe fiksas la okulojn malsekajn de emocio sur la nobla maljunulo kaj diris:

– Jes, nun mi komprenas...

– Kion vi lernis kiel infano, antaŭ ol vi atingis la nunan pozicion? – demandis la antaŭzorgema maljunulo.

– Konforme al la moroj de nia raso mia patro igis min lerni la metion de teksisto, kiel vi scias.

– Vi ne povus ricevi de la patraj manoj pli utilan donon – diris Gamaliel kun serena rideto. – Via patro estis antaŭzorgema, kiel ĉiuj familiestroj de la popolo de Dio, pensante ekzerci viajn manojn en la materiala laboro, antaŭ ol la cerbo pleniĝos per amaso da ideoj. Estas skribite, ke ni devas manĝi panon en la ŝvito de nia vizaĝo. Laboro estas la sankta movado de la vivo.

Iom haltinte, kvazaŭ penante pli profunde meditadi, la maljuna mentoro de la farisea junularo daŭrigis:

– Vi estis senfama teksisto, antaŭ ol ricevi la honorajn titolojn de Jerusalemo. Nun, kiam vi prezentas vin, por servi al la Mesio en la Jerusalemo de la homaro, estas konsilinde, ke vi denove estu modesta teksisto. La obskuraj taskoj estas grandaj instruantoj de la submetiĝemo. Ne sentu vin humiligita, revenante al la teksilo, kiu nun aperas al mi kvazaŭ nobla amiko. Vi nun havas neniom da mono, neniom da materialaj rimedoj... De la unua ekrigardo, se ni konsideras vian reliefan pozicion en la mondo, estus pravigebla peti helpon de parencoj aŭ amikoj, sed vi estas nek malsana, nek kaduka: vi ĝuas sanon kaj havas forton; ĉu do ne estus pli noble el ili fari ilojn de helpo al vi mem? Ĉia honesta laboro havas la sigelon de la beno de Dio. Esti teksisto, estinte rabeno, estas en miaj okuloj pli honoriga ol kuŝi sur iaj iluziaj titoloj, konkeritaj en iu mondo, kie la plej multaj homoj ne scias, kio estas bono kaj vero.

Saŭlo komprenis la grandecon de ĉi tiuj esprimoj kaj, prenante lian manon, kisis ĝin kun profunda respekto kaj diris:

– Mi ne atendis de vi ion alian, ol ĉi tiujn senkaŝecon kaj sincerecon, kiuj prilumas mian spiriton. Mi denove lernos la vojon de la vivo, mi trovos en la bruo de la teksilo la mildajn kaj amikajn stimulojn de la sanktiga laboro. Mi kunvivos kun tiuj homoj, malpli favoritaj de la sorto, mi pli interne penetros en iliajn ĉiutagajn maldolĉojn; en kontakto kun la aliulaj doloroj mi ja povoscios regi miajn proprajn malsuperajn impulsojn kaj fariĝos pli pacienca kaj pli humana!

Posedite de granda ĝojo, la klera maljunulo ekkaris liajn harojn kaj emociite ekkriis:

– Dio benos viajn esperojn!

Ili longe silentis, kvazaŭ dezirante senfine daŭrigi tiun gloran momenton de kompreno kaj harmonio.

Rompis la silenton Saŭlo, kiu, vidigante tra la rigardo la multajn zorgojn de sia animo, timoplene diris:

– Mi intencas repreni la metion de mia knabeco, sed mi ne havas monon por la vojaĝo. Se estus eble, mi praktikus mian metion ĉi tie, en Palmira...

Li paroladis hezite, vidigante al sia respektinda amiko la honton, kiun li nun spertis, farante al li tian konfeson.

– Kial do ne? – vive rediris Gamaliel. – Mi opinias, ke la malfacilaĵoj por la reveno ne estus malgrandaj. Al tiaj baroj mi ne alkalkulas la demandon pri la mono, ĉar ni iel ajn povus ekhavi ĝin por la plej urgaj elspezoj. Mi parolas nur pri la danĝeroj de la situacio, kiujn vi travivis. Mi trovas ĝin justa, se vi revenus Jerusalemon aŭ Tarson, plene konsciante viajn novajn devojn. Ĉiu plantaĵo ĉe sia ekkreskado estas malfortika. La ĉikanoj de la fariseismo, la malvera sciado de la leĝistoj, la familiaj vantaĵoj povus sufoki la gloran semon, kiun Jesuo ĵetis en vian ardan koron. La plej promesanta kreskaĵido ne disvolviĝos, se oni kovros ĝin per ruboj kaj koto. Estas konsilinde, ke vi revenu al via lulilo, al niaj kunuloj kaj al via familio, kiel foliriĉa arbo, honorante la sindonecon de la Dia Kultivisto.

– Sed kion mi faru? – demandis Saŭlo maltrankvila.

La iama instruanto momente konsideris kaj respondis:

– Vi scias, ke la oazoj estas grandaj komercejoj de ledartikloj. La transporta servado dependas tute de la plej lertaj kaj sindonaj teksistoj. Kompreninte ĉi tion mia frato starigis plurajn labortendojn en la plej malproksimaj oazoj, por kontentigi la bezonojn de sia komerco. Mi konversacios kun Hizkija pri vi. Mi ne diros al li, ke la koncerna homo estas iu granda estro en Jerusalemon, kiu intencas dum kelka tempo foriĝi de la societo, ne tial, ke mi timas hontigi vian nomon aŭ devenon, sed tial, ke mi opinias utile, ke vi gustumu humilecon kaj solulecon sur via nova vojo. La konvenciaj konsideroj povus konfuzi vin nun, kiam vi devas neniigi la “malnovan homon” per la forto de sinofero kaj disciplino.

– Mi ĝin komprenas kaj obeas por mia propra bono – atente rediris Saŭlo.

– Efektive, Jesuo donis al ni pri ĉio ĉi ekzemplon, vivante en nia medio sen nia scio.

La tarsi junulo ekmeditis pri la amplekso de ĉi tiuj sugestoj. Li komencos novan ekzistadon, humile ekprenos la teksilon. Li ĝojis, rememorante, ke la Majstro siaflanke ne trovis neinda de li la stablon de ĉarpentisto. La dezerto havigos al li konsolon, laboron, silenton. Li gajnos jam ne la facile haveblan monon de la senrajta estimo, sed la rimedojn necesajn por la vivado ĉe la alta valoro el la venkitaj baroj. Gamaliel estas ja prava. Ne estus dece peti la favoron de la homoj, post kiam Dio faris al li la plej grandan el ĉiaj favoroj, priluminte lian konsciencon por ĉiam. Estas vero, ke en Jerusalemo li estis kruela turmentisto, sed li aĝis nur tridek jarojn. Li penas repaciĝi kun ĉiuj, kiujn li ofendis pro sia sekta rigoreco. Li sentis sin juna, li laboros por Jesuo tiel longe, kiel li havos fortojn.

La ama parolo de la maljunulo ŝiris lin el lia profunda meditado.

– Ĉu vi havas la Evangelion? – demandis la maljunulo kun bonkora interesiĝo.

Saŭlo montris al li la parton, kiun li havis kun si, kaj sciigis pri la peno, kiun li donis al si, en Damasko, por kopii ĝin el la manuskriptoj de tiu grandanima predikisto, kiu resanigis lian subitan blindecon. Gamaliel ĝin atente ekzamenis kaj, longe enpensiĝinte, diris:

– Mi havas kompletan kopion el la notoj de Levi, impostisto en Kapernaŭm, kiu fariĝis Apostolo de la Mesio, noblan memoraĵon de Simon Petro pro mia mizera amikeco; nun mi ne plu bezonas ĉi tiujn notojn, kiujn mi ja konsideras sanktaj. Por gravuri en la memoron la instruojn de la Majstro, mi penis ilin ĉiujn kopii kaj por ĉiam ilin fiksiti en la animo. Mi posedas jam tri kompletajn ekzemplerojn de la Evangelio, faritajn de mi mem, sen la helpo de iu skribisto. Tiel, rigardante la donacon de Petro kiel sanktan relikvon de nobla korligiĝo, mi volas fordoni ĝin en viajn manojn. Vi kunportos la foliojn, skribitajn en la eklezio de la “Vojo”, kiel fidelajn kunulojn en via nova laboro.

La eksrabeno tre emociite aŭskultadis lian parolon.

– Sed kial vi fordonu estimindan memoraĵon pro

mi? – li kortuŝite demandis. – Mi forte ĝojus, ricevante unu el la kopioj, faritaj de viaj manoj!

La maljuna instruanto fiksas trankvilan rigardon sur la pejzaĝo kaj per profeta voĉo rediris:

– Mi venis al la fino de la vojo, mi devas atendi la morton de la korpo. Anstataŭ forlasi la donacon de Petro al homoj, kiuj ne povas rekoni en ĝi la voloron, kiun ni al ĝi atribuas, estas juste doni ĝin al fidela amiko, kiu kapablas taksi ĝian sanktan karakteron. Krom tio mi estas konvinkita, ke mi ne povos plu reveni Jerusalemon; en ĉi tiu mondo estos por mi ebla nenia rekta parolo al la galileaj Apostoloj pri la lumo, kiun la Savinto enverŝis en mian spiriton, kaj mi timas, ke la adepton de Jesuo vin ne tuj komprenos, kiam vi revenos en la sanktan urbon. Vi do havos ĉi tiun memoraĵon, por prezenti vin al Petro en mia nomo.

Tiu profeta tono impresis la tarsan junulon, kiu klinis la kapon kun larmaj okuloj.

Post longa paŭzo, kvazaŭ penante rearanĝi siajn ideojn kun perfekta saĝo, Gamaliel afable daŭrigis:

– Mi vidas vin, en la estonteco, doninta vin al Jesuo kun tia sama varma fervoro, kun kia mi vin konis dediĉita al Moseo. Se la Majstro vokis vin al la servado al li, tiel estis tial, ke li fidas vian komprenemon de fidela servanto. Kiam la manpenado ĝuigos al vi la liberecon elekti la novan sekvendan vojon, Dio benos vian koron, por ke vi disverŝu la lumon de la Evangelio inter la homoj ĝis la lasta tago de vivo sur la Tero. En tiu laborado, mia infano, se vi renkontos nekomprenon kaj lukton en Jerusalemon, ne malesperu kaj ne senkuraĝiĝu. Vi tie semis iom da konfuzo en la spiritoj, kaj tiel estas juste, ke vi rikoltu la sekvojn. Sed en ĉia tasko pensu pri la Kristo kaj iru antaŭen kun via sincera penado. Ne konsternu vin suspektoj, kalumnio kaj mallojaleco: memoru, ke Jesuo ĉion ĉi brave venkis!

Saŭlo sentis profundan ripozon ĉe ĉi tiu amplena, karesa, lojala admono. Aŭdante ĝin, li longe restis dronanta en varmaj larmoj, kiuj atestis lian penton pri sia pasinteco kaj liajn esperojn je la estonteco.

En tiu posttagmezo Gamaliel eliris el la kruda kabano, direktante sin kune kun sia ekslernanto al sia frato, kiu nun kun evidenta ĝojo akceptis la junan tarsanon en sian domon.

La brilega inteligenteco kaj la komunkiĝema juneco de la eksleĝisto konkeris la koron de Ĥizkuja kaj de ties familianoj per bela elmonro de spontanea amikeco.

Vespere de tiu sama tago, post la domaj ceremonioj de la kutima lasta manĝo, la maljuna rabeno de Jerusalemo konigis al la negocisto la situacion de sia protektato. Li diris al sia frato, ke Saŭlo estis lia lernanto ekde sia infaneco, laŭdis ties personajn meritojn kaj fine parolis pri ties efektiva kriza financa situacio. Kaj en la ĉeesto de la interesato mem, kiu ĉiam pli estimis tian saĝan kaj grandaniman maljunulon, ĉi tiu diris, ke la junulo intencas labori kiel teksisto en la tendoj en la dezerto kaj petis Ĥizkijan per sia bonkoreco helpi tiajn noblajn aspirojn al propraj laboro kaj penado.

La komercisto de Palmira ekmiris.

– Sed ĉi tiu junulo – li ĝentile rimarkis – tute ne bezonas izoliĝi, por perlabori la vivon. Mi disponas rimedojn, por lokumi lin ĉi tie, en la urbo mem, kie li estos en konstanta kontakto kun ni.

– Mi tamen preferus vian afablan helpon en la dezerto – per signifoplena tono diris Saŭlo.

– Kial? – demandis Ĥizkija interese. – Mi ne komprenas, kiel junulo, kia vi estas, vivus solece en la senlimaj etendaĵoj da sablo. La enmigrintoj el Jerusalemo, se fraŭloj, ne elportis la kondiĉojn, kiujn mi prezentis al ili en la malproksimaj oazoj; nur kelke da geedzoj akceptis tiujn proponojn kaj tien iris. Koncerne vin, mi ne komprenas, kial vi, kun tia intelekta provizo, preferas esti ia senfama teksisto, apartiĝinta for de ĉiuj...

Gamaliel komprenis, ke la mirego de lia frato povos konduki ĉi tiun al eraraj supozoj pri la juna amiko, kaj antaŭ ol ia nejusta suspekto elkrepuskos en ties esplorama spirito, li saĝe konsideris:

– Via demando, Ĥizkija, estas komprenebla, ĉar la decido de Saŭlo aspektas strange ĉe ĉiu praktika homo. Li estas junulo talenta, donanta belajn esperojn kaj,

krom tio, tre instruita. Malpli saĝaj homoj povus eĉ supozi en lia konduto la deziron liberiĝi de la sekvoj de ia krimo, sed ne tiel estas. Pli sencere parolante, mi devas diri, ke mia ekslernanto volas poste sin doni al la dissemado de la parolo de Dio. Ĉu vi do opinias, ke se Saŭlo elektus la karieron de la niatempa venkanta junularo, li preferus Palmiran ol Jerusalemon? Lia situacio ne estas do nur ia afero de monbezono, sed ankaŭ la neceso mediti pri la plej gravaj problemoj de la vivo. Ni ja scias, ke la profetoj kaj la homoj de Dio iris en la dezertajn lokojn, por senti la efektivajn inspirojn de la Plejaltulo, antaŭ ol sukcese diskonigi la sanktan parolon.

– Se tiel estas... – rediris lia frato venkita.

Kaj meditante kelke da minutoj, la negocisto ree parolis:

– En la regiono, kiun ni konas kun la nomo “oazo de Dan”, pli ol kvindek mejlojn malproksima de ĉi tie, mi ĝuste antaŭ monato enloĝigis junan geedzan paron da teksistoj, venintan kun la lasta aro da rifuĝintoj. Ili estas Akvila kaj lia edzino, Priskila, kiu estis servantino de mia edzino, kiam senprotekta orfa kvabino. Ĉi tiuj bonaj laboristoj estas hodiaŭ la solaj loĝantoj de la oazo; Saŭlo povus kompanii al ili. Tie ekzistas propraj tendoj, komforta domo kaj teksiloj necesaj por la laboro.

– Kaj kia estas la laboro? – demandis la tarsa junulo, interesita pri sia nova tasko.

– La speciala laboro en tiu plej fora metiejo – iom fiere klarigis Ĥizkija – estas la preparado de lantapiŝoj kaj de la fortikaj teksaĵoj el kaproharoj, destinataj por vojaĝobarakoj. Ĉi tiuj artikloj estas grandkvante liverataj de nia firmo. Ilian manipuladon mi lokis tiel malproksime, konsiderante la urĝajn bezonojn de miaj karavanoj, uzataj en mia komercado kun la tuta Sirio kaj aliaj pli prosperantaj lokoj de la ĝenerala negocado.

– Mi ĉion faros, por respondi al via konfido – diris kontenta la eksrabeto.

La konversacio ankoraŭ longe daŭris kun konsideroj pri la perspektivoj, la kondiĉoj kaj la bonaĵoj de tiu negocado.

Post tri tagoj Saŭlo profunde emociite adiaŭis sian instruanton. Ŝajnis al li, ke tiu amika brakumo estas la lasta, kaj tiel longe, ĝis la kameloj de la karavano ekiris al la vastega ebenaĵo, la junulo envolvis la maljunulon en la karesajn vibrojn de la korŝira adiaŭo.

En la morgaŭa tago, irante flanke de granda Vico da paciencaj kameloj, la servantoj de Ĥizkija foriris kun riĉa ŝarĝo da ledoj, lasante Saŭlon ĉe Akvila kaj ties edzino, en granda oazo, prosperanta meze en la dezerto.

La du gelaboristoj en tiu malgranda metiejo akceptis lin kun la plej koraj elontroj de frateco kaj simpatio. Saŭlo jam de la unua ekrigardo rekonis en ili la plej noblajn spiritajn ecojn. La juneco de la grandanimaj geedzoj elverŝiĝis per belaj esprimoj de laboro kaj braveco. Priskila plej fervore klopodadis por stampi ĉion per la juveloj de sia amo. Ŝiaj malnovaj hebreaĵoj kanzonoj sonadis en la granda silento kiel plej alte kaj harmonie belaj notoj. Post la hejmaj laboroj jen ŝi apud la edzo super la teksilo ĝis la plej malfruaj horoj de la krepusko. Ŝia edzo, siaflanke, ŝajnis posedi privilegitan temperamenton, el tiuj, kiuj ne bezonas ian spronon por agi. Plene konsciante la respondecon pri siaj taskoj, Akvila senriproze laboradis en la ombro de la akceptemaj kaj amikaj arboj.

Saŭlo komprenis la benon, kiun li ricevis. Li havis la impreson, kvazaŭ li trovis en tiuj du frataj animoj, kiuj spirite neniam disiĝos de la grandeco de lia misio, du loĝantojn de iu mondo malsama, kiun li ĝis tiam ne povis koni en sia vivo.

Akvila kaj Priskila, prefere ol geedzoj, ŝajnis efektivaj gefratoj. Tuj en la unua tago de komuna laboro la eksleĝisto rimarkis ilian reciprokan respekton, la absolutan interkonformecon de la ideoj, la altan komprenon de devoj, kiu signis iliajn eĉ plej sensignifajn agojn, kaj precipe la senkulpan ĝojon, kiu montriĝis en ĉiuj iliaj faroj. Iliaj puraj, noblaj moroj ravis lian animon, seniluziigintan ĉe la homaj hipokritaĵoj. La manĝoj estis simplaj; ĉiu objekto havis sian uzadon kaj sian alkonforman lokon, kaj la vortoj, kiam ekster la rondo

de la komuna ĝojo, neniam degeneris en klaĉadon aŭ frivolaĵojn.

La unua tago pasis ĉe tre agrablaj surprizoj por la eksrabeno, soifanta pacon kaj solecon por siaj novaj studoj kaj meditoj. Lia laborkamarado plej komplezeme klopodis, por solvi liajn malgrandajn malfacilaĵojn en tiu metio, kiun li jam longe ne praktikadis. Akvila kompreneble miris tiujn delikatajn manojn, tiujn malsamajn manierojn, neniom similajn al tiuj de iu ordinara teksto, sed, kun la nobleco, kiu lin karakterizis, li nenion demandis pri la motivoj de la izoligo de la junulo.

En tiu sama vespero, post la laboro, la geedzoj komforte eksidis ĉe foliriĉa palmo, direktante al la nova kunvivanto esplorantajn rigardojn, kiuj esprimis nekaŝeblan maltrankvilon. Silente, ili malvolvis malnovajn pergamenulaĵojn kaj komencis tre atente legi.

Saŭlo rimarkis tiun timoplenan sintenadon kaj alproksimiĝis.

– Efektive – li per karesa tono diris –, la vespero en la dezerto invitas al meditado... La senlima etendaĵo da sablo ŝajnas ia oceano, staranta senmove... La milda venteto estas la mesaĝo de la malproksimaj urboj... Mi havas la impreson, kvazaŭ ni troviĝas en ia templo de nerompebla paco ekster la mondo...

Akvila miris pri ĉi tiuj elvokaj figuroj kaj ekricevis pli grandan simpatian por tiu nekonata junulo, eble senigita je la plej karaj korligiĝoj kaj treege malĝoje rigardanta la senliman ebenaĵon.

– Vere – li ĝentile rediris –, mi ĉiam kredis, ke la Naturo konservis la dezerton kvazaŭ ian altaron de dia silento, por ke la filoj de Dio havu sur la Tero iun lokon por perfekta ripozo. Ni do profitu nian estadon en la soluleco, por pensi pri la justa kaj sankta Patro, konsiderante Lian malavarecon kaj grandecon.

Dum tio Priskila kliniĝis super la unuan parton de la pergamenulaĵo kaj enprofundiĝis en la legadon.

Okaze leginte, de malproksime, la nomon de Jesuo, Saŭlo alpaŝis al ili kaj, ne povinte kaŝi sian grandan interesiĝon, demandis:

– Akvila, mi portas tian profundan amon al la nazareta profeto, ke mi permesas al mi demandi, ĉu vi legas pri la grandeco de la Ĉiela Patro el la instruoj de la Evangelio?

La junajn geedzojn forte surprizis tia neatendita demando.

– Jes... – hezite respondis la pridemandito –, sed, se vi venis el la urbo, vi do ja scias la persekutojn kontraŭ ĉiuj homoj, ligitaj al la “Vojo” de la Kristo Jesuo...

Saŭlo ne kaŝis sian ĝojon, konstatinte, ke liaj kunuloj, amantaj legadon, estis kapablaj interŝanĝi pli altajn ideojn de la nova lernado.

Kuraĝigite de la konfeso de sia amiko, li sidiĝis sur la krudaj ŝtonoj kaj, interesite preninte tiujn pergamenfoliojn, demandis:

– Ĉu notoj de Levi?

– Jes – respondis Akvila pli trankvila kaj certiginte, ke antaŭ li sin trovas iu samidealano –; mi ilin kopiis en la eklezio de Jerusalemo, antaŭ ol foriri de tie.

Saŭlo tuj alportis tiun kopion de la Evangelio, kiu por lia koro estis unu el plej altvaloraj memoraĵoj de lia vivo. Ili kontente komparis inter si la tekstojn kaj la instruojn.

Kun sincera frata interesiĝo la eksrabeno demandis:

– Kiam vi ambaŭ eliris el Jerusalemo? Mi tre ĝojas, renkontante fratojn, kiuj proksime konas nian sanktan urbon. Kiam mi eliris el Damasko, mi ne antaŭvidis, ke Jesuo destinis por mi tiajn agrablajn surprizojn.

– Ni el tie eliris antaŭ kelke da monatoj – respondis Akvila, nun kun plena konfido al la spontaneeco de la aŭditaj vortoj. – Ni estis devigitaj tion fari dank’al la persekutoj.

Ĉi tiu brutala aludo al lia pasinteco konfuzis la tarsan junulon en la plejprofundo de lia koro.

– Ĉu vi ekkonis Saŭlon el Tarso? – demandis la teksisto per tono de naiveco, travidiĝanta tra liaj okuloj. – Kurioze – li daŭrigis, dum la junulo serĉis ian respondon –, la fama malamiko de Jesuo havas tian saman nomon, kiel vi.

La eksrabeno opiniis pli bone obei fidele la konsilon de Gamaliel. Estis preferinde kaŝi sin, sperti la justan riproĉon al la kondamninda pasinteco, humiliĝi antaŭ la opinio de la ceteraj homoj, kiel ajn senindulgaj tiuj estas, ĝis la kunfratoj de la “Vojo” plene pruvos al li la Fidelecon de la atesto.

– Jes, mi lin ekkonis – li mole respondis.

– Nu – daŭrigis Akvila, komencante rakonti siajn travivaĵojn –, tre povas esti, ke pro via estado en Damasko kaj Palmira vi ne tute klare scias pri la turmentoj, al kiuj la fama leĝisto ofte kaj arbitre nin submetis. Eble Saŭlo mem, kiel mi kredas, ne povis ekscii pri la kruelaĵoj, farataj de la senskrupulaj viroj, kiujn li havis sub sia komando, ĉar tiuj persekutoj estis tiaj, ke, kiel frato de la “Vojo”, mi ne povas konsenti, ke iu edukita rabeno povas preni sur sin la respondecon por tiom da maljustaj faroj.

Dum la eksleĝisto vane serĉis ian taŭgan respondon, Priskila sin entermetis, dirante kun simpleco de koro:

– Esta evidente, ke la rabeno el Tarso ne povis scii pri ĉiuj krimoj, farataj en lia nomo. Simon Petro mem, unu tagon, antaŭ ol ni kaŝe foriris, vespere, diris al ni, ke neniu malamu Saŭlon, ĉar, malgraŭ ties rolo ĉe la morto de Stefano, estis ne eble, ke li ordonis fari tiom da abomenindaj kaj malicaj agoj.

Nun, kiam li aŭdas la plej humilajn, Saŭlo komprenis la amplekson de la krima kampanjo, kiun li entreprenis, donante okazon al tiom da eksceso de subalternuloj kaj partianoj.

– Sed – li demandis kun miro –, ĉu vi tiel multe suferis? Ĉu vi estis kondamnita la ia puno?

– Ne malmultaj suferis tiajn samajn ĝenojn, kiel mi – respondis Akvila kiel klarigon –, dank’al la kondamninda konduto de iaj fanatikaj furiozuloj, elektitaj kiel fervoraj helpantoj de tiu entrepreno.

– Kiel tio fariĝis? – demandis Saŭlo tre interesita.

– Mi donos al vi ekzemplon. Prezentu al vi, ke unu samlandano, nomata Johai, plurajn fojojn demandis mian patron pri la eblo aĉeti de li bakejon en Jerusalemo. Mi prizorgadis mian tendon, mia maljuna patro siajn task-

ojn. Ni vivis feliĉe, kaj, konsiderante nian pacon, malgraŭ la atakoj de tiu ambiciulo, mia patro neniam ekpensis forlasi la fonton de siaj vivrimedoj. Sed Johai, tuj ĉe la komenco de la persekutoj, havigis al si reliefan pozicion. Ĉe tiaj faroj ĉiam venkas la malnoblaj karakteroj. Sufiĉis, ke oni donis al li iom da aŭtoritato por tio, ke la enviulo tuj etendis siajn krimajn dezirojn. Estas vero, ke mi kaj Priskila estis el la unuaj, kiuj vizitadis la eklezion de la “Vojo”, ne nur pro samsentemo, sed ankaŭ tial, ke mi devis danki al Simon Petro la resanigon de malnovaj kadukaĵoj, kiuj suferigis min de la infaneco. Sed mia patro, kvankam simpatianta kun la Savinto, ĉiam diradis, ke li estas tro maljuna por ŝanĝi siajn religiajn ideojn. Alkroĉita al la Leĝo de Moseo, li ne povis kompreni ian ĝeneralan reformadon de principoj en rilato al kredo. Ĉi tio tamen ne deturnis la malicajn instinktojn de tiu ambiciulo. Unu tagon Johai frapis nian pardonon, akompanata de armitaj soldatoj, kun ordono por aresti nin tri. Senutile estus rezisti. La leĝisto el Tarso estis eldoninta decidon, laŭ kiu ĉia rezisto kuntrenis morton. Jen ni iris en la malliberejon. Mia patro vane ĵuris fidelecon al la Leĝo. Post la eldemandado mi kaj Priskila ricevis la ordonon reveni hejmen, sed la maljunulo estis senkompate enkarcerigita. Liaj modestaj havoj estis tuj konfiskitaj. Post multe da klopodoj ni sukcesis, ke li revenu en nian kunvivadon, sed la brava maljunulo, kies sola apogo estis mia fila sindoneco, en sia kadukeco kaj vidveco, elspiris sian animon en niaj brakoj, en la tago, kiu sekvis lian liberigon, de ni tiel sopire atendatan. Kiam li revenis al ni, li aspektis kvazaŭ ia fantomo. Karitemaj soldatoj portis lin preskaŭ agoniantan. Mi ankoraŭ povis vidi liajn rompitaĵojn, liajn vundojn kun nuda karno, lian haŭton streke taŭzitan de skurĝoj. Per hezitantaj vortoj li priskribis la bedaŭrindajn scenojn en la karcero. Johai mem, kune kun partianoj, faris persone la lastajn turmentojn. Ne povante rezisti al tiaj suferoj, mia patro transdonis sian animon al Dio.

Akvila estis profunde emociita. Briletanta larmo akompanis la dolorajn rememorojn.

– Kaj la estro de tiu entrepreno? – demandis Saŭlo senfine kortuŝita. – Ĉu li staris aparte de tiu krimo?

– Mi pensas, ke jes. La krueleco estis tro granda, por ke oni atribuu al li sole nur la punon pro religiaj motivoj.

– Sed ĉu vi ne uzis ian peton pri justeco?

– Kiu kuraĝus tion fari? – mire demandis la metisto de Ĥizkija. – Iuj el miaj amikoj sin turnis kun tio al la juĝaj povoj, sed tiun sian deziron je justeco ili pagis per pli kruelaj punoj.

La eksrabeno komprenis la ĝustecon de ĉi tiuj asertoj. Nur nun lia spirito vidis sufiĉe, por taksii la malnovan blindecon, kiu lin vualis. Akvila estis prava. Li, Saŭlo, ofte estis surda por la plej kortuŝantaj petoj. Li ĉiam tenadis eĉ la plej absurdajn decidojn de siaj senkonsciencaj komisiitoj. Li rememoris Johain mem, kiu ŝajnis al li tiel servema dum tiu tempo de senklereco.

– Kaj kion vi pensas pri Saŭlo? – li subite demandis.

Tute ne sciante, kun kiu li interŝanĝas la plej intimajn pensojn, Akvila senhezite respondis:

– La Evangelio ordonas rigardi lin kiel fraton, kiu plej bezonas la lumon de Jesuo Kristo. Mi lin neniam vidis; timante la malbonagojn, faratajn en Jerusalemo, mi venis ĉi tien, plej urĝe forkurante, kaj mi ĉiam preĝas al Dio por li, esperante, ke ia radio de la Ĉielo lin prilumu, ne tiom por mi, sentaŭgulo, sed pro Petro, kiun mi konsideras ia dua patro tre amata. Mi pensas, ke fariĝus mirindaĵoj, se la eklezio de la “Vojo” povus agadi libere. Mi opinias, ke la galileaj Apostoloj meritas sendornan kampon por la semado de Jesuo.

Turninte sin al sia edzino, dum la junulo el Tarso silentis, la teksisto diris interesita:

– Ĉu vi memoras, Priskila, kiel ni petis por la persekutanto per la intimaj preĝoj de la eklezio? Por klarigi al nia spirito malforta en pardonado, Petro ofte instruis nin rigardi la nepetegeblan rabenon kiel fraton, kies menson la perfortaĵoj nebuligis. Por ke niaj pli intensaj resentoj disfumiĝu, li rakontadis sian propran pasintecon, dirante, ke ankaŭ li, pro nescio, pli ol unu fojon

malkonfesis la Majstron. Li reliefigadis niajn homajn malfortojn, admonadis nin al pli bona kompreno. Unu tagon li eĉ asertis, ke tiu persekutado de Saŭlo estas utila, ĉar ĝi instigis nin pensi pri niaj propraj mizeraĵoj, por ke ni viglu super nia respondeco antaŭ Jesuo.

La ekslernanto de Gamaliel havis okulojn malsekajn de ploro.

– La fama fiŝkaptisto el Kapernaum sendube estas unu el la grandaj fratoj de la malfeliĉuloj – li konvinkite murmuris.

La konversacio prenis alian direkton, post kiam Priskila partoprenis en la finaj vortoj de tiu temo, dirante, ke ŝi konas multe da virinoj en Jerusalemo, kiuj, kvankam iliaj edzoj kaj infanoj estis en karceroj, tamen sincere petis Jesuon prilumi la faman persekutanton de la “Vojo”. Poste ili parolis pri la Evangelio. La mantelo el steloj kovris iliajn grandiozajn esperojn, dum Saŭlo per plena gorĝo trinkadis la puran akvon de la sincera amikeco en tiu tiel malgranda nova mondo.

Inter tiuj karesaj, frataj konversacioj la tagoj rapide pasadis. De tempo al tempo venis el Palmira ankoraŭ provizoj kaj aliaj rimedoj. La tri loĝantoj de tiu silenta oazo interplektadis aspirojn kaj pensojn pri la Evangelio de Jesuo, la sola libro de iliaj meditoj en tiu tiel malproksima regiono.

La eksrabeno havis nun alian aspekton, ĉe la rekta kontakto kun la agresemaj fortoj de la Naturo. La haŭto, brunigita de la suno, havigis al li la aspekton de homo kutima al la krueleco de la dezerto. La longe kreskinta barbo aliigis lian mienon. La manoj, kiuj iam manipulis librojn, fariĝis kalaj kaj fortikaj. Aliflanke, la soluleco, la severa disciplinado, la peniga teksilo riĉigis lian animon per lumo kaj sereneco. La trankvilaj kaj enfalintaj okuloj atestis la novajn konkerojn de lia spirito. Li fine komprenis tiun nekonatan pacon, kiun Jesuo deziris al siaj disĉiploj; li nun povosciis klarigi al si la sindonecon de Petro, la trankvilecon de Stefano ĉe la momento de la malhoriga morto, la fervoron de Abigail, la bravecon de la adeptoj de la “Vojo”, kiujn li persekutadis en Jerusalemo. La meminstruado, ĉe la ne-

havado de la tiamaj rimedoj, lernigis al lia sopiranta animo tiun superbela sekreto, fordoni sin al la Kristo, por ripozi en ties nevideblaj akceptemaj brakoj. De kiam li per sia tuta koro kaj animo sin fordonis al la Majstro, la riproĉoj de la konscienco, la doloroj, la malfacilaĵoj kvazaŭ forflugis de lia spirito. Li ricevadis ĉian laboron kiel bonaĵon, ĉian bezonon kiel instruilon. Senpene li korligiĝis al Akvila kaj ties edzino, kvazaŭ ili naskiĝis kune. Foje tiu lia amiko malsaniĝis kaj ŝajnis baldaŭ mortonta, konsumata de forta febro. Ĉi tiu aflikta situacio, la sinsekvaj sablotempestoj malvigligis ankaŭ Priskilan, kiu iris en la liton ĉe nemultaj esperoj je savo, sed Saŭlo kondukis kun eksterordinaraj braveco kaj zorgo. Sincere fidante Dion, li atendis la restarigon de la kvieteco kaj ĝojo. Plezurante, li vidis Akvilan denove super la teksilo kaj la kunulinon revene al la domaj laboroj, kun novaj montroj de paco kaj konfido.

Kiam pli ol unu jaro pasis super tiu solejo, karavano, veninta el Palmira, portis al li mallongan letereton: la negocisto komunikis al li la ja longe antaŭviditan morton de sia frato.

La foriro de Gamaliel en la regnon de la morto estis ja por li dolora surprizo. La maljuna instruanto, post lia patro, estis la plej bona amiko, kiun li havis en la vivo. Li ekmeditis pri ties lastaj konsiloj, li pesis ties profundan saĝecon. Sub ties influo li ricevis la deziritan pacon, por alkonformiĝi al la necesa spirita situacio, tiel, ke li rearanĝu sian ekzistadon. En tiu tago pensoj de profunda resopiro turmentadis lian senteman animon.

Posttagmeze, post la manĝo kaj en la tempo de la kutimaj preĝoj, la eksrabeno ekrigardadis la geedzojn kun pli granda mildeco, kiu travidiĝis tra liaj sinceraj okuloj.

Kiam ĉiu el ili enprofundiĝis en la meditado de la Dia Evangelio, jen la tarsi junulo ekparolis iom time, neakorde kun sia decidema temperamento:

– Akvila, mi ofte, en la soleco de nia laboro, pensas pri la monstreco de la malbono, kiun al vi faris la leĝisto el Tarso. Kion vi farus, se vi iam okulo al okulo renkontus tiun turmentiston?

– Mi penus ami en li iun fraton.

– Kaj vi, Priskila? – li demandis la virinon, kiu scivola lin fikse rigardadis.

– Tio estus tre bona okazo, por atesti la amon, pri kiu Jesuo donis ekzemplojn en siaj diaj instruoj.

La eksleĝisto resereniĝis kaj, laŭtigante la voĉon, akcente diris:

– Mi ĉiam opiniis, ke ĉiu homo en administrado respondas por ĉiaj eraroj de siaj subuloj rilate la ĝeneralan programon de servoj; sekve, laŭ mia pensmaniero, mi ne tiel forte kulpigas Johain, kiu fariĝis ia vulgara krimulo, trouzante prerogativon, kiun li ricevis, por plenumi tiom da abomenindaj venĝoj.

– Al kiu do vi imputus la mortigon de mia patro? – demandis Akvila impresita, dum lia amiko iom haltis.

– Mi opinias, ke Saŭlo el Tarso devas respondi por tiu proceso. Estas vero, ke li ne rajtigis tiun kruelaĵon, sed li kulpiĝis pro sia persona indiferenteco rilate la detalojn de la tasko, kiu koncernis lian oficon.

La geedzoj ekmeditis pri la motivo de tiaj demandoj, dum la junulo silentis en retiriĝa sintenado.

Fine, per humila kaj kortuŝanta voĉo li rekomencis paroli:

– Miaj geamikoj, sub la inspiro de la Sinjoro estas juste, ke ni konfesu niajn kulpojn unu al alia. Miaj manoj, kaliĝintaj en laborado, mia penado, por bone lerni la virtojn de la fido, pri kiu vi ambaŭ konstante donas ekzemplojn antaŭ miaj okuloj, devas esti atesto pri mia spirita renoviĝo. Mi estas Saŭlo el Tarso, la sangavida persekutanto, turniĝinta en pentofarantan servanton. Mi multe eraris, sed nun mi multe bezonas. Laŭ sia favorokoreco Jesuo disŝiris la mizeran tunikon de miaj iluzioj. La revirtigaj suferoj penetris mian koron kaj ĝin lavis per doloraj larmoj. Mi formetis de mi ĉion, kio signifas honoraĵojn kaj mondajn valorojn, por ekpreni la savantan krucon kaj sekvi la Majstron sur la vojo de la spirita elaĉeto. Estas vero, ke mi ankoraŭ ne povis doni min al la konstruaj kaj sanktigaj luktoj, sed mi persistas ĉe la klopodo abnegacii min mem, forpuŝante la pas-

intecon de malbonagoj, por meriti la krucon de mia levigo al Dio.

Akvila kaj ties edzino lin rigardadis kun mirego.

– Ne dubu mian parolon! – li plorante daŭrigis. – Mi prenas sur min la respondecon por miaj bedaŭrindaj faroj, sed pardonu min, konsidere al mia krima scienco!

La teksisto kaj ties edzino komprenis, ke la larmoj sufokis lian voĉon. Kvazaŭ posedita de forta emocio, Saŭlo komencis konvulsie plori. Akvila alproksimiĝis kaj lin brakumis. Ĉi tiu ama konduto ŝajnis pliakrigi la doloran penton, ĉar la ploro ekfluis pli intense. Li rememoris tiun momenton, kiam li renkontis la sinceran amikecon de Ananias, kaj vidante sin ĉi tie en la brakoj de frato, li lasis la larmojn plene lavi lian koron. Li sentis la neceson elverŝi amajn sentojn. La iama vivado en Jerusalemo estis esprimo de konvenciamo kaj sekeco de koro. Kiel eminenta leĝisto li tiam havis multe da estimantoj, sed en neniu li trovis fratan altiriĝemon. En tiu loketo en la dezerto la atmosfero estis alia. Antaŭ li staris digna kaj homesta viro, sindona kaj laborema kamarado, iama viktimo de liaj senindulgaj, kruelaj persekutoj. Kiom da homoj, kiel Akvila kaj ties edzino, pro li diskuris en la mondon kaj nun manĝas la amaran panon de la ekziliĝo! La grandaj sentoj neniam okupas la animon per unu fojo, per sia tuta beleco. Homo, venenita de malbono, similas vazon da vinagro, kiu devas esti malplenigata iom post iom. La vido je Jesuo estis por li viva, nepasema okazaĵo, sed por povi kompreni la tutan amplekson de siaj novaj devoj, li nepre iru la mallarĝan vojon de la akraj, amaraj provoj. Li ja vidis la Kriston, sed por iri al tiu, li devos paŝi returne kaj transiri abismojn. La disreviĝoj en la sinagogo de Damasko, la konsolo apud la maleminentaj fratoj sub la direktado de Ananias, la manko de mono, la severaj konsiloj de Gamaliel, la anonimeco, la soluleco, la forlaso de la homoj plej karaj por li, la peza teksilo ĉe la varmeĝo de dezerto, la nehavado de ĉia materiala komforto, la ĉiutaga meditado pri la iluzioj de la vivo – ĉio ĉi estis altvalora helpo por lia venka decido. La Evangelio fun-

kciis kiel lampo dum lia malfacila vojiro al la eltrovo de si mem, por ke li mezuru la plej urĝajn bezonojn.

Streĉe brakumante sian amikon, kiu penis viŝi liajn larmojn, li rememoris, ke en Damasko, post la majesta vido je la Mesio, li eble konservis en sia animo la fieron povoscii instrui, la amon al la katedro de instruanto en Izrael, la despotan inklinon devigi sian simululon pensi tiel, kiel li, dum nun li povis esplori sian kulpan pasintecon kaj senti la ĝojon de la repaciĝo, humile turnante sin al sia viktimo. En tiu momento li havis la impreson, kvazaŭ Akvila reprezentas la tuton de ĉiuj homoj, ofenditaj de liaj kruelaj ekscesoj. Milda sereneco plenigis lian koron. Li sentis sin pli malproksime de la fiero, de la memestimo, de la amaraj ideoj, de la teruraj konsciencoriproĉoj. Ĉiu guto da ploro estis iom da galo, kiun li ĉerpis el sia animo kaj kiu refojigis lian senton de trankvileco kaj korfacileco.

– Frato Saŭlo – diris la teksisto, ne kaŝante sian ĝojon –, ni gaju antaŭ la Sinjoro, ĉar, kiel fratoj, ni estis for unu de alia, kaj nun ni troviĝas denove kune. Ni ne parolu pri la pasinteco: ni konsideru la povon de Jesuo, kiu nin aliigas por sia amo.

Priskila, kiu ankaŭ ploris, kortuŝite intermetis:

– Se Jerusalem sciis ĉi tiun venkon de la Mesio, ĝi donus dankon al Dio!

Sidante kun siaj du kunvivantoj sur la maldensa gazono de la oazo, ĉe la blovado de la vento, kiu mildigis la kruelecon de la varma posttagmezo, kaj ĉe la kunfratiĝo de ili tri en la majesteco de la komuna kredo, la tarsi junulo rakontis al ili la neforgeseblan okazaĵon en la vojiro al Damasko, elmontrante la profundajn ŝanĝojn en sia vivo.

La geedzoj ploris de emocio kaj ĝojo, aŭdante tiun favorkoraĵon de Jesuo, kiu en iliaj piaj okuloj estis ne nur esprimo de koreco al la erarinta servanto, sed beno de amo al la tuta homaro.

De post tiu tago la tasko ŝajnis al ili pli facila, la baroj malpli penigaj. Pasis neniu krepusko, en kiu ili ne parolis pri la glora dono de la Kristo proksime al Damasko.

– Nun, kiam la Majstro nin kunigis – diris Akvila kontenta –, ni foriru de la dezerto, ni proklamu tra la tuta mondo la favorojn de Jesuo. Mi kaj Priskila ne havas multe da familiodevoj. Pro la morto de mia patro ni troviĝas solaj rilate al la pli pezaj devoj, kaj estas konsilinde, ke ni ne preterlasu la okazon, por helpi la disvastigon de la Bona-Novajo. Krom la instruoj de Levi ni nun havas ankaŭ la vidon je Jesuo releviĝinta, por ilustri nian parolon.

Post longa tempo, kelkajn tagojn antaŭ ol ili rekomencos siajn luktojn en la grandaj urboj, aŭdante iliajn entuziasmajn vokojn, Saŭlo demandis pri la projektoj, kiujn ili dorlotis.

– De post via malkaŝo – diris la teksisto plena de konfido kaj espero –, mi nutras grandan idealon. Ĝi ŝajnas nekredebla ĉe la unua ekrigardo, sed mi revas antaŭ ol morti iri Romon kaj anonci la Kriston al la fratoj el la malnova Leĝo. Via vido sur la vojo al Damasko min kuraĝigas! Mi raportos tiun okazaĵon eĉ al tiuj plej indiferentaj kaj donos iom da lumo al tiuj plej sensaĝaj. Kiel humila servanto al la homoj, mi scios fordoni min al la interesoj de la Savinto.

– Sed kiam vi intencas foriri?

– Kiam la Majstro malfermos la vojon ĉe la unua oportuna okazo. Ĉe tio ne forlasos Palmiran.

Post paŭzo, dum kiu Saŭlo restis enpenŝiĝa, Akvila demandis:

– Kial vi ne venu kune kun ni Romon?

– Ha, se mi ĝin povus! – diris la eksrabeno, komprenigante sian deziron. – Mi pensas, ke Jesuo deziras vidi min antaŭ ĉio repaciĝinta kun ĉiuj, kiujn mi ofendis en Jerusalemo. Krom tio mi bezonas revidi miajn gepatrojn, por estingi la resopiron.

Efektive, post la veno de granda karavano, kiu alkondukis iliajn anstataŭontojn, la tri gefratoj de la “Vojo”, servataj de unu kamelo, forlasis la oazon direkte al Palmira, kie la familio de Gamaliel ilin plej ame akceptis.

Akvila kaj lia edzino tie restis kelkan tempon en servado al Ĥizkija, ĝis ili povos realigi la ĉarman idealon labori en la potenca Romo de la cezaroj, sed Saŭlo el Tarso, nun tiel rezistanta al la vetero, kiel iu bedueno, dankinte sian bonfaranton por lia komplezo kaj kun larmantaj okuloj adiaŭinte siajn amikojn, denove ekiris Damaskon, radikale aliĝinte de la meditoj dum tri sinsekvaj jaroj, pasigitaj en la dezerto.



III

Luktoj kaj humiligoj

La vojirado fariĝis sen incidentoj. En sia nova soluleco la tarsa junulo konstatis, ke nevideblaj fortoj pri-semas lian menson per grandiozaj kaj konsolaj inspiroj. En la sino de la vespero plena de steloj li havis la impreson, kvazaŭ li aŭdas ian karesan kaj saĝan voĉon, kiu esprimas alvokojn de plej alta amo kaj de plej viva espero. De post la momento, kiam li foriĝis de la estiminda kompanio de Akvila kaj ties edzino, kiam li vidis sin tute sola por la grandaj entreprenoj de sia nova destino, li trovis internajn fortojn, ĝis tiam neantaŭviditajn, ĉar nekonataj.

Li ne povis difini tiun spiritan staton, sed vera estis tio, ke de tiam, sub la direktado de Jesuo, Stefano staras apud li kiel fidela kompaniulo.

Tiuj admonoj, tiuj dolĉaj kaj amikaj voĉoj, kiuj helpis lin dum lia tuta apostolado kaj atribuitaj rekte al la Savinto, venadis de tiu nobla martiro de la “Vojo”, kiu spirite sekvis lin dum tridek jaroj, konstante refreŝigante liajn fortojn por la plenumado de la elaĉetantaj taskoj de la Evangelio.

Jesuo tiele volis, ke la unua viktimo de la persekutoj en Jerusalemo restu por ĉiam ligita al la unua turmentanto de la prozelitoj de lia doktrino de vivo kaj elaĉeto.

Anstataŭ la sentoj de memriproĉo kaj perplekseco pro la kulpa pasinteco, anstataŭ la resopiro kaj senkuraĝigo, kiuj iafoje pikis lian koron, li nun sentis brilajn promesojn en la renoviĝinta spirito, tamen ne povante klarigi al si la sanktan devenon de tiel profundaj esperoj. Malgraŭ la rimarkindaj fizionomiaj ŝanĝoj, kiujn al li

kaŭzis la vivado kaj la klimato en la dezerto, li eniris en Damaskon kun sincera ĝojo en la animo, nun tute sin fordoninta al la servado al Jesuo.

Kun neesprimebla ĝojo li brakumis la maljunan Ananiason, kiun li informis pri siaj spiritaj edifoj. La respektinda maljunulo tre bonanime reciprokis lian korelverŝon. Nun la eksrabeno ne bezonis izoliĝi en ia gastejo ĉe nekonatoj ĉar la fratoj de la “Vojo” kun malfermitaj brakoj loĝigis lin ĉe si. Ĉiutage li sentis la konsolan emocion de la unua kunveno, kiun li ĉeestis, antaŭ ol retiriĝi en la dezerton. La frata malgranda grupo kunvenis ĉiun vesperon, interŝanĝante novajn ideojn pri la instruoj de la Kristo, komentariante la mondajn okazaĵojn laŭ la Evangelio, parolante pri celoj kaj konkludoj. Saŭlo estis informita pri ĉiuj novaĵoj, koncernantaj la doktrinon, kaj spertis la unuajn efikojn de la malkonsento inter la judoj kaj la amikoj de la Kristo rilate la cirkumcidon. Lia flamanta temperamento komprenis la amplekson de la tasko, destinita por li. La formalaj-emaj fariseoj de la sinagogo jam ne ribelis kontraŭ la laboroj de la “Vojo”, se nur la sekvanto de Jesuo antaŭ ĉio fidele observis la principojn de Moseo. Nur Ananias kaj iaj nemultaj rimarkis la subtilecon de la kazuistikistoj, kiuj intence vekis konfuzon en ĉiuj sferoj, malakcelante la venkan marŝon de la savanta Bona-Novaĵo. La eksleĝisto rekonis, ke dum lia forestado la maniero de persekutado fariĝis pli danĝera kaj nerimarkebla, ĉar la kruelajn sed senkaŝajn karakterizaĵojn de la komenca entrepreno sekvis la montroj de farisea hipokriteco, kiu sub la preteksto de cedemo kaj bonvolemo dronigos la personon de Jesuo kaj la grandecon de ties diaj instruoj en kriman kaj intencitan forgeson. Konsente kun la novaj decidoj de sia konscienco, li ne intencis reiri en la sinagogon de Damasko, por ne ŝajni ia pavema instruanto, batalanta por la savo de aliulo, antaŭ ol zorgi pri sia propra perfektigo; tamen ĉe tio, kion li vidis kaj kolektis kun granda psikologia juĝokapablo, li komprenis, ke estas utile alfronti ĉiajn sekvojn kaj montri la malakordojn inter la farisea formalismo kaj la Evangelio, nome kio estas la cirkumcido kaj kio estas la nova kredo.

Li elvolvis antaŭ Ananias la projekton okazigi la diskutadon de tiu temo kaj la grandanima maljunulo stimulis lian intencon restarigi la veron sur ĝiaj veraj fundamentoj.

Por ĉi tio, en la dua sabato post sia veno en la urbon, la arda predikanto iris en la sinagogon. Neniu rekonis la rabenon el Tarso en lia eluzita tuniko, en lia haŭto, brunigita de la suno, en lia malgrasega vizaĝo, en la pli viva brilo de liaj profundaj okuloj.

Post la reglamentaj legado kaj komentarioj de pecoj el la Leĝo kaj kiam estis permesita la parolo al la sinceraj studentoj de la religio, jen la nekonato suriris la tribunon de la instruantoj de Izrael kaj, penante interesi la grandnombran kunvenataron, unue parolis pri la sankta karaktero de la Leĝo de Moseo, entuziasme ekzamenante la mirindajn kaj saĝajn promesojn de Jesaja, ĝis li entreprenis la studadon de la ceteraj profetoj. La ĉeestantoj aŭskultadis lin kun profunda atento. Kelkaj pensi identigi tiun voĉon, kiu ŝajnis al ili ne fremda. La fajra prediko vekis konkludojn de granda amplekso kaj beleco. Brilega spirita lumo disradiis el tiuj elokventaj ekflugoj.

Tiam la eksrabeno, konstatinte la magnetan povon, jam agantan sur la multenombran aŭdantaron, ekparolis pri la Nazareta Mesio, komparante ties vivon, farojn kaj instruojn kun la tekstoj, kiuj anoncis lin en la sanktaj skriboj.

Kiam li ektuŝis la demandon pri la cirkumcido, jen la kunvenataron eksplodis per furioza kriegado.

– Tio estas li! Li estas la perfidinto! – blekis tiuj plej kuraĝaj, identiginte la ekslegiston de Jerusalemo. – Ŝtonoj al la blasfemanto! Li estas la hundo de la sekto de la “Vojo”!

La estroj de la religia servado, siaflanke, rekonis la iaman kamaradon, nun rigardatan kiel defalinton de la Leĝo, kulpulon, al kiu oni devis suferigi akrajn, kruelajn punojn.

Saŭlo ĉeestis la refariĝon de tiu sceno, kiam li parolis en la elita kunveno antaŭ la levidoj el Kipro. Li

senemocie alfrontis la situacion, ĝis la religiaj aŭtoritatoj sukcesis kvietigi la tumultantojn.

Post la plej akraj fazoj de la agitiĝo la sinagogestro arogante ordonis al la parolanto deiri de la tribunon, por respondi liajn demandojn.

La konvertito apud Damasko en palpebruma daŭro komprenis, ke li bezonas sian tutan flegmon, por sukcese eliri el tiu malfacila aventuro, kaj tuj, sen protesto obeis.

– Ĉu vi estas Saŭlo el Tarso, iama rabeno en Jerusalemo? – emfaze demandis tiu aŭtoritato.

– Jes, per la graco de la Kristo Jesuo! – li firme kaj decideme respondis.

– Ne estas nun ĝustatempa ia parolo pri la ĉarpentisto el Nazaret! Interesas nin sole nur vin tuj aresti, laŭ la instrukcioj, kiujn ni ricevis de la Templo – en solena sintenado rediris la judo.

– Aresti min? – demandis Saŭlo kun miro.

– Jes.

– Mi ne rekonas en vi la rajton aresti min – diris la predikanto.

Ĉe tia energia konduto vidiĝis mirego en ĉies mieno.

– Kial vi hezitas? – rediris la judo – Via devo estas nur obei.

Saŭlo el Tarso lin severe ekrigardis kaj klarigis:

– Mi kontraŭstaras, ĉar, kvankam mi ŝanĝis mian religian kredon, mi tamen estas leĝisto, kaj krom tio, rilate al la politika situacio, mi estas roma civitano kaj do ne povas obei buŝajn arestordonojn.

– Sed vi estas arestita en la nomo de la Sinedrio.

– Kie la letero?

Ĉi tiu neatendita demando konsternis la aŭtoritatulon. Antaŭ pli ol du jaroj venis el Jerusalemo tiu oficiala letero, sed neniu povis antaŭvidi tiun okazon. La ordono estis zorge arkivita, sed ne povis esti tuj elmontrita, kiel postulis la cirkonstancoj.

– Tiu letero estos prezentita post nemulte da horoj – iom hezite diris la sinagogestro.

Kaj kvazaŭ pravigante sin, li aldonis:

– Ekde la skandalo de via lasta prediko en Damasko ni havas ordonon de Jerusalemo, por vin aresti.

Saŭlo energie fiksas sur li sian rigardon kaj, turnante sin al la ĉeestantaro, kiu mirege kaj admire observadis lian moralan bravecon, diris laŭte kaj bone aŭdeble:

– Viroj de Izrael, mi portis al via koro tion, kion mi plej bonan posedas, sed vi forpuŝas la veron, ŝanĝante ĝin je la eksteraj formalajoj. Mi vin ne kondamnas. Mi vin bedaŭras, ĉar ankaŭ mi estis tia, kiel vi. Tamen, kiam venis mia tempo, mi ne rifuzis la amikan helpon, kiun la Ĉielo al mi proponis. Vi superĵetas min per akuzoj, vi riproĉas miajn nunajn religiajn konvinkojn; sed kiu el vi estus preta diskuti kun mi? Kie la sincera batalanto de la spirita kampo, kiu dezirus kune kun mi sondi la sanktajn skribojn?

Profunda silento sekvis ĉi tiun inviton.

– Neniu? – demandis kun triumfa rideto la flama defendento de la nova kredo. – Mi konas vin, ĉar ankaŭ mi iradis tiujn vojojn. Ni tamen konsentu, ke la fariseismo nin pereigis, ĵetante niajn plej sanktajn esperojn en ian oceanon da hipokritaĵoj. Vi respektegas Moseon en la sinagogo; vi treege zorgas pri la eksteraj formalajoj, sed kia estas la mieno de via interna vivo? Kiom da doloroj vi kaŝas sub la brilanta tuniko! Kiom da vundoj vi maskas per trompaj vortoj! Same kiel mi, tiel vi devus senti teruran naŭzon kontraŭ tiom da abomenindaj maskoj! Se ni montrus la krimojn, kiujn oni faras en la ombro de la Leĝo, ni ne havus sufiĉe da skurĝoj, por puni la kulpulojn, nek la ĝustan nombron de la malbenoj nepre necesaj al la pentrado de similaj abomenindaĵoj! Mi suferis tiajn samajn ulcerojn, kiel vi, ankaŭ mi venenis min en tia sama mallumo, kaj mi venis, por alporti al vi la nepre necesan resanigilon. Vi forpuŝas mian fratan kunhelpon, tamen vi vane ribelas kontraŭ la regenerantaj procesoj, ĉar nur Jesuo sola povos nin savi! Mi alportas al vi la Evangelion, mi montras al vi la elaĉetan pardonon por niaj malnovaj mizeraĵoj, sed vi volas rekompenci mian klopodon per karcero kaj malbono? Mi rifuzas ricevi tian pagon interŝanĝe kontraŭ mia spontanea iniciativo! Vi ne povos aresti min, ĉar la parolo de Dio ne estas katenita. Se vi ĝin forĵetas, aliaj min komprenos. Ne estas juste, ke mi for-

donu min al viaj kapricoj, dum la farenda laboro postulas de mi sinoferon kaj bonvolon.

La direktantoj mem de la kunveno ŝajnis potencataj de grandaj, nedifineblaj magnetaj fortoj.

La tarsa junulo ĵetis superregantan rigardon sur ĉiujn ĉeestantojn, elmontrante la rigidecon de sia potenca animo.

– Via silento parolas pli elokvente, ol paroloj – li iom aŭdace diris. – Jesuo ne permesas al vi aresti lian modestan kaj fidelan servanton. Lia beno prilumu viajn spiritojn por la vera kompreno de la realaĵoj de la vivo.

Tion dirinte, li decideme sin direktis al la elirpordo, dum la mireganta rigardo de la ĉeestantoj sekvis lin, ĝis li firmpaŝe malaperis en unu el la mallarĝaj stratoj, kiuj kondukis al la granda placo.

Kvazaŭ vekiginte post la aŭdaca provoko, la kunveno degeneris en varmegan diskutadon. La sinagogestro, kiu ŝajnis treege impresita de la parolo de la eksrabeno, ne kaŝis sian sendecidecon, baraktante inter la amaraj veraĵoj, diritaj de Saŭlo, kaj la ordono por tuja aresto. Liaj pli energiaj kamaradoj penis levi lian karakteron de aŭtoritatulo. Estis necese por ĉiu prezo aresti la tro bravan parolinton. Tiuj plej decidemaj tuj ekserĉis tiun leteron el Jerusalemo, kaj tuj kiam ili ĝin trovis, ili decidis peti la helpon de la civilaj aŭtoritatuloj, entreprenante klopodojn en ĉi tiu rilato. Post tri horoj estis faritaj ĉiuj disponoj por la aresto de la tro kuraĝa predikisto. La unuaj taĉmentoj estis senditaj al la pordegoj de la urbo. Ĉe ĉiu el tiuj lokis sin malgranda grupo da fariseoj, akompanataj de du soldatoj, por fiaskigi ĉiun provon de elŝteliĝo.

Poste oni komencis ĝeneralan esploradon en la domo de ĉiuj homoj, suspektataj pri simpatio kaj rilatoj kun la disĉiploj de la Nazaretano.

De sia flanko Saŭlo, elirinte el la sinagogo, ekpensis iri al Ananias, sopirante lian amoplenan kaj konsilan parolon.

La klera maljunulo aŭdis lian raporton pri la okazaĵoj kaj aprobis lian konduton.

– Mi scias, ke la Majstro – fine diris la junulo – kondamnis la kverelojn kaj neniam kompaniis al diskut-emuloj, sed li tamen neniam indulgis la malbonon. Mi estas preta rebonigi mian kulpan pasintecon. Mi alfrontos la nekomprenemon de Jerusalemo, por elmontri mian radikalan aliĝon. Mi petos pri pardono ĉiujn, kiujn la malsaĝeco de mia nesciado ofendis, sed mi tute ne povos perterlasi la okazon aserti, ke mi estas sincera kaj verama. Ĉu mi servus al la Majstro, humiligante min antaŭ malnoblaj ekspluatistoj? Jesuo kiel nur eble bataladis kaj liaj disĉiploj ne alie povos konduki.

La bonkora maljunulo akompanadis liajn vortojn per jesaj gestoj. Kuraĝiginte lin per sia aprobo, Ananias rekomendis al li la plej grandan singardon; estus saĝe kiel eble plej baldaŭ foriĝi de ĉi tie, de lia kabano. La judoj en Damasko scias pri lia partopreno en la resaniĝo de sia amiko, tial li ofte elportadis iliajn insultojn kaj mokojn. Ili certe venos al li, por lin aresti. Li do opinias, ke estus bone, se la junulo rifuĝus en la domon de tiu samreligia lavistino, kie ili kuintime preĝadas kaj studadas la Evangelion. Ŝi ja lin bonkore akceptos.

Saŭlo senhezite obeis ĉi tiun konsilon.

Post tri horoj la maljuna Ananias estis vizitita kaj pridemandita. Ĉe sia diskreta konduto li estis enkarcerigita por pluaj esploroj.

Pridemandate de la religia aŭtoritatulo, li respondadis nur jene:

– Saŭlo certe estas kune kun Jesuo.

Laŭ siaj skrupuloj de konscienco la grandanima maljunulo opiniis, ke li tiele ne mensogas antaŭ la homoj, nek kompromitas fidelan amikon. Enkarcerigite kaj sen ia komunikado kun la ekstero dum dudek kvar horoj, li estis liberigita post doloraj punoj. Dudek bastonfrapoj serioze vundis liajn vizaĝon kaj manojn. Tamen, tuj kiam li vidis sin libera, li atendis la vesperon kaj singarde iris al la malriĉa kabano, kie okazadis la predikoj de la “Vojo”. Revidinte sian amikon, li elvolvis al ĉi tiu planon, kiu savos la situacion.

– Kiam mi estis infano – plezure diris Ananias –,

mi ĉeestis la forkuron de unu homo trans la muregojn de Jerusalemo.

Kaj kvazaŭ revenigante la detalojn de tiu fakto en lacan memoron, li demandis:

– Saŭlo, ĉu vi timus fuĝi en vimenkorbo?

– Kio! – diris la junulo ridetante. – Ĉu Moseo ne komencis sian vivon en korbo sur la akvo?

La maljunulo trovis amuza la aludon kaj klarigis sian projekton. Ne tre malproksime de tie kreskis altaj arboj ĉe la muregoj de la urbo. Oni levos la fuĝonton en granda korbo kaj poste, kun apenaŭ rimarkeblaj movoj, li povos malsupreniri sur la transan lokon; li tiel komencos sian vojon al Jerusalemo, kiel li intencas. La eksrabeno spertis grandegan ĝojon. En tiu sama tempo la domomastrino iris peti la helpon de tri el la plej fidindaj samkredanoj. Kiam la ĉielo fariĝis pli malluma en la unuaj horoj post noktomezo malgranda grupo koliktiĝis ĉe la murego, en loko pli malproksima de la centro de la urbo. Saŭlo kun larmoj kisis la manojn al Ananias. Per mallaŭta voĉo li adiaŭis siajn amikojn, um unu el ili donis al li grandan pakon da hordeokukoj. Sur la supro de la foliriĉa kaj malhelverda arbo la plej juna atendis la signalon. La tarsi junulo eniris en sian improvizitan veturilon kaj la elŝteliĝo fariĝis en la silenta sino de la nokto.

Sur la transa flanko li facile eliris el la korbo, sed li lasis sin preni de strangaj pensoj. Ĉu estas juste tiele fuĝi? Nenian krimon li faris. Ĉu ne estas malkuraĝo sin ne prezenti antaŭ la civila aŭtoritato por la necesaj klarigoj? Samtempe li konsideris, ke tiun lian konduton ne naskis iaj infanecaj kaj malnoblaj sentoj, ĉar li iras Jerusalemon sentime, li penas vidiĝi kun siaj iamaj kamaradoj, malkaŝe parolos al ili, kaj konkludis, ke ne estas pravigebla, ke li senreziste sin oferu al la tirana fanatikeco de la damaska sinagogo.

Ĉe la unuaj radioj de la suno la forkurinto troviĝis jam malproksime. Kiel solan provizon li kunportis la hordeokukojn kaj la Evangelion, donacitan de Gamaliel kiel memoraĵon pri tiel longa tempo da soluleco kaj batalado.

La vojirado estis tre malfacila kaj peniga. La laciĝo devigis lin konstante halti. Pli ol unu fojon li sin turnis al la aliula karitemo tra tiu fortojn konsumanta irado. Per la helpo de kameloj, ĉevaloj aŭ dromedaroj la vojaĝo de Damasko ĝis Jerusalemo ne postulis malpli ol unu semajnon da lacegigaj marŝoj, sed Saŭlo iradis piede. Li eble povus uzi la definitivan helpon de ia karavano, de kiu li ricevus la necesajn rimedojn, sed li preferis familiariĝi sian potencon volon kun la plej akraj baroj. Kiam la laciĝo inspiris al li la deziron atendi la eventualan kunhelpon de iu homo, li penis venki la senkuraĝiĝon, denove stariĝis, apogis sin al improvizitaj teniĝiloj.

Post dolĉaj rememoroj en tiu loko, kie li spertis la gloran vidon je la releviĝinta Mesio, li denove travivis karesajn emociojn, penetrante en Palestinon, malrapide trairente vastajn regionojn de Galileo. Li nepre volis ekkoni la kampon de la unuaj luktoj de la Majstro, identiĝi kun la plej karaj lokoj, viziti Kapernaumon kaj Nazareton, aŭdi la parolon de la filoj de tiu regiono. Jam en tiu tempo la flama Apostolo al nacioj deziris plene sciiĝi pri ĉiuj faktoj rilataj al la vivo de Jesuo, penis ilin senerare kompili, por postlasi al siaj fratoj en la tuta mondo la plej bonan kolekton da informoj pri la Dia Sendito.

Kiam li venis Kapernaumon, ora krepusko superverŝis per lumomirindaĵoj la gracian pejzaĝon. La eksrabeno pie malsupreniris ĝis la bordoj de la lago, raviĝis en la rigardado de la plaŭdantaj akvoj. Pensante pri Jesuo, pri la povo de ties amo, li ekploris, regata de stranga emocio. Li deziris esti vivinta kiel ia nekonata fiŝkaptisto, por ĉerpi tiujn diajn instruojn el ilia fonto mem.

Du tagojn li tie restis en dolĉa raviteco. Ne rekonigante sin, li iris al Levi, kiu lin volonte akceptis. Li elmontris al tiu sian sindonecon kaj konadon de la Evangelio, parolis pri la utileco de ties notoj. La filo de Alfeo ĝojis sub la influo de tiu inteligenta kaj kuraĝiga parolo. En Kapernaum Saŭlo travivis horojn ĉarmajn por lia emociiĝema spirito. Ĝi estis loko de predikoj de

la Majstro; kelkan distancon plue staris la dometo de Simon Petro; ankoraŭ plue la impostejo, kie la Majstro vokis Levin por la plenumo de grava rolo inter la Apostoloj. Li brakumis tie loĝantajn fortikajn homojn, kiuj, iam blindaj kaj lepraj, estis resanigitaj de la favoraj manoj de la Mesio. Li iris Dalmanutan, kie li konatiĝis kun Magdalena. Li riĉigis la impresiĝeman mondon de siaj observoj, rikoltante ĝis tiam nekonatajn informojn.

Post kelke da tagoj, ripozante en Nazaret, jen li apud la pordegoj de la sankta urbo de la izraelidoj, konsumita de laciĝo, de la penigaj iradoj, de la sendormaj noktoj, dum kiuj liaj suferoj ofte ŝajnis al li senfinaj.

Sed en Jerusalema atendis lin aliaj ne malpli doloraj surprizoj.

Absorbis lin premantaj demandoj. Li neniam plu ion sciis pri siaj gepatroj, siaj amikoj, sia karesema fratino, siaj familianoj, ĉiam vivantaj en lia memoro. Kiel lin akceptos liaj plej sinceraj kamaradoj? Afablan akcepton li ne povis atendi de la Sinedrio. La epizodo en Damasko komprenigis al li la animstaton de la anoj de la Tribunalo. Vere, li estis sen iaj formalaj elpelita el la plej distingiĝa rondo de lia raso; kompanse, li estis vokita de la Kristo en la senliman mondon de la eternaj veraĵoj.

Dronante en ĉi tiuj konsideroj, li trairis la pordegon de la urbo, rememorante tiun tempon, kiam li en rapida bigo eliradis, el alia loko, al la domo de Zeĥarja ĉe la vojo al Jafo. La rememoroj pri la plej feliĉaj horoj de la juneco plenigis per larmoj liajn okulojn. La stratirantoj de Jerusalema tute ne povis supozi, kiu estas tiu malgrasa kaj pala viro, kun longa barbo kaj enfalintaj okuloj, kiu iradas kun paŝo treniĝanta de laceco.

Post granda penado li atingis loĝejon, kiun li konis. Lia koro vivege ekbatis. Kvazaŭ nura almuzulo, li frapis je la pordo en korprema atendo.

Severmiena viro lin seke akceptis.

– Ĉu vi estus tiel bona kaj povus informi – li humile demandis –, ĉu ankoraŭ ĉi tie loĝas unu sinjorino, nomata Delila?

– Ne – sovaĝe respondis la viro.

Tiu akra rigardo ne favoris okazon de pluaj demandoj, tamen li kuraĝis ankoraŭ demandi:

– Ĉu vi povus fari al mi la komplezon diri, kies ŝi transloĝiĝis?

– He, he! – kolere rediris la domomastro –, ĉu mi donu kontentigon al iu almozulo? Vi nun demandos min, ĉu mi aĉetis ĉi tiun domon; vi poste demandos pri la prezo, postulos datojn kaj aliajn informojn pri la antaŭaj loĝantoj, konsumos mian tempon per lavango da tedaj demandoj!

Kaj fiksante sur Saŭlo la senemociajn okulojn, li per unu fojo finis:

– Mi scias nenion, ĉu vi aŭdas? For de tie ĉi!

La forkurinto el Damasko serene revenis sur la straton, dum tiu ulo malŝarĝis siajn malsanajn nervojn, brue ĵetfermante la pordon.

La ekslernanto de Gamaliel ekmeditis pri la amara realeco de tiu unua simbola akcepto. Jerusalemo certe neniam plu povos lin koni. Malgraŭ la dolora impresado li ne lasos sin kapti de senkuraĝiĝo. Li decidis iri al Aleksandro, parenco de Kajafas kaj kamarado de li, Saŭlo, en la laboroj en la Sinedrio kaj en la Templo. Lacega, li kun negrandaj esperoj frapis je ties pordo. Unu domoservanto, post la unua demando, alportis al li la ĝojigan sciigon, ke lia mastro ne longe lin atendigos. Efektive, post momento Aleksandro kun nekaŝebla surpriziĝo akceptis la nekonaton.

Ĝojante, ke li ricevis la atenton de malnova amiko, Saŭlo alpaŝis kaj ĉi tiun plej kore salutis.

La klera izraelido ne sukcesis kaŝi sian desapontigon kaj iom simpatie demandis:

– Amiko, por kio vi venis al ĉi tiu domo?

– Ĉu do estas eble, ke vi min ne rekonas? – demandis Saŭlo bonhumore, kvankam treege laca.

– Via mieno ne estas por mi tute fremda, tamen...

– Aleksandro! – li fine ekkriis ĝojoplena. – Vi do jam ne memoras Saŭlon?

Granda brakumo estis la respondo de la amiko, kiu interesite ekkriis, ŝanĝante la traktadon:

– Tre bone! Fine do! Dank'al Dio mi vidas, ke vi estas resaniĝinta! Mi ne eraris, esperante, ke vi revenos! Granda estas la patreco de la Dio de Moseo!

Saŭlo tuj rimarkis lian eraron. Sentante, ke estas malfacile sin komprenigi, li serĉadis la plej bonan manieron klarigi la aferon, dum la amiko daŭrigis:

– Sed kiel do vi aspektas! Nu, vi ŝajnas pli ĝuste ia bedueno de la dezerto... Diru al mi: kiel longe daŭris via obstina malsaneco?

Saŭlo faris al si kuraĝon kaj rediris:

– Sed vi certe eraras aŭ estas neĝuste informita, ĉar mi neniam estis malsana.

– Ne eble! – ekkriis Aleksandro videble ĉagrenita post tiom da elmontroj de amikeco. – Jerusalemo estas per legendoj pri vi. Ĉadok antaŭ tri jaroj venis ĉi tien, por peti energiajn disponojn de la Sinedrio, por ke klarigu via situacio, kaj post longaj debatoj li kunportis kaptordonan leteron kontraŭ vi. De tiu tempo mi klopodis kiel malesperulo, por ke estu ŝanĝitaj la artikoloj de la kondamna dokumento. Mi asertis, ke, se vi prenis sintenadon simpatian por la homoj de la “Vojo”, tia decido sendube obeis al celoj, kiujn ni ne kapablis tuj kompreni, kiel ekzemple pli efike esplori iliajn revoluciajn laborojn.

Saŭlo ne povis sin deteni kaj rebatis, antaŭ ol lia amiko daŭrigos:

– Sed en ĉi tiu okazo mi estus ia hipokritulo mallojala kaj neinda je mia ofico kaj je mi mem.

Aleksandro, ĝenata, kunŝovis la brovojn.

– Efektive, mi konsideris ĉiajn hipotezojn, kaj ĉar mi ne povis rigardi vin kiel hipokritulon – li akcente diris, penante sin korekti –, mi sukcesis pruvi, ke via konduto en Damasko originis el pasonta frenezeco. Ne estis juste pensi alie, des pli, ĉar, en la kontraŭa okazo, vi estus ankaŭ malsincera kontraŭ ni, en la sfero de la fariseismo.

La eksrabeno eksentis la delikatecon de la situacio. Li renovigis siajn religiajn ideojn, sed li ja staris antaŭ amiko. Dum multaj lin forlasis, tiu lin frate akceptis. Li devis do tiun ne ĉagreni, tamen estis neeble kaŝi la

veron. Li eksentis, ke liaj okuloj estas malsekaj. Li nepre, por ĉia prezo devis atesti pri la Kristo, eĉ se li per tio perdis la plej grandajn korligiĝojn en la mondo.

– Aleksandro – li humile diris –, estas vero, ke mi iniciatis la grandan persekutadon kontraŭ la “Vojo”, sed nun mi devas konfesi, ke mi eraris. La galileaj Apostoloj estas pravaj. Ni staras sur la sojlo de grandaj ŝanĝoj. Proksime al la pordegoj de Damasko Jesuo aperis al mi en sia glora resurekto kaj admonis min al la servado al lia Evangelio de amo.

Lia parolo elfluis timeme, kun la deziro ne vundi la kredon de la amiko, kiu malgraŭ tio vidigis profundan disreviĝon sur la palega vizaĝo.

– Ne diru tiajn absurdojn! – li ironie kaj ridetante ekkriis. – Bedaŭrinde mi vidas, ke la malsano ĉiam ankoraŭ konsumas viajn fizikajn kaj mensajn fortojn. La damaska sinagogo estis prava. Se mi vin ne konus de la infaneco, mi nun nomus vin blasfemanto kaj defalinto.

La tarsi junulo, malgraŭ sia vira energio, estis konsertnita.

– Cetere – daŭrigis lia amiko, prenante afekte protekteman sintenadon – ekde la komenco de via vojaĝo mi ne konsentis pri via mizera akompanantaro. Jona kaj Demetrio estas iaj stultuloj kaj Jakob havas muŝon en la cerbo. En tia kompanio ĉia via perturbo nepre kuntrenus grandajn moralajn malfeliĉojn al nia pozicio.

– Tamen, Aleksandro – iom humiligita diris la eksrabeno – mi devas insisti pri la vero. Mi ja vidis per ĉi tiuj okuloj la Mesion el Nazaret; lian voĉon mi aŭdis el lia propra buŝo. Kompreninte la erarojn, en kiuj mi vivadis, laŭ mia malĝusta koncepto pri kredo, mi iris en la dezerton. Tie mi restis tri jarojn en krudaj laboroj kaj longaj meditoj. Mia konvinko ne estas supraĵa. Hodiaŭ mi kredas, ke Jesuo ja estas la Savinto, la Filo de la Vivanta Dio.

– Nu, via malsaneco – fiere daŭrigis Aleksandro, ŝanĝante sian tonon de intimeco – renversis la vivon de via tuta familio. Hontante la sciigojn el Sirio, Ĵakvo

kaj Delila transloĝiĝis de Jerusalemo en Kilikion. Ekscite pri la ordono de la Sinedrio aresti vin, via patrino mortis en Tarso. Via patro, kiu vin plej zorge edukis, esperante de via inteligenteco la plej brilan gloron de nia raso, vivas deprimita kaj malfeliĉa. Viaj amikoj, lacaj elporti la ironiojn de la popolo en Jerusalemo kaj vin senutile serĉinte, vivas sensociete kaj humiligite. Ĉu vin ne doloras la vido je tia bildo? Ĉu tia doloro, kiel ĉi tiu, ne sufiĉas, por refari vian mensan ekvilibron?

Al la eksleĝisto angoro mueladis la koron. Post tiom da afliktaj tagoj, post tiom da ĉagrenoj, travivitaj por iom da kompreno kaj ripozo ĉe la karuloj, jen li nun vidas, ke ĉio ĉi estas iluzio kaj vantaĵo. La familio disbatita, la patrino mortinta, la patro malfeliĉa; la amikoj lin abomenas; Jerusalemo superĵetas lin per ironioj.

Vidante lin en tia situacio, la amiko ĝojis en sia animo, sopire atendente la efikon de siaj vortoj.

Enpensiĝinte unu minuton, Saŭlo akcente diris:

– Mi bedaŭras tiajn malĝojajn okazaĵojn kaj mi atestigas Dion, ke mi ne intence kunhelpis por tio. Tamen eĉ tiuj, kiuj ankoraŭ ne akceptis la Evangelion, devus kompreni, laŭ la iama Leĝo, ke ni devas ne esti fieraj. Moseo, malgraŭ la energio de siaj rekomendoj, instruis bonecon. La lin postirintaj profetoj estis senditoj, kiuj alportis profundajn mesaĝojn al niaj koroj, perdiĝintaj en malbonagado. Amos intigis nin strebi al la Eternulo, por sukcesi vivi. Mi bedaŭras, ke miaj amantoj opinias sin ofenditaj; estas necese konsideri tion, ke antaŭ ol aŭdi ian vanan juĝon de la mondo, ni devas celadi al la juĝo de Dio.

– Por mallonge diri, vi do persistas en viaj eraroj?
– Iom malamike demandis Aleksandro.

– Laŭ mia sento mi ne eraras. Dank'al la ĝenerala nekompreno – digne konsideris la eksrabeto –, ankaŭ mi troviĝas en malfacila situacio, sed la Majstro ja venos al mi kun sia helpo. Mi lin memoras kaj ĝuas profundan konsolon. La karesoj de la familio kaj la estimo de la amikoj estis en la mondo mia sola riĉaĵo, sed mi legis en la notoj de Levi la historion de unu riĉa

junulo, kiu instruas min, kiel kondukti en ĉi tiu horo (*). De la infaneco mi penis severe plenumi miajn devojn, sed, se, por ekhavi la prilumon de Jesuo, estas necese fari uzon el la riĉaĵo, kiu al mi restas, mi forrifuzos eĉ la estimon de ĉi tiu mondo!

Aleksandro ŝajnis kortuŝiĝi ĉe la melankolia tono de ĉi tiuj lastaj vortoj. Saŭlo faris la impreson de iu tuj ploronta.

– Via menso estas profunde konfuzita – rediris Aleksandro –, nur iu frenezulo povus tiel kondukti.

– Gamaliel ne estis frenezulo kaj akceptis Jesuon kiel la promesitan Mesion – diris la ekslegisto, elvokante la respektindan memoron de la granda rabeno.

– Mi tion ne kredas! – tondris la kunparolanto kun grandesinjora maniereco.

Saŭlo silente klinis sian vizaĝon. Estis granda lia humiliĝo en tiu momento. Rigardite kiel frenezulo, nun li estas rigardita kiel mensogulo. Malgraŭ tio, ĉe la apogeo de la perplekseco, li konsideris, ke lia amiko nun ne kapablas lin plene kompreni. Kiam li ankoraŭ meditis pri tiu embarasa situacio, Aleksandro reprenis la parolon:

– Bedaŭrinde mi bezonas konvinkiĝi pri la kadukeco de via cerbo. Por momento vi povos resti en Jerusalema senĝene, sed estas konsilinde ne pligrandigi la skandalon de via malsaneco per falsaj panegiroj pri la ĉarpentisto el Nazaret. La decido de la Sinedrio, kiun mi tiel pene ekhavis, povus ŝanĝiĝi. Pri la ceteraĵo – li finis, kvazaŭ forpelante la junulon –, vi scias, ke mi ĉiam ankoraŭ estas al via dispono por iu definitiva korektado de konduto, en ĉia tempo.

Saŭlo komprenis la averton; ne estis do necese plidaŭrigi la intervidiĝon. Lia amiko lin ĝentile elpelas.

Post du minutoj li denove troviĝis sur la strato. Estis preskaŭ tagmezo, varma tago. Li sentis soifon kaj malsaton. Li serĉfosis la monujon: ĝi estis preskaŭ malplena, restaĵo el tio, kion li ricevis de la malavaraj man-

(*) Mateo, 19:16 ĝis 23. – *Noto de la Aŭtoro.*

oj de la frato de Gamaliel, kiam li definitive forlasis Palmiran. Li elserĉis al si la plej modestan pensionon de unu el la plej malriĉaj kvartaloj de la urbo. Post simpla manĝo kaj antaŭ ol falis la karesaj ombroj de la vespero, li esperplena ekiris al tiu rebonigita malnova domo, kie Simon Petro kaj ties kompanianoj plej fervore laboradis por la afero de Jesuo.

Survoje li rememoriĝis pri tiu tago, kiam li tien iris kune kun Cadok aŭdi Stefanon. Kiel nun ĉio okazis inverse! La iama kritikisto reiris, por esti kritikata. La juĝisto, turniĝinta en juĝoton, dronigis la koron en strangan prematecon. Kiel oni akceptos lin en la eklezio de la “Vojo”?

Antaŭ la modesta domo li haltis. Penetrinte en la pasintecon, kun premata animo, li pensis pri Stefano. Antaŭ siaj kolegoj en la Sinedrio, en la fronto de la aŭtoritatuloj de la judismo, alia estis lia sintenado. Li sciis iliajn apartajn mizeraĵojn, ankaŭ li surmetis la fariseajn maskojn kaj povis do taksi iliajn kriantajn erarojn. Sed fronte al la galileaj Apostoloj sankta respekto trudiĝis al lia konscienco. Tiuj homoj, konsentite, estis krudaj kaj simplaj, ja vivis for de la tiamaj intelektaj valoroj, sed estis la unuaj kunlaborantoj de Jesuo. Krom tio li ne povus alproksimiĝi al ili, ne spertante profundan memriproĉon. Ili ĉiuj suferis ĝenojn kaj humiligojn pro li. Se Gamaliel ne interhelpus, eble Petro mem estus ŝtonumita... Li bezonis plifirmigi sian komprenon pri humileco, por elmontri sian varman deziron al sankta kunlaborado kun la Kristo. En Damasko li luktis en la sinagogo kontraŭ la hipokriteco de iamaj kamaradoj; en Jerusalem li plej brave alfrontis Aleksandron; tamen ŝajnis al li, ke alia devas esti lia konduto tie, kie li devis abnegacii sin mem, por repaciĝi kun tiuj, kiujn li estis vundinta.

Dronante en profunda meditado, li tremetante frapis je la pordo. Unu el la helpantoj de la interna servado, nomata Proĥoro, diligente alkuris, por al li malfermi.

– Frato – humile diris la tarsa junulo –, ĉu vi povas informi, ĉu Petro estas en la domo?

– Mi iros kaj ekscios – amike respondis la demando.

– Se jes – iom hezite aldiris Saŭlo –, diru al li, ke Saŭlo el Tarso deziras paroli al li en la nomo de Jesuo.

Proĥoro treege pala balbutis ian “jes”, fiksita sur la vizitanto la miregantajn okulojn kaj heziteme foriĝis, ne kaŝante sian grandegan surpriziĝon. Jen la persekutanto revenis post tri jaroj. Tiu frato nun rememoris tiun unuan diskuton kun Stefano, kiam la granda predikanto de la Evangelio ricevis tiom da insultoj. Post nelonge li eniris en la ĉambrojn, kie Petro kaj Johano konversaciis pri la internaj demandoj. La sciigo falis inter ilin kvazaŭ ia bombo. Neniu povus antaŭvidi ion tian. Ili ne kredis tiun legendon, kiun Jerusalemo ĉe ĉiu komentario ornamadis per nekonataj detaloj. Estis ne eble, ke la senkompata persekutanto de la disĉiploj de la Sinjoro konvertiĝis al la afero de ties Evangelio de amo kaj elaçeto.

Antaŭ ol irigi la kurieron returne al la neatendita vizitanto, la eksfiŝisto de la “Vojo” sendis voki Jakobon, por ke la tri kune decidu, kion ili faru.

La filo de Alfeo, aliĝinta en severmoran asketon, larĝe malfermis la okulojn.

Post la unuaj opinioj, kiuj, rapidece eldiritaj, esprimis pravajn timojn, Simon tre saĝe diris:

– Vere, li malbonfaris al ni, kiom li nur povis, tamen ne pri ni mem ni devas timi, sed pri la afero de la Kristo, kiu estas al ni konfidita.

– Mi senriske asertas, ke tia historio pri konvertiĝo estas nenio krom farso, por ke ni falu en aliajn insidojn – iom mole rediris Jakobo.

– De mia flanko – diris Johano –, mi petas Jesuon inspiri nin, kvankam mi memoras tiujn skurĝofrapojn, kiujn mi ricevis en la karcero laŭ la ordono de Saŭlo. Antaŭ ĉio estas nepre necese ekscii, ĉu efektive la Kristo aperis antaŭ li proksime al Damasko.

– Sed kiel ni ĝin eksciu – diris Petro, profunde komprenante la situacion. – Nia elemento de tia informiĝo estas Saŭlo mem; li estas la kampo, kiu elmontros, aŭ ne, la sanktan planton de la Majstro. Laŭ mia opinio,

devante prizorgi posedaĵon, kiu ja al ni ne apartenas, mi ne povas konduti alie, ol kiel konsilas la homa singardemo. Ne saĝe estas malfermi al li niajn pordojn, ĉar ni ne konas lian intencon. Ĉe la unua fojo, kiam li ĉi tie estis, Saŭlo el Tarso estis traktita kun la respekto, kiun la mondo al li donadis. Mi elektis por li la plej bonan lokon, por ke li aŭdu la parolon de Stefano. Bedaŭrinde lia malrespekta kaj ironia konduto vekis skandalon, kiu kulminis per la aresto kaj morto de nia kunulo. Li venis meminiciate kaj revenis, por nin aresti. La fratan amon, kiun ni al li montris, li repagis per mankatenoj kaj ŝnuroj. Tiel parolante, mi tamen ne devas forgesi la instruon de la Majstro pri la pardono, kaj tial mi denove asertas, ke mi pensas ne pri mi, sed pri la respondeco por la aferoj, kiuj estas al ni konfiditaj.

Ĉe tiel saĝaj konsideroj liaj amikoj silentis, kaj dume la ekŝfiŝisto aldonis:

– Sekve ne estas al mi permesite akcepti lin en ĉi tiun domon sen pli zorga esploro, kvankam mi ja havas sinceran bonvolon por tio. Tiamaniere decidante ĉi tiun aferon, mi kunvokos kunvenon por hodiaŭ vespere. La demando estas ja tre grava. Saŭlo el Tarso estis la unua persekutanto de la Evangelio. Mi volas, ke ĉiuj kunlaboru kun ni pri la prenendaj decidoj, ĉar mi mem volas ŝajni nek maljusta, nek neantaŭgardema.

Post longa paŭzo li diris al la sendito:

– Iru Proĥoro. Diru al li, ke li revenu poste, ĉar mi ne povas flanken meti la plej urĝajn farendadojn.

– Kaj se li insistos? – demandis la helpanto maltrankvila.

– Se li efektive venis ĉi tien en la nomo de Jesuo, li do scios kompreni kaj atendi.

Saŭlo senpacience atendis la kurieron. Li bezonis trovi iun, kiu lin komprenus kaj sentus lian ŝanĝiĝon. Li estis lacega. La eklezio de la “Vojo” estis lia lasta espero.

Proĥoro tre hezite transdiris al li la respondon. Nenio pli estis necesa, por ke li ĉion komprenu. La galileaj Apostoloj ne kredis lian vorton. Nun li pli klare ekzamenis la situacion. Li komprenis la nedifineblan kaj

grandiozan favorkorecon de la Kristo, kiu lin neatendite vizitis en la plejprofundo de lia spirita abismo proksime al Damasko. Laŭ la malfacilaĵoj, por iri al Jesuo, li kalkulis, kiom da boneco kaj kompatato estus necesaj, por ke la Majstro lin akceptu, farante al li sanktajn admon-ojn ĉe tiu neforgesebla renkontiĝo.

La helpanto rigardis lin simpatie. Saŭlo ricevis la respondon treege ĉagrenite. Li paliĝis kaj ektremis, kvazaŭ hontante sin mem. Krom tio li aspektis malsana, liaj okuloj estis enfalintaj, li kvazaŭ havis nur haŭton kaj ostojn.

– Mi komprenas, frato – li diris kun malsekaj okuloj. – Petro havas justajn motivojn...

Ĉi tiuj vortoj tuŝis Proĥoron ĉe la plejprofundo de la animo; por vidigi sian volontecon helpi la vizitanton, li demandis, montrante perfektan konadon de la faktoj:

– Ĉu vi ne kunportas el Damasko ian prezenton de Ananias.

– Mi jam havas ĉe mi tiun de la Majstro.

– Kiel do? – demandis la helpanto de Petro kun miro.

– Jesuo diris en Damasko – serene respondis la vizitanto –, ke li montros, kiom koncernas min suferi por lia nomo.

En sia animo la eksleĝisto treege resopiris siajn frat-ojn el Damasko, kiuj lin plej simplakore traktis. Tamen li samtempe konsideris, ke tia nuna konduto estas justa, ĉar en Damasko li montris en la sinagogo kaj apud Ananias, ke lia konduto ne estas ŝajniga. Pripensante, ke Jerusalem nun lin ĉie akceptas kiel ian vulgaran mensogulon, li eksentis varmajn larmojn, elŝprucantajn el liaj okuloj, sed por ke la kunparolanto ne rimarku, ke lia sentemo estas vundita, li diris, pravigante siajn larmojn:

– Miaj okuloj estas lacaj de la suno, rostanta super la dezerto! Ĉu vi povus doni al mi iom da malvarmeta akvo?

La ekleziano lin tuj kontentigis. Post momento Saŭlo trempis la manojn en grandan kruĉon kaj lavis al si la okulojn per pura akvo.

– Mi revenos poste – li post tio diris, etdante la manon al la helpanto de la apostoloj, kiu impresite foriĝis.

Maldolĉe spertante la malviglecon, la lacecon, la forlason de la amikoj, la plej akrajn disreviĝojn, la junulo el Tarso foriris kun ŝanceliĝantaj paŝoj.

Vespere, kiel li decidis, Simon Petro, montrante admirandan naturan saĝon, kunvenigis siajn plej gravajn kunulojn, por konsideri la aferon. Krom la galileaj Apostoloj tie troviĝis ankaŭ la fratoj Nikanoro, Proĥoro, Parmenas, Timon, Nikolao kaj Barnabas; ĉi tiu lasta estis alkolektita al la grupo da pli proksimaj helpantoj de la eklezio dank'al la noblaj ecoj de sia koro.

Permesite de Petro, Jakobo komencis la konversacion, eldirante sian malaprobon al ĉia tuja helpo al tiu lasthora konvertito. Johano konsideris, ke Jesuo estas tiel potenca kaj kapablas aliigi eĉ la plej malicajn spiritojn, tiel same, kiel rekuraĝigi la plej malfeliĉajn. Proĥoro konigis siajn impresojn pri la persista persekutanto de la Evangelio, reliefigante la kompaton, kiun ties farto vekis en la eĉ plej nesentemaj koroj. Siavice Barnabas diris, ke ankoraŭ en Kipro, antaŭ ol definitive transloĝiĝi en Jerusalemo, li aŭdis de kelke da levidoj pri la kuraĝo, kun kiu la konvertito parolis en la sinagogo de Damasko tuj post sia vido je Jesuo.

La eksfiŝisto el Kapernaŭm, impresita de la opinio de sia kunulo petis de ĉi tiu detalojn. Barnabas diris ĉion, kion li sciis, kaj montris la deziron, ke oni la plej bonvoleme decidu la aferon.

Nikolao, rimarkinte la atmosferon de bonvolo, kiu estiĝis ĉirkaŭ la persono de la eksrabeno, oponis kun la rigideco de siaj principoj:

– Ni konsentu, ke ne juste estas forgesi la kriplulojn, vivantajn en ĉi tiu domo, viktimojn de la abomeninda sovaĝeco de la partianoj de Saŭlo. La sanktaj skriboj rekomendas singardon kontraŭ la lupoj, kiuj penetras en la ŝafejon en ŝafaj feloj. Tiu leĝisto, kiu faris al ni tiom multe da malbono, ĉiam preferis la plej laŭtajn manifestiĝojn kontraŭ la Evangelio en la Sinedrio. Kiu

scias, ĉu li nun teksas kontraŭ ni ian novan grandefektan reton?

Ĉe tia demando la bonkora Barnabas silente klinis la vizaĝon. Petro rimarkis, ke la kunvenantaro dividiĝis en du grupojn: sur unu flanko estis li kaj Johano, kiuj subtenis la favoran opinion; sur la dua flanko Jakobo kaj Filipo estris la kontraŭan movadon. Konsiderante la averton de Nikolao, li milde diris:

– Amikoj, antaŭ ol eldiri ian personan vidpunkton, ni faru la plej bone, pensante pri la senlima boneco de la Majstro. Dum la laboroj en mia vivo, antaŭ Pentekosto, mi konfesas, ke ĉiaspecaj kulpoj prisemas mian vojon de malfortanima kaj pekanta homo. Mi ne hezitis vundi la plej malfeliĉajn kaj eĉ instigis la Kriston al tio! Kiel vi scias, mi estis el tiuj, kiuj malkonfesis la Sinjoron ĉe la ekstrema horo. Nun konante la veron per ĉiela inspiro, ni ne juste forgesus la Kriston en ĉiu entrepreno. Ni devas pensi, ke se Saŭlo el Tarso penas fari uzon el tiaj rimedoj, por ataki per pluaj frapoj la servantojn al la Evangelio, li do estas ankoraŭ pli bedaŭrinda, ol antaŭe, kiam li nin malkaŝe turmentadis. Ĉar li do estas iu malfeliĉulo, mi tial tute ne vidas motivojn, por ne etendi al li fratajn manojn.

Rimarkinte, ke Jakobo estas preta defendi la opinion de Nikolao, Simon Petro post mallonga paŭzo daŭrigis:

– Nia frato ĵus parolis pri la figuro de la lupoj, kiu penetras en la ŝafejon en la felo de senkulpaj ŝafoj. Mi konsentas ĉi tiun montron de zorgemo. Ankaŭ mi ne povis akcepti Saŭlon, kiam li hodiaŭ frapis je nia pordo, ĉar mi devas gardi la respondecon, al mi konfiditan. Mi volis decidi nenion sen via kunhelpo. La Majstro instruis nin, ke nenia utila laboro povas fariĝi sur la Tero sen la frata kunhelpado. Sed, uzante la prezentitan opinion, ni sincere ekzameni la neantaŭviditan demandon. Vere, Jesuo rekomendis al ni gardi nin kontraŭ la fermentaĵo de la fariseoj kaj diris, ke la disĉiploj devas esti prudentaj kiel serpentoj kaj simplaj kiel kolomboj. Ni konsentu, ke Saŭlo el Tarso povas ja esti tia figura lupoj. Eĉ tiel, konstatinte vera ĉi tiun okazon, ni devus decidi profundan demandon. Se ni klopodas en tasko de paco

kaj amo, kion ni faru kun la lupoj post lia nepre necesa identigo? Ĉu ni lin mortigu? Ni scias, ke ne tio estas nia pensmaniero. Ĉu ne estus pli racie pensi pri ia ebla malsovaĝigo? Ni ja konas krudajn homojn, kiuj sukcesas mastri sovaĝajn hundojn. Kio estus do kun la spirito, kiun Jesuo postlasis al ni kiel sanktan posedaĵon, se el malnoblaj timoj ni ne praktikus bonon?

Ĉi tiu emfaza parolo de la apostolo faris surprizan efikon. Jakobo mem ŝajnis konsternita pro siaj antaŭaj konsideroj. Nikolao vane klopodis pri novaj argumentoj, por formuli aliajn kontraŭdiraĵojn. Rimarkinte la farigintan pezan silenton, Petro serene diris:

– Mi do, amikoj, proponas, ke ni invitu Barnabason persone viziti la tarsan leĝiston en la nomo de ĉi tiu domo. Li kaj Saŭlo ne konas unu la duan, kaj tial tiu oportuna okazo estas des pli bona, ĉar, vidante lin, la tarsi junulo nenion bezonas rememori pri sia pasinteco en Jerusalemo. Se li la unuan fojon estus vizitita de iu el ni, li eble konfuziĝus, supozante, ke niaj vortoj estas de iu, kiu petus de li kontentigon pri antaŭaj faroj.

Johano varme aprobis ĉi tiun ideon. Ĉe la saĝeco de tiu parolo de Petro, Jakobo kaj Filipo montriĝis kontentaj kaj trankvilaj. Ili interkonsentis la esploradon de Barnabas por la sekvanta tago. Ili interesite atendas Saŭlon el Tarso. Se efektive lia konvertiĝo estis reala, des pli bone.

La diakono de Kipro distingiĝis per sia granda bonkoreco. Lia karesa kaj humila parolo, lia repacigemeco kunhelpis en la eklezio por la trankvila solvo de ĉiuj aferoj.

Kun amika rideto Barnabas brakumis la eksrabenon matene, en la pensiono, kie ĉi tiu gastis. Nenia trajto de ties nova personeco signis tiun faman persekutanton, por kiu Simon Petro devis kunvoki siajn amikojn, por decidi pri lia akcepto. La eksleĝisto estis plena de humileco kaj malsana. Nekaŝebla laceco travidiĝis tra liaj eĉ plej malgrandaj gestoj. La mieno ne maskis grandan suferon. Li respondis al la amikaj vortoj de la vizitanto kun malgaja, singena rideto. Estis tamen videbla la plezuro, kiun la vizitanto al li faris. La spontanea

ago de Barnabas lin kortuŝis. Laŭ ties peto Saŭlo rakontis al tiu la vojaĝon al Damasko kaj la gloran vidon je la Majstro, kio prezentis la neforgeseblan signilon de lia vivo. La aŭdanto ne kaŝis sian simpatian. Post nemulte da horoj li sentis sin tiel identiĝinta kun la nova amiko, kvazaŭ ili estus konatoj unu al la dua jam de multe da jaroj. Post la konversacio Barnabas pretekstis ion, por iri al la gastejmastro, al kiu li pagis por la gastado. Poste li invitis sian amikon akompani lin al la eklezio de la “Vojo”. Saŭlo hezitis, sed Barnabas insistis super li.

– Mi timas tien iri – iom sendecide diris la tarsa junulo –, ĉar mi jam multe ofendis Simonon Petron kaj liajn kunulojn. Nur per aldono de favorkoreco de la Kristo mi sukcesis ricevi ian radion da lumo, por ne tute perdi miajn tagojn.

– Nu, nu! – ekkriis Barnabas, bonhumore frapante lin sur la ŝultron. – Kiu ja ne eraris tra sia vivo? Jesuo nin ĉiujn helpas ne pro nia merito, sed tial, ke ni, kiel pekuloj, bezonas tian helpon.

Post nemultaj minutoj ili jam iradis sian vojon, dum kiu la sendito de Petro rimarkis la kadukan sanstaton de la iama rabeno. Tre pala kaj malvigliĝinta, ĉi tiu ŝajnis pene marŝadi; liaj manoj tremadis, li sentis sin febra. Li lasis sin konduki, kvazaŭ iu, konanta la neceson pri helpo. Lia humileco kortuŝis lian kamaradon, kiu pri li aŭdis tiom da malhonoraj famoj.

Kiam li venis al la domo, Proĥoro malfermis al ili, sed nun Saŭlo ne senfinan tempon atendis. Barnabas amike ekprenis lian manon, kaj ili direktis sin al la vasta salono, kie Petro kaj Timon ilin atendis. Ili ĉiuj salutis unu alian en la nomo de Jesuo. La iama persekutanto nun estis pli pala. De sia flanko, Simon, vidante lin, ne kaŝis geston de mirego ĉe la ŝanĝiĝo de lia aspekto.

Tiuj enkaviĝintaj okuloj, la ekstrema malvigleco parolis al la galileaj Apostoloj pri profundaj suferoj.

– Frato Saŭlo – diris Petro kortuŝita –, Jesuo volas, ke vi estu bone veninta en ĉi tiun domon.

– Tiel estu – rediris la ĵusveninto kun malsekaj okuloj.

Timon lin brakumis kun karesaj vortoj, anstataŭ Johano, kiu ĉe mateniĝo foriĝis, en komisio de la kunfrataro de Jafo.

Venkinte la ĝenatecon de la unua kontakto kun la personaj amikoj de la Majstro, post tiel longa foresto, la tarsa junulo, kontentigante ilian peton, baldaŭ plendetale raportis tiun okazaĵon proksiman al Damasko, elmontrante grandegan emociion per la larmoj, kiuj abunde fluadis sur lia vizaĝo. Li senfine kortuŝiĝis, rememorante tian grandan favorkoraĵon. Petro kaj Timon havis jam nenian dubon: la vizio de la eksrabeno estis ja reala. Ili ambaŭ, kune kun Barnabas, sekvis tiun priskribon ĝis la fino kun okuloj malsekaj de ploro. Efektive la Majstro revenis, por konverti la kruelan persekutanton de lia doktrino. Vokante Saŭlon el Tarso en la rifuĝejon de sia amo, li ankoraŭfoje donis la senmortan instruon pri la pardono kaj favorkoreco.

Fininte sian raporton, la eksleĝisto estis laca kaj senfortiĝinta. Insiste demandite pri siaj novaj esperoj, siaj projektoj de spirita laboro, kaj ankaŭ pri tio, kion li intencas fari en Jerusalemo, li tuj konfesis sian profundan dankon por tia amika interesiĝo kaj iom time diris:

– Mi bezonas komenci aktivan fazon de laborado, per kiu mi forviŝus mian kulpan pasintecon. Estas vero, ke mi ĉian por mi eblan malbonon faris kontraŭ la eklezio de Jesuo, en Jerusalemo, sed se la favorkoreco de Jesuo longigos mian restadon en la mondo, mi uzos la tempon vastigante ĉi tiun domon de amo kaj paco ĝis aliaj lokoj de la Tero.

– Jes – saĝe rediris Simon –, la Mesio certe reŝiĝos viajn fortojn, ke vi povu plenumi tian noblan entreprenon en la oportuna tempo.

Saŭlo ŝajnis revigliĝi ĉe tia kuraĝiga parolo. Komprenigante, ke li deziras plifirmigi la konfidon de la aŭdantoj, li prenis el la faldoj de la eluzita tuniko pergamenurojn kaj, prezentante ĝin al la ekŝiŝisto el Kapernaŭm, emocioplene diris:

– Jen relikvo el la amikeco de Gamaliel, riĉaĵo, kiun mi sendisiĝe kunportas. Nelonge antaŭ ol morti, li do-

nacis al mi kopion el la notoj de Levi rilataj al la vivo kaj faroj de la Savinto. Li tre ŝatis ĉi tiujn notojn, ĉar li ilin ricevis de ĉi domo, ĉe sia unua vizito en ĝi.

Elvokante dolĉajn rememorojn, Simon Petro kun viva interesiĝo ekprenis tiun rulaĵon. Saŭlo konstatis, ke la donaco de Gamaliel trafis la celon, antaŭviditan de la noblanima donacinto. De tiu momento la okuloj de la iama fiŝkaptisto fiksiĝis sur Saŭlo kun pli granda konfido. Petro parolis pri la bonkoreco de la nobla rabeno, informiĝante pri lia vivo en Palmira, pri liaj lastaj tagoj, pri lia forpaso. Lia disĉiplo ĉion ĝoje klarigis.

Ree tuŝante la demandon pri siaj novaj perspektivoj, Saŭlo, ĉiam humile, pli vaste traktis ĝin, dirante:

– Mi havas multe da planoj de laboro por la estonteco, sed mi sentas min senforta kaj malsana. La peno, kiun de mi postulis la lasta vojaĝo, sen iaj rimedoj, pli difektis mian farton. Mi sentas en mi febron, la korpo doloras, la animo estas konsumita.

– Ĉu mankas al vi mono? – bonkore demandis Simon.

– Jes... – li mole respondis.

– Tiaj bezonoj – klarigis Petro – jam parte estas kontentigitaj. Ne tro zorgu pri tio. Mi rekomendis al Barnabas pagi la unuajn elspezojn en la gastejo; pri la cetero, ni invitas vin restadi ĉe ni tiel longe, kiel vi volos. Uzu niajn rimedojn tiel, kiel plaĉos al vi.

La gasto kortuŝiĝis. Rememorante la pasintecon, li sentis sin vundita ĉe sia memestimo, sed samtempe li petis Jesuon helpi lin, por ne preterlasi la oportunajn okazojn, por sin instrui.

– Mi akceptas... – li respondis hezite, elmontrante sinĝenecon. – Mi restos ĉe vi tiel longe, kiel mia farto bezonos flegadon...

Kaj kvazaŭ por li estis malfacile aldoni peton al la komplezo, kiun li jam akceptis, post longa paŭzo, en kiu oni vidis lian penon por paroli, li kortuŝe petis:

– Se eble, mi dezirus okupi tiun saman liton, en kiu Stefano kuŝis dank'al la grandanimeco de ĉi tiu domo.

Barnabas kaj Petro forte emociiĝis. Ĉiuj jam antaŭe interkonsentis diri nenion pri tiu predikanto, mort-

igita sub mokokriroj kaj ŝtonfrapoj. Ili ne volis rememorigi la pasintecon antaŭ la damaska konvertito, eĉ tiam, se lia konduto ne estus absolute sincera.

Aŭdante lin, la iama fiŝisto el Kapernaum preskaŭ ekploris. Kun plej granda sindonemo Petro plenumis lian peton, kaj sekve li estis kondukita en la internon de la domo, kie li enlitiĝis inter tre blankaj tukoj. Petro faris ankoraŭ ion: kompreninte la profundan signifon de tiu deziro, li alportis al la konvertito apud Damasko la simplajn pergamenrulaĵojn, kiujn tiu martiro ĉiutage uzadis por la studado kaj meditado de la Leĝo, de la Profetoj kaj de la Evangelio. Malgraŭ la febroy Saŭlo ekĝojis. Profunde emociite, li legis la nomon “Abigail”, plurajn fojojn skribitan en la plej amataj pecoj de tiuj sanktaj notoj. Tie troviĝis frazoj propraj al la dialektiko de la amata fianĉino, datoj, kiuj absolute koincidis kun ŝiaj intimaj malkaŝoj, kiam ili ambaŭ konversaciis pri la pasinteco en la fruktoĝardeno de Zeĥarja. La vorto “Korinto” ofte montriĝis. Tiuj dokumentoj kvazaŭ havis voĉon, parolis al lia koro pri ia granda kaj sankta frata amo. Tiun voĉon li aŭdis silente kaj ĝian parolon li avare konservis. Li al neniu malkaŝos siajn animajn dolorojn. Sufiĉis al aliuloj la grandaj eraroj de lia politika vivo, la memriproĉoj, la rebonigoj, kiujn, kvankam li ilin faris antaŭ ĉiuj, tre malmultaj amikoj sukcesis kompreni. Rimarkinte lian teniĝon de konstanta medito, Petro plej fervoris en sia frata helpado: jen amikaj paroloj, jen komentarioj pri la povo de Jesuo, jen fortodonaj buljonoj, jen sukriĉaj fruktoj, jen kuraĝigaj vortoj. Pro ĉio ĉi la malsanulo kortuŝiĝis, ne sciante, kiel esprimi sian nepereeman dankon.

Li tamen rimarkis, ke Jakobo, filo de Alfeo, eble timante liajn antaŭajn farojn, ne komplezas al li eĉ per unu vorto. Pozante severan plenumanton de la Leĝo de Moseo, en la eklezio de la “Vojo” li iam kaj iam estis vidata de la tarsi junulo kvazaŭ ia senemocia ombro, glitanta kaj murmuranta preĝojn inter la malsanuloj. Ĉe la unuaj momentoj li sentis, kiel doloras al li tia malŝato, sed li baldaŭ konsideris la bezonon humiliĝi antaŭ ĉiuj. Li ankoraŭ nenion faris, kio povus jesigi siajn novajn

konvinkojn. Kiam li mastris en la Sinedrio, ankaŭ li ne indulgis la lasthorajn aliĝojn.

Tuj kiam li ekresaniĝis, li, jam plene identiĝinte kun la korligiĝo de Petro, petis de ĉi tiu konsilojn pri la planoj, kiujn li teksis, insistante pri absoluta malkaŝeco, por ke li povu alfronti la situacion, kiel ajn severaj la cirkonstancoj.

– Laŭ mia opinio – saĝe diris la Apostolo –, ne ŝajnas al mi prudenta via restado en Jerusalemo nun, dum ĉi tiu fazo de renoviĝo. Sincere parolante, ni devas rigardi vian novan animstaton same, kiel iun altvaloran planton, kiu ekkreskas. Estas necese liberigi la dian ĝermon de la fido. Se vi restus ĉi tie, vi ĉiutage renkontus de unu flanko la necedemajn pastrojn, batalantajn kontraŭ via koro, kaj de alia flanko la nekomprenoblajn homojn, kiuj parolas pri la grandegaj malfacilaĵoj por la pardono, kvankam ili mem plene konas la instruojn de la Majstro en ĉi tiu rilato. Vi certe scias, ke la persekutado kontraŭ la simpatiantoj por la “Vojo” postlasis tre profundajn sulkojn en la animo de la popolo. Ne malofte ĉi tien alvenas kripluloj, kiuj malbenas tiun movadon. Tio, Saŭlo, en niaj okuloj apartenas al pasinta tempo, kiu neniam revenos, sed tiuj homoj ĝin ne tuj povas kompreni. En Jerusalemo vi neĝustaloke starus. La ĝermo de viaj novaj konvinkoj renkontus legiojn da malamikoj kaj vi eble ektroviĝus sub la kaprico de la incitegiĝo.

La junulo aŭdis ĉi tiujn avertojn kun premata koro, ne protestante. La apostolo estis prava. En la tuta urbo trafos lin trivialaj kaj detruaj kritikoj.

– Mi revenos Tarson... – li humile diris. – Eble mia maljuna patro komprenos mian situacion kaj helpos miajn paŝojn. Mi scias, ke Jesuo benos miajn klopodojn. Se estas necese rekomenci la ekzistadon, mi do ĝin rekomencos en la hejmo, ek kiu mi devenis...

Simon lin ekrigardis kun mildaj okuloj, mirante tiun spiritan aliĝon.

Ĉiutage ili refaris siajn amikajn konversaciojn. La konvertito apud Damasko, brile inteligenta, montris nesatigeblan scivolon pri la persono de la Kristo, pri liaj

eĉ plej malgrandaj faroj kaj plej subtilaj instruoj. Aliajn fojojn li petis de la eksfiŝisto ĉiajn eblajn informojn pri Stefano, kaj ĝojis pro la memoro pri Abigail, kvankam li avare konservis la detalojn de sia junula amintrigo. Li tiam sciigis pri la pezaj laboroj de tiu predikanto de la Evangelio, kiam tiu estis en karceri, pri lia sindoneco al unu lia samlandano, nomata Sergio Paŭlo, pri lia forkuro en kaduka parto, en la palestina haveno, pri lia eniro en la eklezion de la “Vojo” kiel mizerulo, pri la unuaj scioj pri la Evangelio kaj sekva prilumado en la Kristo Jesuo. Li raviĝis, aŭdante la simplajn kaj amoplenajn rakontojn de Petro, kiu vidigis sian respektigon por la martiro, sed gardante sin ĉagreni lin en lia karaktero de pentanta turmentisto.

Tuj kiam li povis ellitiĝi, li iris aŭdi la predikojn en tiu sama salono, kie li la unuan fojon insultis la fraton de Abigail. La komentariantoj de la Evangelio estis plej ofte Petro kaj Jakobo. La unua paroladis kun profunda singardo, kvankam li uzadis mirindajn simbolajn esprimojn. La dua ŝajnis turmentata de la judiga influo. Jakobo faris la impreson, kvazaŭ li iris returne, kiel la plej multaj ĉeestantoj, al la fariseaj regularoj. Liaj paroladoj dekliniĝis de la modelo de libereco kaj amo en Jesuo Kristo. Li montriĝis enfermita en la malvastaj konceptoj de la reganta judismo. Multaj el la periodoj de liaj paroladoj temis pri la malpuraj viandoj, la devoj al la Leĝo, la ordonoj pri la cirkumcido. Ankaŭ la medio ŝajnis tute alia. La eklezio multe pli similis ian ordinaran sinagogen. Izraelidoj en solena sintenado esploradis pergamenfoliojn kaj papirusojn, kiuj enhavis la ordonojn de Moseo. Saŭlo vane serĉis la impresan bildon de la suferantoj kaj kripluloj, kiajn li vidis en tiu salono, kiam li tie estis la unuan fojon. Instigite de tre granda scivolo, li konstatis, ke Simon Petro tre bonkore ilin akceptas en apuda ĉambro. Li pli proksimiĝis kaj tiam li povis vidi, ke dum la predikado estas ekzakta kopio de la scenoj en la sinagogoj, la afliktitoj seninterrompe sin reciproke sekvas en la modesta ĉambro de la eksfiŝisto el Kapernaum. Iuj eliradis kunportante kruĉojn da medikamento, aliaj oleon kaj panon.

Saŭlo estis impresita de ĉio ĉi. La eklezio de la “Vojo” ŝajnis forte aliiĝinta. Io mankis al ĝi. La ĝenerala atmosfero estis ia klimato de sufoko de ĉiuj ideoj de la Nazaretano. Li tie jam ne sentis la grandan vibradon de frateco kaj de unuigo de principoj per la spirita sendependeco. Post zorgaj meditadoj li ĉion ĉi atribuis al la foresto de Stefano. Ĉi tiu mortis kaj kun li estingiĝis la klopodo pri la libera Evangelio, ĉar ja Stefano estis la dia fermento de la renovigo. Nur nun li konvinkiĝis pri la grandeco de ties altega tasko.

Li ekdeziris peti la parolon, paroli kiel en Damasko, vipi la erarojn de interpreto, foscui la polvon, kiu amasiĝis sur la grandega kaj sankta idealismo de la Kristo, sed li rememoris la avertojn de Petro kaj silentis plu. Nun ne estis juste riproĉi aliulan konduton, se li ankoraŭ ne montris proprajn farojn, por atesti pri sia propra revirtiĝo. Se li provos paroli, li eble aŭdos justajn riproĉojn. Krom tio, li rimarkis, ke liaj iamaj konatoj, nun frekventantoj de la eklezio de la “Vojo”, tute ne forlasante siajn erarajn principojn, lin strabe rigardadas, ne kaŝante ian malŝaton, konsiderante lin mense perturbita. Tamen per ekstrema peno li bridis la deziron sin bati kun ili en tiu salono mem, por la restarigo de la pura vero.

Post tiu unua kunveno li serĉis oportunan okazon, por esti duope kun la eksfiŝisto el Kapernaŭm, por sciiĝi pri la viditaj ennovaĵoj.

– La fulmotondro, kiu sin ĵetis sur nin – volonte klarigis Petro, ne dirante eĉ unu vorton pri la iama konduto de Saŭlo –, instigis min al serioza meditado. De post la unua traserĉado de la Sinedrio en ĉi tiu domo, mi rimarkis ĉe Jakobo profundan ŝanĝiĝon. Li fordonis sin al vivado de granda asketeco kaj severa plenumado de la Leĝo de Moseo. Pri tiu ŝanĝiĝo de lia konduto mi multe pensis, sed de alia flanko mi konsideris, ke li malbona ne estas. Li estas kunulo zorgema, sindona kaj lojala. Mi silentis kaj poste mi konkludis, ke ĉio havas sian pravon de ekzisto. Kiam la persekutoj pli streĉis la sieĝon, la konduto de Jakobo, kvankam nemulte laŭdinda, koncerne la liberecon de la Evangelio, estis iel bon-

fara. Eĉ la plej kruelaj delegitoj respektis lian kulton al Moseo, kaj liaj sinceraj amikrilatoj inter la judoj ebligis al ni konservi la riĉaĵon, kiun ni ricevis de la Kristo. Mi kaj Johano travivis korpemajn horojn, konsiderante tiujn problemojn. Ĉu ni tiam estis malsinceraj, ĉu ni falsis la veron? Afliktite, ni petis inspiron de la Majstro. Dank'al lia dia lumo ni venis al saĝaj konkludoj. Ĉu estus juste, ke ankoraŭ juna vinberujo luktus kontraŭ sovaĝa figarbo? Se ni kontentigus la personan impulson batali kontraŭ la malamikoj de la sendependiĝo de la Evangelio, ni do nepre forgesus la kolektivan aferon. Ne pardoninda estus sperta direktilisto, kiu ĵetus sian ŝipon kontraŭ rokon, kun malutilo por ĉiuj, kiuj fidis lian lertecon. Ni do konstatis, ke la malfacilaĵoj estas grandnombraj kaj ke ni devas, kvankam plej malgranda estis nia kapableco, konservi la ankoraŭ junan arbon de la Evangelio por tiuj, kiuj venos post ni. Krom tio, Jesuo instruis, ke ni atingas altajn celojn en ĉi tiu mondo, nur cedante ion de ni mem. Per la helpo de Jakobo la fariseismo konsentas iradi kune kun ni; nu, laŭ la instruoj de la Majstro ni irados kiom eble plej da majloj. Kaj mi eĉ pensas, ke se Jesuo tiel instruis nin, tiel estas, ĉar dum la irado ni havas la oportunajn okazojn por ion lernigi kaj por montri, kiaj ni estas.

Dum Saŭlo lin rigardadis, plej admirante liajn saĝajn vortojn, la apostolo finis:

– Tio forpasos! La afero apartenas al la Kristo. Se ĝi apartenus al ni, ĝi certe fiaskus; ni mem, ni estas nenio krom simplaj kaj neperfektaj kunhelpantoj.

Saŭlo konservis ĉi tiun instruon kaj enpense retiriĝis en sin mem. Nun en lia konscienco Petro ŝajnis al li multe pli granda. Tiu sereneco, tiu kapablo kompreni eĉ la plej sensignifajn faktojn atestis antaŭ li ties profundan spiritan klarecon.

Nun resaniĝinte, la tarsi junulo, antaŭ ol preni ian decidon pri la nova irenda vojo, ekdeziris revidi Jerusalemon, instigite per komprenebla impulso de korigiĝo al tiuj lokoj, kiuj vekis en li tiom da rememoroj. Li vizitis la Templon, spertante la kontraston de la emocioj. Li ne kuraĝis penetri en la Sinedrion, sed, sopirante, iris

al la sinagogo de la kilikianoj, kie, li supozis, li revidos noblajn kaj ĝentilajn amikojn. Tamen eĉ tie, kie kolektiĝis liaj samlandanoj, loĝantaj en Jerusalemo, li estis akceptita malvarme. Neniu invitis lin paroli. Nur iaj kelke da konatoj de lia familio seke manpremis lin, sed tute malkaŝe evitis lian kompanion. Tiuj plej ironiemaj, post la religiaj servoj, kun mokridetoj faris al li kelke da demandoj. Lia konvertiĝo proksime al Damasko estis kritikata per pikantaj kaj humiligaj ŝercoj.

– Ĉu tio ne estis ia mistifiko de la sorĉistoj de la “Vojo”? – diris unuj.

– Ĉu tio ne estis Demetrio, kiu sin vestis kiel Kristo kaj tiel malklarigis liajn malsanajn kaj lacajn okulojn? – demandis aliaj.

Li aŭdadis la ironiojn, kies objekto li estis. Ili traktadis lin kiel frenezulon. Tiam, ne retenante la impulsiĝemon de sia honesta koro, li kuraĝe suriris podion kaj fiere diris:

– Fratoj el Kilikio, vi eraras. Mi ne estas freneza. Vi ne ekpensas eldemandi min, ĉar mi vin konas kaj povoscias mezuri la farisean hipokritecon.

Tuj eksplodis konflikto. Malnovaj amikoj vomis insultojn. Tiuj pli konsideremaj ĉirkaŭis lin tiel, kiel ili agus kun iu malsanulo, kaj petis lin silentiĝi. Saŭlo devis perforti sin mem por bridi sian indignon; malfacile li sukcesis regi sin kaj foriris. Sur la strato li sentis sin atakita de bolantaj ideoj. Ĉu ne estus pli bone batali tute malkaŝe, prediki la veron sen konsidero al la religiaj maskoj, kiuj svarmis en la urbo? En liaj okuloj estis pravigeble pensi pri iu kampanjo, deklarita kontraŭ la fariseaj eraroj. Kaj se, kontraŭante la avertojn de Petro, li en Jerusalemo fariĝus estro de pli vasta agado favore al la Nazaretano? Ĉu li ne kuraĝis persekuti ties disĉiplojn, kiam ĉiuj leĝistoj estis komplezemaj? Kial li nun ne entreprenu ian kompenson, iniciatante inversan movadon? Li sendube trovas kelkajn amikojn, kiuj aliĝus al li por tiu energia klopodo. Per tiu ago li helpus sian fraton mem en lia honoriga laboro favore al la mizeruloj.

Tute absorbita de tiaj perspektivoj, li eniris en la faman Templon. Li rememoris la plej malproksimajn tagojn de sia infaneco kaj unuatempa juneco. La tiea movado de la popolo jam ne vekis en li la antaŭan intereson. Instinkte li alproksimiĝis al la loko, kie Stefano mortis. Li bildigis al si kun ĉiuj detaloj tiun doloran scenon. Amara premateco sufokis lian koron. Li fervore ekpreĝis al la Kristo. Li eniris en la ĉambron, kie li iam estis duope kun Abigail, aŭdante la lastajn vortojn de tiu martiro de la Evangelio. Li fine komprenis la noblecon de tiu animo, kiu lin pardonis en la horo de sia morto. Ĉiu vorto de la mortanto nun strange resonis en liaj orel-oj. La nobleco de Stefano lin ravis. Tiu predikanto de la Evangelio sin oferis por Jesuo! Kial do ankaŭ li ne same agu? Estis juste resti en Jerusalemo, sekvi ties heroajn paŝojn, por ke la instruado de la Majstro estu komprenata. Rememorante la pasintcon, la tarsi junulo enprofundiĝis en varmegajn preĝojn, petis la inspiron de la Kristo por siaj novaj vojoj. Tiam la damaska konvertito, manifestante siajn spiritajn kapablojn, frukton de severa disciplinado, ekrimarkis, ke ia lumradia figuro subite aperis al li kaj dolĉe diras:

– Foriru de Jerusalemo, ĉar viaj iamaj kamaradoj nunmomente ne akceptos vian ateston!

Sub la protekto de Jesuo, Stefano sekvis liajn pasojn sur la vojo de la lernado, malgraŭ sia transcenda pozicio. Saŭlo, kompreneble, pensis, ke ĉi tiun amikan averton faris la Kristo mem, kaj forte impresite, direktis sin al la eklezio de la “Vojo”, kie li informis al Simon Petro tiun okazaĵon.

– Tamen – li aldone diris al la grandanima apostolo, kiu lin aŭskultadis kun miro – mi devas ne kaŝi, ke mi intencis agiti la religian opinion de la urbo, defendi la aferon de la Majstro, restarigi la veron en ĝia plena karaktero.

Dum la ekfisiisto lin aŭskultadis silente, kvazaŭ serĉante traŝan respondon, la nova disĉiplo daŭrigis:

– Ĉu Stefano sin ne fordonis al la sinifero? Mi sentas, ke ĉi tie mankas al ni kuraĝo egala al tiu de la martiro, pereinta sub la ŝtonfrapoj de nia senscienco.

– Ne, Saŭlo – firme rediris Petro –, ne saĝe estas tiel pensi. Mi havas pli grandan sperton pri la vivo, kvankam mi ne posedas kapitalon da inteligento similan al via. Estas skribite, ke disĉiplo ne estas super sia instruanto. Ĉi tie, en Jerusalemo, ni vidis Judason implikita en insidon egalan al ĉi tiu. En la afliktaj tagoj de tiu tragedio sur Kalvario, kiam la Sinjoro elmontris la bonegecon kaj diecon de sia amo, kaj ni donis la amaran ateston pri nia tre malgranda fido, ni kondamnis la malfeliĉan kunulon. Kelkaj el niaj fratoj ĝis hodiaŭ temadas tian saman opinion, kiel en la unuaj tagoj, sed, en kontakto kun la realeco de la mondo, mi venis al la konkludo, ke Judas estis pli ĝuste malfeliĉa ol malica. Li ne kredis la valoron de senpagaj faroj, ne konsentis alian povon krom tiu de la estroj de la mondo. Li ĉiam maltrankvile sopiris la tujan venkon de la ideoj de la Kristo. Ni ofte vidis lin senpacience kvereli pro la starigo de la Regno de Jesuo en la kadro de la politikaj principoj de la mondo. La Majstro ridetis kaj ŝajnigis, ke li ne komprenas tiajn sugestojn, ĉar li konsciis sian dian programon. Antaŭ ol esti apostolo, Judas estis negocisto; li kutimis vendi sian varon kaj senprokraste rivevi la monon. Laŭ miaj nunaj meditoj mi supozas, ke li ne povis alie kompreni la evangelion, ne sciante, ke Dio estas longepacienca kreditoro, kiu grandanime atendas nin ĉiujn, kiuj estas nenio alia ol mizeraj ŝuldantoj. Li eble profunde amis la Mesion, sed la senpacienco igis lin preterlasi la sanktan oportunan okazon. Pro la sola deziro plifruigi la venkon li teksis la tragedion de la kruco dank'al sia malvigleco.

Saŭlo, forte mirante ĉi tiujn justajn konsiderojn, lin aŭdadis, kaj la bonkora apostolo daŭrigis:

– Dio estas la Zorganto de ĉiuj. Neniu estas forgesita. Por ke vi pli bone faru al vi opinion pri la situacio, ni supozu, ke vi estu pli feliĉa ol Judas. Ni imagu vian personan venkon en la afero. Ni konsentu, ke vi povus altiri al la Majstro la tutan urbon. Kio poste? Ĉu vi devus kaj povus respondi por ĉiuj, kiuj aliĝus al vi klopodo? Vi ja povus altiri, sed neniel konverti. Ĉar ne estus por vi eble kontentigi individue ĉiujn, vi fine

estus tiel same abomenata. Se Jesuo, kiu ĉion povas en ĉi tiu mondo sub la egido de la Patro, pacience atendas la konvertiĝon de la mondo, kial do ni, de nia flanko, ne povas atendi? La plej bona pozicio de la vivo estas la ekvilibro. Ne prave estas deziri fari nek malpli, nek pli ol tion, kio nin koncernas, des pli, ĉar la Majstro diris, ke “sufiĉas por la tago ĝia propra malbono”.

La konvertito apud Damasko plej forte miris. Simon prezentis nekontestablajn argumentojn. Lia inspiro miregis Saŭlon.

– En vido de la okazintaĵo – serene daŭrigis la ekŝfĥisto –, estas grave, ke vi foriru, tuj kiam vesperigĥos. La batalo, komencita en la sinagogo de la kilikianoj, estas multe pli pereiga, ol la malpacoj en Damasko. Povas okazi, ke morgaŭ oni pensos vin enkarcerigi. Krom tio la averto, kiun vi ricevis en la Templo, ne estas tia, ke ni prokrastus fari la nepre necesajn disponojn.

Saŭlo sincere akceptis ĉi tiun proponon. Malmultajn fojojn en sia vivo li aŭdis tiel saĝajn konsiderojn.

– Ĉu vi intencas reveni Kilikion? – per patreca tono demandis Petro.

– Mi jam ne havas, kien iri – respondis kun rezignacia rideto.

– Nu, vi iros Cezarean. Tie ni havas sincerajn amikojn, kiuj povos al vi helpi.

La programo de Simon Petro estis precize plenumita. Nokte, kiam Jerusalema dronis en profunda silento, modesta rajdanto transiris la pordegojn de la urbo direkte al la vojoj, kondukantaj al la granda palestina haveno.

Torturate de la konstantaj zorgoj de sia nova vivo, li venis Cezarean kun la decido ne longe tie resti. Li transdonis la leterojn de Petro, kiuj rekomendis lin al la fidelaj amikoj. Simpatie akceptita de ĉiuj, li ne renkontis malfacilaĵojn por repreni la vojon de la urbo de sia naskiĝo.

Irante nun al la scenejo de sia infaneco, li sentis sin treege emociita ĉe la plej etaj rememoroj. Ĉi tie iu malebenaĵo de la vojo elvokis en lia menso ĉarmajn bildojn; tie iu grupo de maljunaj arboj vekis apartan atenton. Plurajn fojojn li preterpasis karavanojn da kameloj,

kiuj rememorigis al li la patrajn entreprenojn. Tiel aktiva estis lia spirita vivo dum la lastaj jaroj, tiel grandaj la aliformiĝoj, ke la hejma vivo aspektis al li kvazaŭ ia bona sonĝo, antaŭ longe disfumiĝinta. Per Aleksandro li ricevis la unuajn sciigojn pri sia hejmo. Li bedaŭris la forpason de la patrino ĝuste tiam, kiam li la plej multe bezonis ŝian bonkoran komprenemon, sed siajn zorgojn en ĉi tiu rilato li transdonis al Jesuo. De la maljuna patro ne estus racie atendi ĝustan komprenon: spirito formalajema, absolute enradikiĝinta en la fariseismo, lia patro certe ne aprobos lian konduton.

Kun premata animo li atingis la unuajn stratojn de Tarso. La rememoroj seninterrompe sekvis unu alian.

Frapinte je la pordo de la patra hejmo, li komprenis, laŭ la indiferenta mieno de la servistoj, kiel aliĝinta li revenis. La du plej malnovaj servistoj lin ne rekonis. Li tenis sin silente kaj atendis. Post longa atendo lia patro iris al li renkonte. La maljuna Isaak, apogante sin al bastono, en akuta fazo de necedema reŭmatismo, ne kaŝis sian miregon: li tuj rekonis sian filon.

– Mia filo! – li ekkriis energie, penante mastri la emocion. – Ĉu tio estas ebla, ke miaj okuloj min trompas?

Saŭlo lin kore brakumis, kaj ambaŭ iris en la internon de la domo.

Isaak sidiĝis kaj, penante penetri la animon de sia filo, kun akra rigardo kaj per riproĉa tono demandis:

– Ĉu vi do estas ja resaniĝinta?

Por la junulo tia demando estis ankoraŭ unu bato kontraŭ lian korsentemon. Li sentis sin laca, frakasita, disreviĝinta; li bezonis ian kuraĝigon por rekomenci sian ekzistadon en pli alta idealismo, kaj jen eĉ lia patro riproĉas lin per absurdaj demandoj! Sopirante komprenon, li per kortuŝanta tono rediris:

– Mia patro, pro kompatato, gastigu min! Mi ne estis malsana, sed nun mi estas mizera koncerne la spiriton! Mi sentas, ke mi ne povos rekomenci mian karieron en la vivo sen ia ripozo! Etendu al mi viajn manojn!

Konante la patran severecon kaj la amplekson de siaj propraj bezonoj en tiu malfacila momento de sia

vojo, la eksleĝisto de Jerusalemo tute humiliĝis, esprimante per milda voĉo la tutan lacecon de sia koro.

La maljuna izraelido lin firme, severe rigardadis kaj senkompatate diris:

– Vi ne estis malsana? Kion do signifas tiu bedaŭrinda komedio proksime al Damasko? La infanoj povas esti sendankaj kaj sukcesas forgesi, sed la patroj, se ili neniam forviŝas siajn infanojn el sia menso, scias pli bone senti la kruelecon de ilia konduto... Ĉu vin ne doloras vidi nin venkitaj kaj humiligitaj ĉe la honto, per kiu vi superĵetis nian domon? Konsumita de ĉagrenoj, via patrino trovis faciligon por sia koro en la morto, sed mi? Ĉu vi kredas min nesentema por via defalo? Mi eltenis nur tial, ke mi nutris la esperon strebi al la Eternulo, supozante, ke ĉio tio estas nenio krom ia miskompreno, ke ia mensa perturbo implikis vin en la nekomprenemon kaj nepravigeblajn kritikojn de la mondo! Mi edukis vin kun la tuta amo, kiun ĉiu patro el nia raso kutime dediĉas al sia unu sola filo... Vi reprezentis glorajn promesojn por nia gento. Mi min foroferis por vi, mi superŝutis vin per karesoj, mi ne domaĝis penojn, por ke vi povu havi la plej klerajn instruantojn, mi prizorgis vian junecon, mi donis al vi mian tutan koron – Kaj tiele vi reciprokas la sindonecon kaj karesojn de via hejmo?

Saŭlo povis alfronti multe da armitaj viroj, ne perdante la senhezitan kuraĝon, kiu karakterizis liajn teniĝojn; li povis vipi la kondamnindan konduton de aliaj, okupi la plej danĝeran tribunon, por esplori la homajn hipokritaĵojn, sed antaŭ tiu maljunulo, kiu jam ne povis ŝanĝi sian kredon, kaj konsiderante la amplekson de ties sanktaj patraj sentoj, li ne reagis kaj ekploris.

– Vi ploras? – tre seke daŭrigis la maljunulo. – Mi neniam donis al vi ekzemplon de malkuraĝo! Mi heroe klopodis en la plej malfacilaj tagoj, por ke al vi manku nenio. Via morala malforteco estas frukto de la ĵurrompo, de la perfido. Viaj larmoj fontas el neretenebla memriproĉo! Kiel do vi ekiris la vojon de la abomeninda mensogo? Por kio vi ŝpinis la scenon apud Damasko, por fornei tiujn principojn, kiuj nutris vin ekde la lulilo? Kial vi forlasis la brilan situacion de rabeno, de

kiu ni tiel multe esperis, por fariĝi kamarado de iaj sentaŭguloj, kiuj neniam havis la aman tradicion de iu hejmo?

Ĉe ĉi tiuj maljustaj riproĉoj la tarsa junulo plorsingultadis, eble la unuan fojon en sia vivo.

– Kiam mi ekciis, ke vi intencas edziĝi kun ia junulino sen konataj gepatroj – senindulge daŭrigis la maljunulo –, mi surpriziĝis kaj esperis, ke vi tion diros rekte al mi. Poste Delila kaj ŝia edzo devis rapidece forlasi Jerusalemon, mordate de honto pro la arestordono, petita de la damaska sinagogo kontraŭ vi. Mi ofte cerbumadis, ĉu ne tiu malaltklasa virino, kiun vi elektis kaŭzis tiajn grandajn moralajn malfeliĉojn. De pli ol tri jaroj mi ĉiutage ellitiĝas, por mediti pri via krima konduto malutile por viaj plej sanktaj devoj!

Aŭdante tiujn maljustajn dirojn pri la persono de Abigail, la junulo rekuraĝiĝis kaj humile murmuris:

– Patro, tiu virino estis ja sankta! Dio volis, ke ŝi ne estu plu en ĉi tiu mondo! Se ŝi ankoraŭ nun vivus, mi eble havus sanan cerbon, por taŭge aranĝi mian novan vivon.

Ĉi tiu respondo ne plaĉis al lia patro, kvankam lia kontraŭdiro estis farita per tono de obeo kaj afableco.

– Nova vivo? – li kolere blekis. – Kion vi volas diri per tio ĉi?

Saŭlo forviŝis la larmojn kaj rezignacie respondis:

– Mi volas diri, ke tiu epizodo proksime al Damasko ne estis ia iluzio kaj ke Jesuo reformis mian vivon.

– Ĉu vi ne povus vidi en ĉio ĉi ian absolutan frenezajon? – demandis lia patro kun mirego. – Ne eble! Kiel do vi forlasis la amon de la familio, la respektindajn tradiciojn de via nomo, la sanktajn esperojn de viaj karuloj, por sekvi ian nekonatan ĉarpentiston?

Saŭlo komprenis la moralan suferon de sia patro, kiam ĉi tiu parolis en tia maniero. Li eksentis impulson ĵeti sin en liajn amplenajn brakojn, paroli al li pri la Kristo, havigi al li realan komprenon de la situacio; sed samtempe antaŭvidante la malfacilaĵon, ke la patro lin komprenu, li ĉi tiun rezignacie rigardadis, dum la mal-

junulo ankoraŭ havis malsekajn okulojn, elmontrante la ĉagrenon kaj la doloron, kiuj lin posedis.

– Kiel tio povas esti? Se la malbeninda doktrino de la nazareta ĉarpentisto trudas kriman indiferecon por la plej sanktaj ligiloj de la vivo, kiel do oni povus nei, ke ĝi estas malutila kaj bastardeca? Ĉu estas saĝe preferi ian aventuriston, kiu mortis inter krimuloj, ol la dignan kaj laboreman patron, kiu maljuniĝis en la honesta servado al Dio?

– Sed, patro – diris la junulo per peteganta voĉo –, la Kristo estas la promesita Savinto!

Isaak fariĝis ankoraŭ pli furioza.

– Vi blasfemas! – li kriis. – Ĉu vi ne timas insulti la Dian Providencon? La esperoj de Izrael ne povus kuŝi sur iu frunto, kiu konsumiĝis per sango ĉe la puno inter rabistoj! Vi frenezumas! Mi postulas, ke vi rekonsideru vian konduton.

Dum li faris paŭzon, la konvertito oponis:

– Estas fakto, ke mia pasinteco estas plena de kulpoj, en tiu tempo, kiam mi ne hezitis persekuti la reprezentantojn de la vero, sed de tri jaroj ĝis hodiaŭ mi memoras nenian agon, kiu postulas ian rekonsideron.

Ŝajnis, ke la maljunulo atingis la supron de la kolero, kaj li acide diris:

– Mi bedaŭras, ke saĝaj paroloj ne alkonformiĝas al via konfuzita prudento. Mi konstatas, ke mi ĝis nun karesis vanan esperon, morti malamante nenium. Bedaŭrinde mi estas devigita rekoni en viaj nunaj decidoj agojn de iu frenezulo aŭ ordinara krimulo. Por ke niaj teniĝoj estu klare difinitaj, mi do petas vin definitive elekti inter mi kaj la malŝatinda ĉarpentisto!

Eldirante ĉi tiun ordonparolon, la patra voĉo estis obtuza, ŝanceliĝa, elmontranta profundan suferon. Saŭlo komprenis kaj vane serĉis ion repacigan argumenton. La nekomprenemo de la patro lin afliktis. Li neniam tiel multe kaj tiel intense meditis pri la instruo de Jesuo rilata al la familiaj ligiloj. Li sentis sin intime ligita al la nobla muljunulo, volis helpi ĉi tiun pri ties intelekta rigideco, mildigi ties tiranan naturon, sed li komprenis la barojn, kiuj levigis antaŭ liaj sinceraj deziroj. Li sciis,

kiel severe estis ellaborita lia propra karaktero. Antaŭsciante, ke senutilaj estus alvokoj de la koro, li murmuris samtempe humile kaj angore:

– Mia patro, ni ambaŭ bezonas Jesuon!

La maljunulo, necedema, direktis al li flaman rigardon kaj krude rediris:

– Vi elektis! Vi havas jam nenion por fari en ĉi tiu domo!

La maljunulo tremis. Estis videbla lia spirita peno por tia decido. Edukita laŭ la neflekseblaj normoj de la Leĝo de Moseo, Isaak suferis kiel patro; tamen li elpelis sian filon, al kiu oni tiel esperis, kvazaŭ li plenumus ian devon. La amanta koro inspiris al li kompaton, sed la prudento de homo, enfermita en la senindulgajn dogmojn de la raso, sufokis lian naturan impulson.

Saŭlo rigardis lin en silenta kaj petega teniĝo. La hejmo estis la lasta espero, kiu ankoraŭ restis al li. Li ne volis kredi tiun lastan perdon. Li fiksas sur la maljunulo la larmantajn okulojn kaj post longa tempo da streĉa atendado petegis kortuŝe, kiel ne estis al li kutime:

– Mankas al mi ĉio, patro. Mi estas laca kaj malsana! Mi havas neniom da mono, mi bezonas la aliulan favorkorecon.

Kaj akcentante sian doloran plendon:

– Ĉu ankaŭ vi min forpelas?

Isaak sentis, ke ĉi tiu peto vibras en la plejprofundo de lia koro, sed, eble pensante, ke tiam krudeco pli efikas ol mildeco, li seke respondis:

– Refaru vian impreson, ĉar neniu vin forpelas. Vi mem absolute forlasis viajn amikojn kaj la plej purajn korligiĝojn! Ĉu vi travivas necesbezonon? Vi do petu la ĉarpentiston pri la alkonforma helpo... Li, kiu faris tiajn monstrajn absurdojn, ja havos sufiĉe da povo, por al vi helpi.

Grandega doloro frapis la spiriton de la eksrabeno. La esprimoj pri la Kristo suferigis lin multe pli ol la rektaj riproĉoj, kiujn li ricevis. Ne sukcesante sufokis sian angoron, li sentis, ke varmaj larmoj ruliĝadas sur la vangoj, brunigitaj de la suno super la dezerto. Li neniam antaŭe spertis tian amaran ploron; eĉ ne dum tiu

afliktanta blindeco, sekvanta lian vidon je Jesuo, li tiel amare ploris. Kvankam forlasita en ia sennoma gastejo, blinda kaj deprimita, li sentis la protekton de la Majstro, kiu lin vokis al sia servado. Li havis la impreson, kvazaŭ li troviĝas pli proksime al la Kristo. Li ĝojis ĉe la plej akraj doloroj, ĉar li ricevis, proksime al Damasko, ties gloran kaj rektan alvokon. Sed post ĉio, li vane serĉadis apogon ĉe la homoj, por komenci la sanktan taskon. Tiuj pli amikaj rekomendis al li teni sin for. Laste jen lia patro, maljuna kaj bonstata, rifuzas doni al li la manon ĉe la plej dolora momento de lia vivo, forpelas lin, montras abomenon al liaj reformantaj ideoj, ne toleras lian amikecon kun la Kristo. Sed meze en la larmoj, fluantaj el la okuloj, li rememoris Ananiason; kiam ĉiuj forlasis lin en Damasko, jen la sendito de la Majstro aperis kaj lin rekuraĝigis. Lia patro ironie parolis al li pri la povo de la Sinjoro; jes, Jesuo ja havigos al li la nepre necesajn rimedojn. Ĵetante sur la patron neforgeseblan rigardon, li humile diris:

– Adiaŭ do, patro! Vi prave parolas, ĉar mi estas certa, ke la Mesio min ne forlasos!

Per ŝanceliĝaj paŝoj li iris al la elirpordo. Li ĉirkaŭĵetis la rigardon, nebulitan de ploro, sur la malnovajn ornamaĵojn en la ĉambro. La brakseĝo de lia patrino staris kiel kutime. Li rememoris tiun tempon, kiam la okuloj de la patrino legadis al li la unuajn sciojn pri la Leĝo. Ŝajnis al li, kvazaŭ ŝia ombro signas al li kun amplena rideto. Neniam antaŭe li spertis tian grandan malplenon en la koro. Li troviĝis tute sola. Li ektimis sin mem, ĉar li neniam vidis sin en tia situacio.

Post dolora meditado li silente foriris. Li indiferekte ekrigardis la movadon sur la strato, kiel iu, kiu perdis ĉiun intereson pri la vivo.

Kiam li ankoraŭ ne faris multe da paŝoj al sia certa destino, li aŭdis, ke oni lin insiste vokas. Li haltis, atendente, kaj tiam konstatis, ke tiu estas maljuna servanto de la patro, kiu kuras post lin.

Post nelonge la servanto transdonis al li pezan monujon, amike dirante:

– Via patro sendis al vi ĉi tiun monon kiel memorajon.

Saŭlo eksentis en sia animo la ribelon de la “malnova homo”. Li ekpensis alvoki sian propran dignon, por fordanki la humiligan donacon. Tiel agante, li komprenigos al la patro, ke li estas filo, sed ne almuzulo. Li donos al la maljunulo instruon, li montros sian propran valoron, sed samtempe li konsideris, ke tiaj kruelaj provoj eble fariĝas kun la konsento de Jesuo, por ke lia ankoraŭ fiera koro lernu la veran humilecon. Li sentis, ke li venkis multe da baroj, ke li superstaris la situacion en Damasko kaj en Jerusalemo, ke li superfortis la krudaĵojn de la dezerto, ke li elportis la nefavorecon de la klimatoj kaj la dolorajn laciĝojn; nun la Majstro proponis al li lukti kun si mem, por ke la “malnova homo” formortu, ebligante la renaskiĝon de la energia sed milda kaj amoplena koro de la disĉiplo. Tiu estos eble la plej streĉa el ĉiuj bataloj. Li rapide komprenis la situacion kaj, penante sin mem superforti, kun rezignacia rideto ekprenis la monujon, ĝin humile kaŝis inter la faldojn de la tuniko, danke salutis la servanton kaj diris, penante elmontri ĝojon:

– Sinezio, transdiru al mia patro la ĝojon, kiun li faris al mi per sia elkora donaco, kaj diru al li, ke mi petas Dion lin helpi.

Konsiderante tian novan situacion, li vidis en la konduto de la patro ian eĥon de la malnovaj moroj de la judismo. Kiel patro, Isaak ne volis ŝajni sendanka kaj necedema, penante helpi lin, sed kiel fariseo li neniam toleros la ŝanĝon de ideoj de la filo.

Kun indiferenta humoro li prenis simplan manĝon en modesta gastejo. La movadon de la stratoj, jen kion li ne povis elporti. Li soifis meditado kaj silenton, bezonis aŭdi la konsciencon kaj la koron, antaŭ ol findecidi la novajn planojn de la vivo. Li penis foriĝi de la urbo. Kiel anonima ermito, li ekpensis iri al senkultura kamparo. Longe vaginte, li atingis la ĉirkaŭaĵon de Taŭruso. Tiam eksekvis unu post alia la malgajaj ombroj de la vesperiĝo. Lacekonsumita, li eksidis apud unu el la tieaj multaj kavernoj forlasitaj. Tre malpro-

ksime Tarso kuŝis inter arbaĵoj. La vesperaj ventetoj vibris en la medio, tamen ne rompante la serenecon de la aĵoj. Dronante en la kvieteco de la Naturo, Saŭlo mense ekiris returne ĝis la tago de sia radikala aliigo. Li rememoris sian forlasitecon en la gastejo de Judas, la indiferecon de Cadok pri lia amikeco, la unuan kunvenon en Damasko, kie li ricevis tiom da mokfajfoj, ironioj kaj sarkasmoj. Li iris Palmiran, sopirante la helpon de Gamaliel, por enprofundiĝi en la aferon de la Kristo, sed la nobla instruanto konsilis al li izoliĝi en la dezerto. Li rememoris la terurajn malfacilaĵojn ĉe la teksilo kaj la absolutan mankon de rimedoj en la soleca oazo. En tiuj longaj kaj silentaj tagoj li neniam povis forgesi sian formortintan fianĉinon kaj klopodis, por spirite superstari la disbatitajn revojn. Kiel ajn fervore li studadis la Evangelion, li en sia plejprofundo sentis memproĉon pro la ofero de Stefano, kiu, laŭ lia opinio, estis la tomboŝtono de lia rozokolora fianĉeco. Liaj noktoj svarmis per premegaj angoroj. Iafaĵe, en afliktantaj premsonĝoj, li sentis sin denove en Jerusalemon, subskribante sub maljustaj verdiktoj. La viktimoj de tiu granda persekutado akuzadis lin, terurite rigardante lin, kvazaŭ lia fizionomio estus tiu de iu monstro. La espero al la Kristo rekuraĝigis lian decideman spiriton. Post akraj provoj li forlasis la solulecon, por reveni al la societa vivo. Denove en Damasko, li estis akceptita de la sinagogo kun minacoj. La iamaj amikoj kun profunda ironio superĵetis lin per kruelaj epitetoj. Li devis fuĝi, kvazaŭ ia ordinara krimulo, transsaltante muron en la silento de la nokto. Poste li iris Jerusalemon, esperante, ke oni lin komprenos, sed Aleksandro, en kies klera spirito li esperis trovi pli bonan komprenon, akceptis lin kvazaŭ ian viziulon kaj mensoganton. Treege laca, li frapis je la pordo de la eklezio de la “Vojo”, sed li devis enloĝiĝi en gastejaĉon dank’al la pravaj suspektoj de la galileaj Apostoloj. Malsana kaj senforta, li estis kondukita al Simon Petro, kiu donis al li tre saĝajn kaj bonkorajn instruojn, sed kiu, kiel iam Gamaliel, konsilis al li antaŭan enmemiĝon, diskretecon, unuvorte lernadon. Li vane serĉadis ian rimedon interkonsentigi la cirkons-

tancojn, por kunhelpi por la afero de la Evangelio: ĉiuj pordoj ŝajnis fermitaj al lia celado. Fine li iris Tarson, sopirante la familian helpon, por rekomenci la vivon. La patra konduto faris nenion, krom pliakrigi liajn disreviĝojn. Forpelante lin, la patro ĵetegis lin en abismon. Nun li komencis kompreni, ke rekomenci la ekzistadon estas ne reveni al la laboroj de la iama nesto, sed komenci el la tuta animo la internan penadon, forviŝi la pasintecon ĝis la plej etaj restaĵoj, unuvorte esti alia homo.

Li komprenis la novan situacion, sed ne povis reteni la larmojn, kiuj abunde elfluadis.

Kiam li rekonsciigis, jam fariĝis plena noktiĝo. La ĉielo de la Oriento radilumis per steloj. Mildaj ventoj blovis de malproksime kaj malvarmetis lian brulantan frunton. Li faris al si oportune, kiel li povis, inter la krudaj ŝtonoj, ne kuraĝante preterlasi la silenton de la amika Naturo. Kvankam ankoraŭ implikita en siaj amaraj konsideradoj, li sentis sin pli trankvila. Li konfidis al la Majstro siajn akrajn zorgojn, petis Jesuon helpi lin per sia favorkoreco kaj penis teni sin en ripozo. Post la varma preĝo li ĉesis plori, kaj tiam ŝajnis al li, kvazaŭ ia nevidebla supera forto malplidolorigis la vundojn de la premata animo.

Post nelonge, en la dolĉa kvieteco de la doloranta cerbo, li eksentis, ke la dormo lin ekmastras. Mildega sensacio de ripozo havigis al li grandan korfaciligon. Ĉu li estis dormanta? Li havis la impreson, kvazaŭ li penetris en ian regionon el ĉarmegaj revoj. Li sentis sin facilmovi kaj feliĉa. Ŝajnis al li, kvazaŭ li estas forportita sur kampon, superverŝitan de printempa lumo, malproksime de ĉi tiu mondo. Brilantaj floroj, kvazaŭ el kolora nebulo, disvolviĝadis laŭlonge de mirindaj voj-oj, konstruitaj en tiu regiono, banata de nedifineblaj lumoj. Ĉio parolis al li pri ia malsama mondo. En liaj oreloj sonis dolĉaj harmonioj, kvazaŭ kavatinoj, malproksime ludataj sur diaj harpoj kaj liutoj. Li deziris identigi la pejzaĝon, difini ĝiajn formojn, riĉigi observojn, sed ia profunda sento de paco lin tutan ravis. Li certe eniris en ian mirandan regnon, ĉar la spiritaĵoj mirinda-

oj, kiuj montriĝis antaŭ liaj okuloj, superis ĉiun komprenon^(*).

Kiam li apenaŭ vekiĝis el tiu raviteco, jen lin ekposedis nova surprizo, nome la alproksimigo de iu, kiu delikate paŝadas. Post nelonge li ekvidis antaŭ si Stefanon kaj Abigailon, junajn kaj belajn, en vestoj tiel brilaj kaj blankaj, ke ili ŝajnis peploj el diafana neĝo.

Ne povante esprimi la sanktan emocion de sia animo, Saŭlo el Tarso genuiĝis kaj ekploris.

La du gefratoj, kiuj revenis, por lin kuraĝigi, alproksimiĝis kun amika rideto.

– Leviĝu, Saŭlo! – plej bonkore diris Stefano.

– Kio tio estas? Vi ploras? – dolĉe demandis Abigail. – Ĉu vi estas senkuraĝa jam nun, kiam via tasko apenaŭ komenciĝas?

La tarsi junulo, nun staranta, eksplodis per konvulsia ploro. Tiuj larmoj ne estis nur ia faciligo de koro, forlasita en la mondo, sed esprimis senfinan ĝojon, grandegan dankon al Jesuo, ĉiam malavara je protekto kaj bonfarado. Li ekdeziris alpaŝi, kisi la manojn al Stefano, peti de li pardonon pri la abomeninda pasinteco, sed ĝi estis la martiro de la “Vojo”, kiu, en la lumo de sia glora resurekto, alproksimiĝis al la eksrabeno kaj lin kore brakumis, kvazaŭ iun amatan fraton. Poste, kisante lian frunton, li milde murmuris:

– Saŭlo, ne haltadu en la pasinteco! Kiu en la mondo ne eraris? Nur Jesuo estis pura!

La ekslernanto de Gamaliel sentis sin en efektiva oceano da feliĉo. Li volis paroli pri sia grandega ĝojo,

(*) Poste, en sia Dua Epistolo al la Korintanoj (12:2–4) Saŭlo diris: “Mi konas viron en Kristo, antaŭ dek kvar jaroj (ĉu en la korpo, mi ne scias, ĉu ekster la korpo, mi ne scias; Dio scias) eklevitan ĝis en la trian ĉielon; kaj mi scias pri la tiela viro (ĉu en la korpo, aŭ ekster la korpo, mi ne scias; Dio scias), ke li estis eklevita en Paradizon, kaj aŭdis nedireblajn vortojn, kiujn ne estas permesate al homo paroli”. El tiu glora sperto la Apostolo al nacioj elteris novajn konkludojn pri siaj rimarkindaj ideoj rilate la spiritan korpon.
– *Noto de la Aŭtoro.*

danki por tiel altvaloraj donacoj, sed neretenebla emocio sigelis liajn lipojn kaj konfuzis lian koron. Apogite al Stefano, kiu silente al li ridis, li vidis Abigailon pli bela ol iam, rememorante al li la printempajn florojn ĉe la modesta domo apud la vojo al Jafo. Li ne povis eviti la pripensojn de la viro, forgesi la disfumiĝintajn verojn, kiujn li rememoris precipe en tiu glora minuto de sia vivo. Li ekpensis pri la hejmo, kiun li povus esti konstruinta; pri la amo, kun kiu la korinta junulino zorgus pri la karaj infanoj; pri la nesubstuebla amo, kiun ŝia sindoneco povus al li dediĉi. Sed, komprenante liajn plej internajn pensojn, lia spirita fianĉino alproksimiĝis, ekprenis lian dekstran manon, kaligitan de la krudaj laboroj en la dezerto, kaj emocie diris:

– Hejmo neniam al ni mankos... Ni ĝin havos en la koro de ĉiuj, kiuj venos al ni. Rilate infanojn, ni havas la grandegan familion, kiun Jesuo heredigis al ni laŭ sia favorkoreco... La infanoj de Kalvario estas ankaŭ niaj... Ili troviĝas ĉie, atendante la heredaĵon de la Savinto.

La tarsa junulo komprenis ĉi tiun amikan rimarkon kaj ĝin konservis en la plejprofundo de la koro.

– Ne fordonu vin al senkuraĝiĝo – grandanime kaj fervore daŭrigis Abigail. – Por niaj prauloj ekzistas la Eternulo Cebaot, kiu mastris la venkojn kaj posedis la oron kaj la arĝenton de la mondo, sed por ni ekzistas la Patro, kiu estas la sinjoro de nia koro. La Leĝo distingis nian fidon laŭ la riĉeco de la materiaj donoj ĉe la oferoj, sed la Evangelio nin konas laŭ nia senlima konfido kaj la aktiva fido en la servado al la Ĉiopova. Estas necese esti fidela al Dio, Saŭlo! Eĉ se la tuta mondo leviĝus kontraŭ vin, vi posedus la neelĉerpeblan trezoron de la fidela koro. La venka paco de la Kristo estas la paco de la laboranta animo, kiu obeas kaj fidas... Ne piedbatu denove kontraŭ la pikiloj. Forviŝu de vi la pensojn de la mondo. Kiam vi elpremos el vi la lastan guton de la vinagraĵo de la surteraj iluzioj, tiam Jesuo plenigos vian spiriton per nevelkemaj lumoj!

Spertante grandegan konsolon, Saŭlo eĉ konsterniĝis pro sia nekapableco eldiri ian ajn frazon. La admonoj de Abigail restos en li por ĉiam. Li neniam plu lasos la senkuraĝiĝon ekposedi lin. Grandega espero nun plenis lian internon. Li laboros por la Kristo ĉie kaj ĉiam. La Majstro oferis sin por ĉiuj homoj; dediĉi al li sian ekzistadon estas nobla devo. Dum li ŝpinadis ĉi tiujn pensojn, li rememoriĝis pri sia malfacilaĵo harmonii kun la ceteraj homoj: li renkontos luktojn. Tiam revenis en lian memoron tiu promeso de Jesuo, ke kie fratoj kunvenas en lia nomo, tie li estas meze de ili. Sed ĉio ŝajnis al li subite malfacila ĉe tiu rapida intelekta klopodo. La sinagogoj malamikas unu kontraŭ alia. La eklezio de Jerusalemo mem denove inklinis al la judigaj influoj. Tiam Abigail ankoraŭfoje respondis liajn internajn alvokojn, plej dolĉe dirante:

– Vi postulas kunulojn, akordantajn kun vi ĉe la evangeliaj edifoj, tamen vi devas memori, ke Jesuo mem tiajn ne havis. La Apostoloj povis konsenti kun la Majstro nur per la helpo de la Ĉielo, post la Resurekto kaj Pentekosto. Tiuj plej amataj dormadis, dum li, en agonio, preĝadis en la ĝardeno. Unuj malkonfesis lin, aliaj malaperis en la decida horo. Konsentu kun Jesuo kaj laboru. La vojo al Dio estas dividita en senfinan nombron da tavoloj. La spirito paŝos sola de unu sfero en alian. Ĉia altiĝo estas malfacila, sed nur tiel ni ekhavas la efektivan venkon. Rememoru la “mallarĝan pordon”, de la evangeliaj instruoj, kaj marŝu. Kiam oportune, Jesuo vokos al via laboro tiujn, kiuj povos konsenti kun vi en lia nomo. Dediĉu vin al la Majstro en ĉiuj momentoj de via vivo. Servadu al li energie kaj ame, kiel iu, kiu scias, ke spiritaj faroj postulas la kunlaboron de ĉiuj sentoj, kiuj nobligas la animon.

Saŭlo estis ravita. Li ne povus esprimi la karesajn sensaĵojn, kiuj agitiĝadis en lia koro, posedita de nevertigebla ĝojo. Antaŭ liaj spiritaj okuloj etendiĝis radiluma estonteco. Li ekdeziris moviĝi, danki ŝin por tiu superbela donaco, sed la emocio malebligis al li ĉian korean manifestiĝon. Kion de nun li faru, por venki? Kiel li kompletigu la sanktajn sciojn, kiujn li devas praktike

ekzempli, ne vundante aliajn? Komprenigante, ke ŝi aŭdas liajn eĉ plej sekretajn demandojn, Abigail alpaŝis kaj ĉiam plena diris:

– Saŭlo, por la certeco de la venko sur la malglata vojo, memoru, ke estas necese doni: Jesuo donis al la mondo ĉion, kion li posedis, kaj antaŭ ĉio donis al ni la intuician komprenon de niaj malfortaĵoj, por ke ni toleru la homajn mizeraĵojn...

La tarsi junulo rimarkis, ke intertempe Stefano adiaŭas lin, direktante al li fratan rigardon.

Siaflanke Abigail plej ame premis al li la manojn. La eksrabeno dezirus plidaŭrigi tiun delikatan vidon ĝis la fino de sia vivo, esti apud ŝi por ĉiam, sed la kara estaĵo jam montris la intencon foriri. Li do klopodis, por plej rapide fari liston de siaj spiritaj bezonoj, dezirante aŭdi ŝin pri la problemoj, kiuj lin okupis. Sopirante profiti ĝis la plej lastaj momentoj tiun gloran, paseman minuton, Saŭlo mense preterpasigis grandan nombron da demandoj. Kion li faru, por perfekte kompreni la planojn de la Kristo?

– Amu! – senhezite respondis Abigail.

Kiel ni agu, por riĉiĝi pri la dia virto? Jesuo konsilis ami eĉ la malamikojn, se li, Saŭlo, konsideris, kiel malfacila tio devas esti. Penige estas atesti sindonecon sen la efektiva kompreno de la aliaj homoj. Kiel kondukti, por ke la animo atingu tian altan povon de klopodado kun Jesuo Kristo?

– Laboru! – respondis al amata fianĉino, bonkore ridetante.

Abigail estis prava. Estas necese fari la internan perfektigon. Li arde deziris ĝin fari, kaj por tio li izoligis en la dezerto dum pli ol mil seninterrompaj tagoj. Tamen, reveninte en la rondon de la kolektiva penado, por klopodi kun iamaj kamaradoj, liaj noblaj esperoj turniĝis en dolorajn disreviĝojn. Kiajn aranĝojn fari kontraŭ la frakasanta senkuraĝiĝo?

– Esperu! – ŝi ankoraŭ diris komplezeme, dezirante rimarkigi, ke la animo devas esti ĉiam preta obei la dian programon, kia ajn la cirkonstanco kaj sen iaj personaj kapricoj.

Aŭdante ŝin, Saŭlo konsideris, ke la espero ĉiam estis la kunulo de liaj plej akraj tagoj. Li scios atendi la estontecon kun la benoj de la Plejalta. Li fidis Ties favorkorecon. Li ne preterlasos la oportunajn okazojn por la elaĉeta servado. Sed... la homoj? Ĉie bolis la konfuziteco de la spiritoj. Li konfesis, ke efektive la ĝenerala konsento pri la instruoj de la Dia Majstro estas unu el la plej malfacilaj faroj en la dissemado de la Evangelio; sed, krom tio, ŝajnis, ke la homojn ne interesas ankaŭ la vero kaj la lumo. La izraelidoj alkroĉiĝis al la Leĝo de Moseo, fortikigante la sistemon de la fariseaj hipokritaĵoj; la sekvantoj de la “Vojo” denove alproksimiĝis al la sinagogoj, foriĝis de la nacioj, severe submetis sin al la cirkumcido. Kie staras la libereco de la Kristo? Kie la grandaj esperoj, kiujn lia amo alportis al la tuta homaro, ne esceptinte la filojn de aliaj rasoj? Ili interkonsentis, ke estas nepre necese ami, labori, esperi, sed kiel agi en la sfero de tiel heterogenaj fortoj? Kiel harmoniigi la grandiozajn instruojn de la Evangelio kun la indiferenteco de la homoj?

Abigail pli ami premis liajn manojn, esprimante sian adiaŭon, kaj dolĉe respondis:

– Pardonu!

Tuj poste ŝia lumanta figuro ŝajnis dissolviĝi, kvazaŭ farita el eroj da aŭro.

Ravite de ĉi tiu mirinda parolo, Saŭlo vidis sin sola, ne sciante, kiel esprimi sian ensorĉitecon. En tiu regiono, kiu kroniĝis per ĉielaj lumoj, sentiĝis mistere belaj vibr-oj. En liajn orelojn ĉiam ankoraŭ venis malproksimaj eĥoj de superteraj harmonioj, kiuj ŝajnis mesaĝoj de amo el foraj sunoj... Li genuiĝis kaj preĝis! Li dankis la Sinjoron por la mirindeco de Liaj benoj. Post nelonge, kvazaŭ nevideblaj fortoj rekondukis lin en la medion de la Tero, li vidis sin sur la kruda kuŝejo inter la ŝtonoj. Ne povante klarigi al si tian eksterordinaran fenomenon, Saŭlo el Tarso en ia ekstazo ekrigardadis la ĉielon.

La senlima blua firmamento ne estis ia abismo, sur kies fono brilas steloj... En liaj okuloj la spacego ricevis novan signifon: ĝi devas esti plena de vivantaĵoj, kiujn al la ordinara homo ne estas donite kompreni.

Ekzistas korpoj ĉielaj same, kiel ekzistas surteraj. La homo ja ne estas forlasita de la plej altaj povoj de la Kreitaĵaro. La boneco de Dio superas ĉian homan inteligenton. Kiuj demetis de si la karnon, tiuj revenas de la spirita regiono, por konsoli tiujn, kiuj restas malproksime. Por Stefano li estis kruela turmentanto; por Abigail, sendanka fianĉo; tamen la Sinjoro permesis, ke ili ambaŭ revenu al la nigra medio de la mondo, revigligante lian koron. La ekzistado sur nia planedo ricevis novan sencon en liaj profundaj meditoj. Neniu estas forlasita. Eĉ la plej mizeraj homoj havas en la Ĉielo iun sindonan akompananton. Kiel ajn doloraj la homaj provoj, la vivo nun ricevis por li novan mienon de eternaj harmonio kaj beleco.

La Naturo estis trankvila. La lunlumo disradiis en la alto per neesprimeble ĉarmaj vibroj. De tempo al tempo la vento delikate susuradis, disportante misterajn mesaĝojn. Karesaj ventpuŝoj kvietigis la kapon de nia pensanto, kiu raviĝis rememorante siajn ĵusajn mirindajn viziojn en la nevidebla mondo.

Travivante ian ĝis tiam nekonatan pacon, li havis la impreson, ke li en tiu momento renaskiĝas por iu tute alia ekzistado. Ia stranga sereneco ekposedis lian spiriton. Ia malsama kompreno feliĉigis lin por la rekomenco de la irado tra la mondo. Li por ĉiam konservos la devizon de Abigail: amo, laboro, espero kaj pardono estos liaj sendisiĝaj kunuloj. Plene donante sin al ĉiuj estaĵoj, li atendas la oportunajn okazojn, kiujn Jesuo konsentos al li, detenante sin krei mem situaciojn, kaj, en ĉi tiu kadro, li povoscios toleri la aliulan sensciecon aŭ malfortecon, konsciante, ke ankaŭ li portas kondamnindan pasintecon, kiu, eĉ tia, meritis la kompaton de la Kristo.

Nur post longe, kiam la delikataj ventetoj de la mateniĝo anoncis la tagon, la ekdeĝisto sukcesis endormiĝi. Kiam li vekigis, estis malfrua mateno. Tre malproksime Tarso estis rekomencinta sian kutiman movadon.

Li leviĝis, kuraĝigite kiel neniam antaŭe. Tiu spirita konversacio kun Stefano kaj Abigail refreŝigis liajn fortojn. Pretervole li rememorigis pri la monujo, kiun

la patro sendis al li. Li ĝin elprenis, por kalkuli la monrimedojn, kiujn li povas disponi por novaj entreprenoj. La patra donaco estis abunda, sed li ne tuj povis decidi, kion li faru kun tiu mono.

Longe meditinte, li decidis aĉeti teksilon. Tio estos la rekomenco de la lukto. Por plifirmigi siajn novajn intencojn, li opiniis utile praktiki en Tarso la metion de teksisto, ĉar tie, en sia naskiĝurbo, li iam paradis kiel granda intelektulo kaj aplaŭdata atleto.

Post nelonge li estis konata de siaj samurbanoj kiel senfanma tapiŝisto.

La sciigo pri ĉi tiu fakto malagrable eĥis en lia iama hejmo, kaŭzante la transloĝiĝon de la maljuna Isaak, kiu, lin malkaŝe senherediginte, iris en unu el siaj bienoj ĉe la bordo de Eŭfrato, kie li atendis la morton apud filino, ne kapablante kompreni sian tre amatan unue-naskiton.

Tiel, dum tri jaroj, la soleca teksisto en la najbaraĵo de Taŭruso donis ekzemplon de humileco kaj laboro, fervore atendente, ĝis Jesuo vokos lin al la atesto.



IV

Unuaj apostolaj laboroj

Turniĝinte en simplan laboriston, Saŭlo el Tarso prezentis rimarkinde alian fizionomion. Lia mieno de asketo fariĝis pli neta, sed la okuloj, elmontrantaj la homon ekvilibrecan kaj decideman, travidigis ankaŭ profundan kaj nedifineblan pacon.

Komprenante, ke lia situacio ne permesas al li elpensi grandajn projektojn de laboro, li kontentiĝis farante tion eblan. Li sentis plezuron montrante al siaj iamaj kamaradoj en la venkaj horoj, ĉe la tarsaj festoj, la ŝanĝiĝon de sia konduto. Li kvazaŭ fieris, ke li vivas de la modesta enspezo el sia peniga laborado. Plurajn fojojn li trairis la plej multemovajn placojn, portante mem pezajn ligaĵojn da kapraj haroj. Liaj samurbanoj admiris lian humilan konduton, kiu nun estis lia plej reliefa trajto. La altsocietaj familioj rigardadis lin kompateme. Ĉiuj, kiuj konis lin en la ora stadio de lia juneco, ne ĉesis bedaŭri tian aliiĝon. La plej multaj traktis lin kvazaŭ ian trankvilan frenezulon. Tial neniam mankis mendoj al tiu teksisto el la ĉirkaŭaĵo de Taŭruso. La simpatio de liaj samurbanoj, kiuj neniam tute komprenis liajn novajn ideojn, havis la efikon stimuli lian penadon, pliiĝante liajn mizerajn monrimedojn. De sia flanko li vivis trankvile kaj kontente. La programo de Abigail estis konstanta mesaĝo al lia koro. Li ĉiutage ellitiĝis kun la penso ami ĉion kaj ĉiujn; por ĉiam iradi la rektajn vojojn, li diligente laboradis. Se atakis lin ardaĵaj deziroj, ekscitiĝoj, por ke li malĝustatempe pli-intensigu sian laboradon, li pacienciĝis kaj atendis; se iu lin kompatis, se aliaj alnomis lin frenezulo, defalinto

aŭ fantaziulo, li penis forgesi la aliulan nekomprenemon per la sincera pardono, pensante pri la multaj fojoj, kiam ankaŭ li ofendis aliajn pro senscienco. Li estis nun sen amikoj, sen karuloj, alportante la disreviĝojn de la solulecoj; tamen, se li ne havis sindonajn kunulojn, li do ne havis motivaĵon, por timi suferojn el falsaj amikrilatoj. Li penis trovi en la teksilo la altvaloran kunlaboranton, kiu ne rifuzis al li la oportunajn okazojn sin plibonigi. Per ĝi li teksadis diversdesegnajn tapiŝojn, kiel ankaŭ barakojn kaj tendojn, ekzerciĝante en la pacienco nepre necesa al aliaj laboroj, kiuj lin ankoraŭ atendis sur la vojoj de la vivo. La nokto estis beno por lia spirito. Lia ekzistado fluadis sen aliaj pli gravaj epizodoj, kaj jen unu tagon, surprizis lin la neatendita vizito de Barnabas.

La ekslevido el Kipro troviĝis en Antioĥia, baraktante en la respondeco por seriozaj demandoj. La tie fondita eklezio postulas la kunlaboradon de inteligentaj servantoj. Oni devas solvi sennombrajn spiritajn malfacilaĵojn, fari intensajn servojn. Tiun institucion iniciatis disĉiploj el Jerusalemo laŭ la bonkora inspiro de Simon Petro. La eksfiŝisto el Kapernaŭm konsideris, ke oni devas profiti la fazon de kvieteco dum la persekutoj, por ke estu etenditaj la ligiloj de la Kristo. Antioĥia estis el la plej grandaj laboristaj centroj. Ne mankis kontribuantoj al la pagado de la servoj, kvankam la grandioza entrepreno renkontis eĥon nur en la plej modestaj laborlokoj, sed malmultaj estis la efektivaj intelektaj laborantoj. Ankaŭ pri ĉi tiu afero montriĝis la komprenemo de Petro, por ke ne manku al la teksisto el Tarso la necesa oportuna okazo. Rimarkinte ĉi tiujn malfacilaĵojn, Petro indikis Barnabason, por direkti tiun ĉelon de la “Vojo”, kaj konsilis al li vidiĝi kun la damaska konvertito, por ke ties talento atingu novan kamp-on de spirita ekzerciĝado.

Saŭlo treege ĝoje akceptis tiun amikon.

Konstatinte, ke liaj foraj amikoj memoras lin, li ek-sentis, kvazaŭ li ricevis freŝajn fortojn.

La samdoktrinano elvolvis la altan planon de la eklezio, kiu petis lian fratan kunhelpon, la disdividadon de

la servoj, la konstantan kunlaboradon, kiun ili povos disponi por la afero de Jesuo Kristo. Barnabas laŭdegis la sindonecon de la maleminentaj homoj, kiuj kunlaboradis kun li. Tamen la institucio bezonis sindonemajn fratojn, kiuj profunde konus la Leĝon de Moseo kaj la Evangelio de la Majstro, por ke ne ricevu malutilon la partoi rilata al la intelekta prilumado.

La eksrabeno ricevis edifon ĉe ĉi tiu parolo de la vizitanto kaj ne hezitis kontentigi tiun alvokon. Li nur metis unu kondiĉon, nome, ke li praktikadu plu sian metion, por ne esti ŝarĝo por siaj samdoktrinanoj en Antioĥia. Estis senutila ĉia kontraŭdiro de Barnabas en ĉi tiu rilato.

Diligenta kaj servema, Saŭlo el Tarso baldaŭ enloĝiĝis en Antioĥia, kie li komencis aktive kunlabori kun la amikoj de la Evangelio. Dum tutaj horoj en la tago li riparitis tapiŝojn aŭ okupis sin per teksado. Tiel li enspezis tiom, kiom necese por vivi, fariĝante iu modelo en la nova eklezio. Kun la granda kapitalo da spertoj el la luktoj kaj suferoj en la mondo, li neniam okupis la plej ĉefajn lokojn. En “La Agoj de la Apostoloj” lia nomo estas ĉiam citata la lasta, kiam ili parolas pri la kunlaborantoj de Barnabas. Saŭlo estis lerninta atendi. En la kolektivo li preferis de plej modestajn laborojn. Li sentis sin bone zorgante pri la multenombraj malsanuloj. Li memoris pri Simon Petro kaj penis plenumi siajn novajn devojn kun senpretenda bonkoreco, kvankam li stampis ĉion per la trajto de siaj malmildetaj sincereco kaj malkaŝemo.

La eklezio ne estis riĉa, tamen la bonvolo de ĝiaj anoj kvazaŭ provizis ĝin per abundaj gracoj.

Antioĥia, kosmopolita urbo, fariĝis ia fokuso de granda malĉastado. En ĝia medio, ornamita per multekostaj marmoraĵoj, kiuj elmontris la riĉegecon de ĝiaj loĝantoj, svarmis ĉiaj ekscesoj. Tiuj pli riĉaj senbride sin fordonadis al la voluptaj plezuroj. La boskoj estis kunvenejoj de amasantaj paroj, krime indiferentaj al ĉio cetera. La bonstato de la urbo ebligis grandajn ekstravagancojn. La urbo estis plena de komercistoj, kiuj sen-

halte malamikis unu kontraŭ alia, plena de malnoblaj ambicioj, de pasiaj dramoj. Sed ĉiutage vespere kunvenadis en la modesta domo, kie funkciis la ĉelo de la “Vojo”, grandaj grupoj da masonistoj, da malriĉegaj soldatoj, da mizeraj terlaboristoj, kiuj ĉiuj sopire atendadis la mesaĝon pri ia pli bona mondo. Ankaŭ, grandnombre, venis humilklasaj virinoj. La plej multaj el la vizitantoj interesiĝis pri konsiloj kaj konsoloj, rebonigiloj de iliaj korpaj kaj spiritaj kadukaĵoj.

La plej elektitaj predikantoj estis ordinare Barnabas kaj Manaen, kiuj instruis pri la Evangelio mikskonsistajn aŭdantarojn. Saŭlo el Tarso limiĝis je kunlaborado. Li mem rimarkis, ke Jesuo certe rekomendis al li tute rekomenci siajn provojn. Foje li faris ĉion eblan, por prediki ĝeneralajn temojn, sed li nenion atingis. La parolo, iam tiel facila, kvazaŭ retenigis en la gorĝo. Li komprenis, ke estas juste suferi la turmentojn de la rekomenco, pro la oportunaj okazoj, kiujn li ne sciis konsideri ŝatindaj. Malgraŭ la baroj, kiuj staris kontraŭ lia laborado, li tamen neniam lasis sin regi de senkuraĝiĝo. Kiam li okupis la tribunon, li renkontis grandegan malfacilaĵon ĉe la esprimado de la plej simplaj ideoj. Ifoje li eĉ ruĝiĝis de honto antaŭ la publiko, kiu lin aŭskultadis plej interese dank'al lia famo de predikisto de Moseo, en la Templo de Jerusalem. Krom tio la belega okazaĵo proksime al Damasko ĉirkaŭis lin per nobla kaj justa scivolo. Barnabas mem kelkafoje miris lian malklaran dialektikon ĉe la interpretado de la Evangelioj kaj pensis pri la tradicio de ties pasinteco kiel rabeno, kion li persone ne konis, kaj pri la timo, kiu ekposedis Saŭlon, ĝuste en la momento, por konkeri la publikon. Tial li estis diskrete forigita de predikado kaj difinita por aliaj taskoj. Saŭlo komprenis kaj ne senkuraĝiĝis. Se li ne povis tuj repreni la predikadon, tiam li denove pretiĝos por tio. Kun ĉi tiu intenco li retenadis malaltklasajn fratojn en sia laborejo kaj dum la manoj firme teksadis, li konversaciis pri la misio de la Kristo. Vespere li entreprenis en la eklezio paroladetojn, en kiuj partoprenis ĉiuj ĉeestantoj. Tiel longe, ĝis

oni organizos la superan direktadon por la laboroj de la kunvenoj, li sidis kune kun la laboristoj kaj soldatoj, kiuj grandnombre ĉeestis. Li interesigis la atenton de lavistinoj, malsanaj junulinoj, obskuraj patrinoj. Li kelkfoje voĉlegadis pecojn el la Leĝo kaj el la Evangelio, faradis komparojn, instigadis novajn opiniojn. Meze de tiu konstanta laborado la instruo de la Majstro ŝajnis ĉiam tuŝita de kreskanta lumo. Baldaŭ la ekslernanto de Gamaliel fariĝis amiko, amata de ĉiuj. Saŭlo sentis sin treege feliĉa. Li ĝojegis ĉiam, kiam li vidis sian malriĉan laborejon plena de fratoj, kiuj el simpatio iris al li. La mendoj ne ĉesis; li havis ĉiam sufiĉe da laboro, por esti ŝarĝo por neniu. Tie li koniĝis kun Trofimo, kiu poste estis lia fidela kamarado ĉe multe da malfacilaj okazoj; tie li la unuan fojon brakumis Titon, kiam ĉi tiu sindona kunlaboranto apenaŭ eliris el la infaneco.

Por la eksrabeto la ekzistado ne povus esti pli trankvila nek pli bela. Lian tagon plenigis la harmoniaj notoj de digna kaj konstrua laboro; vespere li kunsidis en la eklezio kun fratoj kaj plezure sin donis al la studado de la Evangelio.

La institucio en Antioĥia tiam estis pli alloga, ol la eklezio mem de Jerusalemo. Tie oni vivis en medio kun pura simpleco, ne farante al si zorgon el la rigorismaj ordonoj de la judismo. Ekzistis riĉeco, ĉar laboro ne mankis. Ĉiuj amis la tagajn devojn, atendante la vesperan ripozon en la kunsidoj en la eklezio, kvazaŭ benon de Dio. La izraelidoj, for la la fokuso de la fariseaj postuloj, kunlaboradis kun la nacioj, kaj ĉiuj sentis sin kunigitaj per potencaj frataj ligiloj. Pri la cirkumcido parolis tre malmultaj, kaj ĝuste tial ili estis retenataj per la admono al frateco kaj unuiĝo. La kunvenoj estis regataj de fortaj influoj de spirita amo. La solidareco stariĝis sur aliaj fundamentoj. La doloroj kaj la ĝojoj de unu apartenis al ĉiuj. La komuneco de pensoj pri unu sola celo okazigis ĉarmajn manifestiĝojn de spiriteco. En difinitaj vesperoj fariĝis la fenomenoj, tiel nomataj “senperaj voĉoj”. La institucio en Antioĥia estis unu el la maloftaj apostolaj grupoj, kie tiaj manifest-

iĝoj atingis altegan gradon. La tie reganta frateco pravigis tiun favoron de la Ĉielo. En la ripozotagoj la malgranda societo organizadis evangeliajn studojn en la kamparo. La interpretado de la instruoj de Jesuo fariĝis en iu agrabla soleca loko de la Naturo, preskaŭ ĉiam sur la bordo de Oronto.

Saŭlo en ĉio ĉi trovis ian malsaman mondon. Sian restadon en Antioĥia li rigardis kiel helpon de Dio. La reciproka konfido, la sindonaj amikoj, la bona komprenemo estis sankta nutraĵo de la animo. Li penis uzi la okazon, por riĉigi sian spiritan provizon.

La urbo estis plena de malpli noblaj moralaj aspektoj, sed la modesta grupo de la senfamaj disĉiploj ĉiam pli kreskadis rilate efektivajn spiritajn valorojn.

Tiu eklezio fariĝis respektinda dank'al siaj karitaj faroj kaj tiuj fenomenoj, kies centra organizaĵo ĝi estis.

Altklasaj vojaĝantoj ĝin vizitadis plenaj de interesiĝo. Tiuj pli malavaraj nepre volis subteni ĝiajn ŝarĝojn pri socia bonfarado. Tiam foje aperis tre juna kuracisto, nomata Luko. Pasloĝante en la urbo, li ekrilatis kun la eklezio, instigite de la sincera deziro lerni ion novan. Lia atento fisiĝis speciale sur tiu viro kun iom kruda aspekto, kiu agitadis la opiniojn, antaŭ ol Barnabas malfermos la laborojn. Tiu konduto de Saŭlo, elmontranta la noblan celadon al samtempaj instruado kaj lernado, impresis lin en tia grado, ke li prezentis sin al la eksrabeno, dezirante tiun pli ofte aŭdi.

– Perfekte – ĝoje diris la Apostolo kontenta –, mia laborejo estas al via dispono.

Kaj tiel longe, dum Luko restis en la urbo, ili ambaŭ ĉiutage pasigis kelkan tempon en profitaj konversacioj pri la instruado de Jesuo. Iom post iom reprenante sian kapablon de argumentado, Saŭlo el Tarso baldaŭ inokulis al la spirito de Luko la plej purajn konvinkojn. Ekde la unua intervidiĝo la gasto de Antioĥia forestis de neniu el tiuj modestaj kaj konstruaj kunvenoj. En la antaŭtago de sia foriro li faris rimarkon, kiu por ĉiam ŝanĝis la alnomon de la disĉiploj de la Evangelio.

Kiam Barnabas finis la komentariojn en tiu vespero, nia kuracisto ekprenis la parolon por adiaŭi siajn frat-ojn. Li parolis emociite kaj, finante, li saĝe konsideris:

– Fratoj, forirante de vi, mi portas la intencon labori por la Majstro, uzante por ĉi tio la tuton de miaj mizeraj fortoj. Mi neniel dubas la amplekson de ĉi tiu spirita movado. Laŭ mia opinio, ĝi aliigos la tutan mondon. Dume mi atentigas vin pri la neceso, ke ni donu al ĝiaj manifestiĝoj ian pli difinitan unuformecon. Mi volas paroli pri la titoloj, kiuj signas nian kolektivon. Mi ne vidas en la vorto “vojo” ian perfektan nomon, kiu esprimus nian klopodadon. La disĉiploj de la Kristo estas nomataj “irantoj”, “pilgrimantoj”, “vojantoj”, sed ekzistas ĉiaspecaj vojantoj kaj vojoj. Ankaŭ la malbono havas siajn vojojn. Ĉu ne estus pli ĝuste, se ni nin reciproke alnomus “kristanoj”? Ĉi tiu titolo rememorigus al ni la ĉeeston de la Majstro, vigligus nin en lia nomo kaj perfekte karakterizus niajn laborojn en konsento kun liaj instruoj. (*)

Ĉi tiu propono de Luko estis aprobita kun ĝenerala ĝojo. Barnabas mem lin kortuŝite brakumis, dankante lin por la saĝa propono, kiu ja kontentigis iajn aspirojn de la tuta societo. Saŭlo plifirmigis siajn bonegajn impresojn pri tiu supera alvokiĝo, kiu komencis elmontriĝi.

La morgaŭan tagon la novekonvertito kun larmoj de danko adiaŭis la eksrabenon. Li estis forironta Grekujon, sed nepre volis rememori Saŭlon en ĉiuj detaloj de sia nova tasko. De ĉe la pordo de sia kruda laborejo la eksleĝisto rigardadis la figuron de Luko, ĝis li malaperis malproksime, kaj kun malsekaj okuloj revenis al la teksilo. Agrable kortuŝite, li konfesis al si, ke dank'al la manipulado de la Evangelio li lernis esti fidela kaj sindona amiko. Li komparis la nunajn sentojn kun la antaŭaj ideoj kaj konstatis profundajn diferencojn. Iam liaj rilatoj estis ligitaj kun sociaj konvenaĵoj, la amikoj venadis kaj foriradis, ne postlasante fundajn signojn en lia vibrema animo; nun lia koro renoviĝis en Jesuo

(*) Кр. Агој, 11:26. – *La Trad.*

Kristo, fariĝis pli sentema, kunvivante kun la diaj aferoj, la sinceraj korligiĝoj en ĝi por ĉiam enĉiziĝis.

La propono de Luko rapide etendiĝis al ĉiuj evangeliaj grupoj, enkalkulante Jerusalemon, kiu ĝin ricevis kun aparta simpatio. Post nelonge la vorto “Kristanismo” ĉie anstataŭis la vorton “Vojo”.

La eklezio de Antioĥia ĉiam ankoraŭ montriĝis la plej bele evoluinta. El ĉiuj grandaj urboj alsvarmis sinceraj kunlaborantoj. La kunvenoj estis ĉiam plenaj de revelacioj. Grandnombraj fratoj profetadis, inspirataj de la Sankta Spirito ^(*). Tie Agabo, inspirite de la intelektoj de la supera regiono, ricevis la mesaĝon pri la pezaj elprovoj, kiujn Jerusalemon estis travivonta.^(**) La direktantoj de la institucio estis treege impresitaj. Ĉe insistado de Saŭlo, Barnabas sendis amikon al Simon Petro, konigante la novaĵon kaj admonante lin vigli. La sendito revenis kun la impresado de surpriziĝo de la ekfisiisto, kiu dankis Barnabason por la amikaj petoj. Efektive, post kelke da monatoj unu sendito de la eklezio de Jerusalemon rapidece venis al Antioĥia kun alarmaj kaj doloraj sciigoj. En longa letero Petro raportis al Barnabas la lastajn faktojn, kiuj lin afliktis. Li skribis en tiu sama tago, kiam Jakobo, filo de Zebedeo, estis ekzekutita meze en parada publika spektaklo. Herodo Agripo ne toleris liajn predikojn plenajn de sincereco kaj justaj petoj. La frato de Johano venis el Galileo kun la primitiva malkaŝemo, kun kiu estis anoncata la nova Regno. Ne alkonformiĝinte al la farisea konvencio, li pelis tro malproksimen la sencon de siaj profundaj admonoj. Fariĝis absoluta ripeto de la okazaĵoj, kiuj signis la morton de Stefano. La judoj ekfuriozis kontraŭ la konceptoj pri religia libereco. Lia konduto, sincera kaj senartifika, estis rigardita kiel ribelo.

(*) Ĉiu devas ja scii, ke “Sankta Spirito” estas la nomo de la legio de la Spiritoj, sanktigataj en la lumo kaj amo, kiuj kunlaboras kun la Kristo ekde la unuaj tempoj de la homaro. – *Noto de la Aŭtoto.*

(**) Vd. en Agoj, 11:28, 21:10 k. a. – *La Trad.*

Teruraj persekutoj senĉese eksplodis. La letero de Petro informis ankaŭ pri la premantaj malfacilaĵoj de la eklezio. La urbo suferis malsaton kaj epidemiojn. De unu flanko la kruela persekutado streĉis sian sieĝon, de la dua flanko senfinaj vicoj da malsataj kaj malsanaj homoj frapadis je lia pordo. La ekŝfĥsisto petis de Antioĥia la eblan helpon.

Ĉi tiujn sciigojn Barnabas prezentis kun premata animo. La diligenta kolektivo volonte kunsentis al siaj fratroj el Jerusalemo.

Kiam estis kolektitaj la helpkotizoj, la ekslevido el Kipro sin proponis por esti la postanto de la respondo de la eklezio, sed Barnabas ne povos iri sola. Leviĝis malfacilaĵoj ĉe la elekto de la necesa kunulo. Saŭlo el Tarso senhezite proponis sin por esti ties kompaniulo. Li laboras je sia propra konto – li klarigis al siaj amikoj – kaj tial li povos akompani Barnabason, ne forgesante la devojn, kiuj restos farotaj, en atendo de lia reveno.

La disĉiplo de Simon Petro ekĝojis kaj plezure akceptis tiun proponon.

Post du tagoj ili ambaŭ kuraĝe ekiris al Jerusalemo. La irado estis tre malfacila, sed ili trairis la vojojn en la kiel eble plej mallonga tempo.

Grandegaj surprizoj atendis la senditojn de Antioĥia, kiuj jam ne trovis Simonon Petron en Jerusalemo: la aŭtoritatuloj estis arestintaj la ekŝfĥsiston el Kapernaum tuj post la bedaŭrinda ekzekuto de la filo de Zebedeo. Amaraj sortobatoj trafis la eklezion kaj ĝiajn disĉiplojn. Saŭlo kaj Barnabas estis akceptitaj speciale de Proĥoro, kiu informis ilin pri ĉiuj okazintaĵoj. Ĉar li persone petis la kadavron de Jakobo, por ĝin entombigi, Simon Petro, sen kompato, sen ia respekto, estis arestita de la krimaj partianoj de Herodo, sed post kelkaj tagoj iu anĝelo vizitis la karceron de la Apostolo kaj lin liberigis (*).

(*) “Kaj vidinte, ke tio plaĉas al la Judoj, li plue aldonis la areston de Petro. Kaj tiam estis la tagoj de macoj. Kaj kaptinte lin, li metis lin en malliberejon, transdonante

Proĥoro raportis ĉi tiun fariĝon kun okuloj brilantaj de fido. Li diris pri la ĝojo de la fratoj, kiam Petro vespere rakontis sian liberigon. La pli prudentaj kunuloj tiam admonis lin eliri el Jerusalemo kaj atendi en la komenciĝanta eklezio de Jafo la bonordecon de la situacio. Proĥoro sciigis, kiel malvolonte la Apostolo konsentis tiun saĝan proponon. Johano kaj Filipo jam forestis. La aŭtoritatoj toleris la eklezion nur pro konsidereco rilate la personon de Jakobo, filo de Alfeo, kiu pro sia konduto de profunda asketeco impresis la popolan menson, estigante ĉirkaŭ si atmosferon de netuŝebla respekto. En la sama vespero de sia liberigo Petro, laŭ sia insistado, estis kondukita de siaj amikoj al la eklezio. Li deziris restadi, ne pensante pri la sekvoj, sed kiam li vidis la domon plena de malsanuloj, malsatantoj, ĉifonvestitaj almozuloj, li devis forcedi al Jakobo la direktadon de la societo kaj foriri Jafon, por ke la situacio de tiuj kompatinduloj ne fariĝu pli danĝera pro li.

Saŭlo estis forte impresita de ĉio tio. Kune kun Barnabas li decidis tuj aŭdi Jakobon, la filon de Alfeo. La Apostolo ilin volonte akceptis, sed oni povis tuj rimarki liajn timojn kaj zorgojn. Li ripetis la informojn de Proĥoro mallaŭte, kvazaŭ li timis la ĉeeston de denuncantoj; li parolis pri la neceso cedi al la aŭtoritatoj, pri tiu precedenco, la morto de la filo de Zebedeo, pri la esencaj ŝanĝoj, kiujn li faris en la eklezio. Ĉe la foresto de Petro li starigis novajn disciplinojn. Neniu povas paroli pri la Evangelio, samtempe ne parolante pri la Leĝo de Moseo. Nur la cirkumciditoj povas aŭdi

lin al kvar kvaroj da soldatoj, por gardi lin, intencante elkonduki lin post la Pasko al la popolo. Tial Petro estis gardata en la malliberejo; sed preĝo por li estis fervore farata de la eklezio al Dio. Kaj kiam Herodo intencis elkonduki lin, en tiu sama nokto Petro dormis inter du soldatoj, ligitaj per du katenoj; kaj gardistoj antaŭ la pordoj gardis la malliberejon. Kaj jen apudstaris anĝelo de la Eternulo, kaj lumo ekbrilis en la ĉambro; kaj li frapis la flankon de Petro, kaj vekis lin, dirante: Leviĝu rapide. Kaj liaj katenoj defalis de liaj manoj”. (Agoj, 12:3 ĝis 7.) – *La Trad.*

la predikojn. La eklezio estis egaligita al la sinagogoj. Saŭlo kaj la kunulo aŭdis lin forte surprizitaj kaj silente transdonis al li la monhelpon de Antioĥia.

La okaza foresto de Simon aliigis la strukturon de la evangelia entrepreno. Al ambaŭ ĵusvenintoj ĉio ŝajnis malsama kaj malpli bona. Precipe Barnabas aparte rimarkis ion, nome, ke la filo de Alfeo, altigita ĝis la provizora estreco, ilin ne invitis gastis en la eklezio. La disĉiplo de Petro tial iris al la domo de sia fratino Maria Marko, la patrino de la estonta evangeliisto, kiu ilin tre ĝoje akceptis. Al Saŭlo estis bone en tiu medio de pura kaj simpla frateco. Siaflanke Barnabas rekonis, ke la domo de lia fratino fariĝis la loko, preferata de la frat-oj, plej sin donantaj al la Evangelio. Tie ili kunvenis vespere pordofermite, kvazaŭ la vera eklezio de Jerusale-lem transigis sian sidejon en malgrandan familian rond-on. Observante la intimajn kunvenojn en la hejma san-ktejo, la eksrabeno rememoris la unuan kolektiĝon en Damasko. Ĉio tie estis afablaĵoj, karesoj, akcepto en la koron. La patrino de Johano Marko estis unu el la plej bravaj kaj grandanimaj disĉiplinoj. Rimarkinte la mal-facilaĵojn de la fratoj el Jerusale-lem, ŝi ne hezitis meti siajn havaĵojn al la dispono de ĉiuj mizeruloj kaj mal-fermi siajn pordojn, por ke la evangeliaj kunvenoj, en sia plej pura aspekto, ne ricevu rompon de la kontinueco.

La parolo de Saŭlo ŝin vive impresis. Ravis ŝin precipe la priskriboj de la frata klimato de la eklezio de Antioĥia, kies altajn kvalitojn Barnabas ne ĉesis in-siste laŭdi.

Maria sciigis sian fraton pri sia granda revo; ŝi volis konsekri sian filon, ankoraŭ tre junan, al Jesuo. De longe ŝi preparadis la infanon por la apostoleco, tamen Jerusale-lem dronis en senhaltaj religiaj luktoj. La perse-kutoj eksplodadis ĉiam kaj denove. La kristana orga-nizaĵo de la urbo spertis projudajn alternadojn; nur la pacienco de Petro sukcesis tenadi la kontinuecon de la dia idealo. Ĉu ne estus pli bone, se Johano Marko transirus en Antioĥian, apud sian onklon? Barnabas ne kontraŭstaris ĉi tiun planon de la entuziasmoplena

fratino. Siaflanke la junulo sekvis la konversaciojn, montriĝante kontenta. Demandite pri sia opinio, Saŭlo rimarkis, ke la gefratoj prenas decidojn, ne konsultante la koncernatan personon. La junulo sekvis tiujn projektojn ĉiam afabla kaj ridetante. Tiam la eksleĝisto, profunda konanto de la homa animo, ekprenis la parolon, penante lin pli rekte interesi.

– Johano – li bonkore diris –, ĉu vi ja sentas en vi efektivan alvokiĝon al la servado al Jesuo?

– Jes, sendube! – iom konfuzite respondis la adoleskulo.

– Sed kiel vi difinas vian intencon? – denove demandis la eksrabeno.

– Mi pensas, ke la servado al Jesuo estas gloro – li respondis iom ĝenate sub la esplorado de tiu akra kaj sondanta rigardo.

Saŭlo konsideris momenton kaj diris:

– Via intenco estas laŭdinda, sed vi devas ne forgesi, ke ĉia eĉ plej malgranda monda gloro venos nur post la faro. Se tiel estas en la mondo, kio estas kun laboro por la regno de la Kristo? Des pli, ke sur la Tero ĉia gloro forpasas, sed tiu de Jesuo estas eterna!

La junulo notis al si ĉi tiun rimarkon kaj, kvankam konfuzita de la profundeco de ties paroloj, diris:

– Mi sentas min preparita por la laboroj por la Evangelio kaj, krom tio, al patrino tre plaĉas, ke mi lernu la plej bonajn instruojn en ĉi tiu rilato, por ke mi fariĝu predikanto de la veraĵoj de Dio.

Maria Marko ekrigardis sian filon plena de patrino fiero. Saŭlo komprenis la situacion, eldiris ian ŝercon kaj fine diris:

– Vere, la patrinoj ĉiam deziras al ni ĉiajn glorojn de ĉi tiu kaj de la transa mondo. Laŭ ilia koro, neniam ekzistus maliculoj. Sed, kio nin koncernas, ni devas memori la evangeliajn tradiciojn. Ankoraŭ hieraŭ mi rememoris la laŭdindan maltrankvilecon de la edzino de Zebedeo, sopiranta la glorigon de siaj filoj! Jesuo ricevis sian patrinan deziron, sed demandis ŝin, ĉu la kandidatoj al lia Regno kiel necese prepariĝis por trinki el lia ka-

liko... Kaj ankoraŭ nun ni vidis, ke la kaliko, destinita por Jakobo, enhavis vinagron tiel amaran, kiel tiu proponita al la Mesio sur la kruco.

Ĉiuj silentis, sed Saŭlo daŭrigis gaje, ŝanĝante la impreson de la aŭdantoj:

– Ĉi tio ne signifas, ke ni senkuraĝiĝu antaŭ la malfacilaĵoj kontraŭ nia strebado al la veraj gloroj de la Regno de Jesuo. La baroj refreŝigas la fortojn. La dia celo devas esti nia plej alta celo. Se vi tiel pensas, Johano, mi ne dubas viajn estontajn venkojn.

Patrino kaj filo ridetis trankvilaj.

Sur tiu sama loko ili kombinis inter si la forveturon de la junulo en kompanio de Barnabas. Lia onklo ankoraŭ parolis pri la nepre necesa disciplino, pri la sinoferemo, kiun postulas la nobla misio. Kompreneble, Antioĥia estis ja profunde paca medio, sed ankaŭ rondo kun viglaj kaj konstantaj laboroj. Johano devos formeti de si ĉian ideon pri malardiĝo, por sin fordoni, per korpo kaj animo, al la servado al la Majstro, absolute komprenante sian plej justajn devojn.

La junulo ne hezitis preni sur sin ĉi tiun ŝuldiĝon sub la karesa rigardo de sia patrino, kiu penis subteni liajn decidojn per la sincera kuraĝo de sia koro dediĉita al Jesuo.

Post nemultaj tagoj la tri amikoj direktis sin al la ĉarma urbo ĉe Oronto.

Dum Johano Marko ravite rigardadis la pejzaĝojn, Saŭlo kaj Barnabas longe konversaciadis pri ĝeneralaj intereso de la Evangelio. La eksrabeno revenis treege impresita de la situacio de la eklezio en Jerusalemo. Li sincere deziris iri Jafon, por paroli al Simon Petro, sed liaj fratoj deadmonis lin de tio. La aŭtoritatuloj tenadis sin en vigleco. Pluraj membroj de la Sinedrio kaj de la Templo eĉ postulis la morton de ĉi tiu Apostolo. Ĉia pli grava movado sur la vojo al Jafon povus elĉenigi la tiranecon de la herodaj agentoj.

– Sincere parolante – diris Saŭlo al Barnabas, montriĝante maltrankvila –, mi revenas kun frakasita animo al niaj laboroj en Antioĥia. Jerusalemo faras la

impreson de profunda disruiniĝo kaj granda indiferenteco pri la instruoj de la Kristo. La altaj kvalitoj de Simon Petro, en la estreco de la movado, trankviligas min, sed ni devas firme stari apud li. Pli ol iam mi estas konvinkita pri tiu altega realaĵo, ke Jesuo venis al siaj propraĵoj, sed neniu lin komprenis.

– Jes – konsideris la ekslevido el Kipro, dezirante forpeli la zorgojn de sia kamarado –, mi fidas antaŭ ĉio la Kriston, due mi multon esperas de Petro...

– Tamen – senhezite diris Saŭlo –, ni devas konsideri, ke en ĉio estas necesa perfekta ekvilibro. Ni povas nenion fari sen la Majstro, sed ni ne povas forgesi, ke Jesuo starigis en la mondo eternan verkon, kaj por ĝin komenci, li elektis dek du kunlaborantojn. Estas vero, ke ĉi tiuj ne ĉiam kontentigis la atendon de la Sinjoro, tamen ili estis ja la elektitoj. Tiel ni ankaŭ devas ekzameni la situacion de Petro. Li nekontesteble estas la vera estro de la apostola kolegio dank'al sia supera spirito, agordanta kun la penso de la Kristo en ĉiaj cirkonstancoj, sed li neniel povas agadi sola. Kiel ni scias, el la dek du amikoj de Jesuo kvar restis en Jerusalemo, kie ili konstante ekloĝis. Johano estis devigita foriri, Filipo devis kun sia familio forlasi la urbon, Jakobo iom post iom revenas al la fariseaj kolektivoj. Kio estos kun Petro, se al li mankos la necesa kunhelpado?

Barnabas ŝajnis serioze meditati.

– Mi havas ideon, kiu laŭŝajne venis el pli alte – diris la eksleĝisto sincere kortuŝita.

Kaj li daŭrigis:

– Mi opinias, ke la Kristanismo ne trafos sian celon, se ni atendas paŝojn nur de la izraelidoj, rigidiĝintaj en la malhumileco de la Leĝo. Jesuo asertis ke liaj disĉiploj venos el oriento kaj el okcidento (*). Ni, kiuj antaŭsentas la tempeston, kaj precipe mi, kiu ĝin konas en ĝia furiozo, ĉar mi estis turmentisto, ni devas altiri

(*) Tiel laŭ Mateo, 8:11; sed ankaŭ “el nordo kaj el sudo”, laŭ Luko, 13:29. – *La Trad.*

al ni tiujn disĉiplojn. Mi volas diri, Barnabas, ke ni devas venigi al ni la naciojn el tie, kie ajn ili sin trovas. Nur tiel la movado estos denove tutaĵo laŭ la senco de universaleco.

La disĉiplo de Simon Petro faris geston de miro. La eksrabeno ĝin rimarkis kaj diris:

– Ĉe tio estas kompreneble antaŭvideblaj multe da protestoj kaj grandegaj luktoj, tamen mi povas vidi neniajn aliajn rimedojn. Ne estas juste forgesi la eminentajn servojn de la jerusalema eklezio al la malriĉuloj kaj mizeruloj, kaj mi eĉ pensas, ke la pia helpado de ĝiaj laboroj ofte estis ĝia tabulo de savo. Sed ekzistas aliaj agokampoj, aliaj esencaj horizontoj. Ni povos helpi multe da malsanuloj, havigi ripozoliton al la pli malfeliĉaj, sed sur la Tero ĉiam estis kaj estos malsanaj kaj lacaj korp-oj. En la kristana laborado tia klopodo ne povos esti flanken metita, sed sur la unua loko devas esti la prilumado de la spirito. Se la homo portus la Kriston en sia interno, la kadro de la bezonoj estus tute alia. La kompreno de la Evangelio kaj de la ekzemplado de la Majstro reformus la konceptojn pri doloro kaj sufero. La mizerulo trovas rimedojn en sia propra klopodado, la malsanulo sentus en pli daŭra malsaneco ian defluilon de la neperfektaĵoj. Neniu estus almozulo, ĉar ĉiuj havus kristanan lumon por la reciproka helpado, kaj, fine, la baroj de la vivo estus amataj kiel benindaj punoj de amanta Patro je tumultaj infanoj.

Barnabas ŝajnis entuziasmiĝi ĉe ĉi tiu ideo, sed, pensinte minuton, diris:

– Sed, ĉu tiu entrepreno ne devus esti iniciato de Jerusalem?

– Mi pensas, ke ne – tuj respondis Saŭlo. – Estus absurdo pliiĝi la zorgojn de Petro. Supermezura estas tiu alsvarmo de mizeraj kaj senfortaj homoj, venantaj al li el ĉiuj provincoj. Simon tute ne povus plenumi tian taskon.

– Sed la ceteraj kamaradoj? – demandis Barnabas, montrante solidarecon.

– La ceteraj sendube protestos. Precipe nun, kiam

la judismo ensorbas la apostolajn penojn, estas prave antaŭsenti multe da krioj. Tamen la Naturo mem instruas pri ĉi tio. Ĉu ni ne tiel forte plendas kontraŭ la doloro? Sed kiu plej multe bonfaras al ni? Iafoje nia savo kuŝas ĝuste en tio, kio ŝajnis al ni efektiva malfeliĉo. Estas nepre necese skui la marasmon de la jerusalema institucio, kunvokante la necirkumciditojn, la pekulojn, la eksterleĝulojn, alie post nemulte da jaroj Jesuo estos prezentata kvazaŭ ia vulgara aventuristo. Supozeble, post la morto de Simon, al la malamikoj de la principoj, instruitaj de la Majstro, estos tre facile kripligi la notojn de Levi. La Bona-Novajo estos malŝatata, kaj se post kvindek jaroj de hodiaŭ iu demandas pri la Kristo, tiu ricevos kiel respondon, ke la Majstro estis ia ordinara kriminto, kiu pagis sur la kruco por la deflankiĝoj de sia vivo. Enfermi la Evangelion en Jerusalemon estus kondamni ĝin al estingiĝo en la fokuso de tiom da religiaj malkonsentoj, sub la politikaĉo de la homoj. Ni bezonas disporti la novaĵon de Jesuo al aliaj gentoj, interligi la regionojn de Kristana interkompreniĝo, konstrui novajn vojojn... Estas eĉ juste, ke ni ankaŭ notu tion, kion ni scias pri Jesuo kaj lia dia ekzemplado. Ankaŭ aliaj disĉiploj povus skribi tion, kion ili vidis kaj aŭdis, ĉar laŭ la praktiko mi konstatas, ke Levi ne faris pli plenajn notojn pri tio, kion li scias pri la Majstro. Kelke da situacioj kaj faktoj li ne registris. Ĉu ne estus konsilinda ankaŭ tio, ke Petro kaj Johano notu siajn pli intimajn rimarkojn? Mi ne hezitas aserti, ke niaj posteuloj ofte traserĉos la taskon, al ni konfiditan.

Barnabas ĝojis ĉe tiel allogaj perspektivoj. La admono de Saŭlo estis plej justaj. Oni devas disporti plenajn informojn tra la mondo.

– Vi estas prava – li diris kun miro –, ni devas pensi pri tiuj laboroj, sed kiel ilin plenumi?

– Nu – respondis Saŭlo, provante ebenigi la malfacilaĵojn –, se vi volos estri ĉian ajn klopodon pri tio, vi povas kalkuli je mia senkondiĉa kunhelpo. Nia plano estus disvolvata per la organizado de sindonaj misiistaroj.

oj, celantaj nenion krom plene servadi al la dissemado de la Bona-Novajo de la Kristo. Ni komencus ekzemple en regionoj, ne tute konataj, ni kreus la kutimon instruadi la evangeliajn veraĵojn al la plej diversaj grupoj; post ĉi tiu provo ni irus al aliaj regionoj, ni portus la instruojn de la Majstro al aliaj gentoj...

Lia kompaniano aŭdis lin, karesante sincerajn esperojn. Reanimite, li diris al la konvertito apud Damasko, skizante la unuan punkton de la programo:

– De longe, Saŭlo, mi bezonas reveni al mia naskiĝlando, por solvi kelkajn familiajn problemojn. Kiu scias, ni povus komenci la apostoladon tra vilaĝoj kaj urboj de Kipro? Laŭ la rezultado, ni irus pluen al aliaj regionoj. Mi estas informita, ke la regionon, kie kuŝas Antioĥia, en Pisidio, loĝas simplanimaj kaj bonkoraj homoj, kaj mi pensas, ke ni el tiu entrepreno rikoltus belajn fruktojn.

– Vi povos kalkuli je mi – decideme diris Saŭlo el Tarso. – La situacio postulas la laboron de kuraĝaj fratoj, kaj la eklezio de la Kristo ne povos venki per memkomfortemo. Mi komparas la Evangelion kun ia semlima kampo, kiun la Sinjoro konfidis al ni, por ke ni ĝin kultivu. Kelkaj laboristoj devas resti apud la fontoj, zorgante pri ilia pureco, aliaj displugas la grundon en difinitaj lokoj. Oni ja ne povas forhavi la kunlaboron de tiuj, kiuj bezonas manipuli krudajn ilojn, dishaki densajn lianarbarojn, distranĉi dornarbetojn, por ke la lumo de la suno superverŝu la vojojn.

Barnabas konfesis bonega tiun projekton, sed konsideris:

– Tamen ni devas ankoraŭ ekzameni la demandon pri mono. Mi havas iajn kelke da moneroj, sed nesufiĉajn por ĉiuj elspezoj. De alia flanko ni ne povus troŝarĝi la ekleziojn...

– Sendube! – rediris la eksrabeno. – Kie ni haltados, tie mi povos praktikadi mian metion. Kial do ne? Ĉiu eĉ tre malriĉa vilaĝo ĉiam havas luoteksilojn... Mi do instalos al mi moveblan laborejon.

Barnabas trovis amuza ĉi tiun rimedon kaj konsideris:

– Viaj klopodoj estos ne malgrandaj. Ĉu vi ne timas la neantaŭvideblajn malfacilaĵojn?

– Kio! – ekkriis Saŭlo per firma tono. – Se Dio ne permesis al mi la vivon en familio, tiel estis certe por tio, por ke mi min fordonu sole nur al servado al Li. Kie ni estos, tie ni do instalos la modestan laborejon; kaj kie ne estos tapiŝoj, por ripari aŭ teksu, tie estos sandaloj.

La disĉiplo de Simon Petro entuziasmiĝis. La plua vojaĝo estis difinita por la projektoj de la farota ekskurso. Io tamen estis konsiderenda: krom la neceso submeti la planon al la aprobo de la eklezio de Antioĥia, oni ankaŭ devos pensi pri la juna Johano Marko. Barnabas penis interesi sian nevon pri iliaj konversacioj. La junulo baldaŭ konvinkiĝis, ke li devos aliĝi al la misio, en la okazo, se la anaro en Antioĥia ĝin ne malaprobos. Li interesiĝis pri ĉiuj detaloj de la planita programo. Li ĉie ajn sekvas la laboron de Jesuo.

– Kaj se leviĝos multe da baroj? – saĝe demandis lin Saŭlo.

– Mi povoscios ilin venki – emfaze respondis Johano.

– Sed ni eble renkontos sennombrajn malfacilaĵojn – daŭrigis la eksrabeno, preparante lian spiriton. – Se la Kristo, kiu estis senpeka, ricevis krucon meze en moko kaj skurĝoj, ĉar li instruadis la veraĵojn de Dio, kion ni atendu, ni malfortaj, mizeraj animoj?

– Mi ja trovos la necesajn fortojn.

Saŭlo lin ekrigardadis, mirante la firman decidemon, kiun liaj vortoj travidigis, kaj rimarkis:

– Se vi donos ateston tiel grandan, kiel la kuraĝo, kiun vi elmontras, mi neniel dubas la altecon de via misio.

Ĉe vigligaj esperoj la projekto finiĝis kun belaj perspektivoj de laboro por la tri amikoj.

En la unua kunveno, raportinte siajn personajn observojn koncerne la eklezion de Jerusalemo, Barnabas elvolvis tiun planon al la ĉeestantoj, kiuj lin atente aŭdis. Iuj plejaĝuloj plendis, ke tio forprenus parton de la eklezio, eldiris sian deziron, ke ne rompiĝu la harmonia kaj frata tuto, sed la parolanto ree klarigis la novajn bezonojn de la Evangelio. Kiel eble plej fidele li pentris la okazaĵojn en Jerusalemo, resume sciigis siajn konversaciojn kun Saŭlo el Tarso kaj reliefigis la konvenecon de la alvoko de novaj laborantoj al la servado al la Majstro.

Kiam li traktis la demandon kun la tuta meritita seriozeco, la estroj de la kolektivo ŝanĝis sian opinion. Fariĝis ĝenerala interkonsento. Efektive la situacio, klarigita de Barnabas, estis tre serioza. Liaj emfazaj argumentoj estis plej justaj. Se daŭrus plu la marasmo en la eklezioj, la Kristanismo estis destinita al pereco. Sur tiu sama loko la disĉiplo de Simon ricevis de ĉiuj senkondiĉan aprobon, kaj en la momento de la preĝoj aŭdiĝis en tiu medio de pura simpleco la voĉo de la Sankta Spirito, rekomendanta, ke Barnabas kaj Saŭlo estu difinitaj por evangelizi la naciojn.

Tiu supera rekomendo, tiu voĉo el la ĉielaj faldoj eĥis en la koro de la eksrabeno kvazaŭ ia kanto de spirita triumfo. Li sentis, kvazaŭ li ĵus trairis ian grandegan dezerton, por denove iri renkonte al dolĉa kaj eterna mesaĝo de la Kristo. Por konkeri la spiritan dignon, li spertis nur suferojn, komencante de la dolora blindeco proksime al Damasko. Li sopiris al Jesuo. Li havis brulan, teruran soifon. Li vane petis komprenon de la amikoj, li senutile klopodis pri la milda sino de la familio. Sed nun, kiam la plej alta parolo vokis lin al la servado, li estis posedita de senfina ĝojego. Tio estis la signo, ke li estis rigardita kiel inda je la klopodoj, konfiditaj al la disĉiploj. Pensante pri tio, kiel la pasintaj doloroj ŝajnas al li bagatelaj, infanecaj, kompare kun la grandega ĝojo, kiu plenigas lian animon, Saŭlo el Tarso ekploregis kaj spertis mirindajn sensaĵojn. Neniu el la ĉeestantaj fratoj, eĉ ne Barnabas, povus taksi la

grandiozecon de la sentoj, kiujn tiuj larmoj malkaŝis. Profunde emociite, la eksleĝisto rekonis, ke Jesuo volontis akcepti liajn bonvolajn oferojn kaj klopodojn. La Majstro lin vokis, kaj por kontentigi tiun alvokon, li iros ĝis la randoj de la mondo.

Multenombraj kamaradoj kunhelpis en la komencaj paŝoj por la entrepreno.

Baldaŭ, plene fidante Dion, Saŭlo kaj Barnabas, kune kun Johano Marko, adiaŭis siajn fratojn kaj ekiris al Seleŭkia. La vojaĝo direkte al la marbordo fluis en tre gaja atmosfero. De tempo al tempo ili ekripozis sur la bordo de Oronto por reviglita manĝeto. En la ombro de kverkoj, en la paco de florantaj arbaroj la misiistoj teksadis konsiderojn pri siaj unuaj esperoj.

En Seleŭkia ili ne longe atendis ŝipon. La urbo ĉiam svarmis per pilgrimantoj, sin direktantaj al Okcidento, kaj ricevis grandan nombron da ĉiaspecaj ŝipoj. Entuziasmigite de la akcepto, kiun al ili faris iliaj samkredanoj, Barnabas kaj Saŭlo enŝipiĝis, por iri Kipron, ĉe kortuŝanta kaj karesa adiaŭo.

Al la insulo ili venis, kune kun la juna Johano Marko, sen menciindaj incidentoj. En Citium ili restadis multe da tagoj, kaj tie Barnabas solvis plurajn aferojn, rilatantajn al lia familia intereso.

Antaŭ ol foriri, ili vizitis la sinagogon en sabato, intencante komenci sian taskon. Kiel estro de la misio, Barnabas prenis la parolon, penante kompari la tekston de la Leĝo, studita en tiu tago, kun la instruoj de la Evangelio, el kio li montris la superecon de la misio de la Kristo. Saŭlo rimarkis, ke lia kunulo elvolvas la temon kun iom tro granda respekto al la judaj tradicioj. Oni klare vidis, ke Barnabas deziras antaŭ ĉio konkeri al si la simpation de la aŭdantaro; ĉe iaj punktoj li elmontris, ke li timas komenci la laboron, kio kaŭzus konfliktojn, neniel akordantajn kun lia temperamento. La izraelidoj montriĝis surprizitaj, sed ĝojaj. Observante ĉi tiun scenon, Saŭlo ne sentis sin tute kontenta. Fari riproĉojn al Barnabas estus maldanko kaj maldisciplino; konsenti kun la rideto de liaj samurbanoj,

persistantaj en la eraroj de la farisea ŝajnigo, estus fornei fidelecon al la Evangelio.

Li penis rezignacii kaj atendis.

La misiistaro vizitis multenombrajn lokojn meze en vibroj de granda simpatio. En Amatonto la anoncantoj de la Bona-Novaĵo restis pli ol unu semajnon. La parolo de Barnabas estis senfine cedema kaj havis kiel ĉefan trajton la grandan zorgon ne vundi la sentemecon de la fariseoj.

Post multe da klopodo ili venis al Nea-Pafos, kie loĝis la Prokonsulo. La sidejo de la provinca regado estis bela urbo, plena de naturaj ĉarmaĵoj, distingiganta per solida kulturo. Sed la disĉiplo de Petro estis lacekonsumita, li neniam antaŭe havis tiel intensajn apostolajn laborojn. Konante la neperfektecon de la parolo de Saŭlo en la servoj en la eklezio de Antioĥia, li timis konfidi al la eksrabeno la rektan respondecon por la instruado. Kvankam sentante sin tre laca, li faris la predikon en la sinagogo en la sabato, tuj sekvanta la tagon de lia veno, sed tiam li estis die inspirita. Kun eksterordinara brilo li prezentis la Evangelion. Saŭlo mem profunde kortuŝiĝis; la sukceso estis grandega. La duan kunvenon ĉeestis la plej eminentaj homoj; judoj kaj romanoj tie estis en streĉa atendo. La ekslevido denove faris la apologion de la Kristo, teksante konsiderojn kun mirinda spirita beleco. La eksleĝisto, komisiita por la informaj servoj de la misio, plezure kontentigis ĉiujn konsultojn kaj petojn. Neniu urbo montris tiel grandan interesiĝon kiel tiu; la romanoj grandnombre venis peti klarigojn pri la celoj de tiuj kurieroj, ricevis sciigojn pri la Kristo, esprimante ĝojojn kaj esperojn, montriĝis plej bonvolemaj por la Apostoloj. Entuziasmigite de la sukceso, Saŭlo kaj Barnabas aranĝis kunvenojn en privataj domoj, disponigitaj de simpatiantoj al la doktrino de Jesuo speciale por ĉi tiu celo, kaj tie ili komencis belan entreprenon de resanigoj. Senfine ĝoja, la tarsi teksisto vidadis alveni longajn vicojn de la “infanoj de Kalvario”. Tio estis afliktitaj patrinoj, disreviĝintaj mal-sanuloj, senesperaj maljunuloj, suferantaj orfoj, nun ir-

antaj al la misiistoj por helpo. La sciigo pri resanigoj, konsideritaj kiel neeblaj, plenigis Nea-Pafoson per efektiva mirego. La misiistoj surmetis la manon, eldirante varmajn preĝojn al la Nazareta Mesio, aŭ disdonadis puran akvon en ties nomo. Treege laca kaj opiniante, ke la nova aŭdantaro ne postulas pli grandan erudicion, Barnabas komisiis sian kunulon por predikadi la Bonan-Novajon, sed, forte surprizite, li konstatis, ke Saŭlo estas radikale tute alia. Lia parolo ŝajnis tuŝata de ia nova lumo; li ĉerpis el la Evangelio tiel profundajn konkludojn, ke la ekslevido lin nun aŭdadis, ne kaŝante sian miron. Barnabas rimarkis precipe la zorgon, kun kiu la eksleĝisto prezentas la instruojn de la Kristo al la almozuloj kaj suferantoj. Li paroladis kiel iu, kiu multe da jaroj kunvivadis kun la Sinjoro, kun fluantaj larmoj menciadis iujn pecojn de la instruoj de la Majstro. Dolĉega konsolo plenigis la spiriton de la homamasoj. Tage kaj nokte laboristoj kaj studentoj kopiadis la notojn de Levi.

Ĉi tiuj okazaĵoj agitis la opinion de la tuta urbo. La rezultatoj estis plej kuraĝigaj. Tiam grandega surprizo trafis la spiriton de la misiistoj.

Estis jam malfrue matene, Saŭlo akceptadis multe da mizeruloj, kaj jen anoncigis sin roma legiano. Barnabas kaj lia kamarado fordonis la servojn al Johano Marko kaj iris malfermi al la vizitanto.

– La Prokonsulo Sergio Paŭlo – diris la kuriero per solena tono – ordonis al mi inviti vin viziti lin en la palaco.

Ĉi tiu parolo estis pli ĝuste ordono ol nura invito. La disĉiplo de Simon tion tuj komprenis kaj respondis:

– Ni kore dankas kaj ankoraŭ hodiaŭ iros al lia moŝto.

La eksrabeno konfuziĝis. Treege mirigis lin ne nur tiu fakto per si mem. Li vane penis rememori ion rilatan al ĝi. Sergio Paŭlo? Ĉu li ne konas iun kun ĉi tiu nomo? Li penis remerori la romandevenajn junulojn, al li konatajn. Fine venis en lian memoron tiu konversacio de Petro pri la persono de Stefano, kaj li konklud-

is, ke la Prokonsulo ne povas esti iu alia, ol tiu sama liberiginto de la frato de Abigail.

Ne komukikante al Barnabas siajn intimajn impresojn, li kun tiu ekzamenis la situacion. Kion celas tiu delikata ordono? Laŭ la famo tiu politika estro de longe suferas necedantan malsanon. Ĉu li deziras resaniĝi aŭ, kiu scias, instigite de la judoj, krei ian motivon, por ilin elpeli el la insulo? Sed la situacion ili ja ne solvos per konjektoj.

Komisiinte Johanon Markon por kontentigi ĉiujn, kiuj interesiĝas pri la doktrino, rilate la bezonatajn informojn, la du amikoj decideme ekvojiris.

Kondukite tra longaj galerioj, ili venis al sinjoro ne maljuna, kuŝanta sur larĝa divano kaj vidiganta ekstrem-an senfortiĝon. Malgrasa, pala, elmontrante profundan disreviĝon pri la vivo, la Prokonsulo tamen trasantigis grandegan bonkorecon tra la milda disradiado de la humila kaj melankolia rigardo.

Li akceptis la misiistojn tre simpatie kaj prezentis al ili judan magiiston kun la nomo Bar-Jesuo, kiu jam de longe lin kuracadis. Sergio Paŭlo singardeme ordonis al la gardistoj kaj servistoj forlasi la ĉambron. Kiam tie estis nur la kvar homoj, en tre intima rondo, la malsanulo kun amara sereneco parolis:

– Sinjoroj, pluraj amikoj sciigis min pri viaj sukcesoj en ĉi tiu urbo Nea-Pafos. Vi resanigis danĝerajn malsanojn, revenigis la fidon al multaj senfiduloj, konsolis mizerajn suferantojn... Jam de pli ol unu jaro mi zorgas pri mia kadukiĝinta sano, kaj tial mi nun preskaŭ ne taŭgas plu por la ŝtata servado.

Montrante al Bar-Jesuo, kiu, kontraŭe, fiksas malician rigardon sur la vizitantoj, la roma estro daŭrigis:

– Antaŭ longe mi, maltrankvila kaj fidante la nia-tempan sciaron, dungis ĉi tiun vian samlandanon, sed la rezultatoj ĝis hodiaŭ estis bagatelaj. Mi venigis vin, dezirante elprovi viajn sciojn. Ne miru mian konduton. Se mi povus, mi estus persone irinta al vi, ĉar mi konas la limojn de miaj prerogativoj, sed, kiel vi vidas, mi estas antaŭ ĉio homo, bezonanta helpon.

Saŭlo aŭdis ĉi tiujn vortojn, profunde emociita de la natura bonkoreco de la eminenta malsanulo. Barnabas estis perpleksa, ne sciante, kion diri, sed la eksleĝisto, mastrante la situacion kaj preskaŭ certa, ke tiu estas la sama persono, kiu aperis en la ekzistado de la venkinta martiro, prenis la parolon kaj konvinkite diris:

– Nobla Prokonsulo, ni efektive havas ĉe ni la potencon de iu granda kuracisto. Ni povas resanigi ĉiam, kiam la malsanuloj estas pretaj lin kompreni kaj sekvi.

– Kiu do li estas? – demandis la malsanulo.

– Li estas nomata Kristo. Lia formulo estas sankta – emfaze daŭrigis la teksisto – kaj estas destinita por kuraci antaŭ ĉio la kaŭzon de ĉiaj homaj mizerajoj. Kiel ni scias, ĉiuj korpoj de la Tero ja iam mortos. Tial, dank'al nenuligeblaj naturaj leĝoj ni en ĉi tiu mondo neniam havas perfektan fizikan sanon. Nia organismo sufera la agadon de ĉiuj ĉirkaŭantaj okazaĵoj. La varmo ĝenas, la malvarmo tremigas, la nutrado ŝanĝas nian estecon, la agoj de la vivo aliigas niajn kutimojn. Sed la Savinto instruis nin, ke ni strebu al saneco pli reala kaj altvalora, nome la saneco de la spirito. Posedante ĝin, ni estos farintaj aliaj la kaŭzon de la zorgado de nia vivo kaj ni fariĝos kapablaj ĝuadi tiun ioman fizikan sanon, kiun la mondo povas havigi en la kadro de siaj forpasemaj manifestiĝoj.

Dum Bar-Jesuo, ironie kaj ridetante, aŭskultis ĉi tiun komencon, Sergio Paŭlo atente kaj kortuŝite sekvis la parolon:

– Sed kiel trovi tian kuraciston? – demandis la Prokonsulo, pli interese pri sia resaniĝo, ol pri la alta metafizika senco de la aŭditaj rimarkoj.

– Li estas la perfekta boneco – klarigis Saŭlo el Tarso – kaj lia konsolanta agado estas ĉie. Eĉ antaŭ ol ni lin komprenas, li ĉirkaŭigas nin per la esprimo de sia senlima amo!

Rimarkinte la entuziasmon, kun kiu la tarsa misiisto paroladis, la politika estro de Nea-Pafos per esploranta rigardo demandis Bar-Jesumon pri la afero.

La juda magiisto, elmontrante profundan malŝaton, diris:

– Ni pensis, ke vi estas armitaj per ia nova scienco... Mi ne volas kredi tion, kion mi aŭdas. Ĉu vi ja opinias, ke mi scias nenion pri la falsa nazareta profeto? Ĉu vi kuraĝas eniri en la palacon de iu gubernatoro en la nomo de ia mizera ĉarpentisto?

Saŭlo mezuris la tutan amplekson de tiuj ironioj kaj sentime respondis:

– Amiko, kiam mi portis la farisean maskon, mi ankaŭ tiel pensis, sed nun mi konas la gloran lumon de la Majstro, la Filo de la Vivanta Dio!

Ĉi tiuj vortoj estis diritaj per tono de konvinko tiel varma, ke la izraelida ĉarlatano mem palegiĝis. Ankaŭ Barnabas paliĝis, dum la nobla patricio observadis la flaman predikiston kun videbla interesiĝo. Post korprenma atendo Sergio Paŭlo diris:

– Mi rajtas dubi pri neniu tiel longe, ĝis konkludigaj pruvoj devigos min ĝin fari.

Kaj penante fikse rigardi la fizionomion de Saŭlo, kiu alfrontis lian esplorantan rigardon, li serene daŭrigis:

– Vi parolas pri tiu Kristo Jesuo kaj plenigas min per mireto. Vi diras, ke lia boneco helpas al ni, eĉ antaŭ ol ni lin konas. Kiel mi havu ian konkretan pruvon pri via aserto? Se mi ne komprenas tiun Mesion, kies kurieroj vi estas, kiel do mi sciu, ĉu lia helpo min iam influis?

Saŭlo subite rememoris la konversaciojn de Simon Petro, kiam ĉi tiu rakontis al li la antaŭaĵojn de la martiro de la Kristanismo. En momento li ordigis la plej malgrandajn epizodojn, kaj uzante ĉiujn oportunajn okazojn, por reliefigi la senliman amon de Jesuo, kiel fariĝis en la plej etaj faktoj de lia apostola kariero, li kun aparta akcento respondis:

– Prokonsulo, aŭdu min! Por elmontri al vi, aŭ pli bone, por al vi rememorigi la favorkorecon de Jesuo el Nazaret, nia Savinto, mi turnos vian atenton sur gravan okazaĵon.

Dum Barnabas ekmontris profundan miron ĉe la maltima sintenado de sia kamarado, la politikisto akriĝis sian scivolon.

– Ĉi tio ne estas la unua fojo, kiam vi suferas seriozan malsanon. Antaŭ preskaŭ dek jaroj, provante la unuajn paŝojn en la politika vivo, vi enŝipiĝis en la haveno de Cefalonio direkte al ĉi tiu insulo. Vi vojaĝadis al Citium, sed antaŭ ol la ŝipo venis al Korinto, atakis vin terura febro, via korpo disfendiĝis per malignaj vundoj...

Vaksa blankeco kovris la vizaĝon de la estro de Nea-Pafos. Metinte la manon sur la bruston, kvazaŭ por bridi la plirapidiĝintan batadon de la koro, li ekstreme konfuzita leviĝis.

– Kiel vi scias ĉion ĉi? – li demandis terurita.

– Ĝi ne estas ĉio – serene diris la misiisto –, atendu la ceteraĵon. Vi plurajn tagojn estis inter vivo kaj morto. La kuracistoj en la ŝipo vane studadis vian malsanon. Viaj amikoj vin forlasis. Kiam vi troviĝis tute forlasita, malgraŭ la politika prestiĝo de via funkcio, la Nazareta Mesio, en la silento de sia dia kompatemo, sendis iun al vi.

Ĉe la vekigo de la malnovaj rememoroj la Prokonsulo sentis sin profunde kortuŝita.

– Kiu estis tiu kuriero de la Savinto? – daŭrigis Saŭlo, dum Barnabas lin mirege rigarddis. – Unu el viaj intimuloj? Iu iminenta amiko? Unu el viaj altaj kolegoj, kiuj ĉeestis viajn dolorojn? Ne! Nur ia senvalora sklavo, ia sennomulo, sidanta ĉe la mortigaj remiloj. Jeziel vigladis ĉe vi tage kaj nokte! Kaj kion la monda sciaro ne sukcesis fari, tion atingis la koro, posedita de amo al la Kristo! Ĉu vi nun komprenas? Via amiko Bar-Jesuo parolas pri ia sennoma ĉarpentisto, ia Mesio, kiu preferis la kondiĉon de ekstrema humileco, por alporti al ni la altvalorajn torentojn de siaj gracoj! Jes, ankaŭ Jesuo, simile kiel tiu sklavo, kiu rehavigis al vi la perditan sanon, fariĝis servanto al la homo, por konduki lin al iu pli bona vivo! Kiam ĉiuj nin forlasas, li estas ĉe ni; kiam niaj amikoj foriĝas de ni, lia boneco pli alproksimiĝas. Por eviti la mizerajn eventualaĵojn

de ĉi tiu mortema vivo, estas necese kredi al li kaj lin senripoze sekvi!

Ĉe la konvulsia ploro de la Prokonsulo, Barnabas, perpleksa, konsideris: Kie lia kunulo ĉerpis tiajn profundajn malkaŝojn? Laŭ lia opinio Saŭlo el Tarso en tiu momento iluminigis per la mirinda kapablo de profetaĵoj.

– Sinjoroj, ĉio ĉi estas nuda vero! Vi portis al mi la sanktan sciigon pri iu Savinto! – ekkriis Sergio Paŭlo.

Rimarkinte la kapitulacon de la malavara patricio, kiu abunde provizis lian monujon, la izraelida magiisto, kvankam tre surprizita, energie ekkriis:

– Mensogo! Ili estas mensoguloj! Ĉio ĉi estas verko de Satano! Ĉi tiuj viroj kunportas aĉajn sorĉaĵojn de la “Vojo”! For la kanajlan ekspluatadon!

Lia buŝo ŝaŭmis, liaj okuloj brilegis de kolero. Saŭlo tenadis sin trankvila, flegma, preskaŭ ridetanta. Poste li rediris kun forta akcento:

– Trankviliĝu, amiko! Furiozo ne estas amiko de vero kaj preskaŭ ĉiam kaŝas malnoblajn interesojn. Vi akuzas nin kiel mensogulojn, sed niaj vortoj eĉ je unu colo ne deflankiĝis de la realeco de la okazaĵoj. Vi diras, ke nia forto venas de Satano, sed kiel nekonsekvence! Kiu ja klopodus kontraŭ si mem? Vi asertas, ke ni kunportas sorĉaĵojn; se amo estas tiu talismano, ni ja ĝin portas en la koro, sopirante transigi al ĉiuj estuloj ĝian bonfaran influon. Fine, vi ofende alnomas nin senhontaj ekspluatistoj, sed ni venis ĉi tien vokite de iu, kiu honoris nin per sincereco kaj konfido, kaj neniel ni povus proponi la gracojn de la Savinto kiel ian komercaĵon.

Sekvis varma disputo: Bar-Jesuo plej vigle penis prui la malnoblecon de la intencoj de Saŭlo, dum ĉi tiu ĉion eblan faris, por elmontri noblecon kaj amikecon.

La Prokonsulo vane penis deadmoni la judon daŭrigi plu la kverelon. Siaflanke, Barnabas, multe pli fidante la spiritajn kapablojn de sia amiko, sekvis tiun kunbekiĝon, ne kaŝante miron ĉe la senlimaj rimedoj, kiujn elmontris la tarsa misiisto.

En momento dum la disputo, kiu jam daŭris pli ol unu horon, la magiisto pikis per la parolo la personon kaj la farojn de Jesuo Kristo.

Preninte pli energian teniĝon, la Apostolo diris:

– Mi ĉion eblan faris, por konvinki vin sen rektaj elmontroj, tiel, ke mi ne vundus la respektindan parton de viaj konvinkoj; vi tamen suferas blindecon kaj nur en ĉi tiu stato vi povos vidi la lumon. Same kiel vi, ankaŭ mi jam vivis en mallumo, kaj en la momento de mia persona renkontiĝo kun la Mesio, estis necese, ke la mallumo plidensiĝu en mia spirito, por ke la lumo reaperu pli brila. Ankaŭ vi ricevos tian bonfaron. La korpa vidado estingiĝos, por ke vi povu vidi la veron spirite!

Tiam Bar-Jesuo ellasis krion:

– Mi blindiĝis!

Fariĝis kelka konfuzo en la ĉambro. Barnabas alpaŝis kaj subtenis la izraelidon, kiu afliktite palpatis en la aero. La teksisto kaj la gubernatoro alproksimiĝis surprizitaj. Estis vokitaj servantoj, kiuj elkore kaj diligente faris ĉion necesan en tiu momento. Dum kvar teruraj horoj Bar-Jesuo ploradis, dronante en la densa ombro, kiu invadis liajn lacajn okulojn. Post ĉi tiu tempo la misiistoj sur genuoj ekpreĝis... Milda sereneco elkrepuskiĝis en la vasta ĉambro. Poste, Saŭlo metis la manojn sur lian frunton; tiam kun ekĝemo de korfaciliĝo la maljuna izraelido rericevis la vidadon kaj konfuzita kaj frakasita foriris.

Sed la Prokonsulo, forte interesite pri la tre impresantaj faktoj de tiu tago, vokis la misiistojn aparte kaj diris emociita:

– Amikoj, mi kredas la diajn veraĵojn, kiujn vi anoncas, kaj sincere deziras partopreni en la esperata Regno. Malgraŭ tio, estus bone, se mi plene sciiĝus pri viaj laborceloj, unuvorte pri viaj planoj. Mi ja scias, ke vi ne komercas pri viaj spiritaj kapabloj, kaj mi proponas min, por helpi vin per miaj rimedoj, per ĉio al mi ebla. Ĉu mi povus ekscii viajn projektojn?

La du misiistoj rigardis unu la alian surprizitaj. Barnabas ankoraŭ ne estis reveninta al si de la mirego, kiun

lia kunulo al li kaŭzis. Siaflanke, Saŭlo apenaŭ kaŝis sian propran miregon pri la spirita helpo, kiun li ricevis, penante konfuzi la malicajn intencojn de Bar-Jesuo. Tamen, rekonante la noblan kaj sinceran interesiĝon de la provincestro, li ĝoje klarigis:

– La Savinto fondis la religion de amo kaj vero, nevideblan kaj universalan institucion, kie kolektiĝus ĉiuj bonvolemaj homoj. Nia celo estas havigi al la dia verko videblan mienon, starigante templojn, kiuj kunfratiĝus laŭ samaj principoj en lia nomo. Ni ĝuste taksas la delikatecon de tia entrepreno kaj ja kredas, ke sur nia vojo leviĝas la plej grandaj malfacilaĵoj. Preskaŭ ne eble estas trovi la homan rimedon, nepre necesan al tiu tasko, sed oni ja devas konkretigi la planon. Kiam fiaskos la laborantoj de la videbla institucio, ni esperos al ia ĉiela eklezio, kie en la lumo de la universaleco Jesuo estos la superega estro de ĉiuj armeoj, sin dediĉantaj al bono.

– Ĝi estas plej bela iniciato – rediris la Prokonsulo, elmontrante noblan interesiĝon. – Kie vi komencis la konstruadon de la sanktejoj?

– Nia misio faras siajn unuajn paŝojn ĝuste nun. La disĉiploj de la Mesio fondis la ekleziojn de Jerusalemo kaj Antioĥia. Nun ni ne havas aliajn edukajn ĉelojn krom ĉi tiuj. Ĉie ekzistas multe da kristanoj, sed ili kunvenas en privataj domoj. Ili ne havas propre templojn, kie ili povus pli efike doni helpon kaj fari propagandon.

– En Nea-Pafos estos do la unua eklezio, frukto de via rekta laborado.

Saŭlo ne sciis, kiel esprimi sian dankon por tiu memvola grandanimaĵo. Profunde kortuŝite, li tiam alpaŝis kaj, kune kun la kiprano, dankis la patricion por tiu malavaraĵo, kiu donos prestiĝon kaj faciligos la apostolajn laborojn.

La tri amikoj ankoraŭ longe paroladis pri la perspektivaj entreprenoj. Sergio Paŭlo petis ilin indiki tiujn homojn kapablajn konstrui la novan templon, dum Barnabas kaj lia kamarado parolis pri siaj esperoj.

Nur vespere la misiistoj povis reveni al la modesta domo de la predikoj.

– Mi estas impresita de ĉio ĉi! – diris Barnabas, rememorante la okazintaĵon. – Kion vi faris? Mi pensas, ke hodiaŭ estas la plej granda tago de via ekzistado. Via parolo havis ian sanktan kaj malsaman nuancon; nun animas vin la kapablo profeti... Krom tio la Majstro favoris vin per la povo superregi la malicajn ideojn. Ĉu vi vidis, kiel tiu ĉarlatano sentis la influon de grandaj fortoj, kiam vi faris vian alvokon?

Saŭlo atente aŭdis kaj plej simplanime rediris:

– Ankaŭ mi ne scias, kiel vortigi mian miregon pro la ricevitaj gracoj. Ni fariĝis iloj de la konvertiĝo de la Prokonsulo dank'al la Kristo, ĉar vero estas, ke per ni mem ni neniom valoras.

– Mi neniam forgesos la hodiaŭajn okazaĵojn – diris la ekslevido kun miro.

Kaj post paŭzo:

– Saŭlo, kiam Ananias baptis vin, ĉu li ne sugestis, ke vi ŝanĝu vian nomon?

– Mi ne pensis pri tio.

– Nu, mi opinias, ke vi de nun devas konsideri vian vivon kiel ian vivon novan. Vi ricevis la lumon de la graco de la Majstro, vi havis vian Pentekoston, vi estis konsekrita kiel Apostolo por la diaj laboroj de la elaĉeto.

La ekslegiŝto ne kaŝis sian miron kaj rediris:

– Ĝi estas tre signifoplena por mi, ke iu politika estro estas altirita al Jesuo per nia helpo, des pli, ĉar nia tasko celas kunvoki la naciojn al la dia suno de la savanta Evangelio.

En sia animo li rememoris la ligilojn, kiuj lin katenis al la figuro de Stefano, la bonkoran influon de tiu roma patricio, kiu liberigis tiun junulon el la pezaj laboroj de la sklaveco, kaj silente elvokante la memoron pri tiu martiro, diris kortuŝita:

– Mi scias, Barnabas, ke multaj el niaj samdoktrinanoj ŝanĝis siajn nomojn, kiam ili konvertiĝis al la amo de Jesuo; ili tiamaniere volis signigi sian disiĝon for de la fatalaj trompoj de la mondo. Sed ankaŭ la aliĝo

de la gubernatoro, la lumo de la graco, kiu akompanis nin dum la hodiaŭaj okazaĵoj, instigas min serĉi ian motivon de senmortaj memoraĵoj.

Post longa paŭzo, komprenigante, kiel longe li pripensis, por preni tiun decidon, li diris:

– Intimaj motivoj, tute respektindaj, devigas min de nun rekoni bonfaranton en la politika estro de ĉi tiu insulo. Ne multe ŝanĝante mian nomon, mi de hodiaŭ ĝin skribos laŭ la maniero de la romanoj.

– Tre bone – diris lia kunulo –, inter “Saŭlo” kaj “Paŭlo” tre malgranda diferenco ekzistas, nur tiu rilata al skribado kaj prononco. Ĉi tiu decido estos bela honorado al nia unua misia venko ĉe la nacioj kaj samtempe estos agrabla memoraĵo de tiel nobla spirito.

Sur ĉi tiu fakto estis bazita la ŝanĝo de unu litero en la nomo de la ekslernanto de Gamaliel. Kun solida kaj energia karaktero, la rabeno de Jerusalem, eĉ fariĝinte modesta teksisto, ne volis ŝanĝi sian naturan fidelecon, kiam li eniris en la Kristanisman. Se li servadis al Moseo kiel Saŭlo, li do kun tiu sama nomo servos ankaŭ al Jesuo Kristo. Se li eraris kaj estis malica en la unua stato, li uzos la oportunan okazon, kiun al li donis la Ĉielo, li rebonigos sian ekzistadon, li estos bona kaj justa homo en la dua. En ĉi tiu rilato li konsideris nenian sugeston de siaj amikoj. Li estis la unua persekutanto de la kristana institucio, necedema turmentanto de la komenciĝanta prozelitismo, sed li nepre volis havi ĉiam ankoraŭ la nomon Saŭlo, por memori la malbonon, kiun li faris, kaj por kiel eble plej klopodi por la tuta bono, kiun li povos dissemi. Sed en ĉi tiu momento la figuro de la karmemora Stefano dolĉe parolis al lia koro. Stefano estis lia plej granda ekzemplo por la spirita marŝo. Tiu estis la Jeziel tre kara al Abigail. Por serĉi lin, ili ambaŭ faris la reciprokajn promeson senhezite iri iren ajn. La du gefratoj el Korinto estis tiel vivaj en lia sentema animo, ke li ne povis forviŝi de sia memoro la plej malgrandajn faktojn de ilia vivo. La mano de Jesuo kondukis lin al la Prokonsulo, la liberiginto de Jeziel el la sklaveco; la eks-sklavo iris Je-

rusalemon kaj tie fariĝis disĉiplo de la Kristo! La eksrabeno sentis sin feliĉa, ĉar li ricevis helpon de la dia armeo, siavice fariĝante liberiginto de Sergio Paŭlo, katenita al suferado kaj al la danĝeraj iluzioj de la mondo. Estis juste gravuri en la menso iun nedefroteblan memoraĵon de tiu, kiu, lia viktimo en Jerusalemo, nun estas benita frato, kiun li ne sukcesis forgesi en ia ajn momento de sia vivo kaj de sia apostola servado.

De tiam la konvertito apus Damasko, memore de la neforgesebla predikanto de la Evangelio, kiu mortis ŝtonumita, alprenis la nomon “Paŭlo”, kaj tiel ĝin skribis, ĝis la finiĝo de siaj tagoj.

La sciigo pri la resaniĝo kaj konvertiĝo de la Prokonsulo plenigis Nea-Pafoson per mirego. La misiistoj ne plu ripozis. La eklezio treege kreskis malgraŭ la protesto de la izraelidoj, kiu estis cetere preskaŭ nula. Nun en plena saneco, la provincestro liveris ĉion necesan por la konstruado de la preĝejo. La aktiveco estis grandega, kaj la du kurieroj de la Evangelio ne ĉesis doni dankon al Dio.

La sukceso aŭreolis ilin per profunda estimo, kaj jen al Paŭlo iris Bar-jesuo, por peti de li konfidencan parolon. La eksrabeno ne hezitis lin akcepti: tio estis por Paŭlo bona okazo, por elmontri al la maljuna izraelido siajn noblajn kaj sincerajn intencojn. Li do tiun akceptis plej afable.

Bar-Jesuo ŝajnis posedita de forta sinĝenado. Respekte salutinte la misiiston, li iom konfuzita diris:

– Nu, mi devis malfari tiun miskomprenon en la afero de la Prokonsulo. Pli ol mi, neniu deziris lian resaniĝon, kaj sekve neniu restus pli danka al via helpo, kiu liberigis lin de tiel dolora malsano.

– Mi vin tre dankas por via opinio kaj mi ĝojas pro via kompreno – ĝentile diris Paŭlo.

– Tamen...

La vizitanto hezitis, ĉu li malkaŝu, aŭ ne, siajn plej intimajn celojn. Atentante lian hakitan parolon, tamen ne divenante ĝian kaŭzon, la eksrabeno komplezeme kuragiĝis lin:

– Kion vi deziras diri? Parolu malkaŝe, senceremonie!

– Nu – li rediris pli kuraĝigita –, mi de longe karesas la penson demandi vin pri viaj spiritaĵoj. Mi pensas, ke ekzistas neniam pli granda trezoro, por venki en la vivo...

Paŭlo estis perpleksa, ne sciante, kian direkton iros la konversacio. Alcelante la plej delikatan punkton de sia pretendo, Bar-Jesuo daŭrigis:

– Kiom vi ricevas el via servado?

– Mi ricevas la favorkorecon de Dio – respondis la misiisto, nun komprenante la celon de tiu neatendita vizito. – Mi vivas de mia laborado kiel teksisto, kaj ne estus dece komerci per tio, kio apartenas al la Patro, sidanta en la Ĉielo.

– Apenaŭ kredeble! – ekkriis la magiisto, larĝe malfermante la okulojn. – Mi estis konvinkita, ke vi kunportas iajn talismanojn, kiujn mi estis preta aĉeti por ĉia prezo.

Kaj dum la eksrabeno lin rigardadis plena de kompato pro lia senscienco, la vizitanto parolis plu:

– Sed, ĉu tio estas ebla, ke vi faras tiajn aferojn sen la helpo de sorĉaĵoj?

La misiisto lin pli fikse ekrigardis kaj respondis:

– Mi konas nur unu solan efikan sorĉaĵon.

– Kio ĝi estas? – demandis la magiisto kun fajreranta kaj avida rigardo.

– Tio estas la fido je Dio kun abnegacio de ni mem.

La maljuna izraelido elmontris, ke li ne komprenis la tutan signifon de ĉi tiuj vortoj, oponante:

– Nu, jes, tamen la vivo havas siajn urgajn bezonojn. Oni nepre devas antaŭvidi kaj kolekti rimedojn.

Paŭlo pensis minutojn kaj diris:

– Per mi mem, mi povas klarigi al vi nenion, sed Dio ĉiam havas iun respondon por ĉiaj niaj demandoj. Ni konsiliĝu kun Liaj eternaj veraĵoj. Ni vidu, kia mesaĝo estas difinita por via koro.

Laŭ sia kutimo li estis malfermonta la Evangelion, sed la vizitanto rimarkigis:

– Mi konas nenion de tiu libro. Al mi ĝi do povos fari nenian admonon.

La misiisto komprenis lian kontraŭstaron kaj demandis.

– Kion vi do konas?

– Moseon kaj la Profetojn.

Paŭlo ekprenis la pergamenrulaĵon, kie oni povis legi la malnovan Leĝon, kaj transdonis ĝin al la suspektema maljunulo, por ke ĉi tiu malfermu ĝin senelekte, laŭ la tiamaj moroj, kaj legu la koncernan sentencon. Bar-Jesuo, kun videbla malvolonto, diris:

– Mi legas la Profetojn nur surgenue.

– Vi povas legi tiel, kiel vi volas, ĉar interesas nin antaŭ ĉio la kompreno.

Elmontrante sian farisean hipokritecon, la ĉarlatano genuiĝis kaj solene malfermis la tekston sub la serena kaj esploranta rigardo de la eksrabeno. La maljuna izraelido paliĝis. Li gestis, kvazaŭ li ne volas legi, sed Paŭlo rimarkis tiun apenaŭ videblan movon kaj, alproksimiĝinte, iom energie diris:

– Ni legu la eternan mesaĝon de la senditoj de Dio.

Tio estis peco el la Sentencoj de Salomono, kiun Bar-Jesuo forte ĉagrenite voĉlegis:

“Du aferojn mi petis de Vi; ne rifuzu al mi, antaŭ ol mi mortos: falsaĵon kaj mensogaĵon forigu de mi; malriĉecon kaj riĉecon ne donu al mi; nutru min per tiom da pano, kiom mi bezonas. Ĉar alie mi eble trosatiĝus kaj neus kaj dirus: Kiu estas la Eternulo? Aŭ eble mi malriĉiĝus kaj ŝtelus, kaj malbonuzus la nomon de mia Dio.”^(*)

La magiisto stariĝis konfuzita; la misiisto mem miregis.

– Ĉu vi vidis, amiko? – demandis Paŭlo. – La parolo de vero estas tre elokventa. Tio estas granda talismano, en nia ekzistado, se ni scias vivi per niaj pro-

^(*) Sentencoj, 30:7 ĝis 9. – *Noto de la Aŭtoro.*

praj rimedoj, ne translimante tion necesan al nia spirita riĉiĝo.

– Jes, efektive – rediris la ĉarlatano – ĉi tiu procedo de konsiliĝo estas tre interesa. Mi serioze meditos pri la hodiaŭa sperto.

Tuj poste li adiaŭis la Apostolon, murmurinte iajn kelkajn vortojn, kiuj apenaŭ maskis la konfuzon, kiu lin ekposedis.

Impresite de la okazaĵo, la teksisto, konsekrita al la Kristo, notis al si tiujn profundajn admonojn, por plifirmigi sian programon de spiritaj laboroj sen malnoblaj interesoj.

La misiistoj, ŝarĝitaj per multe da laboro, restis en Nea-Pafos ankoraŭ kelke da tagoj. Johano Marko kunhelpis, kiel li nur povis, sed Barnabas iam kaj iam surprizis lin malĝoja kaj lamentanta; la junulo ne antaŭkalkulis tiom da laboro antaŭ si.

– Sed tiel estas pli bone – akcente diris Paŭlo –; la servado al la bono estas la murego, defendanta kontraŭ la tentoj.

La junulo rezignaciis, tamen lia ĉagreniĝo estis evidenta. Krom tio, fidela observanto de la judismo, malgraŭ sia profunda amo al la Evangelio, la filo de Maria Marko sentis grandajn skrupulojn ĉe la bonvolemo de sia onklo kaj de la alia misiisto koncerne la naciojn. Li ja per tuta koro deziris servi al Jesuo, sed ne povis forigi la Majstron for de la tradicioj de sia lulilo.

Dum la semoj, ĵetitaj en Kipro, ekĝermis en la grundo de la koroj, la laboristoj de la Mesio, enprofundiĝintaj en grandajn esperojn, forlasis Nea-Pafoson.

Multe konversaciinte, Paŭlo kaj Barnabas decidis etendi la mision ĝis la popoloj de Pamfilio, kio forte skandalis Johanon Markon, kiu miris tian decidon.

– Sed kion ni faros kun tiaj strangaj homoj? – kolerete demandis la junulo. – Ni scias, en Jerusalemo, ke tiu lando estas loĝata de ekstreme malkleraj homoj, kaj krom tio, ke en Pamfilio ĉie svarmas rabistoj.

– Tamen – konvinkite konsideris Paŭlo – mi pensas, ke ĝuste pro tio ni devas iri al tiu regiono. Por aliaj

pli grandan intereson povas prezenti iu vojaĝo al Aleksandrio, sed ĉiuj tiaj grandaj kernoj estas plenaj de majstraj parolistoj. Ili posedas gravajn sinagogojn, altajn konojn, elstarajn figurojn en scioj kaj riĉeco. Ili ne servas al Dio nur pro malvolonto aŭ malmoliĝo de la koro. Pamfilio, kontraŭe, estas tre malriĉa, rudimenta, bezonanta spiritan lumon. Antaŭ ol instrui en Jerusalema, la Majstro preferis paroli en Kapernaum kaj aliaj apenaŭ konataj vilaĝoj de Galileo.

Ĉe ĉi tiu nerebatebla argumento Johano sin detenis insisti.

Post nemultaj tagoj per senluksa ŝipo ili venis al Atalia, en kies pejzaĝoj, ĉirkaŭantaj Cestron, Paŭlo kaj Barnabas trovis grandan ĉarmon.

En tiu tre malriĉa loko ili sukcesege predikadis la Bonan-Novajon sub libera ĉielo. Rimarkinte en sia kamarado superan trajton, Barnabas kvazaŭ transdonis la estrecon de la entrepreno al la eksrabeno, kies parolo tiam kapablis vekti plej grandajn raviĝojn. La simpla popolo ricevis la predikadon de Paŭlo kun profunda interesiĝo. Li paroladis pri Jesuo kvazaŭ pri ia ĉiela princo, kiu vizitis la mondon kaj poste reiris en la sferon de la spirita glorado, por tie atendi siajn amatajn regatojn. Vidiĝis la atendo, kiun la loĝantoj de Atalia donis al tiu afero. Iuj petis kopiojn de la instruoj de la Evangelio, aliaj komplezadis la senditojn de la Majstro per ĉio, kion plej bonan ili posedis. Tre kortuŝitaj, ili ricevadis la elkorajn donacojn de siaj novaj amikoj, kio preskaŭ ĉiam estis pladoj da pano, oranĝoj aŭ fiŝo.

La estado en Atalia naskis aliajn problemojn: estis nepre necese ion kuiri. Barnabas delikate difinis sian nevon por tiu tasko, sed la junulo ne sukcesis kaŝi sian malkontentecon. Rimarkinte lian sinĝenadon, Paŭlo komplezeme antaŭiĝis:

– Ni ne faru al ni zorgojn el la naturaj demandoj. Ni de nun penu limigi niajn prinutrajn bezonojn kaj gustojn. Ni manĝos nur panon, fruktojn, mielon kaj fiŝon; tiel, la kuirlaboro estos pli simpla kaj limiĝos je la preparado de rostitaj fiŝoj, pri kio mi estas tre sperta

ekde mia izoligo en Taŭruso. Johano ne turmentiĝu per ĉi tiu demando, ĉar estas juste, ke ĉi tiu parto estu sub mia respondeco.

Malgraŭ tia nobla konduto de Paŭlo la junulo estis ĉiam ankoraŭ malgaja.

La misiistoj baldaŭ luis ŝipon kaj ekveturis al Perga. En ĉi tiu urbo, rilate grava por la regiono, kie ĝi kuŝis, ili predikadis la Evangelion kun grandega sindono. En la malgranda sinagogo ili plenis la sabaton per vigla movado. Kelke da judoj kaj multenombraj nacioj, pleje homoj malriĉaj kaj simplaj, ĝoje akceptis la misiistojn. La sciigoj pri la Kristo vekis fortan scivolon kaj raviĝon. La modesta domo, luita de Barnabas, pleniĝis per homoj, sopirantaj ekhavi kopion de la notoj de Levi. Paŭlo ĝojegis, spertis neesprimeblan ĝojon, rilatante kun tiuj senfamaj kaj simplaj koroj, kiuj faris en lia spirito laca de la kazuistiko la dolĉan impreson de ia spirita virgeco. Iuj demandis pri la rango de Jesuo en la hierarkio de la dioj de la paganismo; aliaj deziris ekscii, kial oni krucumis la Mesion, sen ia konsidero rilate lian altan titolon kiel Sendito de la Eternulo. Tiu regiono svarmis per superstiĉoj kaj kredaĉoj. La juda kulturo ŝtoniĝis interne de la muroj de la sinagogoj. Kvankam plej multe klopodante ĉe la izraelidoj, predikante en la rondoj de tiuj, kiuj sekvis la Leĝon de Moseo, la misiistoj tamen vekis la interesiĝon de la plej malaltaj klasoj de la popolo pro la resanigoj kaj la plena invito de la Evangelio, ĉe kio la laboristoj de Jesuo plej streĉis siajn fortojn.

Plene kontentaj, Paŭlo kaj Barnabas decidis de tie tuj iri al Antioĥia en Pisidio. Informite pri ĉi tio, Johano Marko ne sukcesis pli longe reteni siajn profundajn timojn kaj demandis:

– Mi pensis, ke ni ne iros trans Pamfilion; kial do iri al Antioĥia? Ni ne havas rimedojn, por trairi tiajn grandajn abismojn. La arbaroj svarmas per banditoj, la kaskadoplana rivero ne ebligas veturadon de barkoj. Kaj la noktoj? Kiel dormi? Tian vojaĝon oni ne povas provi sen ĉevaloj kaj servantoj, kion ni ne havas.

Paŭlo konsideris minuton kaj rediris:

– Nu, Johano, laborante por iu, ni devas labori kun amo. Mi opinias, ke anonci la Kriston al tiuj, kiuj lin ne konas pro siaj naturaj malfacilaĵoj, estas por ni gloro. La servemo neniam ŝarĝas aliajn per la plej peniga parto. La Majstro ne transdonis sian krucon al siaj kunuloj. Rilate nin, se ni disponus multe da sklavo kaj ĉevaloj, ĉu ne ili portus la plej pezan respondecon koncerne la propre materiajn demandojn? La afero de Jesuo estas tiel granda en niaj okuloj, ke ni devas konkuradi kontraŭ la ceteraj homoj pri ĉia ajn parto de ĝia plenumado, por nia propra bono.

La junulo aspektis pli afliktita. La energio de Paŭlo lin senaplombigis.

– Sed – li daŭrigis tre pala – ĉu ne estus pli saĝe, se ni irus Aleksandrion kaj aranĝus almenaŭ iajn pli facilajn rimedojn?

Dum Barnabas sekvis la dialogon kun la sereneco propra al li, la eksrabeto daŭrigis:

– Vi atribuas tro grandan gravecon al la kontraŭaĵoj. Ĉu vi jam ekpensis pri la malfacilaĵoj, kiujn la Sinjoro certe superis, por veni al ni? Eĉ se li devus nur libere trapasi la spiritajn abismojn, por veni en nian rondon de perverseco kaj malklereco, ni devas preni en kalkulon la ŝliman muregon de niaj strukturaj mizeraj-on... Kaj vi timiĝas antaŭ iaj kelke da paŝoj da vojo inter ni kaj Pisidio?

La junulo silentiĝis videble ĉagrenita. La argumentado, en liaj okuloj, estis tro forta kaj ebligis al li nenian fluan konteston.

Vespere Barnabas, videble maltrankvila, alproksimiĝis al sia kunulo kaj sciigis lin pri la intencoj de sia nevo. La junulo decidis reveni Jerusalemon por ĉia prezo. Paŭlo flegme aŭdis liajn klarigojn, kiel iu, kiu povis per nenio oponi al tiu decido.

– Ĉu ni ne povus akompani lin almenaŭ ĝis iu loko pli proksima al lia celo? – demandis la ekslevido el Kipro kiel zorgema onklo.

– Celo? – ripetis Paŭlo kun miro. – Ni jam havas nian celon. Ekde nia unua konversacio ni planis la ekskurson al Antioĥia. Mi ne povas malhelpi, ke vi kompaniu al la junulo, sed mi ja ne devas ŝanĝi la deciditan vojiron. Se vi decidis reveni, mi iros pluen sola. Mi pensas, ke la entreprenoj de Jesuo havas sian ĝustan momenton de plenumado, kaj ni devas ĝin profiti. Se ni prokrastos la viziton en Pisidio ĝis la venonta monato, eble estos tro malfrue.

Barnabas konsideris kelke da minutoj kaj emfaze rediris:

– Via rimarko estas nekontestebla. Mi ne povas rompi la devoligilojn. Krom tio Johano estas jam matura homo kaj povos reveni sola. Dank'al la patrina zorgado li havas la monon necesan por tio.

– Kiam ne bone uzata – trankvile finis Paŭlo –, la mono ĉiam detruas la ligilojn kaj la plej sanktajn devojn.

La konversacio finiĝis kaj Barnabas denove ekdonis konsilojn al sia nevo, forte impresita de la kuraĝo de Paŭlo.

Post du tagoj, antaŭ ol iri en la ŝipon, kiu lin kondukos al la enfluejo de Cestro, la filo de Maria Marko kun ĝenateca rideto adiaŭis la jerusaleman eksleĝiston.

Paŭlo lin senĝoje brakumis kaj diris per tono de serena averto:

– Dio vin benu kaj protektu. Ne forgesu, ke ankaŭ la irado al la Kristo estas farata laŭ vicoj. Ni ĉiuj devas alveni bone; tiuj, kiuj devojiĝas, devas alveni bone je sia propra konto.

– Jes – diris la junulo plena de honto –, mi penas labori kaj servadi al Dio per mia tuta animo.

– Vi agos bone kaj plenumos vian devon, tiel konfutante – akcente diris la eksrabeno. – Ĉiam memoru, ke, dum li havis ian okupon, David estis fidela al la Ĉiopova, sed, kiam li ekripozis, li sin fordonis al adultado; Salomono, dum la pezaj laboroj de la konstruado de la Templo, portis puran fidon, sed, kiam li ekripozis, li estis venkita de la malĉastado; Judas komencis bone kaj

estis rekta disĉiplo de la Sinjoro, sed sufiĉis la impresoj el la triumfa eniro de la Majstro en Jerusalemon por tio, ke li cedis al la perfido kaj morto. Ĉe tiom da ekzemploj antaŭ niaj okuloj, estas utile, ke ni neniam ripozu.

La nevo de Barnabas foriris, sincere tuŝita de ĉi tiuj vortoj, kiuj de tiam lin ĉiam akompanadis kiel konstanta alvoko.

Tuj poste la du misiistoj direktis sin al la apenaŭ ireblaj vojoj. Je la unua fojo ili devis tranokti elmetitaj al la roso, en la sino de la Naturo. Venkinte krutaĵojn, ili trovis kavernon, kie ili sin kaŝis, por ripozigi la muelitan kaj dolorantan korpon. La dua tago de ilia marŝado fluis kun la ĉiam sama nerompebla braveco. La nutrado konsistis el kelke da panoj, kunportitaj el Perga, kaj sovaĝaj fruktoj, ĉi tie kaj tie ŝiritaj. Decidemaj kaj bonhumoraj, ili alfrontis kaj superis ĉiajn kontraŭaĵojn. Ie kaj ie ili devis transiri la riveron tie, kie ili renkontis ne transpaseblajn barojn; ili tiam singarde palpatis la fluejon de la torentoj per longaj verdaj vergoj aŭ traesploradis danĝerajn nekonatajn vojojn.

La soluleco inspiris al ili belajn pensojn. Sankta optimismo elvidiĝis el iliaj eĉ plej malgravaj diraĵoj. Ili ambaŭ karesadis dolĉajn memorojn pri la pasinteco plena de amo kaj esperoj. Kiel homoj, ili travivis ĉiajn homajn bezonojn, sed profunde kortuŝanta estis la fideco, kun kiu ili sin fordonis al la Kristo, konfidante al lia amo la plenumon de la sanktaj deziroj al pli alta vivo.

En la dua vespero ili enlokiĝis en kaverneton iom malproksiman de la mallarĝa vojo, tuj post la lastaj koloroj de la krepusko. Post tre simpla manĝeto ili vigle ektensis konsiderojn pri la faroj de la jerusalema eklezio. Estis jam profunda nokto, tamen iliaj voĉoj ankoraŭ rompatis la grandan silenton. Elvolvante la temojn, ili ekparolis pri la altegaj flankoj de la Evangelio, laŭdegante la grandecon de la misio de Jesuo Kristo.

– Se la homoj scius... – diris Barnabas, farante komparojn.

– Ili ĉiuj kolektiĝus ĉirkaŭ la Sinjoro kaj ripozus – kompletigis Paŭlo plena de konvinko.

– Li estas la Princo, kiu regos super ĉiuj.

– Neniu iam portis al ĉi tiu mondo pli grandan riĉaĵon.

– Ha! – konsideris la disĉiplo de Simon Petro –, la trezoro, kiun li alportis, riĉigos la Teron por ĉiam.

Kaj tiel ili konversaciadis, uzante belajn figurojn el la ordinara vivo, por bildigi la eternajn bonaĵojn, kaj jen stranga brueto vekis ilian atenton. Ĉe la lumeto de torĉo, kie brulis rezinoj, du armitaj viroj sin ĵetis kontraŭ ilin.

– La monujon! – ekkriis unu el la rabistoj.

Barnabas iomete paliĝis, sed Paŭlo estis flegma kaj trankvila.

– Donu ĉion, kion vi havas, aŭ vi mortos! – ekkriis la dua rabisto, levante ponardon.

Fikse rigardante sian kamaradon, la eksrabeno ordonis:

– Donu al ili la restantan monon; Dio alie kontentigos niajn bezonojn.

Barnabas elŝutis ĝian enhavaĵon el la monujo, kiun li kunportis inter la faldoj de la tuniko, kaj la banditoj avide ekprenis la malgrandan sumon.

Rimarkinte la pergamenfoliojn de la Evangelio, kiujn la misiistoj legadis en la lumo de la improvizita torĉo, unu el la rabistoj suspektoplene kaj ironie demandis:

– Kio estas tiuj dokumentoj? Vi paroladis pri ia riĉega princo... Ni aŭdis pri ia trezoro... Kion ĉio tio signifas?

Kun mirinda spiritoĉeesto Paŭlo klarigis:

– Ho, jes, ĉi tiuj dokumentoj estas efektive la gvidilo de la riĉega trezoro, al ni alportita de la Kristo Jesuo, kiu ja regos super la estroj de la Tero.

Unu el la banditoj, treege interese, ekstrarigardis la rulaĵon kun la notoj de Levi.

– Kiu trovos tiun trezoron – decideme daŭrigis Paŭlo –, tiu neniam plu havos iajn bezonojn.

La rabistoj zorge konservis ĉe si la Evangelion.

– Danku Dion, ke ni ne forprenas de vi la vivon – diris unu el ili.

Kaj estinginte la tremlumetantan torĉon, ili malaperis en la noktan mallumon. Kiam la misiistoj estis solaj, Barnabas ne sukcesis kaŝi sian perpleksecon.

– Kaj nun? – li demandis kun tremanta voĉo.

– La misio iras ankoraŭ bone – respondis Paŭlo plena de kuraĝo. – Ni ne antaŭvidis la bonegan okazon, por konigi la Bonan-Novajon al tiuj rabistoj.

Mirante tian grandan serenecon, la disĉiplo de Petro rediris:

– Sed ili forprenis de ni ankaŭ la lastajn hordeopanojn kaj krome la mantelojn...

– Ni tamen trovos ian frukton survoje – decideme diris Paŭlo –, kaj rilate la mantelojn, ni ne afliktiĝu, ĉar ne mankos la musko de la arboj.

Kaj dezirante trankviligi sian kunulon, li aldonis:

– Efektive, ni jam havas neniom da mono, sed mi pensas, ke ne estos malfacile ricevi laboron ĉe la tapiŝistoj el Antioĥia en Pisidio. Krom tio, la regiono kuŝas tre malproksime de la grandaj civilizaj kernoj, kaj mi povas havigi iajn novaĵojn al miaj sammetianoj. Ĉi tiu cirkonstanco estos utila por ni.

Ŝpininte novajn esperojn, ili ekdormis sub libera ĉielo, revante pri la ĝojoj de la Regno de Dio.

En la morgaŭa tago Barnabas estis ankoraŭ maltrankvila. Demandite de sia amiko, li korprenate konfesis:

– Mi rezignacias pri la absoluta foresto de materiaj rimedoj, sed mi ne povas forgesi, ke ili forprenis de ni la evangeliajn notojn, kiujn ni posedis. Kiel ni rekomencu nian taskon? Grandan parton el la instruoj ni tenas parkere, tamen ne ĉiujn esprimojn ni povas kontroli...

Paŭlo faris signifoplenan geston kaj, malbutonante la tunikon, elprenis ion, kion li konservadis ĉe la koro.

– Vi eraras, Barnabas – li diris kun bonhumora rideto –, mi havas ĉi tie tiun Evangelion, kiu rememorigas al mi la bonkorecon de Gamaliel. Tio estis donaco

de Simon Petro al mia maljuna mentoro, kiu siavice ĝin donis al mi nelonge antaŭ ol morti.

La misiisto el Kipro kunpremis en la manoj tiun terzonon de la Kristo. La ĝojo denove ekprilumis lian koron. Ili povis ne havi ĉiajn bonaĵojn de la mondo, sed la parolo de Jesuo estis nepre necesa. Venkinte ĉiaspecajn barojn, ili venis Antioĥian treege malvigligintaj. Precipe Paŭlo, ĉe iuj momentoj en la nokto, sentis sin laca kaj febranta. Barnabas suferis oftajn tusataĵojn. La unua kontakto kun la kruda Naturo kaŭzis al la du anoncantoj de la Evangelio fortan organan perturbon.

Malgraŭ sia kaduka farto la teksisto el Tarso tuj en la mateno, kiam ili alvenis, penis informiĝi pri la ledajometiejoj, ekzistantaj en tiu urbo.

Antioĥian en Pisidio loĝis granda nombro da izraelidoj. Ĝia komerca movado estis vigla. La stratoj havis bone provizitajn butikojn kaj malgrandajn metiejojn por diversaspecaj industriaĵoj.

Fidante la Dian Providencon, ili luis tre modestan ĉambron, kaj dum Barnabas ripozis de la ekstrema lacedo, Paŭlo iris al unu el la laborejoj, indikitaj de frukto-komercisto.

Bonaspekta judo, kune kun tri helpantoj, meze en grandnombraj bretoj kun sandaloj, tapiŝoj kaj aliaj multaj uzaĵoj, koncernantaj lian metion, direktis gravan negocojn. Sciante ties nomon, pro la interesiĝo, kiun li montris, parolante al la dirita komercisto, la eksleĝisto el Jerusalemo demandis pri sinjoro Ibrahim kaj estis akceptita kun granda scivolo.

– Amiko – klarigis Paŭlo sen ĉirkaŭfrazoj –, mi estas via metia kolego, kaj, premata de urĝaj bezonoj, mi venis, por peti de vi la grandgan komplezon dungi min en vian laborejon. Mi devas fari longan vojaĝon, kaj, havante neniom da mono, mi turnas min al via grandanimeco, esperante vian konsenton.

La tapiŝisto rigardadis lin simpatie, sed iom suspektante. Samtempe lin mirigis kaj al li plaĉis la sincereco kaj senĝeneco de la vizitanto. Konsiderinte kelkan tempon, li iom malprecize rediris:

– Nia laboro estas tre malmulta, kaj, sincere parolante, mi ne disponas sufiĉe da kapitalo, por pagi multe da metiistoj. Ne ĉiuj homoj aĉetas sandalojn; la jungilaroj longe kuŝas en atendo de karavanoj, kiuj nur iam kaj iam haltas ĉi tie; malmulte da tapiŝoj ni vendas, kaj se ne estus la ledoplektaĵoj por improvizitaj tendoj, mi pensas, ke ni ne havus tion necesan, por tenadi la negocon. Kiel vi vidas, ne estus facile havigi al vi laboron.

– Tamen – rediris la eksrabeno, kortuŝita de la sincereco de sia dialoganto – mi kuraĝas insisti pri mia peto. Tio estus por nur iaj kelke da tagoj... Krom tio mi kontentiĝus laborante interŝanĝe kontraŭ pano kaj loĝejo por mi kaj por malsana kamarado.

La bonkora Ibrahim kortuŝiĝis ĉe ĉi tiu konfeso. Post longa paŭzo, dum kiu la tapiŝisto de Antioĥia ankoraŭ ŝanceliĝis inter “jes” kaj “ne”, Paŭlo fine diris:

– Tiel granda estas mia bezono, ke mi insistas ĉe vi, en la nomo de Dio.

– Envenu – diris la negocisto, venkita de lia argumentado.

Kvankam malsana, la sendito de la Kristo plej fervore alfalis al laborado. Malnova teksilo estis rapide instalita apud stablo, kovrita per tranĉiloj, marteloj kaj ledaĵoj.

Paŭlo eklaboris, ĉiam kun amika rigardo kaj afabla parolo al ĉiu kamarado. Anstataŭ imponi al ili pro sia kompetenteco, li observadis la labormanieron de la helpantoj de Ibraim kaj bonkore, senafekte sugestis rimedojn, kiuj utilis al la laboro.

Tuŝite de liaj sinceraj konfesoj, la metiejstro sendis manĝon al Barnabas. La eksrabeno brile superis la unuajn malfacilaĵojn, spertante la ĝojon de granda venko.

En tiu vespero, kune kun sia kamarado li adresis al Jesuo preĝon el plej profunda danko. Ili paroladis pri sia nova situacio: ĉio iras bone, tamen estas necese pensi pri la mono, per kiu ili pagu por la luado de la ĉambro.

Edifite de la ekzempla konduto de sia amiko, nun Barnabas penis lin kuraĝigi:

– Ne grave, Jesuo prenos en kalkulon nian bonvolon, li ne lasos nin senhelpe.

En la sekvanta tago, kiam Paŭlo revenis de la metiejo, li devis iom maltrankvile atendadi sian kunulon. La servanto de Ibrahim, kiu portis al Barnabas lian manĝon, tiun ne trovis. Post kelka afliktiĝo la eksrabeno treege surprizite malfermis al li la pordon. La disĉiplo de Petro aspektis ekstreme senfortiĝinta, sed grandega ĝojo travidiĝis tra lia rigardo. Barnabas klarigis, ke ankaŭ li aranĝis al si enspezigan laboron: li sin dungigis ĉe argilafisto, kiu bezonis laboristojn, por profiti la favoran veteron. Ili kortuŝite brakumis unu la duan. Se ili estus atingintaj la regadon de la mondo, per senpena riĉeco, ili ne tiel kore ĝojus. Honesta servo, eĉ plej modesta, sufiĉis al iliaj koroj, prilumitaj de Jesuo Kristo.

En la unua sabato de ilia estado en Antioĥia la heroldoj de la Evangelio iris al la tiea sinagogo. Tre kontenta de la kunlaborado de sia nova dungito, Ibrahim donacis al li du ne novajn tunikojn, kiujn Paŭlo kaj Barnabas ĝoje surmetis.

Ĉiuj homoj, “kiuj timis Dion”, kunepremiĝis en la salono. La du misiistoj sidiĝis sur la loko, rezervita al vizitantoj aŭ nekonatoj. Post la legado kaj komentariado de la Leĝo kaj la Profetoj, la direktanto de la religiaj servoj laŭte demandis ilin, ĉu ili deziras diri kelke da vortoj al la ĉeestantoj.

Paŭlo tuj stariĝis kaj akceptis la inviton. Kun nobla sintenado li direktis sin al la modesta tribuno kaj kun alta elokventeco ekparoladis pri la Leĝo. La aŭdantaro, ne kutiminta al tiel pompa stilo, sekvadis lian fluantan parolon, kvazaŭ ili ektrovis veran profeton, kiu dissemas mirindaĵojn. La izraelidoj ĝojegis. Kiu estas tiu viro, pri kiu povus fieri eĉ la jerusalema Templo mem? Sed ĉe umu momento la parolo de la oratoro fariĝis apenaŭ komprenebla por ĉiuj. Lia superega parolo anoncis ian Mesion, jam venintan al la mondo. Kelkaj el la judoj streĉis la orelojn. Tiu estis la Kristo Jesuo, per kiu la homoj devas esperi la gracon kaj la veron de la saviĝo. La eksleĝisto rimarkis, ke multaj el tiuj mienoj

montras malkontenton, sed la plej multaj ĉeestantoj lin aŭskultadis kun neesprimebla vibrado de simpatio. La raporto pri la faroj de Jesuo, lia dia ekzemplado, lia morto sur kruco elŝiradis larmojn el la aŭdantaro. La sinagogestro mem estis absolute konfuzita...

Post tiu longa parolado la nova misiisto estis brakumita de granda nombro da ĉeestantoj. Ibrahim, kiu ĵus ekkonis tiun lian aspekton, lin ĝojege gratulis. Eŭstako, tiu argilajisto, kiu dungis Barnabason, tre emociite alproksimiĝis, por lin komplimenti. Tamen malkontentuloj ne mankis; la sukceso de Paŭlo pikis la farisean spiriton de kelkaj.

La morgaŭan tagon Antiohia en Pisidio estis posedita de la afero. La metiejoj de Ibrahim kaj de Eŭstako fariĝis lokoj por grandaj diskutoj kaj babiladoj. Paŭlo tiam parolis pri la resanigoj, kiujn oni povas fari en la nomo de la Majstro. Maljuna onklino de lia mastro liberiĝis el longedaŭra malsano per nura surmeto de manoj kaj preĝoj al la Kristo. Du infanetoj de la argilajisto resaniĝis per la helpo de Barnabas. La du misiistoj de la Evangelio tuj ricevis tre bonan reputacion. La bono kreskis, sed kreskis ankaŭ kontraŭ ili la malamikemo de tiuj, pli alte sidantaj en la urbo. Komenciĝis movado kontraŭ la Kristo. Malgraŭ la kontinueco de la predikoj de Paŭlo, ĉe la potencaj izraelidoj grandiĝis la persekutoj, la moko kaj la ironioj. Tamen la senditoj de la Bona-Novaĵo ne senkuraĝiĝis. Subtenataj de tiuj plej sinceraj, ili fondis eklezion en la domo de Ibrahim. Kiam ĉio iris bone, jen la eksrabeno, ankoraŭ dank'al la penigaj travivaĵoj dum la trairado de la marĉoj de Pamfilio, serioze malsaniĝis, maltrankviligante ĉiuj fratojn. Dum tuta monato li troviĝis sub la pereiga potenco de konsumanta febzo. Barnabas kaj la novaj amikoj estis nesupereble zorgemaj en lia flegado.

Ekspluatante ĉi tiun incidenton, la malamikoj de la Evangelio komencis agitadon, superjetante per ironiado la situacion. Ce pli ol tri monatoj la du misiistoj anoncadis la novan Regnon, reformadis la religiajn ideojn de la popolo, resanigadis la plej necedamajn malsanojn, sed

kial la potenca predikisto sin mem ne resanigis? Svarmis tial la mordantaj dirajoj kaj la malhonorigaj opinioj.

Sed la kunfratoj estis senlime sindonaj. Paŭlo estis flegata plej ame en la hejmo de Ibrahim, kvazaŭ tiu estis por li nova hejmo.

Resaniĝinte, la brava teksisto pli entuziasme rekomencis la predikadon de la nova veraĵoj.

Rimarkante lian kuraĝon, la judoj, bolante de ĵaluzo, faris koluzion, por lin senindulge elpeli el la urbo. Dum pluraj monatoj la eksleĝisto el Jerusalemo bataladis kontraŭ la frapoj de la fariseismo, reganta en la urbo, ĉiam superstarante kalumniojn kaj insultojn. Sed kiam li elmontradis sian decidemon kaj animfirmecon, tiam la malkontentaj izraelidoj minacadis Ibrahimon kaj Eŭstakon per forigo de privilegioj kaj ekzilo. La du malnovaj loĝantoj de Antiohia en Pisidio estis akuzitaj kiel simpatiantoj de la revolucio kaj malordo. Tre emociite, ili ricevis la formalan komunikon, ke nur la foriro de Paŭlo kaj Barnabas povos evitigi al ili, malnovaj loĝantoj, enkarcerigon kaj skurĝadon.

La misiistoj de Jesuo ekpripensis pri la malfacila situacio de siaj amikoj kaj decidis foriri. Al Ibrahim staris larmoj en la okuloj; Eŭstako ne sukcesis kaŝi sian konsternitecon. Ĉe la demandoj de Barnabas, la eksrabeno elvolvis la planon de iliaj estontaj laboroj. Ili iros al Ikonio, kaj tie predikos la veraĵojn de Dio. La disĉiplo de Simon Petro tion senhezite aprobis. Kolektinte siajn fratojn en unu vespero memorinda por ĉiuj, kiuj travivis ĝiajn profundajn emociojn, la kurieroj de la Bona-Novaĵo ilin adiaŭis. Dum pli ol ok monatoj ili tie instruadis la Evangelion, alfrontis ridindigojn kaj sarkasmojn, spertis tre amarajn elprovojn. Iliajn laborojn la mondo nun premiis per elpelo, kvazaŭ ili estus iaj ordinaraj krimuloj; tamen la eklezio de la Kristo estis ja fondita. Paŭlo parolis pri tio iom fiere, malgraŭ la larmoj, ruliĝantaj el liaj okuloj. La novaj disĉiploj ne miru la nekomprenemon de la mondo, des pli ĉar la Savinto mem ne evitis la malhonorigan krucon, kaj li aldonis, ke la vorto “kristano” signifas “sekvanton de la Kristo”.

Por eltrovi kaj ekkoni la superbelaĵojn de la Regno de Dio, oni devas senripoze labori kaj suferi.

Siaflanke la amika ĉeestantaro kun larmoj ricevis liajn admonojn.

En la morgaŭa mateno, kun letero de rekomendo de Eŭstako kaj granda kvanto da memorajetoj de siaj samkredanoj, ili sentimaj kaj feliĉaj ekvojiris.

La irado, en distanco pli ol cent kilometrojn longa, estis malfacila, sed la pioniroj ne retenis sin ĉe la konsiderado de ia ajn baro.

Veninte en la urbon, ili prezentis sin al tiu amiko de Eŭstako, kun la nomo Onesiforo. Tie ili estis akceptitaj kun elkora gastamo kaj en la tuj sekvanta sabato, eĉ antaŭ ol komenci siajn profesiajn laborojn, Paŭlo iris al la sinagogo, por sciigi la celon de sia vizitado en la regiono. Lia unua parolado en la sinagogo naskis flaman diskutadon. La politika sfero de la urbo konsistis el judoj riĉaj kaj kompetentaj en la Leĝo de Moseo; la meza klaso estis grandnombre el nacioj. Ĉi tiuj lastaj ricevis la parolon de Paŭlo kun profunda interesiĝo, sed la unuaj tuj de la komenco eksplodis per furioza reago. Okazis tumultoj. La arogantaj idoj de Izrael ne povis toleri ian Savinton, kiu senreziste sin foroferis al la kruco, destinita por la rabistoj. Tamen la parolo de la Apostolo trovis tiel grandan favoron ĉe la popolo, ke la nacioj de Ikonio disponigis al li vastan salonon, por ke ĉiun vesperon ili ricevu la evangelian instruadon. Ili volis informojn pri la nova Mesio, interesiĝis pri ĉiuj liaj faroj, eĉ plej malgrandaj, kaj pri liaj eĉ plej simplaj sentencoj. La eksrabeno, plena de danko kaj simpatio, akceptis tiun taskon. Ĉiutage, post la ordinara laboro, densa amaso da ikonianoj kolektiĝis, avidante lian vibrantan parolon. Mastrante la administradon, la judoj baldaŭ reagis, sed estis senutile provi timigi la predikanton per la plej teruraj minacoj: li predikadis pli kuraĝe, spite ĉion. Siaflanke Onesiforo subtenis lin, kaj baldaŭ estis fondita la eklezio en lia domo mem.

La izraelidoj ne ĉesis nutri la intencon elpeli la misiistojn, kaj jen iu okazaĵo venis helpe al ili.

Ĝi estis tio, ke iu fianĉinigita junulino, okaze aŭdante la predikojn de la apostolo, ĉiutage eniradis en la salonon, strebante al novaj instruoj. Ravite de la promesoj de la Kristo kaj sentante grandegan pasion por la ensorĉanta persono de la parolanto, ŝi bedaŭrinde forlogiĝis, forgesinte la devojn, kiuj ŝin ligis al ŝia fianĉo kaj al la patrina amo. Tekla – kiel ŝi estis nomata – jam ne observis la sanktajn ligilojn, kiujn ŝi devis honorati en la hejmo. Ŝi forlasis la tagan laboron kaj sopire atendadis la krepuskon. Teoklia, ŝia patrino, kaj Tami-ris, ŝia fianĉo, malagrabla frapitaj, observadis la aferon. Tian senprudentiĝon ili imputis al Paŭlo. Siaflanke la eksleĝisto trovis stranga tian konduton de la junulino, kiu ĉiutage enŝoviĝis per signifoplenaj demandoj, rigardoj kaj afektaĵoj.

Foje, kiam Paŭlo estis revenonta al la domo de Onesiforo kune kun Barnabas, la junulino petis lin pri intima parolo.

Ĉe liaj respektaj demandoj Tekla ruĝiĝis kaj balbutis:

– Mi... mi...

– Diru, infano – iom zorgoplene diris la Apostolo –, vi imagu al vi, ke vi staras antaŭ patro.

– Sinjoro – ŝi sukcesis diri, anhelante –, mi ne scias kial, mi estas forte impresita de via parolo.

– Kion mi instruas – klarigis Paŭlo –, tio ne estas mia; ĝi venas de Jesuo, kiu deziras al ni ĉion bonan.

– Kiel ajn ĝi estas – ŝi pli timoplene diris –, mi vin tre amas!

Paŭlo ektimiĝis; li ne antaŭkalkulis tian amdeklaron. La esprimo “mi vin tre amas” ne estis dirita per tono de pura frateco, sed per ia tendenca nuanco, kiun la Apostolo sub forta impreso rimarkis. Longe meditante pri tia neantaŭvidita situacio, li akcente rediris:

– Infano, tiuj homoj, kiuj sin reciproke amas spirite, unuiĝas en la Kristo por la eterneco de la plej sanktaj emocioj; nu, kiu scias, vi ja amas la mortontan karnon?

– Mi bezonas vian amon – diris la junulino, rigardante lin kun larmoj.

– Jes – diris la eksrabeno –, sed ni ambaŭ bezonas la amon de la Kristo. Nur apogite al li, ni povas havi kuraĝon meze en niaj malfortajoj.

– Mi vin ne povos forgesi – singulte diris la junulino, vekante en li kompaton.

Paŭlo enpensiĝis. Li rememoris sian junecon, la verojn, kiujn li teksis kune kun Abigail. En minuto lia spirito esploris tutan mondon da dolĉaj kaj sopiraj rememoroj; kaj kvazaŭ reveninte de ia mistera lando el ombroj, li diris, kvazaŭ al si mem:

– Vere, amo estas sankta, sed pasio estas venena. Moseo rekomendis, ke ni amu Dion super ĉio, kaj la Majstro aldiris, ke ni amu unu alian en ĉiaj cirkonstancoj de la vivo...

Kaj fiksante la okulojn, nun tre brilajn, sur la ploranta junulino, li iom acide diris:

– Ne enamiĝu en viron, faritan el koto kaj peko, kaj destinitan por morto!

Kiam Tekla ankoraŭ ne revenis al si de sia propra miro, ŝia fianĉo, konsternita, eniris en tiun apartan ĉambron. Tamiris brue elkriis siajn unuajn protestojn, sed la sendito de la Bona-Novaĵo tre serene aŭdis liajn riproĉojn. Lia fianĉino malbonhumore kontraŭparolis al li, konfirmis sian simpation por Paŭlo, malkaŝe konigis siajn plej intimajn intencojn. La junulo skandaligis. La Apostolo pacience atendis, ĝis la fianĉo lin demandos. Kaj kiam vokita al sinpravigo, li per frata tono klarigis:

– Amiko, ne afliktiĝu kaj ne flamiĝu ĉe okazaĵoj, naskitaj de profunda miskompreno. Via fianĉino estas simple malsana. Ni anoncadas la Kriston, sed la Savinto havas malamikojn, ĉie kaŝitajn, egale kiel la lumo havas kiel malamikon la konstantan mallumon; sed la lumo venkas ĉian mallumon. Sen grandaj kontraŭaĵoj ni komencas nian misian laboron en ĉi tiu urbo. La judoj nin ridindigas, sed ili tamen trovis en niaj agoj nenion, kio pravigus ilian malkaŝan persekutadon. La nacianoj nin ame brakumas. Nia penado pace disvolv-

iĝas, kaj nenio nin senkuraĝigas. La nevideblaj antagonistoj de vero kaj bono certe ekpensis influĵi ĉi tiun kompatindan infanon, por fari ŝin ia ilo, malordiganta nian taskon. Kredeble vi ne tuj min komprenos, tamen la realaĵo alia ja ne estas.

Tamen, vidigante, ke li mem suferas tiun saman malican influon, Tamiris kolere blekis:

– Vi estas ia fia sorĉisto, jen la vero! Mistifikanto de la stulta kaj malklera popolo, deloganto de impresiĝemaj junulinoj! Vi insultas vidvinon kaj honestan viron, kia mi estas, enŝoviĝante en la malfortan spiriton de pripatra orfino.

Li ŝaŭmis de kolero. Paŭlo aŭdadis liajn akuzojn kun granda flegmo.

Kiam la junulo ĝislace rabiis, la Apostolo ekprenis sian mantelon, faris adiaŭan geston kaj emfaze diris:

– Kiam ni estas sincerajn, ni ĝuas neskueblan trankvilecon. Ĉiu akceptas la veron, kiel li nur povas. Pensu do kaj komprenu tiel, kiel vi kapablas.

Kaj li forlasis tiun lokon, por iri al Barnabas.

Sed la parencoj de Tekla ne restis senagaj ĉe tio, kion ili rigardis kiel malhonorigon. En tiu sama vespero, uzante ĉi tiun pretekston, la judaj aŭtoritatuloj de Ikonio ordonis aresti la senditon de la Bona-Novaĵo. Vico da malkontentuloj alsvarmis al la perdo de Onesiforo, vomante plej vundajn insultojn. Malgraŭ la interhelpo de la amikoj Paŭlo estis ĵetita en karceron, kie li suferis la torturon de la tridek naŭ batoj. Li estis akuzita kiel deloginto de koroj kaj blasfemanto kaj revoluciulo, kaj tial estis necesa granda sindono de liaj ĵus konvertitaj kunfratoj, por reĝuigi al li la liberecon.

Post kvin tagoj da mallibereco ĉe severaj punoj, li revenis hejmen, kie li estis ĝoje akceptita de Barnabas.

La afero de Tekla ricevis amplekson de granda skandalo, sed la Apostolo, en la unua vespero post sia liberigo, kunvenigis la doman eklezion, kiun li fondis kune kun Onesiforo, kaj klarigis la situacion por plena informiĝo de ĉiuj.

Barnabas opiniis, ke ili ne pli longe povos tie restadi: ankoraŭ unu malpaco kun la aŭtoritatuloj kredeble malutilos ilian mision. Tamen Paŭlo montriĝis forte decidema; se necese, li nun predikos la Evangelion sur la stratoj, konigante la veron al la nacioj, ĉar la izraelidoj plezuris en kriantaj deflankiĝoj.

Pridemandite, Onesiforo konsideris la situacion de tiu malfeliĉa junulino, fariĝinta objekto de la popola ironiado. Tekla estis fianĉino kaj pripatra orfino. Tamiris kreis la fabelon, ke Paŭlo estas simple ia potenca sorĉisto. Se, kiel fianĉino, ŝi estos denove renkontita en akompano de la Apostolo, la tradicio preskribis, ke ŝi estu kondamnita al ŝtiparumo.

Eksciinte la superstiĉojn de tiu regiono, la eksrabeno eĉ minuton ne hezitis: li forlasos Ikonion en la morgaŭa tago, ne tial, ke li kapitulacas antaŭ la nevidebla malamiko, sed tial, ĉar la eklezio estas jam fondita kaj ne juste estas kunhelpi por la morala torturo de iu infano.

La decido de la Apostolo meritis la aprobon de ĉiuj. Oni metis la fundamentojn por la daŭrigo de la evangelia lernado. Onesiforo kaj la ceteraj fratoj prenis sur sin la devon zorgi pri la semoj, ricevitaj kiel ĉiela donaco.

Dum la konversacioj Barnabas dronis en pensoj. Kien ili iru? Ĉu ne estas praviginde pensi pri reveno? La malfacilaĵoj kreskadis de tago al tago kaj la farto de ambaŭ, de kiam ili troviĝis apud Cestro, forte ŝanĝiĝis. Tamen la disĉiplo de Petro, konante la bravecon kaj decidemon de sia kunulo, paciencie atendis, ĝis la temo spontanee kaj nature elaperos.

Helpe al liaj zorgoj, unu el la ĉeestantaj amikoj vivece demandis Paŭlon:

– Kiam vi ambaŭ intencas foriri?

– Morgaŭ – respondis la Apostolo.

– Sed, ĉu ne estus pli bone ripozi kelke da tagoj?

Viaj manoj estas ŝvelintaj kaj via vizaĝo estas vundita de la skurĝoj.

La eksleĝisto ridetis kaj bonhumore rediris:

– La afero estas ne nia, sed de Jesuo. Se ni tro zorgos pri ni mem, koncerne suferojn, tiam ni ne el-

faros nian taskon; kaj se ni haltos ĉe malfacilaj pasaĝoj, tiam ni restos ĉe la baroj, sed ne ĉe la Kristo.

Liaj spritaj kaj konkludigaj argumentoj kreis atmosferon de bonhumoro.

– Ĉu vi reiros Antioĥian? – interesite demandis Onesiforo.

Barnabas akriĝis la orelojn, por detale ekscii la respondon, dum lia kamarado respondis:

– Certe ne: Antioĥia jam ricevis la elaĉetan Boman-Novaĵon. Kaj Likaonio?

Nun rigardante al la ekslevido el Kipro, kvazaŭ petante lian aprobon, li akcente diris:

– Ni iros antaŭen. Ĉu vi ne konsentas, Barnabas? La popoloj de tiu regiono bezonas la Evangelion. Se ni tiel ĝojas ĉe la sciigoj de la Kristo, kial do ilin rifuzi al tiuj, kiuj bezonas la bapton de la vero kaj de la nova kredo?

Lia kunulo faris jesan signon kaj plena de rezignacio konsentis, dirante:

– Sendube. Ni iros antaŭen; Jesuo al ni helpos.

Kaj la ĉeestantoj komencis studi la situacion de Listra kaj ankaŭ la interesajn morojn de ĝia simplanima loĝantaro. Onesiforo tie havis fratinton vidvinon, kun la nomo Lojda. Li donos al la misiistoj leteron de rekomendo; ili estos gastoj de lia fratino tiel longe, kiel ili bezonos tie restadi.

La du anoncantoj de la Evangelio ĝojegis. Precipe Barnabas preskaŭ krevis de ĝojo, formetante la nigran penson, ke ili eble estus tute solaj en tiu urbo.

En la sekvanta tago, sub kortuŝantaj adiaŭdiroj, la misiistoj ekprenis la vojon, laŭ kiu ili sin direktis al sia nova batalo.

Post tre peniga vojaĝo ili venis al Listra en grizeta krepusko. Ili estis lacekonsumitaj.

La fratino de Onesiforo malavaris al ili ĝentilaĵojn. Lojda estis maljuna vidvino de bonstata greko kaj loĝis kune kun sia filino Eŭnike, ankaŭ vidva, kaj sia nepo Timoteo, kies inteligenteco kaj noblaj sentoj estis la plej granda ĉarmaĵo de ambaŭ sinjorinoj. La senditoj de la

Bona-Novaĵo estis akceptitaj en tiun hejmon kun evidentaj almonroj de simpatio. La nesuperebla koreco de tiu familio estis konsola balzamo por ili ambaŭ. Laŭ sia kutimo, Paŭlo ĉe la unua oportuna okazo parolis pri sia grandega deziro labori dum sia estado en Listra, por ne fariĝi objekto de klaĉado aŭ kritiko, sed la domestrino formale kontraŭstaris al tio. Ili estas ŝiaj gastoj. La sola rekomendo de Onesiforo ilin trankviligu. Krom tio, ŝi klarigis: Listra estas tre malriĉa urbo, havas nur du sensignifajn metiejojn, kie oni neniam faras tapiŝojn.

Paŭlo estis tre kortuŝita de tiu frata gastigo. En tiu sama vespero, kiam ili alvenis, li observis, kiel karese Timoteo, aĝanta nemulte pli ol dek tri jarojn, ekprenis la pergamenrulaĵojn de la Leĝo de Moseo kaj la Sanktajn Skribojn de la Profetoj. La Apostolo lasis, ke la du sinjorinoj komentariu tiujn revelaciojn kune kun la knabo, ĝis li estos invitita partopreni en ilia konversacio. Kiam tio fariĝis, li uzis la okazon, por unuafoje prezenti la Kriston al la ravita koro de la aŭdantaro. Tuj kiam li ekparolis, li rimarkis la profundan impreson de la du sinjorinoj, kies okuloj brilis de emocio, kaj la malgranda Timoteo aŭskultadis lin kun tiaj elmonroj de interesiĝo, ke li ofte karesis ties enpensiĝan kapon.

La parencoj de Onesiforo ĝojege ricevis la Bonan-Novaĵon. En la morgaŭa tago ĉiuj en tiu domo parolis pri nenio alia. La junuleto faris ĉiaspecajn demandojn, kaj la Apostolo lin kontentigis kun frataj ĝojo kaj intereso.

Dum tri tagoj la misiistoj dolĉe ripozigis siajn fizikajn fortojn. Paŭlo uzis la okazon, por vaste konversacii kun Timoteo apud la granda stalo, kien la kaproj enkollektiĝis.

Nur en la plej proksima sabato ili ekpensis pli intime ekrilati kun la loĝantaro. En Listra svarmis plej strangaj legendoj kaj kredaĉoj. La judaj familioj estis tre malmultaj, kaj la naiva popolo akceptis kiel veraĵojn ĉiuj mitologiajn figurojn. La urbo ne havis sinagogon, sed malgrandan templon, konsekritan al Jupitero, kiun la kamparanoj akceptis kiel la absolutan patron de la

dioj de Olimpo. Ekzistis organizita kultado. La kunvenoj fariĝadis periode, la oferoj estis grandnombraj.

Sur nuda placo estis matene moviĝado en la malriĉa bazono.

Paŭlo komprenis, ke li ne trovos pli bonan lokon por sia unua rekta kontakto kun la popolo.

De sur ia improvizita tribunon el ŝtonoj, kuŝigitaj unu sur alian, li komencis la predikadon per forta kaj kortuŝanta voĉo. La popolanoj subite ekalsvarmis; kelkaj venis el pacaj domoj, por ekscii la motivon de tiu kompakta amaso. Neniu ekpensis pri aĉeto de viando, fruktoj, verdaĵoj. Ĉiuj volis aŭdi la nekonatan fremdulon.

La Apostolo parolis unue pri la profetaĵoj, kiuj anoncis la venon de la Nazaretano, kaj poste raportis la farojn de Jesuo ĉe la homoj. Li pentris la bildon de Galileo per la plej brilaj koloroj de sia priskriba talento, parolis pri la humileco kaj abnegacio de la Mesio. Kiam li raportis la miregindajn resanigojn, kiujn la Kristo faris, li rimarkis, ke negranda grupo de la ĉeestantoj superĵetas lin per ofendaj ŝercoj. Flamante de fervoro en sia religia elokventeco, Paŭlo rememoris tiun tagon, kiam li vidis Stefanon en la nomo de la Sinjoro resanigi mutan junulinon.

Konvinkita, ke la Majstro lin ne forlasos, li ĵetis ĉirkaŭrigardon sur la grandan homamason. En la distanco de kelke da metroj li ekvidis mizeran almozulon, kiu sin pene trenadis. Impresita de la evangelia parolado, la kriplulo de Listra alproksimiĝis, movante sin per la brakoj, kaj, pene sidiĝinte, fiksas la okulojn sur la predikanton, kiu lin plej kortuŝite observadis.

Agigante la potencon de sia fido, Paŭlo lin fikse rigardadis kaj aŭtoritate diris:

– Amiko, en la nomo de Jesuo, stariĝu rekte sur viaj piedoj!

La kompatinda, kun okuloj fiksita sur la Apostolo, facile leviĝis, kaj la homamaso, miregante, ellasis kriojn. Kelkaj repaŝis terurita, aliaj serĉis per la okuloj Paŭlon kaj Barnabason, kaj ravite, ĝojante, ilin rigardadis. La kriplulo komencis saltadi de ĝojo. Lia eksterordinara

resaniĝo, de li, longe konata en la urbo, allasis ja nenian dubon.

Multaj el tiuj genuiĝis; aliaj rapidis al ĉiuj finoj de Listra, por anonci, ke la popolo ricevis la viziton de la dioj. La placo en malmultaj minutoj estis tute plena; ĉiuj deziris vidi tiun almozulon, kiu ricevis sian facilan moviĝadon. La okazaĵo rapide disvastiĝis. Barnabas kaj Paŭlo estis rigardataj kvazaŭ Jupitero kaj Merkuro, malleviĝintaj el Olimpo. La Apostoloj, ĝojante pro tiu favorkoraĵo de Jesuo, sed tre surprizitaj de la konduto de la likaonianoj, tuj komprenis ilian eraron. Ĉe la respekto de ĉiuj Paŭlo denove suriris la improvizitan tribunon kaj klarigis, ke li kaj lia kunulo estas nuraj mortemaj homoj, kaj reliefigis la favorkoraĵon de la Kristo, kiu volontis konfirmi la promeson de la Evangelio en tiu neforgesebla momento, sed li vane klarigis la aferon. Ĉiuj aŭdadis lin genuante, senmove. Tiam iu maljuna pastro, vestita laŭ la tiamaj ritoj, subite sin prezentis, kondukante du bovojn kun girlandoj el floroj kaj farante solenajn afektaĵojn kaj riverencojn. La servanto al Jupitero laŭte invitis la popolon al la ceremonio de la ofero al la vivantaj dioj.

Paŭlo rimarkis la popolamasan moviĝadon kaj mal-suprenirinte sur la centron de la placo, el plena gorĝo ekkriis, malfermante la tunikon sur la brusto:

– Ne estu malpiaj! Ni ne estas dioj... Vidu! Ni ja estas nuraj homoj el karno!

De proksime sekvate de Barnabas, li forprenis el la manoj de la maljuna pastro la delikatan ledplektaĵon, kiu interligis la bestojn, liberigante la du pacemajn taŭrojn, kiuj tuj ekmanĝis la verdajn kronojn.

La servanto al Jupitero ekdeziris protesti, sed baldaŭ silentis tre ĉagrenita. Meze en la plej strangaj komentarioj la misiistoj foriris, sopirante al ia preĝoloko, kie ili povus altigi ĝis Jesuo siajn esprimojn de ĝojo kaj danko.

– Granda venko! – iom fiere diris Barnabas. – La favorkoraĵoj de la Kristo estis grandnombraj, la Sinjoro pensas pri ni!

Paŭlo enpenŝiĝis kaj rediris:

– Kiam ni ricevas multe da favoroj, ni devas pensi pri la multo de la atestoj. Mi opinias, ke ni spertos grandajn elprovojn. Efektive, ni ne forgesu, ke la triumfa eniro de la Majstro en Jerusalemon antaŭiris la torturojn sur la kruco.

Konsiderante la altan signifon de ĉi tiuj asertoj, lia kamarado en profunda silento falis en mediton.

Lojda kaj ŝia filino radiis de ĝojo. La resanigo de la kriplulo havigis al la anoncantoj de la Bona-Novajo reliefan situacion. Paŭlo uzis tiun okazon, por fondi la unuan ĉelon de la Kristanismo en tiu urbeto. La komencaj paŝoj estis faritaj en la domo de la grandanima vidvino, kiu disponigis al la misiistoj ĉiajn rimedojn por ŝi havigeblajn.

Tiel, kiel en Nea-Pafos, ili instalis en tre malriĉa kabano la sidejon de la laboroj de informo kaj helpo. Anstataŭ Johano Marko pri ĉiuj servoj helpis la knabo Timoteo. Multe da homoj kopiadis la Evangelion dum la tago, kaj el ĉie alvenis malsanuloj, bezonantaj tujan helpon.

Malgraŭ tia sukceso kreskis ankaŭ la malamemo de kelkaj kontraŭ la nova doktrino.

La nemultaj judoj en Listra decidis konsulti la aŭtoritatojn de Ikonio rilate la du nekonatojn. Ĉi tio sufiĉis por tio, ke la horizonto nubigis. La komisiitoj revenis kun amaso da malfavoraj sciigoj. La aferon de Tekla oni pentris per nigraj koloroj. Paŭlo kaj Barnabas estis akuzitaj kiel blasfemantoj, sorĉistoj, ŝtelistoj kaj delogantoj de honestaj virinoj. Precipe Paŭlo estis prezentata kiel timinda revoluciulo. La afero estis diskutata en Listra sekrete. La administrantoj de la urbo invitis la pastron al Jupitero partopreni en la kampanjo kontraŭ la trompisto, kaj kiel facile ili kredis tiujn diojn, tiel ĉiuj ekatribuis al la predikantoj la plej grandajn malmoralajojn. Oni intertekis krimajn aranĝojn. De post la alveno de la du nekonatoj, kiuj paroladis en la nomo de ia nova profeto, Listra vivis agitata de malsamaj ideoj. Estis necese bridi la trouzojn. La parolo de Paŭlo estis

tro kuraĝa kaj postulis efikan punon. Fine oni decidis, ke la flama predikanto estu ŝtonumita ĉe la unua okazo, kiam li parolos antaŭ la publiko.

Ne sciante, kion oni insidis kontraŭ li, la Apostolo al nacioj, lasante Barnabason, kuŝantan sur sia lito pro eksceso de laboro, prenis kun si la knabon Timoteon en la sekvanta sabato ĉe vesperiĝo, kaj iris al la placo, kie li ankoraŭfoje anoncis la veraĵojn kaj promesojn de la Evangelio de la Regno.

La placo prezentis neordinaran movadon. La predikanto rimarkis la ĉeeston de multe da suspektindaj kaj tute nekonataj mienoj. Ĉiuj sekvis liajn eĉ plej malgrandajn gestojn kun videbla scivolo.

Plej serene li suriris la tribunon kaj komencis paroli pri la eterna gloro, kiun la Sinjoro Jesuo alportis al la suferanta homaro, sed kiam li apenaŭ komencis la evangelian predikon, jen sub la furiozaj krioj de tiuj pli flamiĝemaj amase ekpluvegis ŝtonoj.

Paŭlo subite rememoris la neforgeseblan figuron de Stefano. Certe la Majstro destinis por li tian saman morton, por ke li elpagu la malbonon, kiun li faris kontraŭ tiu martiro de la eklezio en Jerusalemo. La malmolaj ŝtonetoj atingis al li la piedojn, la bruston, la frunton. Li eksentis, ke la sango fluas el lia vundita kapo, kaj genuiĝis sen ia plendo, petegante Jesuon fortiĝi lin en tiu dolora pasaĝo.

Ĉe la unuaj momentoj Timoteo, terurite, komencis kriadi, petante pri helpo, sed unu viro kun atletaj brakoj singarde alproksimiĝis kaj flustris en liajn orelojn:

– Silentiĝu, se vi volas esti utila!

– Ĉu do vi, Gajo? – ekkriis la knabo kun larmantaj okuloj, sentante kelkan konsolon, ke li havas amikon en tiu tumulto, kie li estis implikita.

– Jes – murmure respondis tiu –, mi ĉi tie staras, por helpi al la Apostolo. Mi ne povas forgesi, ke li resanigis mian patrinon.

Kaj rigardante la movadon de la krima popolaĉo, li aldonis:

– Ni ne povas perdi eĉ sekundon. Ne longe daŭros

kaj oni forportos lin en la forĵetejon. Se tio okazos, penu sekvi nin kun iom da akvo. Se la misiisto ne mortos, vi havigos la unuajn helpojn, ĝis mi sciigos pri tio vian patrinon!

Ili tuj disiĝis. Plej afliktite, la junuleto vidis la predikanton surgenue, kun okuloj fiksitaj sur la ĉielo, en ia neforgesebla ekstazo. Strietoj da sango malsupren fluadis el lia rompita frunto. Ĉe unu momento la kapo ekpendis kaj la korpo senapoge falis. La homamaso ŝajnis posedita de mirego. Profitante tiun momenton, kiam vidiĝis nenia decido, Gajo enŝoviĝis, alproksimiĝis al la senmova Apostolo, faris signifoplenan geston al la ĉeestantoj kaj kriis:

– La sorĉisto estas mortinta!

Lia giganta figuro vekis la simpatian de la senkonscienca popolaĉo. Ekklakis aplaŭdoj. La iniciatintoj de tiu malnobla atenco malaperis. Gajo komprenis, ke neniu kuraĝas preni sur sin la individuan respondecon. Per strangaj vibroj la pli malicaj blekadis:

– Ekster la urbon! Ekster la urbon! La sorĉisto en la forĵetejon! La sorĉisto en la for... ĵet... ejon!

Maskante la kompaton per elmontroj de ironio, la amiko de Paŭlo diris al la kontentigita amaso:

– Mi forpostos la restaĵojn de la sorĉisto!

La popolaĉo faris surdigan bruegon kaj Gajo penis kiel eble plej zorge treni la misiiston. Ili kun krioj laŭiris longajn stratetojn ĝis dezerta loko, iom malproksima de la muregoj de Listra, kie ili delasis Paŭlon duonmortintan en la balaajostakon.

La korpulentulo kliniĝis, kvazaŭ por konstati la morton de la ŝtonumito, kaj zorge vidinte, ke ĉi tiu ankoraŭ vivas, kriis:

– Ni forlasu lin al la hundoj, kiuj zorgos pri la ceteraĵo! Ni festu la faron per iom da vino!

Sekvante sian tiumomentan ĉefon, la homamaso foriris, kaj tiam Timoteo alproksimiĝis al tiu loko, profitante la ombron de la verperiĝo. Kurinte al ne tre malproksima baseno, destinita por la publiko, la knabo plenis per pura akvo sian netramalsekiĝan ĉapon kaj donis

al la vundito la unuan helpon. Kun larmoj li rimarkis, ke Paŭlo malfacile spiras, kvazaŭ droninte en profunda sveno. La junulo el Listra sidiĝis apud li kaj plej kore banis lian vunditan frunton. Post kelke da minutoj la Apostolo rekonsciiĝis kaj ekesploris la situacion. Timoteo informis lin pri ĉio. Tre kortuŝite, Paŭlo dankis Dion, ĉar li rekonis, ke nur la favorkoreco de la Plej-altulo povis esti farinta tian potencaĵon, por savi lin de la krimaj intencoj de la senprudenta popolaĉo.

Post du horoj tri silentaj figuroj alproksimiĝis. Tre afliktite, Barnabas forlasis la liton, kvankam febranta, por akompani Lojdan kaj Eŭniken, kiuj avizite de Gajo, alrapidis por la unua kuracado.

Ĉiuj donis dankon al Jesuo kaj Paŭlo trinkis iometon da refortiga vino. Kun potenca spirita strukturo, malgraŭ la brutalaĵoj, la teksisto el Tarso stariĝis kaj revenis hejmen kune kun siaj amikoj, delikate alapogite al Barnabas, kiu oferis al li sian amikan brakon.

La resto de la nokto fluis en frataj konversacioj. La du senditoj de la Bona-Novaĵo timis atakon de la popolo al la grandanimaj sinjorinoj, kiuj ilin gastigis kaj helpis. Ili devis do foriri, por antaŭhaltigi pli grandajn ĝenojn kaj embarasojn.

Lojda vane penis dekonsili de foriro la predikantojn de la Kristo; Timoteo senrezulte kisis la manojn al Paŭlo kaj petis lin ne foriri. Timante pli bedaŭrindajn okazaĵojn kaj doninte la instrukciojn necesajn al la naskiĝanta eklezio, ili trapasis la pordegojn de la urbo ĉe mateniĝo direkte al Derbe, kiu situaciis iom malproksime.

Post peniga irado ili atingis sin novan laborkampon, kie ili estis pasigontaj pli ol unu jaron. Kvankam sin donante al manlaborado, per kiu ili aranĝis al si la panon de la vivo, la du kamaradoj bezonis ses monatojn, por restarigi sian difektitan sanon. Kiel sennomaj teksisto kaj argilajisto, Paŭlo kaj Barnabas longe restadis en Derbe, ne vekante la publikan scivolon. Nur revigliĝinte de la travivitaj afekcioj, ili rekomencis la dissemadon de la Bona-Novaĵo de la Regno de Jesuo. Vizitante

la ĉirkaŭaĵojn, ili estigis grandan interesigon de la simpla popolo pri la elaĉeta Evangelio. Malgrandaj kristanaj rondoj estis fonditaj en atmosfero de multe da ĝojo.

Post longa tempo da laboro ili decidis reiri al la komenca kampo de sia penado. Venkante malfacilajn fazojn, ili vizitis kaj kuraĝigis ĉiujn fratojn, postenantajn en la diversaj regionoj de Likaonio, Pisidio kaj Pamfilio.

De Perga ili malsupreniris al Atalio, de kie ili ŝipiris al Seleŭkia kaj de ĉi tie al Antioĥia, en Sirio.

Ili ambaŭ estis spertintaj la malfacilecon de la plej krudaj laboroj. Ili ofte vidis sin perpleksaj antaŭ la kaprompaj demandoj de la entrepreno: interŝanĝe kontraŭ la frata sindoneco ili ricevis mokojn, skurĝojn kaj perfidajn akuzojn; tamen tra la korpa kadukeco kaj la vundoj ili disradiis nevideblajn ondojn da intensa spirita ĝojo. Tiel estis, ĉar meze inter la dornoj de la malgata vojo la du bravaj kamaradoj tenadis alte la dian kaj konsolan krucon, abunde disjetante la benatajn semojn de la Elaĉeta Evangelio.



Luktoj por la Evangelio

La revenon de Paŭlo kaj Barnabas en Antioĥia signis grandega ĝojo. La frata anaro, profunde emociita, admiris la faron de siaj fratoj, kiuj portis al tiel malriĉaj kaj malproksimaj regionoj la diajn semojn de vero kaj amo.

Dum multe da sinsekvaj vesperoj la ĵusvenintoj buŝe raportis siajn faritaĵojn, mankigante nenian detalon. La eklezio de Antioĥia vibris de ĝojo kaj donis dankon al la Ĉielo.

La du sindonaj misiistoj revenis en fazo de grandaj malfacilaĵoj por la institucio. Ili ambaŭ kun bedaŭro tiujn rimarkis. La malkonsentoj en Jerusalemo penetris ĝis la societo de Antioĥia; luktoj pri la cirkumcido flamis. La plej eminentaj estroj mem malkonsentis inter si pro dogmaj asertoj. Tiel profundaj fariĝis la dividlinioj, ke la voĉoj de la Sankta Spirito jam ne manifestiĝis. Manaen, kies penoj en la eklezio estis nepre necesaj, staradis malproksime pro la senrezultaj kaj venenaj diskutoj. La fratoj estis treege konfuzitaj: unuj estis partianoj de la deviga cirkumcido, aliaj batalis por senkondiĉa libereco, konsentita de la Evangelio. Plej maltrankvile la targa predikanto observadis la furiozajn polemikojn rilate al puraj kaj malpuraj nutraĵoj.

Provante starigi la ĝeneralan harmonion pri la instruoj de la Dia Majstro, Paŭlo senutile paroladis, klarigante, ke la Evangelio estas libera kaj ke la cirkumcido estas sole nur ia konvencia karakterizaĵo de la juda maltoleremo. Malgraŭ lia nekontestebla aŭtoritateco, kiu ĝuis prestiĝon ĉe la tuta anaro, dank'al la spiritaj me-

ritoj, kiujn li konkeris dum sia misio, la malkonsentoj daŭradis plue.

Kelke da homoj, venintaj el Jerusalemo, ankoraŭ pli komplikis la situacion. Tiuj malpli rigoremaj parolis pri la absoluta aŭtoritateco de la galileaj apostoloj. Oni flustradis, ke la aprolo de Paŭlo kaj Barnabas, kiel ajn inspirata el la instruoj de la Evangelio, ne estas sufiĉe rajtigita, por sin prezenti en la nomo de Jesuo.

La eklezio de Antioĥia ŝanceliĝis en grandega perplekseco; ĝi perdis sian spiriton de unueco, kiu ĝin karakterizis de ĝiaj unuaj tempoj. Ĉiu instrudis la doktrinon el sia persona vidpunkto. La naciojn oni traktadis kun moko; oni organizis kampanjojn favore por la cirkumcido.

Forte impresite de la situacio, Paŭlo kaj Barnabas kombinis ekstreman rimedon: ili decidis inviti Simonon Petron persone viziti la institucion en Antioĥia. Konante lian spiriton liberan de religiaj antaŭjuĝoj, la du kamaradoj adresis al li longan leteron, sciigante, ke la laboroj de la Evangelio bezonas lian grandvaloran kunhelpon kaj insistante pri lia prestiĝa agado.

La kuriero zorge transdonis tiun leteron, kaj al la granda surprizo de la kristanoj en Antioĥia la ekspediisto el Kapernaŭm venis en la urbon, elmontrante grandan ĝojon pro la tempo de fizika ripozo, kiun al li havigis tiu ekskurso.

Paŭlo kaj Barnabas ĝojegis. Akompanante Simonon, venis Johano Marko, kiu ne tute forlasis la evangeli-ajn laborojn. La grupo travivis belajn horojn de intimaj konfidencaj pri la misiaj vojaĝoj, inteligente raportitaj de la eksrabeno, kaj pri la faktoj, okazantaj en Jerusalemo de post la morto de la filo de Zebedeo, kiujn Simon Petro pentris per vivaj koloroj.

Perfekte informite pri la religia situacio en Antioĥia, la ekspediisto diris:

– En Jerusalemo niaj luktoj estas tiaj samaj. De unu flanko la eklezio ĉiutage plena de mizeruloj, de alia flanko la senhaltaj persekutoj. En la centro de ĉiuj laboroj staras Jakobo kun plej krudaj postuloj. Mi iafaje

sentas la impulson lukti, por restarigi la liberecon de la principoj de la Majstro, sed – kiel agi? Kiam la religia tempesto minacas per detruo la riĉaĵon, kiun ni sukcesis transdoni al la afliktoj de la mondo, la fariseismo renkontas la rigoran observadon de Jakobo kaj estas devigita paralizi la kriman agadon, de longe komencitan. Se mi klopodos, por nuligi lian influon, mi samtempe ĵetos la jerusaleman institucion en la abismon de pereco pro la politika agitado de la granda urbo. Kaj la programo de la Kristo? Kaj la mizeruloj? Ĉu estus juste, se ni malutilus tiujn malpli favoritajn de la sorto pro ia persona punkto de vidadado?

Kaj ĉe la profunda atento de Paŭlo kaj Barnabas la bonkora kamarado daŭrigis:

– Ni ja scias, ke rilate la demandon pri la necirkumciditoj Jesuo postlasis nenian rektan solvon, sed li instruis, ke ne laŭ la karno ni atingos la Regnon, sed per la menso kaj la koro. Sed, konante la influon de la Evangelio sur la popolan animon, la aŭtoritata fariseismo ne ĉesas nin observadi kaj ĉion faras, por elradiki la arbon de la Evangelio, kiu ekkreskas ĉe la simplaj kaj pacemaj homoj. Ni do nepre devas plej zorgi, ke ni neniel difektu la dian planton.

Liaj amikoj faradis grandajn gestojn de aprobo. Elmontrante sian neordinaran talenton, por direkti iun ideon kaj kunigi la multajn malkonsentantajjn, Simon Petro havis unu vorton taŭgan por ĉiu situacio, unu ĝustan klarigon por ĉia eĉ plej simpla demando.

La anaro en Antioĥia ĝojegis. La nacioj ne kaŝis la ĝojon, kiu bolis en ilia animo. La nobla Apostolo persone vizitadis ĉiujn, sendistinge kaj senprefere. Li ĉiam antaŭmetadis bonan rideton al la zorgoj de la amikoj, kiuj timis la “malpuran” nutraĵon, kaj kutime demandadis, kiaj substancoj ne estas benitaj de Dio. Paŭlo akompanadis liajn paŝojn, ne kaŝante sian intiman kontentecon. Per laŭdinda klopodo por interkonsento, la Apostolo al nacioj ne sin detenis iradi kun li al ĉiaj lokoj, kie ekzistis fratoj, konfuzitaj de la ideoj de deviga cirkumcido. Rapide ekestis rimarkinda atmosfero de

konfido kaj unuformeco de opinioj. Ĉiuj samdoktrinanoj ĝojegis.

Sed jen venis el Jerusalemo tri senditoj de Jakobo. Ili alportis leterojn por Simon, kiu ilin akceptis kun grandaj elmontroj de estimo. De tiam la atmosfero ŝanĝiĝis. La ekŝfististo el Kapernaŭo, tiel inklina al la simpleco kaj sendependeco en la Kristo Jesuo, tuj retiriĝis. Li ne plu kontentigis la invitojn de la necirkumciditoj. La intimaj kaj elkoraj festoj, aranĝitaj honore al li, jam ne havis lian gajan kaj amikan ĉeeston. En la eklezio li tute ŝanĝis sian konduton. Li estis ĉiam kune kun la senditoj el Jerusalemo, kiuj lin neniam forlasadis, kaj aspektis severa kaj malgaja, neniam parolante pri la libereco, kiun la Evangelio havigis al la homa konscienco.

Profunde ĉagrenite, Paŭlo rimarkis tiun aliiĝon. Laŭ lia spirito, rigore kutiminta al la libereco de opinio, tiu fakto estis sentofenda kaj dolora; pligravigis ĝin tio, ke ĝi venis ĝuste de iu kredanto, kiel Simon, alte sidanta kaj absolute respektinda. Kiel kompreni tian konduton, tute ne akordantan kun tio, kion oni atendis? Konsiderante la grandecon de sia tasko ĉe la nacioj, ĉia demando de liaj amikoj pri tio lin konfuzis. Amante la senkaŝajn kondutojn, li ne estis el tiaj laboristoj, kiuj kapablas atendi. Post du semajnoj da korprema atendo dezirante doni klarigon al la grandnombraj necirkumciditoj en Antioĥia, invitite paroli el la tribuno al siaj kamaradoj, li komencis per laŭdego al la religia liberiĝo de la mondo de post la veno de Jesuo Kristo. Li citis la elmontrojn, kiujn la Majstro grandanime faris pri sia potenco antaŭ la impostistoj kaj pekuloj. Petro aŭdadis lin, miregante tiajn grandajn erudicion kaj rimedojn de hermeneŭtiko, por instrui la ĉeestantojn pri la plej malfacilaj principoj. Ankaŭ la kurieroj de Jakobo miregis, ĉiuj lin atente aŭdadis.

Ĉe unu momento la teksisto el Tarso fikse rigardis la galilean Apostolon kaj diris:

– Fratoj, defendante nian senton de unuiĝo en Jesuo, mi ne povas kaŝi nian nekontentecon ĉe la lastaj okazaĵoj. Mi volas paroli pri la konduto de nia tre

amata gasto Simon Petro, kiun ni devus nomi “majstro”, se ĉi tiu titolo efektive kaj laŭrajte ne apartenus al nia Savinto (*).

La surprizo kaj la mirego de ĉiuj estis grandaj. Ankaŭ la Apostolo el Jerusalemo miris, sed aspektis tre trankvila. La senditoj de Jakobo elmontris profundan ĝenat-econ. Barnabas estis palega. Sed Paŭlo brave daŭrigis:

– Simon ĉiam estis por ni vivanta ekzemplo. La Majstro lin postlasis al ni kvazaŭ rokon de nepereema fido. En lian noblan koron ni metis niajn plej grandajn esperojn. Kiel do ni rigardu lian konduton, foriĝi de la necirkumciditaj fratoj de post la alveno de la senditoj el Jerusalemo? Antaŭ ol tiuj venis, li ĉeestis niajn intimajn vesperlaborojn, manĝis el la pano de niaj tabloj. Mi tiel penas malkaŝe klarigi ĉi tiun demandon ne el la deziro skandali iun ajn, sed tial, ĉar mi kredas ian Evangelion nur liberan de ĉiuj eraraj antaŭjuĝoj de la mondo, konsiderante, ke la parolo de la Kristo ne estas alĉroĉita al ĉiaj ajn malnoblaj interesoj de la pastraro.

La tiea atmosfero malheliĝis de ekscititeco. La nacioj el Antioĥia rigardadis la parolanton kun raviteco kaj danko; la simpatiantoj al la fariseismo, kontraŭe, ne kaŝis sian malamon ĉe tiu kuraĝo, kiu ĝislimis aŭdacon. Tiam kun okuloj flamantaj de nedifineblaj sentoj, Barnabas prenis la parolon, dum la predikanto faris paŭzon, kaj diris:

– Paŭlo, mi estas el tiuj, kiuj bedaŭras vian konduton en ĉi tiu rilato. Per kia rajto vi povas ataki la puran vivon de la kontinuiganto de la Kristo Jesuo?

Ĉi tion li parolis per tre kortuŝanta tono, per voĉo sufokita de larmoj. Paŭlo kaj Petro estis liaj plej bonaj kaj karaj amikoj.

Anstataŭ konfuziĝi ĉe tiu demando, la oratoro tiel same sincere respondis:

(*) La vortoj de Paŭlo en la Epistolo al la Galatoj (2:11 ĝis 14) rilatas al fakto, okazinta pli frue ol tiu kunveno de la disĉiploj. – *Noto de la Aŭtoro.*

– Ni ja havas unu rajton, nome tiun, vivi kun la vero, abomeni hipokritecon kaj, kio estas pli sankta, savi la nomon de Simon for de la fariseaj atakoj, kies fleksiĝojn mi ja konas, ĉar ili konsistigas la nigran abismon, el kiu mi sukcesis eliri en la lumon de la elaĉeta Evangelio.

La parolado de la eksrabeno daŭris plu per kruda kaj senkaŝa tono. De tempo al tempo Barnabas lin interrompis, pliflamigante la diskutadon. Tamen dum tiu tuta diskutado la persono de Petro la plej multe impresis pro la nobla sereneco de sia severa mieno.

En tiuj nemultaj momentoj la galilea Apostolo konsideris la altegecon de sia tasko sur la spirita batal-kampo por la venkoj de la Evangelio. Sur unu flanko staras Jakobo, plenumanta altan mision ĉe la judismo; el lia konservativemeco fariĝis feliĉaj okazaĵoj por la solideco de la jerusalema eklezio, starigita kiel komenca ĉelo por la kristanigo de la mondo; sur alia flanko, la potenca persono de Paŭlo, la brava amiko de la naciaĵoj, plenumanta plej belan taskon; el liaj heroaj faroj fontis tuta torento da lumo por la idolkultaj popoloj. Kiu la pli granda en liaj okuloj de kamarado, vivinta apud la Majstro kaj de tiu ricevinta la plej eminentajn instruojn? En tiu momento la eksfiŝisto petegis Jesuon konsenti al li la inspiron necesan por la fidela plenumo de siaj devoj. Ne povante pravigi sin per la sola intenca karaktero de siaj agoj, alie li eksplodigus pli grandan skandalon por la kristana institucio, apenaŭ elkoviĝinta en la mondo, li sentis la dornon de la misio, enpikitan en lia brusto mem. Kun larmoj, dum Paŭlo kaj Barnabas kverelis, li havis la impreson, kvazaŭ li denove vidas la Sinjoron en la tago de Kalvario. Neniu tiun komprenis, eĉ ne la amataj disĉiploj. Poste ŝajnis al li, ke li vidas Jesuon, mortantan sur la kruco de la martireco. Ia kaŝita forto instigis lin atente rigardadi la lignaĵon. La kruco de la Kristo nun ŝajnis al li ia simbolo de perfekta ekvilibro. Unu linio horizontala kaj unu linio vertikala, unu sur la dua, formas ortangulan figuron. Efektive, la tortura ilo sendis al li silentan mesaĝon.

Estas necese esti justa, sen partio aŭ misinklino. La Majstro ĉiujn sendistinge amis, disdividis la eternajn bonaĵojn al ĉiuj homoj. En liaj kompatplenaj kaj favor-emaj okuloj nacioj kaj judoj estas fratoj. Li nun ĝuis eksterordinaran sagacecon, por konsciencie ekzameni la situacion. Li devas ami Jakobon pro lia grandanima zorgemo por la izraelidoj, kaj ankaŭ Paŭlon el Tarso pro lia ekstrema sindoneco al ĉiuj, kiuj ne havas ideon pri iu justa Dio.

La ekŝifisto el Kapernaum rimarkis, ke la plej multaj ĉeestantoj lin celas per scivolaj rigardoj. Liaj jerusalemaj kunuloj travidigis koleron tra la palegeco de la vizaĝoj. Ŝajnis, ke ĉiuj vokas lin al la diskutado. Al Barnabas la okuloj estis ruĝaj de ploro, kaj Paŭlo ŝajnis ĉiam pli senĝena, vipante la hipokritecon per sia frakasanta rezonado. La Apostolo preferus la silenton, por ne skui la varman fidon de tiuj, kiuj kolektiĝis en la eklezio en la lumo de la Evangelio, kaj mezuris la amplekson de sia respondeco en tiu neforgesebla minuto. Koleri estus neigi la meritojn de la Kristo kaj perdi la utilecon de liaj faroj; inklini al Jakobo estus partio, tute pravigi la argumentojn de Paŭlo ne estus juste. Li penis kolekti en la menso la instruojn de la Majstro kaj rememoris tiun neforgeseblan sentencon, ke kiu volos esti la plej granda, tiu estu la servanto de ĉiuj. Ĉi tiu preskribo havigis al li grandegan konsolon kaj multe da spirita forto.

La kunbekiĝo ĉiam pli kaj pli flamadis. La partioj ĝisekstreme streĉis siajn klopodojn por venki unu alian. La kunveno estis plena de flustroj. Estis nature antaŭvidi ian vulkanan eksplodon.

Simon Petro stariĝis. Lia mieno estis serena, sed la okuloj estis plenaj de larmoj, kiuj tamen ne elfluis.

Uzante pli longan paŭzon, li ekparolis per laŭta voĉo, kiu tuj kvietigis la tumulton:

– Fratoj! – li noble diris. – Mi multe eraris en ĉi tiu mondo. Ĝi estas sekreto por neni, ke mi eĉ malkonfesis nian Majstron en la plej dolora momento de la Evangelio. Mi mezuras la favorkorecon de la Sinjoro laŭ

la profundeco de la abismo de miaj mizeraĵoj. Se mi eraris ĉe la tre amataj fratoj en Antiohia, mi petas pardonon pri miaj kulpoj. Mi submetas min al via juĝado kaj petas ĉiujn submetiĝi al la juĝado de la Plejaltulo.

Ĉiuj estis kvazaŭ fulmobatitaj. Komprenante la efikon de sia sinpravigo, la eksfiŝisto finis, dirante:

– Konfesinte la grandecon de miaj spiritaj mankoj kaj rekomdante min al viaj preĝoj, ni transiru, fratoj, al la komentarioj de la hodiaŭaj pecoj el la Evangelio.

La ĉeestantoj miregis ĉe tiu neantaŭkalkulita finiĝo. Oni supozis, ke Simon Petro revenĝe faros longan paroladon. Neniu ankoraŭ povis reveni al si de la surprizo. Laŭ antaŭa interkonsento la Evangelio devis esti komentariata de la galilea Apostolo, sed la eksfiŝisto, antaŭ ol residiĝi, tre serene diris:

– Mi petas nian fraton Paŭlo el Tarso bonvoli legi kaj komentarii la notojn de Levi.

Malgraŭ sia natura ĝenateco la eksrabeno konsideris la altan meriton de ĉi tiu peto, tuj formetis ĉiujn ekstrememajn sentojn de sia arda koro kaj per bela improvizaĵo parolis pri la legado de la skribaĵoj de la Bona-Novaĵo.

La prudenta konduto de Simon Petro savis la naskiĝantan eklezion. Taksante laŭ ilia ĝusta valoro la penojn de Paŭlo kaj Jakobo, li antaŭforigis skandalon kaj tumulton en la sanktejo. Dank'al lia frata abnegacio tiu incidento estis apenaŭ rimarkita en la historio de la primitiva kristanaro, kaj eĉ la preterpasa parolo de Paŭlo en lia epistolo al la galatoj, malgraŭ ĝia tiama formo rigida kaj esprimiva, ne povas doni ideon pri la minacanta danĝero de skandalo, kiu pendis super la kristana institucio en tiu memorinda tago.

La kunveno finiĝis sen pluaj malpaciĝoj. Simon iris al Paŭlo kaj lin gratulis pro la beleco kaj elokventeco de lia parolado. Li nepre volis rekonsideri la incidenton, por ĝin amike pritrakti. La demando pri la nacianoj, li diris, ja meritas grandan interesiĝon. Kial rifuzi la lumon de la Kristo al tiu, kiu naskiĝis malproksime de la judaj societoj, se la Majstro mem asertis, ke la dis-

ĉiploj venos el okcidento kaj el oriento? (*). La milda kaj nobla konversacio realproksimigis inter si Paŭlon kaj Barnabason, dum la eksfiŝisto intence paroladis, kvietigante la animojn.

La eksleĝisto defendadis plue sian tezon per solida argumentado. Komence sinĝene, li poste, dank'al la bonvolemo de la galileano, nature vaste paroladis, ricevinte la serenecon. La demando estis ja komplikita. Ĉu transplanti la Evangelion en la judismon ne sufokos ĝiajn diajn kapablojn? – demandis Paŭlo, firmigante sian vidpunkton. Sed la miljara penado de la judoj? – demandis Petro, atentigante, ke, kiel li komprenis, se Jesuo asertis, ke lia misio estas la ĝusta plenumo de la Leĝo, oni do ne povos forigi la novan for de la antaŭa revelacio. Agi alie estus tio sama, kiel deŝiri de sukriĉa trunko branĉon verdantan, destinitan por frukti.

Ekzameninte ĉi tiujn gravajn argumentojn, Paŭlo el Tarso tiam diris, ke estus konsilinde kunvenigi en Jerusalema la plej sindonajn samkredanojn, por pli vasta debato de la afero. Laŭ lia opinio, la rezultoj estus bonfaraj, ĉar ili elmontrus ĝustan konduton, kiu ne donus materialon por sofismoj, tiel konformaj al la fariseaj gusto kaj kutimo.

Kvazaŭ iu, kiu forte ĝojus, trovinte la ŝlosilon de iu malfacila problemo, Simon Petro volonte konsentis tiun proponon, dirante, ke li plej interese deziras, ke tiu kunveno fariĝu kiel eble plej baldaŭ. En sia animo li konsideris, ke tio estus tre bona okazo, por ke la disĉiploj en Antioĥia konstatu la kreskantajn malfacilaĵojn en Jerusalema.

Vespere ĉiuj fratoj iris al la eklezio por la adiaŭo de Simon kaj por la kutimaj preĝoj. Petro preĝis kun sankta fervoro, kaj ĉiuj sentis sin envolvitaj en bonfarajn vibrojn de paco.

La incidento postlasis en ĉiuj kelkan perpleksecon, sed la saĝa kaj afabla konduto de la eksfiŝisto sukcesis

(*) Vd. la piednoton sur pĝ. 317. – *La Trad.*

tenadi plu la kunecon de ĉiuj ĉe la Evangelio por la daŭrigo de la nobligaj taskoj.

Konstatinte la perfektan repaciĝon de Paŭlo kaj Barnabas, Simon Petro reiris Jerusalemon kune kun la senditoj de Jakobo.

En Antioĥia la situacio estis ĉiam ankoraŭ malfirma. La senfruktaj diskutoj daŭris plu flamantaj. La juda influo batalis kontraŭ la nacioj kaj la liberaj kristanoj formale rezistis al la antaŭjuĝa konvencio. Tamen la eksrabeno ne ripozis. Li kunvokis kunvenojn, en kiuj li klarigis la celojn de tiu kunsido, kiun Simon promesis al ili ĉe la unua oportuna okazo. Vigla batalanto, li multobligis siajn proprajn fortojn, por tenadi la sendependecon de la Kristanismo, kaj publike promesis alporti de la eklezio de la galileaj Apostoloj leterojn, kiuj asekurus la pozicion de la nacioj en la konsola doktrino de Jesuo kaj tiel oni forĵetus la absurdajn altrudojn rilate la cirkumcidon.

Liaj disponoj kaj promesoj ekflamigis novajn luktojn. La rigoraj observantoj de la antaŭaj ordonoj dubis tiujn konsentojn de Jerusalemo.

Paŭlo ne senkuraĝiĝis. En sia animo li al si prezentis sian alvenon al la eklezio de la Apostoloj, detale ekzamenis, en sia superekscitita imagemo, la tutan potencan argumentadon, kiun li uzos, kaj vidis sin kiel venkinton el tiu demando, kiu bildiĝis antaŭ liaj okuloj kiel esence grava por la estonteco de la Evangelio. Li penos prui la grandan kapablon de la nacioj por la servado al Jesuo. Li raportos siajn sukcesojn en la longa ekskurso dum pli ol kvar jaroj tra tiuj malriĉaj kaj preskaŭ nekonataj regionoj, kie la nacioj ricevis la sciigojn pri la Majstro kun forta ĝojo kaj komprenemo multe pli alta, ol liaj samrasanoj. Pliigante siajn noblajn projektojn, li decidis konduki kun si la junan Titon, kiu, kvankam veninta el inter la paganoj kaj aĝanta neplenajn dudek jarojn, estis en la eklezio de Antioĥia unu el la plej klaraj kapoj en la servado al la Sinjoro. De kiam Paŭlo venis el Tarso, Tito korigiĝis al li kiel bona frato. Rimarkinte lian laboremecon, Paŭlo instruis

al li la metion de tapiŝisto, kaj ĝuste li estis ties substituinto en la modesta laborejo dum la tuta tempo de la unua misio. Li estos eminentulo de la renoviga povo de la Evangelio. Kiam li parolos en la kunveno, li certe mirigos tiujn plej klerajn per siaj alte ekzegezaj argumentoj.

Karesante esperojn, Paŭlo el Tarso faris ĉiujn disponojn por la sukceso de siaj planoj.

Post kvar monatoj unu sendito el Jerusalemon alportis la atenditan sciigon de Petro rilate la kunvenon. Helpate de la aktiveco de Barnabas, la eksrabeno akcelis la necesajn disponojn. En la antaŭtago de sia foriro li suriris la tribunon kaj, ne konfuziĝante ĉe la ironia rideto, kiun kelke da izraelidoj singarde kaŝis, ree faris la promeson pri la konsentoj, esperataj de la nacioj.

En la morgaŭa mateno la karavaneto foriris. Ĝi konsistis el Paŭlo kaj Barnabas, Tito kaj ankaŭ du fratoj, kiuj ilin akompanis kiel helpantoj.

Ili faris malrapidan vojaĝon, haltante en ĉiuj vilaĝoj por predikoj pri la Bona-Novajo, dissemante resanigojn kaj konsolojn.

Post multe da tagoj ili alvenis Jerusalemon, kie ili estis plej ĝoje akceptitaj de Simon. Kune kun Johano la grandanima Apostolo ilin frate gastigis. Ĉiuj gastoj ekokupis la departementon, kie troviĝis multe da mizeruloj kaj malsanuloj. Paŭlo kaj Barnabas ekzamenis la ŝanĝojn, faritajn en la domo. Aliaj pavilonoj, kvankam modestaj, staris transe, sur ne malgranda areo.

– La servoj pligrandiĝis – bonkore klarigis Simon –; la nombro de la malsanuloj, kiuj venas al ni, kreskas kun ĉiu tago. Estis necese konstrui novajn ĉambrojn.

La vico da litoj ŝajnis senfina. Kripluloj kaj maljunuloj distris sin en la suno, inter la amikaj arboj de la korto.

Paŭlo miris la amplekson de tiuj konstruoj. Post nelonge Jakobo kaj aliaj kamaradoj venis saluti siajn fratojn el la institucio de Antioĥia. La eksrabaeno fikse ekrigardis la Apostolon, kiu estris la pretendojn de la judismo. La filo de Alfeo nun ŝajnis al li tute aliĝinta.

Liaj trajtoj similis tiujn de iu “instruisto de Izrael”, kun ĉiuj neesprimeblaj karakterizaĵoj de la fariseaj moroj. Li ne ridetis. Liaj okuloj travidigis ian pretendon je supereco, kiu ĝislimis indiferecon. Liaj gestoj estis pri-kalkulataj, kiel tiuj de iu pastro de la Templo en la ceremoniaj aferoj. La teksisto ĉerpis al si la konkludojn el tia teniĝo kaj atendis la vesperon, kiam komenciĝos la preparaj diskutoj. En la lumo de kelke da torĉoj sidis ĉirkaŭ granda tablo pluraj personoj, nekonataj al Paŭlo. Ili estas novaj kunlaborantoj en la eklezio de Jerusalemo – bonkore klarigis Petro. La eksrabeto kaj Barnabas ĉe la unua ekrigardo ricevis pri ili nebonan impreson. La nekonatoj similis anojn de la Sinedrio en ilia hierarkio kaj konvencia pozicio.

Kiam ili venis al la salono, la konvertito apud Damasko estis frapita de sia unua disreviĝo. Rimarkinte, ke al la reprezentantoj de Antioĥia kompaniis junulo, Jakobo alpaŝis kaj demandis:

– Fratoj, estas juste, ke ni eksciu, kiu estas tiu junulo, kiun vi venigis kun vi en ĉi tiun privatan salomon. Nia zorgo estas bazita sur la tradiciaj ordonoj, laŭ kiuj oni devas esplori la devenon de la junuloj, por ke ne tumultiĝu la servoj al Dio.

– Ĉi tio estas nia brava kunlaboranto en Antioĥia – klarigis Paŭlo samtempe fieraj kaj kontentaj. – Li estas nomata Tito kaj estas unu el niaj grandaj esperoj en la kultivejo de Jesuo Kristo.

La Apostolo lin fikse ekrigardis sen surprizo kaj redemandis:

– Ĉu li estas ido de la elektita popolo?

– Li devenas el nacioj – iel fiere respondis la eksrabeto.

– Cirkumcidita? – ĵaluze demandis la filo de Alfeo.

– Ne.

Ĉi tiun “ne” Paŭlo diris iom kolerete. La postuloj de Jakobo lin ekscitis. Aŭdinte tiun negativan vorton, la galilea Apostolo per firma tono rediris:

– Mi do pensas, ke ne juste estos enlasi lin en la kunsidon, ĉar li ja ne plenumis ĉiujn ordonojn.

– Ni apelacias al Simon Petro – emfaze diris Paŭlo. – Tito estas reprezentanto de nia institucio.

La eksfiŝisto el Kapernaŭm estis palega. Starante inter la du grandaj reprezentantoj: de la judismo kaj de la nacianismo, li devis kristane decidi la neatenditan malfacilan demandon.

Ĉar lia rekta partopreno malfruis kelke da minutoj, tial la tarsi teksisto daŭrigis:

– Efektive, la kunsido devos solvi tiajn plej interesajn demandojn, por ke oni starigu la verajn rajtojn de la nacioj.

Nun Simon, konante ambaŭ kverelantojn, rapidis doni sian opinion, dirante per paciga tono:

– Jes, la afero estos ja objekto de nia atenta ekzamenado en la kunsido.

Kaj intence turnante la okulojn al la eksrabeno, li daŭrigis, klarigante:

– Vi apelacias al mi kaj mi akceptas la peton; ni tamen devas pli profunde studi la oponon de Jakobo. Li estas sindona estro en ĉi tiu domo kaj ne estus juste malŝati lian servemon. Fakte, la konsilantaro diskutos tiujn aferojn, kio signifas, ke ĉi tiu demando ne estas ankoraŭ solvita. Mi do proponas, ke la frato Tito estu cirkumcidita morgaŭ, por ke li partoprenu en la debatoj, kun la supera inspiro, pri kiu mi scias, ke li ĝin havas. Per ĉi tiu sola faro la horizonto nepre klariĝos, por la trankvileco de ĉiuj disĉiploj de la Evangelio.

La subtileco de lia argumentado disbatis la barojn. Se ĝi ne plaĉis al Paŭlo, ĝi tamen kontentigis la plimulton, kaj kiam la junulo el Antioĥia reiris en la internon de la domo, la kunsido komenciĝis per antaŭtemaj diskutoj. La eksrabeno estis malgaja kaj konsternita. La konduto de Jakobo, la novaj anoj, fremdaj al la Evangelio, kiuj voĉdonos en la kunsido, la paciga ago de Simon Petro, ĉio ĉi lin profunde ĉagrenis. Tiu altrudo koncerne Titon aspektis al li kvazaŭ ia krimo. Li sentis impulsojn reiri Antioĥian, akuzi kiel hipokritulojn kaj “tombojn blankigitajn” la judigajn fratojn. Sed la emancipoleteroj, kiujn li promesis al siaj kunuloj-naci-

anoj? Ĉu ne estos pli prudente repuŝi sian vunditan ofendiĝemon pro amo al siaj samidealanoj? Ĉu ne estos pli juste atendi definitivajn decidojn kaj kumiliĝi? La penso, ke liaj amikoj kalkulas je liaj promesoj, lin tran-kviligis. Profunde ĉagrenite, la damaska konvertito atente sekvis la unuajn debatojn. La komencaj demandoj jam duonmontris la grandajn ŝanĝojn, kiujn oni intencis enmeti en la Evangelion de la Majstro.

Unu el la ĉeestantaj fratoj eĉ rimarkis, ke la naci-anoj devas esti konsiderataj kiel la “brutaro” de la popolo de Dio: barbaroj, kiujn oni submetu per forto, por ilin servigi en la plej pezaj laboroj de la elektitoj. Alia demandis, ĉu la paganoj estas similaj al la ceteraj homoj, konvertitaj al Moseo aŭ al Jesuo. Rigidmiena maljunulo kuraĝis aserti tiun malsaĝaĵon, ke viro sukcesas esti tuta viro nur cirkumcidita. Krom la nacianismo aliaj frivolaj temoj donis materialon por debatoj. Unu el la kunsidantoj proponis, ke la kunveno devas normigi la aferon pri la malpuraj nutraĵoj kaj ankaŭ la plej taŭgan procedon, por lavi la manojn. Jakobo argumentadis kaj paroladis kiel ĝisfunda konanto de ĉiuj ordonoj. Petro aŭdadis kun granda sereneco. Li neniam respondis, kiam la temo prenis la formon de konversacio, kaj atendis oportunan momenton, por esprimi sian opinion. Li prenis pli energian teniĝon nur tiam, kiam unu el konsilantoj petis, ke la Evangelio de Jesuo fariĝu parto de la libro de la profetoj kaj sekve estu per unu fojo submetita al la Leĝo de Moseo. Tio estis la unua fojo, kiam Paŭlo vidis la ekŝiŝiston necedema, eĉ iom kruda, pruvante la absurdecon de tia propono.

La laboroj estis interrompitaj malfrue nokte, en la fazo de nura preparado. Jakobo kolektis, por konservi, la pergamenrulaĵojn kun notoj, surgenue preĝis, kaj la kunsidantoj disiris, por nova kunveno en la morgaŭa tago.

Simon serĉis la kompanion de Paŭlo kaj Barnabas, por iri en la ripozoĉambron.

La teksisto el Tarso estis konsternita. La cirkumcido de Tito aspektis al li kiel frakaso de liaj neflekseblaj

principoj. Li ne rezignaciis pri tio kaj sentigis al la eksfiŝisto la amplekson de siaj ĉagrenoj.

– Sed kio estos tia malgranda cedo – demandis ĉiam afabla la Apostolo el Kapernaum – kompare kun tio, kion ni intencas fari? Ni bezonas pacan atmosferon, por klarigi la demandon pri la devigeo de la cirkumcido. Ĉu vi per ia promeso ne estas ligita al la nacianoj de Antioĥia?

Paŭlo rememoris tiun promeson, kiun li faris al siaj fratoj, kaj respondis:

– Jes, vere.

– Ni do konfesu la neceson de granda prudento, por veni al ĝustaj solvoj. La malfacilaĵoj, en ĉi tiu rilato, ne implikas nur la eklezion de Antioĥia. La anaroj de Cezarea, de Jafō kaj de aliaj regionoj baraktas en tiaj samaj embarasoj. Ni ja scias, ke ĉiaj eksteraj ceremonioj estas absolute senutilaj por la animo, tamen, konsiderante la respektindajn principojn de la judismo, ni ne povas abrupte deklari eksterman militon al ĝiaj tradicioj. Estas saĝe lukti kun granda prudento, krude ofendante neniun.

La eksrabeno aŭdis ĉi tiujn admonojn de la Apostolo kaj, rememorante la liktojn, kiujn li mem ĉeestis en la fariseaj rondoj, silente ekmeditis.

Post kelke da paŝoj ili atingis la salonon, ŝanĝitan en dormoĉambron de Petro kaj Johano. Ili eniris. Dum Barnabas kaj la filo de Zebedeo vigle konversaciadis, Paŭlo, sidante apud la eksfiŝisto, dronis en profundaj pensoj.

Post kelke da momentoj la ekslegisto, elirinte el sia absorbiteco, turnis sin al Petro kaj diris:

– Estas por mi malagrade konsenti la cirkumcidon de Tito, sed mi vidas nenian alian rimedon.

Altirite de ĉi tiu konfeso, ankaŭ Barnabas kaj Johano lin atente ekaŭskultis.

– Tamen, fleksiĝante antaŭ tiu dispo – li plej malkaŝe daŭrigis –, mi ne povas ne rekoni en tia fakto unu el la plej krientaj elmontroj de hipokriteco. Mi konsentos tion, kion mi neniel akceptas. Mi iom pentas, ke

mi ŝuldiĝis al io kontraŭ niaj amikoj en Antioĥia; mi ne supozis, ke la abomeninda politiko de la sinagogoj tute invadis la eklezion de Jerusalemo.

La filo de Zebedeo fiksas sur la konvertito apud Damasko siajn tre klarajn okulojn, kaj Simon serene respondis:

– La situacio estas ja tre delikata. Precipe post la buĉado de kelkaj el niaj plej amataj kaj servemaj kamaradoj, la religiaj malfacilaĵoj en Jerusalemo multiĝas kun ĉiu tago.

Kaj ĉirkaŭrigardante la ĉambron, kvazaŭ dezirante fidele esprimi tre danĝeran penson, li daŭrigis:

– Kiam la situacio fariĝis pli serioza, mi ekpensis pri la eblo de mia transiĝo en alian eklezion; poste mi ekpensis akcepti la lukton kaj reagi, sed unu nokton, tiel belan kiel ĉi tiu, kiam mi preĝadis en ĉi tiu ĉambro, mi ekrimarkis la ĉeeston de iu, kiu delikate alproksimiĝas. Mi staris genue, kiam la pordo malfermiĝis, al mia grandega surpriziĝo. Tio estis la Majstro! Lia vizaĝo estis tia sama, kiel en la belaj tagoj ĉe Tiberiado. Li min serioze kaj ame ekrigardis kaj diris: “– Petro, atentu la “infanojn de Kalvario”, antaŭ ol pensi pri viaj kapricoj!” Tiu mirinda vizio daŭris minuton, kaj tuj poste mi komencis rememori la maljunajn, la mizerajn, la malklerajn kaj la malriĉajn, kiuj venas al ni pri helpo. La Sinjoro rekomendis al mi atenti la portantojn de la kruco. De tiam mi deziris nenion, krom servi al ili.

Al la Apostolo staris larmoj en la okuloj, kaj Paŭlo estis forte impresita de tiu parolo, ĉar li memoris, ke li aŭdis la esprimon “infanoj de Kalvario” el la spiritaj lipoj de Abigail, kiam li ŝin tiel vidis en la silento de la nokto, alproksimiĝante al Tarso.

– Efektive, la lukto estas granda – konsentis la damaska konvertito, ŝajnante pli trankvila.

Kaj montriĝante konvinkita pri la neceso ekzameni la realecon de la ordinara vivo, malgraŭ la beleco de la miregindaj manifestiĝoj de la nevidebla mondo, li daŭrigis:

– Ni tamen devas trovi ian rimedon, por liberigi la evangeliajn veraĵojn el la homa konvenciismo. Kio estas la precipa motivo de la superregado de la fariseismo super la eklezio de Jerusalemo?

Simon Petro senkaŝe klarigis:

– La plej grandaj malfacilaĵoj kuŝas en la mona demando. Ĉi tiu domo ĉiutage nutras pli ol cent homojn kaj krom tio helpadas malsanulojn, orfojn kaj senprotektajn estulojn. Por la tenado de la laboroj estas nepre necesaj multe da kuraĝo kaj multe da fido, ĉar neevitablaj estas la ŝuldoj kontraŭ la bonfarantoj de la urbo.

– Sed la malsanuloj – respekte demandis Paŭlo –, ĉu ili ne laboras, pli bone fartante?

– Ili ja laboras – respondis la Apostolo. – Mi organizis laborojn de plantado por tiuj resaniĝintaj kaj ne povantaj tuj foriri el Jerusalemo. Per tio la domo ne bezonas aĉeti legomojn kaj fruktojn. Tiuj, pli bone fartantaj, prenas sur sin la rolon de flegantoj de tiuj malpli sanaj. Ĉi tiu aranĝo ebligis al ni forungi du pagatajn servantojn, kiuj helpadis nin ĉe la frenezuloj nekuraceblaj aŭ malpli facile kuraceblaj. Kiel vi vidas, ĉi tiuj detaloj ne estas preterviditaj, sed eĉ tiel la eklezio dronas en elspezoj kaj ŝuldoj, kiujn nur la kontribuado de la judoj povas malpliigi aŭ nuligi.

Paŭlo komprenis, ke Petro estas prava. Tamen, plej dezirante havigi sendependecon al la klopodoj de siaj samideanoj, li diris:

– Mi do admonas, ke ni devas loki ĉi tie servantojn, kiuj ebligus al la domo vivi per propraj rimedoj. La orfoj, la maljunuloj kaj la viroj al io utilaj povos fari laborojn krom la terkultivaj kaj produkti ion por la nepre necesa enspezo. Ĉiu laborus konforme al siaj propraj fortoj sub la direktado de pli spertaj fratoj. La produktado de la laboroj asekurus la ĝeneralan vivotendon. Kiel ni scias, kie estas laboro, tie estas riĉeco, kaj kie kunlaborado, tie paco. Tio estas la sola rimedo, por emancipi la jerusaleman eklezion el la altrudoj de la fariseismo, kies artifikojn mi ja konas de la komenco de mia vivo.

Petro kaj Johano estis ravitaj. La ideo de Paŭlo estis bonega, venis helpe al iliaj premantaj zorgoj ĉe la malfacilaĵoj, kiuj ŝajnis senfinaj.

– Via projekto estas admirinda – diris Petro –; ĝi ja solvus grandajn demandojn de nia vivo.

La filo de Zebedeo, kies okuloj radiis de ĝojo, siaflanke, ekpritraktis la aferon, oponente:

– Sed la mono? Kie ni ekhavis la kapitalon nepre necesan al tia grandioza entrepreno?!

La eksrabeno profunde ekmeditis kaj respondis:

– La Majstro helpas niajn bonajn intencojn. Barnabas kaj mi, ni ambaŭ faris longan ekskurson en la servado al la Evangelio kaj dum ĝia tuta daŭro ni vivis per nia laborado: mi teksisto, li argilaĵisto, en tiuj lokoj, kie ni haltadis. Post la unua provo ni povus nun reiri al tiuj samaj regionoj kaj viziti aliajn, petante helprimedojn por la eklezio de Jerusalemo. Ni pruvus nian personan malprofitemon, vivante per nia penado, kaj rikoltus la donacojn ĉie, konsciante, ke se ni laboradas por la Kristo, estus juste, se ni ankaŭ petus pro amo al la Kristo. La kolektado starigus la liberecon de la Evangelio en Jerusalemo, ĉar ĝi estus la materialo necesa al definitivaj konstruoj en la kadro de la enspeziga laborado.

Estis tiele skizita tiu programo, kiun la grandanima Apostolo al nacioj estis obeonta dum siaj restantaj tagoj. Plenumante ĝin, li suferos la plej kruelajn akuzojn, sed en la sanktejo de sia sindona kaj sincera koro Paŭlo, krom la grandiozaj apostolaj servoj, ankaŭ faros kolektadon por Jerusalemo ĝis la fino de sia surtera ekzistado.

Aŭdinte lian planon, Simon stariĝis kaj brakumis lin, kortuŝite dirante:

– Vere, mia amiko, ne vane Jesuo persone venis al vi proksime al Damasko.

Neordinara fakto en lia vivo, larmoj staris en la okuloj de Paŭlo. Li signifoplene ekrigardis la eksfiŝiston, konsiderante en sia animo siajn ŝuldojn de danko al la Savinto, kaj diris:

– Mi faros nenion alian, ol mian devon. Mi neniam povos forgesi, ke Stefano eliris el la litoj de ĉi tiu domo, kiuj ankaŭ al mi mem jam servis.

Ĉiuj estis treege kortuŝitaj. Barnabas faris entuziasmajn konsiderojn pri tiu ideo kaj riĉigis la planon per grandnombraj detaloj.

En tiu nokto la sindonaj disĉiploj de la Kristo revis pri la sendependeco de la Evangelio en Jerusalemo, pri la emancipiĝo de la eklezio, liberiĝinta el la absurdaj altrudoj de la sinagogo.

La morgaŭan tagon oni solene cirkumcidis Titon sub la zorga direktado de Jakobo kaj ĉe la profunda naŭzo de Paŭlo el Tarso.

La vesperaj kunsidoj daŭris ankoraŭ pli ol unu semajnon. En la unuaj vesperoj, preparante la spiritojn por malkaŝe defendi la aferon de la nacioj, la eksfiŝisto el Kapernaŭm petis la reprezentantojn de Antioĥia esprimi sian impreson pri la vizitoj al la paganoj en Kipro, Pamfilio, Pisidio kaj Likanonio. Paŭlo, treege malkontenta de tiuj postuloj, truditaj al Tito, petis Barnabason paroli en lia nomo.

La ekslevido el Kipro faris longan raporton pri ĉiuj okazaĵoj, estigante miregon ĉe ĉiuj, kiuj aŭdis lin pri la supermezura povo de la Evangelio super tiuj, kiuj ĝis tiam ankoraŭ ne ekkonis iun puran kredon. Poste, ankaŭ obeante rimarkojn de Paŭlo, Tito ekparolis, profunde emociite de la interpreto de la instruoj de la Kristo, ĉe kio li elmontris, ke li posedas belan kapablon profeti; Jakobo mem lin admiris kaj pli ol unu fojon lin brakumis.

Preskaŭ ĉe la finiĝo de la kunsidoj oni ankoraŭ diskutadis pri la devigeo de la cirkumcido rilate al la nacioj. La eksrabeno sekvadis la debatojn silente, mirante la rezistemon kaj toleremon de Simon Petro.

Konstatinte, ke la malkonsentoj daŭros senfine, la eksfiŝisto stariĝis kaj petis la parolon; tiam li faris la noblan kaj saĝan admonon, pri kiu sciigas la “Agoj de la Apostoloj” (15 : 7 ĝis 11) :

– Fratoj – li komencis per energia kaj serena tono –, vi ja scias, ke jam antaŭ longe Dio elektis nin, por ke la nacioj aŭdu la veraĵojn de la Evangelio kaj kreu al Lia Regno. La Patro, kiu konas la korojn, donis la parolon de la Sankta Spirito al cirkumciditoj kaj necirkumciditoj. En la glora tago de Pentekosto la voĉoj manifestiĝis publike en Jerusalemo kiel al la idoj de Izrael, tiel ankaŭ al tiuj de la paganoj. La Ĉiopova ordonis, ke la veraĵoj estu anoncataj sendistinge. Jesuo asertis, ke la kunlaborantoj de la Regno venos el oriento kaj el okcidento ^(*). Mi do ne komprenas, kiel tiom da malkonsentoj, se la situacio estas ja tiel klara en niaj okuloj. La Majstro praktike montris la neceson de konstanta harmonio: li konversaciadis kun la leĝistoj de la Templo, vizitadis la domon de la impostistoj, havis kuraĝigan vorton por ĉiuj senesperaj, akceptis la ekstreman torturon inter rabistoj. Kial do ni volu izoligi tiujn, kiuj havas la plej grandan bezonon? Ankoraŭ unu argumento, kiun ni devas ne forgesi, estas tio, ke la Evangelio venis en la mondon, kiam ni jam havis la Leĝon. Se la Majstro ĝin ame kaj plej sinofere portis al ni, ĉu estus juste, se ni enfermiĝus en iaj konvenciaj tradicioj, forgesante la laborkampon? Ĉu la Kristo ne ordonis, ke ni prediku la Bonan-Novajaĵon al ĉiuj nacioj? Kompreneble, ke ni ne povos malŝati la havon de la izraelidoj. Ni devas ami en la idoj de la Leĝo, kiaj ni estas, la manifestiĝon de profundaj suferoj kaj de altaj spertoj, kiuj atingas nian koron per tiuj, kiuj antaŭiris la Kriston en la miljara entrepreno gardi la fidon je la unu sola Dio; sed tiu rekono devas inklinigi nian animon strebadi al la elaĉeto de ĉiuj homoj. Forlasi la naciojn al ilia propra sorto estus forĝi feran katenon anstataŭ praktiki tiun amon, kiu kovras ĉiujn pekojn ^(**). Ĝuste pro tio, ke ni bone komprenas la judojn kaj tre estimas la diajn ordonojn, ni devas starigi la plej grand-

(*) Vd, la piednoton sur pĝ. 317. – *La Trad.*

(**) Tiel en Sentencoj, 10:12; en I Petro, 4:8, la Apostolo skribis ke “amo kovras amason da pekoj”. – *La Trad.*

an fratecon kun la nacioj, ŝanĝante ilin en elementojn de dia fruktado. Ni kredas, ke Dio purigas niajn korojn per la fido, sed ne per la regularoj de la mondo. Hodiaŭ ni donas dankon al la Ĉielo pro la glora venko de la Evangelio, kiu estigis nian liberecon: kiel do altrudi al la novaj disĉiploj jugon, kiun, ni konfesu, ni ne povas elporti? Mi do opinias, ke la cirkumcido ne devas esti ago deviga por tiuj, kiuj konvertiĝos al la amo de Jesuo Kristo, kaj kredas, ke ni saviĝos nur per la dia graco de la Majstro, favoro, grandanime konsentata al ni, kiel ankaŭ al ili.

La parolo de la Apostolo efikis sur la boladon de la opinioj simile al forta ĵeto da malvarma akvo. Paŭlo radiis de ĝojego, dum Jakobo ne sukcesis kaŝi sian ĉagrenon.

La admono de la ekŝiŝisto donis materialon por multego da interpretoj: ĝi parolis pri la ama respekto al la judoj, sed ankaŭ pri ia jugo, kiun li ne povis elporti. Neniu tamen kuraĝis malkonfesi liajn nedubeblajn prudenton kaj saĝon.

Post la preĝo Simon petis Paŭlon eldiri sian personan impreson rilate la naciojn. Pli esperplena, la eksrabeno la unuan fojon en la konsilio prenis la parolon, kaj, invitinte Barnabason fari ĝeneralan komenton, petis, kune kun li, la kunsidantaron konsenti al la paganoj la necesan sendependecon koncerne la cirkumcidon.

Nun en ĉio estis ia noto de ĝenerala kontenteco. La rimarkoj de Petro profunde impresis ĉiujn fratojn. Tiam Jakobo prenis la parolon kaj, vidante sin prekaŭ sola ĉe sia vidpunkto, diris, ke Simon estis tre bone inspirita en sia alvoko, sed li petis tri amendojn, por ke la situacio estu perfekte klara. La paganoj estos liberigitaj de la cirkumcido, sed devis preni sur sin la ŝuldiĝon deteni sin de malpuriĝoj ĉe idoloj, de malĉasteco kaj de sufokitaĵoj.

La apostolo al nacioj estis kontenta. La plej granda baro estis formovita.

La morgaŭan tagon la laboroj estis elfinitaj kaj oni protokolis la decidojn sur pergamento. Petro zorgis, ke

ĉiu frato kunportu leteron, kiel ateston de la decidoj, laŭ la peto de Paŭlo, kiu deziris elmontri tiun dokumenton kiel mesaĝon pri la liberigo de la nacioj.

Demandite de la ekŝfĥisto, kiam ili estis duope, pri siaj personaj impresoj rilate tiujn laborojn, la jerusalema ekŝleĝisto respondis kun rideto:

– Unuvorte, mi estas kontenta. La plej malfacila el la demandoj estas solvita. La devigeo de la cirkumcido por la nacioj estis en miaj okuloj ia krimo. Koncerne la amendojn de Jakobo, ili min ne impresas, ĉar idolkulto kaj malĉasteco estas abomenindaĵoj en la individua vivo de ĉiu; pri manĝoj mi opinias, ke ĉiu kristano povas manĝi ĉion, kio al li plej multe plaĉas, kondiĉe ke li sin detenu de iaj ekscesoj.

Petro ridetis kaj klarigis al la eksrabeno siajn novajn planojn. Esperplena li parolis pri la ideo, ke estu farata ĝenerala monkollektado por la eklezio de Jerusalemo, kaj elmontrante sian tute propran prudenton, diris maltrankvila:

– Via projekto pri ekskursoj kaj propagando de la Bona-Novaĵo, celante rikolti iom da rimedoj por la solvo de niaj pli gravaj taskoj, naskas en mi pravan ĝojon, tamen mi de longe meditas pri la situacio de la eklezio de Antioĥia. Laŭ tio, kion mi mem konstatis, mi opinias, ke la institucio bezonas sindonajn servantojn, kiuj alternus en la konstantaj ĉiutagaj laboroj. Via foresto, des pli bedaŭrinde kun Barnabas, kaŭzos malfacilaĵojn, se ni ne faros la necesajn aranĝojn. Jen kiel mi proponas al vi la kunhelpon de du sindonaj kunuloj, kiuj min ĉiam anstataŭas en pli pezaj taskoj. Ili estas Silas kaj Barsabas, du disĉiploj amikaj al la nacioj kaj la liberalaj principoj. Iam kaj iam ili malkonsentas kun Jakobo, kio estas natura; mi supozas, ke ili estos bonegaj helpantoj de via programo.

Paŭlo vidis en ĉi tiu propono la paŝon, kiun li deziris. Apud Barnabas, kiu partoprenis en la konversacio, li tre kortuŝite dankis la ekŝfĥiston. La eklezio de Antioĥia havos do tiujn necesajn rimedojn, kiujn postulis la evangeliaj laboroj. La proponita aranĝo forte plaĉis al li,

des pli, ĉar li tuj eksentis por Silas grandan simpation, supozante en tiu lojalan, vigan kaj sindonan kamaradon.

La misiistoj el Antioĥia post tiu kunveno ankoraŭ restis en la urbo tri tagojn, dum kiuj Barnabas ripozis en la domo de sia fratino; Paŭlo fordankis tiun inviton de Maria Marko kaj restis en la eklezio, studante la estontan situacion kune kun Simon Petro kaj la du novaj kunelpantoj.

En atmosfero de granda harmonio la laboristoj de la Evangelio detale trarigardis ĉiujn postulojn de la projekto.

Io notinda estis la propravola sensocietiĝo de Paŭlo, nur apud la galileaj Apostoloj, sed neniam elirante sur la straton, por eviti kontakton kun la vivanta scenejo de sia uragana pasinteco.

Fine, kiam ĉio estis preta kaj interkonsentita, la misiistoj decidis reveni al Antioĥia. En ĉiuj mienoj montriĝis ĝojo kaj sankta espero pri la estontaj tagoj; tamen okazis kurioza incidento, kiun estas nepre necese reliefigi. Laŭ peto de sia fratino, Barnabas decidis akcepti la kunlaboradon de Johano Marko por nova provo, ke ĉi tiu servu al la Evangelio. Konsiderante la bonan intencon, kun kiu li konsentis la petojn de sia fratino, la ekslevido el Kipro trovis nenecese demandi pri tio sian kamaradon, sed Paŭlo ne ĉagreniĝis: li ricevis la decidon de Barnabas kun kelka miro, kore brakumis la junulon kaj atendis, ĝis la disĉiplo de Petro ion diros rilate la estontecon.

La grupo, nun kun Silas, Barsabas kaj Johano Marko, ekiris al Antioĥia en la plej bona humoro de harmonio. Alternante en la predikato de la eternaj veraĵoj, ili anoncadis la Regnon de Dio kaj faradis resanigojn ĉie, kien ili alvenis.

Veninte al sia destino, ĉe grandaj ĝojelmontroj de la nacioj, ili organizis la celitan planon, por ĝin tuj efikigi. Paŭlo konigis sian intencon reiri al la jam fonditaj kristanaj societoj kaj etendi la evangelian migradon ĝis aliaj regionoj, kie la Kristanismo ne estis konata. Ĉi tiun planon ĉiuj aprobis. La institucio de Antioĥia ri-

cevos la kunlaboradon de Barsabas kaj Silas, la du sindonaj kunuloj, kiuj ĝis tiam estis du fortaj kolonoj de la laboroj en Jerusalemo.

Post la prezento de la parola raporto pri la farotaj klopodoj Paŭlo kaj Barnabas komencis pensi pri la lastaj detalaj disonoj.

– Nun – diris la ekslevido el Kipro – mi esperas, ke vi konsentos tion, kion mi decidis rilate al Johano.

– Johano Marko? – demandis Paŭlo kun miro.

– Jes, mi deziras kunpreni lin kun ni, por alfari lin al la misio.

La eksrabeno kunŝovis la brovojn, kiel li ĉiam faradis, kiam li estis malkontenta, kaj rediris:

– Mi ĝin ne aprobas: via nevo estas ankoraŭ tro juna por tiaj entreprenoj.

– Nu, mi promesis al mia fratino akcepti lin en niajn laborojn...

– Ne eble.

Tiam fariĝis inter ili ambaŭ disputo, en kiu Barnabas vidigis sian malkontentecon. La eksrabeno penis pravigi sin, dum la disĉiplo de Petro prezentis kiel motivon de sia insistado sian ligitan vorton kaj iom ĉagrenite mallaŭdis la sintenadon de sia amiko. Tamen la eksleĝisto ne lasis sin konvinki. La reakcepto de Johano Marko, li diris, ne estas justa; tiu povos denove ne respondi al ilia konfido, dekliniĝi de la prenitaj ŝuldiĝoj, preterlasi la oportunan okazon de la sinofero. Li rememorigis la persekutojn en Antioĥia en Pisidio, la neeviteblajn malsanojn, la moralajn dolorojn, kiujn ili travivis en Ikonio, la kruelan ŝtonumadon sur la placo de Listra. Ĉu la junulo en tia mallonga tempo estas preparita, por kompreni la profundecon de ĉiuj ĉi okazaĵoj, ĉe kiuj la animo estas instigata ĝoji pro la atesto?

Barnabas estis ĉagrenita, havis malsekajn okulojn.

– En la fino de la finoj – li diris kortuŝite –, neniuj el ĉi tiuj argumentoj laŭ tute bona konscienco min konvinkas kaj al mi klarigas. Unue, mi ne vidas, kial ni rompus niajn korligilojn...

La eksrabeno ne lasis lin fini kaj diris:

– Nur ne tio! Nia amikeco staras multe pli alte ol tiuj cirkonstancoj. Niaj ligiloj estas ja sanktaj.

– Nu – akcente rediris Barnabas –, kiel mi do komprenu vian rifuzon? Kial ni ne havigu al la junulo ankoraŭ unu provon de reboniga laboro? Ĉu ne estus nekaritemo flanken meti iun oportunan okazon eble providencan?

Paŭlo fikse ekrigardis sian amikon kaj respondis:

– Mia intuicio, en ĉi tiu rilato, estas malsama ol la via. La amikeco al Dio, Barnabas, preskaŭ ĉiam estas neakordigebla kun la amikeco al la mondo. Se ni leviĝas, por fidele plenumi nian devon, la ideoj de la mondo leviĝas kontraŭ nin. Ni ŝajnas malicaj kaj sendankaj. Tamen aŭskultu min: neniu trovas fermitaj la pordojn de la oportunaj okazoj, ĉar ilin malfermas al ni la Ĉiopova. La okazoj estas unuj samaj por ĉiuj, sed la kampoj devas esti malsamaj. En la ĝustadire homa laboro la provoj povas esti ĉiutage ripetataj. Ĉi tio estas justa. Sed mi opinias, ke se en la servado al la Patro ni interrompas ian komencitan taskon, tio estas signo, ke ni ankoraŭ ne posedas ĉiajn spertojn necesajn al la kompleta homo. Se homo ankoraŭ ne havas ĉiujn plej noblajn sciojn pri sia vivo kaj siaj devoj sur la Tero, kiel do li sukcese sin donus al la dia servado? Kompreneble ni ne povas aserti, ĉu tiu aŭ tiu alia jam finis la serion de siaj homaj provoj kaj ke li de hodiaŭ estas sufiĉe lerta por servi al la Evangelio, ĉar en ĉi tiu rilato ĉiu elmontriĝas mem. Mi ja kredas, ke via nevo atingos tiun pozicion post ankoraŭ kelke da luktoj. De nia flanko, ni ja devas konsideri, ke ni estas farontaj ne ian provon, sed ateston. Ĉu vi komprenas la diferencon?

Barnabas komprenis la grandegan gravecon de ĉi tiuj koncizaj, nerefuteblaj motivoj, kaj silentis, dirante post sekundoj:

– Vi estas prava. Ĉi tiun fojon mi do ne povos iri kun vi.

Paŭlo eksentis la tutan malĝojon, kiu travidiĝis tra ĉi tiuj vortoj kaj, longe meditante, emfaze diris:

– Ni ne malĝoju. Mi nun pensas pri la eblo de via foriro, kune kun Johano Marko, al Kipro. Li tie trovas kampon taŭgan por la al li necesaj laboroj kaj samtempe zorgus pri la institucio, kiun ni fondis en tiu insulo. Laŭ ĉi tiu plano ni tenadus plue nian perfektan kunlaboradon, ankaŭ rilate la monkokolektadon por la eklezio de Jerusalemo. Superflue estas paroli pri la utileco de via ĉeesto en Nea-Pafos kaj Salamis. De mia flanko, mi kunprenus Silason kaj penetrus en Taŭruson, kaj la eklezio de Antioĥia ankoraŭ havus la servojn de Barsabas kaj Tito.

Barnabas estis plene kontenta. Ĉi tiu projekto ŝajnis al li bonega. Paŭlo, en liaj okuloj, estis ĉiam ankoraŭ la junulo, kiu trovas oportunajn solvojn.

Post nemultaj tagoj, direkte al Kipro, kie li servis al Jesuo, ĝis li poste iros Romon, Barnabas kun sia nevo foriris al Seleŭkia; ĉe la adiaŭo li kaj Paŭlo brakumis unu la alian kiel du tre amataj fratoj, kiujn la Majstro vokis al malsamaj destinoj.



Migradoj kaj sinoferoj

En kompanio de Silas, kiu akordis kun lia strebado al laboro, la eksrabeno foriris de Antioĥia, enprofundiĝis en la montarojn kaj post grandegaj malfacilaĵoj atingis sian naskiĝurbon. Lia kamarado, indikita de Simon Petro, baldaŭ kutimiĝis al lia labormaniero. Silas havis paceman temperamenton, kiun pliriĉigis rimarkindaj spiritaj kvalitoj pro lia absoluta sindoneco al la Dia Majstro; siaflanke Paŭlo estis plene kontenta de lia kunhelpado. Tra longaj kaj apenaŭ ireblaj vojoj, ili sin nutradis mizere, preskaŭ nur per okaze trovataj sovaĝaj fruktoj. Tamen la jerusalema disĉiplo elmontradis egalan bonhumoron en ĉiaj cirkonstancoj.

Antaŭ ol atingi Tarson, ili predikadis la Bonan-Nov-aĵon tra la tuta vojaĝo. Romaj soldatoj, mizeregaj sklavoj, modestaj karavanistoj ricevis el iliaj lipoj la konsolajn instruojn de Jesuo, kaj ne malmultaj rapidece kopiis al si iajn kelkajn notojn de Levi, prefere tiujn, kiuj plej alĝustiĝis al ilaj personoj mem. Laŭ ĉi tiu maniero la Evangelio ĉiam pli disvastiĝadis, plenigante la korojn per esperoj.

En la urbo de sia lulilo, nun pli mastrante siajn konvinkojn, la teksisto, kiu sin fordonis al Jesuo, abunde dissemadis la ĝojojn de la Elaĉeta Evangelio. Multaj admiris sian samurbanon, ĉiam pli rimarkinde ŝanĝiĝinta; aliaj daŭrigis la malbelan kampanjon de ironiado kaj bedaŭrinda forgeso pri si mem; tamen Paŭlo sentis sin firma en la fido, kiel neniam antaŭe. Li trovis la malnovan domon, kie li naskiĝis, revidis la plaĉan lokon,

kie li ludadis dum sia frua infaneco, rigardadis la sportejon, kie li kondukadis sian roman bigon; revivigante ĉi tiujn faktojn, li tamen ne suferis ilian frakasantan influon, ĉar li ĉion transdonis al la Kristo kiel havaĵon, kiun li iam poste ekposedos, kiam li estos plenuminta sian dian komision.

Post nelonga estado en la ĉefurbo de Kilikio, Paŭlo kaj Silas ekpenis atingi la suprojn de Taŭruso, en nova etapo de la malglata komenciĝanta migrado.

Noktojn sub la roso, multegon da sinoferoj, minacojn de banditoj, sennombrajn danĝerojn travivis la misiistoj, kiuj ĉiuvespere transdonis al la Dia Majstro la rezultatojn de la rikolto kaj matene petis lian favorkorecon nepre havigi al ili la altvaloran oportunan okazon de laboro, kiel ajn peza la ĉiutaga tasko.

Plenaj de tiu aktiva fido, ili venis al Derbe, kie la eksrabeno emociite brakumis la amikojn, kiujn li sukcesis fari post sia dolora resaniĝo ĉe la unua vojaĝo.

La Evangelio ĉiam ankoraŭ agadis sur ĉiuj kampoj. Profunde emociite, la damaska konvertito, dum la natura disvolviĝado de la laboroj, komencis ricevi sciigojn pri la agado de Timoteo. La juna filo de Eŭnike, laŭ la famo, povosciis mireginde pliriĉigi siajn konojn. La malgranda kirstanaro de Derbe jam ŝuldis al li eminentajn bonfarojn. Pli ol unu fojon la nova disĉiplo tien iris en aktivaj misioj. Li dissemadis resanigojn kaj konsol-ojn. Lia nomo estis benata de ĉiuj. Plena de ĝojo, la eksrabeno, fininte siajn taskojn en tiu urbeto, ardante de sopiro direktis sin al Listra.

Lojda akceptis lin, kaj ankaŭ Silason, tiel same ĝoje, kiel je la unua fojo. Ĉiuj volis sciigojn pri Barnabas, kaj Paŭlo komplezeme kaj plezure ilin donis. En la posttagmezo de tiu tago la damaska konvertito kun korelversado brakumis Timoteon. La junulo revenis de sia ĉiutaga laboro kiel paŝtisto. Post nemulte da minutoj Paŭlo sciis la amplekson de liaj spiritalaj progresoj kaj akiroj. La eklezio de Listra estis riĉa per gracoj. La kristana junulo sukcesis konverti multajn: du judoj el la plej influaj en la urba regado, el la plej grandaj instig-

antoj de la ŝtonumado de la Apostolo, nun estis fidelaj observantoj de la doktrino de la Kristo. En tiu momento oni pensis pri la konstruado de iu preĝejo, kie la mal-sanuloj ricevus helpon kaj la forlasitaj infanoj havus varman neston. Paŭlo ekĝojis.

En tiu sama vespero okazis en Listra granda kunveno. La Apostolo al nacioj tie trovis koran atmosferon, kiu havigis al li grandan konsolon. Li elvolvis la celon de sia vojaĝo, samtempe kiel li konfesis sian zorgon pri la disvastigado de la Evangelio kaj aldonis la aferon pri la eklezio de Jerusalemo. Kiel en Derbe, tiel ĉi tie ĉiuj amikoj kontribuis laŭpove. Paŭlo ĝojegis, konstatante la palpeblan venkon de klopodoj de Timoteo ĉe la malalta klaso.

Profitante lian estadon en Listra, la bonkora Lojda konfidencis al li siajn personajn bezonojn. Ŝi kaj Eŭnike havis en Greklando parencojn per la patro de Timoteo, kiuj insiste petis pri ilia persona ĉeesto, por havi ĉe si ilian koran amikecon. La monrimedoj, kiuj al ili restas en Listra, estas preskaŭ elĉerpitaj. Krom tio ŝi deziras, ke Timoteo sin fordonu al la servado al Jesuo, prilumante al si la koron kaj la intelekton. La grandanima maljunulino kaj ŝia filino projektis do sian definitivan transloĝigon kaj demandis la Apostolon, ĉu li povas akcepti la kompanion de la junulo, almenaŭ kelkan tempon, ne nur por tio, ke li faru pli da akiroj sur la kampo de la praktiko, sed ankaŭ tial, ĉar tio plifaciligus la transigon de ĉiuj en tiel foran lokon.

Paŭlo volonte konsentis: kun sincera plezuro li akceptis la kunlaboradon de Timoteo. Siaflanke la junulo, eksciinte ĉi tiun decidon, estis tiel ravita, ke li ne havis vorton, por esprimi sian profundan dankon.

Kelkajn tagojn antaŭ ol ili foriros, Silas saĝe sin enmiksas en la aferon kaj demandis la Apostolon, ĉu ne estus bone cirkumcidi la junulon, por ke la judismo ne malhelpu la apostolajn laborojn; por plifortigi sian argumentadon, li citis la barojn kaj akrajn luktojn en Jerusalemo. Paŭlo longe konsideris, pensis pri la neceso dissemi la Evangelion, skandalante nenium, kaj konsentis

tiun proponon. Timoteo estis predikonta publike; li kunvivis kun la nacioj, sed pleje kun la izraelidoj, mastroj de la sinagogoj kaj aliaj institucioj, kie la religio estis instruata al la popolo. Estis do saĝe pripensi tiun proponon, por ke la junulo ne estu ĝenata ĉe ili.

La filo de Eŭnike senhezite obeis. Post kelke da tagoj, adiaŭinte siajn fratojn kaj tiujn noblajn sinjorinojn, kiuj en larmoj deziris al ili la pacon de Dio, la misiistoj foriris el Ikonio plenaj de forta kuraĝo kaj de solida intenco servadi al Jesuo.

Laŭ la amplena spirito de predikado kaj frateco, etendante la povon de la elaĉetanta Evangelio super la animojn kaj neniam forgesante la helpon al la eklezio de Jerusalemo, la disĉiploj vizitis ĉiujn vilaĝetojn de Galatujo, iom longe restante en Antioĥia, en Pisidio, kie ili iel perlaboris sian vivtenon.

Paŭlo ĝojegis. Liaj penoj, kune kun Barnabas, ne estis senfruktaj. En la plej malproksimaj lokoj, tie, kie li ĝin ne atendis, jen venis sciigoj el la antaŭe fonditaj eklezioj. Tio estis bonfaroj al mizeruloj, pli bona farto aŭ resaniĝoj de malsanuloj, konsoloj al homoj en ekstrema malespero. La Apostolo spertis la ĝojon de seminto, kiu ekvidas la unuajn florojn kiel brilajn promesojn de la kampo.

La senditoj de la Bona-Novaĵo trairis Frigion kaj Galatujon sen gravaj persekutoj. La nomo de Jesuo estis nun eldirata kun pli da respekto.

Kiam la eksrabeto plej multe laboradis por la diskonigado de la Evangelio en Azio, li unu nokton, post la kutimaj preĝoj, ekaŭdis voĉon, kiu amplene diris al li:

– Paŭlo, ni iru antaŭen! Ni portu la lumon de la Ĉielo en aliajn ombrojn; aliaj fratoj atendas vin sur la senfina vojo!

Tio estis Stefano, la amiko en ĉiuj horoj, kiu, reprezentante la Dian Majstron apud la Apostolo al nacioj, instigis lin al la dissemado en aliajn grundojn.

La brava kuriero de la eternaj veraĵoj komprenis, ke la Sinjoro destinis por li novajn traesplrendajn kamp-

ojn. La morgaŭan tagon, informinte Silason kaj Timoteon pri la okazintaĵo, li inspirite finis:

– Mi do estas konvinkita, ke la Majstro vokas min al novaj tasko. Estas juste. Cetere mi konfesas, ke ĉi tiuj regionoj jam ricevis la dian semon.

Kaj post paŭzo li daŭrigis:

– Ĉi tiun fojon ni ne renkontis multe da malfacilaĵoj. Antaŭe, kun Barnabas, ni spertis elpelojn, karceron, batojn, ŝtonojn, sed nun nenio tia okazis. Tio signifas, ke ĉi tie jam ekzistas firmaj bazoj por la venko de la Kristo. Estas do necese iri tien, kie staras la baroj, kaj ilin disbati, por ke la Majstro estu konata kaj glorata, ĉar ni ja troviĝas implikitaj en batalo kaj ni devas ne forlasi la frontojn.

La du disĉiploj aŭdis kaj ekpenis mediti pri la grandeco de tiaj paroloj.

Post semajno jen ili piediris direkte al Misia, tamen Paŭlo intuicie ekkomprenis, ke ne tiu estus la nova kampo de agado. Li ekpensis iri al Bitinio, sed tiu voĉo, pri kiu la nobla Apostolo supozis, ke ĝi estas de la “Spirito de Jesuo” (*), inspiris al li ŝanĝi sian projekton, rekomendante malsupreniri al Troas. Veninte al sia celo, ili lacekonsumitaj enloĝiĝis en modestan gastejon. Paŭlo, kiel signifoplenan vizion de la spirito, ekvidis viron makedonan, kiun li identigis laŭ la karakteriza vesto, maltrankvile gestantan al li kaj dirantan: “Transpasu al Makedonujo kaj nin helpu!”(**). La ekslegisto komprenis ĉi tiun fakton kiel ordonon de Jesuo rilate liajn novajn taskojn. Pri ĝi li sciigis siajn kunulojn tuj en la sekvanta mateno, ne forgesante pesi la grandegan malfacileco de la permara vojaĝo, ĉar li havis neniom da mono.

– Tamen – li finis – mi kredas, ke la Majstro tie provizos nin per ĉio necesa.

Silas kaj Timoteo respekte silentis.

(*) Agoj, 16:7. – *Noto de la Aŭtoro.*

(**) Agoj, 16:9. – *La Trad.*

Elirinte matene sur la sunan straton, jen la Apostolo ekvidis butikon kaj tien ekiris kun senpacienca ĝojo: tio estis Luko, kiu laŭŝajne faris aĉetojn.

La eksrabeno kune kun la disĉiploj alproksimiĝis kaj delikate frapis lin sur la ŝultro:

– Vi ĉi tie? – demandis Paŭlo kun kora rideto.

La du amikoj ĝoje brakumis unu alian. La predikisto de la Evangelio prezentis al la kuracisto la novajn kamaradojn kaj informis lin pri la celo de sia ekskurso tra tiuj regionoj. Siavice Luko diris, ke de du jaroj li estas komisiita por la kuracoservoj sur granda ŝipo, tie ankranta, transite al Samotrake.

Paŭlo plej interese ricevis ĉi tiun informon. Tre impresite de tiu renkontiĝo, li konigis al la amiko la aŭdan revelacion pri ilia irado kaj ankaŭ la hieraŭan vizion.

Kaj konvinkite pri la helpon de la Majstro en tiu momento, li per certeca tono diris:

– Mi estas certa, ke la Sinjoro sendis la necesajn rimedojn per vi. Ni devas transpasi al Makedonujo, sed ni havas neniom da mono.

– Rilate ĉi tion – malkaŝe diris Luko – ne maltrankviliĝu. Mi ja ne havas riĉecon, sed mi gajnas honorarion. Ni estos vojkamaradoj, kaj mi ĉion tre plezure pagos.

La konversacio daŭris plu animita, dum kiu la gasto de Antioĥia raportis siajn konkerojn por Jesuo. Tra siaj vojaĝoj li uzis ĉiujn oportunajn okazojn por la Evangelio, havigante al ĉiuj, kiuj venis al li, la trezorojn de la Bona-Novaĵo. Kiam li diris, ke li troviĝas tute sola en la mondo pro la forpaso de sia patrino en la spiritan sferon, Paŭlo emfaze diris al li:

– Nu, Luko, se vi nun ne estas ligita per tuj kontentigenda ŝuldiĝo, kial do vi ne donus vin tute al la laboroj de la Dia Majstro?

Ĉi tiu demando iom emociis la kuraciston, kvazaŭ ia revelacio. Kiam forpasis la surpriziĝo, Luko iom semdecide respondis:

– Efektive, tamen estas konsiderendaj la profesiaj devoj...

– Sed – rediris Paŭlo –, kio estis Jesuo, se ne la Dia Kuracisto de la tuta mondo? Ĝis hodiaŭ vi kuracis korpojn, kiuj pli aŭ malpli frue iale pereos. Ĉu prizorgi la spiriton ne estus pli utila peno? Per ĉi tio mi ne intencas diri, ke oni devas malŝati la propre mondan medicinon: tia tasko koncernus homojn, kiuj ankoraŭ ne posedas tian spiritan kapitalon, kian vi havas. Mi ĉiam opiniis, ke la korpa medicino estas tuto el sanktaj provoj, kiujn la homo ne povas flanken meti, ĝis li decidigos fari la dian kaj neŝanĝeman provon de la spirita kuracado.

Luko serioze ekmeditis pri ĉi tiuj vortoj kaj rediris:

– Vi estas prava.

– Ĉu vi volas kunlabori kun ni ĉe la evangelizado de Makedonjo? – demandis la eksrabeno kun sento de venko.

– Mi ja iros kun vi – fine diris Luko.

Ĉe la kvar disĉiploj de la Kristo fariĝis grandega ĝojo.

En la sekvanta tago la misiistoj veturis al Samotrake. Luko klarigis sian konduton, kiel li nur povis, petante de la ŝipestro forpermeson por unu jaro; kaj prezentinte anstataŭonton, li facile ricevis konsenton pri sia intenco.

Sur la ŝipo, kiel li ĉie faris, Paŭlo uzis ĉiujn okazojn por la predikado. La plej etaj aferoj inspiris grandiozajn evangeliajn temojn al lia supera hermeneŭtiko. La ŝipestro mem, vera romano, plezuregis lin aŭdante.

Dum tiuj vojaĝoj Paŭlo el Tarso ekrlatis kun granda nombro da simpatiantoj de la Evangelio, akirante al si multe da amikoj, cititaj en liaj estontaj epistoloj.

Elŝipiĝinte, la misiistoj, nun kun la altvalora kunlaborado de Luko, ripozis du tagojn en Neapolis kaj de tie iris al Filipi. Preskaŭ veninte al la urbo, Paŭlo proponis, ke Luko kaj Timoteo per aliaj vojoj iru al Tesaloniko, kie ili kvar poste kolektiĝos. Laŭ ĉi tiu programo neniu vilaĝo estus flanke lasita kaj la semoj de la Regno de Dio estus ĵetataj eĉ en la plej simplajn mediojn. Ĉi tiu ideo estis ĝoje aprobita.

Luko sin ne detenis kaj demandis, ĉu Timoteo estas cirkumcidita; li konis la ĉikanojn de la judoj kaj ne deziris malpacigojn en siaj komencaj laboroj.

– Ĉi tiu demando – klarigis la Apostolo – estas jam necese solvita. La sovaĝaj humiligoj, truditaj al juna samkredano, kiun mi kunprenis al Jerusalemo, ne al konsilio de la sinagogo, sed al kunveno de la eklezio, igis min pensi pri la situacio de Timoteo, kiu ofte bezonas la favorojn de la izraelidoj en la daŭro de la predikoj. Tiel longe, ĝis Dio cirkumcidos tiom da hardiĝintaj koroj, ni nepre devas agadi prudente, sen kolizioj, kiuj vanigus niajn klopodojn.

Post ĉi tiu klarigo de la afero ili eniris en la urbon, kie la kuracisto kaj la junulo el Listra iom ripozis, antaŭ ol foriri al Tesaloniko laŭ malsamaj vojoj, por plimultiigi la fruktojn de la misio.

Ili prenis al si ĉambron en mizera gastejo, kiun la loĝantoj de la urbo rezervis por la fremdlandanoj. Post tri noktoj la amikoj de Jesuo iris al la preĝodomo, kiu staris ĉe la bordo de la rivero Gangas. Filipi ne havis sinagogo, kaj la sanktejo, destinita por la preĝoj, kvankam nomata “domo”, estis nenio alia, ol agrabla natura loko, ĉirkaŭita de ruinaj muroj.

Sciante pri la religia stato de la ubro, Paŭlo tien iris kun siaj kamaradoj. Kun granda surpriziĝo la misiistoj tie vidis nur sinjorinojn kaj knabinojn preĝantajn. La eksrabeno decideme eniris en tiun rondon el virinoj kaj parolis pri la celo de la Evangelio, kvazaŭ li starus antaŭ grandnombra publiko. Tiuj virinoj estis ravitaj de lia flama kaj belega parolo. Ricevante sciigojn pri la Majstro, ili diskrete forviŝadis la larmojn, fluantajn sur iliaj vizaĝoj, kaj unu el ili, nomata Lidia, digna kaj grandanima vidvino, alproksimiĝis al la misiistoj kaj, konfesante, ke ŝi estas konvertita al la atendita Savinto, oferis al tiuj sian propran domon, por ke ili fondu la novan eklezion.

Paŭlo el Tarso ŝin longe rigardis kun larmoj. Aŭdante sian voĉon plenan de kristata sincereco, li rememoris, ke en oriento, en la neforgesebla tago de Kalvario,

nur virinoj akompanis Jesuon ĉe tiu dolora travivaĵo kaj estis la unuaj homoj, kiuj vidis lin post lia glora releviĝo; nun ankoraŭ ili, en la dolĉa spirita kunveno, ricevas, la unuaj en okcidento, la parolon de la Evangelio. Silente la Apostolo al nacioj rigardadis la grandan nombron da knabinoj, genuantaj en la karesa ombro de la arboj. Observante iliajn helkolorajn vestojn, li havis la impreson, kvazaŭ li vidas antaŭ si gracian aron da tre blankaj kolomboj, tuj disportantaj la instruojn de la Kristo tra la mirinda ĉielo super Eŭropo.

Tial, kontraŭ la atendo de la kunuloj, la energia predikisto afable respondis al Lidia:

– Ni akceptas vian gastigon.

De post tiu minuto estis forĝita inter Paŭlo el Tarso kaj lia amata eklezio de Filipi la plej bela amikeco.

Lidia, kies domo estis tre bonstata dank'al ŝia komercado per purpuro, kun neesprimebla ĝojo engastigis la disĉiplojn de la Mesio. Dume Luko kaj Timoteo vojaĝadis plue. Silas kaj la ekslegisto el Jerusalemo sin fordonis al la servado al la Evangelio ĉe la noblaj filipianoj.

La urbo distingiĝis per sia roma spirito. Ĉe la strat-oj estis pluraj temploj, konsekritaj al la antikvaj dioj. Kaj ĉar nur virinoj iris al la preĝodomo, tial Paŭlo, kun la maltimemo, kiu lin karakterizis, decidis predikadi la Evangelion antaŭ la tuta publiko.

En tiu sama tempo en Filipi estis antaŭdiristino, kiu famiĝis en la ĉirkaŭaĵoj. Simile kiel laŭ la tradicioj el Delfoj, ŝiaj paroloj estis rigardataj kiel neerarema orakolo. Tio estis knabino, kies mastroj ekspluatadis ŝiajn psikajn kapablojn. La mediumeco estis profitata de malpli progresintaj Spiritoj, kiuj plezuris donante respondon pri mondaj aferoj. La situacio estis tre enspeziga por tiuj, kiuj ŝin malnoble ekspluatadis. Okazis, ke tiu junulino ĉeestis la unuan predikon de Paŭlo, ricevitan de la popolo kun nesuperebla sukceso. Post tiu evangelia instruado la misiistoj observis la knabinon, kiu per laŭta voĉo, kiu impresis la publikon, komencis kriadi:

– Akceptu la senditojn de Dio la Plejalta! Ili proklamas al vi la vojon de savo!

Paŭlo kaj Silas iom perpleksiĝis, tamen nenion rediris, diskrete konservante tiun okazaĵon en la koro. Sed en la sekvanta tago tiu fakto refariĝis, kaj dum tuta semajno la disĉiploj de la Evangelio aŭdadis, post la predikoj, la estulon, kiu ekposedis la knabinon kaj superŝutis ilin per laŭdoj kaj grandefektaj titoloj.

La eksrabeno ekde tia unua manifestiĝo penis informiĝi, kiu estas tiu nekonata junulino kaj tiam eksciis la antaŭaĵojn de la afero. Instigite de la facila mongajno, ŝiaj mastroj instalas kabineton, kie la antaŭdiristino akceptadis la klientojn. Siaflanke ŝi iom post iom pasis de viktimo al kunfirmanino, ĉar riĉa estis la enspezo. Paŭlo, kiu neniam toleris komercadon per la ĉielaj bonaĵoj, komprenis la kaŝitan aranĝon de la okazaĵoj kaj, mastrante ĉiujn detalojn de la afero, atendis, ĝis la vizitanto el la nevidebla mondo denove aperos.

Tial, post la prediko sur la placo, kiam la junulino komencis krei: “Akceptu la senditojn de la savo! Ili estas ne homoj, sed anĝeloj de la Plejaltulo!”, la konvertito apud Damasko firmaŝe malsupreniris de la tribuno kaj, direktante sin al la parolantino, regata de ia stranga influo, imfaze ordonis al la manifestiĝanto:

– Malica Spirito, ni estas ne anĝeloj, sed laborantoj, luktantaj kontraŭ niaj propraj mizeraĵoj pro amo al la Evangelio. En la nomo de Jesuo Kristo mi ordonas al vi, ke vi eliru el ŝi por ĉiam! Mi malpermesas al vi, en la nomo de la Sinjoro, ke vi dissemu konfuzon inter la homoj, instigante malnoblajn interesojn de la mondo malprofite por la sanktaj interesoj de Dio!

La kompatinda knabino tuj rericevis fortojn kaj liberiĝis el tiu malbonfara influado.

Ĉi tiu fakto naskis grandegan miron inter la popolo. Silas mem, kiu iel plezuradis aŭdante la parolojn de la antaŭdiristino, rigardante ilin kiel ian spiritan konsolon, miregis.

Kiam ili estis duope, li deziris, ke Paŭlo klarigu al li la motivojn de tia konduto, kaj demandis:

– Ĉu ŝi ja ne paroladis en la nomo de Dio? Ĉu la propagando, kiun ŝi faradis, ne estis do altvalora helpo al ni?

La Apostolo ridetis kaj respondis:

– Ĉu, Silas, oni povas sur la Tero taksi iun laboron, antaŭ ol ĝi estas finita? Tiu Spirito ja parolis pri Dio, tamen ne venis de Dio. Cetere, kion ni faris, por ricevi laŭdojn? Tage kaj nokte ni bataladas kontraŭ la neperfektaĵoj de nia animo. Jesuo ordonis al ni instrui, por ke ni amare lernu. Vi ja scias, kiel mi senĉese luktas kontraŭ la dorno de la malsuperaj deziroj. Kiel do! Ĉu juste estus, ke ni akceptu ne merititajn titolojn, se la Majstro deklinis de si la epiteton “bona”? Estas kompreneble, ke se tiu Spirito estus veninta de Jesuo, aliaj estus liaj vortoj: li stimulus niajn klopodojn, komprenante niajn malfortaĵojn. Cetere, mi penis informiĝi pri tiu junulino kaj mi scias, ke ŝi estas hodiaŭ la ŝlosilo de granda komerca movado.

Silas estis impresita de ĉi tiuj plej pravaj klarigoj, sed, esprimante sian malfacilecon pri ilia plena kompreno, diris:

– Tamen, ĉu tiu okazaĵo estas instruo, por ke ni ne ekriklatu kun la nevidebla regiono?

– Kiel vi povis veni al tia konkludo? – respondis la eksrabeno kun granda miro. – Kristanismo sen profetismo estus ia korpo sen animo. Se ni fermos la pordon de komunikiĝado kun la sfero de la Majstro, kiel do ni ricevos liajn instruojn? La pastroj estas homoj, la temploj estas el ŝtono. Kio estus kun nia tasko sen la lumo de la supera regiono? El la grundo fontas multe da nutraĵo, sed nur por la korpo; por la nutrado de la spirito nia animo devas suprenflugi al la Ĉielo kaj kalkuli je la helpo de Dio. En ĉi tiu rilato nia tuta agado kuŝas en la ricevitaj donoj. Ĉu vi jam pensis pri la Kristo sen resurekto kaj sen interparolo kun siaj disĉiploj? Neniu povas ŝlosi la pordojn, kiuj kondukas nin al la Ĉielo. La Kristo vivas kaj neniam mortos. Li kunvivis kun siaj amikoj, post Kalvario, en Jerusalemo kaj Galileo; li alportis pluvon da lumo kaj saĝo al siaj galileaj kunlaborantoj, ĉe Pentekosto; li vokis min proksime de Damasko; li irigis senditon, por liberigi Petron, kiam la nobla fiŝisto ploradis en la karceron...

La voĉo de Paŭlo en ĉi tiuj profundaj elvokoj havis mirindan akcenton. Silas komprenis kaj silentis kun larmantaj okuloj.

Sed tiu okazaĵo havis pli grandajn efikojn, ol tiuj, kiujn la Apostoloj de la Majstro povis atendi. La antaŭdiristino ne plu ricevis la viziton de tiu estulo, kiu disdonadis ĉiaspacajn respondojn. La pasie kutimaj konsultantoj vane iris al ŝi. Vidante sin senigitaj je tiu facila enspezo, tiuj negocistoj, trafitaj de tia malprofito, levis grandan agitadon kontraŭ la misiistoj.

Disvastiĝis la famo, ke Filipi, dank'al la trokuraĝo de la revolucia predikisto, estis senigita je la protekto de la spiritoj de Dio. La fanatikuloj ekzaltiĝis. Post tri tagoj Paŭlo kaj Silas sur la placo mem estis surprizitaj de atako de la popolamaso, ligitaj al tre pezaj ŝtupoj kaj senkompatate vergobatitaj. Sub la mokfajfado de la malklera homamaso ili humile submetiĝis al tiu torturo. Kiam ili sangadis sub la kruelaj vergoj, la aŭtoritatuloj enpaŝis en la aferon kaj ili, senfortaj kaj ŝanceliĝe paŝantaj, estis ĵetitaj en malliberejon. En la senluma kaj turmenta nokto, ne povante dormi pro la akregaj doloroj, la disĉiploj de Jesuo pasigis la tempon en preĝoj, saturitaj de luma fervoro. Ekstere muĝis la tempesto per timegigaj tondroj kaj siblantaj ventoj. Ŝajnis, ke la tuta Filipi estas ĉe siaj fundamentoj skuata de la frakasanta uragano. Estis jam post noktomezo kaj la du Apostoloj laŭte preĝadis. Vidante ilin preĝantaj, la plej proksimaj kaptitoj, ŝajnis, ilin akompanadis, laŭ la esprimo de la mienoj. Paŭlo tra la kradoj ilin rigardis kaj, pene alproksimiĝinte, komencis predikadi la Regnon de Dio. Kiam li konsideradis la subitan tempeston, kiu trafis la animon de la disĉiploj, dum Jesuo dormadis en la ŝipeto, mirakleca okazaĵo ekfrapis la rigardon de la malliberuloj: la multepezaj pordoj de la grandnombraj karceroj senbrue malfermiĝis. Silas palegiĝis; Paŭlo ĝin komprenis kaj eliris renkonte al siaj kamaradoj. Per impresa tono li predikadis plu la eternajn veraĵojn de la Sinjoro; kaj ekvidinte dekojn da viroj kun vila brusto, longa barbo kaj malgaja animo, kvazaŭ ili tute forgesis

la mondon, la Apostolo al nacioj pli entuziasme parolis pri la misio de la Kristo kaj petis, ke neniu penu fuĝi. Tiuj, kiuj rekonos sian kulpon, danku la Patron por la bonfaro de la puno; tiuj, kiuj opinios sin senkulpaj, elverŝu sian ĝojon, ĉar nur la torturoj de la justulo povas savi la mondon. Ĉi tiuj argumentoj de Paŭlo retenis tiun tutan strangan malgrandan aŭdantaron: neniu ekpensis iri al la elirpordo; kolektiĝinte ĉirkaŭ tiun nekonaton, kiu tiel bone povosciis paroli al la malfeliĉuloj, multaj kun larmoj genuiĝis kaj konvertiĝis al la Savinto, kiun li bonkore kaj energie anoncis.

Ĉe tagiĝo, post la tempesto, la malliberejestro vekigis, ĝenata de tiu eksterorda voĉbruo. Vidante la pordojn malfermitaj kaj timante pri sia respondeco, li instinkte provis mortigi sin, sed Paŭlo alpaŝis kaj nebligis al li tiun ekstreman agon, klarigante al li, kio okazis. Ĉiuj malliberuloj humile reiris en siajn karcerojn. Lukano, la malliberejestro, konvertiĝis al la nova doktrino. Antaŭ ol la taga lumo superverŝis la kampojn, jen li plej kortuŝite faris al la Apostoloj urĝkuracadon, lavante al ili la batvundojn. Loĝante apud la malliberejo, li kondukis la disĉiplojn en la internon de sia hejmo, ordonis regali ilin per nutraĵo kaj revigliga vino. Tuj frue matene la urbestroj de Filipi estis informitaj pri tiuj okazaĵoj. Timoplene, ili ordonis liberigi la predikistojn, sed Paŭlo, dezirante asekuri la kristanajn laborojn, komenciĝantajn en la eklezio, fondita en la domo de Lidia, diris, ke li estas romano, por ke la urbestroj de Filipi pli respektu la ideojn de la nazareta profeto. Li forpuŝas la ordonon de liberigo kaj postulas la ĉeston de la urbestroj: tiuj timplene venis. La Apostolo anoncis al ili la Regnon de Dio kaj, elmontrante al ili siajn titolojn, devigis ilin aŭskulti lian paroladon pri Jesuo. Li sciigis ilin pri la evangeliaj laboroj, kiuj elkrepuskigis en la urbo, ĉe la kunhelpado de Lidia, kaj faris konsiderojn pri la rajto de la kristanoj ĉie. La urbestroj prezentis al li sian senkulpigon, garantiis la tenadon de la paco al la naskiĝanta eklezio kaj, prenante kiel pretekston la gradon de sia respondeco antaŭ la popolo, pet-

is Paŭlon kaj Silason foriri de la urbo, por antaŭhaltigi pluajn tumultojn.

La eksrabeno estis kontenta, kaj reveninte en la loĝejon de la nobla vendistino de purpuro kune kun Silas, kiu konfesis al si lian animfortecon, ne kaŝante sian miregon, tie restadis kelke da tagoj, kunmetante la programon de la laboroj sur la nova kampo de Jesuo. Poste ili vojaĝis al Tesaloniko, haltante ĉie, kie estis lokoj aŭ vilaĝoj, atendantaj sciigojn pri la Savinto.

En tiu nova agmedio ili denove estis kun Luko kaj Timoteo, kiuj ilin sopire atendadis. La laboroj daŭris plu intensegaj. Ĉie tiuj ĉiam samaj kolizioj. Antaŭjuĝemaj judoj, homoj malsinceraj, nedankemaj kaj indifereantaj koluziadis kontraŭ la jerusalema eksleĝisto kaj ties sindonaj kamaradoj.

Paŭlo eĉ en la plej malgrandaj luktoj tenadis sin forte kaj noble. Pluvis ĉagrenoj, afliktoj sur la placo, maljustaj akuzoj, kruelaj kalumnioj; teruraj minacoj ofte subite trafis la dian neprofitemon de liaj faroj, tamen la brava disĉiplo de la Sinjoro iradis ĉiam antaŭen serena kaj firma tra la agitadoj, vivante sole nur de sia laboro kaj konsilante al la amikoj tiel same konduiti. Estis nepre necese, ke Jesuo venku en la koroj: jen la plej ĉefa programo. Ĉi tiun realaĵon li superstarigis super ĉia intereso, repuŝante ĉian kapricon; la misio daŭris plu meze en grandegaj doloroj kaj baroj, tamen solida kaj venkanta pri sia dia celo.

Post nekalkuleblaj malpaciĝoj kun la judoj en Tesaloniko la eksrabeno decidis transiĝi en Berean. Ankorau klopodoj, sindonoj, turmentoj. La misiaj laboroj, ĉiam pace komenciĝantaj, poste iradis meze en flamaj luktoj.

La rigoremaj judoj en Tesaloniko sin ne detenis kaj iris Berean. La urbo agitiĝis kontraŭ la disĉiploj de la Evangelio, la koroj ekzaltiĝis. Luko, Timoteo kaj Silas estis devigitaj foriri el la urbo kaj ekvagadis tra la najbaraj vilaĝoj. Paŭlo estis arestita kaj skurĝita. Dank'al grandegaj klopodoj de la simpatiantoj de Jesuo li estis

liberigita, kun la kondiĉo kiel eble plej baldaŭ forlasi la urbon.

La eksrabeno senprokraste konsentis; li sciis, ke post li kaj per supermezuraj penoj ĉiam ekstaros ia hejma eklezio, kiu, protektata de la favorkoreco de la Majstro, diskreskos ĝis senfineco, por proklami la superregecon de la Bona-Novaĵo.

Estis nokto, kiam liaj samidealanoj sukcesis konduki lin el la karcereto sur la straton. La Apostolo al nacioj penis informiĝi pri siaj kamaradoj kaj eksciis pri la ilin afliktantaj sortobatoj. Li rememoris, ke Silas kaj Luko estas malsanaj kaj ke Timoteo bezonis renkontiĝi kun sia patrino en la haveno de Korinto. Estus pli bone ĝuigi al siaj amikoj iom da ripozo en la bolegado de la renovigaj laboroj. Ne estus juste peti ilian kunhelpon, dum li mem sentis la neceson ripozi.

La fratoj en Berea insistis pri lia foriro. Estis tro riske doni kaŭzon al pluaj malpacigoj. Tiam Paŭlo decidis efektiviĝi longdatan planon: li vizitos Atenon, plenumante delongan idealon. Impresite de la helena kulturo, kiun li ricevis en Tarso, li ofte karesis la sopiron koni la glorajn monumentojn, la majestajn templojn, la kleran kaj liberan spiriton de Ateno. Kiam ankoraŭ tre juna, li pensis pri tiu vizito en la grandioza urbo de la malnovaj dioj, decidinte doni al ĝi la trezorojn de la kredo, konservatajn en Jerusalemo: li iros al la kleraj kaj sendependaj anaroj kaj parolos pri Moseo kaj ties Leĝo. Nun pensante pri la efektivigo de tiu projekto, li konsideris, ke li havigos al la atena spirito multe pli riĉan lumon: li anoncos al la fama urbo la Evangelion de Jesuo. Kiam li parolos antaŭ la publiko, li certe ne renkontos la tumultojn, kio tiel plaĉas al la izraelidoj. Li jam antaŭĝuis la plezuron paroladi al la popolamaso, kutiminta al la traktado de la spiritaj aferoj. Certe la filozofoj senpacience atendas sciigojn pri la Kristo: ili do ricevos el liaj evangeliaj predikoj la veran sencon de la vivo.

Lulante sin en tiuj esperoj, la Apostolo al nacioj decidis fari la vojaĝon en akompano de kelke da pli fi-

delaj amikoj, sed ĉi tiuj de la atenaj pordegoj revenis al sia urbo, forlasante lin tute sola.

Paŭlo eniris en la urbon tre emociita. Ateno ankoraŭ elmontris multe da eksteraj belaĵoj. La monumentoj de ĝiaj respektindaj tradicioj preskaŭ ĉiuj staris; mildaj harmonioj vibradis en la tre blua ĉielo; ridantaj valoj estis tapiŝitaj de floroj kaj parfumoj. La granda animo de la Apostolo raviĝis, kontemplante la Naturon. Li rememoris tiujn noblajn filozofojn, kiuj enspiris tiun saman aeron. La gloran pompon de la atena pasinteco, kaj sentis sin transportita en ian miriandan sanktejon. Sed la stratiranto ne povis vidi lian animon kaj de Paŭlo vidis nur la malgrasegan korpon, kiun la manko de vivnecesaĵoj faris strangaĉa. Multaj prenis lin kiel ian almozulon, ian homan ĉifonaĵon el la granda amaso, kiu senĉese enfluadis el la senprotekta oriento. La sendito de la Evangelio, en la entuziasmo de siaj noblaj intencoj, ne povis rimarki la interkontraŭajn opiniojn pri li. Plena de kuraĝo li decidis fari predikojn surstrate, en la posttagmezo de tiu sama tago. Li sopiris stari fronte al la atena spirito, tiel same, kiel li nun staris antaŭ la materiaj belaĵoj de la urbo. Sed lian klopodon kronis dolora fiasko. Ĉe la unua momento alproksimiĝis multe da homoj, sed kiam ili aŭdis liajn parolojn pri Jesuo kaj la resurekto, granda parto el la ĉeestantoj eksplodis per incite ironia ridegado.

– Ĉu ĉi tiu filozofo estas ia nova dio? – ŝerce demandis preterpasanto.

– Li aspektas tro senhelpa por tio – respondis la demandito.

– Kia dio estus tia? – demandis alia. – Vidu, ke liaj manoj tremas! Li mienas malsana kaj senfortiĝinta. Lia barbo estas sovaĝa, kaj li estas kovrita de cikatroj!

– Li estas frenezulo – ekkriis maljunulo, pretendanta profundan saĝon. – Ni ne perdu tempon.

Paŭlo ĉion ĉi aŭdis, vidis la vicon de la forirantoj, indiferentaj kaj malmolkoraj, kaj eksentis grandan froston en la koro. Ateno staris tre malproksime de liaj espero. La popola amaso donis al li la impreson de ia

grandega kolektiĝo de homoj, venenitaj de falsa kulturo. Pli ol unu smajnon li persistis en la publikaj predikoj sen rimarkindaj rezultatoj. Neniu interesiĝis pri Jesuo kaj des malpli ekpensis oferi al li gastigon pro nura simpatio. Tio estis la unua fojo, de kiam li komencis sian misiistan taskon, ke li foriros el iu urbo, ne fondinte eklezion. Eĉ en la plej krudaj vilaĝoj ĉiam iu kopiadis la notojn de Levi, por komenci la evangelian laboradon en ia modesta hejmo; en Ateno aperis neniu, kiu interesiĝus pri la legado de la evangeliaj tekstoj. Tamen tiel forta estis la insistado de Paŭlo super kelke da eminentaj personoj, ke ili kondukis lin en la Areopagon, por ke li ekrilatu kun la homoj plej kleraj kaj inteligentaj de tiu tempo.

La anoj de tiu elita societo ricevis lian viziton pli scivole ol interese.

La Apostolo eniris tien dank'al Dionisio, klera kaj nobla homo, kiu kontentigis lian peton, por observi, kiel granda estas lia kuraĝo ĉe la prezentado de la nekonata doktrino.

Paŭlo komencis impresante la aŭdantaron per tio, ke li parolis pri la “Dio nekonata”, kultata sur la atenaj altaroj. Lia vibranta parolo havis neordinarajn nuancojn; la figuroj estis multe pli riĉaj ol tiuj, registritaj de la aŭtoro de la “Agoj”. Dioniso mem miregis. La Apostolo montriĝis al li tre malsama ol tia, kian li vidis sur la placo. Paŭlo paroladis altfluge, emfaze; la figuroj vastiĝis per eksterordinaraj koloroj; sed kiam li ekparolis pri la releviĝo de la mortintoj, aŭdiĝis forta kaj longedaŭra murmurado. La aeropaganoj ridetis, pikmokoj pluvis. La atena intelekta aristokratato ne povis cedi pri siaj sciencaj antaŭjuĝoj.

Tiuj pli ironiemaj forlasis la salonon kun sarkasmaj ridegoj, dum tiuj malpli flamiĝemaj, konsidere al Dionisio, kun neesprimebla rideto alproksimiĝis al la Apostolo, dirante, ke ili volonte lin denove aŭskultos, tiam kiam li ne permesos al si la ekstravagancon komentarii fikciajn aferojn.

Paŭlo kompreneble konsterniĝis. Ĉe tiu momento li ne kapablis veni al la konkludo, ke la falsa kulturo ĉiam

vidos en la vera klareco esprimon de iaj imagaj, sensenc-aj aferoj. La konduto de la Aeropago ne ebligis al li veni al la fino. Baldaŭ la luksa salono estis preskaŭ silenta. Al la Apostolo tiam venis en la kapon, ke estas preferinde alfronti la tumulton de la judoj. Kie estos batalo, tie ĉiam estos fruktoj por deŝiri. La diskutoj kaj la kolizioj ĉe multaj okazoj estis kvazaŭ ia disfosado de la spirita grundo por la dia kultivejo. Sed tie li renkontis la malvarmecon de la glacio. La marmoro de la fieraj kolonoj tuj bildigis antaŭ li la situacion. La atena kulturo estis bela kaj pene prizorgata, impresis per sia grandioza ekstero, sed ĝi nun estis malvarma pro la riĝideco de la intelekta morto.

Nur Dionisio kaj unu juna sinjorino, nomata Damaris, kaj iaj kelke da servantoj en la palaco restis apud li, treege ĝenataj, kvankam inklinaj al la afero.

Malgraŭ sia disreviĝo Paŭlo el Tarso faris ĉion eblan, por forblovi la nubon de malĝojo, kiu ombris ĉiujn, komencante de li mem. Li duonridetis de rezignacio kaj provis ion bonhumoran. Dionisio ankoraŭ pli fortikigis sian admiron je la potencaj spiritaĵoj de tiu homo aspekte tiel mizera, sed tiel energia kaj jaluza pri siaj konvinkoj.

Antaŭ ol ili foriris, Paŭlo parolis pri la eblo, ke oni fondu ian eklezion, eĉ se en ia hejmo, kie oni studus kaj komentarius la Evangelion, sed la ĉeestantoj amasigis senkulpigojn kaj pretekstojn. Dionisio diris, ke li bedaŭras sian nepovadon subtenadi tiun entreprenon pro manko de tempo; Damaris elmetis la hejmajn devojn; la servantoj en la Aeropago ĉiuj prezentis grandegajn malfacilaĵojn: unu estis tre malriĉa, alia estis malmulte komprenata... Paŭlo ricevis ĉiujn senkulpigojn, tenante konsternan mien esprimon, simile al semisto, vidanta ĉirkaŭ si nur ŝtonojn kaj dornarbetojn.

La Apostolo al nacioj serene adiaŭis ĉiujn, sed apenaŭ li estis sola, li ekploregis. Al kio atribui la doloran fiaskon? Li ne tuj povis kompreni, ke Ateno tiam suferis centjaran intelektan veneniĝon, kaj opiniante sin forlasita de la potencoj de la supera regiono, la eksra-

beno sin tutan fordonis al terura senkuraĝiĝo. Li ne rezignaciis pri la malvarmeco de ĉiuj, des pli, ĉar la nova doktrino apartenis ne al li, sed al la Kristo. Kiam li ne ploradis, esprimante sian propran doloron, li ploradis pro la Majstro, pensante, ke li, Paŭlo, ne respondis al la atendo de la Savinto.

Dum multe da tagoj li ne sukcesis disfumi la nubon de maltrankvilo, kiu ombris lian animon. Tamen li rekomendis sin al Jesuo kaj petis lin protekti la grandajn devojn de lia vivo.

En tiu kirlego da duboj kaj afliktoj jen ekaperis la helpo de la Majstro al la amata Apostolo: Timoteo alvenis el Korinto, portante bonajn novaĵojn.



La Epistoloj

La nepo de Lojda portis al la eksrabeno multe da konsolaj novaĵoj. Li estis jam enloĝiginta la du sinjorinojn en la urbo, portis iom da mono kaj parolis al li pri la disvolviĝado de la kristana doktrino en la malnova ĉefurbo de Akajo. Unu sciigo aparte plaĉis al li: Timoteo raportis al li sian renkontiĝon kun Akvila kaj Priskila. Ĉi tiuj du homoj, kiuj kunsentiĝis al li ĉe la grandegaj malfacilaĵoj en la dezerto, nun laboradis en Korinto por la gloro de la Sinjoro. Li ekĝojis profunde, en sia animo. Krom la multaj personaj motivoj, kiuj vokis lin al Akajo, t.e. la neforviŝeblaj rememoroj pri Jeziel kaj Abigail, ankaŭ la deziro brakumi la amikajn geedzojn estis decida cirkonstanco de lia tuja foriro.

La brava perdikisto eliris tre konsternita el Ateno. La fiasko antaŭ la greka kulturo pelis lian esploreman spiriton al plej turmentaj konsideroj. Li nun komencis kompreni, kial la Majstro preferis Galileon kun ĝiaj malminentaj kaj korsimplaj homoj, liaj kunlaborantoj; li pli bone komprenis, kial la Kristo malkaŝe parolis pri la savo kaj malkovris sian naturan pliamon por la nefavoritoj de la sorto.

Timoteo rimarkis lian strangan malĝojon kaj vane penis konvinki lin, ke pli konsilinde estas vojaĝi per ŝipo pro la facilaĵoj ĉe Pireo; li tamen decidis nepre iradi piede, por viziti la interajn unuopajn lokojn.

— Sed mi sentas, ke vi estas malsana — oponis la disĉiplo, penante lin dekonsili. — Ĉu ne estus pli prudente, se vi ripozus?

Rememorante siajn travivitajn senkuraĝiĝojn, la Apostolo diris:

– Tiel longe, kiel ni povas labori, ni devas imagi en la laboro ian eliksiron kontraŭ ĉiaj malbonoj. Cetere estas juste uzi la tempon kaj la oportunon.

– Mi tamen pensas – motivis la juna amiko –, ke vi povus iomete prokrasti...

– Kial prokrasti? – rediris la eksrabeno, ĉiel klopodante por forbati la ĉagrenojn pri Ateno. – Mi ĉiam estis konvinkita, ke Dio urĝe bezonas servojn bone faritajn. Se ĉi tio estas karakterizaĵo de niaj mizeraj laboroj en ĉi tiu mondo, kial do prokrasti aŭ malplenumi la sanktajn devojn de nia animo al la Ĉiopova?

La junulo konsideris la ĝustecon de ĉi tiuj asertoj kaj silentis. Ili tiel trairis pli ol sesdek kilometrojn, dum kelke da tagoj da marŝado kaj intertempoj de predikoj. En tiu laborado ĉe simplanimaj homoj Paŭlo el Tarso sentis sin pli feliĉa. La kampuloj ricevis la Bonan-Nov-aĵon pli ĝoje kaj pli kompreneme. Hejmaj eklezietoj estis fonditaj ne malproksime de la golfo Saron.

Absorbite de la karesaj rememoroj pri Abigail, li trairis la istmon kaj eniris en la multemovan kaj bruatan urbon. Li brakumis Lojdan kaj Eŭniken en dometo proksima al Kenkrea kaj tuj penis vidiĝi kun la malnovaj geamikoj el la “oazo de Dan”.

Posedite de plej granda ĝojo, la tri amikoj interŝanĝis brakumojn. Akvila kaj lia edzino longe paroladis pri la evangeliaj laboroj, al kiuj ili estis vokitaj de la favorkoreco de Jesuo. Kun brilantaj okuloj, kvazaŭ ili estus venkintaj ian grandan batalon, ili raportis al la Apostolo, ke ili realigis sian idealon, dum kelka tempo restadi en Romo. Kiel senfamaj teksistoj ili loĝis en malnova ruina domo en Trastevere kaj faris siajn unuajn predikojn en la medio mem de cezaraj pompoj. La judoj estis deklarintaj malkaŝan militon al la novaj principoj. Tuj ĉe la unua trumpetvoko de la Bona-Novaĵo leviĝis grandaj tumultoj en la malriĉa kaj senprotekta judkvartalo. Priskila rakontis, ke grupo da furiozaj izraelidoj nokte penetris trarompe en ŝian ĉambron kun

instrumentoj por skurĝado kaj puno. Ŝia edzo longe restis en la metiejo, kaj tial ŝi ne povis eviti la krue-lajn skurĝojn. Nur tre malfrue ŝin helpis Akvila, kiu trovis ŝin rulita en sango. La tarsi Apostolo ĝojegis pro tia atesto. Siavice li sciigis al siaj geamikoj la dolorojn, kiujn li pro la nomo de Jesuo Kristo ĉie suferis. Tiuj komunaj torturoj montriĝis kiel favoroj de Jesuo, kiel eternaj glortitoloj. Kiu amas, tiu turmentiĝas, por ion doni, kaj tiuj, kiuj amis la Majstron, sentis sin ekstreme feliĉaj, ke ili ion suferas pro sia sindoneco al lia nomo.

Dezirante repreni la serenecon de siaj viglaj laboroj, forgesante la atenan malvarmecon, Paŭlo parolis pri sia projekto, fondi eklezion en Korinto; Akvila kaj lia edzino tuj montriĝis pretaj fari ĉion por ĝia realigo. La eksrabeno akceptis ilian noblan oferon kaj ekloĝis kune kun ili en ilia domo, kie li ĉiutage okupis sin pri sia metio.

Korinto konstante vekadis rememorojn karajn por lia koro. Ne komunikante al siaj amikoj tiujn rememorojn, bolantajn en lia sentema animo, li iris revidi tiujn lokojn, pri kiuj Abigail ravite ĉiam paroladis. Kun plej granda zorgo li lokalizis tiun regionon, kie probable kuŝis la bieneto de la maljuna Johedeb, nun unuigita kun la vastegaj proprietoj de la heredintoj de Licinio Minucio; li rigardadis la malnovan malliberejon, el kiu lia fianĉino sukcesis fuĝi, por saviĝi de tiuj monstroj, kiuj murdis ŝian patron kaj sklavigis ŝian fraton; li longe pensis pri la haveno de Kenkrea, el kiu Abigail unu tagon ŝipiris, por konkeri lian koron laŭ la supera kaj neŝanĝebla decido de la Eternulo.

Paŭlo per korpo kaj animo sin fordonis al sia kruda laboro. La vigla manlaborado havigis al li dolĉan forgeson pri Ateno. Komprenante la neceson de kelka tempo de kvieteco, li instigis Lukon ripozi en Troas, ĉar Timoteo kaj Silas trovis laboron kiel kamelpelistoj.

Sed antaŭ ol li denove faris siajn predikojn, komencis alveni al Korinto senditoj el Tesaloniko, Berea kaj aliaj lokoj de Makedonujo, kie li iam fondis siajn amatajn ekleziojn. Ĉi tiuj baraktis en urĝe premantaj aferoj, kiuj postulis lian delikatan kunhelpon. Sentante emba-

rason por ĉion sola kontentigi kun la necesa preteco, li denove vokis Silason kaj Timoteon, por lin helpi. Uzante la oportunajn okazojn en sia profesio, ĉi tiuj ambaŭ povus efike kunagi por la solvo de la neantaŭviditaj demandoj.

Plikuraĝigita de la kunhelpo de tiuj amikoj, Paŭlo la unuan fojon parolis en la sinagogo. Lia flama parolo rikoltis eksterordinaran sukceson. Judoj kaj grekoj emtuziasme parolis pri Jesuo. La teksisto estis invitita ĉiusemajne daŭrigi siajn religiajn komentariojn, sed tuj kiam li ekstraktis pri la rilatoj inter la Leĝo kaj la Evangelio, jen reŝprucis la malpaciĝoj. La izraelidoj ne toleris la superecon de Jesuo super Moseo, kaj, se ili konsideris la Kriston kiel profeton de la raso, ili tamen ne konsentis, ke li estas Savinto. Paŭlo akceptis la provokojn, sed ne sukcesis cedi tiel hardiĝintajn korojn; la diskutadoj daŭris plurajn sinsekvajn sabatojn, ĝis, unu tagon, kiam la flama kaj sincera parolo de la Apostolo forte vipadis la fariseajn erarojn, unu el la plej eminentaj estroj de la sinagogo akre al li ordonis:

– Tenu la buŝaĉon, ci senhonta vortŝutanto! La sinagogo ĝis hodiaŭ toleris ciajn artifikojn per efektive mireginda paciencemo, sed en la nomo de la plimulto mi ordonas, de ci por ĉiam foriru! Ni volas scii nenion pri cia Savinto, mortigita same, kiel tiuj hundoj la krucanoj!

Ĉe tiaj malrespektaj esprimoj pri la Kristo la okuloj de la Apostolo pleniĝis de larmoj. Li nature pripensis la situacion kaj rediris:

– Ĝis nun, en Korinto, mi penis diri la veron al la popolo, elektita de Dio por la sankta konservado de la dia unueco, sed, se vi ĝin ne akceptas, mi de hodiaŭ iros al la nacioj! Falu sur vin mem la maljustaj malbenoj, per kiuj vi superĵetis la nomon de Jesuo Kristo!

Kelkaj el la izraelidoj pli varmsangaj ekintencis ataki lin, naskante tumulton, sed unu romano, nomata Tito Justo, ĉeestanta ĉe la kunveno kaj kiu ekde la unua prediko sentis sin forte altirita al la potenca persono de la Apostolo, alproksimiĝis kaj etendis al li siajn brakojn de amiko. Paŭlo povis do sendifekte eliri el la salono

kaj iris al la domo de sia bonfaranto, kiu disponigis al li ĉion necesan al la organizado de aktiva eklezio.

La teksisto ĝojegis. Tio estis la unua konkero por iu definitiva establaĵo.

Kun la helpo de ĉiuj simpatiantoj de la Evangelio, Tito Justo aĉetis domon por la komenco de la religiaj servoj. Akvila kaj Priskila estis la precipaj kunlaborantoj, krom ankaŭ Lojda kaj Eŭnike, por ke estu plenumitaj la programoj, aranĝitaj de Paŭlo, simile al la kara organizacio de Antioĥia.

La eklezio de Korinto komencis tiam doni la fruktojn plej riĉajn pri spiriteco. La urbo estis fama per sia malĉasteco, sed la Apostolo kutime diradis, ke el la marĉoj ofte naskiĝas la plej belaj lilioj; kaj ĉar tie, kie estas multe da pekado, estas multe da memriproĉo kaj sufero, en egalaj cirkonstancoj la eklezio kun ĉiu tago kreskadis, kunigante la plej diversajn kredantojn, kiuj alvenadis, sopirante forlasi tiun Babelon, putrantan de malvirtoj.

Pro la ĉeesto de Paŭlo la eklezio de Korinto ricevis apartan gravecon, kaj preskaŭ ĉiutage alvenadis senditoj el la plej foraj regionoj. Tio estis kurieroj el Galatujo petantaj helprimedojn por la eklezioj de Pisidio; kamaradoj el Ikonio, Listra, Tesaloniko, Kipro, Jerusalemo. Ĉirkaŭ la Apostolo kreiĝis kolegiato da sekvantoj, da konstantaj kunuloj, kiuj kun li laboradis ĉe la plej etaj taskoj. Paŭlo tamen en la animo turmentiĝis de zorgoj. La aferoj estis diversaj kaj urĝaj. Li ne povis flanken meti ilian tenadon: li sin ŝarĝis per pezaj devoj antaŭ la fratoj en Korinto; li devis atendi la monkoklektadon, destinitan al Jerusalemo; li ne povis forlasi la antaŭe fonditajn ekleziojn. Iom post iom li ekkomprenis, ke ne sufiĉis ekspedi komisiulojn. La petoj alamasigadis el ĉiuj lokoj, kie li iam estis, disportante la ĝojojn de la Bona-Novajaĵo. Liaj fratoj, plenaj de amo kaj konfido, kalkulis je lia sincereco kaj sindoneco, devigante lin intense bataladi.

Sentante sin ne kapabla samtempe kontentigi ĉiujn bezonojn, la abnegacia disĉiplo de la Evangelio, foje,

profitante la silenton de la nokto, kiam la eklezio estis senhoma, kun larmoj petis Jesuon nepre havigi al li la rimedojn necesajn al la plena efektivigo de lia tasko.

Fininte la preĝon, li sentis sin envolvita en mildan lumon. Li havis la klaran impreson, ke li ricevas la viziton de la Sinjoro. Sur la genuoj, spertante neesprimblan emocion, li aŭdis serenan, amplenan admonon:

– Ne timu – diris la voĉo –, ĉiam ankoraŭ instruadu la veron kaj ne silentu, ĉar mi estas kun vi.

La Apostolo lasis liberan kuron al la larmoj, elfluantaj el lia koro. Tiu ama zorgemo de Jesuo, tiu admono, kiel respondo al lia alvoko, penetris en lian animon per karesaj ondoj. La ĝojo en tiu momento estis sufiĉe granda, por kompensi ĉiujn dolorojn kaj suferojn sur la vojo. Dezirante profiti la sanktan inspiron en tiu forpasanta momento, li ekpensis pri la malfacilaĵoj, kiujn li devas venki, por kontentigi la plurajn fratajn ekleziojn. Ĉi tio estis sufiĉa por tio, ke la dolĉega voĉo respondis:

– Ne turmentiĝu pro la bezonoj de via tasko. Estas kompreneble, ke vi ne povas mem samtempe helpi, sed vi povas unutempe ĉiujn kontentigi per la povoj de la spirito.

Li penis trafi la ĝustan sencon de ĉi tiu parolo, sed tio estis por li malfacila.

Tamen la voĉo milde daŭrigis:

– Vi povus solvi ĉi tiun demandon, skribante al ĉiuj fratoj en mia nomo; tiuj bonvolemaj scios kompreni, ĉar la valoro de la tasko kuŝas ne en la persona ĉeesto de la misiisto, sed en la spirita enhavo de lia parolo, de lia ekzemplado kaj de lia vivo. De hodiaŭ Stefano staros pli proksime al vi, transigante al vi miajn pensojn, kaj la laboroj por la evangelizado povos pligrandiĝi por la bono de la suferoj kaj de la bezonoj de la mondo.

La sindona amiko de la nacioj ekvidis, ke la lumo estingiĝis; la silento denove regis inter la senornamaj muroj de la korinta eklezio; sed, kvazaŭ trinkinte la dian akvon de la eterna lumo, li havis sian spiriton en nesprimebla ĝojo. La ja pli diligente rekomencos la labor-

ojn, li sendos al la plej malproksimaj anaroj sciigojn pri la Kristo.

Efektive, tuj la morgaŭan tagon alvenis kurieroj el Tesaloniko kun tre malagrablaj sciigoj. La judoj sukcesis veki en la tiea eklezio novajn kaj strangajn dubojn kaj kverelojn. Timoteo konfirmis tion per personaj observoj. Oni petis la urĝan ĉeeston de la Apostolo, sed ĉi tiu decidis efektiviĝi la inspiron de la Majstro, kaj rememorante, ke Jesuo promesis al li partoprenigi Stefanon en la dia tasko, li opiniis, ke li devas ne agi sola, kaj tial li vokis Timoteon kaj Silason, por kunredakti kun li la unuan el liaj famaj epistoloj.

Tiel komenciĝis la cirkulado de tiuj nepereemaj leteroj, kies spirita esenco venis el la sfero de la Kristo per la amplena kunhelpo de Stefano, sinoferema kaj fidela kunulo de tiu, kiu en sia juneco permesis al si fariĝi la unua persekutanto de la Kristanismo.

Komprenante la altan spiriton de kunagado en la diaj aferoj, Paŭlo el Tarso neniam pensis skribi sen iu; en tiu momento li deziris la kompanion de la plej indaj kunuloj, helpis al si per iliaj inspiroj, konsciante, ke la kuriero de Jesuo, kiam li ne trovas en sia sentimenta dispozicio la kapablojn necesajn por la konigo de la deziroj de la Sinjoro, havas en la amikoj taŭgajn instrumentojn.

De tiam tiuj amataj kaj famaj leteroj, trezoro el vibroj de iu supera mondo, estis ĉie kopiataj kaj sentataj. Kaj Paŭlo ĉiam plue skribadis, sed ne sciis, ke tiuj altvaloraj dokumentoj, ofte skribataj en momentoj de plej granda korpremateco, estas destinitaj ne al iu aparta eklezio, sed al la tutmonda kristanaro. La epistoloj ricevis rapidan sukceson. La fratoj interkonkuris en la plej senfamaj lokoj, por havi iliajn tekstojn el konsoloj, kaj Simon Petro mem, ricevinte en Jerusalemo la unuajn kopiojn, kunvenigis la eklezion; kortuŝite ilin leginte, li diris, ke la leteroj de la konvertito apud Damasko devas esti rigardataj kiel leteroj de la Kristo al siaj disĉiploj kaj sekvantoj, kaj ankaŭ ke ili signas novan luman periodon en la historio de la Evangelio.

Tre kuraĝigita de tiuj sukcesoj, la eksleĝisto klopodis por riĉigi la korintan eklezion per ĉiuj spertoj, kiujn li havis el la institucio en Antioĥia. La kristanoj de la urbo vivis en ia oceano da neesprimeblaj triumfoj. La eklezio havis propran departementon por helpado al tiuj, kiuj bezonis panon, vestojn, medikamentojn. Respektindaj maljunulinoj alternis en la sankta tasko akceptadi homojn, malpli favoritajn de la sorto. Ĉiuvespere okazis kunsidoj, por komentarii iun pecon el la vivo de la Kristo; post la ĉefa prediko kaj kiam ĉiu esprimis sian penson, ĉiuj eksilentis, por mediti pri tio, kion ili ricevis el la Ĉielo per la profeteco. Tiuj ne kapablaj profeti posedis sanigivajn naturdotojn, kiuj estis uzataj por la bono de la malsanuloj en proksima ĉambro. La nuntempa evangelia mediumeco estas tiu sama profeteco de la apostolaj eklezioj.

Kiel iafoje okazis en Antioĥia, tiel ankaŭ ĉi tie pri ia pecoj pli malfacile interpreteblaj leviĝis negravaj malkonsentoj, kiujn Paŭlo rapidis kvietigi, sen malutilo por la edifa frateco.

Ĉe la fino de la laboroj de ĉiu vespero, dolĉa kaj sincera preĝo signis la momenton de ripozo.

La institucio okulvideble progresadis. Aliĝinte al la grandanimeco de Tito Justo, aliaj bonstataj romanoj alprenis al si la Evangelion, riĉigante la organizaĵon per novaj povoj. La malriĉaj izraelidoj havis en la eklezio amikan hejmon, kie Dio sin manifestis al ili per monstroj de boneco, dum, kontraŭe, en la sinagogoj anstataŭ pano por la mordanta malsato, anstataŭ balzamo por la vundoj de la korpo kaj de la animo, ili renkontis nur la krudecon de la tiranaj antaŭjuĝoj sur la lipoj de senkompataj pastroj.

Kolerante pri la nesuperebla sukceso de la entrepreno de Paŭlo el Tarso, kiu loĝis en la urbo jam jaron kaj ses monatojn, fondinte efektivan kaj perfektan rifuĝejon por la “infanoj de Kalvario”, la judoj el Korinto teksis teruran plano de persekutado al la Apostolo. La sinagogo estis ĉiam malpli vizitata. Estis necese neniiigi la kaŭzon de ĝia socia senkrediteco. La eksrabeno el

Jerusalem tre kare pagos por sia aŭdaco, propagandi la Nazaretan Mesion malprofite al Moseo.

Estis prokonsulo en Akajo, sed loĝanta en Korinto, nobla kaj klera romano, kiu en siaj funkcioj ĉiam agadis laŭ la justeco. Junio Galiono estis frato de Seneko kaj homo bonkora kaj alte edukita. La proceso, starigita kontraŭ la eksrabeno, iris al li por juĝo absolute sen la scio de Paŭlo, kaj tiel granda estis la amaso de la akuzoj, prezentitaj de la izraelidoj, ke la administratoro devis arestigi la Apostolon por la komenca enketo. La sinagogo tre insiste petis, ke ĝi ricevu la taskon konduki la akuziton en la tribunalon. Tute ne suspektante la motivon de tia peto, la prokonulo ĝin konsentis kaj ordonis, ke la interesatoj iru al la publika aŭdienco en la sekvanta tago.

Kun la ordono en la mano la pli flamiĝemaj izraelidoj decidis aresti Paŭlon en tiu sama tago, en momento, kiam la fakto povos skandali la tutan eklezion.

Vespere, ĝuste kiam la eksrabeno, profunde inspirata, komentariadis la Evangelion, armita grupo haltis ĉe la pordo kaj el ĝi elpaŝis kelke da pli eminentaj judoj, kiuj sin direktis en la internon de la domo.

La arestordonon Paŭlo plej serene aŭdis, sed ne same la kunsidantaro. Ekbolis granda tumulto en la salono. Iuj pli varmsangaj junuloj estingis la torĉojn, sed la brava Apostolo, per severa kaj emocianta alvoko, kriis:

– Fratoj, ĉu vi do volas la Kriston sen atesto?

Ĉi tiu demando tondris en la salono kaj kvietigis ĉiujn korojn. Ĉiam flegma, la eksrabeno ordonis, ke oni ekbruligu la lumojn, kaj etendante la manojn al la mirantaj judoj, diris per neforgesebla tono:

– Mi estas preta!

Iu el la grupo, pikita de tiu spirita supereco, elpaŝis kaj frapis lian vizaĝon per la skurĝoj.

Kelkaj el la kristanoj protestis, la portintoj de la ordono de Galiono lin akre riproĉis, sed la kaptito, elmontrante neniom da indigno, pli laŭte ekkriis:

– Fratoj, ni ĝoju en la Kristo Jesuo. Ni estu tran-
kvilaj kaj ni gaju, ĉar la Sinjoro juĝis nin indaj lin
sekvi!

Granda sereneco tiam fariĝis inter la anaro. Pluraj
virinoj mallaŭte plorsingultadis. Akvila kaj lia edzino
direktis al la Apostolo neforgesebaln rigardon, kaj la
malgranda grupo ekiris al la karceron en la nokta mal-
lumo. Ĵetite en la fundon de malseketa ĉelo, Paŭlo estis
ligita al la torturoŝtipo kaj devis ricevi la tridek naŭ
batojn. Li mem miris. Ĉiela paco plenigis lian koron
per dolĉaj konsoloj. Kvankam tute sola, ĉe kruelaj per-
sekutantoj, li sentis refortigita sian fidon al la Kristo.
En tia animstato lin ne doloris la teruraj battoj, kaj la
turmentantoj vane incitis lian flaman spiriton per in-
sultoj kaj ironioj. En tiu kruda, dolora elprovo li ĝoje
rimarkis, ke li atingis, en la interna mondo, la regionon
de tiu dia paco, kiuj Dio havigas al Siaj infanoj post la
dornaj senĉesaj luktoj, kiujn ili tenadas por la konkero
de si mem. En iamaj tempoj la amo al la justo lin pel-
adis al pasioregataj situacioj, al apenaŭ briditaj deziroj,
al akraj polemikoj, sed ĉi tie, elportante la skurĝojn,
kiuj frapis liajn duonnudajn ŝultrojn kaj fosis sangant-
ajn sulkojn, li faris al si pli vivan bildon de la Kristo,
li havis la impreson, kvazaŭ li venas en ties kompat-
emajn brakojn, post teruraj, malglataj iradoj ekde la mo-
mento, kiam li falis proksime al Damasko en ian abismon
el larmoj kaj mallumo. Dronante en superteraj pensoj,
Paŭlo el Tarso spertis sian unuan grandan ekstazon. Li
ne plu aŭdis la sarkasmojn de siaj senindulgaj turmentantoj,
sed sentis, ke lia animo etendiĝas en la senliman
spacon, travivante ravantajn emociojn de neesprimebla
feliĉo. La milda dormo sensensigis lian koron, kaj nur
ĉe mateniĝo li revenis al si el tiu dolĉa ripozo. La suno
lin gaje vizitis tra la kradojn. La brava disĉiplo de la
Evangelio vigle leviĝis, rearanĝis siajn vestojn kaj pa-
ciece ekatendis.

Nur posttagmeze tri soldatoj malsupreniris en la
karceron de la judaj punoj kaj elkondukis la arestiton
al la prokonsulo.

Paŭlo plej serene iris antaŭ la tribunalan seĝon. La salono estis plena de flamantaj izraelidoj, sed la Apostolo rimarkis, ke la plej multaj ĉeestantoj estas grekoj kun simpatiaj mienoj, eĉ multaj el ili estas liaj personaj konatoj el la helpservoj de la eklezio.

Junio Galiono, tre zorgema pri sia ofico, sidiĝis antaŭ la maltrankvila rigardo de la interesplenaj ĉeestantoj.

Laŭ la oficiala moro la prokonsulo devos aŭdi la pledantojn, antaŭ ol eldiri ian verdikton, malgraŭ la plendoj kaj akuzoj, registritaj sur pergameno.

Por la judoj estis parolonta unu el la potenculoj de la sinagogo, nomata Sostenes, sed ĉar ne aperis la reprezentanto de la eklezio de Korinto, por defendi la Apostolon, tial la aŭtoritatulo postulis la senprokrastan plenumon de tiu formalajo. Paŭlo el Tarso, tre surprizite, en sia animo petis Jesuon esti la patrono de lia afero, kaj jen elpaŝis sinjoro, kiu sin proponis, por depozicii en la nomo de la eklezio. Tio estis Tito Justo, tiu grandanima romano, kiu nun ne preterlasis la okazon de la atesto. Tiam fariĝis neatendita fakto: la tieaj grekoj eksplodis per tondra aplaŭdado.

Junio Galiono ordonis, ke la akuzantoj komencu siajn necesajn publikajn deklarojn.

Sostenes tiam ekparolis, forte subtenate de la ĉeestantaj judoj. Li akuzis Paŭlon kiel blasfemanton, defalinton de la Leĝo, sorĉiston, acide parolis pri ties pasinteco, diris, ke ties parencoj mem tiun forlasis. La prokonsulo atente aŭskultadis, sed kun kurioza teniĝo: per la montrofringro de la dekstra mano li premis la orelon, ne atentante la miregon de ĉiuj, sed la sinagogestro ĉe tia sinteno senaplombiĝis. Fininte sian akuzon tiel pasian, kiel maljustan, Sostenes demandis la administraton de Akajo pri lia konduto, kiu postulis ian kontentigon, por ne esti prenata kiel ia malrespekto. Sed Galiono, tre trankvila, respondis humure:

– Mi pensas, ke mi ĉi tie sidas, ne por doni ian kontentigon pri miaj personaj agoj, sed por plenumi la devojn de la Justico. Tamen, obeante la kodon de la homa frateco, mi diras, ke, laŭ mia opinio, ĉiu administr-

anto aŭ juĝanto de aliula afero devas destini unu orelon por la akuzo kaj la duan por la defendo.

Dum la judoj plej konsternite kunŝovis la brovojn, la korintanoj plezure ridegadis. Paŭlo mem trovis amuza tiun aserton de la prokonsulo, ne povante kaŝi la sanan rideton, kiu subite prilumis lian vizaĝon.

Post tiu sprita incidento Tito Justo alpaŝis kaj nedetale ekparolis pri la misio de la Apostolo. Liaj vortoj obeadis altan blovon de inspiro kaj spirita beleco. Aŭdante el la buŝo de unu sampatrujano la historion de la konvertito apud Damasko, Junio Galiono montriĝis forte impresita kaj emociita. Iam kaj iam la grekoj ektondris per ekkrioj de aplaŭdo kaj ĝojo. La izraelidoj komprenis, ke ilia afero de momento al momento diserigās.

Ĉe la fino de la kunsido la politika estro de Akajo prenis la parolon, por konkludi, ke li vidas nenian krimon ĉe la disĉiplo de la Evangelio; ke la judoj devas, antaŭ ol fari ian maljustan akuzon, ekzameni la noblan laboradon de la korinta eklezio, ĉar, li opinias, ĉi tie ekzistas nenia ofendo de la izraelidaj principoj; ke la sola malkonsento de vortoj ne pravigas perfortaĵojn; li finis deklarante frivolaj la akuzojn kaj dirante, ke li ne deziras funkcii kiel juĝanto en tiaspeca afero.

Ĉiu lia aserto estis brue aplaŭdita de la korintanoj.

Kiam Junio Galiono deklaris, ke Paŭlo konsideru sin plene liberigita, la aplaŭdoj atingis la deliron. La aŭtoritatulo rekomendis, ke la foriro fariĝu en ordo, sed la grekoj atendis la malsupreniron de Sostenes kaj, kiam ekaperis la paveca figuro de la “majstro”, ili lin semkomplete atakis. Fariĝis grandega tumulto sur la longa ŝtuparo, apartiganta de la strato la tribunalon, kaj tial Tito Justo afliktoplena alproksimiĝis al la prokonsulo kaj petis lian interhelpon. Sed Galiono, preparante sin plue por reveni hejmen, direktis al Paŭlo simpatiorigardon kaj flegme rediris:

– Ni ne zorgu pri tio. La judoj estas tre kutimaj al tiaj tumultoj. Se mi, kiel juĝanto, gardis unu orelon, ŝajnas al mi, ke Sostenes, kiel akuzanto, devus gardi la tutan korpon.

Kaj nekonsternite li direktis sin al la interno de la domo. Tiam Paŭlo, aperante sur la supro de la ŝtuparo, ekkriis:

– Fratoj, repaciĝu pro la Kristo!

Ĉi tiu admono trafis plene la tumultantan grandnomban homamason. Ĝia efiko estis tuja. Ĉesis la bruoj kaj la krioj. La lastaj luktantoj kvietigis la agitiĝantajn brakojn. La konvertito apud Damasko komplezeme alkuris, por helpi al Sostenes, kies vizaĝo sangadis. La tiutagan senkompatan atakinton la kristanoj de Korinto, plenumante la peton de Paŭlo, plej zorge kondukis en lian hejmon.

Forte kolerante pro sia fiasko, la tieaj izraelidoj forĝis novajn atakojn, sed la Apostolo, kunveniginte la anojn de la Evangelio, sciigis, ke li deziras foriri Azion, por kontentigi insistajn vokojn de Johano (*), por la definitiva fondo de la eklezio de Efeso. La korintanoj delikate protestis, penante reteni lin, sed la eksrabeno per firma tono montris la konvenecon de la vojaĝo kaj aldonis, ke li esperas reveni baldaŭ. Ĉiuj kunservantoj en la eklezio estis konsternitaj. Precipe Febe, distinginda kunlaborantino de lia apostola klopodado en Korinto, ne sukcesis kaŝi la larmojn el la koro. La fervora disĉiplo de Jesuo komprenigis, ke la eklezio estas fondita kaj bezonas nur la kontinuecon de la atento kaj zorgemo de la kunuloj. Ne estus juste, laŭ lia opinio, denove alfronti la furiozecon de la izraelidoj, kaj ŝajnis al li prudente atendi la kunhelpon de la tempo por la necesaj faroj.

Post monato li foriris al Efeso, preninte kun si Akvilan kaj ties edzinon, kiuj volontis lin akompani.

Ĉe la adiaŭo al la urbo lia penso turnis sin al la pasinteco, al la espero de ia surtera feliĉo, kiujn la jaroj enabismigis en sin. Li vizitis tiujn lokojn, kie Abigail kaj ŝia frato ludis en sia infaneco, saturiĝis per dolĉaj,

(*) Johano tre frue komencis siajn laborojn en la eklezio de Efeso, kvankam sen apartiĝo de Jerusalemo. – *Noto de la Aŭtoro.*

neforgeseblaj rememoroj, kaj en la haveno de Kenkrea, memorige al la foriro de la amata fianĉino, razigis al si la kapon, referante sian promeson de eterna fideleco, laŭ la tiamaj popolaj moroj.

Post malfacila vojaĝo, plena de malagrablaj incidentoj, Paŭlo kaj liaj kunuloj venis al la celita loko.

La eklezio de Efeso baraktis en turmentaj problemoj. Johano serioze klopodadis, por ke la evangelia penado ne degeneru en senfruktajn kverelojn: tamen la teksistoj, venintaj el Korinto, donis al li, kiom necese, ĉian helpon.

Inter la fajraj kumbekiĝoj, kiujn li devis tenadi kun la judoj en la sinagogo, la eksrabeno ne flanken metis iajn sentimentajn farojn, kies plenumon li de longe deziris. Kun plej alta grado da delikateco de sentoj li vizitis la Patriron de Jesuo en ŝia senluksa dometo, rigardanta al la maro. Lin forte impresis la humileco de tiu simplanima kaj amplena homo, kiu pli ĝuste ŝajnis ia anĝelo en virinaj vestoj. Paŭlo el Tarso interesiĝis pri ŝiaj dolĉaj rakontoj pri la nokto de la naskiĝo de la Majstro, fiksas en sia koro ŝiajn diajn impresojn kaj promesis kiel eble plej baldaŭ reveni, por rikolti la informojn necesajn el la Evangelio, kiun li intencis skribi por la estontaj kristanoj. Maria tre ĝoje metis sin al lia dispono.

Tamen la Apostolo, iom longe kunlaborinte por la plifirmigo de la eklezio kaj konsiderante, ke Akvila kaj Priskila komforte loĝas kaj estas kontentaj, decidis foriri al novaj lokoj. Liaj fratoj vane penis lin dekonsili de tio, petante lin iom pli longe restadi en la urbo. Promesante reveni tuj, kiam la cirkonstancoj tion ebligos, li diris, ke li devas iri Jerusalemon, por transdoni al Simon Petro la frukton el la kolektado dum sinsekvaj jaroj en la lokoj, kie li estadis. La filo de Zebedeo, kiu konis tiun malnovan projekton, pravigis lin, ke li senprokraste faru tiun vojaĝon.

Denove trovante sin kune kun li, Silas kaj Timoteo kompaniis al li en tiu nova ekskurso.

Tra grandegaj malfacilaĵoj, sed ĉiam kun vere pia entuziasmo predikante la Bonan-Novaĵon, ili venis

al la haveno de Cezarea, kie ili restis kelke da tagoj, disdonante tra la vojoj, konsolojn kaj resanigojn. Kiam ili venis al la ĉefurbo de la judismo, la eksfŝisto el Kapernaum ilin plej ĝojege akceptis. Simon Petro montris grandan korpan senfortecon dank'al la teruraj kaj senĉesaj klopodoj, por ke la eklezio sen pli fortaj skuoj elportu la ŝtormojn de la unua tempo, sed liaj okuloj konservis tiun saman serenecon de la fidelaj disĉiploj.

Paŭlo transdonis al li la iometon da mono, kies uzado asekuros pli grandan sendependecon al la jerusalema institucio, por la ĝusta disvolviĝado de la entrepreno de la Kristo. Petro kortuŝite dankis kaj kun larmoj lin brakumis. La malriĉuloj, la orfoj, la senhelpaj maljunuloj kaj la resaniĝantoj de tiam havos benatan lernejon de sanktiga laboro.

Petro rimarkis, ke ankaŭ la eksrabeno estas korpe kadukiĝinta: tre malgrasa, tre pala, haroj jam grizaj, ĉio en Paŭlo elmontris la intensecon de liaj luktoj; manoj kaj vizaĝo estis strekitaj de cikatroj.

Antaŭ ĉi tiu vido, la eksfŝisto entuziasme parolis al li pri liaj epistoloj, dissemitaj en ĉiuj eklezioj kaj avide legataj; profunde sperta en spiritaj demandoj, li eldiris sian konvinkon, ke tiuj leteroj fontas el rekta inspiro de la Dia Majstro: tiun opinion Paŭlo el Tarso ricevis tre emociite pro la meminiato de la kunbatalanto. Krom tio – plezure aldonis Simon – ne povus ekzisti ia eduka rimedo tiel profunda, kiel tiu. Li konas en Palestino kristanojn, kiuj havas ĉe si multe da kopioj de la mesaĝo al la tesalonikanoj. La eklezioj de Jafjo kaj Antipatrio, ekzemple, komentariadis la epistolojn frazo laŭ frazo.

La eksrabeno eksentis grandegan kuraĝigon, por daŭrigi la elaĉetan bataladon.

Post kelke da tagoj li iris kun la disĉiploj en Antioĥian. Li kelkan tempon ripozis apud la amataj kamaradoj, sed lia potenca laborkapableco ne permesis pli grandajn periodojn de senfareco.

Dum tiu tempo ne pasis semajno, en kiu li ne akceptis delegitarojn de pluraj eklezioj el la plej malpro-

ksimaj lokoj. Antioĥia en Pisidio plendis pri malfacilaĵoj, Ikonio petis pluajn vizitojn, Berea kriis pri helprimedoj, Korinto bezonis klarigojn, Koloso insistis pri lia baldaŭa ĉeesto. Per la servemo de siaj tiamaj kunuloj Paŭlo el Tarso sendadis al ili leterojn post leteroj, ĉiujn plej kore kontentigante. En tiaj cirkonstancoj la Apostolo al nacioj neniam plu troviĝis sola en la evangelia misio. Liaj epistoloj, kiujn li skribadis ĉiam helpate de multenombraj disĉiploj kaj kiuj poste estis en la manoj de la venontaj kristanoj, estas plejparte plenaj de dolĉaj kaj delikataj personaj preparoloj.

Fininte sian estadon en Antioĥia, li revenis al sia naskiĝurbo, kie li predikis la eternajn veraĵojn kaj sukcesis interesigi grandan nombron da tarsanoj pri la realaĵoj de la Evangelio. Poste li denove penetris la altaĵojn de Taŭruso, vizitis la ekleziojn de Frigio kaj Galatujo, fortikigante siajn samkredanojn, por kio li uzis multe da tempo. Dum tiu senlaca kaj senĉesa klopodado li sukcesis varbi novajn disĉiplojn al Jesuo, disdonante grandajn bonfarojn en ĉiuj lokoj, prilumataj de lia parolo edifa, ĉar ankaŭ ilustrata per faktoj.

Ĉie luktoj senĉesaj, ĝojoj kaj doloroj, angoroj kaj amaraĵoj de la mondo, kiuj ne malvarmigis liajn esperojn al la promesoj de Jesuo. De unu flanko la rigoremaj izraelidoj, obstinaj kaj malkaŝaj malamikoj de la Savinto; de alia la nedecidemaj kristanoj, ŝanceliĝantaj inter la personaj interesoj kaj la falsaj interpretoj. Tamen la tarsi misiisto, sciante, ke la sincera disĉiplo devas ĉiutage sperti la sensaĵojn de la “mallarĝa pordo”, neniam lasis sin posedi de senkuraĝiĝo kaj ĉiumomente plifortigis sian decidon ĉion elporti, peni, fari kaj konstrui por la Evangelio, tute sin doninte al Jesuo Kristo.

Venkinte la senhaltajn batalojn, li decidis reveni al Efeso, interese pri la skribado de la Evangelio konforme al la rememoroj de Maria.

Tie li jam ne vidis Akvilan kaj Priskilan, kiuj estis revenintaj Korinton kune kun ia Apolos, kiu distingiĝis per sia klereco inter la ĵuskonvertitoj. Kvankam intenc-

inte nur kelke da pli longaj konversacioj kun la neforgebla filino de Nazaret, li estis devigita entrepreni seriozan batalon por helpi la kunlaborantojn de Johano. La sinagogo estis haviginta al si grandan politikan influon super la eklezio de la urbo, kiu minacis ruiniĝon. La eksrabeno ekrimarkis la danĝeron kaj senkondiĉe akceptis la lukton. Dum tri monatoj li diskutadis en la sinagogo, en ĉiuj kunvenoj. La urbo, kiu baraktadis en kruelaj duboj, laŭŝajne atingis komprenpovon pli altan kaj pli riĉan per lumo. Farante ĉiam pli da mirigaj resanigoj, Paŭlo, unu tagon metinte la manojn sur kelkajn malsanulojn, estis ĉirkaŭita de ia neesprimebla lumo el la spirita mondo. Tiuj sanktaj voĉoj, manifestiĝintaj en Jerusalemo kaj Antioĥia, parolis antaŭ la publiko. Ĉi tiu fakto ricevis grandegan eĥon kaj havigis pli grandan valoron al la argumentoj de la Apostolo kontraŭ la judoj.

En Efeso oni paroladis pri nenio alia. La eksrabeno estis subite levita ĝis la apogeo de la estimo. La izraelidoj ĉie cedadis kampon. La teksisto profitis la okazon, por fiksi pli fundajn evangeliajn radikojn en la koroj. Sekvante la klopodojn de Johano, li penis organizi en la eklezio la servojn por helpado al tiuj malpli favoritaj de la sorto. La institucio riĉiĝis per spiritaj valoroj. Komprenante la gravecon de la eklezio de Efeso por la tuta Azio, Paŭlo el Tarso decidis plidaŭrigi sian estadon tie. Venis disĉiploj el Makedonujo. Akvila kaj lia edzino estis revenintaj el Korinto; Timoteo, Silas kaj Tito vigle kunlaboradis, vizitante tiujn jam starigitajn kristanajn fondaĵojn. Tiamaniere vigle helpate, la grandanima Apostolo en la nomo de la Sinjoro ĉiam pli multigadis resanigojn kaj bonfarojn. Batalante por la venko de la principoj de la Majstro, li igis multajn formeti de si danĝerajn kredaĉojn kaj superstiĉojn, por sin fordoni al la amplenaj brakoj de la Kristo.

Ĉi tiu fekunda laborado daŭris jam pli ol du jarojn, kaj jen fariĝis okazaĵo, kiu profunde efikis ĉe la efesanoj.

La urbo dediĉis specialan kulton al la diino Dia-

na (*). Malgrandaj statuoj, fragmentaj figuroj de tiu mitologia diaĵo montriĝis en ĉiuj lokoj kaj ankaŭ en la ornamadoj de la loĝantaro; sed la predikoj de Paŭlo ŝanĝis la preferojn de la popolo. Preskaŭ neniu plu interesiĝis pri aĉetado de figuroj de la diino. Sed tiu kulto estis tiel enspeziga, ke la tiamaj arĝentaĵistoj, havantaj kiel ĉefon unu metiiston kun la nomo Demetrio, prezentis fortan proteston antaŭ la koncernaj aŭtoritatoj.

Tiuj, kiuj ricevis malutilon, motivis sian proteston, dirante, ke la kampanjo de la Apostolo neniigas la plej bonajn popolajn tradiciojn de la distinginda kaj prospera urbo. La kultado al Diana venas de la prapatroj kaj meritas pli da respekto; krom tio tuta klaso da sanaj homoj fariĝos senlaboruloj.

Demetrio ekagis. La arĝentaĵistoj kolektiĝis kaj pagis agitantojn. Ili sciis, ke Paŭlo parolos en la teatro, en tiu sama vespero, kiu sekvis la definitivajn interkonsentojn. Pagite de la metiistoj, la maliculoj ekdisvastiĝis famojn ĉe la plej kredemaj. Ili false distrumpetis, ke la eksrabeno pretiĝas por trarompe penetri en la templon de Diana, por forbruligi la kultobjektojn. Ili aldonis, ke la ikonoklasta bando eliros el la teatro, por plenumi la pereigan projekton. La koroj flamiĝis. La plano de Demetrio funde impresis la imagemon de la pli simplanimaj. Ĉe vesperiĝo sin lokis granda popolamaso sur la vasta placo en atenda sintenado. Fariĝis plena vespero, la homamaso ĉiam kreskadis. Kiam en la teatro oni ekbruligis la unuajn lumojn, la arĝentaĵistoj pensis ke la Apostolo tie troviĝas. Kun minacaj sakraĵoj kaj gestoj la amaso ekimpetis furioze kriante, sed nur Gajo kaj Aristarĥo, fratoj el Makedonujo, tie estis, preparante la teatron por la vesperaj predikoj. Ili ambaŭ estis arestitaj de tiuj pli flamantaj. Konstatinte la foreston de la eksrabeno, la senkonsciencia amaso sin direktis al la metiejo de Akvila kaj Priskila, sed ankaŭ ĉi tie Paŭlo ne troviĝis. La senluksa laborejo de la kristanaj geedzoj

(*) En Agoj, 19:24 “Artemis”, greka nomo de Diana. – *La Trad.*

estis tute disruinigita per kruelaj frapoj: teksiloj sovaĝe rompataj, ledobjektoj furioze ĵetataj sur la straton. Fine la geedzoj estis arestitaj sub mokfajfoj de la ekscitita amaso.

La sciigo pri ĉi tiuj okazaĵoj rapidege disvastiĝis. La revolucia ondo, dank'al sia festa karaktero, entrendis adeptojn sur ĉiuj stratoj. Soldatoj vane alkuris, por reteni la popolamason; la plej grandaj penoj estis senutilaj. Iam kaj iam Demetrio suriris ian improvizitan tribunon kaj parolis al la popolo, venenante la korojn.

Gastante en la loĝejo de unu amiko, Paŭlo el Tarso plene sciigis pri la gravaj faktoj, kiuj pro li fariĝas. Lia unua impulso estis tuj iri al siaj arestitaj kamaradoj, por ilin liberigi, sed la fratoj malpermesis lian eliron. Tiu dolora nokto restis neforgesebla en lia vivo. Malproksime oni aŭdadis la tondran kriegadon: “Granda estas la Diana de Efeso! Granda estas la Diana de Efeso!” (*). Sed la Apostolo, perforte retenata de siaj kunuloj, devis rezigni ĉian klarigon al la popolo sur la strato.

Nur post longe la urboskribisto sukcesis paroli al la popolo, konsilante ilin prezenti la aferon al iu juĝejo, flanken metante la frenezan intencon fari mem juston.

La kunvenintoj disiris nelonge antaŭ noktomezo, sed obeis la aŭtoritatulon, nur vidinte Gajon, Aristarĥon kaj la geteksistojn en karceroj.

La morgaŭan tagon la nobla Apostolo al nacioj iris kune kun Johano vidi la ruinojn de la metiejo de Akvila. Ĉio estis rompitaĵoj sur la strato. Paŭlo forte ĉagrenite ekpensis pri siaj malliberigitaj amikoj kaj kun larmplenaj okuloj diris al la filo de Zebedeo:

– Kiel profunde ĉio ĉi min malĝojigas! Akvila kaj Priskila estas miaj kunbatalantoj ekde la unuaj horoj de mia konvertiĝo al Jesuo. Por ili mi devus suferi ĉion pro la multe da amo, kiun mi al ili ŝuldas; tial mi opinias nejuste, ke ili suferas pro mi.

(*) La teksto en Agoj, 19:28.34 iom diferencas, sed ne esence. *La Trad.*

– Pli ĝuste, pro la Kristo! – prave rediris Johano.
La eksrabeno ŝajnis konsenti la rimarkon kaj diris:

– Jes, la Majstro nin konsolos.

Kaj longe enmemiĝinte, li diris:

– De pli ol dudek jaroj ni senhalte bataladas en Azio... Nun mi devas senprokraste foriri de Ionio. La frapoj venis de ĉiuj flankoj. Interŝanĝe kontraŭ la bono, kiun ni deziras, oni faras al ni la malbonon, kiun oni nur povas. Ve al ni, se ni ne portus sur ni la stampojn de la Kristo Jesuo!

La nobla predikisto, tiel brava kaj fortika, ploradis! Johano tion rimarkis, ekrigardis liajn antaŭtempe griz-iĝintajn harojn kaj penis deturni la temon:

– Ne foriru nunmomente – li zorgeme diris –, via ĉeesto ĉi tie ankoraŭ estas necesa.

– Ne eble – li malĝoje respondis –, la revolucio de la metiistoj daŭrus plu. Ĉiuj fratoj kare pagus por mia kompanio.

– Sed, ĉu vi ne intencas skribi la Evangelion laŭ la rememoroj de Maria? – dolĉe demandis la filo de Zebedeo.

– Jes, vere – kun amara sereneco konfirmis la eksrabeno –, tamen mi ja devas foriri. Se mi plu ne revenos, tiam mi venigos iun kamaradon, por rikolti la necesajn notojn.

– Vi tamen povus restadi ĉe ni.

La teksisto el Tarso trankvile ekrigardis sian kunulon kaj humile klarigis:

– Vi kredeble eraras. Mi naskiĝis por senhalta batalado, kiu devos daŭri ĝis la fino de miaj tagoj. Antaŭ ol trovi la lumon de la Evangelio, mi krime eraris, kvankam dezirante servi al Dio. Mi tre frue fiaskis en la espero de ia hejmo. Mi fariĝis malamata de ĉiuj, ĝis la Sinjoro kompatis mian mizeran situacion, vokante min proksime al Damasko. Tiam malfermiĝis abismo inter mia animo kaj la pasinteco. Forlasite de la amikoj de mia infaneco, mi devis iri al la dezerto kaj rekomenci la vivon. El la tribuno de la Sinedrio mi reiris al la peza kruda teksilo. Kiam mi revenis Jerusalemon, la jud-

ismo rigardis min kiel malsanulon kaj mensoganton. En Tarso mi spertis la forlason de la plej karaj parencoj. Poste mi rekomencis en Antiohia tiun taskon, kiu kondukis min al la servado al Dio. De tiam mi senĉese laboradis, ĉar eĉ multe da jarcentoj da servado ne sufiĉus, por pagi, kion mi ŝuldas al la Kristanismo. Kaj mi elpaŝis al predikado. Mi migradis tra pluraj urboj, mi vizitadis centojn da vilaĝoj, sed el nenia loko mi foriris sen akraj luktoj. Mi ĉiam eliradis tra la pordo de karcero, per ŝtonumado, per skurĝado. En marvojaĝoj mi pli ol unu fojon spertis ŝiprompiĝon; eĉ ne en la mallarĝa sino de ia naĝveturilo mi ĝis hodiaŭ povis eviti lukton. Sed Jesuo ĉiam instruas al mi la saĝon de la anima paco en perfekta harmonio kun lia amo.

Ĉi tiuj vortoj estis dirataj per tono de tiel sincera humileco, ke la filo de Zebedeo ne sukcesis kaŝi sian admiron.

– Vi estas feliĉa, Paŭlo – li konvinkite diris –, ĉar vi komprenis la programon de Jesuo rilate vin. Ne doloru vin la rememoro pri la travivitaj turmentoj, ĉar la Majstro devis foriri de la mondo per la torturoj de la kruco. Ni gaju pro la malliberigoj kaj suferoj. Se la Kristo foriris, sangante el tiel doloraj vundoj, ni do ne rajtas sekvi lin sen cikatroj...

La Apostolo al nacianoj treege atentis ĉi tiujn konsolajn vortojn kaj rediris:

– Estas vere!

– Cetere – aldonis lia kunulo emociita –, ni devas kalkuli je multenombraj kalvarioj. Se la Senmakula Ŝafido suferis sur la malhonoriga kruco, kiom da krucoj ni do bezonas, por atinge nian elaĉeton? Jesuo venis al la mondo dank'al grandega favorkoreco. Li dolĉe signis al ni, vokante al ni por iu pli bona vivo... Nun, mia amiko, simile al la prauloj de Izrael, kiuj eliris el la sklaveco en Egiptujo je la kosto de plej grandaj klopodoj ni tiel devas liberiĝi el la pekoj, kiuj nin sklavigas, perfortante nin mem, disciplinante la spiriton, por ke ni kolektiĝu al la Majstro responde al lia senfina boneco.

Paŭlo enpensiĝe balancis la kapon kaj rediris:

– De la momento, kiam la Sinjoro bonvolis voki min al la servado al la Evangelio, mi pri nenio alia pensas.

Laŭ ĉi tiu kora tono ili longe konversaciis, ĝis la Apostolo al nacianoj pli kuraĝigite finis:

– Kion mi el ĉio ĉi konkludas, tio estas, ke mia misio en oriento estas finita. La servemo postulas, ke mi iru antaŭen... Mi esperas prediki la Evangelion de la Regno en Romo, en Hispanujo kaj ĉe malpli konataj popoloj...

Lia rigardo estis plena de gloraj vizioj, kaj Johano humile diris:

– Dio benos viajn vojojn.

Li ankoraŭ iom longe restis en Efeso, plej forte klopdante pri la malliberigitoj. Sukcesinte ilin liberigi, li decidis forlasi Ionion kiel eble plej baldaŭ. Sed li estis ekstreme malfortika, kvazaŭ la lastaj luktoj kunagis por la ruinigo de liaj plej bonaj fortoj. Akompanata de amikoj, li iris al Troas, kie li restis kelke da tagoj, edifante la fratojn en la fido. Sed lia laceco fariĝis ĉiam pli serioza. La maltrankviligaj zorgoj disbatis liajn nervojn. Li sentis en la animo profundan angoron, kiun la maldormemo kun ĉiu tago faris pli premanta. Neniam forgesinte la amon de siaj fratoj en Filipi, Paŭlo tiam decidis serĉi al si ian rifuĝejon, sopirante kelkajn momentojn ripozi. La Apostolo estis akceptita kun sendubaj montraj de amo kaj estimo. La infanoj, protektataj de la institucio, superŝutis lin per esprimoj de kora amikeco. Alia agrabla surprizo lin tie atendis: Luko okaze troviĝis en la urbo kaj iris, por lin brakumi. Tiu renkontiĝo revigligis lian deprimitan animon. Vidante lin, la kuracisto forte maltrankviliĝis. Paŭlo aspektis al Luko ekstreme senforta, malgaja, malgraŭ la neskuebla fido, kiu nutris lian koron kaj elverŝiĝis el liaj lipoj. Li klarigis, ke li estis malsana, ke li multe suferis ĉe la lastaj predikoj en Efeso, ke li troviĝas sola en Filipi post la reveno de kelke da amikoj, kiuj lin akompanis, ke la plej fidelaj kunlaborantoj foriris Korinton, kie ili lin atendas.

Forte mirante, Luko ĉion silente aŭdis kaj demandis:

– Kiam vi forveturos?

– Mi intencas resti ĉi tie du semajnojn.

Kaj ĉirkaŭrigardinte la pejzaĝon, li finis per iom amara tono:

– Efektive, mia kara Luko, mi pensas, ke ĉi tiu estas la lasta fojo, kiam mi ripozas en Filipi...

– Nu, kial? Estas neniamaj motivoj por tiaj malĝojaj pensoj.

Paŭlo rimarkis la maltrankvilecon de sia amiko kaj rapidis forviŝi lian unuan impreson:

– Mi supozas, ke mi devos foriri al okcidento – li klarigis kun rideto.

– Tre bone! – rediris Luko reanimita. – Mi nun elfinas la aferojn, kiuj min venigis ĉi tien, kaj iros kune kun vi al Korinto.

La Apostolo ekĝojis, kaj ja des pli ekĝojis pro la kompanio de kamarado el tiuj plej sindonaj. Ankaŭ Luko ĝojis pro la eblo helpi lin en la veturado. Tre pene li kaŝis la doloran impreson, kiun kaŭzis al li la farto de la Apostolo. Malgrasega, vizaĝo pala, okuloj enfalintaj, la eksrabeno aspektis korpe plej mizere, sed la kuracisto penis ne elmontri siajn afliktajn konjektojn.

Kiel kutime, Paŭlo el Tarso dum la vojaĝo al Korinto parolis pri sia projekto iri Romon, por porti al la ĉefurbo de la Imperio la mesaĝon de la amo de la Kristo Jesuo. La kompanio de Luko, la alieco de regionoj revigligis lian organismon. La kuracisto mem miris la naturan reagon de tiu potencvola viro.

Tra la vojo, dank'al okazaj predikoj dum longa irado aliĝis al ili kelke da pli fervoraj kamaradoj.

Denove en Korinto, la eksrabeno daŭrigis siajn epistolojn, ame reorganizis la programon de servoj de la eklezio, kaj en la rondo de siaj plej intimaj amikoj paroladis pri nenio alia, ol pri sia grandioza projekto viziti Romon, celante helpi la kristanojn, jam ekzistantajn en la urbo de Cezaroj, fondi instituciojn similajn al tiuj de Jerusalemo, Antiohia, Korinto kaj aliaj pli gravaj lokoj en oriento. Intertempe li reakiris la latentajn fortojn de la kaduka organismo. Li plej streĉe klopodadis pri sia plano, kunordigante ideojn post ideoj de la celita programo en la imperia ĉefurbo. Li proponis multegon

da disponoj. Li pensis pri la preparado de sia alveno, sendante antaŭe leteron, per kiu li rememorigus la konsolantan doktrinon de la Evangelio kaj nomus, kun kora saluto, ĉiujn fratojn, kiujn li konis en la medio de Romo. Akvila kaj Priskila estis reirintaj de Efeso en la ĉefurbon de la Imperio, intencante rekomenci la vivon: ili do estus liaj plej amataj helpantoj. Por tio Paŭlo uzis kelke da tagoj por redakti tiun faman dokumenton, kiun li finis per amaso da apartaj kaj longaj salutoj. Tiam okazis epizodo, apenaŭ konata al la konfesantoj de la Kristanismo. Konsiderante, ke ĉiuj fratoj kaj predikistoj estas homoj treege okupitaj pri la plej diversaj taskoj kaj ke al Paŭlo estas malfacile trovi iun, kiu portos la faman leteron, la fratino, nomata Febe, granda kunhelpantino de la Apostolo al nacioj en la haveno de Kenkrea, sciigis lin, ke ŝi estas irona Romon, por viziti parencojn, kaj proponas sin volonte porti la dokumenton, destinitan por prilumi la estontan kristanaron.

Paŭlo ĝojegis, kiel ankaŭ ĉiuj fratoj. La epistolo estis finita gaje kaj entuziasme. Tuj kiam foriris la brava senditino, la eksrabeno kunvenigis la negrandan kolekton da plej amataj disĉiploj, por starigi la definitivajn bazojn de la granda migrado. Li komencis, klarigante, ke la vintro estas proksima, sed tuj kiam venos la tempo de marveturado, li ŝipiros al Romo. Praviginte la bonegecon de la plano, ĉar la Evangelio estis jam enplantita en la plej gravajn regionojn de oriento, li petis siajn intimajn amikojn diri al li, kiel kaj ĝis kia grado ili povos lin helpi. Timoteo respondis, ke Eŭnike en tiu momento ne povas forhavi lian zorgadon pro la morto de la respektinda Lojda; kiel li klarigis, li devas reveni al Tesaloniko, kaj Aristarĥo konfirmis lian senkulpigon. Sopater parolis pri siaj malfacilaĵoj en Berea. Gajo intencis foriri al Derbe en la morgaŭa tago. Tiĥiko kaj Trofimo prezentis kiel pretekston la urĝan neceson iri al Efeso, de kie ili intencas transloĝiĝi en Antioĥian, naskiĝurbon de ili ambaŭ. Preskaŭ ĉiujn ceterajn io nepovigis partopreni en la ekskurso. Nur Silas diris, ke li povos ĝin fari, kiaj ajn la cirkonstancoj. Luko, kiu

ĝis tiam silentis, diris, ke li estas preta kaj decidinta dividi la laborojn kaj ĝojojn de la misio en Romo. El ĉiuj kunvenintoj nur du povos lin akompani, tamen Paŭlo montriĝis rezignaciinta kaj tre kontenta. Sufiĉis al li Silas kaj Luko, kutimaj al lia maniero de propagando kaj posedantaj la plej belajn atestojn de laboro kaj sindoneco al la afero de Jesuo.

Ĉio iradis glate, la interkonsentita plano antaŭvidiĝis grandajn rezultatojn, kaj jen, en la morgaŭa tago, unu pilgrimanto, malriĉa kaj malgaja, aperis en Korinto, veninte per unu el la lastaj ŝipoj, ankrintaj ĉe Peloponezo, por la longa travintrado. Li venis el Jerusalemo, iris al la eklezio kaj insiste demandis pri Paŭlo, por transdoni al tiu konfidencan leteron. Vidinte la strangan kurieron, la Apostolo surpriziĝis: tiu estis la frato Obadja, kiun Jakobo komisiis, por doni tiun leteron al la eksrabeno. Ĉi tiu ĝin iom nerve ekprenis kaj disrulis.

Laŭgrade kiel li ĝin legadis, li fariĝis pli pala.

Tio estis konfidenca, plej grava dokumento. La filo de Alfeo informis la ekslegiston pri la doloraj okazaĵoj, fariĝantaj en Jerusalemo. Jakobo sciigis, ke la tiea eklezio travivas ankoraŭ unu el la plej teruraj persekutadoj de la flanko de la Sinedrio. La rabenoj decidis rekomenci la torturojn kontraŭ la kristanoj. Simon Petro estis elpelita el la urbo. Granda nombro da kunfratoj suferadis persekutojn kaj turmentojn. La eklezio estis atakita de senkonsciencaj judoj kaj ne ricevis pli seriozajn difektojn pro la respekto, kiun la popolo havis por ĝi. Per siaj pacigaj klopodoj li sukcesis kvietigi tiujn pli flamiĝemajn, sed la Sinedrio opinias necesa ian interparolon kun Paŭlo, por konsenti la ĉeson de siaj agoj. La konstanta kaj efektiva agado de la Apostolo al nacioj sukcesis ĵeti ĉie la parolon de Jesuo. El ĉiuj flankoj la Sinedrio ricevadis konsultojn, plendojn, alarmajn sciigojn. La sinagogoj iom post iom dezertiĝadas. Tia situacio postulas klarigojn. Apogante sin al ĉi tiuj pretekstoj, la plej alta tribunalo de la izraelidoj ĵetis terurajn atakojn kontraŭ la kristanan organizaĵon de Jerusalemo. Jakobo tre serene raportis ĉi tiujn okazaĵojn

kaj petis Paŭlon el Tarso ne forlasi la eklezion en tiu horo de akraj luktoj. Li, Jakobo, estas nun maljuna kaj laca. Sen la kunlaborado de Petro, li timas pereĵi. Li do petas la damaskan konvertiton veni al Jerusalemo kaj alfronti la persekutojn pro Jesuo, por ke la leĝistoj de la Sinedrio kaj de la Templo ricevu sufiĉe da klarigo pri ilia afero. Li opinias, ke povos okazi nenio malbona al la eksrabeno, ĉar ĉi tiu pli bone komprenos paroli al la religiaj aŭtoritatoj, por ke la afero havu la justan sukceson. La iro al Jerusalemo havus nur unu solan celon, nome klarigi al la Sinedrio, kiel ja nepre necese. Post tio, kion Jakobo opiniis plej grava, por savi la eklezion de la ĉefurbo de la judismo, Paŭlo revenus trankvila kaj feliĉa tien, kie al li plej plaĉus.

La mesaĝo estis plena de amaraj esprimoj kaj de ardaj alvokoj.

Paŭlo el Tarso finis la legadon kaj rememoris la pasintecon. Per kia rajto la galilea Apostolo faras al li tian peton? Jakobo sin ĉiam lokis en antagonisma pozicio. Malgraŭ sia inpetema, sincera, nerompebla temperamento, li, Paŭlo, ne povis malami tiun fraton; tamen li sin ne sentis sufiĉe alligita al la filo de Alfeo, ke li fariĝus lia absoluta kunulo ĉe tia malfacila afero. Li serĉis ian izolitan angulon de la eklezio, sidiĝis kaj ekmeditis. Sentante ian malinklinon rezigni iri Romon, malgraŭ la projekto, farita en Efeso kelkajn tagojn antaŭ la ribelo de la arĝentaĵistoj, viziti la ĉefurbon de la Imperio, nur denove irinte al Jerusalemo, li ekpensis konsiliĝi kun la Evangelio, por disbati tiel grandan perpleksecon. Li disrulis la pergamenfoliojn kaj, ilin senlekte ekrigardinte, legis jenan averton el la notoj de Levi: “Konsentu rapide kun via kontraŭulo” (*).

Ĉe ĉi tiuj saĝaj vortoj li sin ne detenis de mirego, ricevante ilin kiel dian admonon, ke li ne preterlasu la oportunan okazon estigi kun la galilea Apostolo la sanktajn ligilojn de la plej pura frateco. Ne estas praviginde nutri personajn kapricojn en la afero de la Kristo.

(*) Mateo, 5:25. – *Noto de la Aŭtoro.*

En la nuna rilato la interesato pri lia ĉeesto en Jerusalemon estas ne Jakobo, sed la eklezio, tiu sankta institucio, kiu fariĝis prizorganto de la malriĉaj kaj de la malfeliĉaj. Ĉu inciti la furiozon de la fariseoj kontraŭ ĝin ne estus elĉenigi ian tempeston kun neantaŭvideblaj sekvoj por la senhavuloj kaj nefavoritoj de la mondo? Li rememoris sian junecon kaj la longedaŭran persekutadon, kiun li permesis al si fari kontraŭ la disĉiploj de la Krucumito. Li klare rememoris tiun tagon, kiam li ordonis aresti Petron ĉe la kripluloj kaj la malsanuloj, kiuj plorante tiun ĉirkaŭis. Li rememoris, ke Jesuo vokis lin al la dia servado, proksime al Damasko; ke de tiam li suferadis kaj predikadis, oferante sin mem kaj instruante la eternajn veraĵojn, organizante amoplenajn kaj gastigemajn ekleziojn, kie la “infanoj de Kalvario” havus konsolon kaj rifuĝon, laŭ la admonoj de Abigail. Tiel li venis al la konkludo, ke li ŝuldas al la suferantoj en Jerusalemon, kion li devas redoni. Iam li nutradis konfuzon, senigis ilin je la ama helpado de Stefano, iniciatis senindulgajn ekzilojn. Multe da malsanuloj en la urbo de la rabenoj estis devigitaj fornei la Kriston en lia ĉeesto. Ĉu ĉi tiu ne estas la okazo oportuna por la pago de lia grandega ŝuldo? Nun en la lumo de la plej sanktaj spertoj de la vivo ĉe la amata Majstro, Paŭlo el Tarso leviĝis kaj firmpaŝe direktis sin al la kuriero, kiu lin humile atendis:

– Amiko, venu kaj ripozu, ĉar vi tion ja bezonas. Vi portos la respondon post nemulte da tagoj.

– Ĉu vi iros Jerusalemon? – demandis Obadja iom maltrankvila, kvazaŭ konante la gravecon de la afero.

– Jes – respondis la Apostolo.

La sendito estis plej kore trankvila. Paŭlo deziris aŭdi lian personan impreson pri la persekutado, denove ĵetita kontraŭ la disĉiplojn de la Kristo, penis starigi ian planon pri tio, kion li devas fari, sed ne sukcesis eviti iajn altrudajn kaj ŝajne nesolveblajn zorgojn. Kiel li konduku en Jerusalemon? Kiajn klarigojn li donu al la rabenoj de la Sinedrio? Kian ateston li donu?

Tre maltrankvila li ekdormis en tiu nokto post turmenta kaj konsumanta pensado. Tiam li songĝis, ke li staras sur longa hela vojo kun tonoj de mirinda opaleca lumo. Farinte nemulte da paŝoj, li estis brakumita de du karesemaj kaj amikaj estuloj: tio estis Jeziel kaj Abigail, kiuj lin plej kore ĉirkaŭprenis. Ravite, li eĉ ne unu vorton povis diri. Abigail dankis lin por la delikateco de liaj emocioplenaj rememoroj en Korinto, parolis al li pri la ĝojoj de sia koro kaj gaje finis:

– Ne estu maltrankvila, Paŭlo. Vi ja devas iri Jerusalemon por la nepre necesa atesto.

En sia animo la Apostolo rekonsideris la planon de sia iro al Romo, kun la nobla celo instrui la kristanajn veraĵojn en la sidejo de la Imperio. Sufiĉis, ke li pensis, por ke la kara voĉo denove aŭdiĝis per familiara tono:

– Trankviliĝu, ĉar vi iros Romon, por plenumi altegan devon, ne kiel vi volas, sed laŭ la planoj de la Plejaltulo...

Kaj tuj kun ia anĝela rideto:

– Poste estos nia eterna kuniĝo en Jesuo Kristo, por la dia tasko de amo kaj vero en la lumo de la Evangelio.

Ĉi tiuj vortoj penetris en lian animon kun la forto de ia profunda revelacio. La Apostolo al nacioj ne povoscius klarigi, kio fariĝis en la interno de lia spirito. Li sentis samtempe doloron kaj plezuron, maltrankvilon kaj esperon. La surprizo ŝajnis malhelpi, ke li sekvu plue tiun neforgeseblan vizion. Jeziel kaj lia fratino, ame gestadante al li, malaperis kvazaŭ envolvitaj en travideblan nebulon. Li vekiĝis kun saltanta koro kaj tuj konkludis, ke li devas pretiĝi por la lastaj atestoj.

En la sekvanta tago li kunvenigis la amikojn kaj kamaradojn en Korinto. Li ordonis al Obadja per propra buŝo klarigi la situacion en Jerusalemo kaj sciigis sian planon iri al la ĉefurbo de la judismo, antaŭ ol iri Romon. Ĉiuj komprenis la sanktajn postulojn de la nova decido, sed Luko elpaŝis kaj demandis:

– Laŭ la ŝanĝo de la projekto, kiam do vi intencas foriri?

– Post kelke da tagoj – li per firma tono respondis.

– Ne povas esti – rediris la kuracisto –; ni ne povas konsenti, ke vi piediru al Jerusalemo; cetere vi bezonas ripozi iajn kelkajn tagojn post tiom da luktoj.

La eksrabeno momenton konsideris kaj konsente diris:

– Vi estas prava. Mi restos en Korinto kelke da semajnoj; mi tamen intencas vojaĝadi laŭ stadioj, por viziti la kristanajn societojn, ĉar mi havas la intuicion, ke mi baldaŭ foriros Romon kaj ne plu vidos en mortema korpo la amatajn ekleziojn...

Ĉi tiujn vortojn li diris melankolie. Luko kaj la ceteraj kunuloj silentadis kaj la Apostolo daŭrigis:

– Mi profitos la tempon, por instrukcii Apoloson pri la necesaj laboroj de la Evangelio en la diversaj lokoj de Akajo.

Tuj poste, por forviŝi la impreson de siaj malpli kuraĝigaj asertoj rilate sian vojaĝon al Romo, li reanimis la ĉeestantaron per optimismaj kaj esperigaj paroloj. Li organizis grandan programon por la disĉiploj, rekomendante al la plej multaj el ili laborojn ĉe la eklezioj en la tuta Makedonujo, por ke ĉiuj fratoj estu sur siaj postenoj okaze de lia adiaŭo; aliaj estis senditaj Azion kun tiaj samaj instrukcioj.

Kiam li estis en Korinto jam tri monatojn, la judoj rekomencis siajn persekutojn kontraŭ la institucio. La ĉefa sinagogo de Akajo estis ricevinta sekretajn informojn el Jerusalemo. Oni postulis tute simple la pereigon de la Apostolo por ĉiu prezo. Paŭlo rimarkis la insidon kaj, prudente adiaŭinte la korintanojn, piediris, kune kun Luko kaj Silas, por viziti la ekleziojn de Makedonujo.

Li ĉie predikadis la parolon de la Evangelio, konvinkite, ke tio estas la lasta fojo, kiam li vidas tiujn lokojn.

Kortuŝite li ĉie adiaŭis siajn malnovajn amikojn, farante rekomendojn, kvazaŭ por ĉiam forironte. Virinoj dankoplenaj, maljunuloj kaj infanoj alsvarmis, por kareseme kisi liajn manojn. En Filipi, kies frata anaro

pli intime paroladis al lia koro, liaj vortoj vekis torentojn da larmoj. Tiu amoplena eklezio, floranta por Jesuo sur la bordo de Gangas, nutris por la Apostolo al naci-anoj apartan korinklinon. Lidia kaj ŝiaj multaj helpantoj, per ja homa impulso, deziris reteni lin ĉe si, insistadis, ke li ne iru pluen, pro la timo al la persekut-oj de la judismo. La Apostolo, serena kaj fidoplena, diris:

– Ne ploru, fratoj. Mi estas konvinkita pri tio, kio min koncernas, kaj mi ne devas esperi florojn kaj feliĉ-ajn tagojn. Estas mia devo atendi la finon, en la paco de la Sinjoro Jesuo. La homa ekzistado estas kampo de senĉesa laborado, kaj la lastaj suferoj estas la krono de la atesto.

Tio estis admonoj plenaj de esperoj kaj ĝojoj, por kuraĝigi tiujn pli timemajn kaj revigligi la fidon en la malfortaj kaj suferantaj koroj.

Konsiderinte finita sian taskon en Filipi kaj ĉirkaŭ-aĵoj, Paŭlo kaj liaj kunuloj ŝipiris al Troas. En ĉi tiu urbo la Apostolo plej sukcese faris sian lastan predikon en la sepa vespero post sia alveno; tiam okazis la fama akcidento al Eŭtiĥo, kiu falis el fenestro de la tria etaĝo de la domo, kie plenumiĝis la evangeliaj ceremonioj, kaj al kiu tuj helpe kuris la eksrabeno; ĉi tiu levis lin duon-mortintan, sed lin resanigis en la nomo de Jesuo.

En Troas aliaj kunfratoj aliĝis al la negranda anaro. Obeante la rekomendon de Paŭlo, ili kune kun Luko kaj Silas ekveturis al Asos, por malkare lui ian malnovan fiŝkaptan barkon, ĉar la Apostolo preferis veturi tia-maniere inter la multenombraj insuloj kaj havenoj, por adiaŭi siajn fratojn kaj amikojn, tie laborantajn. Tiel okazis; kaj dum liaj kunhelpantoj veturis en komforta ŝipo, la eksrabeno iris piede pli ol dudek kilometrojn da vojo, nur pro la plezuro brakumi la maleminentajn daŭr-igantojn de lia grandioza apostola klopodado.

Poste, haviginte al si ian tute nebonan barkon, Paŭlo kaj la disĉiploj veturis pluen al Jerusalemo, disdonante konsolojn kaj spiritajn helpojn ĉe la humilaj kaj sen-famaj eklezioj.

Sur ĉiuj marbordoj vidiĝis kortuŝantaj gestoj, amaraj adiaŭoj, sed en Efeso la sceno estis multe pli malĝoja, ĉar la Apostolo estis petinta la ĉeeston de la plej-aĝuloj kaj de la amikoj, por aparte paroli al iliaj koroj. Li ne deziris elŝipiĝi, por antaŭhaltigi novajn konfliktojn, kiuj plimalfruigus lian iradon, sed por atesti amon kaj dankon, ĉiuj fratoj senescepte iris al li renkonte, kio emociis lian ameman animon.

Maria mem, profundaĝa, venis de malproksime kune kun Johano kaj aliaj disĉiploj, por diri ian parolon de amo al la brava paladino de la Evangelio de ŝia Filo. La maljunuloj akceptis lin kun varmaj elmontroj de amikeco, la infanoj oferis al li manĝaĵojn kaj florojn.

Treege kortuŝite, Paŭlo el Tarso adiaŭe predikis, kaj kiam li konigis sian antaŭsenton, ke li tien ne plu revenos en mortema korpo, aŭdiĝis laŭtaj ĉagrenesprimoj ĉe la efesanoj.

Kvazaŭ tuŝitaj de la spirita grandeco de tiu momento, preskaŭ ĉiuj genuiĝis sur la blanka etendaĵo de la marbordo kaj petis Dion protekti la diligentan batalanton de la Kristo. Ricevante tiajn belajn esprimojn de koreco, la eksrabeno kun larmoj brakumis ĉiujn, unu post unu. La plej multaj ĵetiĝis en liajn amikajn brakojn, plorsingultante, kisante liajn kalajn kaj fortikajn manojn. Al la fino brakumante la Sanktan Virgulinon, Paŭlo ekprenis ŝian dekstran manon kaj sur ĝin delikate premis kison de fila amo.

La veturado daŭris plu kun samaj karakterizaĵoj: Rodo, Patara, Tiro, Ptolemais kaj fine Cezarea. En ĉi tiu lasta ili gastis ĉe Filipino, kiu tie de longe konstante loĝadis. La malavara kunbatalanto informis Paŭlon pri ĉiuj okazaĵoj en Jerusalemo, kie oni multe esperis el lia persona klopodo por la subtenado de la eklezio. La nobla galileano, nun tre maljuna, parolis pri la spirita mieno de la urbo de la rabenoj, ne kaŝante la timojn, kiujn al li kaŭzis la situacio. Ne nur tio afliktis la misiistojn. Agabo, jam konata de Paŭlo en Antioĥia, venis el Judujo kaj en mediuma tranco, en la unua intima kunsido en la domo de Filipino, eldiris la plej dolorajn antaŭ-

vidaĵojn. La perspektivoj estis tiel nigraj, ke eĉ Luko mem ekploris. La amikoj petis Paŭlon el Tarso, ke li foriru; estus preferindaj la libereco kaj la vivo por la bono de la afero.

Sed li, ĉiam preta kaj decidema, parolis pri la Evangelio, komentariis tiun pecon, en kiu la Majstro profetis la torturojn, kiuj atendis lin sur la kruco, kaj entuziasme finis:

– Kial ni ploru, dispremante la koron? La sekvantoj de la Kristo devas esti pretaj al ĉio. De mia flanko, mi estas preta doni ateston, eĉ se mi devas morti en Jerusalemon pro la nomo de la Sinjoro Jesuo!

Kiam la impresoj de la antaŭdiraĵoj de Agabo ankoraŭ ne forviŝiĝis, la domo de Filipo ricevis novan surprizon en la sekvanta tago. La kristanoj el Cezarea kondukis al la eksrabeno unu senditon de Jakobo, kun la nomo Mnason. La galilea Apostolo eksciis pri la alveno de la damaska konvertito al la palestina haveno kaj rapidis komunikiĝi kun li per kuriero, sin donante al la komuna afero. Mnason klarigis al la eksrabeno la motivon de sia ĉeesto, avertante lin pri la danĝeroj, al kiuj li riskus en Jerusalemon, kie la sektisma malamo boladas kaj iris ĝis la plej kruelaj persekutoj. Dank'al la ekzaltiteco kaj vikleco de la judismo Paŭlo devus ne iri tuj al la eklezio, sed ekgasti en lia domo, kien Jakobo iros, por intime paroli al li, Paŭlo, por ke ili ambaŭ decidu, kio plej konvenas al la sanktaj interesoj de la Kristanismo. Post tio, la Apostolo al nacioj estus akceptita en la institucion de Jerusalemon, por diskuti kun la nunaj estroj pri la destino de la institucio.

Paŭlo trovis tre saĝaj la zorgojn kaj sugestojn de Jakobo, sed preferis sekvi la buŝajn proponojn de la kuriero.

Peza onbro premis la spiriton de la kunuloj de la granda Apostolo, kiam la karavano, akompanata de Mnason, foriris de Cezarea direkte al la ĉefurbo de la judismo. Kiel ĉiam, Paŭlo el Tarso anoncis la Bonan-Nov-aĵon en la plej senfamaj vilaĝoj.

Post kelke da tagoj da malrapida irado, por ke ĉiuj

evangeliaj laboroj estu kontentige plenumitaj, la disĉiploj de la Evangelio, poseditaj de maltrankviligaj zorgoj, transpaŝis la pordegojn de la urbo de la rabenoj.

Maljunaspekta kaj senfortiĝinta, la Apostolo al nacioj ekrigardis la konstruaĵojn de Jerusalemo, fiksante la okulojn sur tiu senviva kaj malgaja vidaĵo, kiu rememorigis al li la jarojn de lia tumulta kaj por ĉiam formortinta juneco. Li altigis la penson ĝis Jesuo kaj petis lin pri inŝpiro en la plenumado de la sankta servado.



VIII

La martireco en Jerusalem

Obeinte la rekomendojn de Jakobo, Paŭlo el Tarso ekgastis en la domo de Mnason antaŭ ĉia intertrakto kun la eklezio. La galilea Apostolo promesis viziti lin en tiu sama vespero.

Antaŭvidante gravajn okazaĵojn en tiu fazo de sia ekzistado, la eksrabeno uzis la tagon, farante laborplanojn por tiuj disĉiploj, agantaj pli rekte sub lia direktado.

Vespere, kiam densa ombrovualo envolvis la urbon, Jakobo venis kaj tre humile salutis sian kamaradon. Ankaŭ li estis maljunaspekta, senforta, malsana. La konvertito apud Damasko, alie, ol iam antaŭe, eksentis plej grandan simpation por lia persono, kiu ŝajnis tute ŝanĝita de la batoj kaj ĉagrenoj de la vivo.

Post la unuaj impresoj pri la vojaĝoj kaj evangeliaj faroj, la kamarado de Simon Petro petis la eksrabenon difini al li lokon kaj horon por pli intima konversacio. Paŭlo tuj kontentigis lian peton kaj ambaŭ iris en apartan ĉambron.

La filo de Alfeo komencis, klarigante la motivon de siaj grandaj zorgoj. De pli ol unu jaro la rabenoj Eliakim kaj Ĥanoĥ decidis revivigi la persekutojn, kiujn li, Paŭlo, starigis dum sia tumulto direktado de la Sinedrio. Ili diris, ke la iama leĝisto kulpis pri la magiaĵoj kaj sorĉaĵoj de la degenerinta anaro, kompromitante la aferon de la judismo, kaj do ne estas juste toleradi plu la situacion nur tial, ĉar la tarsi leĝisto perdis la prudenton proksime al Damasko. Tiu iniciato ricevis grandegan popularecon en la religiaj rondoj de Jerusa-

lem, kaj la plej grava leĝodona institucio de la raso, nome la Sinedrio, aprobis la proponitajn paŝojn. Konfesante, ke la evangeliza entrepreno de Paŭlo kaj ties kunuloj ĉie donis mirindajn esperfruktojn, laŭ la senĉesaj sciigoj el ĉiuj sinagogoj de la regionoj, kiujn ili vizitis, la granda tribunalo antaŭ ĉio dekretis la areston de la Apostolo al naciaĵoj. Multenombraj procesoj por individuaj persekutoj, ne elfinitaj de Paŭlo el Tarso pro lia neatendita konvertiĝo, estis rekomencitaj, kaj – kio estis pli abomeninda – kiam la juĝotoj estis jam mortintaj, tiam oni punadis iliajn idojn, kiuj do estis torturataj, humiligataj, malhonorataj!

La eksrabeno ĉion ĉi aŭdis silente, miregante.

Jakobo daŭrigis dirante, ke li ĉion eblan faris, por mildigi la akrecon de la situacio. Li agigis influajn politikistojn, kiujn li povis peti, kaj tiel sukcesis malpli-rigorigi iajn pli maljustajn verdiktojn. Malgraŭ la ekzilo de Petro li penis tenadi plu la helpadon al la nefavoritoj de la sorto kaj ankaŭ la kolonion de servado, fonditan el inspiro de la damaska konvertito kaj kie la resaniĝantoj kaj senprotektuloj havis bonegan medion de pagata kaj paca laborado. Post pluraj interparoloj kun la Sinedrio, pere de amikoj influaj en la judismo, li havis la plezuron vidi malpliakrigitaj la postulojn, kiujn oni metis al li, Paŭlo, nome: ke la eksleĝisto el Tarso estus libera agadi, povus bataladi plu por siaj intimaj konvinkoj, sed li donus publikan kontentigon rilate la privilegiojn pri raso, koniderante la demandojn, kiujn la Sinedrio prezentus al li per Jakobo, kiu montriĝis lia amiko. La kunulo de Simon Petro klarigis, ke la postuloj estis komence tre rigoraj, sed nun, dank'al grandegaj klopodoj, ili limiĝis je ia negrava devo.

Paŭlo el Tarso lin aŭskultadis plej kortuŝita. Posedante luman evangelian sciaron, li opiniis, ke nun venis la momento atesti sian sindonecon al la Majstro ĝuste per tiu sama persekutorgano, kiun lia senscienco pasintatempe kreis. En tiuj rapidaj minutoj li streĉis la memoron kaj ekvidis iamajn terurajn bildojn... Maljunuloj estis torturataj en lia ĉeesto, por ke li sentu la

plezuron de la kristana apostateco ĉe la refarado de la promeso de eterna fideleco al Moseo; patrinoj de familio, elŝirataj el siaj modestaj hejmoj, devigataj ĵuri per la malnova Leĝo, ke ili forneas la nazaretan ĉar-pentiston, abomenante la krucon de lia martireco kaj malhonoro. La plorsingultoj de tiuj humilaj virinoj, mal-konfesantaj sian kredon, ĉar ili estis vunditaj ĉe tio plej nobla, kion ili posedis, nome la patrina instinkto, nun penetris en liajn orelojn kvazaŭ krioj de angoro, postul-antaj dolorajn elacetojn. Ĉiuj pasintatempaj scenoj nun preterŝoviĝadis antaŭ lia spirita retino, sen manko de eĉ la plej sensignifa detalo. Fortikaj junuloj, subten-antoj de multemembraj familioj, eliris stumpitaj el la karcero; aliaj junuloj petis venĝon, infanoj postulis la li-berigon de la patroj. Meze en la tumultantaj rememoroj, nun bildiĝis al li la honora morto de Stefano sub la ŝtonjetoj kaj insultoj de la popolo; li revidis Petron kaj Johanon deprimitaj kaj humilaj antaŭ la juĝisto, kvazaŭ malbonfarantoj kaj krimuloj. Nun li staris antaŭ la filo de Alfeo, kiu lin neniam tute komprenis, parolanta al li en la nomo de la pasinteco kaj en la nomo de la Kris-to, kvazaŭ admonante lin elpigi siajn lastajn dolorajn ŝuldojn.

Paŭlo el Tarso eksentis, ke larmo elŝprucas el liaj okuloj, tamen ne fluante. Kia torturo lin atendas? Kiaj la ordonoj de la religia aŭtoritatulo, pri kiuj Jakobo parolis kun klare videbla interesiĝo?

Kiam la kamarado de Simon pli longe paŭzis, la eksrabeto tre kortuŝita demandis:

– Kion ili postulas de mi?

La filo de Alfeo fiksitis sur li la serenajn okulojn kaj klarigis:

– Post longa rezistado la izraelidoj, kunvenintaj en nia eklezio, decidis peti de vi nur tion, pagi la elspezojn de kvar malriĉaj viroj, kiuj faris la promeson esti nazoreoj, kaj iri kun ili al la Templo dum sep sinsekvaj tagoj, por ke la tuta popolo povu vidi, ke vi ĉiam ankoraŭ estas bona judo kaj lojala ido de Abraham... Ĉe la unua ekrigardo, la elmonro povas ŝajni infaneca,

tamen ĝi celas, kiel vi vidas, kontentigi la farisean vantamon.

La eksrabeno faris geston ja propran al li, kiam li estis ĉagrenita, kaj diris:

– Mi pensis, ke la Sinedrio decidis postuli mian morton...

Jakobo komprenis, kiom da naŭzo elverŝas tia rimarko kaj rediris:

– Mi ja scias, ke tio naŭzas vin, tamen mi insistas, ke vi cedu, ne ĝustadire pro ni, sed pro la eklezio kaj pro tiuj, kiuj iam estonte nin helpos.

– Tio – oponis Paŭlo kun grandega disreviĝo – estas nenia nobleco. Tia postulo estas ia profunda ironio kaj celas fari el ni iajn infanojn, tiel sensaĝa ĝi estas. Ĝi estas ne persekuto, sed humiligo; ĝi estas la deziro elmontri memkonsciajn homojn, kvazaŭ ili estus ventkapaj kaj malkleraj buboj...

Sed Jakobo, prenante karesan teniĝon, kian la eksrabeno neniam antaŭe vidis en li ĉe iaj ajn cirkonstancoj de la vivo, parolis kun plej granda frata koreco, en nova lumo elmontriĝante al sia mireganta kamarado:

– Jes, Paŭlo, mi komprenas vian pravan abomenon. La Sinedrio per tio intencas ridindigi niajn konvinkojn. Mi scias, ke la torturo sur la strato vin malpli dolorus, tamen, ĉu vi pensas, ke tio ne estas por mi doloro de multe da jaroj? Ĉu vi kredus, ke mia konduto naskiĝas de ia senkonscia kaj krima fanatikeco? Mi tre frue komprenis, ekde la unua persekuto, ke la harmoniigo de la eklezio kun la judoj kuŝas plej precipe en miaj manoj. Kiel vi ja scias, la fariseismo ĉiam vivis en frapanta elmontrado de hipokriteco, sed ni konsentu ankaŭ, ke ĝi estas la superreganta, tradicia partio de niaj religiaj aŭtoritatuloj. De la unua tago mi ĉiam devas iradi kun la fariseoj multe da mejloj, por ekhavi ion por la tenado de la eklezio de la Kristo. Hipokritaĵo? Ne tiel opiniu. La Majstro, en Galileo, ofte instruis nin, ke la plej bona atesto konsistas en malrapida, ĉiutaga mortado por la venko de lia afero; ankaŭ tial li asertis, ke Dio ne deziras la morton de la pekulo, ĉar ĝustadire nur

estingante niajn ĉiutagajn kapricojn, ni trovas la luman ŝtuparon, por supreniri al lia senlima amo. La atento, kiun mi dediĉas al la judoj, estas ĝemelo de la koreco, kiun vi portas por la nacioj. Al ĉiu el ni Jesuo konfidis taskon malsaman pri la formo, sed saman en la fundo. Se mi ofte kaŭzis misinterpretojn de mia konduto, tio ĉagrenas mian spiriton, kutimiĝintan al la simpleco de la galilea medio. Kion utilis al ni detruanta konflikto, dum ni havas grandiozajn devojn por prizorgi? Estas por ni grave scii morti, por ke niaj ideoj transiru kaj floru en la ceteraj homoj. Personaj luktoj, kontraŭe, velkigas la plej fortikajn esperojn. Ĉu estigi disiĝojn kaj proklami iliajn malutilojn, en la eklezio de la Kristo, ne rezultigus, ke ni per niaj propraj manoj ekstermus la sanktan planton de la Evangelio?

La parolo de Jakobo sonis saturita de boneco kaj saĝo kaj valoris kiel konsola revelacio. La galileanoj estis multe pli kleraj, ol ĉiu ajn el la plej instruitaj rabenoj de Jerusalemo. Li, Paŭlo, kiu venis en la religian mondon per famaj lernejoj, kiu ĉiam, dum sia juneco, havis la inspiron de ia Gamaliel, li nun admiris tiujn ŝajne krudajn homojn, venintajn el la kabanjoj de fiŝkaptistoj, kiuj en Jerusalemo atingis neforgeseblajn intelektajn venkojn nur tial, ĉar ili povosciis silenti, kiam oportune, havante krom la sperto pri la vivo grandegan kapitalon da boneco kaj abnegaciemo laŭ la modelo de la Dia Majstro.

La konvertito apud Damasko nun ekvidis la filon de Alfeo en nova lumo. Liaj grizaj haroj, la faltoplana kaj vakspala vizaĝo atestis akrajn kaj senĉesajn laborojn. Nun li vidis, ke la vivo postulas pli ĝuste komprenemon ol konadon. Li supozis, ke li konas la galilean Apostolon laŭ ties psikologia kapableco, sed li venis al la konkludo, ke nur en tiu momento li povis kompreni tian fraton laŭ la titolo, kiun tiu rajtas.

Kiam la kamarado de Simon Petro faris pli longan paŭzon, Paŭlo el Tarso lin ekrigardis plej simpatie kaj emociite diris:

– Mi vidas, ke vi estas prava, tamen tiu postulo

devigas havi monon. Kiom mi devos pagi por la verdikto? Izoliĝinte kaj malproksime de la judismo jam longajn jarojn, mi ne scias, ĉu la ceremonioj forte ŝanĝiĝis.

– La ordonoj estas tiuj samaj – rediris Jakobo –, ĉar vi devos sanktigi vin per ili; laŭ la tradicio, vi pagos por la aĉeto de dekkvin ŝafoj krom ankaŭ por la reglamentaj manĝaĵoj.

– Ĝi estas absurdo! – oponis la Apostolo al nacioj.

– Kiel vi ja scias, la religia aŭtoritato postulas ce ĉiu nazoreo tri bestojn por la laboroj de konsekrado.

– Akra postulo – diris Paŭlo kortuŝita.

– Tamen – rediris Jakobo kun rideto – nia paco valoras multe pli ol tion, kaj ne nur ĝin, sed ankaŭ la estontecon de la Kristanismo ni devas ne kompromiti.

La konvertito apud Damasko longe tenis la vizaĝon apogita sur la dekstra mano, vidigante la profundecon de sia meditado, kaj fine diris per tono, kiu elmontris lian grandegan sentemon:

– Jakobo, kiel vi, tiel mi mem hodiaŭ atingis pli altan gradon da kompreno de la vivo. Mi pli bone komprenas viajn argumentojn. La homa ekzistado estas ja ia supreniro el la mallumo en la lumon. Junceco, pretendo al aŭtoritateco, centrigo de nia persona sfero naskas multe da iluzioj, makulante de ombroj la plej sanktajn aferojn. Estas mia devo fleksiĝi antaŭ la postuloj de la judismo, fruktoj de persekutado, kiun mi mem iam iniciatis.

Li haltis, montrante malfacilecon, por tute konfesi sian kulpon, sed, prenante pli humilan teniĝon, kiel iu, kiu havas nenian elturniĝon, iom time daŭrigis:

– Dum miaj luktoj mi neniam pensis, ke mi estas ia viktimo, sed mi ĉiam rigardadis min kiel antagoniston de malbono. Nur Jesuo, kun siaj senmakulaj pureco kaj amo, povis diri, ke li estas anĝelo, buĉita de nia nigra maliceco; koncerne min, kiel ajn multe oni min ŝtonumis kaj vundis, mi ĉiam opiniis, ke tio estas tro malmulte kompare kun tio, kion mi devis suferi ĉe la justaj atest-

oj. Sed nun, Jakobo, zorgigas min negrava malfacilaĵo; Kiel vi ja scias, mi ĝis hodiaŭ vivis absolute de mia teksista laboro, kaj nun mi ne havas monon, per kiu mi povus fari la antaŭvideblajn elspezojn... Tio estus la unua fojo, kiam mi devus turni min al aliula monujo dum la solvo de la demando koncernas sole nur min...

Liaj vortoj elmontris sinĝenon, miksitajn kun la malĝojo, kiun li ordinare sentis en la tagoj de humiliĝo kaj malfeliĉo. Ĉe tia esprimo de abnegaciemo Jakobo, per impulso de kora spontaneeco, ekprenis lian manon, kisis ĝin kaj diris:

– Ne zorgu: ni scias, en Jerusalemo, pri la grandeco de viaj personaj klopodoj, kaj ne estus saĝe, se la eklezio ne interesiĝus pri tiuj nepravigeblaj postuloj. Nia institucio pagos ĉiujn viajn elspezojn. Ne malmulte estas, ke vi konsentas tiun oferon.

Ili ankoraŭ longe konversaciadis pri la demandoj, rilatantaj al la propagando de la Evangelio, kaj en la sekvinta tago Paŭlo kaj liaj kamaradoj iris al la eklezio de Jerusalemo, kie ilin akceptis Jakobo kune kun ĉiuj judaj plejaĝuloj, simpatiantaj kun la Kristo kaj sekvantaj Moseon, kolektiĝintaj por lin aŭdi.

La kunsido komenciĝis per rigora ceremoniaro, en kiu la eksrabeno rimarkis la amplekson de la influo de la fariseoj en la institucio, destinita por esti la luma kulturejo de la Dia Majstro. Liaj kamaradoj, kutimintaj al la sendependeco de la Evangelio, ne sukcesis kaŝi sian miron, sed per gesto la damaska konvertito igis ĉiujn silenti plu.

Invitite, por klarigi sian konduton, la eksrabeno legis longan raporton pri siaj klopodoj ĉe la nacioj, kion li faris kun granda konsideremo kaj ekstrema prudento.

La judoj, kiuj tamen laŭŝajne okupis definitive la eklezion, tenante plu la malnovan konduton de la instruantoj de Izrael, per sia parolperanto Kenan diris al la eksleĝisto konsilojn kaj riproĉojn. Ili deklaris, ke ankaŭ ili estas kristanoj, sed severaj observantoj de la malnova Leĝo; ke Paŭlo ne devas batali kontraŭ la cirkumcido kaj ke li devas doni plenan kontentigon pri siaj agoj.

Ĉe la profunda mirego de siaj kamaradoj la eksrabeno tenadis sin silenta, kun neantaŭvidita sereneco ricevante la insultojn kaj riproĉojn.

Fine Kenan prezentis tiun proponon, pri kiu Jakobo hieraŭ parolis. Por kontentigi la postulon de la Sinedrio, la teksisto el Tarso devos sanktigi sin en la Templo kun kvar tre malriĉaj judoj, farintaj la promeson esti nazoreoj, kaj pagi por ĉiuj elspezoj.

La amikoj de Paŭlo ankoraŭ pli miregis, vidante lin leviĝi inter tiu antaŭjuĝema kunsidantaro kaj deklari sin preta plenumi la ordonon.

La reprezentanto de la plejaĝuloj pedante kaj longe ankoraŭ paroladis pri la normoj de la raso, kaj estis aŭdata de Paŭlo kun aĝela pacienco.

Reveninte al la domo de Mnason, la eksrabeno decidis konigi al siaj kamaradoj la motivojn de sia konduto. Kutiminte konfide respekti liajn decidojn, ili ne faris al li eble superfluaĵajn demandojn, sed deziris akompani la Apostolon al la Templo de Jerusalemo, por iom profiti el lia sincera sinofero rilate la estontecon de la evangeliismo. Paŭlo emfazis la konvenecon, ke li iru sola, sed Trofimo, kiu ankoraŭ kelke da tagoj restadis en Jerusalemo, antaŭ ol reveni Antioĥian, insistis kaj atingis, ke la Apostolo akceptis lian kompanion.

La apero de Paŭlo el Tarso en la Templo, kien li akompanadis kvar rasfratojn en profunda mizereco, por kun ili sanktigi sin kaj pagi por ilia promeso, kaŭzis grandegan sensacion en ĉiuj rondoĵoj de la fariseismo. Ekflamiĝis akraj, brutaj diskutoj. Tuj kiam ĝi vidis la eksrabenon humiligita, la Sinedrio ekpensis altrudi novajn verdiktojn: al ĝi jam ne sufiĉis la antaŭaj altrudoj. En la dua tago de la sanktigo la popola movado estis terure kreskinta; ĉiuj volis vidi la faman leĝiston, kiu freneziĝis proksime al Damasko pro la sorĉarto de la galileanoj. Paŭlo observadis la boladon de la medio ĉirkaŭ lia persono kaj petadis Jesuon nepre havigi al li la necesajn fortojn. En la tria tago, manke de alia preteksto por pli granda kondamno kelkaj leĝistoj diris, ke Paŭlo estas tiel malrespekta kaj sin akompanigas en la sankt-

ajn lokojn per grekdevena viro, fremda al la izraelidaj tradicioj. Trofimo naskiĝis en Antioĥia, el grekaj gepatroj, kaj dum multe da jaroj vivis en Efeso; tamen, malgraŭ la sango, fluanta en liaj vejnoj, li konis la regulojn de la judismo kaj en la lokoj, destinitaj por la kultado, li kondukis plej respektive. Tamen la aŭtoritatuloj ne volis konsideri ĉi tiujn apartaĵojn. Estis necese denove kondamni Paŭlon el Tarso, kaj ili ja ĝin faros por ĉiu prezo.

La eksrabeno ekrimarkis la insidon, kiu ŝpiniĝis ĉirkaŭ li, kaj petis la disĉiplon ne plu akompani lin al la monto Moriĵa, kie oni faradis la religiajn servojn. Sed la malamo de la fariseoj ĉiam plue fermentadis.

En la hieraŭo de la lasta tago de la farisea purigo la konvertito apud Damasko kun sia ĉiam sama humileco ĉeestis la ceremoniojn, sed tuj kiam li sin lokis, por preĝi kune kun siaj kamaradoj, kelkaj flamiĝemuloj ĉirkaŭis lin kun minacaj esprimoj kaj teniĝoj.

– Morton al la defalinto! Ŝtonojn kontraŭ la perfidinton! – kriis tondra voĉo, skuante la salonon.

Paŭlo havis la impreson, ke tiuj krioj estas la signalo por pli gravaj perfortaĵoj, ĉar tuj eksplodis infera kriegado. Iuj ekscititaj judoj kaptis lin je la kolumo de la tuniko, aliaj krude senmovigis liajn brakojn kaj trenis lin sur la grandan korton, destinitan por la movoj de la granda publiko.

– Ci pagos pro cia krimo! – diris unuj.

– Ci devas morti! Izrael hontas cian estadon en la mondo! – kriis aliaj pli furiozaj.

La Apostolo al nacianoj sin fordonis tute senreziste. En palpebruma daŭro li konsideris la profundan celon de sia veno al Jerusalemo kaj konkludis, ke li estis vokita ne nur por la infaneca devo akompani en la Templon kvar rasfratojn, senhelpajn en sia necesbezono. Estis lia devo elmontri, en la urbo de la rabenoj, la solidecon de siaj konvinkoj. Li nun komprenis la subtilecon de la cirkonstancoj, kiuj kondukis lin al la atesto. Unue la repaciĝo kaj la pli bona konado de tia kamarado, kiel Jakobo, per kio li obeis ordonon, kiu ŝajnis al li iom

infaneca; due lia granda deziro pruvi la fidon kaj la fordonitecon de sia animo al Jesuo Kristo. Treege surprizite, meze en profundaj kaj doloraj rememoroj, li rimarkis, ke la flamantaj izraelidoj lasis lin sub la kaprico de la furioza popolamaso, ĝuste sur tiu sama korto, kie Stefano antaŭ dudek jaroj estis ŝtonumita. Iuj senprudentiĝintaj judoj perforte ekkaptis lin kaj lin ligis al la torturoŝtupo. Dronante en siaj rememoroj, la ganda Apostolo apenaŭ sentis la vangofrapojn, kiujn oni al li donis. Li rapide teksis la plej kuriozajn konsideradojn. En Jerusalemo la Dia Majstro suferis la plej dolorajn torturojn; sur tiu sama loko, kie li nun estas, la nobla Jeziel sin oferis pro la Evangelio sub la batoj kaj Mokoj de la popolaĉo. Li tiam hontis pri la turmento, farita el lia propra iniciato kontraŭ la frato de Abigail. Nur nun, ligite al la torturoŝtupo, li komprenis la grandecon de la sufero, kiun fanatikeco kaj malklereco kaŭzas en la mondo. Kaj li rezonis: – La Majstro estas la Savinto de la homoj kaj ĉi tie suferis por la elaĉeto de ĉiuj. Stefano estis lia disĉiplo, sindona kaj plena, kaj ankaŭ ĉi tie spertis la turmentojn de la morto. Jesuo estis la Filo de Dio, Jeziel estis la Apostolo. Kaj li, Paŭlo? Ĉu tie ne estis la pasinteco kaj postulis dolorajn elpagojn? Ĉu ne estas juste, ke li multe suferu, pro la multe da sufero, kiun li travivigis al aliaj? Li prave ĝojis en tiuj amaraj momentoj, ne nur tial, ke li ekprenis sian krucon kaj sekvas la amatan Majstron, sed ankaŭ, ĉar li havis la okazon suferi tion saman, kion Jeziel plej maldolĉe trapasis.

Ĉi tiuj konsideradoj havigis al li kelkan konsolon. Lia konscienco sentis sin malpli peza. Li atestos sian fidon en Jerusalemo, kie li renkontiĝis kun la frato de Abigail; mortinte, li povos alproksimiĝi al ties granda koro kaj triumfe rakonti al tiu siajn proprajn oferojn. Li petos de tiu pardonon kaj gloros la bonecon de Dio, kiu kondukis lin al tiu sama loko por la justa pago. Etendante la rigardon, li duonvidis la malgrandan pordon al la ĉambreto, kie li troviĝis kun la amata fianĉino kaj ŝia frato, baldaŭ forironta el la mondo en la eks-

tremaj momentoj de la agonio. Ŝajnis al li, kvazaŭ li ankoraŭ aŭdas la lastajn vortojn de Stefano, miksitajn kun boneco kaj pardono.

Kiam li apenaŭ elvenis el siaj rememoroj, la unua ŝtonfrapo vekis lin, por ke li aŭdu la kriegadon de la popolo.

La granda korto estis plena de minacaspektaj izraelidoj. Sarkasmaj insultoj tranĉadis la aeron. La sceno estis tia sama, kia en tiu tago, kiam Stefano forflugis de la Tero: samaj ofendoj, samaj mokaj mienoj de la turmentantoj, sama senindulga malvarmeco de la fanatikaj ekzekutistoj. Paŭlo mem miregis, konstatante la kuriozajn koincidojn. La unuaj ŝtonoj trafis al li la bruston kaj la brakojn, lin forte vundante.

– Ĉi tiu estos en la nomo de la sinagogo de la kili-kianoj! – diris junulo meze de ĥoraj ridegoj.

La ŝtono flugis sibilante kaj la unua breĉis la vizaĝon de la Apostolo. Flueto da sango ekmalsekigis liajn vestojn, sed eĉ ne minuton li kun sia miregiga sereneco deturnis la rigardon for de siaj ekzekutantoj.

Sed Trofimo kaj Luko, sciiĝinte pri la seriozeco de la situacio, ekde la unuaj momentoj, per amiko, kiu ĉeestis la komencon de la torturo, tuj iris peti la helpon de la romaj aŭtoritatoj. Timante novajn embarasojn ili ne konigis la titolojn de la konvertito apud Damasko, sed diris nur, ke li estas homo, kiu ne devas suferi de la mano de iaj senkonsciencaj kaj fanatikaj izraelidoj.

Unu ĉefkapitano senprokraste organizis taĉmenton da soldatoj. Forlasinte la fortikaĵon, ili decideme penetris en la korton. La popolamaso deliradis en ia uragano da surdigaj krioj kaj blekoj. Obeante la ordonon de sia komandanto, du centestroj firme elpaŝis kaj maligis la kaptiton, ŝirante lin el tiuj barbaroj, kiuj avido konkuris pri li.

– For la malamikon de la popolo! Li estas krimulo! Malbonfaranto! Ni dispecigu la rabiston!

Ŝvebis en la aero la plej strangaj ekkrioj. Ne trovinte sufiĉe aŭtoritatajn rabenojn por la klarigoj, la roma ĉefkapitano ordonis, ke la akuzito estu mankatena. Tiu

oficito estis konvinkita, ke Paŭlo estas iu danĝera maliculo, kiu jam longe fariĝis terura turmentilo de la provincanoj. Nenian alian klarigon li trovis, por pravigi tiom da malamo.

Kun kontuzita brusto, kun vnditaj vizaĝo kaj brakoj, la Apostolo eskortita de la subuloj de Cezaro, ekmarŝis al la Turo Antonia, dum la popolaĉo, post la malgranda anaro, senĉese kriegadis: – Morton! Morton!

Kiam li estis enironta en la unuan korton de la granda roma fortikaĵo, Paŭlo, fine kompreninte, ke li ne venis Jerusalemon, nur por akompani kvar mizerajn nazoreojn sur la monton Morija, sed por doni pli konvinkan ateston de la Evangelio, humile demandis la ĉefkapitanon:

– Ĉu vi permesas, ke mi diru al vi ion?

Rimarkante liajn bonedukitajn manierojn, la noblanton de lia parolo en pura greka lingvo, la kohortestro, tre mirante, respondis:

– Ĉu vi ne estas tiu egipta bandito, kiu antaŭ kelka tempo organizis tiun bandon da rabistoj, kiuj disruinigas ĉi tiujn regionojn?

– Mi ne estas rabisto – respondis Paŭlo, ŝajnanta ia stranga figuro pro la sango, kiu makulis lian vizaĝon kaj senluksan tunikon. – Mi estas civitano el Tarso kaj petas vin, permesu al mi paroli al la popolo.

La roma militisto forte miris pri tia alta bontoneco kaj povis fari nenion alian, ol cedi, kvankam hezitante.

Sentante sin en unu el siaj grandaj momentoj de atesto, Paŭlo el Tarso supreniris kelkajn ŝtupojn de la grandega ŝtuparo kaj ekparolis en la hebrea lingvo, impresante la amason pro la profunda sereneco kaj eleganteco de sia parolado. Li komencis, konigante siajn unuajn luktojn, siajn memriproĉojn pro tio, ke li persekutis la disĉiplojn de la Dia Majstro; li rakontis sian iradon al Damasko, la senliman bonecon de Jesuo, kiu permesis al li tiun gloran vizion, kun vortoj de admono kaj pardono. Vive rememorante Stefanon, li parolis pri sia eraro, ke li konsentis ties morton.

Aŭdante lian rafinitan, mistere belan parolon, Klaŭdio Lisias, la roma ĉefkapitano, kiu lin arestis, spertis neesprimeblajn sensaĵojn. Ankaŭ li ricevis iajn bonfarojn de tiu nekomprenebla Kristo, pri kiu la oratoro parolis en tiaj amaraj cirkonstancoj. Farante al si skrupulon, li sendis voki la ĉefkapitanon Zelfos, el egipta deveno, kiu akiris iajn romajn titolojn dank'al sia riĉeco, kaj petis:

– Amiko – li apenaŭ aŭdeble flustris –, mi ne deziras ĉi tie preni iajn decidojn rilate la aferon de ĉi tiu viro. La popolaĉo furiozas, kaj eble fariĝos tre seriozaj okazaĵoj. Mi dezirus vian tuĵan kunhelpon.

– Jes, sendube – decideme respondis lia kolego.

Kaj dum Lsias klopodis por pli detale ekzameni la personon de la Apostolo, kiu en impresa maniero paroladis, Zelfos plej diligente faris koncernajn disponojn. Li plifortigis la garnizonon, starigis kordonon de izolado, celante gardi la oratoron kontraŭ ia subita atako.

Post detala raporto pri sia konvertiĝo, Paŭlo el Taro ekparolis pri la grandeco de la Kristo, pri la promesoj de la Evangelio; sed kiam li traktis pri siaj rilatoj kun la spirita mondo, el kiu li ricevadis la konsolajn mesaĝojn de la Majstro, tiam la senkonsciencia, furioza popolaĉo per malnoblaj impetoj ekagitiĝis. Granda nombro da izraelidoj demetis siajn mantelojn kaj ĵetis polvon en la aeron, per impulso, karakterizanta malklerecon kaj malicecon. La momento estis plej serioza. Tiuj pli flamantaj provis rompi la kordonon de la soldatoj, por masakri la kaptiton. La agado de Zelfos estis rapida. Li ordonis konduki la Apostolon en la internon de la Turo Antonia. Kaj dum Klaŭdio Lisias iris hejmen, por iom mediti pri la grandiozeco de la aŭdita parolo, lia kolego faris energiajn disponojn, por dispeli la popolamason. Ne malmultaj obstine blekadis plu sur la strato, sed la oficiro ordonis disirigi la kalcitrantojn per sturmado de kavalerio.

Kondukite en humidan karceron, Paŭlo rimarkis, ke la soldatoj traktas lin plej malrespekte. Liaj vundoj lin terure suferigis. La kruroj estis doloraj kaj malfirmaj.

La tuniko estis penetrita de sango. La senkompataj kaj ironiemaj gardistoj ligis lin al dika kolono, traktante lin same, kiel la ordinarajn krimulojn. La Apostolo sentis sin senforta kaj febranta, rekonante, ke por li ne estos facile rezisti al la baldaŭa torturo. Li konsideris, ke ne estas juste sin tute fordoni al la malicaj intencoj de la lin gardantaj soldatoj. Li rememoris, ke la Majstro sin oferis sur la kruco, ne kontraŭstarante al la krueleco de la homoj, sed ankaŭ, ke li asertis, ke la Patro ne deziras la morton de la pekulo. Li ne povis havi la pretendon fordoni sin tiel same, kiel Jesuo, ĉar nur ĉi tiu portas sufiĉe da amo, por esti sendito de la Ĉiopova; kaj ĉar li sin konfesis pekulo, konvertiĝinta al la Evangelio, tial estis justa lia deziro laboradi, ĝis la lasta tago de siaj kapabloj sur la Tero, por siaj homfratoj kaj por sia propra spirita klerigado. Li rememoris la saĝon, kun kiu Petro kaj Jakobo ĉiam kondukis, por ke la taskoj, konfiditaj al ilin ne suferu nepreavigeblajn difektojn. Nun, konstatinte sian malgrandan ŝancon al organisma rezisto, en tiu neforgesebla horo, li kriis al la soldatoj:

– Vi ligis min al la kolono, destinita al krimuloj, kaj tamen vi povas imputi al mi nenian kulpon! Mi nun vidas, ke vi preparas skurĝojn por la torturo, dum sango min jam kovras ekde la martirigo, al kiu min submetis la freneza popolaĉo...

Unu el la gardistoj, iom ironiema, interrompis lin kaj diris:

– Be! Ĉu vi do ne estas Apostolo de la Kristo? Estas famo, ke via Majstro mortis sur la kruco, dirinte eĉ ne vorteton, kaj fine li eĉ petis pardonon por la ekzekutantoj, motivante ĝin per tio, ke ili ne scias, kion ili faras...

La kamaradoj de la ŝercanto eksplodis per laŭta ridgado, sed Paŭlo el Tarso, elmontrante la tutan noblecon de sia koro en la brilego de la rigardo, senhezite rediris:

– Jes, ĉirkaŭita de la malklera kaj senkonscienca popolo, en la tago de Kalvario, Jesuo petis Dion pardonon la spiritan mallumon, en kiu dronis tiuj homoj, kiuj star-

igis por li la malhonoran lignaĵon; sed la komisiitoj de la imperia registaro ja ne povas esti ia amaso, kiu ne konscias siajn proprajn agojn. La soldatoj de Cezaro devas konscii, kion ili faras, ĉar, se vi ne scias la leĝojn, por kies plenumo vi ricevas soldon, estus do pli juste, ke vi rezignu viajn postenojn.

La gardistoj restis senmovaj, frapitaj de mirego. Sed Paŭlo per firma voĉo daŭrigis:

– Nun mi demandas: ĉu estas laŭleĝe pro vi skurĝi roman civitanon ne kondamnitan?

La centestro, kiu kontrolis la aranĝojn por la skurĝado, haltigis la komencajn disponojn. Kun miro la centestro vokis Zelfoson. Eksciinte la okazaĵon, la ĉefkapitano, treege mirante, demandis la Apostolon:

– Diru al mi, ĉu vi estas romano?

– Jes.

Ĉe la certeca tono de ĉi tiu respondo Zelfos opiniis prudente ŝanĝi la konduton kontraŭ la malliberigito. Timante embarasojn, li ordonis, ke oni forprenu la eksrabenon for de la ŝtupo, kaj permesis al li fari al si senĝene en la malvasta spaco de la ĉelo. Nur tiam Paŭlo el Tarso sukcesis havi iom da ripozo sur malmola kuŝejo kaj pli respekte kaj estime ricevis kruĉon da akvo. Li kvietigis la fortan soifon kaj ekdormis, malgraŭ la sangantaj kaj doloraj vundoj.

Zelfos tamen ne estis trankvila; li tute ne sciis la socian rangon de la akuzito. Timante embarasojn malutilajn por lia pozicio, ja enviinda el la politika vidpunkto, li klopodis, por vidiĝi kun la ĉefkapitano Klaŭdio Lisias. Eksciinte la motivon de la maltrankvileco de sia kamarado, tiu diris:

– Ĉi tio min mirigas, ĉar al mi li diris, ke li estas judo el Tarso en Kilikio.

Zelfos tiam konfesis, ke estas por li malfacile klarigi la aferon kaj diris:

– Laŭ tio, kion vi diras, li ŝajnas al mi pli ĝuste ia ordinara mensoganto.

– Ho ne! – ekkiriis Lisias. – Li kredeble posedas

dokumentojn pri civitaneco de la Imperio kaj kondukis laŭ motivoj, kiujn ni ne kapablas kompreni.

Rimarkinte, ke lia amiko incitetiĝis en la animo pro tiu lia supozo, Zelfos rapidis ĝin korekti:

– Via opinio estas justa.

– Mi devas ĝin eldiri laŭ tute bona konscienco – aldonis Lisias bone inspirita –, ĉar tiu viro, ne konata al ni ambaŭ, parolis pri tre seriozaj demandoj.

Zelfos ekpensis momenton kaj rediris:

– Konsiderante ĉion ĉi, mi proponas, ke li estu morgaŭ prezentita al la Sinedrio. Mi pensas, ke nur tiel ni povus trovi ian rimedon, por solvi la aferon.

Klaŭdio Lisias ricevis ĉi tiun proponon nevolonte. En sia animo li pli inklinis helpi la defendon de la Apostolo. Ties parolo, flamanta de fido, lin vive impresis. En malmultaj sekundoj li ekzamenis ĉiujn ŝancojn por kaj kontraŭ tia agado. Preni la akuziton for de la persekuto de tiuj plej ekzaltitaj estus ago justa; sed disputi kun la Sinedrio estus konduto, kiu postulus pli da prudento. Li tre proksime konas la judojn kaj pli ol unu fojon spertis la grandecon de iliaj pasioj kaj kapricoj. Ankaŭ komprenante, ke li devas vekti ĉe sia kolego nenian suspekton rilate al sia religia kredo, li faris jesan geston kaj diris:

– Mi konsentas vian proponon. Ni morgaŭ lin transdonos al la juĝistoj kompetentaj en aferoj de kredo. Vi povus lasi tion en miaj manoj, ĉar la malliberulo estos akompanata de eskorto, kiu gardos lin kontraŭ ĉia brutalajo.

Tiel estis. En la morgaŭa mateno la plej alta tribunalo de la izraelidoj estis sciigita de la ĉefkapitano Klaŭdio Lisias, ke tiu predikanto de la Evangelio ne longe post tagmezo venos antaŭ la juĝistojn por la necesaj esploroj. La aŭtoritatuloj de la Sinedrio forte ekĝojis. Ili fine revidos la defalinton de la Leĝo vizaĝo kontraŭ vizaĝo. Ĉi tiu novaĵo diskoniĝis kun neordinara rapideco.

De sia flanko, Paŭlo, en la soluleco de la karcero, estis feliĉigita de granda surprizo en tiu mateno de nigr-

aj perspektivoj. Jen okazis, ke, kun la permeso de la ĉefkapitano, maljuna sinjorino kaj ŝia ankoraŭ juna filo eniris en la ĉelon, por lin viziti. Tio estis lia fratino Delila kun lia nevo Stefano, kiuj post multe da klopodo sukcesis havi permeson por mallonga intervidiĝo. Kun larmoj de emocio la Apostolo brakumis la noblan sinjorinon, kiu aspektis tre senfortiĝinta. La juna Stefano ekprenis la manojn al sia onklo kaj ilin respektis kaj amigis.

Delila parolis pri sia intensa resopiro pri li, per la poezio de sia koro de virino rememorigis familiajn epizodojn; la eksleĝisto el Jerusalemo ricevadis ĉiujn sciigojn, ĉu bonajn, ĉu malbonajn, kun neskuebla sereneco, kvazaŭ ili venus de ia mondo tute malsama ol lia. Li tamen penis konsoli sian fratinton, kiu ĉe iu pli dolora rememoro verŝadis torenton da larmoj. Paŭlo nedetale raportis siajn vojaĝojn, luktojn, barojn sur la vojoj, irataj pro Jesuo. La respektinda sinjorino, kvankam staranta aparte de la veraĵoj de la Kristanismo, tre ĝentile ne volis tuŝi religiajn temojn, limigante sin je la amikecaj motivoj de sia frata vizito, kaj ĉe sia adiaŭo ŝi ploregis. Ŝi ne povis kompreni la rezignacion de la Apostolo, nek ĝuste taksis lian abnegacion. En sia animo ŝi bedaŭris lian sorton kaj, en la fundo, tiel same, kiel la plej multaj el ŝiaj samurbanoj, ŝi malŝatis tiun Jesuon, kiu regalis siajn disĉiplojn nur per krucoj kaj suferoj.

Sed Paŭlo el Tarso ricevis grandan konsolon de ŝia ĉeesto; precipe la inteligenteco kaj vigeleco de Stefano, dum ilia nelonga konversacio, estigis en li plej grandajn esperojn pri la spirita estonteco de la nevo.

Kiam li ankoraŭ karesadis en la menso ĉi tiun agrablan impreson, jen multenombra eskorto sin lokis apud la ĉelo, por akompani lin al la Sinedrio en la oportuna momento.

Tuj post tagmezo li sin prezentis antaŭ la tribunalo kaj ekrimarkis, ke la kunveno de la grandaj leĝistoj de Jerusalemo, plena de densa popola amaso, travivas unu el siaj solenaj tagoj. Lia ĉeesto vekis torenton da ko-

mentarioj. Ĉiuj volis vidi, ekkoni tiun defalinton de la Leĝo, tiun leĝiston, kiu forneis kaj malŝatis la sanktajn titolojn. Plej kortuŝite, la Apostolo ankoraŭ unu fojon rememoris la personon de Stefano. Nun estis lia vico atesti pri la Evangelio de vero kaj savo. La agitiĝado en la Sinedrio redonis al li tian saman atmosferon de la antaŭaj tempoj, kiujn li tie travivis. Ĝuste tie li trudis la plej krudajn humiligojn al la frato de Abigail kaj al la adeptoj de Jesuo. Estis do juste atendi nun akrajn kaj elaĉetajn suferojn. Krom tio, por plenigi la maldolĉon, la stranga koincido: la ĉefpastro, kiu prezidis en la proceso, estis nomata ankaŭ Ananias! Ĉu ironio de la destino?

Tiel, kiel okazis en la afero de Jeziel, post la legado de la akuza akto estis donita la parolo al la Apostolo, por sin defendi, pro konsidero al liaj denaskaj prerogativoj.

Paŭlo plej respektive ekpravigis sin. Sufokitaj ridoj ne malofte rompitis la tiean silenton, elmontrante la sarkasme malamikan etoson de la aŭdantaro.

Kiam lia elokventeco ekimpresis ĉiujn pro la fideleco de lia kristana atesto, la ĉefpastro trudis al li silenton kaj emfaze kriegis:

– Kiam iu ido de Izrael, kvankam havanta romajn titolojn, malrespektas la tradiciojn de ĉi tiu domo per asertoj, ofendantaj la memoron de la profetoj, li fariĝas inda je severaj riproĉoj. La akuzito laŭŝajne ne scias la devon sin konvene esprimi kaj jen deliras en iaj misteraj ideoj, propraj al lia senbrida kaj krima obsedo por la revolucia ĉarpentisto el Nazaret! Mia aŭtoritateco permesas neniajn translimaĵojn en la sanktaj lokoj. Mi do ordonas, ke oni frapu al Paŭlo el Tarso la buŝon kiel venĝon al liaj insultaj vortoj.

La Apostolo direktis al li neesprimeble serenajn rigardon kaj rediris:

– Pastro, viglu super via koro, por ne fari maljustajn punojn. Tiaj homoj, kiel vi, similas la blankigitajn murojn de la tomboj, sed vi ja devas scii, ke ankaŭ vi estos vundita de la justeco de Dio. Mi plej profunde

konas tiujn leĝojn, kies plenumanto vi fariĝis. Se vi ĉi tie sidas, por juĝi, kial do vi ordonas, ke oni min frapu?

Sed antaŭ ol li povis daŭrigi, malgranda grupo da subuloj de Ananias antaŭeniĝis kun skurĝetoj kaj vundis liajn lipojn.

– Ĉu vi kuraĝas insulti la ĉefpastrojn? – ili ekkriis koleraj. – Vi pagos por la insultoj!

La frapoj, ĉe la aplaŭdado de ĉiuj, strekadis la respektindan faltoplenan vizaĝon de la eksrabeno. Ironiaj voĉoj senĉese leviĝadis el la fia homamaso. Iuj petis pli grandan rigoron, aliaj tondre postulis la ŝtonumadon. La sereneco de la Apostolo donis plenan ateston kaj pli incitis la impulsiĝemajn kaj krimajn temperamentojn. Iuj grupoj da pli malŝatindaj izraelidoj elpaŝis kaj, kunagante kun la turmentantoj, kraĉis sur lian vizaĝon. La tumulto ĝeneraliĝis. Paŭlo ekprovis paroli, pli detale klarigi siajn pensojn, sed la konfuzo estis tiel infera, ke jam ne ekzistis aŭdado nek interkompreniĝo.

La ĉefpastro konsentis la malordon intence. La ĉefaj anoj de la Sinedrio deziris pereigi la eksleĝiston, kostu, kiom ĝi kostos. La tribunalo volontis fari tiun juĝadon kiel farson, ĉar ĝi rimarkis la personan interesiĝon de Klaŭdio Lisias pri la malliberulo; alie Paŭlo el Tarso estus mortigita en Jerusalemo, por kontentigi la abomenindajn sentojn de la senkaŭzaj malamikoj de lia benata apostola misio. Laŭ la peto de la ĉefkapitano, ĉeestanta en tiu memorinda kunveno, Ananias sukcesis serenigi tiun atmosferon. Post malesperaj petoj la alestantoj silentiĝis, en atendo.

Al Paŭlo la vizaĝo sangadis, la tuniko disĉifoniĝis, sed, kio ĉiujn miregigis, lia rigardo, alie ol iam, en tiaj cirkonstancoj, travidigis grandan fratan trankvilecon, elmontrante, ke li komprenas kaj pardonas la ofendojn de la senklereco.

Pensante, ke li mastras la situacion, la ĉefpastro aregante diris:

– Vi devus morti kiel via Majstro, sur malŝatinda kruco! Vi defalinto de la sanktaj tradicioj de la patrujo, vi blasfemanta krimulo, por vi ne sufiĉas, kiel justa

puno, la suferoj, kiujn vi komencas sperti inter la veraj idoj de Izrael!

Anstataŭ timuliĝi, la Apostolo flegme rediris:

– Tro rapida via juĝo... Mi ne meritas la krucon, kiel la Elaĉetinto, ĉar ĝia aŭreolo estas tro glora por mi; tamen ĉiuj torturoj de la mondo estus justaj, per kiuj oni punus tian pekulon, kiel mi. Vi timas la suferojn, ĉar vi ne konas la eternan vivon, vi rigardas la elprovojn simile al iu, kiu vidas nenion trans ĉi tiuj pasemaj tagoj de la homa ekzistado. La politikaĉo debaris vian spiriton de la sanktaj vizioj de la profetoj! La kristanoj, vi sciu, konas alian spiritan vivon; iliaj esperoj ne kuŝas en falsaj venkoj, kiuj putros kune kun la korpo en la tombo! La vivo estas ne tion, kion ni vidas en la banaleco de ĉiuj surteraj tagoj, sed pli ĝuste esprime de glora senmorteco kun Jesuo Kristo!

La parolo de la oratoro nun ŝajnis magnetizi la tutan aŭdantaron. Eĉ Ananias mem, malgraŭ la surda kolero, sentis sin ne kapabla por ĉiu reago, kvazaŭ io mistera devigis lin aŭdadi ĝis la fino. Kun nerompebla sereneco Paŭlo daŭrigis:

– Vundu min plue! Kraĉu sur mian vizaĝon! Skurĝu min! Ĉi tiu torturo ekzaltas min por ia pli alta espero, ĉar mi jam starigis en mia interno sanktejon, kiu estas neatingebla por viaj manoj kaj kie Jesuo ja regnos por ĉiam!

“Kion vi celas – li per firma voĉo parolis plue – per viaj tumultoj kaj persekutoj? Nu, kia la motivo por tiom da senrezultaj kaj ruinigaj luktoj? La kristanoj klopodas, same kiel Moseo, por la kredo je Dio kaj je nia glora resurekto. Estas senutile dividi, enblovi malpacon, peni maski la veron per la iluzioj de la mondo. La Evangelio de la Kristo estas la suno, kiu prilumas la tradiciojn kaj la faktojn de la malnova Leĝo!”

Tiam, malgraŭ la perplekseco de multaj, eksplodis nova tumulto. Kun gestoj kaj senprudentaj esprimoj la sadukeoj sin ĵetis kontraŭ la fariseojn. La ĉefpastro vane pensi kvietigi la batalantojn. Pli flamanta grupo provis alproksimiĝi al la eksrabeno, en la intenco lin gorgĝpremi.

Nun Klaŭdio Lisias kunvokis la soldatojn kaj ekparolis al la ĉeestantaro per minacaj vortoj. Mirante tiun strangan fakton, ĉar la romanoj neniam ekpensis sin enmiksi en religiajn aferojn de la raso, la malpacantaj izraelidoj tuj submetiĝis al lia ordono. Tiam la ĉefkapitano sin turnis al Ananias kaj postulis, ke ĉi tiu fermu la kunvenon, aldonante, ke la malliberulo revenos en sian karceron de la Turo Antonia, ĝis la judoj decidis pli prudente kaj trankvile studi la aferon.

La aŭtoritatoj de la Sinedrio ne kaŝis sian miregon, sed, ĉar la provincestro estis ĉiam ankoraŭ en Cezarea, tial ne estus prudente ne kontentigi lian reprezentanton en Jerusalemo.

Antaŭ ol okazos novaj tumultoj, Ananias deklaris, ke la juĝado de Paŭlo el Tarso, laŭ la ricevita ordono, daŭros plu en la plej proksima kunsido de la tribunalo, okazonta post tri tagoj.

La gardistoj tre zorge forkondukis la malliberulon, dum la pli eminentaj izraelidoj penis bridi la unuopajn protestojn de tiuj, kiuj akuzis Klaŭdion Lisiason kiel homon partian kaj simpatianton al la nova kredo.

Rekondukite al sia silenta ĉelo, Paŭlo povis spiri pli libere kaj revigliĝi, por alfronti la situacion.

Sentante pravan simpatian al tiu brava kaj sincera viro, la ĉefkapitano faris por li novajn disponojn. La eksleĝisto estis pli kontenta kaj trankvila. Li havis apud si gardiston, por servi al li pri ĉio, kion li bezonis, ricevis akvon abunde, medikamentojn, nutraĵojn kaj la viziton de la plej intimaj amikoj. Ĉi tiuj elmontroj lin tre korusadis. Spirite, li sentis sin eĉ pli konsolita, sed doloris lin la vundita korpo, kaj fizike li estis tute senfortiĝinta. Dum kelke da minutoj konversaciinte, laŭ permeso, kun Luko kaj Timoteo, li eksentis, ke iuj doloraj zorgoj taŭzas lian koron. Ĉu estus juste pensi pri vojaĝo al Romo nun, kiam lia farto estas tiel mizera? Ĉu li longe rezistus al la teruraj persekutoj, komencitaj en Jerusalemo? Tamen la voĉoj el la Supera Mondo promesis al li tiun vojaĝon al la ĉefurbo de la Imperio... Li ne devas dubi la promesojn, faratajn en la nomo de Kristo. Iom

da laceco, kune kun granda aflikto, jen ekŝancelis liajn ĉiam viglajn esperojn. Sed, posedite de ia nerezistebla dormemo, li rimarkis, kiel aliajn fojojn, ke intensa lumo inundas la ĉelon, samtempe kiel ia dolĉega voĉo flustras al li:

– Ĝoju pro la doloroj, kiuj elaĉetas kaj prilumas la konsciencon! Eĉ se multiĝos la suferoj, tenadu vivantaj la diajn triumfojn de la espero! Konservu vian bravecon, ĉar kiel vi jam atestis pri mi en Jerusalemo, tiel vi devas atesti ankaŭ en Romo!

Subite li sentis, ke novaj fortoj revigligas lian kadan organizon.

La matena lumo renkontis lin preskaŭ perfekte bonfartanta. Frue en la tago Stefano iom maltrankvila iris al li. Akceptite kun kora interesiĝo, la junulo informis sian onklon pri la minacaj projektoj, teksigantaj en la ombro. La judoj ĵuris pereigi la Apostolon, eĉ se por tio ili devus murdi Klaŭdion Lisiason mem. La Sinedrio nun estas kampo de abomenindaj klopodoj. Oni planas murdi la predikiston al la nacioj, en hela luma tago, en la plej proksima kunsido de la Tribunalo. Pli ol kvardek bandanoj, el la plej fanatikaj, per solena ĵuro interkonsentis efektiviĝi la pereigan projekton. Paŭlo aŭdis ĉion kaj, trankvile vokinte la gardiston, diris al li:

– Mi petas vin konduki ĉi tiun junulon al la ĉefkapitano, por ke ĉi tiu aŭdu lin pri urĝa afero.

Stefano estis do kondukita al Klaŭdio Lisias, al kiu li prezentis la denuncon. La sagaca kaj nobla patricio, kun la politika takto, kiu karakterizis liajn decidojn, promesis konvene studi la demandon, ne ebligante la supozon pri iuj definitivaj disponoj, por fiaskigi la kunĵuron. Dankante por la informo, li rekomendis al la junulo la plej grandan singardecon rilate komentariojn de la situacio, por ne pliflamigi la partiajn spiritojn.

En la soluleco de sia kabineto la roma ĉefkapitano serioze pensadis pri tiuj malgajaj perspektivoj. Laŭ sia intrigemeco la Sinedrio povos instigi manifestaciojn de la ĉiam ŝanĝanima kaj atakema popolo. Pasiaj rabenoj eble kunvokos banditojn kaj murdos lin en spektaklecaj

ĉirkonstancoj. Sed la denunco venis de junulo, preskaŭ knabo, kiu, krom tio, estas nevo de la malliberulo. Ĉu li diris la veron aŭ ĉu li estas nura ilo de ebla mistifiko pro korinklino, trompo diktita de prava maltrankvileco de la familio? Kiam li ankoraŭ ne sukcesis malimpliki siajn dubojn, por preni ian decidon, iu petis de li la komplezon de intervidiĝo. Dezirante iom ripozi de tiel gravaj pensoj, li tuj konsentis la peton. Li malfermis la luksan pordon kaj kvietmiena maljunulo jen montriĝis ridetanta. Klaŭdio Lisias ekĝojis. Li tiun konis proksime. Li al tiu ŝuldis komplezojn. La neatendita vizitanto estis Jakobo, kiu venis, por uzi sian noblan influon interhelpe por la granda kamarado en liaj evangeliaj predikoj. La filo de Alfeo ree elvolvis la planon, antaŭ kelke da minutoj jam denunciitan de Stefano. Kaj li iris pluen: li rakontis la kortuŝantan historion de Paŭlo el Tarso, montriĝante senpartia atestanto de ties tuta vivo kaj klarigante, ke la Apostolo venis en la urbon pro lia insistado, por ke ili kombinu oportunajn disponojn rilatajn al la propagando. Li finis sian respektan raporton, petante de sia eminenta amiko efikajn paŝojn, por antaŭforigi tiun monstran atencon.

Nun pli maltrankvila, la ĉefkapitano diris:

– Viaj konsideroj estas justaj, tamen estas por mi malfacile fari tujajn disponojn. Ĉu ne estus pli bone atendi la faktojn kaj tiam reagi kontraŭ la forto per la forto?

Jakobo duonmontris rideton de dubo kaj rediris:

– Mi opinias, ke via aŭtoritateco trovos urĝajn rimedojn. Mi konas la pasiojn de la fariseoj kaj la furioz-econ de iliaj manifestadoj. Mi neniam povos forgesi la abomenindan fermenton de la fariseoj en la tago de Kalvario. Mi timas ne nur pri la sorto de Paŭlo, sed ankaŭ pri vi mem. La popolamaso en Jerusalemo ofte estas krima.

Lisias faldis la frunton kaj longe meditis. Ŝirante lin el lia sendecideco, la maljuna galileano prezentis al li la ideon transforigi la malliberulon en Cezarean, por pli justa juĝado. Tio havus la utilon forpreni la

Apostolon el la incitita atmosfero de Jerusalemo, tuj ĉe la komenco fiaskigus la planon de murdo; krom tio la ĉefkapitano ne estus trafita de iaj maljustaj suspektoj kaj tenadus sendifekta la tradician respekton al lia nomo de la flanko de la malicaj kaj sendankaj judoj. Ĉi tion konus nur la plej intimaj amikoj, kaj la patricio destinus eskorton el kuraĝaj soldatoj, por akompani la malliberulon; la eliro el Jerusalemo okazus post noktomezo.

Klaŭdio Lisias konsideris la bonegecon de ĉi tiuj proponoj kaj promesis ilin efektivi en tiu sama nokto.

Tuj kiam Jakobo foriris, la romano vokis du fidindajn helpantojn kaj donis la unuajn ordonojn, por ke estu aranĝita eskorto, forta, el cent tridek soldatoj, ducent lancistoj kaj sepdek rajdistoj, sub kies protekto Paŭlo el Tarso devos sin prezenti antaŭ la provincestro Felikso en la granda palestina haveno. La subuloj, obeante la ricevitajn instrukciojn, destinis por la malliberulo unu el la plej bonaj ĉevaloj.

Malfrue en la nokto Paŭlo el Tarso estis vokita, kio lin forte surprizis. Klaŭdio Lisias per malmultaj vortoj klarigis al li la celon de sia decido, kaj la multnombra karavano silente ekiris direkte al Cezarea.

Dank'al la sekreta karaktero de la disponoj la vojaĝo fariĝis sen menciindaj incidentoj. Nur post multe da horoj venis el la Turo Antonia la unuaj informoj pri tio, kaj tiam la judoj, tre desapontitaj, konvinkiĝis pri la senutileco de ĉia revenĝo.

En Cezarea la provincestro kun mirego akceptis la karavanon. Li konis la renomon de Paŭlo, kiel ankaŭ ties luktojn kontraŭ la samrasanoj, sed tiu taĉmento el kvarcent soldatoj, por protekti unu malliberulon, estis ja io miriga.

Post la unua eldemandado la plej grava reprezentanto de la Imperio en la provinco diris:

– Konsiderante la judan devenon de la akuzito, mi lin ne povas juĝi, ne aŭdinte la kompetentan organon de Jerusalemo.

Kaj li ordonis, ke la Sinedrio plej urĝe venigu iun sian reprezentanton en la sidejon de la regado.

La izraelidoj ĝojegis ĉe ĉi tiu ordono.

Sekve de tiu decido, kvin tagojn post la transforigo de la Apostolo, Ananias mem nepre volis estri la aron da aŭtoritatuloj de la Sinedrio kaj de la Templo, kiu iris Cezarean kun plej strangaj projektoj pri la situacio de la antagonisto. Konante la potencon de la rezonado kaj la ĉarmecon de la parolo de la ekslegiŝto el Tarso, la maljunaj rabenoj prenis kun si Tertulon, unu el la plej distingindaj talentuloj, kiuj kunlaboradis en la respektinda kolegio.

En tribunalo improvizita por decidi la aferon, la oratoro de la Sinedrio ricevis la parolon la unua, kion li faris per teruraj akuzoj kontraŭ la juĝato, pentrante per nigraj koloroj ĉiujn laborojn de la Kristanismo kaj fine petante la provincestroon transdoni la akuziton al liaj samrasanoj, por ke li estu de ili dece juĝata.

Ricevinte la permeson pravigi sin, Paŭlo ekparolis plej serene. Felikso tuj rimarkis liajn altajn intelektajn naturdotojn, lian dialektikan perfektecon, kaj kun neordinara interesiĝo aŭskultadis lian argumentadon. La plejaĝuloj el Jerusalemo ne povis kaŝi sian koleron. Se eble, ili distranĉus la Apostolon sur tiu sama loko, tiel granda estis la incititeco, kiu ilin furiozigis, kontraste kun la videbla trankvileco de la parolo kaj de la persono de la oponanta oratoro.

La provincestro estis en granda embaraso por eldiri la verdikton. De unu flanko li vidis la plejaĝulojn de Izrael en preskaŭ ataka teniĝo, postulantaj rajtojn de raso; de alia flanko li rigardadis la Apostolon de la Evangelio trankvilan, flegman, spiritan mastron de la afero, per sia eleganta kaj pripensata parolo instruanta pri la malklaraj punktoj de tiu kurioza proceso.

Konfesante en sia animo la senfinan valoron de tiu malfortika, maljunaspekta viro, kies haroj ŝajnis grizigintaj pro doloroj kaj sanktaj spertoj, la provincestro Felikso rapide ŝanĝis sian unuan impreson kaj fermis la kunsidon per jenaj vortoj:

– Sinjoroj, mi konfesas, ke ĉi tiu proceso estas pli grava, ol kiel mi opiniis de la unua ekrigardo. Mi tial decidis prokrasti la definitivan verdikton, ĝis la ĉefkapitano Klaŭdio Lisias estos aŭdita, kiel necese.

La plejaĝuloj mordis la lipon. La ĉefpastro vane petis pri la daŭrigo de la laboroj. La delegito de Romo ne ŝanĝis sian vidpunkton, kaj la multenombra kunsidantaro disiĝis, ĉe la grandega ĉagreno de la izraelidoj, kiuj kun longa nazo devis reiri al Jerusalemo.

Sed Felikso de tiam ekrigardis la malliberulon kun pli da estimo. En la sekvanta tago li vizitis Paŭlon kaj donis al tiu permeson, por akcepti siajn amikojn en la administrejo. Veninte al la konkludo, ke Paŭlo havas grandan prestiĝon ĉe ĉiuj sekvantoj de la doktrino de la nazareta profeto, li tuj ekpensis tiri ian profiton el la situacio. Ĉiam, kiam li vizitis la Apostolon, li rimarkis ĉe ĉi tiu pli grandan mensan penetremon, kiu lin interesis pro ties parolo viva kaj vibranta per saĝaj observoj pri la konceptado kaj sperto de la vivo.

Unu tagon la provincestro lerte tuŝis la sferon de la personaj interesoj, sugestante al li la utilecon de lia liberiĝo, por ke li kontentigu la aspirojn de la kristana anaro, kiun li tiel alte distingigis en la socio. Sed Paŭlo decideme rebatis:

– Mi ne tute ĝuste dividas vian opinion. Mi ĉiam opiniis, ke la unua virto de kristano estas lia preteco ĉie ajn obei la volon de Dio. Mi nun estas mallibera certe ne sen Lia helpo kaj protekto, kaj tial mi pensas, ke Jesuo opinias pli bone en la nunaj tagoj tenadi min mallibera. Mi do servos al li tiel same, kiel se mia koro estus tute libera.

– Tamen – daŭrigis Felikso, ne kuraĝante rekte tuŝi sian celon – via liberiĝo ne estus io tre malfacila...

– Kiel do?

– Ĉu vi ne havas amikojn riĉajn kaj influhavajn en ĉiuj provincaj lokoj? – dubasence demandis la registara delegito.

– Kion vi celas per ĉi tio? – siavice demandis la Apostolo.

– Mi pensas, ke se vi ekhavas la monon sufiĉan, por kontentigi la personajn interesojn de tiuj, kiuj partoprenos en la proceso, vi post ne multe da tagoj estus tute libera de la Justico.

Paŭlo komprenis ĉi tiujn apenaŭ vualitajn duondirojn kaj noble reparolis:

– Mi nun komprenas. Vi parolas pri ia Justico, submetita al la krimea kaprico de la homoj. Tia Justico min ne interesas. Mi preferas morti en la karcero, ol bari la spiritan savon de eĉ la plej malalta el la oficistoj de Cezarea. Doni al ili monon interŝanĝe kontraŭ ia malmorala sendependeco estus kutimigi ilin al alkroĉiĝo al havaĵoj, kiuj al ili ne apartenas. Mia laborado estus do ia evidente perversa klopodado. Cetere, kiam nia konscienco estas pura, tiam neniu povas embarasi nian liberecon, kaj mi ja sentas min tiel libera ĉi tie, kiel ekstere, sur la strato.

La provincestro ricevis ĉi tiun senvualan kaj akran admonon kaj kaŝis sian konfuzitecon. La leciono lin krude humiligis, kaj de tiam li ne plu interesiĝis pri la afero. Tamen li estis jam komentariinta inter siaj plej intimaj amikoj la speciale dotitan inteligentecon de la malliberulo de Cezarea kaj post kelke da tagoj lia juna edzino Drusila esprimis al li sian deziron koniĝi kaj aŭdi la Apostolon. Malvolonte, ne povante deturni sin de ŝia peto, li fine kondukis ŝin antaŭ la eksrabenon.

Kiel denaska judino, Drusila, alie ol ŝia edzo, ne kontentiĝis per nuraj supraĵaj demandoj. Dezirante sondi liajn plej profundajn ideojn, ŝi petis lin fari ĝeneralan komenton pri tiu nova doktrino, kiun li alprenis al si kaj pri kiu li klopodadas, por ĝin diskonigi.

Antaŭ eminentuloj de la provinca kortumo la brava Apostolo al nacioj faris brilan panegiron de la Evangelio, reliefigante la neforgeseblan ekzempladon de la Kristo kaj la devojn de la prozelitismo, kiu burĝonadis en ĉiuj loketoj de la mondo. La plej multaj ĉeestantoj aŭskultadis lin kun videblaj montroj de interesiĝo; sed kiam li komencis paroli pri la releviĝo el la mortintoj kaj pri la devoj de la homo antaŭ sia multobla respondeco en la spirita mondo, tiam la provincestro paliĝis kaj interrompis la predikon.

– Sufiĉe por hodiaŭ! – li aŭtoritate ekkriis. –

Miaj familianoj povos aŭdi vin ian alian fojon, se ĝi plaĉos al ili, ĉar mi, mi ne kredas la ekzistadon de Dio.

Paŭlo el Tarso serene ricevis ĉi tiun parolon kaj bonkore rediris:

– Mi dankas vin por la ĝentileco de via deklaro, sed, via provincestro moŝto, mi tamen kuraĝas atentigi vin aparte pri la neceso bone pesi la aferon, ĉar homo, kiu diras, ke li ne konsentas la patrecon de la Ĉiopova, ordinare timas la juĝadon de Dio.

Felikso ĵetis sur lin koleran rigardon kaj foriris kune kun la siaj, promesante al si mem forlasi la malliberulon en la manoj de lia propra sorto.

Pro tio, kvankam respektata dank'al sia malkaŝemeco kaj lojaleco, Paŭlo devis amare travivi du jarojn kiel malliberulo en Cezarea, tempon, kiun li uzis por tenadi konstantajn rilatojn kun siaj amataj eklezioj. Senombraj mesaĝoj venadis kaj iradis, alportante konsultojn kaj forportante opiniojn kaj instrukciojn.

Intertempe la eksleĝisto de Jerusalemo atentigis Lukon al la malnova projekto pri ia biografio de Jesuo kun la helpo de la informoj de Maria; li bedaŭras sian nepovadon iri Efeson kaj tial li komisias sian kamaradon por tiu tasko, kiun li opinias esence grava por la adeptoj de la Kristanismo. La amika kuracisto plene kontentigis tiun lian deziron, postlasante al la venontoj la altvaloran raporton pri la vivo de la Majstro, riĉan per diaj lumo kaj espero. Kiam Luko finis siajn evangeliajn notojn, la agema spirito de la Apostolo al nacioj reliefigis al li la neceson de iu verko, kiu registrus la multeflankan agadon de la Apostoloj tuj post la ĉieliro de la Kristo, por ke la mondo konu la glorajn revelaciojn en Pentekosto; tiel naskiĝis la bonega raporto de Luko, nome la Agoj de la Apostoloj.

Malgraŭ sia stato de malliberulo la konvertito apud Damasko ne malpliintensigis sian laboradon eĉ unu tagon, uzante ĉiajn rimedojn, kiajn al li nur eblajn, por la dissemado de la Bona-Novajo.

La tempo flugadis rapide. La izraelidoj neniam rezignis sian unuan planon pereigi la bravan ĉampionon

de la ĉielaj veraĵoj. La provincestro estis plurfoje demandita pri la oportuno resendi la enkarcerigiton en Jerusalemon, sed, rememorante Paŭlon, lia konscienco hezitis. Krom tio, kion li per si mem observis, li ankaŭ aŭdis la ĉefkapitanon Klaŭdio Lisias, kiu plej respektive parolis al li pri la eksrabeno. Prefere timante la supernaturajn kapablojn, atribuatajn al la Apostolo, ol pro sindoneco al siaj devoj de administranto, li rezistis al ĉiuj elpensadoj de la judoj, persistante en sia decido gardi la akuziton ĝis montriĝos la oportuna okazo por pli saĝa juĝado.

Du jarojn da mallibereco registris la dosiero de la granda amiko de la nacioj. Imperiestra ordono estis transforiginta Felikson en la administradon de alia provinco. Ne forgesinte la ĉagrenon, kiun al li kaŭzis la malkaŝemeco de Paŭlo, li nepre volis forlasi ĉi tiun al la kaprico de lia sorto.

La nova provincestro, Porcio Festo, alvenis Cezarean meze en bruega popola manifestacio. Jerusalemo ne volis deteni sin de la politikaj honoroj, kaj tuj kiam la eminenta patricio ekregis, li iris viziti la grandan urbon de la rabenoj. La Sinedrio uzis la okazon, por insiste postuli la transdonon de la malamiko, kiun ĝi havis de tiom da jaroj. Grupo da leĝistoj de la malnova Leĝo penis ceremonie vidiĝi kun la grandanima romano, por peti de li la redonon de la malliberulo, por ke ĉi tiun juĝu la religia tribunalo. Festo ĝentile akceptis la komisionon kaj montriĝis inklina ĝin kontentigi, sed, prudenta nature kaj pro la devo de sia ofico, deklaris, ke li preferas solvi la aferon en Cezarea, kie li povos koni la demandon kun la nepre necesaj detaloj. Por ĉi tio li invitas la rabenojn akompani lin ĉe lia reveno al tiu urbo. La izraelidoj ekĝojegis. Disvastiĝis terure minacaj projektoj por la akcepto de la Apostolo en Jerusalemo.

La provincestro tie restis dek tagojn, sed, antaŭ ol li revenos Cezarean, iu kun premata, afliktita koro iris al ĉi tiu urbo. Tio estis Luko, kiu, diligenta kaj servema, penis informi la malliberulon pri ĉiuj tiuj strangaj okazaĵoj. Paŭlo el Tarso atente kaj trankvile lin aŭs-

kultadis, sed kiam lia kamarado ekraportis la planojn de la Sinedrio, la amiko de la nacioj paliĝis. Estis per unu fojo decidite, ke la defalinto estos krucumita same kiel la Dia Majstro, sur tiu sama loko de la Kranio. Oni faris preparojn por la fidela enscenigo de la dramo sur Kalvario. La akuzito portos la krucon ĝis tie, sub la sarkasmoj de la popolaĉo, kaj eĉ oni parolis pri la torturo de du rabistoj, por ke refariĝu ĉiuj detaloj de la martirigo de la Ĉarpentisto.

Malmulte da fojoj la Apostolo elmontris tiel grandan impreson de mirego. Fine, acidhumora kaj energia, li ekkriis:

– Mi ĉie spertis skurĝojn, ŝtonumadojn kaj insultojn, sed el ĉiaj persekutoj kaj elprovoj ĉi tiu estas la plej absurda...

La kuracisto mem ne sciis, kiel kompreni ĉi tiun aserton, sed tiam la eksrabeno daŭrigis:

– Ni ja devas antaŭhaltigi tion per ĉiaj rimedoj, kiujn ni disponas. Kiel rigardi tiun ekstravagancan decidon refari per mi tiun kalvarian scenon? Kiu disĉiplo kuraĝus submetiĝi al tia ridiga imitado, kun la malnobla celo atingi la nivelon de la Majstro per atesto al la homoj? La Sinedrio eraras. Neniu en la mondo sukcesos havi tian Kalvarion, kian havis la Kristo. Ni scias, ke en Romo la kristanoj, prenataj por plej mizeraj sklavoj, komencas morti kiel oferaĵoj. La malicaj potencoj de la mondo elĉenigas kirlegon da hontindaĵoj kontraŭ la sekvantojn de la Evangelio. Se mi devos atesti pri Jesuo, mi ĝin faros en Romo. Mi scios morti apud miaj kamaradoj, kiel ordinara kaj pekanta homo, sed mi ne submetiĝos al la rolo de imitanto de la promesita Mesio. Sekve, ĉar la nova provincestro ree debatos la proceson, mi apelacios al Cezaro.

La kuracisto faris geston de mirego. Kiel la plimulto el la eminentaj kristanoj de ĉiuj tempoj, tiel Luko ne sukcesis kompreni tiun teniĝon, kiu de la unua ekrigardo ŝajnis ia rifuzo al atesto.

– Tamen – li iom hezite oponis – Jesuo ne apelaciis al altaj aŭtoritatoj ĉe la sinofero sur la kruco,

kaj mi timas, ke la disĉiploj ne kapablos laŭdeve kompreni vian konduton.

– Mi ne konsentas kun vi – decideme rediris Paŭlo –; se la kristanaj eklezioj ne kapablos kompreni mian decidon, tiam mi preferas esti de ili rigardata kiel pedanta kaj malatenta en ĉi tiu grava horo de mia vivo. Mi estas pekulo kaj devas ne ŝati la laŭdon de la homoj. Se ili min kondamnos, ili ne eraros. Mi estas neperfekta kaj devas atesti en ĉi tiu efektiva stato de mia vivo. Alie mi maltrankviligus mian propran konsciencon, naskante ian falsan homan estimon.

Forte impresite de ĉi tiu rezonado, Luko konservis la neforgeseblan instruon.

En la tria tago post tiu intervidiĝo la provincestro reiris al la sidejo de la Provinca Regado, akompanata de multenombra aro da izraelidoj, decidintaj atingi, ke la fama malliberulo estu al ili transdonita.

Porcio Festo, kun la trankvileco, kiu karakterizis liajn politikajn sintenadojn, tuj penis ekkoni la situacion. Li detale reviziis la proceson, el kiu li sciigis pri la roma civitaneco de la akuzito, laŭ la reganta leĝaro. Rimarkinte la insistadon de la rabenoj, kiuj montris grandegan senpaciencon pri la decido de la afero, li kunvokis kunsidon por nova ekzameno de la depozicioj de la akuzito, por kontentigi la regionan politikon de Jerusalemo.

La konvertito apud Damasko, korpe deprimita, sed ĉiam spirite fortika, venis al la kunsido sub la malama rigardo de siaj samrasanoj, kiuj klopodadis pri lia transforigo por ĉiu prezo. La tribunalo de Cezarea altiris grandan homamason, kiu deziregis ĉeesti la novan juĝadon. La izraelidoj disputadis, la kristanoj en defenda teniĝo faradis konsiderojn pri la debatoj. Pli ol unu fojon Porcio Festo devis laŭtigi la voĉon, postulante atenton kaj silenton.

Malferminte tiun neordinaran kunsidon, la provincestro kun nobla energio demandis la akuziton. Paŭlo el Tarso respondis ĉiujn demandojn kun la sereneco al li propra. Malgraŭ la evidenta malamikeco de la judoj li deklaris, ke li per nenio ilin ofendis kaj ne memoras

ian agon en sia vivo, per kiu li eble atakis la Templon de Jerusalem aŭ la leĝojn de Cezaro.

Festo komprenis, ke li traktas kun klera kaj eminenta spirito kaj ke ne tiel facile estos transdoni Paŭlon al la Sinedrio, kiel li komence pensis. Kelkaj rabenoj estis insistintaj ke li nur simple ordonu transkonduki la malliberulon en Jerusalemon sen konsidero al iaj leĝaj preskriboj. Pri tio la provincestro ne hezitus, uzante sian politikan influon, sed li ne volis fari ian arbitran agon, opiniante, ke li antaŭe devas koni la moralajn ecojn de tiu homo, celata de la intrigoj de la fariseoj. En sia animo li konsideris, ke se tiu estus ia ordinara persono, li sentime povus tiun transdoni al la tirana aŭtoritateco de la Sinedrio, kiu certe formortigus la Apostolon; sed tiel ne estus, se li konstatus noblecon kaj inteligentecon ĉe la malliberulo, ĉar, kun sia subtila politika senco, li ne deziris havigi al si iun malamikon, kiu povus lin iam malutili. Konstatinte la altajn intelektajn kaj moralajn naturdotojn de la Apostolo, li tute ŝanĝis sian teniĝon. Li tuj pli prudente ekrigardis la kunparolanton kaj venis al la konkludo, ke estos krimo partie agi en la afero. Krom tio, ke la akuzito elmontris kulturon, tiu estas roma civitano laŭ leĝe ricevitaj titoloj. Ŝpinante novajn konjektojn kaj forte surprizante la arogantajn reprezentantojn de la Sinedrio, Porcio Festo demandis la malliberulon, ĉu tiu konsentas reiri Jerusalemon, por tie esti juĝata, antaŭ li mem, de la religia tribunalo el siaj samrasanoj. Kompreninte la insidon de la izraelidoj, Paŭlo el Tarso trankvile respondis, miregigante la ĉeestantaron:

– Via provincestro moŝto, mi staras antaŭ la tribunalo de Cezaro, por esti juĝita per unu fojo. Jam pli ol du jarojn mi atendas la decidon de iu proceso, kiun mi ne povas kompreni. Kiel vi ja scias, mi neniun ofendis. Mian areston naskis sole nur la religiaj intrigoj de Jerusalem. Pri ĉi tio mi invitas tiujn plej postulemajn doni sian ateston. Se mi faris ian malnoblaĵon, mi mem petas mortverdikton. Kiam estis kunvokita la nova juĝado, mi, farante juston al via grandanimeco de konscien-

ca kaj honesta administranto, supozis, ke vi estos sufiĉe kuraĝa kaj rompos kun la kanajlaj aspiroj de la Sinedrio. Mi ĉiam ankoraŭ fidis vian aŭtoritatecon, vian sempartiecon, purajn de favoroj, kiujn neniu povos postuli de via honoriga kaj delikata ofico. Profunde ekzameni tiujn akuzojn, kiuj retenas min en karcerco de Cezarea! Vi tiam konstato, ke nenia provinca aŭtoritato povos transdoni min al la tiraneco de Jerusalemo! Konfesante ĉi tiun altvaloran cirkonstancon kaj apogante min sur miaj titoloj, kvankam mi sincere kredas viajn saĝajn kaj justajn juĝojn, mi jam nun apelacias al Cezaro!

Ĉi tiu neatendita teniĝo de la Apostolo al nacioj miregigis ĉiujn. Porcio Festo, tre pala, enprofundiĝis en seriozan meditado. De sia juĝista seĝo li grandanime jam instruis la vojon de la vivo al multe da akuzitoj kaj maliculoj, tamen en ĉi tiu neforgesebla horo de sia ekzistado li staris antaŭ juĝato, kiu parolis al lia koro. La respondo de Paŭlo valoris kiel ia programo de justeco kaj ordo. Treege malfacile li plurfoje petis la ĉeestantojn kvietiĝi. La reprezentantoj de la judismo flame diskutadis inter si; iuj pli rapidjuĝemaj kristanoj mallaŭde komentariadis la konduton de la Apostolo, supraĝe rigardante ĝin, kvazaŭ ĝi estis ia rifuzo je atestado. La provincestro urĝe kunvokis la malgrandan konsilion de la plej influaj rabenoj. La eminentuloj de la malnova Leĝo insistis pri disponoj pli energiaj, supozante, ke Paŭlo reboniĝos per kelke da bastonbatoj. Tamen, ne perterlasante la oportunan okazon por ankoraŭ unu prestiĝa instruo por sia politika vivo, la provincestro ŝtopis al si la orelojn kontraŭ la intrigoj de Jerusalemo, asertante, ke li neniel povos cedi pri la plenumo de sia devo en tiu signifoplena momento de sia ekzistado. Li, ĉagrenita, petis pri senkulpigo la maljunajn politikistojn de la Sinedrio kaj de la Templo, kiuj fiksadis sur li koleregajn okulojn, kaj eldiris tiujn famajn vortojn:

– Vi apelaciis al Cezaro, al Cezaro vi devos iri!

Per ĉi tiu proverbiĝinta esprimo estis finitaj la laboroj de la nova juĝado. La reprezentantoj de la Sinedrio foriris terure koleraj, kaj unu el ili blekis al la malliberulo, kiu serene ricevis la insulton:

– Nur la malbenindaj defalintoj apelacias al Cezaro. Iru for al la nacioj, vi fia mistifikanto!

La Apostolo lin bonvoleme ekrigardis, pretiĝante por reveni en la karceron.

La provincestro senprokraste ordonis, ke oni priatentu la peton de la akuzito por la daŭrigo de la juĝado. En la morgaŭa tago li longe studadis la aferon, sed sentis sin trafita de forta ŝanceliĝo. Li ne povos irigi la akuziton al la ĉefurbo de la Imperio, ne motivante lian tiel daŭran malliberecon en la karceroj de Cezarea. Kiel agi? Nu, post kelke da tago jen Herodo Agripo kaj Berenike venis saluti la novan provincestron, per ceremonia kaj neatendita vizito. La imperiestra delegito ne povis kaŝi la absorbajn zorgojn, kiuj lin okupis, kaj post la etiketaj solenaĵoj, kiujn rajtis tiel eminentaj gastoj, li rakontis al Agripo la historion de Paŭlo el Tarso, kies persono enlogis eĉ tiujn plej indiferentajn. La palestina reĝo, kiu konis la renomon de la eksrabeno, esprimis la deziron lin proksime observi; tion Festo konsentis plej ĝoje, ne nur pro la okazo havigi plezuron al la altklasa gasto, sed ankaŭ tial, ke li esperis el ties impresoj ion utilan, por ilustru la proceson de la Apostolo, kiun li devas sendi Romon.

Porcio donis al tiu akcepto festan karakteron. Li invitis la plej eminentajn personojn en Cezarea kaj tiel kolektis apud la reĝo brilantan societeton en la plej bona kaj plej vasta aŭditorio de la Provinca Kortumo. Unue okazis baletoj kaj muzikaĵoj; tuj poste la konvertito apud Damasko, konvene eskortata, estis prezentita de la provincestro mem per vortoj diskretaj, sed koraj kaj sinceraj.

Herodo Agripo tuj kaj forte estis impresita de la mal-sanaspekta, malgrasa figuro de la Apostolo, kies serenaj okuloj esprimis la nerompeblan energion de lia raso. Scivola pli bone koni la juĝoton, li rodonis, ke tiu per propra buŝo sin defendu.

Paŭlo ekkomprenis la profundan signifon de tiu minuto kaj elokvente kaj sincere ekraportis siajn travivaĵojn. La reĝo lin aŭdadis kun mirego. La eksrabeno

parolis pri sia infaneco, citis rememorojn el sia juneco, sciigis sian abomenon, kontraŭ la sekvantoj de la Kristo Jesuo kaj, per riĉa inspiriteco, pentris sian renkontiĝon kun la reviviĝinta Majstro apud Damasko, en la intensa lumo de la suno. Poste li rakontis siajn klopodojn ĉe la nacioj, la persekutojn, kiujn li ĉie suferis pro la Evangelio, kaj finis, vive dirante, ke malgraŭ ĉio liaj predikoj ne kontraŭas, sed pli ĝuste jesigas la profetaĵojn de la malnova Leĝo detempe de Moseo.

Donante liberan kuron al sia arda kaj potenca imagemo, la parolanto havis triumfajn kaj brilantajn okulojn. La aristokrata kunsidantaro estis ekstreme impresita de la raportataj faktoj kaj elmontris entuziasmon kaj ĝojon. Herodo Agripo tre pala, havis la senton, kvazaŭ li eltrovis unu el la plej profundaj voĉoj de la dia revelacio. Porcio Festo ne kaŝis la surprizon, kiu subite trafis lian spiriton. Li ne supozis en la malliberulo tiel grandajn fidon kaj konvinkipovon. Aŭdante la Apostolon kun la okuloj plenaj de ĝojo kaj lumo priskribi la plej belajn scenojn el sia apostolado, inokulante al la atenta kaj kortuŝita aŭdantaro novajn kaj kuriozajn ideojn, la provincestro ekpensis, ke tiu estas ia supertera frenezulo, kaj laŭte diris al li, dum pli longa paŭzo:

– Paŭlo, vi frenezas! Multe da studado vin frenezigas!

Anstataŭ ektimi, la eksrabeno noble respondis:

– Vi eraras! Mi ne frenezas! Antaŭ via aŭtoritateco de eminenta romano mi ne kuraĝus paroli en tia maniero, ĉar mi konstatas, ke vi ne estas necese preparita por min aŭdi. Ankaŭ la patricioj de Aŭgusto apartenas al Jesuo Kristo, sed ili ankoraŭ ne plene konas la Savinton. Al ĉiu homo oni devas paroli konforme al lia spirita kapableco. Ĉi tie, via provincestro moŝto, mi parolas sentime tial, ĉar mi turnas min al reĝo, kiu ja komprenas la sencon de miaj paroloj. Herodo Agripo certe aŭdis Moseon ekde sia infaneco. Li estas romano laŭ la kulturo, sed nutris sin per la revelacio de Dio al liaj prauloj. Neniu el miaj asertoj sendube estas al li nekonata, alie li perfidus sian sanktan devenon, ĉar ĉiuj

filoj de tiu nacio, kiu akceptis la unu solan Dion, devas koni la revelacion de Moseo kaj de la profetoj. Ĉu vi tion kredas, reĝo Agripo?

Ĉi tiu demando kaŭzis fortan miregon. Eĉ la provinestro mem ne kuraĝus tiel senĝene sin turni al la reĝo. La eminenta posteulo de Antipas estis forte surprizita. Plej granda paleco kovris lian vizaĝon. Neniu iam antaŭe tiel parolis al li, dum lia tuta vivo.

Rimarkinte lian mensan staton, Paŭlo el Tarso kompletigis sian potencan argumentadon, aldonante:

– Mi ja scias, ke vi kredas!

Konfuzite de la senĝeneco de la parolanto, Agripo ekskuis la kapon, kvazaŭ dezirante forpuŝi ian altrudigeman penson, duonridetis, komprenigante, ke li mastras sin mem, kaj per ŝerca tono ekkriis:

– Be! En mallonga tempo vi konvinkos min fariĝi kristano...

La Apostolo ne lasis sin venki kaj rediris:

– Mi volus preĝi al Dio, ke, ĉu en mallonga aŭ en longa, vi fariĝu disĉiplo de Jesuo; ne nur vi, sed ankaŭ ĉiuj, kiuj aŭskultis nin hodiaŭ.

Porcio Festo komprenis, ke la reĝo estas multe pli impresita, ol kiel oni supozis, kaj, dezirante ŝanĝi la tian atmosferon, proponis, ke la eminentaj personoj foriru por la posttagmeza manĝo en la palaco. La eksrabeno estis rekondukita en la karceron, postlasante ĉe la aŭdantaro nepereeman impreson. Berenike, kortuŝita, ekparolis la unua, petante indulgemon por la malliberulo. La ceteraj dividis tian saman bonvoleman simpation. Herodo Agripo pensi fari dignan aranĝon por la liberigo de la Apostolo, sed la provinestro diris, ke, konante la moralan energion de Paŭlo, li prenis serioze ties apelacion al Cezaro kaj por tio estis jam skribitaj sur pergamenon la unuaj instrukcioj. Skrupule obeante la romajn leĝojn, li kontraŭstaris al la propono, kvankam petante la intelektan helpon de la reĝo por la praviga letero, kun kiu la akuzito devos sin prezenti al la konkerna aŭtoritatulo en la ĉefurbo de la Imperio. Dezirante konservi sian politikan trankvilecon, la posteulo de

la Herodoj faris nenian alian sugeston, nur bedaŭrante, ke la malliberulo jam apelaciis al lasta instanco. Li tial penis kunhelpi por la redaktado de la dokumento, malaprobante la konduton de la predikanto de la Evangelio nur pro tio, ke Paŭlo elmovis multajn religiajn luktojn inter la simpla popolo, neakorde kun la unueco de la kredo, celata de la Sinedrio kiel defenda fortikaĵo de la tradicioj de la judismo. Por tio la reĝo mem subskribis kiel atestanto, havigante pli grandan gravecon al la asertoj de la imperiestra delegito. Porcio Festo, treege ĝoja, dankis por la helpo. La problemo estis solvita, kaj Paŭlo el Tarso tiam povos foriri Romon kune kun la plej baldaŭ forveturonta grupo da kondamnitoj.

Estas superflue diri, ke li serene ricevis ĉi tiun sciigon. Post interparolo kun Luko, li petis, ke la eklezio de Jerusalemo estu avizita, kiel ankaŭ tiu de Cidon, kie la ŝipo certe ricevos kargon kaj pasaĝerojn. Ĉiuj amikoj en Cezarea estis vokitaj por la servo de la kortuŝantaj mesaĝoj, kiujn la eksrabeno adresis al la amataj eklezioj, escepte de Timoteo, Luko kaj Aristarĥo, kiuj proponis sin, por lin akompani al la ĉefurbo de la Imperio.

La tagoj rapide fluis, ĝis venis la momento, kiam la centestro Julio kun sia eskorto iris al la malliberuloj, por ilin konduki al la ŝipo. La centestro havis plenan rajtigon, por fari ĉiajn disponojn, kaj tuj simpatiinte kun la Apostolo, li ordonis, ke ĉi tiu estu kondukata al la ŝipo sen mankatenoj, alie ol la ceteraj malliberuloj.

Apogite al la brako de Luko, la teksisto el Tarso trankvile revidis la klaran kaj bruantan scenon de la stratoj, karesante la esperon pri ia vivo pli alta, en kiu la homoj povus ĝuadi fratecon en la nomo de la Sinjoro Jesuo. Lia koro dronis en dolĉaj meditoj kaj varmaj preĝoj, kaj jen lin surprizis densa homamaso, kiu premiĝis kaj agitiĝis sur la vasta marborda placo.

Vicoj da maljunuloj, junuloj kaj infanoj kolektiĝis ĉirkaŭ li je nemulte da metroj de la marbordo. En la fronto, Jakobo, kadukiĝinta kaj profundaĝa, plej pene veninta el Jerusalemo, por doni al li la fratan kison. La

flama defendanto de la nacioj ne sukcesis regi sian emocion. Aroj da infanoj ĵetis sur lin florojn. Rekonante la noblecon de tiu heroo spirito, la filo de Alfeo ekprenis lian dekstran manon kaj ĝin kore kisis. Li tie estis kune kun ĉiuj kristanoj el Jerusalemo, kiuj povis veni. Tie troviĝis kunfratoj el Jafò, el Lida, el Antipatris, el ĉiuj lokoj de la provinco. La infanoj el la nacioj kuniĝis kun la judaj etuloj, kiuj kore salutadis la malliberan Apostolon. Kriplaj maljunuloj respektoplene alproksimiĝadis kaj ekkriadis:

– Pli bone ne foriru!

Malaltrangaj virinoj dankis por la bonfaroj, kiujn ili ricevis el liaj manoj. Resaniĝintoj parolis pri la laborkolonio, kiun li proponis kaj por kies fondo li kunhelpis en la jerusalema eklezio, kaj laŭte proklamis sian dankon. La nacioj, konvertiĝintaj al la Evangelio, kisis al li la manojn kaj demandis:

– Kiu de nun instruos nin esti infanoj de la Plejaltulo?

Amplenaĵ infanoj alkroĉiĝis al lia tuniko sub la rigardo de miregantaj patrinoj.

Ĉiuj petis lin resti, ne foriri, baldaŭ reveni por la benataj laboroj de Jesuo.

Subite li rememoris la iaman scenon de la aresto de Petro, kiam li, Paŭlo, fariĝinte turmentanto de la disĉiploj de la Evangelio, vizitis la eklezion de Jerusalemo, estrante punan ekspedicion. Tiuj korelverŝoj de la popolo milde tuŝis lian animon; ili signifis, ke li jam ne estas tiu senindulga turmentanto, kiu ĝis tiam ne estis povinta kompreni la dian favorkorecon; ili esprimis la kvitigon de lia ŝuldo antaŭ la animo de la popolo. Kun iom faciligita konscienco li rememoris Abigailon kaj ekploris. Li tie sentis sin kvazaŭ en la medio de la “infanoj de Kalvario”, kiuj dankplene lin brakumis. Tiuj almozuloj, tiuj kripluloj, tiuj infanoj estis lia familio. En tiu neforgesebla momento de sia vivo li sentis sin identiĝinta kun la kadro de la universala harmonio. Mildaj ventetoj el malsamaj mondoj kvietigis lian animon, kvazaŭ li estus atinginta ian dian regionon post venko el granda batalo.

La unuan fojon iuj etuloj nomis lin “patro”. Li pli kareseme kliniĝis al la lin ĉirkaŭantaj infanetoj. Ĉiujn okazajojn en tiu neforgesebla horo li prenis kiel ian benon de Jesuo, kiu ligis lin al ĉiuj estuloj. Antaŭ li la kvieta oceano ŝajnis ia vojo senfina kaj promesanta misterajn kaj dolĉajn belaĵojn.

Julio, la centestro de la eskorto, kortuŝite alproksimiĝis kaj delikate diris:

– Bedaŭrinde jen venis la momento forveturi.

Kaj, vidante tiun manifestadon de amikeco al la Apostolo, ankaŭ li havis larmantajn okulojn. Multajn krimintojn li jam vidis en tiaj samaj cirkonstancoj, kaj ili ĉiuj estis nekonformiĝintoj, malesperuloj aŭ malfeliĉaj pentantoj, sed tiu estis serena kaj preskaŭ feliĉa; ia neesprimebla ĝojo elverŝiĝis el ties brilantaj okuloj. Krom tio li sciis, ke tiu viro, sin donanta al la bono de ĉiuj estuloj, faris nenian kulpon; ĝuste tial li tenis sin apud Paŭlo, kvazaŭ dezirante dividi la korelverŝojn de la popolo, kvazaŭ elmontrante la estimon, kiun la Apostolo meritas de li.

La Apostolo al nacioj la lastan fojon brakumis siajn amikojn. Ĉiuj ploradis diskrete, kiel sinceraj disĉiploj de Jesuo, kiuj ne ploras sen konsolo: patrinoj genuis kun siaj infanoj sur la blanka sablo, maljunuloj plej pene sin apogis sur siaj krudaj bastonoj. Ĉiuj, kiuj brakumis la ĉampionon de la Evangelio, genuiĝis, petante la Sinjoron beni lian novan iradon.

Fininte la adiaŭon, Paŭlo kun heroa sereneco diris:

– Ni ploru de ĝojo, fratoj! Nenia pli granda gloro en ĉi tiu mondo ekzistas por homo, ol troviĝi sur la vojo al la Kristo Jesuo! La Majstro iris renkonte al la Patro per la torturoj sur la Kruco! Ni benu nian ĉiutagan krucon. Ni ja devas porti la signojn de la Sinjoro Jesuo! Mi ne kredas, ke mi povos ĉi tien reveni en ĉi tiu semforta korpo de miaj materiaj luktoj. Mi esperas, ke la Sinjoro permesos al mi la lastan ateston en Romo, tamen mi estos ĉe vi per la koro; mi revenos al niaj eklezioj spirite; mi kunhelpos ĉe viaj klopodoj en la pli amaraj tagoj. La morto nin ne disigos, tute same, kiel ĝi ne

disigis la Sinjoron for da la societo de liaj disĉiploj. Ni neniam staros malproksimaj unu de alia, kaj ĝustiel Jesuo promesis esti kun ni ĉiujn tagojn, ĝis la maturiĝo de la mondaĝo!

Julio kortuŝite aŭdis ĉi tiun admonon. Luko kaj Aristarĥo mallaŭte plorsingultadis.

Tuj poste la Apostolo ekprenis la brakon al la amika kuracisto kaj, proksime sekvate de la centestro, decide kaj serene ekpaŝis al la ŝipo.

Centoj da homoj, en pia enmemiĝo kun larmoj kaj preĝoj, sekvis la manovrojn por la ekveturo. Dum la ŝipo malrapide foriĝadis, Paŭlo kaj liaj kunuloj kun larmantaj okuloj rigardadis Cezarean. La silenta amaso de tiuj, kiuj, plorante, restis, mansignadis kaj ondadis sur la marbordo, kiun la distanco iom post iom malklarigadis. Plena de ĝojo kaj danko, Paŭlo el Tarso haltigis la rigardon sur tiu kampo de streĉaj luktoj kaj ekmeditis pri tiuj multaj jaroj da malbonagoj kaj necesaj repagoj. Li rememoris la infanecon, la unuajn revojn kaj la maltrankviliĝojn de la juneco, la edifajn servojn al la Kristo, kaj sentis, ke li forlasas Palestinon por ĉiam. Grandiozaj pensoj lin absorbadis, kaj jen Luko alproksimiĝis kaj, montrante malproksimen al la amikoj, ankoraŭ genuantaj, ekkriis:

– Malmulte da faktoj min tiel profunde kortuŝis en la mondo, kiel ĉi tiu! Mi registros en miaj notoj, kiel vi estis amata de ĉiuj, kiuj ricevis per viaj frataj manoj la benon de Jesuo.

Paŭlo laŭŝajne profunde meditis pri ĉi tiu konsidero kaj rediris:

– Ho ne, Luko! Ne skribu pri iaj virtoj, kiajn mi ne havas. Se vi amas min, ne elmetu mian nomon al malveraj juĝoj. Parolu, ja parolu, pri la persekutoj, kiujn mi elmovis kontraŭ la sekvantoj de la sankta Evangelio, pri la favoro, kiun la majstro konsentis al mi proksime al Damasko, por ke eĉ la plej nesentemaj homoj ne malesperu pri sia savo kaj atendu lian favorkorecon en la ĝusta momento. Menciu la batalojn, kiujn ni de la unua momento ĝis nun tenadas, pro la altrudoj de la

fariseismo kaj la hodiaŭaj hipokritaĵoj. Parolu pri la venkitaj baroj, la doloraj humiligoj, la sennombraj malfacilaĵoj, por ke la estontaj disĉiploj esperu al la spirita elaçeto ne dank'al la falsa senfareco de la mondo, fidante la nekompreneblan favoron de la dioj, sed per akraj laboroj, per benataj klopodoj por la sinperfektigo. Parolu pri niaj konfliktoj kun la potencaj kaj kleraj homoj, pri niaj servoj ĉe tiuj nefavoritaj de la sorto, por ke la estontaj sekvantoj de la Evangelio ne timu pli malfacilajn kaj delikatajn situaciojn, konsciante, ke la kurieroj de la Majstro ilin helpas ĉiam, kiam ili fariĝos veraj iloj de frateco kaj amo tra la vojoj, kiujn iras la evolucio de la homaro.

Post longa paŭzo, dum kiu li konstatis la atenton, kun kiu Luko sekvis lian inspiratan rezonadon, li per serena kaj firma tono daŭrigis:

– Sed ĉiam prisilentu la estimelmontrojn, la favorojn, kiujn ni ricevis en nia misio, ĉar tia rekompenco apartenas nur al Jesuo: li forigis niajn premantajn mizeraĵojn, havigante al ni tion, kio al ni mankis; lia mano nin karite ekprenis kaj rekondukis nin sur la sanktan vojon. Ĉu vi ne raportis al mi viajn dolorajn luktojn en la fora pasinteco? Ĉu mi ne diris al vi, kiel malica kaj senklara mi iam estis? Kiel li apud Damasko prilumis miajn ombrajn vojojn, tiel ankaŭ li kondukis vin en la eklezion de Antioĥia, por ke vi aŭdu liajn eternajn veraĵojn. Kiel ajn multe ni studas, ni sentas ian abismon inter ni kaj la eterna sciaro; kiel ajn pene ni laboras, ni ne sentas nin indaj je tiu, kiu nin helpas kaj gvidas ekde la unua momento de nia vivo. Ni nenion posedas mem! La Sinjoro ŝtopas la malplenon de nia animo kaj faras la bonon, kiun ni ne havas. Tiuj tremantaj maljunuloj, kiuj nin brakumis kun larmoj, tiuj infanoj, kiuj nin ame kisis, ili tion faris al la Kristo. Jakobo kaj liaj kamaradoj venis el Jerusalemo, ne nur por esprimi al ni sian koran fratecon, sed por atesti amon al la Majstro, kiu kunigis nin en sama vibrado de sankta solidareco, kvankam ili ne povoscias vortigi kaŝitan meĥanisman de tiuj grandiozaj, altegaj emocioj. Meze en

ĉio ĉi, Luko, ni estis nuraj mizeraj servantoj, kiuj uzis la havaĵojn de la Sinjoro, por pagi niajn proprajn ŝuldojn. Li havigis al ni favorkorecon, por ke la justeco plenumiĝu. Tiuj ĝojoj kaj tiuj ĉielaj emocioj apartenas ja al li... Ni do tute ne zorgu pri la raporto de iaj okazaĵoj, kiuj malfermus pardonon al nekomprenebla vantaĵo. Sufiĉu al ni la profunda konvinko, ke ni likvidis niajn kriptajn ŝuldojn...

Luko kun miro aŭdis ĉi tiujn oportunajn kaj pravajn konsiderojn, ne sciante esprimi la surprizon, kiun ili al li kaŭzis.

– Vi estas prava – li fine diris –, ni estas tro malfortaj, ke ni atribuas al ni ian valoron.

– Cetere – aldonis Paŭlo – la batalo de la Kristo estas komencita. Ĉiu venko apartenos al lia amo, sed ne al nia klopodado de ŝuldoplenaj servantoj... Skribu do viajn notojn en la plej simpla maniero kaj komentariu nenion, se ne por glorado de la Majstro en lia senmorta evangelio!

Dum Luko serĉadis Aristarĥon, por transsciigi al li ĉi tiujn saĝajn kaj korajn sugestojn, la eksrabeno ĉiam ankoraŭ rigardadis la domaron de Cezarea, kiu nun estingiĝis en la horizonto. La ŝipo dolĉe veturadis, foriĝante de la marbordo... Tra multe da horoj li tie restadis, meditante pri la pasinteco, kiu bildiĝis antaŭ liaj spiritaj okuloj kvazaŭ ia grandega krepusko. Dronante en la rememoroj, interplektitaj per preĝoj al Jesuo, li tie restis en signifoplena silento, ĝis ekbrilis sur la tre blua firmamento la unuaj noktaj astroj.



La malliberulo de la Kristo

La ŝipo el Adramitio en Misia, en kiu veturis la Apostolo kaj liaj kamaradoj, en la sekvanta tago haltis ĉe Cidon, kie ripetiĝis la hieraŭaj kortuŝantaj scenoj. Julio permesis, ke la eksrabeno iru al siaj amikoj sur la bordo, kaj la adiaŭo fariĝis kun admonoj je esperoj kaj multe da larmoj. Paŭlo el Tarso akiris moralan influon super la ŝipestro, ŝipanoj kaj gardistoj. Lia flama parolo konkeris la atenton de ĉiuj. Li paroladis pri Jesuo, ne kiel pri ia neatingebla persono, sed kiel pri iu majstro amplena kaj amika al la homoj, proksime sekvanta la evoluadon kaj elaĉeton de la surtera homaro detempe de ties komenciĝo. Ĉiuj deziris aŭdi lian parolon rilatan al la Evangelio kaj al ties influo sur la estontecon de la popoloj.

El la ŝipo ofte montriĝis vidaĵoj plej karaj al la rigardo de la Apostolo. Post veturado preter Fenicio ekaperis la konturoj de la insulo Kipro, kio vekis agrablajn rememorojn. Proksime al Pamfilio li ekĝojegis pro la plenumita devo, kaj fine venis al la haveno de Mira en Likio.

Tie Julio decidis preni aleksandrian ŝipon, veturontan al Italujo. Tiel la vojaĝo daŭris plu, sed kun malfavoraj perspektivoj. La ŝipo portis tro multan kargon. Krom granda kvanto da tritiko, ĝi havis en si ankaŭ ducent sepdek ses animojn. Alproksimiĝis la tempo malfacila por navigado. La ventoj forte blovdadis, kontraŭante la veturadon. Post multe da tagoj ili ankoraŭ iradis proksime al Knido. Venkinte grandegajn malfacilaĵojn, ili sukcesis halti ĉe kelkaj lokoj de Kreto.

Rimarkante la kontraŭaĵojn de la irado kaj obeante sian propran intuicion, la Apostolo, fidante la amikecon de Julio, vokis lin aparte kaj proponis, ke ili travintru en Kaloi-Limenes. La kohortestro akceptis ĉi tiun proponon kaj ĝin prezentis al la ŝipestro kaj al la piloto, kiuj ĝin juĝis malsaĝa.

– Kio ĉi tio estas, centestro? – emfaze demandis la ŝipestro, kun iom ironia rideto. – Ĉu ni ion kredus al tiuj malliberuloj? Hm, mi vidas, ke tio estas ia subtile kaj saĝe forĝita plano por fuĝo... Tamen, kio ajn ĝi estas, tiu propono estas neakceptinda, ne nur pro la fido, kiun ni devas havi pri niaj profesiaj rimedoj, sed ankaŭ tial, ke ni bezonas atingi la havenon de Fenikso por la necesa ripozo.

La centestro senkulpigis sin, kiel li nur povis, kaj foriris iom konsternita. Li dezirus protesti, klarigante, ke Paŭlo el Tarso ne estas ia simpla ordinara malliberulo, ke la Apostolo parolas ne nur en sia nomo, sed ankaŭ en tiu de Luko, kiu ankaŭ estas el la plej lertaj maristoj. Tamen ne bone estus por li kompromiti sian brilan militistan kaj politikan situacion, kontraŭstarante al la provincaj aŭtoritatuloj. Estas preferinde ne insisti, alie li eble estus miskomprenata de siaj samklasanoj. Li iris al la Apostolo kaj sciigis tiun pri la respondo. Anstataŭ ĉagreniĝi, Paŭlo trankvile rediris:

– Ni ne malĝoju pro tio! Mi estas certa, ke la malhelpoj estos multe pli grandaj, ol kiel ni povas imagi. Ni tamen ja ĉerpos el tio ian profiton, ĉar, en la afliktaj horoj, ni rememoros la povon de Jesuo, kiu avertis nin ĝustatempe.

La vojaĝo daŭris plu meze inter timoj kaj esperoj. La centestro mem nun estis konvinkita pri la netaŭgatempeco de la halto ĉe Kaloi-Limenes, ĉar dum la du tagoj post la konsilo de la Apostolo la vetero tre pliboniĝis. Sed tuj kiam ili troviĝis en marmezo, direkte al Fenikso, subite atakis ilin uragana vento. Nenion helpis ĉio, kion ili urĝe faris kontraŭ ĝi. La ŝipo ne povis alfronti la tempeston, kaj oni devis lasi ĝin laŭ la kaprico de la fortega vento, kiu ĝin forportis tre mal-

proksimen, envolvitan en densan nebulegon. Tiam komenciĝis teruraj suferoj por tiuj homoj, izolitaj en la kirlego de la malkvietaj ondoj. La tempesto ŝajnis semfina. Jam preskaŭ du semajnojn la vento senĉese, ruiniĝe muĝadis. La tuta ŝarĝo da tritiko estis elĵetita, ĉion, kio estis troo da pezo, sen tuja utileco, englutis la nesatigebla kaj muĝanta monstro!

La persono de Paŭlo estis nun rigardata respektete. La ŝipanaro ne povis forgesi lian konsilon. La piloto kaj la ŝipestro estis konfuzitaj, kaj tiu malliberulo ricevis unuanimajn respekton kaj estimon. Precipe la centestro konstante staris apus li, konvinkite, ke la eksrabeno havas supernaturajn kaj savipovajn kapablojn. La morala deprimateco kaj la marmalsano dissemis senkuraĝiĝon kaj teruron. Sed la grandanima Apostolo helpadis ĉiujn individue, devigis ilin nutri sin, ilin rekuraĝigis. Iam kaj iam li elokvente aŭdigis sian voĉon kaj, kun la necesa permeso de Julio, parolis al siaj kamaradoj, kun li dividantaj tiun maldolĉan horon, penante identigi la spiritajn demandojn kun tiu konvulsia spektaklo de la Naturo.

– Fratoj! – li laŭte diris al tiu stranga homamaso, kiu lin aŭdadis afliktegita. – Mi kredas, ke ni baldaŭ atingos teron, sed ni trudu al ni la devon neniam forgesi la nunan teruran instruon. Ni penu iri tra la mondo simile al viglanta maristo, kiu, ne sciante, kiam venos la tempesto, tamen estas certa, ke ĝi ja venos. La transiro de la homa ekzistado en la spiritan vivon similas ĉi tiun amaran momenton, kiun ni de multe da tagoj travivas en ĉi tiu ŝipo. Vi ja scias, ke pri ĉiuj danĝeroj ni estis avizitaj en la lasta haveno, kiu invitis nin restadi, ne riskante ruinigajn akcidentojn. Ni penetris la marmezon je nia propra konto. Ankaŭ la Kristo Jesuo konsentas al ni la ĉielajn avertojn per sia Evangelio el Lumo, sed ni ofte preferas la abismon de la doloroj kaj tragediaj spertoj. La iluzio, simile al la suda vento, ŝajnas neigi la admonojn de la Savinto, kaj ni iradas plue laŭ la vojo de nia kripla imagemo, kaj jen la tempesto atakas subite. Ni ja devas transiri de unu vivo

en alian, por rektigi la neeviteblan direkton. Ni komencas eljetante la pezan ŝarĝon de niaj kruelaj eraroj, ni forlasas la krimajn kapricojn, por plene akcepti la altegan volon de Dio. Ni rekonas nian sensignifecon kaj mizerecon, trafas nin ia grandega naŭzo pri la eraroj, kiuj nutris nian koron, tiel same, kiel ni sentas la neni-aĵon, kia ni estas en ĉi tiu skeleto el malfortikaj tabuloj, flosanta sur englutejo, ni, prenitaj de marmalsano, kiu naskas en ni plej terurajn naŭzojn! La fino de la homa ekzistado estas ĉiam ia tempesto, kiel ĉi tiu, en la nekonataj regionoj de la interna mondo, ĉar ni neniam estas preparitaj, por aŭdi la diajn admonojn, kaj serĉas la afliktantan kaj detruan tempeston laŭ la vojo, kiun ni al ni mem konstruas.

La ĉeestantaro aŭdadis lian parolon posedita de neesprimebla teruro. Vidante, ke ĉiuj sin reciproke brakumas, kunfratiĝante en la komuna afliktiĝo, li daŭrigis:

– Ni rigardu la bildon de niaj suferoj. Vidu, kiel la danĝero instruas tujan amikecon. Ĉi tie troviĝas ni, romaj patricioj, negocistoj el Aleksandrio, plutokratoj el Fenicio, aŭtoritatuloj, soldatoj, malliberuloj, virinoj kaj infanoj... Kvankam ni diferencas unu de alia, antaŭ Dio la doloro samniveligas niajn sentojn por sama celo de saviĝo kaj restarigo de la paco. Mi pensas, ke la vivo sur seka tero estus tute alia, se la homoj tie interkompreniĝus tiel same, kiel ĉi tie nun sur la mara etendaĵo.

Aŭdante ĉi tiun apostolan parolon, iuj retenis sian kolereton, sed la granda plimulto alproksimiĝis, rekonante lian superan inspiron kaj dezirante rifuĝi en la ombron de lia heroa virteco.

Post dek kvar tagoj da nebulego kaj tempesto la aleksandria ŝipo atingis la insulon Melita. Ĉiuj ĝojegis, sed la ŝipestro, konstatinte, ke la danĝero estas jam for kaj sentante sin humiligita de la konduto de la Apostolo dum la vojaĝo, sugestis al du soldatoj murdi la malliberulojn el Cezarea, antaŭ ol tiuj povos fuĝi. La subuloj de la centestro prenis sur sin la iniciaton de tiu faro, sed Julio decideme kontraŭstaris, elmontrante la spiritan

aliĝon, kiu lin nun feliĉigas en la lumo de la elaĉetanta Evangelio. Tiuj malliberuloj, kiuj povosciis naĝi, kuraĝe sin ĵetis en la akvon; la ceteraj alkroĉiĝis al improvizitaj boatoj, direkte al la marbordo.

La indiĝenoj de la insulo kaj ankaŭ la malmultaj romanoj, tie loĝantaj en administra servado, simpatie akceptis la ŝiprompiĝulojn, sed, ĉar ili estis multaj, ne estis eble ĉiujn dece enloĝigi. Malvarmego frostigis eĉ la plej rezistemajn, sed Paŭlo, elmontrante sian indon kaj sperton ĉe la alfrontado al malbona vetero, decidis doni ekzemplon al tiuj pli senkuraĝiĝintaj, zorgante, ke oni senprokraste ekbruligu fajron. Grandaj lignaroj estis rapide ekbruligitaj por la varmigo de la ŝiprompiĝuloj, sed kiam la Apostolo ĵetis faskon da sekaj branĉoj en la kraketantan flamon, vipuro enpikis en lian manon siajn venenajn dentojn. La eksrabeno ĝin trankvile tenadis en la aero, ĝis ĝi falis en la fajron, kio miregigis ĉiujn. Luko kaj Timoteo alproksimiĝis afliktitaj. La kohortestro kaj kelke da amikoj estis forte malĝojaj, ĉar la insulanoj, tion rimarkinte, kriis alarmon, dirante, ke tiu reptilio estas el la plej venenaj en la regiono kaj ke ĝiaj viktimoj ne postvivas pli ol iajn kelke da horoj.

Iuj el la indiĝenoj, impresite de la fakto, diskrete foriĝis de tie; aliaj, plenaj de timo, asertis:

– Ĉi tiu viro sendube estas granda kriminto, ĉar, saviĝinte de la furiozaj ondoj, li venis ĉi tien, por esti punita de la dioj.

Ne malmultaj atendis la morton de la Apostolo, momento post momento, sed Paŭlo, kiel nur eble varmigante sin, observis ĉies mienon kaj fervore preĝis. Ĉe la antaŭdiro de la insulanoj Timoteo pli alproksimiĝis kaj sciigis lin pri tio, kion oni diradis pri li.

La eksrabeno ridetis kaj rediris:

– Ne zorgu. La opinioj de la vulgarularo estas ja senbazaj, mi pri tio havas propran sperton. Ni atentu niajn devojn, ĉar la senklereco estas ĉiam preta transiri de malbeno al laŭdo kaj inverse. Tre povas esti, ke post kelke da horoj ili rigardos min kiel ian dion.

Efektive, kiam ili vidis, ke li ne elmontris eĉ la plej malgrandan signon de doloro, la insulanoj ekrigardis lin

kvazaŭ ian supernaturan estulon. Ne atakite de la veneno de la vipuro, li do ne povis esti iu ordinara homo, sed devis esti ia sendito el Olimpo, al kiu ĉiuj ŝuldis obeon.

Intertempe Publio Apiano, la plej alta oficisto en Melita, venis al tiu loko kaj ordonis la unuajn disponojn por helpo al la ŝiprompiĝuloj; ili tiam estis kondukitaj en vastajn neokupitajn barakojn, proksimajn al lia domo, kaj tie ricevis varman buljonon, medikamentojn kaj vestojn. La imperia delegito destinis la plej bonajn ĉambrojn de sia propra loĝejo por la ŝipestro kaj la centestro Julio, konsiderante la gravecon de la respektivaj oficoj, ĝis ili povos havigi al si novajn loĝlokojn en la insulo, sed la kohortestro, nun sentante sin plej forte ligita al la Apostolo, petis la grandaniman roman oficiston gastiĝi la eksrabenon laŭ la estimo, kiun tiu rajtas, samtempe kiel li laŭdis ties heroecon.

Eksciinte la altan spiritan nivelon de la damaska konvertito kaj aŭdante la mirindajn faktojn, kiujn oni atribuis al tiu koncerne resanigojn, Publio kortuŝita diris al la centestro:

– Bone do! Feliĉa estas via propono, des pli, ĉar mia patro estas ĉi tie malsana kaj tial mi dezirus elprovi la potencon de tiu sankta viro el la popolo de Izrael!

Invitite de Julio, Paŭlo donis sian konsenton sentime kaj tiel sin prezentis en la domo de Publio. Kondukite antaŭ la malsanan maljunulon, li metis sur tiun siajn kalajn kaj faltoplenajn manojn, samtempe kiel li eldiris kortuŝantan kaj varman preĝon. La maljunulo, kiu brulis de mortiga febro kaj forkonsumiĝadis, tuj ricevis pli bonan farton kaj donis dankon al la dioj de sia kredo. Surprizite, Publio Apiano vidis lin leviĝi kaj peni kapti la manon de sia bonfarinto, por ĝin respekte kisi; sed la eksrabeno profitis de la situacio kaj en tiu sama ĉambro eklaŭdis la Dian Majstron, predikante la eternajn veraĵojn kaj klarigante, ke ĉiaj havaĵoj venas de lia favora kaj justa koro, sed ne de homoj malriĉaj kaj pekantaj, kiel li, Paŭlo.

La delegito de la Imperio tuj deziris ekkoni la Evangelion. Preninte el la faldoj de la tuniko la ĉifoniĝint-

ajn pergamenfoliojn de la Bona-Novaĵo, la solan riĉaĵon, kiu restis en liaj manoj post la tempesto, Paŭlo el Tarso iomete fiere ekelvolvis la pensojn kaj instruojn de Jesuo. Publio ordonis, ke oni kopiu tiun dokumenton kaj promesis interesiĝi pri la situacio de la Apostolo, uzante siajn amikrilatojn en Romo, por havigi al li la liberecon.

La sciigo pri tiu okazaĵo disvastiĝis en nemulte da horoj. Oni paroladis pri nenio alia, ol pri tiu providenca viro, kiun la dioj sendis al la insulo, por ke malsanuloj resaniĝu kaj la popolo ricevu novajn revelaciojn.

Kun la konsento de Julio la eksrabeno kaj liaj kamaradoj, aranĝis al si de la administranto malnovan salonon, kie la evangeliaj laboroj regule fariĝis dum la monatoj de la severa vintro. Grandega nombro da malsanuloj estis resanigitaj. Plej mizeraj maljunuloj ĉe la lumo de la ĉielaj trezoroj ricevis novajn esperojn. Kiam revenis la tempo de navigado, Paŭlo estis jam kreinta en la tuta insulo grandan kristanan familion, plenan de paco kaj noblaj faroj por la estonteco.

Zorgante pri la devoj de sia komisio, Julio decidis forveturi kun la malliberuloj per la ŝipo “Kastoro kaj Polukso”, kiu tie travintris kaj estis irona al Italujo.

En la tago de la enŝipiĝo la Apostolo havis la konsolon konstati la sinceran interesiĝon de la novaj amikoj de la Evangelio, kortuŝite ricevante montrojn de frata koreco. La sankta standardo de la Kristo ankaŭ tie ekflagris por ĉiam.

La ŝipo direktiĝis al la itala marbordo sub favoraj ventoj.

Kiam ili venis Sirakuzon, en Sicilio, Paŭlo el Tarso, subtenate de la grandanima centestro, nun sindona amiko, profitis la tri tagojn da restado en la urbo por predikado pri la Regno de Dio, kio varbigis multe da homoj al la Evangelio.

Poste la ŝipo traveturis la markolon, haltis ĉe Regio kaj de ĉi tie direktiĝis al Puteoli, ne malproksime de Vezuvo.

Antaŭ ol ili elŝipiĝis, la centestro respektive alproksimiĝis al la Apostolo kaj diris:

– Mia amiko, ĝis nun vi troviĝis sub la rekta protekto de mia persona amikeco, sed de nun ni vojaĝos sub la esploraj rigardoj de homoj, loĝantaj en la najbaraĵo de la metropolo, kaj ni devas konsideri vian karakteron de malliberulo...

Rimarkinte lian naturan singenecon, miksaĵon el humileco kaj respekto, Paŭlo rediris:

– Nu, Julio, ne maltrankviliĝu! Mi ja scias, ke vi ne povas vin deteni mankateni min, por fidele plenumi vian devon. Rapidu fari tion, ĉar ne estus dece kompromiti amikecon tiel puran, kiel nia.

La kohortestro havis malsekajn okulojn, sed, preninte el sia saketo la mankatenojn, emfaze diris:

– Mi dividas la ĝojon restadi kun vi. Mi dezirus esti, same kiel vi, iu malliberulo de la Kristo!

Paŭlo, ekstreme kortuŝita, eletendis la manon kaj de tiam restis ligita al la centestro, sub la karesa rigardo de la tri kamaradoj.

Julio ordonis, ke la ordinaraj malliberuloj estu lokitaj en kraditaj arestejoj kaj ke Paŭlo, Timoteo, Aristarĥo kaj Luko estu kune kun li, en modesta pensio. Ĉe la humileco de la Apostolo kaj ties kunlaborantoj la kohortestro ŝajnis pli grandanima kaj frata. Dezirante plaĉi al la maljuna disĉiplo de Jesuo, li tuj ordonis esplori, ĉu en Puteoli ekzistas kristanoj kaj, se jes, ke ili venu al li, por koniĝi kun la laboristoj en la sankta semado. La soldato, komisiita por tio, post kelke da horoj alkondukis noblaspektan maljunulon, nomatan Sisto Flakus, kies mieno elradiis la plej vivan ĝojon. Apenaŭ enirinte, li iris al la maljuna Apostolo kaj kisis ties manojn, surverŝis ilin per larmoj, esprimante spontanee korecon. Tuj ekestis konsola konversacio, en kiu Paŭlo partoprenis emociita. Flakus informis, ke la urbo de longe havas sian eklezion; ke la Evangelio progresas en la koroj; ke la leteroj de la eksrabeno fariĝis temo por meditado kaj studado en ĉiuj kristanaj hejmoj, kiuj rekonis en liaj laboroj la mision de iu kuriero de la savinta Mesio. Preninte sian malnovan sakon, li sur tiu sama loko eltiris la kopion de la Epistolo al la Romanoj,

kiun kun aparta zorgemo konservis ĉe si la kunfratoj de Puteoli.

Paŭlo ĉion ĉi aŭdis agrable impresita, kaj ŝajnis al li, kvazaŭ li venis en ian novan mondon. Siaflanke, Julio preskaŭ krevis de ĝojo, kaj, donante liberan kuron al sia natura entuziasmo, Sisto Flakus ekspedis sciigojn al siaj kamaradoj. La modesta gastejo iom post iom pleniĝis de novevenintoj. Tio estis bakistoj, negocistoj kaj metiistoj, kiuj rapidis veni, por manpremi la amikon de la nacioj. Ĉiuj volis sorbi la parolojn de la Apostolo, vidi lin proksime, kisi liajn manojn. Paŭlo kaj liaj kunuloj estis invititaj paroli en la eklezio tiun saman vesperon; eksciinte, ke la centestro intecas forveturi Romon en la sekvanta tago, la sinceraj disĉiploj de la Evangelio, en Puteoli, petis Julion permesi la restadon de Paŭlo ĉe ili almenaŭ dum sep tagoj, kion la kohortestro volonte konsentis.

La eklezio travivis tutajn horojn da grandega ĝojo. Sisto Flakus kaj liaj kamaradoj irigis du senditojn al Romo, por ke la amikoj en la imperia ĉefurbo eksciuj la venon de la Apostolo. Kaj kantante korajn laŭdojn, la kredantoj pasigis tagojn da senfina feliĉo.

Post tiu semajno de fruktodonaj, feliĉaj laboroj la centestro atentigis al la neceso forveturi.

La trairenda distanco superis ducent kilometrojn, dum sep tagoj da senhalta kaj laciga irado.

La malgranda grupo formariĝis, akompanata de pli ol kvindek kristanoj el Puteoli, kiuj iris kune kun la eksrabenon ĝis la Vendejo de Apio, rajdante fortikajn ĉevalojn, kiel zorgema eskorto de la veturiloj de la gardistoj kaj malliberuloj. En ĉi tiu loko, malproksima de Romo iom pli ol kvardek mejojn, atendis la Apostolon al nacioj la unua reprezentantaro de la disĉiploj de la Evangelio en la imperia ĉefurbo. Tio estis kortuŝitaj maljunuloj, kune kun noblaj kamaradoj, kiuj apenaŭ ne portis la eksrabenon en la brakoj. Julio ne povis kaŝi la surprizon, kiu tuŝis lian animon. Li neniam antaŭe vojaĝis kun tiel influa malliberulo. El la Vendejo de Apio la karavano direktis sin al la loko, nomata “La Tri

Gastejoj”); nun aliĝis al la vojaĝantoj granda veturilo, portanta la romajn plejaĝulojn, sed ĉiam kun akompano de fortaj kaj decidemaj rajdistoj. En ĉi tiu regiono, kun stranga nomo dank'al la granda komforto de siaj gastejoj, ankoraŭ veturiloj kaj novaj amikoj atendis Paŭlon el Tarso kun grandegaj ĝojelmontroj. La Apostolo nun rigardadis la regionojn de Latio posedite de dolĉaj emocioj. Li havis la impreson, kvazaŭ li alboridiĝis al ia mondo malsama ol lia Azio plena de streĉaj bataloj.

Kun la permeso de Julio, la figuro, plej elstare reprezentanta la romajn plejaĝulojn, sidiĝis apud Paŭlo en tiu triumfa vojaĝofino. La maljuna Apolodoro, certiginte pri la simpatio de la kohortestro al la doktrino de Jesuo, fariĝis pli viva kaj detala en siaj raportoj, respondante la demandojn de la Apostolo.

– Vi venis Romon en oportuna tempo – diris la maljunulo per rezignacia tono –; ni havas la impreson ke niaj suferoj por Jesuo estos pli grandaj. Ni estas en la jaro 61, sed jam de tri jaroj la disĉiploj de la Evangelio komencis morti en la arenoj de la cirko pro la sankta nomo de la Savinto.

– Jes – ĝentile rediris Paŭlo el Tarso. – De kiam mi ankoraŭ ne estis arestita en Jerusalemo, mi jam aŭdis pri la nerektaj persekutoj, farataj de la romaj aŭtoritatoj kontraŭ la adeptoj de la Kristanismo.

– Ne malmultaj – aldonis la maljunulo – jam verŝis sian sangon en la hommortigaj spektakloj. Sub la moko de la senkonscienciga popolaĉo, niaj kamaradoj faladas en centoj, disŝirataj de la sovaĝaj bestoj aŭ ĉe la torturoŝtupoj...

La centestro, tre pala, demandis:

– Sed kiel tio povas fariĝi? Ĉu iaj leĝaj preskriboj pravigus tiajn krimojn?

– Nu, kiu povas paroli pri justeco dum la regado de Nerono? – respondis Apolodoro kun rideto de sankta rezignacio. – Antaŭ nelonge mi perdis amatan filon en unu el tiuj monstraj buĉadoj.

– Sed kiel? – demandis la miranta kohortestro.

– Tre simple – klarigis la maljunulo –: la kristanoj estas kondukataj en la cirkojn de torturo kaj morto

kvazaŭ kulpaj kaj mizeregaj sklavoĵoj. Ĉar ankoraŭ ne ekzistas ia leĝa fundamento, kiu pravigus similajn kondamnojn, tial la viktimoj estas mensoge nomataj kvazaŭ sklavoĵoj, kiuj meritis la ekstremajn punojn.

– Sed, ĉu ne ekzistas almenaŭ unu politikisto, kiu povus senmaskigi ĉi tiun fian artifikon?

– Preskaŭ ĉiuj honestaj kaj justaj politikistoj estas ekzilitaj, krom tiuj multaj, kiujn la senperaj subuloj de la Imperiestro pelis al memmortigo. Ni supozas, ke ne longe daŭros kaj komenciĝos la malkaŝa persekutado kontraŭ la disĉiploj de la Evangelio. Ĉi tiun decidon ĝis nun prokrastis nur la interhelpo de kelkaj sinjorinoj, konvertiĝintaj al Jesuo, kiuj ĉion eblan faras por la defendo de niaj idealoj. Se ĉi tio ne estus, la situacio kredeble montriĝus pli dolora.

– Ni devas abnegacii nin mem kaj preni la krucon – diris Paŭlo el Tarso, komprenante la severecon de la tempoj.

– Ĉio ĉi estas tre stranga por ni ekster via rondo mem – prave konsideris Julio –, ĉar ni vidas nenian motivon por tia tiraneco. Estas malsaĝaĵo la persekutado kontraŭ la adeptoj de la Kristo, homoj, kiuj klopodas por la ellaborado de ia pli bona mondo, dum tie ĉi kaj tie prosperas tiom da societoj de malbonfarantoj, kiuj devas esti leĝe disbatitaj. Sub kia preteksto oni entreprenas tiun kaŝitan kampanjon?

Apolodoro ŝajnis enmemiĝi kaj diris:

– Oni akuzas nin kiel malamikojn de la ŝtato, kiuj subfosas ĝiajn politikajn fundamentojn per renversaj kaj detruaj ideoj. La koncepto pri boneco, en la Kristanismo, donas motivon por tio, ke multaj misinterpretas la instruojn de Jesuo. La bonstataj romanoj, la kleraj, ne toleras la ideon pri ia homa frateco. Laŭ ilia pensmaniero, malamiko estas malamiko, sklavo estas sklavo, mizerulo estas mizerulo. Ne venas en ilian kapon la penso, eĉ ne por momento forlasi la orgion de la vantaj kaj krimaj plezuroj, por mediti pri la altigo de la socia nivelo. Tre malmultaj estas tiuj, kiuj zorgas pri la problemoj de la plebo. Al karitema patricio oni montras

kun mokoĵ. En tia klimato tiuj ne favoritaj de la sorto trovis en la Kristo Jesuo plej amatan Savinton kaj la avaruloj mortigendan malamikon, por ke la popolo ne karesu esperojn. Ekzamenante ĉi tiun cirkonstancon, ni povas imagi al ni la progresadon de la kristana doktrino ĉe la afliktitoj kaj malriĉuloj, se ni konsideras, ke Romo ĉiam estis ia grandega monda veturilo de triumfo kun la aŭtoritatemaj kaj tiranaj turmentistoj sur la kondukado kaj ĉirkaŭita de malsataj homamasoj, ie kaj ie kolektantaj al si la manĝorestaĵojn. La unuaj kristanaj predikoj fariĝis ne rimarkate, sed kiam la popolo mem montris, ke ĝi komprenas la altan signifon de la nova doktrino, jen ekestis la akraj bataloj. Antaŭe kun kulto libera, la Kristanismo poste komencis esti severe kontrolata. Oni diradis, ke niaj rondoj fontas el sorĉaĵoj kaj magiaĵoj. Poste, ĉar okazis ribeletoj de sklavoj en la nobelaj palacoj de la urbo, tial niaj kunsidoj por preĝoj kaj spiritalaj bonfaroj estis malpermesitaj. La societoj estis perforte likviditaj. Dank'al la garantioj, kiujn ĝuas la kooperativoj por funebraj ceremonioj ni ekkunvenis malfrue nokte en la katakomboj. Eĉ tiel, malkaŝitaj de la partianoj de la Imperiestro, niaj preĝorondoj travivas barbarajn torturojn.

– Ĉio ĉi estas ja terura! – ekriis la kortuŝita centestro – Plej miriga estas tio, ke ekzistas oficistoj, pretaj plenumi tiel maljustajn ordonojn!

Apolodoro ridetis kaj rediris:

– La nuntempa tiraneco ĉion pravigas. Ĉu vi mem ne kondukas Apostolon kiel malliberulon? Mi tamen konfesas, ke vi estas al li granda amiko.

Ĉi tiu komparo de la maljuna kaj sagaca pensulo iomete paligis la centestron.

– Jes, jes – tiu balbutis, penante klarigi sian penson.

Paŭlo el Tarso, konstatinte la situacion kaj embarason de sia amiko, helpis lin, klarigante:

– Sed la vero estas, ke mi estis enkarcerigita ne pro maliceco aŭ eraro de la romanoj, ne konantaj Jesuon Kriston, sed de miaj samrasanoj mem. Ĝustadire, ne nur

en Jerusalemo, sed ankaŭ en Cezarea, mi renkontis la plej sinceran bonvolon de la delegitoj de la Imperio. En ĉio ĉi, amikoj, regas la nepraj devoj de la servado al la Majstro. Por la necesa sukceso de siaj elaĉetaj klopodoj la disĉiploj ne povos iradi en la mondo sen la signoj de la kruco.

La konversaciantoj kontente ekrigardis unu alian. La klarigo de la Apostolo plene prilumis la demandon.

La multenombra grupo atingis Albon, kie nova aro da rajdistoj atendis la bravan misiiston. De ĉi tie ĝis Romo la karavano moviĝis pli malrapide, travivante ĉielajn ĝojosensaĵojn. Paŭlo el Tarso, tre kortuŝita, admiradis la apartan belecon de la scenoj, sterniĝantaj laŭlonge de la Vojo Appia. Post kelke da minutoj la vojaĝantoj atingis la Pordegon Kapena, kie centoj da virinoj kaj infanoj atendis la Apostolon. Kortuŝanta sceno!

La irantaro haltis, por ke liaj amikoj lin brakumu. Treege emociite, la centestro sekvis tiun neforgeseblan okazaĵon, rigardante blankharajn maljunulinojn, kiuj plej kore kisadis la manojn de Paŭlo.

Ravite de tiaj korelverŝoj, la Apostolo ne sciis, ĉu li rigardos la miregindajn scenojn de la sepmonta urbo, ĉu li retenos siajn emociojn, por spirite sin klini, elmontrante dankon al Jesuo.

Obeante la amikajn admonojn de Apolodoro, la grupo dissiĝis.

Opaleca krepusko milde superverŝis la tutan Romon. Karesaj ventetoj blovis el malproksime, farante pli agrable la varman posttagmezon. Konsiderante, ke Paŭlo bezonas ripozon, la centestro decidis pasigi la nokton en gastejo kaj prezenti sin kune kun la malliberuloj la morgaŭan tagon en la Kazerno de la Pretoranoj, post kiam ili ĉiuj refreŝiĝos de la longa kaj laciga vojaĝo.

Nur en la sekvanta mateno li iris al la koncernaj aŭtoritatoj, al kiuj li prezentis la akuzitojn. Tiu estis feliĉa ideo, ĉar la eksrabeno nun sentis sin tute revigliĝinta. En la antaŭtago Luko, Timoteo kaj Aristarĥo disiĝis de li, por enloĝiĝi ĉe siaj samidealanoj, ĝis ili povos firme starigi por si privatajn loĝejojn.

En la Kazerno de la Vojo Nomentana la centestro renkontis altrangajn oficistojn, kiuj tute bone povus aŭdi lin rilate al la afero, kiu venigis lin al la ĉefurbo de la Imperio; li tamen nepre volis atendi Generalon Burrus, persona amiko de la imperiestro kaj konata dank'al sia tradicia honesteco, por klarigi la aferon de la Apostolo.

La generalo lin rapide kaj komplezeme akceptis kaj sufiĉe sciiĝis pri la afero de la eksrabenado, kiel ankaŭ pri ties personaj anteceditoj kaj pri la luktoj kaj turmentoj, kiujn Paŭlo de longe travivas. Preninte la dokumentojn, senditajn de la Kortumo de Cezarea, por zorge ilin gardi, li promesis plej interese studadi la demandon. En la ĉeesto de la Apostolo li asertis al la centestro, ke, se la dokumentoj pruvos la roman civitanekon de la akuzito, ĉi tiu povos ĝui la favoron de la "eksterkarcera mallibereco", nur akompanate de gardisto, ĝis la favorkoreco de Cezaro decidos la apelacion.

Antaŭ ol tiuj dokumentoj estos ekzamenataj, Paŭlo estis enkarcerigita kune kun la ceteraj akuzitoj. Julio lin adiaŭis kortuŝita, la gardistoj brakumis la eksrabenon, malĝojaj kaj respektplenaj. La altrangaj oficistoj de la Kazerno sekvis tiun scenon kun nekaŝebla miro. Nenia malliberulo ĝis tiam eniris tien ĉe tiaj elmontraj de koreco kaj estimo.

Post semajno, dum kiu estis al li permesita konstanta kontakto kun Luko, Aristarĥo kaj Timoteo, la Apostolo ricevis ordonon, por preni loĝejon en la najbaraĵo de la malliberejo; tia privilegio estis al li konsentita dank'al liaj titoloj, kvankam li devis resti sub la rigardo de iu policano, ĝis la definitiva juĝo de lia apelacio.

Helpate de samdoktrinanoj, loĝantaj en la urbo, Luko luis modestan ĉambron de domo ĉe la Vojo Nomentana, kien, plena de kuraĝo kaj fido al Dio, transloĝiĝis la brava predikanto de la Evangelio.

Anstataŭ lasi fali la manojn antaŭ la malhelpoj, li ĉiam plue redaktadis konsolantajn kaj saĝajn epistolojn al la malproksimaj anaroj. En la dua tago post sia transloĝiĝo li rekomendis al la tri kunuloj serĉi al si laboron, por ne esti ŝarĝo por la fratoj, aldonante, ke li,

Paŭlo, vivos de la pano de la enkarcerigoj, kiel juste, ĝis Cezaro povos decidi pri lia peto.

Tiel, efektive, li agadis: ĉiutage li iradis al la kradoj de la karcero kaj tie li manĝadis sian nutroporcion. Li tiam uzadis tiuj horojn de kunevivado kun la krimintoj aŭ la viktimoj de la homa maliceco, por prediki la konsolajn veraĵojn de la Regno, kvankam tiuj en katenoj. Ĉiuj en spirita raviteco lin aŭdis, ĝojante pro la sciigo, ke ili ne estas forlasitaj de la Savinto. Tio estis krimuloj el Eskvilino, banditoj el la provincaj regionoj, malbonfarantoj el Suburra, servantoj ŝtelistoj, kiujn iliaj mastroj transdonis al la Justico, por la necesa revirtigo, kaj malriĉuloj, persekutataj de la tirana despotismo kaj suferantaj la teruran influadon de la difektoj de la administrado.

La parolo de Paŭlo efikis kiel ia balzamo el sanktaj konsoloj. La malliberuloj ricevis novajn esperojn kaj multaj konvertiĝis al la Evangelio, kiel ekzemple Onesimo, la revirtiĝinta sklavo, kiu eniris en la historion de la Kristanismo per la elkora epistolo al Filemon.

En la tria tago de sia nova situacio Paŭlo el Tarso vokis siajn amikojn, por efektivigi certajn entreprenojn, kiujn li opiniis nepre necesaj. Li atentigis, ke estas grava iu interkonsento kun la izraelidoj, al kiuj li bezonis havigi la lumon de la Bona-Novaĵo, sed en tiu momento li ne povos viziti la sinagogon. Tamen, ne retenante la fortajn impulsojn de sia vigla menso, li petis Lukon kunvoki la potenculojn de la judismo en la ĉefurbo de la Imperio, por prezenti al ili ian eksponon de principon, kiun li opinias konvena.

Posttagmeze en tiu sama tago granda nombro da plejaĝuloj de Izrael venis en lian ĉambron.

Paŭlo el Tarso elvokis antaŭ ili la multepromesajn novaĵojn pri la Regno de Dio, klarigis sian pozicion, parolis pri la juveloj de la Evangelio. La aŭdantoj montrigis iom interesitaj, sed, ĵaluzaj pri siaj tradicioj, fine prenis singardan kaj nekularan teniĝon.

Kiam li finis sian entuziasman paroladon, la rabeno Menandro diris en la nomo de ĉiuj:

– Via parolo meritas nian plej grandan estimon, tamen, amiko, ni nenian sciigon ankoraŭ ricevis el Judujo pri vi. Ni iom scias pri tiu Jesuo, pri kiu vi kore kaj respektoplene parolas. En Romo oni parolas pri li kiel pri ia krima revoluciulo, kiu meritis en Jerusalemo la torturon, destinitan al la rabistoj kaj maliculoj. Lia doktrino estas rigardata kiel kontraŭa al la esenco de la Leĝo de Moseo. Malgraŭ ĉio ĉi ni tamen sincere deziras aŭdi vin pri la nova profeto kun la necesa trankvileco. Cetere ne estas juste, ke nur ni solaj aŭdas tiujn strangajn novaĵojn. Estas konsilinde, ke via parolo estu direktata al la plimulto el niaj fratoj, por ke unuopaj juĝoj ne malutilu la interesojn de la tuto.

Paŭlo el Tarso kaptis la subtilecon de ĉi tiu rimarko kaj petis, ke ili difinu la tagon de lia prediko al pli granda aŭdantaro; ĉi tiu propono estis ricevita de la maljunaj judoj kun prava intereso.

En la tago asignita, granda amaso da izraelidoj kunepremitis en kaj ekster la modesta ĉambro, kie la eksrabeno instalas la novan sidejon de evangeliaj laboroj. Li predikis la instruojn de la Bona-Novaĵo kaj, de mateno ĝis posttagmezo, pacience klarigis la gloran mision de Jesuo. Iuj malmultaj liaj samrasanoj laŭŝajne komprenis la novajn instruojn, dum la plej multaj nur faradis bruajn demandojn kaj senfruktajn polemikojn. La Apostolo rememoris tiun tempon de siaj vojaĝoj kaj vidis tie ĝustan ripetigon de la incitaj scenoj en la aziaj sinagogoj, kie la judoj sin flame donadis al streĉaj bataloj.

La vespero alproksimiĝis kaj la diskutoj ankoraŭ varme daŭradis. La suno iom post iom formalaperadis, orkolorigante la supron de la foraj montetoj. Rimarkinte, ke la eksrabeno iom ripozis, por iom pli longe respiri, Luko alproksimiĝis kaj flustris:

– Doloras min konstati, kiom vi klopodas, por venki la spiriton de la judismo!

Paŭlo el Tarso iom konsideris kaj respondis:

– Jes, konstati la volan ribelon tudas la koron, tamen la sperto pri la mondo instruis min iel difini la pozicion de la spirito. Ekzistas du klasoj da homoj, por

kiuj estas pli malfacila la renoviga kontakto de Jesuo. La unua estas tiu, kiun mi vidis en Ateno kaj kiu konsistas el homoj, venenitaj de la trompema sciaĵaro de la Tero, homoj, kiuj kristaliĝas en ian imagan superecon kaj sin tre alte taksas: tiaj, laŭ mia opinio, estas la plej malfeliĉaj. La dua estas tiu, kiun ni vidas ĉe la obstinaj judoj, kiuj, ne komprenante kredon sen religiaj luktoj, ŝtoniĝas en la fiero pri raso kaj persistas en malvera interpreto de Dio. Tial ni opinias pli bona la parolon de la Kristo, kiu konsideris la malriĉajn en spirito kaj la pacigantojn sur la Tero feliĉaj homoj. Malmultaj kleraj nacioj kaj tre malmultaj judoj, sekvantaj la malnovan Leĝon, estas preparitaj por la benita lernejo de la perfektigado ĉe la Dia Majstro.

Luko ekmeditis pri la saĝa parolo de la Apostolo, sed tiam la bruaj kaj incitantaj disputoj de la izraelidoj ŝajnis la rapida fermento de neevitebla pugnobatalo. Strebante al paco, la eksrabeno denove suriris la tribunon kaj diris:

– Fratoj, ni evitu la senrezultajn kverelojn kaj ni aŭdu la voĉon de nia propra konscienco! Ekzameni plu la Leĝon kaj la Profetojn, en kiuj vi ĉiam trovos la promeson pri la Mesio, jam veninta... Detempe de Moseo ĉiuj mentoroj de Izrael parolis pri la Majstro per fajraj signoj... Ni ne kulpas vian spiritan surdecon... Prenante kiel motivon la pikantajn kunbekiĝojn, ĵus okazintajn, mi rememoras tiun instruon de Jesaja, ke multaj vidos, sed ne konservos, kaj iliaj oretoj estos malfermitaj, sed ne aŭdos. Tio estas la hardiĝintaj spiritoj, kiuj, pliakrigante siajn proprajn mizeraĵojn, kulminas per malesperaj luktoj, por ke Jesuo poste povu ilin konverti kaj resanigi per la balzamo de sia senlima amo. Tamen vi povas esti konvinkitaj, ke ĉi tiu mesaĝo estos ĝoje ricevita de la simplanimaj kaj malfeliĉaj nacioj, kiuj estas ja la feliĉaj de Dio.

Ĉi tiu malkaŝa kaj flama deklaro de la Apostolo atingis la aŭdantaron kvazaŭ fulmo kaj trudis absolutan silenton, sed, dekliniĝante de la sentoj de la plimulto, juda maljunulo alproksimiĝis al la damaska konvertito kaj diris:

– Mi ja komprenis la ĝustan sencon de via parolo, tamen mi dezirus peti vin, ke ĉi tiu Evangelio estu plue instruata al nia gento. Ekzistas bonintencaj sekvantoj de Moseo, kiuj povus profiti de la instruado de Jesuo, tiel riĉiĝante per ĝiaj eternaj valoraĵoj.

Ĉi tiu delikata kaj sincera peto estis farita per korusanta tono. Paŭlo kun profunda emocio brakumis tiun simpatianton de la nova doktrino kaj rediris:

– Ĉi tiu senluksa ĉambro estas ankaŭ via. Venu koni la penson de la Kristo ĉiam, kiam plaĉos al vi. Vi povos kopii ĉiujn notojn, kiujn mi posedas.

– Kaj ĉu vi ne instruas en la sinagogo?

– Nun, mallibera, kiel mi estas, mi ne povos ĝin fari, sed mi ja skribos leteron al niaj bonvolemaj fratoj.

Post nemulte da minutoj la densa homamaso disiĝis ĉe la unuaj ombroj de la vespero.

De tiam la kamaradoj de Paŭlo ekvidis, ke li, profitante la lastajn horojn de ĉiu tago, skribadas ian dokumenton, al kiu li donis profundan atenton. Iafoje ili vidis lin en larmoj dum la skribado, kvazaŭ dezirante fari el la mesaĝo ian tenujon de sanktaj inspiroj. Post du monatoj li donis sian verkon al Aristarĥo, por ĝin kopii, dirante:

– Ĉi tiu estas la epistolo al la hebreoj. Mi nepre volis ĝin skribi mem, farante uzon el miaj propraj rimedoj, ĉar mi ĝin dediĉas al miaj samrasanoj kaj penis skribi ĝin per la koro.

La amiko komprenis lian intencon kaj antaŭ ol komenci fari la kopiojn, atentis la apartan stilon kaj la grandiozajn kaj neordinarajn ideojn.

Kaj Paŭlo ĉiam plue laboradis por la bono de ĉiuj. Kiel malliberulo, li havis la kiel eble plej komfortan situacion. Li fariĝis sindona bonfaranto de ĉiuj gardistoj, kiuj atestis pri lia apostola klopodado. Al iuj li faciligis la koron per la ĝojoj de la Bona-Novaĵo; aliajn li liberigis de kronikaj, doloraj malsanoj. La bonfaro ofte ne limiĝis je la interesato, ĉar la romaj legianoj venigadis al li parencojn, korligitojn kaj amikojn, por profiti el la rilatoj kun tiu homo, konsekrita al la intereso de Dio.

Jam en la tria tago li ne estis plu mankatenita, ĉar la soldatoj trovis nenecesa tian formalajon, nur gardante lian pardonon kiel nuraj amikoj. Ne malofte tiuj bonkoraj militistoj invitis lin promeni tra la urbo, precipe sur la Vojo Appia, kiu fariĝis lia preferata loko.

Kortuŝite, la Apostolo dankis ilin por tiaj elmontroj de indulgemo.

La bonaĵoj el lia kunevivado fariĝis kun ĉiu tago pli klaraj. Impresite de lia eduka parolo kaj de liaj ĝentilaj manieroj, multaj legianoj, antaŭe kulpaj kaj malzorgemaj, estis nun elementoj utilaj al la administrado kaj al la socio. La soldatoj komencis konkuri pri la gardado de lia ĉambro, kaj tio estis la plej bona atesto de lia spirita valoro.

Samtempe kiel senĉese vizitata de fratoj kaj senditoj de liaj karaj eklezioj en Makedonujo kaj Azio, li daŭrigadis sian klopodon ame helpi la malproksimajn amikojn kaj kunlaborantojn per alte inspirataj leteroj.

Jam preskaŭ du jarojn lia apelacio al Cezaro kuŝis forgesita sur la tabloj de la mallaboremaj juĝistoj, kiam okazis plej grava fakto. Unu tagon iu amika legiano venigis al la damaska konvertito sinjoron kun vire energiaj trajtoj, laŭaspekte kun la aĝo de ĉirkaŭ kvardek jaroj. Tio estis Akacio Domicio, persono kun granda politika influo kaj, de kelka tempo, blindiĝinta en misteraj cirkonstancoj.

Paŭlo el Tarso lin bonkore akceptis kaj, metinte sur lin la manojn, klarigante al li, kion Jesuo deziras de tiuj, kiuj ricevas lian bonfaremon, emocie diris:

– Frato, nun mi invitas vin vidi, en la nomo de la Sinjoro Jesuo Kristo!

– Mi vidas! Mi vidas! – ekkriis la romano, posedita de plej granda ĝojo; kaj li tuj, per instinkta movo, genuiĝis kun larmoj kaj diris:

– Via Dio estas vera!

Profunde danka al Jesuo, la Apostolo oferis sian brakon, por ke li leviĝu, kaj en tiu sama momento Domicio penis ekkoni la spiritan enhavon de la nova doktrino, por reboniĝi kaj ŝanĝi sian vivmanieron. Li tuj

komplezeme notis al si la informojn rilatajn al la proceso de la eksrabeno kaj emfaze diris, adiaŭante:

– Dio helpos min, por ke mi povu pagi la bonon, kiun vi al mi faris! Koncerne vian situacion, ne dubu la decidon, kiun ĝi meritas, ĉar en la plej proksima semajno ni estos atingintaj la solvon de la proceso per la absolvo, konsentita de Cezaro!

Efektive, post kvar tagoj la maljuna servanto de la Evangelio estis vokita, por fari deklarojn. Laŭ la leĝaj ordonoj li venis sola antaŭ la juĝistojn kaj kun mirinda spriteco respondis ĉiujn, eĉ la plej detalajn demandojn, kiujn oni pafis kontraŭ lin. La patriciaj juĝistoj konstatis la senvalorecon de la akuzo, la stultecon de la argumentoj, prezentitaj de la Sinedrio, kaj ne nur konsiderante la politikan situacion de Akacio, kiu uzis en la afero la tutan influon, kiun li povis disponi, sed ankaŭ pro la profunda simpatio, kiun disradiis la persono de la Apostolo, klarigis la proceson per la plej noblaj opinioj kaj sendis ĝin per Domicio al la verdikto de la Imperiestro.

La grandanima amiko de Paŭlo ĝojis pro la komenca venko, konvinkita pri la baldaŭa liberigo de sia bonfarinto. Senprokraste li agis siajn plej bonajn amikrilatojn, inter kiuj Popean Sabinan, kaj fine atingis la imperiestran absolvon.

Paŭlo el Tarso ricevis la sciigon kun esprimoj de danko al Jesuo. Pli, ol li mem, ĝojegis liaj amikoj, kiuj festis la okazaĵon per memorindaj korelverŝoj, sed la konvertito apud Damasko vidis en tio ne nur ian motivon por persona ĝojo, sed la devon pliintensigi la disvastigon de la Evangelio de Jesuo.

Dum tuta monato, ĉe la komenco de la jaro 63, li vizitadis la kristanajn ekleziojn en ĉiuj kvartaloj de la imperia ĉefurbo. Lia ĉeesto estis konkure dezirata de ĉiuj rondoj, kiuj lin akceptadis kun koraj elmontroj de respekto kaj amo dank'al lia morala aŭtoritateco. Organizinte servoplanojn por ĉiuj hejmaj eklezioj, funkciantaj en la urbo, kaj post sennombraj ĝeneralaj predikoj en la silentaj katakomboj, la senlaca laborulo de-

cidis foriri Hispanujon. Liaj kunlaborantoj vane petis lin rezigni pri tia vojaĝo: nenio deadmonis lin de ĝi. De longe li nutradis la deziron viziti la ekstremon de la okcidenton, kaj, se eble, li dezirus morti, konvinkita, ke li portis la Evangelion ĝis la randoj de la Tero.



Renkonte al la Majstro

Kelke da tagoj antaŭ lia foriro al la hispanaj nacioj, jen la Apostolo ricevis kortuŝantan leteron de Simon Petro. La eksfiŝisto el Kapernaum skribis al li el Korinto, anoncante sian baldaŭan venon al la imperia ĉefurbo. La letero estis kora kaj emocia, plena de amaraj kaj malĝojaj konfidencoj. Petro konfidis al la amiko siajn lastajn disreviĝojn en Azio kaj montriĝis forte interesita pri tio, kio al li okazis en Romo. Ne sciante, ke la eksrabeno jam ricevis liberigon, li penis tiun frate konsoli. Antaŭ li, Simon, decidis rifuĝi apud siajn frat-ojn en la imperia metropolo, kie li esperis ĉiam ajn esti utila al la amiko. Ankoraŭ en tiu sama intima dokumento li petis, ke Paŭlo uzu la kurieron, por komuniki al la romaj kunfratoj lian intencon resti kelkan tempon ĉe ili.

La damaska konvertito plej kortuŝita legis kaj re-legis tiun amikan mesaĝon.

Per la sendito, frato el la eklezio de Korinto, li estis avizita, ke la respektinda Apostolo el Jerusalemo venos al la haveno de Ostia post ĉirkaŭ dek tagoj.

Li eĉ momenton ne hezitis. Li faris uzon el ĉiuj por li disponeblaj rimedoj, sciigis siajn intimulojn kaj pretigis modestan domon, kie Petro povos enloĝiĝi kun la familio. Li estigis la plej bonan etoson por la akcepto al la respektinda kamarado. Pro lia proksima vojaĝo al Hispanujo, liaj amikoj faris al li donacojn, kiujn li ne akceptis, indikante al ili la bezonojn de Simon, al kiu nenio manku. Ĉiujn domajn uzaĵojn, kiujn li posedis, li transportis el la senluksa ĉambro, kiun li luis apud la Pordego Lavernal, en la dometon destinitan al Simon,

proksime al la izraelidaj tombejoj ĉe la Vojo Appia. Ĉi tiun ekzemplon de kunlaborado ĉiuj rigardis kiel alte ŝatindan. La plej malriĉaj fratoj nepre volis donaci malgrandajn uzaĵojn al la respektinda Apostolo, kiu alvenos kun malplenaj manoj.

Informite, ke la ŝipo ennaĝas en la havenon, la eksrabeno ekrapidis al Ostia. Luko kaj Timoteo, ĉiam akompanantaj lin, kune kun aliaj sindonaj kunlaborantoj, subtenis lin ĉe la malgrandaj neebenaĵoj de la vojo, ĉi tie kaj tie oferante al li la brakon.

Oni ne povis aranĝi pli malkaŝan akcepton. La senbrua persekutado kontraŭ la adeptoj de la Nazaretano streĉis la sieĝon de ĉiuj flankoj. La lastaj honestaj konsilantoj de la Imperiestro iom post iom malaperadis. Romo pleniĝis de teruro ĉe la monstreco kaj kvanto da ĉiutagaj krimoj. Noblaj homoj el la patricioj kaj el la popolo estis viktimoj de kruelaj atencoj. Atmosfero de teroro regis ĉiujn politikajn agojn, kaj en la kadro de ĉi tiuj malfeliĉegoj la kristanoj ricevadis la plej brutajn punojn dank'al la malamika sintenado de tiuj, kiuj alkonformiĝis al la malnovaj dioj kaj sin regalis per la plezuroj de diboĉa kaj senzorga ekzistado. Pri ĉiaj okazantaj malfacilaĵoj estis akuzataj kaj responsigataj la sekvantoj de Jesuo. Se eksplodis iu pli forta tempesto, tia fenomeno havis kiel kaŭzon la adeptojn de la nova doktrino. Se fariĝis plisevera vintro, estis akuzataj ĉi tiuj, ĉar neniuj, kiel la disĉiploj de la Krucumito, tiel multe malŝatis la sanktejojn de la iama kredo, abomenante la favorojn kaj la oferojn al la protektantaj dioj. Ekde la regado de Klaŭdio oni dissemadis naŭzajn famojn pri la kristanan laboroj. La imagemo de la popolo, avida je la disdonoj de tritiko ĉe la grandaj festoj en la cirko, elpensadis ne ekzistantajn situaciojn, naskante strangajn, absurdajn opiniojn pri la kredantoj de la Evangelio. Ĝuste tial, ekde la jaro 58, la tute pacemaj kristanoj estis kondukataj en la Grandan Cirkon kvazaŭ revoluciemaj aŭ ribelintaj sklavo, kiuj devos esti eks-termataj. La tiraneco kreskis kun ĉiu tago. Tiuj romanoj pli aŭ malpli distingindaj, ĉu pro sia nomo, ĉu pro

sia financa situacio, kiuj simpatiis la doktrinon de la Kristo, kiel ĉiam ne suferadis publikajn hontigojn, sed la malriĉuloj, la laboristoj, la infanoj de la plebo, tiuj estis pelataj po centoj al la martirigo. Tial la amikoj de la Evangelio preparis nenian publikan honoradon al Simon Petro ĉe lia alveno; kontraŭe, ili donis al tiu okazaĵo tute intiman karakteron, ke ĝi ne nasku revenĝajn agojn de la regantaj monstroj.

Paŭlo el Tarso, ĝojplena, etendis la brakojn al sia malnova amiko el Jerusalemo. Simon venigis kun si la edzinon kaj infanojn, krom ankoraŭ Johano. Lia nobla parolo estis plena de novaĵoj por la Apostolo al naci-anoj. Post nemultaj minutoj li eksciis pri la morto de Jakobo kaj pri la novaj torturoj, kiujn la Sinedrio trudis al la jerusalema eklezio. La maljuna eksfiŝisto bonhumore rakontis la lastajn incidentojn de sia sorto. Eĉ la plej pezajn atestojn li komentariis kun rideto kaj la tutan raporton li traplektis per laŭdoj al Dio. Parolinte pri siaj luktoj tra multaj kaj ripetitaj migradoj, li sciigis la eksrabenon, ke dum kelke da tagoj li rifuĝis apud Johanon, en Efeso, kaj iris kune kun la filo de Zebedeo al Korinto, kie ili decidis veni al la ĉefurbo de la Imperio. Siavice, Paŭlo raportis la taskojn, kiujn li en la lastaj jaroj ricevis de Jesuo. Admirindaj estis la optimismo kaj la kuraĝo de ĉi tiuj viroj, kiuj, ardante de la mesia kaj amanta spirito de la Majstro, konsideradis la disreviĝojn kaj dolorojn de la mondo kiel kronojn de la vivo!

Post ĉi tiuj mildaj ĝojoj de la revidiĝo la grupo diskrete sin direktis al la dometo, destinita al Simon Petro kaj lia familio.

Sentante la bonegecon de tiu elkora akcepto, la eksfiŝisto ne povosciis, kiel esprimi la ĝojegon de sia animo. Kiel Paŭlo, veninte al Puteoli, tiel li havis la impreson, kvazaŭ li troviĝas en ia mondo malsama, ol tiu, kie li ĝis nun vivis.

Ĉe lia alveno pliintensiĝis la apostolaj servoj, tamen la predikisto al naci-anoj ne flanken metis sian penson iri Hispanujon. Farante al si motivon, ke Petro lin eĉ

pli efike anstataŭos, li decidis en la difinita tago foriri per malgranda ŝipo, veturonta al Gallujo. Nenion helpis amikaj protestoj, eĉ ne la insistado de Simon, ke li prokrastu sian vojaĝon. Akompanata de Luko, Timoteo kaj Demas, la maljuna defendanto de la nacioj, ardante per grandiozaj projektoj, forveturis ĉe la matenuĝo de bela tago.

La misio vizitis parton de Gallujo kaj direktis sin al Hispanujo, kie ĝi pli longe restis en la regiono de Tortosa. Ĉie la parolo kaj faroj de la Apostolo gajnis novajn korojn por la Kristo, dissemante la servojn de la Evangelio kaj refreŝigante la esperojn de la popolo en la lumo de la Regno de Dio.

Sed en Romo la situacio estis ĉiam pli serioza. Pro la maliceco de Tiĝelinus, estranta la Departementon de la Pretoranoj, pliakriĝis la teruro ĉe la disĉiploj de Jesuo. Mankis nur iu edikto, per kiu la romaj civitanoj, simpatiantaj la Evangelion, estus publike kondamnataj, ĉar la liberigintoj, la devenintoj de aliaj popoloj kaj la plebaj infanoj jam plenŝtopis la karcerojn.

Simon Petro, kiel reliefa persono de la movado ne konis ripozon. Malgraŭ la natura malvigleco de maljunulo, li penis kontentigi ĉiujn aperantajn bezonojn. Lia potenca spirito superstaris ĉiajn sortobatojn kaj plenumadis ĉiujn devojn kun plej granda sindoneco al la afero de la Vero. Li flegadis la malsanulojn, predikadis en la katakomboj, trairedis longajn distancojn, ĉiam vigla kaj ĝoja. La kristanoj en la tuta mondo neniam povos forgesi tiun legion da abnegaciuloj, kiuj ilin antaŭiris ĉe la unuaj kredatestoj, travivante dolorajn kaj maljustajn situaciojn, priverŝante per sango kaj larmoj la kultivejon de la Kristo, brakumante unu alian, reciproke konsolataj en la plej nigraj horoj de la historio de la Evangelio, en la abomenindaj spektakloj en la Cirko, en la afliktopreĝoj, kiuj leviĝis el la forlasitaj tombejoj.

Tiĝelinus, granda malamiko de la prozelitoj de la Nazaretano, penadis pliakrigi la situacion per ĉiuj rimedoj, kiujn disponis lia abomeninda kaj perversa aŭtoritateco.

Kiam la filo de Zebedeo sin preparis por reveni Azion, jen grupo da pedeloj de la persekutantoj surprizis lin en kora kaj inspirata prediko, per kiu li adiaŭis siajn kunfratojn en Romo, esprimante emocian dankon al Jesuo. Malgraŭ siaj respektaj klarigoj Johano estis arestita kaj senkompate trabastonata, kaj kune kun li dekoj da fratoj estis enŝlositaj en la feĉajn karcerojn de Eskvilino.

Petro ricevis ĉi tiun informon dolore surprizita. Li sciis la amplekson de la laboroj, kiuj atendas en Azio lian noblan kamaradon, kaj petis la Sinjoron ne forlasi ĉi tiun, por la fina justa absolvo. Kiel li konduitu en tiaj malfacilaj cirkonstancoj? Li sin turnis al la influaj amikoj, kiujn li havis en la urbo, sed ankaŭ tiuj amikoj havis nenian politikan prestiĝon ĉe la tiaman administraj kabinetoj. La kristanoj en pli reliefa financa pozicio ne kuraĝis alfronti la sufokantan ondon da persekutado kaj tiraneco. La malnova estro de la jerusalema eklezio ne senkuraĝiĝis. Li devis liberigi sian amikon kaj por tio li kiel eble uzos siajn fortojn. Komprenante la pravan timemon de la romanoj, simpatiantaj kun la Kristo, li rapide kunvokis kelke da intimaj amikoj, por ekzameni la aferon.

Dum la debatoj unu el ili proponis voki Paŭlon. La Apostolo al nacioj havas en la ĉefurbo de la Imperio multe da eminentaj amikoj. Por lia absolvo la iniciato venis rekte de la rondo de Popea Sabina. Multaj militistoj, kunlaborintoj de Afranio Burrus, lin estimas. Akacio Domicio, kiu kalkulas je altaj influoj ĉe la pretoranoj, estas lia sindona kaj senkondiĉa amiko. Neniu pli efike, ol la eksteksisto el Tarso, povos preni sur sin la delikatan taskon savi la malliberulon. Ĉu do ne estos pravigeble peti lian helpon? Oni konsideris la urĝecon de ĉi tiu paŝo, des pli, ĉar multe da kristanoj ĉiutage mortis en la malliberejo de Eskvilino, vundite de bolanta oleo. Tiĝelinus kaj kelke da anoj de la krima adminstrado faris al si amuzon el la turmentoj de la viktimoj. Oni ĵetadis la oleon sur la malfeliĉulojn ĉe la torturoŝtipoj. Aliaj malliberuloj, kun ligitaj manoj,

estis enigataj en grandajn barelojn da bolanta akvo. La estro de la pretoranoj postulis, ke iliaj samreligianoj ĉestu la martirigon por averta ekzemplo al ĉiuj. La malliberuloj sekvadis tiujn barbaraĵojn, silente plorante. Kiam oni konstatis la morton de la viktimo, iu soldato prenis sur sin la taskon ĵeti liajn viscerojn al la malsataj fiŝoj en la vastaj basenoj de la abomenindaj malliberejoj. Ĉe tia terura ĝenerala situacio, ĉu oni povos kalkuli je la interhelpo de Paŭlo? Hispanujo kuŝas tre malproksime. Lia veno eble neniom utilos ĉe la persona afero de Johano, sed Petro konsideris la oportunecon de ĉi tiu rimedo kaj diris, ke ili plue klopedos por la filo de Zebedeo. Nenio tamen malhelpas, ke oni tuj sin turnu al la prestiĝo de Paŭlo, des pli, ke la situacio de momento al momento fariĝas pli malbona. Tiu jaro 64 komenciĝis kun teruraj perspektivoj. Oni ne povis flanken meti la servojn de iu energia kaj decidema homo en la direktado de la interesoj de la afero.

Ĉe ĉi tiu opinio de la respektinda jerusalema Apostolo, la kunsidantaro aprobis la prezentitan proponon. Unu frato, kiu fariĝis sindona kunlaboranto de Paŭlo, en Romo, estis urĝe sendita Hispanujon. Tiu sendito estis Krescencio, kiu ĉe la grandega korpremateco de ĉiuj forveturis de Ostia, portante la leteron de Simon.

Post longa migrado la Apostolo al nacioj kelkan tempon restis en Tortosa, kie li sukcesis kolekti grandan nombron da kunlaborantoj, sin donantaj al Jesuo. Liaj apostolaj klopedoj daŭradis senĉese, kvankam ne tiel intense pro la fizika laceco. La moviĝado de la epistoloj malpliĝis, sed ne tute ĉesis. Por kontentigi la bezonojn de la eklezioj en oriento, Timoteo forveturis de Hispanujo al Azio, portante amikajn leterojn kaj rekomendojn. Ĉirkaŭ la Apostolo kolektiĝis nova aro da diligentaj kaj sinceraj kunlaborantoj. En ĉiuj lokoj Paŭlo el Tarso instruadis laboron kaj abnegacion, pacon de la konscienco kaj praktikadon de bono.

Kiam li planis novajn vojaĝojn kune kun Luko, jen aperis en Tortosa la kuriero de Simon.

La eksrabeno legis la leteron kaj decidis tuj reveni al la imperia ĉefurbo. Tra la koraj vortoj de la malnova

amiko li iel komprenis la seriozecon de la okazaĵoj. Krom tio, Johano devis reiri al Azio; Paŭlo ja sciis ties bomfaran influon en Jerusalemo. En Efeso, kie la eklezio konsistas el judoj kaj nacioj, la filo de Zebedeo ĉiam estis nobla kaj ekzempla persono, libera de sektemo. Paŭlo el Tarso ekzamenis la bezonojn de la evangelia agado ĉe la orientaj eklezioj kaj konkludis, ke la reiro de Johano estas urĝa; li tial decidis senprokraste enpaŝi en la aferon.

Kiel aliajn fojojn, tiel nun nenion helpis la konsideroj de liaj amikoj rilate la demandon de lia sano. Tiu energia kaj decidema viro, malgraŭ siaj blankaj haroj, tenadis la saman spiriton rezolutan, noblan kaj neŝancelblan, kiu lin karakterizis en la delonge forpasinta juneco. La aktiva moviĝado de ŝipoj en la komenco de Majo 64 lin favoris, kaj tial ne estis por li malfacile reveni al la haveno de Ostia, apud la kamaradojn.

Simon Petro akceptis lin kortuŝita. En nemultaj horoj la damaska konvertito konis la neelporteblan situacion, kiun en Romo kreis la krima agado de Tiĝelinus. Johano estas ĉiam ankoraŭ en karcero, malgraŭ la apelacioj al la tribunaloj. La iama fiŝisto el Kapernaŭm, en signifoplenaj konfidencoj, malkaŝis al sia kunulo, ke lia koro antaŭdiras al li ankoraŭ dolorojn kaj kruelajn atestojn. Profeta sonĝo anoncis al li krudajn persekutojn kaj elprovojn. En unu el la lastaj noktoj li vidis strangan bildon: ia giganta kruco ŝajnis involvi en sian ombron la tutan familion de la disĉiploj de la Sinjoro. Paŭlo el Tarso lin aŭdis interesite kaj eldiris sian plenan akordon pri liaj antaŭsentoj. Malgraŭ la forte nuba aero ili decidis agadi multope, por liberigi la filon de Zebedeo.

Fluadis la monato Junio.

La eksrabeno sin jetis al intensaj klopodoj, iris al Akacio Domicio, por peti lian interhelpon kaj apogon. Ankoraŭ plue: konsiderante, ke la malrapideco de la disponoj povos rezultigi fiaskon, lin helpata de eminentaj amikoj, penis vidiĝi kun multaj anoj de la Imperia Kortego kaj eĉ venis al Popea Sabina, por peti ŝian helpon

en la afero de la filo de Zebedeo. La fama favoritino aŭdis lin forte surprizita. Tiuj konigoj pri ia vivo eterna, tiu koncepto pri Dio ŝin teruris. Kvankam nekaŝita malamikino de la kristanoj, dank'al sia simpatio al la judismo, Popea tamen estis impresita de la asketa figuro de la Apostolo kaj de la argumentoj por la plifortigo de lia peto. Ne kaŝante sian admiron, ŝi promesis kongentigi lin, tuj konigante al li la disponojn, kiujn ŝi senprokraste faros.

Paŭlo foriris, esperante la absolvon de la kamarado, ĉar Sabina promesis liberigi ĉi tiun en la daŭro de tri tagoj.

Reveninte al la eklezio, li sciigis la fratojn pri sia intervidiĝo kun la favoratino de Nerono, sed, fininte sian raporton, li iom mire rimarkis, ke iuj kamaradoj malaprobis tiun lian paŝon. Li tiam petis ilin klarigi kaj pravigi ĉian dubon. Aŭdiĝis ne grandvaloraj konsideroj, kiujn li ricevis kun sia neskuebla sereneco. Oni diris, ke ne estas laŭdinte turni sin al ia diboĉa korteganino, por peti de ŝi iun favoron. Tia konduto ŝajnis ne deca al sekvantoj de la Kristo. Popea estas virino kun ĉiekonate malĉasta vivado, festenadas en la orgioj de Palatino, distingigās per sia skandala voluptamo. Ĉu estos do saĝe peti de ŝi protekton por la disĉiploj de Jesuo?

Paŭlo el Tarso ricevis ĉi tiujn bagatelajn konsiderojn kun anĝela pacienco kaj saĝe rediris:

– Mi respektas kaj ŝatas vian opinion, sed antaŭ ĉio mi konsideras necesa la liberigon de Johano. Se mi estus la malliberulo, mi ne opinius la aferon tiel urĝa kaj tiel serioza. Mi estas maljuna, senfortiĝinta, kaj tial estos por mi pli bone, kaj eble pli utile, mediti pri la favorkoreco de Jesuo post la kradoj de iu karcero. Sed Johano estas rilate juna, estas fortika kaj sindona; la kristanismo en Azio ne povas malhavi lian konstruan klopodadon, ĝis aliaj laborantoj estos vokitaj al la dia kultivejo. Koncerne viajn dubojn mi devas prezenti argumenton, kiu postulas konsideradon. Kial vi opinias nedeca iun peton al Popea Sabina? Ĉu vi tiel same pensus, se mi irus al Tiĝelinus aŭ al la Imperiestro mem?

Ĉu ili ne estas viktimoj de tiu sama prostituado, kiu nigrigas la favoratinojn de ilia kortego? Se la paŝojn pri la liberigo de nia kamarado mi interkonsentus kun ia ebria militisto, el Palatino, vi eble sen rezervoj aplaudus tiun mian faron. Fratoj, estas necese kompreni, ke la morala ruiniĝo de la virino preskaŭ ĉiam naskiĝas el la morala putreco de la viro. Mi konsentas ke Popea ne estas la persono plej deca en ĉi tiu afero, dank'al la agitiĝado de sia vivmaniero, tamen tiu estas la paŝo, kiun la cirkonstancoj indikis, kaj mi devas liberigi la sindonan disĉiplon de la Sinjoro. Cetere mi penis uzi tiajn rimedojn, rememorante la admonon de la Majstro, kiu rekomendas, ke la homo faru al si amikojn per la mamono de maljusteco (*). Mi opinias, ke ĉia rilato kun Palatino estas esprimo de la maljusta riĉeco, sed ankaŭ ke estas utile servigi tiujn, kiuj restas “mortintaj” en pekado por iu ago de karito aŭ fido, per kiu ili liberiĝu el la ligiloj kun la kulpa pasinteco, helpate de la mano de fidelaj amikoj.

Ĉi tiu klarigo de la Apostolo plenigis la ĉambron per granda trankvileco. Per nemulte da vortoj Paŭlo el Tarso vidigis al siaj kamaradoj transcendantajn veraĵojn en la spirita sfero.

La promeso ne malplenumiĝis: post tri tagoj la filo de Zebedeo estis liberigita. Johano estis ekstreme senfortiĝinta. La brutalajoj, la vidado je la teruraj scenoj en la karcero, la angora atendado estis dronintaj lian spiriton en dolora perplekseco.

Petro ĝojegis, sed la eksrabeno, atenta al la nerva streĉiteco en la urbo, konsilis la senprokrastan reiron de la galilea apostolo al Azio. La efesa eklezio lin atendas. Jerusalem devas kalkuli je lia abnegacia kaj amika kunlaborado. Johano ne havis oportunon por longaj konsideroj, ĉar Paŭlo, kvazaŭ posedita de amaraj antaŭsentoj, iris al la haveno de Ostia, por aranĝi lian forveturon, profitante napolan ŝipon, baldaŭ irontan al Mileto. Surprizite de tiuj disponoj kaj ne povante kontraŭstari al

(*) Luko, 16:9. – *Noto de la Aŭtoro.*

la decidema eksrabeno, la filo de Zebedeo enŝipiĝis ĉe la fino de Junio 64, dum la ceteraj amikoj restis en Romo, por la bona batalado favore al la Evangelio.

Ju pli nigra la horizonto, des pli solida fariĝis la grupo de la samkredanoj en la Kristo Jesuo. Multiĝadis la kunvenoj en la malproksimaj forlasitaj tombejoj. Dum tiuj tagoj de suferoj, la predikoj ŝajnis pli belaj.

Paŭlo el Tarso kaj liaj kunlaborantoj sin plej varme donadis al spiritalaj edifoj, kiam la urbon subite ekskuis miregiga okazaĵo. La 16-an de Julio 64, matene, ekestis proksime al la Granda Cirko fortega brulo, kiu ekprenis la tutan kvartalon inter la montetoj Celio kaj Palatino. La fajro komenciĝis en vastaj magazenoj plenaj de brulema materialo kaj disvastiĝis kun miregiga rapiceco. Oni vane kunvokis laboristojn kaj plebanojn, por mildigi ĝian intensecon; senutile la grandnombra kaj densa popolamaso uzis ĉiajn rimedojn, por rebonigi la situacion. La flamoj ĉiam leviĝadis kaj furioze sin sternadis, postlasante amasojn da ruboj kaj ruinoj. La tuta Romo, jam absorbata de siaj minacaj kaj teruraj pasioj, alkuris, por vidi la pereigan spektaklon. La fajro rapidege ruliĝis ĉirkaŭ Palatino kaj invadis Velabron. La unua tago finiĝis kun afliktantaj perspektivoj. La ĉielo kovriĝis per densa fumo, kaj granda parto de la montetoj heliĝis de la abomeninda lumego de la terura brulo. La elegantaj konstruaĵoj sur Aventino kaj Celio ŝajnis sekaj arboj de flamanta arbaro. Pliakriĝis la konsterniteco de la viktimoj de la grandega katastrofo. Ĉio ardis en la najbaraĵo de la Forumo. Plej malfacile komenciĝis la eliro. Ĉe la pordegoj de la urbo ŝtope svarmis homoj, poseditaj de profunda teruro. Timegplenaj bestoj kuradis tra la stratoj, kvazaŭ pelataj de nevideblaj persekutantoj. Solidaj malnovaj domoj disfaladis kun infera bruego. Ĉiuj loĝantoj de Romo deziris foriĝi de tiu brulego. Jam neniu kuraĝis ataki la senbridan fajron. La dua tago montriĝis kun tiu sama neforgesbla spektaklo. La popolanoj rezignis savi ion kaj kontentiĝis povante enterigi la sennombrajn mortintojn, trovatajn en alireblaj lokoj. Dekoj da homoj trairedis

la stratojn en terurakcentaj ridegoj; frenezo atakadis tiujn pli impresiĝemajn. Improvizitaj brankardoj kondukadis vunditojn sen difinita destino. Longaj vicoj invadis la sanktejon, por forsavi la riĉajn figurojn de la dioj. Miloj da virinoj, kun doloraj petegoj, laŭtege farante voton de penigaj oferoj, sekvis la nekortuŝeblan figuron de la protektantaj dioj. Kompatemaj viroj prenis kun si, en la kirlego de la konsternitaj homamasoj, la piedpremitajn aŭ nur vunditajn infanojn. La tuta urboparto, kondukanta al la Vojo Appia, direkte al Albo, estis plenŝtopita de rapidantaj kaj disreviĝintaj forirantoj. Centoj da patrinoj kriadis pri siaj malaperintaj infanetoj, kaj ne malofte oni rapide faris disponojn, por helpi al tiuj, kiuj freneziĝis. La tuta loĝantaro deziregis samtempe forlasi la urbon. La situacio fariĝis danĝera. La ribelinta popolaĉo atakadis la portseĝojn de la patricioj. Nur la sentimaj rajdistoj sukcesis trarompi la homan maron, kio vekis novajn blasfemojn kaj lamentojn.

La fajro jam estis preskaŭ tute konsuminta la nobelajn kaj riĉajn palacetojn de la Carinae kaj ĉiam ankoraŭ disbatadis la romajn kvartalojn inter la valoj kaj la montetoj, kie la loĝantaro estis tre densa. Dum tuta semajno, tage kaj nokte, ardis la detruanta fajro, dissemante afliktojn kaj ruinojn. El la dek kvar distriktoj, en kiujn la imperia metropolo estis dividita, nur kvar estis netuŝitaj. Tri estis ia amaso da fumantaj ruboj kaj la ceteraj sep konservis nur iajn postesignojn de la pli altvaloraj konstruaĵoj.

La imperiestro troviĝis en Antium, kiam komenciĝis la fajro, kiun li mem planis, ĉar vere estas, ke, dezirante konstrui iun novan urbon per la grandegaj monrimedoj, venantaj el la tributantaj provincoj, li projektis tiun faman brulegon kaj tiel venkis la kontraŭstaron de la popolo, kiu ne deziris la translokigon de la sanktejoj.

Krom ĉi tiu entrepreno urboplanisma, la filo de Agripino havis, en ĉio, kiel karakterizan trajton sian satanan originalecon. Li flatis al si, ke li estas genia artisto, sed ja estis ia monstra histriono, kiu markis siajn

paŝojn en la politika vivo per neforviŝeblaj fiaj krimoj. Ĉu ja ne estus amuze prezenti al la mondo Romon flamantan? Laŭ lia opinio nenia spektaklo estus tiel neforgesebla, kiel tia. El la senvivaj cindroj li rekonstruus la detruitajn kvartalojn. Li estus malavara por la viktimoj de la supermezura katastrofo. Li ekpaŝus en la historion de la Imperio kiel grandanima administranto kaj amiko de la suferantaj regatoj.

En tia intenco li interkonsentis tiun atencon kun la korteganoj, kiuj ĝuis liajn plej grandajn konfidon kaj intimecon, kaj foriris de la urbo, por ne vekti suspekton en la spirito de la pli honestaj politikistoj.

Li tamen ne povis mem antaŭvidi la amplekson de tiu terura malfeliĉego. La brulo prenis nedezirindan grandecon. Liaj malpli dignaj konsilistoj ne povis antaŭkalkuli la vastecon de tiu katastrofo. Rapidece tirite el siaj krimaj plezuroj, la imperiestro alvenis ĝustatempe, por observi la lastan tagon de fajro kaj tiam li konstatis la karakteron de la abomeninda ago. Irinte al unu el la plej altaj lokoj, li rigardadis la amason da ruinoj kaj sentis la seriozecon de la situacio. La ekstermado de la privataj posedaĵoj estis supermezura. Oni ne povis antaŭvidi tiajn dolorajn sekvojn. Rekonante la justan indignon de la popolo, Nerono decidis publike paroli, samtempe verŝante iajn kelke da larmoj per sia eksterordinara kapablo simuli. Li promesis helpi la rekonstruadon de la privataj domoj, deklaris, ke li dividas la suferadon de ĉiuj kaj ke Romo restariĝos sur la fumantaj ruboj pli impona kaj pli bela. Grandega homamaso aŭskultadis lian parolon, atentante ĉiujn liajn gestojn. La imperiestro, en sia teatreca gestado, prenadis kortuŝantajn teniĝojn. Li parolis pri la forperditaj sanktejoj, dronante en larmoj. Ĉe ĉiu pli efekta frazo li alvokadis la protekton de la dioj. La popolanaso emociiĝis. Neniam antaŭe la imperiestro montriĝis tiel patre kortuŝita. Ne estus juste dubi liajn promesojn kaj rimarkojn. Ĉe iu momento lia parolo ekvibris pli patosa kaj esprim-pova. Li antaŭ la popolo solene prenos sur sin la ŝuld-iĝon senindulge puni la prirespondantojn. Li elserĉos la

bruligintojn, li senkompate venĝos tiun roman malfeliĉon. Li eĉ petas ĉiujn urbanojn kunagi kun li, elserĉante kaj denuncante la kulpulojn.

Kiam la parolo de la imperiestro fariĝis pli signifoplena, tiam oni rimarkis, ke la popolamaso strange agitigas. Nun frakase grandega plimulto unuiĝis kun terura krio:

– Kristanoj al la rabobestoj! Al la rabobestoj!

Jen la filo de Agripino trovis la solvon, kiun li serĉis. Vane serĉinte en la superekscitita spirito la novajn viktimojn de siaj fiaj maĥinacioj, homoj, al kiuj li povos imputi la kulpon de tiuj bedaŭrindaĵoj, li nun ekvidis en la minaca bleko de la popolaĉo la respondon al lia pereiga cerbumado. Nerono sciis la malanon de la vulgarularo kontraŭ la humilaj sekvantoj de la Nazaretano. La disĉiploj de la Evangelio sin tenadis ekster kaj super la tiamaj malmoralaj kaj brutaj moroj. Ili ne iradis en la cirkojn, deturnadis sin de la paganaj temploj, ne adorkliniĝadis antaŭ la idoloj kaj ne aplaudadis la politikajn tradiciojn de la Imperio. Krom tio ili predikadis iajn strangajn instruojn kaj laŭŝajne atendadis ian novan regnon. La granda histriono de Palatino eksentis, ke ia ondo da ĝojo invadas liajn miopajn kaj ŝvelruĝajn okulojn. La voĉo de la roma popolo ne povus esti pli bona. La krimintoj certe estas la kristanoj; sur ilin ja devas fali la venĝanta glavo. Li interŝanĝis kun Tigelinus inteligentan rigardon, kvazaŭ dirante, ke ili hazarde kaptis la neantaŭviditan solvon, kaj tuj deklaris al la furiozigiinta popolaĉo, ke li senprokraste faros disponojn, por bridi la ekscesojn kaj puni tiujn, kulpantajn pri la katastrofo; fine, ke tiu brulo estos rigardata kiel krimo kontraŭ la ŝtato kaj sakrilegio, por ke ankaŭ la punoj estu esceptaj.

La popolo freneze ekaplaŭdis, antaŭĝuante la sensaciojn en la cirko kun grimacoj de monstroj kaj kantoj de martiriĝintoj.

La fia akuzo peze efikis sur la disĉiplojn de Jesuo kvazaŭ naŭza ŝarĝo.

La unuaj arestoj fariĝis simile al ia malbeninda plago. Multe da familioj, timante la senkompatajn turment-

antoj, rifuĝis en la tombejon kaj la ĉirkaŭaĵojn de la duone detruita urbo. Oni faradis ĉiaspecajn trouzojn. Sendefendaj junulinoj estis fordonataj, en la karceroj, al la sovaĝa instinkto de monstraj soldatoj. Respektindaj maljunuloj estis kondukataj en la malliberejon en mankatenoj kaj sub bastonoj. Infanoj estis ŝirataj el la patrinaj brakoj ĉe larmoj kaj kortuŝantaj petoj. Disruiniga tempesto trafis la sekvantojn de la Krucumito, kiuj, kun okuloj turnitaj al la ĉielo, submetiĝis al maljustaj punoj.

Neniom valoris por Nerono la saĝaj atentigoj de la noblaj patricioj, kiuj ankoraŭ konservis la tradiciojn pri prudento kaj honesteco. Ĉiuj, kiuj venis al la imperia aŭtoritatulo, altmerite farante justajn proponojn, estis rigardataj kiel suspektindaj, pliakrigante la situacion.

La filo de Agripino kaj liaj helpaj korteganoj decidis, ke oni donu al la popolo la unuan spektaklon en la komenco de Aŭgusto 64, kiel efektivan elmontron de la oficialaj paŝoj kontraŭ la supozitaj aŭtoroj de la abomeninda atenco. La plujaj viktimoj, t.e. ĉiuj arestitoj, venintaj en karceron post la inaŭgura festo, servos kiel ornamento al la estontaj ĝojoj, laŭgrade kiel la urbo povos revestiĝi per la novaj planataj konstruaĵoj. Por tio, oni decidis tuj rekonstrui la Grandan Cirkon. Antaŭ ol kontentigi la bezonojn de la kortego mem, la imperiestro deziris la simpation de la malklera kaj suferanta popolo, nutrante tion, kio povos kontentigi ĝiajn strangajn kapricojn.

La unua buĉado, destinita amuzi la popolan spiriton, havis lokon en grandegaj ĝardenoj, en la ne detruita urboparto, meze en hontindaj orgioj, en kiuj partoprenis la plebo kaj multe da patricioj, kiu sin fordonis al malĉastado kaj libertineco. La festo daŭris sinsekvajn noktojn ĉe la lumo de bonega iluminado kaj la harmonia ritmo de multenombraj orkestroj, kiuj plenigis la aeron per karesaj melodioj. Sur la artaj lagoj glitadis graciaj barkoj, artiste lumprovizitaj. Inter la verdaĵo, favorate de la nokta mallumo, kiun la potencaj torĉoj ne tute sukcesis disbati, ĝissate sin paŝtis la diboĉo. Apud

tiuj festaj esprimoj staris tiuj de la torturo de la kompatindaj kondamnitaj. La kristanoj estis transdonataj al la popolo por tiu puno, kiun ĝi opiniis plej taŭga. Por tio, kun regulaj interspacoj, la ĝardenoj estis plenaj de krucoj, ŝtipoj, skurĝoj kaj multe da aliaj turmentiloj. Imperiaj gvardianoj helpadis tiujn punojn. Ĉe preparitaj ŝtiparoj troviĝis bolantaj akvo kaj oleo, kiel ankaŭ inkandeskaj ferpintaĵoj por ĉiu, kiu volos ilin uzi.

La ĝemoj kaj plorsingultoj de la malfeliĉuloj ironie agordis kun la harmoniaj notoj de la liutoj. Unuj elspiris sian animon ĉe larmoj kaj preĝoj, sub la Mokfajfado de la popolaĉo; aliaj stoike sin donis al la torturo, rigardante al la alta stela ĉielo.

Eĉ la plej esprimpova lingvo estas malriĉa, por vortigi la grandegajn dolorojn de la kristana anaro dum tiuj plej afliktaj tagoj. Malgraŭ la neesprimeblaj turmentoj la fidelaj sekvantoj de Jesuo elmontris al tiu perversa kaj putranta socio la povon de la fido, alfrontante la por ili destinitajn torturojn. Pridemandate en la tribunaloj, en tia tragika momento, ili malkaŝe eldiradis sian fidon al la Kristo Jesuo kaj akceptadis la suferojn humile, por lia nomo. Tia heroeco kvazaŭ ankoraŭ pli incitadis la spiritojn de la bestiginta popolaĉo. Oni elpensadis novajn specojn de torturado. La perverseco ĉiutage prezentadis novajn numerojn el sia venena abundeco de rimedoj. Tamen ŝajnas, ke la kristanojn posedis ia energio malsama ol tiu, konata sur la kampoj de sangoverŝaj bataloj. La nevenkebla pacienco, la potenca fido, la morala rezistokapablo miregigis eĉ la plej kuraĝajn homojn. Ne malmultaj fordonis sin al la ofero, kantante. Ĉe tia granda braveco la improvizitaj turmentistoj ofte timis la misteran venkan povon kontraŭ la morto.

Post tiu aŭgustmonata masakrado, ĉe granda popola entuziasmo, daŭris plu la senhalta persekutado, por ke ne manku la kontingento da viktimoj en la periodaj spektakloj, donataj al la popolo ĝoje pro la rekonstruado de la urbo.

Ĉe tiuj torturoj kaj hekatombo la koro de Paŭlo el Tarso sangadis de doloro. Tiu uragano konfuzis ĉiujn sferojn. La kristanoj el oriento plejparte klopodis por forlasi la batalkampon, al tio devigite de trudaj cirkonstancoj de la privata vivo, sed la maljuna Apostolo, kune kun Petro, malaprobis tian konduton. Escepte de Luko, ĉiuj senperaj kunlaborantoj, konataj detempe de Azio, estis revenintaj. Tamen la eksteksisto, kunsentante al tiuj senhelpaj, nepre volis ilin subteni en tiuj eksterordinaraj afliktaj momentoj. La hejmaj eklezioj silentis. La grandaj salonoj, luitaj en Suburra por la predikoj de la doktrino, estis fermitaj. Al la sekvantoj de la Majstro restis nur unu rimedo, por intervidiĝi kaj sin reciproke konsoli per komunaj preĝoj kaj larmoj, nome la kunvenoj en la forlasitaj katakomboj. Kaj efektive ili ne domaĝis penojn por amase veni al tiuj malgajaj dezertaj lokoj. En tiuj forgesitaj tombejoj ili trovadis la fratan konsolon pri la tragedia momento, kiun ili travivis. Tie ili preĝadis, komentariadis la lumajn instruojn de la Majstro kaj ĉerpatis novajn fortojn por la baldaŭaj atestoj.

Apogite al Luko, Paŭlo el Tarso alfrontadis la nokt-an malvarmon, la densajn ombrojn, la malglatajn vojojn. Dum Simon Petro klopodis sur aliaj kampoj, la eksrabeno iris al la estintaj tomboj, kie li inokulis al siaj afliktitaj fratoj la inspiron de la Dia Majstro, torente fluantan el lia flama animo. La predikoj ofte okazadis malfrue en la nokto, kiam majesta silento tronis super la Naturo. Centoj da disĉiploj aŭskultadis la luman parolon de la maljuna Apostolo, spertante la potencan influon de lia fido. En tiuj sanktaj ejoj la damaska konvertito aliĝadis al la kantoj, kiuj miksiĝis kun doloraj ploroj. La sankta spirito de Jesuo en tiuj momentoj kvazaŭ ŝvebadis super la kapo de tiuj sennomaj martiroj, inspirante al ili ĉielajn esperojn.

Du monatoj estis jam pasintaj post tiu abomeninda festo kaj la movado en la malliberejoj kreskadis kun ĉiu tago. Bruaj memorfesto estis atendataj. Kelkaj riĉaj domoj sur Palatino, rekonstruitaj laŭ moderaj kaj eleg-

antaj linioj, postulis honoradon de la ŝtata povo. La rekonstruado de la Granda Cirko estis tre progresinta. Estis do nepre necese plani decajn festojn. Por tio la karceroj estis plenplenaj; ne mankos personoj por la tragedio. Oni projektis pitoreskajn ludojn de marbataloj kaj, en la cirko, homajn ĉasadojn, kiel ankaŭ la prezentadon de famaj teatraĵoj kun mitologia gusto.

La kristanoj preĝadis, suferadis, atendadis.

Unu nokton Paŭlo direktis al la fratoj sian koran parolon, komentariante la Evangelion de Jesuo. Liaj esprimoj ŝajnis, pli ol iam antaŭe, die inspirataj. La noktaj ventetoj penetris en la funebran kavernon, prilumatan de kelke da bruletantaj torĉoj. La loko estis plena de virinoj kaj infanoj apud multe da viroj, enkovritaj per manteloj.

Post la kortuŝanta prediko, kiun ĉiuj aŭdis kun larmoj, la eksteksisto el Tarso emfaze finis:

– Jes, fratoj, Dio estas pli bela en la tagoj tragediaj. Kiam mallumo minacas la vojon, tiam la lumo estas pli altvalora kaj pura. En ĉi tiuj tagoj de sufero kaj morto, kiam la mensogo renversis la veron kaj la virto estas anstataŭita de la krimo, ni rememoru Jesuon sur la malhonoriga kruco. La kruco havas por ni dian mesaĝon. Ni ne evitigu al ni la sanktan ateston, dum la Majstro, kvankam senmakula, renkontis en ĉi tiu mondo nur silentajn batalojn kaj neesprimeblajn suferojn. Ni ĉerpu al ni forton el la veraĵo, ke lia regno ankoraŭ ne estas el ĉi tiu mondo. Ni altigu nian spiriton ĝis la sfero de lia senmorta amo. La urbo de la kristanoj ne sidas sur la Tero; ĝi ne povus esti tiu Jerusalemo, kiu krucumis la Dian Senditon, nek ĉi tiu Romo, kiu plezuras verŝante la sangon de la martiroj. En ĉi tiu mondo ni estas en la fronto de ia sensanga batalo, klopodante por la eterna venko de la paco de la Sinjoro. Ni do ne esperu ripozi en la loko de laborado kaj de la vivaj atestoj. De la nedetruibla urbo de nia fido Jesuo nin rigardas kaj faciligas nian koron. Ni marŝu al li renkonte per la torturoj kaj doloraj situacioj de perplekseco. De la supro de Kalvario li leviĝis al la Patro;

ni sekvos liajn postesignojn, humile akceptante la suferojn, kiuj pro lia amo estos por ni destinataj...

Aŭdante la profetajn parolojn de la Apostolo, la ĉeestantoj ŝajnis ekstazantaj. Inter tiuj malvarmaj kaj indiferentaj ŝtonoj la samkredantoj sentis sin pli unuigintaj. En ĉiuj rigardoj brilis la certeco pri la spirita venko. En tiuj esprimoj de doloro kaj espero estis la silenta ŝuldiĝo sekvi la Krucumiton ĝis lia Regno de Lumo.

La parolanto faris paŭzon, sentante sin regata de stranga emocio.

En ĉi tiu neforgesebla momento, taĉmento da soldatoj trarompe penetris en tiun medion. La centestro Volumnio, en la fronto de la armitoj, laŭte donis ordonojn, dum la pacemaj kredantoj, surprizite, ŝtoniĝis de teruro.

– En la nomo de Cezaro! – ekkriis la imperia servanto, ĝojegante.

Kaj ordonante al la soldatoj streĉi la rondon ĉirkaŭ la sendefendajn kristanojn, li daŭrigis sian teatrecan blekadon:

– Kaj neniu forkuru! Kiu tion provos, tiu havos hundaĉan morton!

Apogite al fortika bastono, ĉar en tiu nokto Luko ne estis apud li, Paŭlo, rekte starante kaj elmontrante sian moralan energion per firma tono rediris:

– Kial ni forkurus? Ĉu vi ne scias, ke la kristanoj konas la Majstron, al kiu ili servas? Vi estas sendito de ia monda reganto, kiun ĉi tiuj tomboj atendas; ni, ni estas laborantoj de la grandanima kaj nemortema Savinto!

Volumnio lin fikse ekrigardis kun miro. Kiu estas ĉi tiu maljunulo plena de energio kaj batalemo? Malgraŭ la miro, kiun tiu vekis ĉe li, la centestro elmontris sian malkontentecon per ironia rideto. Spite rigardante la eksrabenon per profunde malestimaj okuloj, li diris:

– Bone atentu, kion vi ĉi tie diras kaj faras...

Kaj post ridego li arogante sin turnis al Paŭlo:

– Kiel do vi kuraĝas alfronti la aŭtoritatecon de Aŭgusto? Certe ekzistas fortaj diferencoj inter la im-

periestro kaj la jerusalema krucumito. Mi ne komprenas lian savpovon, kiu forlasas siajn viktimojn en karceroj aŭ ĉe torturoŝtipoj...

Ĉi tiuj vortoj estis traplektitaj per mordanta ironio, sed la Apostolo respondis per sama nobleco de konvinko:

– Vi ne eraras, centestro! La diferencoj estas ja grandegaj! Vi obeas bedaŭrindan kaj malestimindan persekutanton kaj ni laboras por iu savinto, kiu amas kaj pardonas. La romaj administrantoj ventkape povas elpensi kruelaĵojn, sed Jesuo neniam ĉesos nutri la fonton de benoj!

Ĉi tiu respondo elmovis grandan sensacion ĉe la aŭdantaro. La kristanoj aspektis pli trankvilaj kaj fido-plenaj, la soldatoj ne kaŝis la grandegan impreson, kiu ilin posedis. Kvankam rekonante la sentimecon de tiu brava spirito, la centestro ne volis ŝajni malfortanima en la okuloj de siaj subuloj kaj kolere ekkriis:

– Nu, Lucilio: tri bastonbatojn kontraŭ ĉi tiun impertinentan maljunulon!

La soldato alpaŝis al la Apostolo, kiu sin tenis ne konsternita. Ĉe la silenta mirego de la ĉeestantoj la bastono fajfis en la aero kaj plene frapis la vizaĝon al la Apostolo, kiu, eĉ tiel, ne ŝanĝis sian sintenon. La tri batoj estis rapidaj, kaj jen flueto da sango ekruliĝis sur lia ŝirita vizaĝo.

La eksrabeno, al kiu oni antaŭe elprenis la apogiĝilon, iom malfacile tenis sin starante, tamen ne perdante la bravecon, kiu karakterizis lian energian animon. Li rigide ekrigardis siajn turmentantojn kaj firme diris:

– Vi povas vundi nur la korpon. Vi povos ligi al mi la piedojn kaj la manojn, rompi mian kapon, sed miaj konvinkoj estas netuŝeblajn, netrafeblajn por viaj ĉasprocedoj.

Ĉe tia granda sereneco Volumnio apenaŭ ne repaŝis terurita. Li ne povis kompreni tiun moralan energion, kiu leviĝis antaŭ liaj miregantaj okuloj. Li nun ekkredis, ke la kristanoj, senprotektaj kaj sennomaj, posedas ian povon, kiun lia inteligento ne sukcesis atingi. Impresite de tiu kontraŭstaro, li rapide ekaranĝis la vic-

ojn de la kompatindaj persekutatoj, kiuj, humilaj, semhezite lin obeis. La maljuna tarsa Apostolo prenis lokon inter la arestitoj, elmontrante nenian ĉagrenon aŭ ribelon. Atente observante la konduton de la soldatoj, li ekkriis, kiam marŝis tiu amaso da viktimoj kaj turmentantoj ĉe la unua kontakto kun la malvarma nokta roso:

– Ni postulas la plej grandan respekton al la virinoj kaj infanoj!

Neniu kuraĝis ion rediri al ĉi tiu admono, farita per serioza tono. Volumnio mem laŭŝajne obeadis senkonscie la admonojn de tiu viro kun potenco, nevenkebla fido.

La grupo marŝis silente, tra la senhomaj vojoj, kaj alvenis al la Malliberejo Mamertina, kiam la unua eklumo de la matenruĝo strekadis la ĉielon super la horizonto.

Komence ĵetite en malluman korton, ĝis ili estos individue lokitaj en kraditaj kaj naŭzaj apartaĵoj, la disĉiploj de la Sinjoro profitis tiujn malmultajn momentojn por reciproka konsolado, por interŝanĝi edifajn ideojn kaj konsilojn.

Paŭlo el Tarso tamen ne ripozis. Li petis aŭdiencon de la malliberejestro, kio estis prerogativo, konsentita al lia titolo de roma civitano, kaj estis tuj kontentigita. Li tute malkaŝe elvolvis sian doktrinon kaj, impresante la aŭtoritatulon per sia fluanta kaj alloga parolo, insistis pri la paŝoj, koncernantaj lian aferon, petante la ĉeeston de pluraj amikoj, kiel Akacio Domicio kaj aliaj, por ke ili faru deklarojn pri liaj honestaj konduto kaj antecedentoj. La administranto hezitis pri la konvena decido. Li estis ricevinta la formalan ordonon enkarcerigi ĉiujn anojn de societoj, aliĝintaj al la abomenata kaj persekutata kredo. Tamen tiuj ordonoj de pli alta aŭtoritatulo enhavis iajn limigojn, por iamaniere gardi la “humiliores” (*), al kiuj la kortego prezentadis rimedojn por liberiĝo, se nur ili faros ĵuron al Jupitero, forneante la Kriston Jesuo. Ekzameninte la titolojn de Paŭlo kaj

(*) *Humiliores* estis maleminentaj homoj sen ia titolo de socia digno. – *Noto de la Aŭtoro.*

konante per liaj buŝaj informoj la prestiĝajn rilatojn, kiujn tiu povis disponi en la romaj rondoj la direktoro de la Malliberejo Mamertina decidis konsiliĝi kun Akacio Domicio pri tio farenda en tiu afero.

Vokite, por studi tiun demandon, la amiko de la Apostolo tuj venis kaj, post longa interparolo kun la malliberejestro, iris al la enkarcerigito.

Domicio diris al sia bonfarinto, ke la situacio estas tre serioza; ke la estro de la pretoranoj havas plenpovon, por direkti la kampanjon laŭvole; ke oni nepre devas esti plej prudenta; ke, kiel lasta rimedo, restas nur peto al la grandanimeco de la imperiestro, antaŭ kiun la Apostolo devus veni, por sin persone defendi, en la okazo, se estus favore decidita la peticio, kiun li prezentus al Cezaro en tiu sama tago.

Aŭdante ĉi tiujn konsiderojn, la eksrabeno rememoris, ke unu nokton, dum la tempesto, inter Greklando kaj la insulo Melita, li aŭdis la profetan voĉon de kuriero de Jesuo, kiu anoncis, ke li, Paŭlo, iam staros antaŭ Cezaro, sed ne klarigis la motivon de tia okazaĵo. Ĉu ne tiu estas la antaŭvidita momento? Miloj da fratoj estas en karceroj aŭ en ekstrema malespero. Akuzite kiel brulfarintoj, ili ne havis ian firman kaj decideman voĉon, kiu defendus ilian aferon kun la necesa sentimemo. Li ja vidis en Akacio ties interesigon pri lia liberiĝo, tamen tra la delikataj duondiroj montriĝis ia diskreta invito, ke li kaŝu sian kredon antaŭ la imperiestro, en la okazo, se la imperiestra moŝto lin aŭdiencie akceptos. Li komprenis la timon de sia amiko, tamen, en sia animo, li deziris ricevi tiun intervidigon kun Nerono, por al tiu klarigi la altegajn principojn de la Kristanismo. Li fariĝos advokato de siaj persekutataj kaj malfeliĉaj fratoj. Li alfrontos, vizaĝo kontraŭ vizaĝo, la triumfantan tiranecon, li krios por la rebonigo de ties maljusta ago. Se li estos denove arestita, li reiros en la karceron kun la konscienco edifita per la plenumo de sankta devo.

Post nelonga medito pri la oportuneco de tiu rimedo, kiu ŝajnis al li providenca, li insistis ĉe Domicio, ke tiu lin subtenu per la interhelpoj, kiujn la amiko disponos.

La amiko de la Apostolo plej diligente klopodis, por trafi tiun celon. Uzante la prestiĝon de ĉiuj, kiuj vivis kiel subuloj apud la imperiestro, li sukcesis ekhavi la deziratan aŭdiencon, por ke Paŭlo el Tarso sin defendu kiel konvene, per rekta peto al la aŭtoritateco de Aŭgusto.

En la difinita tago li estis inter gardistoj allasita al Nerono, kiu akceptis lin scivola en vastan salonon, kie la imperiestro kutimis kolekti la senfarajn favoratojn de sia krima kaj ekscentra kortego. La persono de la eksrabeno lin ja interesis. Li volis koniĝi kun tiu viro, kiu agigis grandan nombron el liaj intimuloj, por apogi ties apelacion. La ĉeesto de la Apostolo lin forte disrevigis: kian valoron ja povas havi tiu maljunulo kun tia sensignifa kaj skeleta aspekto? Apud Tiĝelinus kaj aliaj malicaj konsilistoj li kun ironio fikse rigardis la personon de Paŭlo. Tiel granda intereso pri tia vulgara ulo estis ja nekredebla. Kiam li ekpensis revenigi la Apostolon en la kerceron, ne aŭdinte ties peton, unu el la korteganoj diris, ke estus konsilinde doni la parolon al Paŭlo, por ke oni taksu ties mensan kadukecon. Nerono, kiu neniam preterlasadis ian okazon, por paradi per siaj artistaj pretendoj, juĝis ĉi tiun proponon bona kaj ordonis al la malliberulo laŭplaĉe paroladi.

Inter du gardistoj la inspirata predikanto de la Evangelio noble levis la kapon, fikse ekrigardis Cezaron kaj la kamaradojn de ties ventkapa akompananaro kaj per firma voĉo ekparolis:

– Imperiestro de la romanoj, mi komprenas la profundan signifon de ĉi tiu horo, kiam mi al vi parolas, apelaciante al viaj sentoj de grandanimeco kaj justeco. Mi ĉi tie turnas min ne simple al ia erarema viro, al iu homa estulo, sed ja al la administranto, kiu devas esti konsciencia kaj justa, al la plej granda el la regantoj en la mondo, homo, kiu, pli bone ol teni la sceptron kaj la kronon de grandega imperio, devas rigardi sin kiel la grandaniman patron de milionoj da infanoj!

La parolo de la maljuna Apostolo resonadis en la salono kvazaŭ ia profunda novaĵo. La imperiestro lin

rigardadis mirante kaj kortuŝite; la kapricema temperamento de Nerono estis impresiĝema por personaj aludoj, en kiuj tronus brilaj figuroj. Rimarkinte, ke li imponas al la negranda aŭdantaro, la damaska konvertito pli kuraĝe daŭrigis:

– Fidante vian grandanimecon, mi klopodis por ĉi tiu neforgesebla horo, por apelacii al via koro, ne sole por mi, sed ankaŭ por miloj da viroj, virinoj kaj infanoj, kiuj suferas en la karceroj aŭ pereas en la cirkoj de torturoj. Mi ĉi tie parolas en la nomo de tiu nealkulebla multego da suferantoj, kun malvarma krueleco persekutataj de favoratoj de via kortego, kiu devus konsisti el honestaj kaj humanaj sinjoroj. Ĉu al viaj oreloj ne venas la angoraj lamentoj de vidvinoj, maljunuloj kaj infanoj? Ho Aŭgusto, reganta sur la trono de Klaŭdio, eksciu, ke ondo da malicaĵoj kaj abomenaj krimoj balaas la kvartalojn de la imperia ĉefurbo, eltirante dolorajn plorsingultojn al viaj kompatindaj zorgatoj! Apud viaj reglaboroj certe rampas plej danĝeraj vipuroj, kiujn oni devas mortigi por la trankvileco kaj honesta laborado de via popolo. Tiuj malicaj kunhelpantoj deklinas viajn penojn for de la rekta vojo, dissemas teruron ĉe la klasoj, nefavoritaj de la sorto, minacas la pli malfeliĉajn! Tio estas ili, kiuj akuzas la konfesantojn de doktrino de amo kaj elaĉeto. Ne kredu la trompon de iliaj konsiloj, kiuj elspiras kruelecon. Eble neniu klopodis tiel, kiel la kristanoj, por helpi al la viktimoj de la konsumanta brulego. Dum la nobelaj patricioj forkuradis de Romo ruinigata, dum la plej timemaj rifuĝis en la plej ŝirmitajn lokojn, la disĉiploj de Jesuo trakuradis la flamantajn kvartalojn, malakrigante la suferadon de la malfeliĉaj viktimoj. Kelkaj oferis sian vivon al la honoriga altruismo, sed fine, vidu, la sinceraj laborantoj de la Kristo ricevis de monstraj kalumniantoj kiel rekompencon la nigrigan nomon de aŭtoroj de la abomeninda krimo. Ĉu via konscienco ne doloris, kiam vi subtenis tiajn fiajn asertojn, sen ia senpartia kaj rigora enketo? En la ŝaŭmado de la kalumnioj mi aŭdis nenian voĉon, kiu klarigus al vi la aferon. Mi supozas, ke vi estas implik-

ita en tiaj tragediaj iluzioj, ĉar mi ne kredas la kripligon de via aŭtoritateco, destinita al la plej bonaj decidoj favore por la Imperio. Tial, ho imperiestro de la romanoj, rekonante la grandiozan povon en viaj manoj, mi kuraĝas laŭte sonigi mian voĉon, por via plena informiĝo. Atentu la gloran amplekson de viaj devoj. Ne cedu al la rabio de senkonsciencaj kaj kruelaj politikistoj. Memoru, ke en iu vivo pli alta, ol ĉi tiu, oni postulos de vi kalkulojn pri via konduto en la ŝtataj aferoj. Ne nutru la pretendon, ke via sceptron estas eterna. Vi estas delegito de iu potenca Sinjoro, kiu loĝas en la Ĉielo. Por konvinkiĝi pri la specialeco de tia situacio, nur ekrigardu la nebulan pasintecon. Kio fariĝis viaj antaŭirintoj? Tra viaj luksaj palacoj paŝadis venkintaj militistoj, improvizitaj reĝoj, heredintoj fieraj pri siaj tradicioj. Kie tiuj estas? La historio sciigas nin, ke ili suriris la tronon ĉe la deliraj aplaŭdoj de la popolamasoj. Ili venis malhumilaj, dekretante la morton de la malamiko, ornamitaj per la sangoplenaj restaĵoj de la viktimoj, tamen sufiĉis blovo por tio, ke ili ekglitis de la brilego de trono en la mallumon de tombo. Unuj forpasis pro la fatalaj sekvoj de siaj detruaj eksceso mem; aliaj, murдите de la infanoj de la ribelo kaj mal-espero. Rememorigante tian situacion, mi intencas, ne aliigi la kulton al la vivo en kulton al la morto, sed ja montri, ke la plej granda riĉeco de homo estas la paco de la konscienco pro la plenumita devo. Pro ĉiuj ĉi motivoj mi apelacias al via grandanimeco, ne sole por mi, sed ankaŭ por ĉiuj niaj samkredanoj, ĝemantaj en la senlumeco de la karceroj, atendante la glavon de la morto.

Nun, dum la longa paŭzo, kiun faris la elokventa parolanto, povis vidiĝi la stranga sensacio, kiun naskis lia diskurso. Nerono estis palega. Tigelinus, treege incitiginta, serĉis ian rimedon, por duondiri iun malpli dignan an rimarkon pri la petanto. La tre malmultaj korteganoj, tie troviĝantaj, vidigis la neesprimeblan emocijon, kiu afekciis ilian nervan sistemon. La amikoj de la estro de la pretoranoj montriĝis indignantaj, ruĝiĝintaj de kolero. Aŭdinte unu el la korteganoj, la imperiestro

ordonis, ke la petanto sin tenu silente, ĝis li faros la unuajn decidojn.

Ĉiuj estis poseditaj de mirego. De iu senforta, malsana grandaĝulo oni ne povis atendi tian konvinkpovon, ian sentimecon, kiu ĝislimis frenezon laŭ la pensamano de la patricioj. Pro multe malpli grava kulpo maljunuloj kaj honestaj konsilistoj de la kortego estis ekzilitaj aŭ kondamnitaj al morto.

La filo de Agripino ŝajnis afekciita. Li jam ne almetadis al la okulo la impertinentan smeraldon kvazaŭ monoklon. Li havis la impreson, kvazaŭ li aŭdis nigrajn profetaĵojn. Maŝine li gestadis, kiel al li propre, kiam io lin absorbis aŭ trafis liajn nervojn. La admonoj de la Apostolo penetris en lian koron, ties vortoj kvazaŭ por ĉiam resonos en liaj oreloj. Tiĝelinus rimarkis la delikatecon de la situacio kaj alproksimiĝis.

– Dia Cezaro – per voĉo apenaŭ aŭdebla kaj sklavaĉe flustris la estro de la pretoranoj –, se vi volos ĉi tiu fiulo povos morti ankoraŭ hodiaŭ, ĉi tie...

– Ho ne, ne – rediris Nerono kortuŝita –, ĉi tiu viro estas el la plej danĝeraj, kiajn mi ĝis hodiaŭ renkontis. Neniu, kiel li, kuraĝis komentarii la nunan situacion per tiaj esprimoj. Kvazaŭ gardantojn de la parolo, mi vidas multe da eble eminentaj personoj, kiuj, kuniginte potenciajn elementojn, povus fari al mi grandan malbonon.

– Mi konsentas – diris la interparolanto hezitante, tre mallaŭte.

– Tiel do – prudente daŭrigis la imperiestro –, oni devas ŝajni grandanima kaj sagaca. Mi por momento lin pardonos, rekomendante, ke li ne foriru de la urbo, ĝis plene klariĝos la situacio de la sekvantoj de la Kristanismo...

Tiĝelinus aŭskultadis lin kun angora rideto, kaj la filo de Agripino finis, flustrate:

– Vi tamen sekvu ĉiujn liajn paŝojn, tenadu lin kaŝe gardata, kaj kiam ni festos la restarigon de la Granda Cirko, ni uzos la okazon, por ekspedi lin en ian malproksiman lokon, kie li devos por ĉiam malaperi.

La abomeninda pretoranestro ridetis kaj diris:

– Neniu pli bone solvus ĉi tiun malfacilan demandon.

Post ĉi tiu nelonga konversacio, neaŭdebla por la ceteraj ĉeestantoj, Nerono deklaris, forte surprizante la korteganojn, ke li konsentas al la apelaciinto la libercon, por kiu tiu pledis en sia unua defendo, sed prokrastas la absolvon ĝis tiam, kiam oni definitive konkludos pri ia respondeco de la kristanoj. Tiel do la defendanto de la Kristanismo povos libere restadi en Romo, sed ligita al la ŝuldiĝo ne foriĝi de la sidejo de la Imperio, ĝis lia persona afero estos sufiĉe klarigita. La estro de la pretoranoj skribis la verdikton sur pergameno. Siaflanke, Paŭlo el Tarso estis rekuraĝigita kaj ĝojega. La ruza monarko ŝajnis al li ne tiel malbona, eĉ inda je amikeco kaj danko. Li sentis sin posedita de granda ĝojo, ĉar la rezultatoj de lia unua defendo estis tiaj, ke ili havigas novajn esperojn al liaj samkredanoj.

Paŭlo reiris en la karceron kaj la administranto ricevis oficialan noton pri la lastaj disponoj al li rilataj. Nur tiam oni lin liberigis.

Kun granda espero li serĉis siajn amikojn, sed ĉie aŭdis nur senkuraĝigajn informojn. La plej multaj el liaj pli intimaj kaj servemaj kunlaborantoj estis malaperintaj, arestitaj aŭ mortintaj. Multaj forkuris, timante la ekstreman oferon. Fine tamen li havis la plezuron denove renkonti Lukon. Tiu pia kuracisto informis lin pri la doloraj kaj tragediaj okazaĵoj, kiuj ĉiutage fariĝadis. Ne sciante, ke soldato sekvas lin de malproksime, por lokalizi lian novan loĝejon, Paŭlo, akompanata de sia amiko, venis al malriĉa domo en la ĉirkaŭaĵo de la Pordego Kapena. Bezonante ripozi kaj revigligi la senfortiĝintan korpon, la maljuna predikanto iris al du noblaj kredantoj, kiuj lin ĝojege akceptis: tiuj estis la geedzoj Lino kaj Klaŭdia, fervoraj servantoj de Jesuo.

La Apostolo al nacioj enloĝiĝis en tiu malriĉa hejmo, devante iri al la Malliberejo Mamertina ĉiun trian tagon, ĝis definitive klariĝos lia situacio.

Malgraŭ la konsolo, kiun li ĝuis, la respektinda amiko de la nacioj havis strangajn antaŭsentojn. Iafaĵe

mirigis lin mem, ke li meditas pri la kronado de sia apostola laborado, kvazaŭ jam nenio al li restus, krom morti por Jesuo. Tiajn pensojn li penadis forpeli de si, por bataladi plue por la dissemado de la evangeliuj instruoj. Pro sia organisma kadukeco li ne povis plu iri al la predikado en la katakomboj, sed uzis la amikan kaj sindonan helpadon de Luko por tiuj epistoloj, kiujn li opiniis necesaj. Inter ĉi tiuj enviciĝas la lasta letero, kiun li skribis kaj sendis al Timoteo per du amikoj, kiuj forveturis Azion. Paŭlo skribis ĉi tiun lastan dokumenton al la tre amata disĉiplo, posedite de nedifinebla emocio, kiu plenigis al li la okulojn per abundaj larmoj. Lia nobla animo deziris konfidi al la filo de Eŭnike siajn lastajn disponojn, sed li bataladis kun si mem, por ne konfesi sian malvenkon. Skribante elkorajn vortojn, la eksrabeno sentis sin kvazaŭ ia disĉiplo, vokita al pli altaj sferoj, sed ne povanta forlasi sian kondiĉon de homo, kiu ne deziras kapitulaci en la batalado. Samtempe kiel li konfidis al Timoteo sian konvinkon, ke li finis sian karieron, li petis tiun sendi lian vastan ledmantelon, kiun li lasis en Troas ĉe Karpo, ĉar li bezonis ian ŝirmilon por la senforta korpo. Konigante al la amiko siajn lastajn impresojn, plenajn de prudento kaj amo, li petis ties klopodon, ke Johano Marko venu al la sidejo de la Imperio, por helpi lin en la apostola laborado. Kiam lia tremanta kaj faltoplana mano melankolie skribis: “Nur Luko estas kun mi” (*), la konvertito apud Damasko haltis, plorante super la pergamenfolioj, sed en tiu momento li eksentis, ke karesas lian kapon iaj malpezaj flugiloj. Milda konsolo ekposedis lian amplenan kaj bravan koron. Ĉe ĉi tiu loko de la letero li rekuraĝiĝis kaj denove elmontris batalemon, kaj finis per la rekomendoj, koncernantaj la bezonojn de la materia vivo kaj liajn evangeliajn laborojn.

Paŭlo el Tarso donis la leteron al Luko, por ĝin ekspedi, sed ne sukcesis kaŝi siajn funebrajn antaŭsentojn. Vane la karesema kuracisto kaj sindona amiko pen-

(*) Dua Epistolo al Timoteo, 4:11. – *Noto de la Aŭtoro.*

is forbati tiujn zorgojn; senutile Lino kaj Klaŭda provis lin distri.

Kvankam li ne forlasis la laborojn konformajn al la nova situacio, la maljuna Apostolo dronis en profunda meditado, el kiu li eliris, nur por kontentigi la ordinarajn bezonojn.

Efektive, kiam pasis kelke da semajnoj post tiu letero al Timoteo, armita grupo vizitis la loĝejon de Lino post noktomezo, en la antaŭtago de la grandaj festoj, per kiuj la ŝtata administrantaro deziris signigi la rekonstruon de la Granda Cirko. La domomastro, lia edzino kaj Paŭlo el Tarso estis arestitaj; saviĝis Luko, ĉar li tranoktis aliloke. La tri viktimoj estis kondukitaj en karceron sur la monteto Eskvilino, atestante potencan fidon ĉe la komenciĝanta martirigo.

La Apostolo estis ĵetita en malluman ĉelon, povante komunikiĝi kun neniu. La soldatoj mem ektimis ĉe lia kuraĝo. Adiaŭante Linon kaj ties edzinon, dum ĉi tiu abunde ploradis, la brava predikanto ilin brakumis, dirante:

– Ni estu kuraĝaj. Ĉi tio kredeble estas la lasta fojo, ke ni nin reciproke salutas per la materiaj okuloj, sed ni ja revidiĝos en la regno de la Kristo. La tirana povo de la Cezaro atingas sole nur la mizeran korpon...

Laŭ formala ordono de Tiĝelinus la malliberulo estis izolita for de ĉiuj siaj kamaradoj.

En la senlumeco de la karceri, kiu aspektis kvazaŭ ia malseketa kaverno, li faris retrospektivan ekzamenon de ĉiu faroj dum sia vivo kaj fordonis sin al Jesuo, plene fidante lian dian favorkorecon. Li sincere ekdeziris resti apud siaj fratoj, kiuj certe estis destinitaj por la morgaŭaj fiaj spektakloj, esperante kun ili dividi la kronon de la martiroj, kiam sonos la ekstrema horo.

Li ne povis dormi, konsiderante la horojn, pasintajn de la momento de lia aresto, kaj konvinkiĝis, ke la tago de la ofero estas ne malproksime. Eĉ ne radieto da lumo penetris la naŭzan malvastan ĉelon. Li perceptis nur iajn forajn malprecizajn murmurojn, kiuj ŝajnis al li kvazaŭ kolektiĝo de homoj sur la stratoj. La horoj tren-

iĝadis en laŭŝajne senfina atendado. Post angora laceco li sukcesis havi iom da horoj da dormo; kiam li vekigis, li ne kapablis kalkuli, kiom da horoj forpasis. Li estis soifa kaj malsata, sed fervore preĝis kaj eksentis, ke el la fontoj de la nevidebla providenco fluadas dolĉa konsolo por lia animo. En sia koro li maltrankviliĝis pri la situacio de siaj kamaradoj. Unu gardisto informis lin, ke grandega nombro da kristanoj estos kondukita en la cirkon, kaj li suferis, ĉar li ne estis vokita, por morti pro Jesuo kune kun siaj fratoj en la areno de la martiriĝo. Dronante en ĉi tiuj konsideroj, li post nelonge eksentis, ke iu singarde malfermas la pordon de la karcero. Kondukite eksteren, la eksrabeno ekvidis antaŭ si ses armitajn virojn, kiuj lin atendis apud granda veturilo. Malproksime, sur la horizonto punktita per steloj, pentriĝis la mirindaj tonoj de la baldaŭa aŭroro.

La Apostolo silente obeis la ekskorton. Liajn kalajn manojn ili brute ligis per maldelikataj ŝnuroj. Unu noktogardisto, videble ebria, alproksimiĝis kaj sputis sur lian vizaĝon. La eksrabeno rememorigis al si la suferojn de Jesuo kaj ricevis tiun insulton, farante nenian geston de ofendita memestimo.

Ĉe ankoraŭ unu ordono li prenis lokon en la veturilo apud la ses armitoj, kiuj lin observadis, mirante tiajn grandajn serenecon kaj bravecon.

La ĉevaloj ektrotis vigle, kvazaŭ dezirante moderigi la humidan malvarmecon de la mateno.

Kiam ili venis al la tombejoj, kiuj sekvis unu alian laŭlonge de la Vojo Appia, la nokta ombro preskaŭ tute disfandiĝis, anoncante tagon kun radiluma suno.

La militisto, kiu komandis la eskorton, ordonis haltigi la veturilon kaj, eliriginte la malliberulon, hezite diris al li:

– La estro de la pretoranoj, laŭ verdikto de Cezaro, ordonis, ke vi estu ekzekutita en la tago, sekvanta tiun, kiam mortis la kristanoj, difinitaj por la festoj de la cirko, hieraŭ okazintaj. Vi do sciu, ke vi travivas viajn lastajn minutojn.

Trankvila, kun brilantaj okuloj kaj ligitaj manoj, Paŭlo el Tarso, ĝis tiam silenta, diris, mirigante la turmentantojn per sia majesta sereneco:

– Mi deklaras mian ekscion pri la krima tasko, kiun koncernas vin plenumi... La disĉiploj de Jesuo ne timas la turmentantojn, ĉar tiuj povas neniigi nur la korpon. Ne pensu, ke via glavo povos estingi al mi la vivon, ĉar, travivante ĉi tiujn forpasantajn minutojn en karna korpo, mi do estas senprokraste penetrona en la sanktejojn de la vivo eterna kun mia Sinjoro Jesuo Kristo, tiu sama, kiu prenos kalkulojn de vi, kiel ankaŭ de Nerono kaj de Tiĝelinus!

La malica taĉmento estis konsternita de mirego. Tiu morala energio en la ekstrema momento skuus eĉ la plej fortajn. Rimarkinte la perpleksecon de ĉiuj kaj skrupule observante sian komision, la eskortestro prenis sur sin fari la ekzekuton. Liaj subuloj ŝajnis konsternitaj, nervaj, tremantaj. La decidema komisiito de Tiĝelinus ordonis do al la malliberulo antaŭeniĝi dudek paŝojn. Paŭlo el Tarso ekmarŝis serene, kvankam, en la koro, rekomendante sin al Jesuo, komprenante la bezonon de spirita subteno por la plej granda atesto.

Sur la difinita loko la sendito de Tiĝelinus elingigis la glavon, sed, en ĉi tiu momento, lia mano ekstremitis, kiam li fikse ekrigardis sian viktimon, kaj li diris apenaŭ aŭdeble:

– Estas al mi dolore, ke mi estas komisiita por ĉi tiu tasko, kaj en la koro mi ne povas min deteni bedaŭri vin...

Levante la kapon, tiom, kiom por li eble, Paŭlo el Tarso senhezite rediris:

– Mi ne estas inda je bedaŭro. Prefere kompatu vin mem, ĉar mi mortos, plenumante sanktajn devojn en strebado al vivo eterna, dum vi ankoraŭ ne povas eviti la maldelikatajn devojn de la pasema vivo. Ploru pri vi, ja pri vi, ĉar mi, mi foriros al la Sinjoro de Paco kaj Vero, kiu donas vivon al la mondo, dum vi fininte vian sangotaskon, devos reveni al la naŭza kunevivado de la ordonantoj de mallumaj krimoj de via tempo!

La ekzekutonto ĉiam ankoraŭ lin rigardadis kun mirego, sed Paŭlo, rimarkinte la tremadon, kun kiu li tenas la glavon, decideme instigis:

– Ne tremu! Plenumu vian devon ĝis la fino!

Fortega frapo vundis lian gorĝon, preskaŭ tute fortranĉante la maljunan kapon, kiu blankiĝis ĉe la suferoj de la mondo.

Paŭlo el Tarso peze falis, eldirinte eĉ ne unu vorton. La senviva korpo buliĝis sur la tero kiel ia malbelega kaj senutila restaĵo. La sango torente elfluadis ĉe la lastaj kuntiriĝoj de la rapida agonio, dum la eskorto, konsternita, muta, reen ekmarŝis en la triumfa matena lumo.

La brava disĉiplo de la Evangelio sentis la aflikton de la lastaj fizikaj reefikoj, sed iom post iom ekspertis ian mildan sensaĵon de revigliga faciligo. Ŝajnis al li, kvazaŭ iaj karesantaj kaj helpemaj manoj lin delikate tuŝas kaj, ĉe tiu sola dia kontakto, forviŝas la teruran impreson de liaj amaraj suferoj. Surprizite, li rimarkis, ke oni lin transportas malproksimen, kaj pensis, ke grandanimaj amikoj deziras lin helpi en iu pli oportuna loko, por ke ne manku al li la dolĉa konsolo de la kvieta morto. Post kelke da minutoj la doloroj estis tute malaperintaj. Sub la impresoj, ke li troviĝas en la ombro de ia foliriĉa kaj amika arbo, li ĝuadis la karesadon de matenaj ventetoj, kiuj malvarmete preterblovas. Li provis stariĝi, malfermi la okulojn, ekkoni la ĉirkaŭaĵon: ne eble! Li sentis sin senfortiĝinta, simila al resaniĝanto de longa kaj tre serioza malsano. Li kiel eble kolektis siajn mensajn fortojn kaj ekpreĝis, petegante Jesuon permesi la prilumadon de lia animo en tiu nova situacio. Precipe la nevidado dronigis lin en premanta atendo. Li rememoris tiujn tagojn en Damasko, kiam la blindeco invadis liajn okulojn de pekulo, senvidigitajn de la glora lumo de la Majstro. Li rememoris la fratan korecon de Ananias kaj ekploris sub la influo de tiuj rememoroj. Post granda penado li sukcesis leviĝi kaj konsideris, ke la homo devas servi al Dio, eĉ se li palpas en densa mallumo.

Tiam li aŭdis paŝojn de iu, kiu facile alproksimiĝas. Subite venis al li en la kapon tiu neforgesebla tago, kiam li estis vizitita de la sendito de la Kristo, en la gastejo de Judas.

– Kiu vi estas? – li demandis tiel, kiel iam, ĉe tiu neforgesebla travivaĵo.

– Frato Paŭlo... – ekparolis la ĵusveninto.

Rekoninte tiun amatan voĉon, la Apostolo al naci-anoj interrompis lin, ekkriante kun neesprimebla ĝojego:

– Ananias! Ananias!

Kaj li falis sur la genuojn, konvulsie plorante.

– Jes, estas mi – diris la respektinda estulo, metante la luman manon sur lian kapon. – Unu tagon Jesuo ordonis, ke mi redonu al vi la vidadon, por ke vi povu koni la malglatan vojdon de liaj disĉiploj, kaj hodiaŭ, ho Paŭlo, li konsentis al mi la feliĉon malfermi viajn okulojn por la rigardado al la vivo eterna. Leviĝu! Vi jam venkis la lastajn malamikojn, vi ricevis la kronon de la vivo, vi atingis aliajn sferojn de la Elaĉeto!

La Apostolo stariĝis, dronante en larmoj de ĝojanta danko, dum Ananias, metante la dekstran manon sur liajn estingiĝintajn okulojn, milde ekkriis:

– Vidu denove, en la nomo de Jesuo! Detempe de la revelacio apud Damasko vi dediĉis la okulojn al la servado al la Kristo; ekrigardu nun la belaĵojn de la vivo eterna, por ke ni ambaŭ povu ekflugi renkonte al la amata Majstro.

Tiam la sindona laboranto de la Evangelio ekvidis la mirindaĵojn, kiujn Dio destinas por ĝiaj laborantoj en la ombroplena mondo. Miregante, li rekonis la ĉirkaŭaĵon. Ne malproksime troviĝis la katakomboj ĉe la Vojo Appia. Misteraj fortoj estis forigintaj lin de la malgaja sceno, kie putradis liaj sangaj restaĵoj. Li sentis sin juna kaj feliĉa. Li nun komprenis la grandecon de la spirita korpo en medio fremda al la surteraj organismoj. Liaj manoj jam ne havis faltojn, lia haŭto estis libera de cikatroj. Li havis la impreson, kvazaŭ li sorbis ian misteran eliksiron de la juneco. Radilume blanka tuniko envolvis lin kun graciaj ondoj. Kiam li apenaŭ vekigis

el sia raviteco, jen iu faciluŝe frapis lian ŝultron: tio estis Gamaliel, kiu venis por frata kiso. Paŭlo el Tarso sentis sin la plej feliĉa el la estuloj. Brakumante kune la maljunan instruanton kaj Ananiason, per unu sola elkora ekmovo, li ekkriis kun larmoj:

– Nur Jesuo povus konsenti al mi tian ĝojon, kiel ĉi tiu!

Kiam li apenaŭ ĉi tion diris, jen komencis alveni malnovaj kamaradoj el la surteraj luktoj, iamaj amikoj, sindonaj fratoj, kiuj venis lin saluti ĉe lia transpaŝo de la sojlo de la eterneco. La raviĝoj de la Apostolo senhalte sekvis unu post alia. Kvazaŭ ili restus en Romo, atendante lin, ĉiuj martiroj ĉe la hieraŭaj festoj alvenis, kantante apud la katakomboj. Ĉiuj deziris brakumi la noblan disĉiplon, kisi liajn manojn. Tiam, donante la impreson, ke ĝi naskiĝas el iaj mirindaj fontoj de la transaĵo, aŭdiĝis karesa melodio, akompanata de arĝentosonaj voĉoj, kiuj certe estis de anĝeloj. Miregante la belecon de tiu komponaĵo, nevertigebla en homa lingvo, Paŭlo aŭdis la respektindan amikon el Damasko, kiu komplezeme klarigis:

– Ĉi tio estas la himno de la liberiĝintoj!

Rimarkante lian intensan emocion, Ananias demandis, kia lia unua deziro en la sfero de la elaĉetitoj. Paŭlo el Tarso, en si mem, ekpensis pri Abigail kaj la sanktaj aspiroj de sia koro, kiel farus ĉiu homo, sed nun, okupante sin nur pri la dia servado, kiu ordonas forgesi ĉiajn, eĉ la plej simplajn kapricojn, kaj ne perfidante la dankemon al la favorkoreco de la Kristo, li kortuŝite respondis:

– Mia unua deziro estus revidi Jerusalemon, kie mi faradis tiom da malbono, kaj tie preĝi al Jesuo, por prezenti al li mian dankon.

Tuj kiam li tion diris, jen la luma anaro ekmoviĝis. Miregante la flugpovon, Paŭlo rimarkis, ke nun distancoj signifas nenion por lia spirita kapableco.

De pli alte ĉiam ankoraŭ fluadis plej belaj harmonioj. Tio estis himnoj, glorantaj la feliĉon de la laborantoj venkintaj kaj la favorkorecon de la benoj de la Ĉiopova.

Paŭlo deziris alkonformigi tiun ravan iradon al siaj rememoroj. Por tio la grupo laŭiris la Vojon Appia ĝis Arisio, de kie ĝi turniĝis direkte al Puteoli, en kies eklezio ĝi preĝis dum kelke da minutoj da senkompara feliĉo. De tie la spirita karavano iris al la insulo Melita, poste al Peloponezo, kie Paŭlo raviĝis ĉe la rigardado al Korinto, donante liberan kuron al karesaj kaj dolĉaj rememoroj. Flamante de frata entuziasmo, la ceteraj ekskursantoj akompanadis la bravan disĉiplon sur la vojo de la sanktaj rememoroj, vibrantaj en lia koro. Ateno, Tesaloniko, Filipi, Neapolis, Troas kaj Efeso estis lokoj, kie la Apostolo longe haltadis, preĝante en larmoj de danko al la Plejaltulo. Trafluginte la regionojn de Pamfilio kaj Kilikio, ili kun ĝojo kaj sankta respekto eniris en Palestinon. Sur ĉiuj vojoj aliĝis senditoj kaj laborantoj de la Kristo. Paŭlo ne sukcesis taksi la ĝojon de lia veno al Jerusalemo sub la belega blua tono de la krepusko.

Akceptinte la proponon de Ananias, ili kolektiĝis sur la supro de Kalvario kaj tie kantis himnojn de espero kaj lumo.

Rememorante la erarojn de sia nigra pasinteco, Paŭlo el Tarso genuiĝis kaj direktis al Jesuo varman peton. La elaĉetitaj kunuloj enmemiĝis, dum li, ekstaze, en larmoj, penis formuli sian dankon al la Dia Majstro. Tiam sur la tolo de la senlima spaco pentriĝis eksterordinare bela bildo. Kvazaŭ ŝirinte la nemezureblan bluan volbon, jen ekaperis, en la vasteco de la firmamento, ia luma vojo kaj tri figuroj, kiuj alproksimiĝis, disradiante fortan brilon. La Majstro okupis la mezon, akompanata de Stefano dekstre kaj de Abigail sur la flanko de la koro. Miregante, ravite, la Apostolo povis nur etendi la brakojn, ĉar la voĉo estingiĝis ĉe la apogeo de la emocio. Abundaj larmoj perlis sur lia vizaĝo, en grandioza ekstazo. Abigail kaj Stefano alpaŝis al li. Ŝi, obeante impulson de la koro, delikate ekprenis liajn manojn, dum Stefano lin varme brakumis.

Paŭlo ekvolis ĵeti sin en la brakojn de la du fratoj el Korinto, kisi iliajn manojn en sia feliĉego, sed, simile

al obeema infano, kiu ĉion ŝuldas al sia sindona kaj bona instruanto, li serĉis la rigadon de Jesuo, por senti lian aprobon.

La Majstro indulgeme kaj bonkore ridetis kaj parolis:

– Jes, Paŭlo, estu feliĉa! Nun venu en miajn brakojn, ĉar estas laŭ la volo de mia Patro, ke turmentantoj kaj martiroj por ĉiam kolektiĝu en mia regno!

Kaj tiele kune, feliĉaj, la fidelaj laborantoj de la elaĉetanta Evangelio sekvis la paŝosignojn de la Kristo, direkte al la sferoj de Vero kaj de Lumo...

Malsupre en la forajo Jerusalema ravite rigardadis la vesperan krepuskon, atendente la lunlumon, kiu ne malfruos kun siaj unuaj ekbriloj.

FINO

G L O S A R O

Mi ĉi tie prezentas proprajn nomojn, uzitajn en ĉi tiu traduko, sed ne ĉiujn. Kelkajn mi trovis nenie, tial mi devis ilin forĝi; tiujn, kiel ankaŭ tiujn en la Nova Testamento, en la Malnova Testamento kaj komunuzajn, mi ĉi tie ne registras escepte de iaj nemultaj. Kelkajn mi prezentas, kvankam ili estas konataj, jam ekzistantaj en la literaturo de Esperanto, sed ĉu por komparo kaj debato pri formoj, ĉu por instruigo de la leganto.

ALBALONGO. Nomo, kiun oni vidas en “Quo Vadis”, de la fama antikva urbo de Latio, konkuranto de Romo. En la “Enciklopedia Vortaro”, de Wüster, kaj en la “Grand Dictionnaire Esperanto-Français”, de Prof. G. Waringhien, oni vidas simple “Albo”.

ANTIUM. Antikva urbo en Latio. En la Esperanta traduko de “Quo Vadis” ankaŭ “Antium”.

CARINAE. Pron. “karine”. Latina nomo de strato en la antikva Romo. Ankaŭ tiel en “Quo Vadis”.

CESTRO. Lat. *Cestros*, gr. *Kestros*. Rivero de Pisidio, Malgrand-Azio, trafluanta ankaŭ Pamfilion. Hodiaŭ nomata de unuj “Aksu”, de aliaj “Karahissar”.

CITIUM. Lat. *Citium*. Urbo de Kipro.

EŬNIKE. El la gr. *Euneike* aŭ *Eunike*. En la latinlingvaj surskriboj *Eunica*. En II Timoteo, 1:5, *Eŭnike*, tial mi preferis ĉi tiun; tamen en “Quo Vadis” *Eunice*.

KALOI-LIMENES. Greka nomo, signifanta “Belaj Havenoj”, kaj tiel en Agoj, 27:8. La Vulgato skribas *Boniportus*.

Hodiaŭ konata kiel “Kalo-Limniones”. Golfeto kaj haveno de la insulo Kreto. Mi preferis restigi la nomon, kiun al ĝi donis la Aŭtoro.

MAMERTINA MALLIBEREJO. Lat. *Carcer Mamertinus*. En “Quo Vadis” *Mamertina malliberejo*; en “Pabiola” *Mamertena Karcer*. La formo, kiun mi nun alprenis, estas tiu sama, kiun mi proponis en mia traduko “Antaŭ du mil jaroj. . .”, portugallingva verko ankaŭ de Emmanuel.

NEA-PAFOS. Ekzistis iu “Pafos”, kiu estis forlasita, kaj tiam oni konstruis novan urbon, 15 km malproksime de la unua. Tiun “novan” la Aŭtoro nomas *Nea-Pafos*, kiu estas ja la konata “Pafos”. Eble ni povus ĝin nomi en Esperanto “Nov-Pafos”, simile al “Nov-Jorko”, “Nov-Zelando” k.a.

ORONTO. Rivero de Sirio, hodiaŭ nomata Aassi. Lat. kaj gr. *Orontes*; en “Quo Vadis” *Oronto*.

PALMIRA. Urbo de Sirio, proksima al Dezerta Arabujo. El la gr. *Palmyra*, lat. *Palmyra, Palmira*. Oni diras, ke la sirianoj nomas ĝin “Tadmor” kaj la grekoj “Palmyra”. En I Reĝoj, 9:18, II Kronikoj, 8:4, k.a. estas citita iu “Tadmor”; en Jeĥezkel, 47:19 oni legas “Tamar”.

POPEA SABINA. Lat. *Poppaea Sabina*; en “Quo Vadis” *Sabina Poppaea*. Mi preferis “Popea” laŭ Kabe, en sia “Unua Legolibro”. Kabe ne citas la duan nomon de la fama korteganino, tial ĝi povus ja esti “Sabina”.

PORDEGO KAPENA. Lat. *Porta Capena*; ĉi tiun latinan formon oni vidas en “Quo Vadis” kaj en la “Unua Legolibro”, de Kabe. Mi preferis traduki: “Porta” estus “Pordego” (ne, ĝustadire, “Pordo”), kaj faciligi la prononcon: “Kapena”.

PORDEGO LAVERNAL. El la lat. *Porta Lavernalis*.

SARONA GOLFO. Lat. *Saronicus sinus*. Hodiaŭ nomata “Egina golfo”, inter Peloponezo kaj Atiko. “Saron” estas, ŝajnas, la nomo de iu reĝo aŭ rivero, aŭ de ambaŭ.

SUBURRA. Lat. *Subura* aŭ *Suburra*, antikva malbonfama kvartalo en Romo. Ankaŭ *Suburra* en “Quo Vadis” kaj “Fabiola”.

TRASTEVERE. Ankaŭ “Transtevere”: italaj nomoj de la lat. *Transtiberium*. Unu el la dek kvar regionoj, en kiujn Aŭgusto dividis Romon, sed neniam aparteninta al la “urbs” mem. En “Quo Vadis” *Transtibro*, traduko, kiun mi aprobas; mi tamen preferis restigi la nomon, kiun al ĝi donis la Aŭtoro.

VOJO APPIA. Lat. *Appia via*. En “Quo Vadia” *Via Appia* kaj *Appia vojo*. Mi preferis la formon, kiun oni vidas en la “Unua Legolibro”, de Kabe.

VOJO NOMENTANA. Lat. *Nomentana via*. En “Quo Vadis” *Via Nomentana*. Por unuformeco mi preferis “Vojo Nomentana”.

